



ALLAN KARDEC

LA
GENEZO



LA GENEZO

**La Mirakloj kaj la Antaŭdiroj
laŭ Spiritismo**

LA GENEZO

La Mirakloj kaj la Antaŭdiroj laŭ Spiritismo

de

ALLAN KARDEC

(Aŭtoro de “La Libro de la Spiritoj”)

La Spiritisma Doktrino rezultis el la kolektiva,
interakorda instruado de la Spiritoj.

La Scienco estas vokita starigi la Genezon
laŭ la leĝoj de la Naturo.

Dio pravas sian grandecon kaj sian povon
per la neŝanĝebleco de siaj leĝoj,
ne per ties nuligo.

Por Dio, pasinteco kaj estonteco estas nuno.



FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA

(Brazila Spiritisma Federacio)

DEPARTAMENTO EDITORIAL E GRÁFICO

(Eldonfako kaj Presejo)

Rua Souza Valente, 17

BR-20941-040 Rio de Janeiro (RJ) – Brazilo

ISBN 85-7328-302-5

B.N.

1^a Eldono - 1000 ekzempleroj

Titolo de la franca originalo:

La Genèse, les Miracles et les Prédications selon le Spiritisme

(Parizo, la 6an de Januaro 1868)

41-AA; 000.1-O; 3/2003

El la franca lingvo tradukis: AFFONSO SOARES

Kovrilo de CECCONI

Copyright 2002 by

FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA

(Brazila Spiritisma Federacio)

Av. L-2 Norte - Q. 603 - Conjunto F

70830-030 - Brasília-DF - Brazilo

Ĉiuj rajtoj de reproduktado, kopiado, komunikado al la publiko kaj komerca ekspluatado de ĉi tiu verko estas ekskluzive rezervitaj al la FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA (Brazila Spiritisma Federacio). Ankaŭ estas malpermesata ĝia parta reproduktado per ia ajn formo, rimedo aŭ procedo elektrona, diĝita, per fotokopiado, mikrofilmado, Internet, KD_rom (kompakta disko), sen antaŭa kaj formala rajtigo de la Eldonejo, kiel preskribas la leĝo 9.619/98, promulgita en Brazilo, kiu reguligas la rajton de aŭtoreco kaj ties koneksajn rajtojn.

Kompostado, fotolitografio kaj ofsetpresado de

Presejo de la Eldona Fako de FEB

Rua Souza Valente, 17

20491-040 - Rio de Janeiro, RJ - Brazilo

CPNJ n-ro 33.644.857/0002-84 - I.E. n-ro 81.600.503

Retadreso: febnet@febnet.org.br

Tabelo de Enhavo

<i>Parolo de la Tradukinto</i>	11
<i>Enkonduko</i>	15

La Genezo

ĈAPITRO I – <i>Karakteroj de la spiritisma revelacio</i>	19
ĈAPITRO II – <i>Dio</i>	61
<i>Ekzisto de Dio</i>	61
<i>Pri la dia naturo</i>	64
<i>La Providenco</i>	69
<i>La vido de Dio</i>	73
ĈAPITRO III – <i>Bono kaj malbono</i>	77
<i>Origino de bono kaj malbono</i>	77
<i>Instinkto kaj intelekto</i>	83
<i>Reciproka sindetruado de la vivantaj estaĵoj</i>	89
ĈAPITRO IV – <i>Rolo de la scienco en la genezo</i>	93
ĈAPITRO V – <i>Antikvaj kaj modernaj sistemoj de la mondo</i>	103
ĈAPITRO VI – <i>Ĝenerala uranografio</i>	113
<i>Spaco kaj tempo</i>	113
<i>La materio</i>	117
<i>La leĝoj kaj la fortoj</i>	120
<i>La primara kreado</i>	123
<i>La universa kreado</i>	126
<i>La sunoj kaj la planedoj</i>	129
<i>La satelitoj</i>	131

La kometoj	134
La Lakta Vojo	136
La fiksj steloj	138
La dezertoj de la spaco	142
Eterna sinsekvo de l' mondoj	145
La universa vivo	148
Diverseco de l' mondoj	149
ĈAPITRO VII – <i>Geologia skizo de la Tero</i>	152
Geologiaj epokoj	152
Primitiva stato de la terglobo	159
Primara epoko	162
Transira epoko	163
Sekundara epoko	167
Terciara epoko	170
Diluvia epoko	175
Postdiluvia aŭ nuntempa epoko. Apero de la homo	177
ĈAPITRO VIII – <i>Teorioj pri la Tero</i>	180
Teorio de la ekĵeto	180
Teorio de la kondensiĝo	183
Teorio de la inkrustiĝo	184
Animo de la Tero	187
ĈAPITRO IX – <i>Transformiĝoj de la globo</i>	189
Ĝeneralaj aŭ partaj transformiĝoj	189
Aĝo de la montoj	190
Biblia diluvo	192
Periodaj revoluoj	193
Estontaj kataklismoj	197
Pligrandiĝo aŭ malpligrandiĝo de la volumeno de la Tero	199
ĈAPITRO X – <i>Organa genezo</i>	203
Primara formado de la vivantaj estaĵoj	203
Vivoprincipo	211
Spontana generado	213

Skalo de la organaj estaĵoj	215
La korpa homo	217
ĈAPITRO XI – <i>Spirita genezo</i>	220
Spirita principo	220
Kuniĝo de la spirita principo kun la materio	224
Hipotezo pri la origino de la homa korpo	227
Enkarniĝo de la Spirito	228
Reenkarniĝoj	237
Elmigradoj kaj enmigradoj de la Spiritoj	240
Adama raso	242
Doktrino pri la falintaj anĝeloj kaj pri la perdita paradizo	245
ĈAPITRO XII – <i>Mosea genezo</i>	251
La ses tagoj	251
La perdita paradizo	261

La mirakloj laŭ Spiritismo

ĈAPITRO XIII – <i>Karakteroj de la mirakloj</i>	275
La mirakloj en la teologia senco	275
Spiritismo ne faras miraklojn	277
Ĉu Dio faras miraklojn?	284
Tio supernatura kaj la religioj	286
ĈAPITRO XIV – <i>La fluido</i>	289
I. NATURO KAJ PROPREGOJ DE LA FLUIDOJ	
Fluidecaj elementoj	289
Formado kaj proprecoj de la perispirito	293
Agado de la Spirito sur la fluidojn; fluidecaj kreaĵoj; fotografio de la penso	297
Kvalitoj de la fluidoj	300
II. KLARIGO DE KELKAJ FENOMENOJ RIGARDATAJ KIEL SUPERNATURAJ	
Spirita aŭ psika vidado; duobla vidado; somniaĵismo; sonĝoj	305

Katalepsio. – Reviviĝoj	310
Resanigoj	312
Aperaĵoj. – Transfiguriĝoj	314
Fizikaj manifestiĝoj. – Mediumeco	318
Obsedoj kaj posedoj	322
ĈAPITRO XV – <i>La mirakloj de la Evangelio</i>	327
Supereco de la naturo de Jesuo	327
Sonĝoj	329
Stelo de l' magoj	330
Duobla vidado	330
– Eniro de Jesuo en Jerusalemon	330
– Kiso de Judas	331
– Mirakla fiŝkaptado	331
– Alvokiĝo de Petro, Andreo, Jakobo, Johano kaj Mateo	331
Resanigoj	333
– Sangelfluo	333
– La blindulo el Betsaida	334
– Paralizulo	335
– La dek lepruloj	336
– Velkinta mano	337
– La kurbiginta virino	337
– La paralizulo de la lageto	338
– Denaska blindulo	340
– Multenombraj resanigoj faritaj de Jesuo	343
– Poseditoj	345
Reviviĝoj	348
– La filino de Jairo	348
– La filo de la vidvino el Nain	349
Jesuo iras sur la akvo	351
Transfiguriĝo	352
Kvietigita ventego	353
Edziĝo en Kana	354
Multobligo de panoj	355

– La fermentaĵo de la Fariseoj	356
– La ĉiela pano	356
Tento de Jesuo	358
Miregindaĵoj okaze de la morto de Jesuo	360
Postmortaj aperoj de Jesuo	362
Malapero de la korpo de Jesuo	367

La antaŭdiroj laŭ Spiritismo

ĈAPITRO XVI – <i>Teorio de la antaŭscio</i>	371
ĈAPITRO XVII – <i>Antaŭdiroj de la Evangelio</i>	383
Neniu estas profeto en sia lando	383
Morto kaj pasiono de Jesuo	386
Persekutado al la apostoloj	387
Senpentaj urboj	388
Ruiniĝo de la Templo kaj de Jerusalemo	388
Malbeno kontraŭ la fariseoj	390
Miaj vortoj ne forpasos	381
La bazangula ŝtono	392
Parabolo de la murdintaj vinberistoj	393
Unu grego, unu paŝtisto	395
Veno de Elija	397
Anonco de la Konsolanto	398
Dua veno de la Kristo	401
Antaŭsignoj	404
Viaj filoj kaj filinoj profetos	408
Lasta juĝo	409
ĈAPITRO XVIII – <i>La tempoj estas venintaj</i>	413
Signoj de l' tempoj	413
La nova generacio	430
APENDICO: Spiritismo aŭ Spiritisma Doktrino	437

Parolo de la tradukinto

“La Genezo, la Mirakloj kaj la Antaŭdiroj laŭ Spiritismo” konstituas la lastan, laŭ kronologia ordo, el la kvin fundamentaj libroj de la spiritisma revelacio, verkitaj de ties sistemiginto Allan Kardec, pseŭdonimo de la franca pedagogo Hippolyte Léon Denizard Rivail (1804-1869). Ĝi aperis en 1868, kiam jam respektinda movado kreskadis sub lia orientado kaj la influo de la aliaj, jam tre populariĝintaj, kvar fundamentaj verkoj, nome “La Libro de la Spiritoj” (1857), “La Libro de la Mediumoj” (1861), “La Evangelio laŭ Spiritismo” (1864), “La Ĉielo kaj la Infero” (1865).

Antaŭ ol sin fordoni al sia grava misio kiel kompilinto kaj sistemiginto de la revelacioj, kiuj fontis el la nevidebla mondo, Allan Kardec jam estis akirinta honoran reputacion kiel pedagogo, kun fekundaj, oficiale agnoskitaj, kontribuoj al la plibonigo de la instruado en Francio.

Pri la enhavo de ĉi tiu verko ni povas senhezite aserti ĝian kernan aktualecon, malgraŭ la fakto, ke, pro la progreso de la sciencoj de post ĝia apero en 1868, multaj ideoj, teorioj kaj principoj en ĝi prezentitaj devis cedi lokon al novaj formuloj konstruitaj sur esploroj, observoj, sondoj teknike pli perfektaj. La aŭtoro mem, kun klarmensa antaŭvidemo, atentigas la leganton pri tio. Koncerne tamen la ekskluzivan, specifan kampon de la ankoraŭ ne agnoskita spiritisma scienco, ĉio spiras novecon, freŝecon, precipe logikecon kaj

raciecon, ĉar en “La Genezo” estas studataj la elementoj, kiuj donas konsiston al tiu nepre ekzistanta forto de la Naturo, nome la nevidebla mondo, de kiu ĉiu homo venas en la korpan mondon per la naskiĝo kaj al kiu nepre revenas per la morto, tiel longe ĝis li, per senĉesa progresado, intelekta kaj precipe morala, eniras novan fazon de evoluado ne plu necesiganta sinsekvajn reenkarniĝojn en krudmateriajn planedojn.

Kontraŭflue al la tradiciaj religiaj skoloj, Allan Kardec rekonas la rolon de la Scienco en la formulado de la vera Genezo, laŭ la leĝo de la Naturo, sen tamen radikale forĵeti la antikvajn konceptojn kaj interpretojn, ĉefe tiujn de la Biblio, kiujn li rigardas envolvitaj en la alegorio kaj kaŝantaj superbe-lajn veraĵojn. Jenaj liaj asertoj, interalie, klare difinas, ĉirilate, unu el la karakterizaj trajtoj de la spiritisma revelacio: “Se la Religio rifuzas marŝi kun la Scienco, ĉi tiu marŝos sola”, kaj “Religio, kiu, eĉ per unu punkto, ne kontraŭdirus la leĝojn de la naturo, ja neniel devus timi la progreson kaj estus do neatingebla”.

Kvankam “La Genezo” aparte fokusigas tiun trajton, aŭ aspekton, sciencon de la Spiritisma Doktrino, en ĝi tamen estas elvolvigitaj la aliaj, neapartigeblaj trajtoj, nome la filozofia kaj la morala, kiuj nature, konsekvence, elfluas el la por tiel diri “fizikaj” elementoj de la revelacio.

Kiel esperantisto-spiritisto, mi aparte ĝojas, ke la Brazila Spiritisma Federacio finplenumas, per ĉi tiu eldonaĵo, projekton, kiun ĝi iniciatis en la jaro 1946 per la aperigo de “La Libro de la Spiritoj”, nome la publikigon, en Esperanto, de la tiel nomata Spiritisma Pentateŭko, konsistanta el la kvin fundamentaj verkoj de Allan Kardec. Tutkoran dankon mi esprimas do al tiu respektiginda, pli ol centjara Institucio, en la nomo de la esperantista mondo, al kiu ĝi faras bonajn servojn ekde de la jaro 1909, kiam ĝia oficiala organo, la revuo

“Reformador”, aperigis artikolon pri la Neŭtrala Internacia Lingvo, ties movado kaj idealoj.

Mi ankaŭ aparte dankas mian karan amikon kaj majstron, la kleran lingviston, tradukiston, kompetentan esperantiston, D-ron Benedicto Silva, el la brazila urbo S. José do Rio Preto (SP), kiu bonvole kaj sinofere kontrolis la tutan tradukon, tiel ebligante, ke ĝi aperu inda je la genia kreaĵo de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof.

Rio de Janeiro (RJ), la 22-an de Majo 2002.

ENKONDUKO

AL LA UNUA ELDONO,
PUBLIKIGITA EN JANUARO 1868

Ĉi tiu nova verko estas plia paŝo sur la tereno de la sekvoj kaj aplikoj de Spiritismo. Kiel montras la titolo, ĝia celo estas studi tiujn tri objektojn ĝis nun diverse interpretatajn kaj komentariatajn: la Genezon, la miraklojn kaj la antaŭdirojn, laŭ ties rilatoj kun la novaj leĝoj rezultantaj el la observado de la spiritismaj fenomenoj.

Du elementoj, aŭ, se oni volas, du fortoj regas la Universon: la spirita elemento kaj la materia elemento. El la simultana agado de tiuj du principoj fontas specialaj fenomenoj, kiuj memkompreneble neklarigeblas se oni unu el ambaŭ abstraktas, tute same kiel neklarigeblas la formiĝo de la akvo se oni abstraktus unu el ĝiaj konsistigaj elementoj, nome hidrogeno kaj oksigeno.

Elmontrante la ekziston de la spirita mondo kaj ties rilatojn kun la materia mondo, Spiritismo liveras la ŝlosilon por sennombra amaso da fenomenoj nekomprenataj kaj, ĝuste pro tio, rigardataj kiel neakcepteblaj por certa klaso de pensuloj. Svarmas tiuj faktoj en la Sanktaj Skriboj, kaj ja pro la nekonaĉo de la leĝo, ilin reganta, la komentariantoj sur ambaŭ kampoj ne sukcesis veni al racia solvo, ĉar ĉiuj senĉese turniĝadis sur sama rondo de ideoj, unuj ignorantaj la pozitivajn atingojn de la scienco, aliaj la spiritan principon.

Tiu solvo troviĝas en la reciproka agado inter la spirito kaj la materio. Vere ĝi senigas la plimulton de tiuj faktoj je ilia supernatura karaktero. Sed kio pli valoras: ilin akcepti kiel efikojn de la natura leĝo aŭ ilin malakcepti entute? Ilia absoluta forĵeto kuntrenus la forĵeton de la bazo mem de la konstruaĵo, sed ilin akcepti en ties ĉi-supra karaktero, nur forigante iliajn akcesoraĵojn, lasas sendifekta ĝian bazon. Jen kial Spiritismo revenigas tiom multe da personoj al la kredo pri veraĵoj, kiujn ili antaŭe rigardis simple utopiaj.

Ĉi tiu verko estas do, kiel ni jam diris, ia komplemento al la aplikoj de Spiritismo el speciala vidpunkto. La materialoj jam estis pretaj, aŭ almenaŭ de longe ellaboritaj, sed ankoraŭ ne estis veninta la tempo por publikigo. Necesis unue, ke la ideoj, konsistigontaj ilian bazon, atingu la maturecon, kaj, krome, preni en kalkulon la oportunecon de la cirkonstancoj. Spiritismo enhavas nek misterojn nek sekretajn teoriojn; ĉio en ĝi devas esti malkaŝa, por ke ĉiu povu ĝin plenscie juĝi; sed ĉiu afero devas aperi ĝustatempe, por ke ĝia alveno estu sekura. Senpripensa solvo, prezentita antaŭ ol oni komplete klarigis la demandon, kaŭzus pli ĝuste regreson, ol progreson. Ĉe tiu, ĉi tie traktita, la graveco de la temo trudis al ni la devon eviti ĉian senpripenson.

Antaŭ ol eniri la temon, ŝajnis al ni necesa klare difini la respektivajn rolojn de la Spiritoj kaj de la homoj en la ellaborado de la nova doktrino. Tiuj enkondukaj konsideroj, kiuj ĝin senigas je ĉia mistika karaktero, konsistigas la objekton de la unua ĉapitro, titolita: Karakteroj de la spiritisma revelacio. Pri tiu ĉi punkto ni petas seriozan atenton, ĉar tie iasence troviĝas la nodo de la demando.

Malgraŭ la parto koncernanta la homan partoprenon en la ellaborado de tiu doktrino, ĝia iniciato tamen apartenas al la Spiritoj, sed ĝia konsisto ne rezultas el la persona opinio de iu ajn el ili. Ĝi estas, kaj ne povas ne esti, la rezultato de ilia akordanta kaj kolektiva instruado. Nur en tiu karaktero ĝi

povas esti nomata doktrino de la Spiritoj. Se ne tiel, ĝi estus nenio alia ol la doktrino de unu Spirito kaj same valorus kiel ies persona opinio.

Ĝeneraleco kaj akordo en la instruado, jen la esenca karaktero de la doktrino, la kondiĉo mem de ĝia ekzisto, el kio rezultas, ke ĉiu principo, kiu ne ricevis la konsenton de la plimulto, ne povas esti rigardata kiel konsista parto de tiu doktrino, sed ja kiel nura unuopa opinio, pri kiu Spiritismo ne povas respondi.

Ĝuste tiu kolektiva akordo en la opinio de la Spiritoj, krome pasigita tra la kriterio de la logiko, fortigas la spiritisman doktrinon kaj garantias al ĝi ĉiamdaŭrecon. Por ke ĝi ŝanĝiĝu, estus necese, ke la tutaĵo de la Spiritoj ŝanĝu sian opinion kaj ke ili unu tagon asertu la malon de tio, kion ili antaŭe diris. Kaj ĉar ĝi fontas el la instruado de la Spiritoj, estus necese, por ĝia pereco, ke la Spiritoj ĉesu ekzisti. Tio ankaŭ igos ĝin ĉiam superstari la personajn sistemojn, kiuj, diference de ĝi, ne ĉie havas radikojn.

La fidindeco de La Libro de la Spiritoj solidiĝis nur tial, ke ĝi estas la esprimo de ĝenerala, kolektiva penso. En aprilo, 1867, kompletigis ĝia unua jardeko. Intertempe, la fundamentaj principoj, kies bazojn ĝi sidigis, sinsekve kompletigis kaj elvolviĝis kiel rezulto de la progresiva instruado de la Spiritoj, sed neniu estis malkonfirmata de la scienco, ĉiuj restis stare, pli vivaj ol iam antaŭe, dum el ĉiuj kontraŭdiraj ideoj, kiujn oni provis kontraŭmeti al ĝi, neniu venkis ĝuste tial, ke ilia malo estis ĉie instruata. Ĉi tiu estas ja karakteriza rezultato, kiun ni povas proklami sen vanteco, ĉar ĝian meriton ni neniam atribuis al ni.

La samaj skrupuloj gvidis la redakton de niaj aliaj verkoj, tial ni povis ilin titoli: laŭ Spiritismo, ĉar ni estis certaj pri ilia konformeco al la ĝenerala instruado de la Spiritoj. Tiel same estis kun ĉi tiu, kiun ni povas, pro similaj kaŭzoj, prezenti kiel komplementon de la antaŭaj, escepte tamen de iuj anko-

raŭ hipotezaj teorioj, pri kiuj ni havis la zorgon ilin montri kiel tiajn, kaj kiujn oni devas rigardi personaj opinioj tiel longe ĝis ili estos konfirmitaj aŭ malkonfirmitaj, por ke ne pezu sur la doktrino la respondeco pri ili.¹

Cetere, la fidelaj legantoj de la Revue povis tie rimarki, en formo de skizoj, la plimulton de la ideoj elvolvitaj en ĉi tiu verko, same kiel ni ĝin faris rilate al la antaŭaj. La Revue ni multfoje uzas kiel provertenon, destinitan al sondado de la opinio de homoj kaj Spiritoj pri certaj principoj, antaŭ ol ni ilin akceptas kiel konsistigajn partojn de la doktrino.

¹ *Noto de la Brazila Spiritisma Federacio al sia portugallingva eldono:* La leganton do koncernas, dum la legado de ĉi tiu verko, distingi la parton prezentitan kiel komplementan al la Doktrino disde tiu, kiun la Aŭtoro mem rigardas kiel hipotezan kaj sian propran.

Noto de la Union Spirite (Belgio) al sia franclingva eldono: La sciencaj donitaĵoj en ĉi tiu verko datiĝas de 1867. La leganto eventuale devos konsideri la lastajn progresojn de la scienco.

LA GENEZO LAŬ SPIRITISMO

ĈAPITRO I

KARAKTEROJ DE LA SPIRITISMA REVELACIO

1. – Ĉu oni povas rigardi Spiritismon kiel revelacion? Se jes, kia estas ĝia karaktero? Sur kio sidas ĝia vereco? Al kiu kaj kiamaniere ĝi estis farita? Ĉu la spiritisma doktrino estas ia revelacio laŭ la teologia senco de tiu vorto, nome ĉu ĝi entute estas produkto de ia okulta instruado veninta de la supro? Ĉu ĝi estas senŝanĝa aŭ ĉu ĝi akceptas modifojn? Portante al la homoj la kompletan veron, ĉu tiu revelacio ne havus kiel efikon bari al ili la uzon de siaj kapabloj, ŝparante al ili la laboron de la esplorado? Kia povas esti la aŭtoritato de la instruado de la Spiritoj, se ili ne estas neeraremaj nek superaj al la homaro? Kian utilon havas la moralo, kiun ili predikas, se ĝi estas ne alia ol tiu, jam konata, veninta de la Kristo? Kiuajn novajn veraĵojn ili portas al ni? Ĉu la homo ja bezonas ian revelacion, kaj ĉu li ne povas trovi en si mem kaj en sia

konscienco ĉion necesan por konduki sian vivon? Tiaj estas la demandoj, sur kiuj gravas, ke ni koncentriĝu.

2. – Ni unue difinu la signifon de la vorto *revelacio*. *Revelacii*, el la latina *revelare*, kies radiko estas *velum*, vualo, laŭlitere signifas *eliri el sub la vualo*: figursence ĝi signifas malkovri, konatigi ion sekretan aŭ nekonatan. Laŭ sia plej ordinara signifo, ĝi rilatas al ĉio nesciata, kion oni diskonigas, al ĉiu nova ideo, kiu malkaŝas al ni ion, pri kio ni ne sciis.

Laŭ tiu vidpunkto, ĉiuj sciencoj, kiuj konatigas al ni la misterojn de la Naturo, estas revelacioj. Tial oni povas aserti, ke por la homoj ekzistas senĉesa revelaciado. La Astronomio revelaciis al ni la astran mondon; la Geologio, la formiĝon de la Tero; la Kemio, la leĝon de la afinecoj; la Fiziologio, la funkciojn de la organismo, ktp; Koperniko, Galileo, Neŭtono, Laplace, Lavoisier estis revelaciintoj.

3. – La esenca karaktero de ĉia revelacio nepre estas la vero. Revelacii sekreton estas konatigi fakton; se la afero estas falsa, ĝi ne estas fakto kaj sekve oni jam ne havas revelacion. Ĉia revelacio dementita de la faktoj ne plu estas revelacio, ĉefe se oni ĝin atribuas al Dio. Ĉar li ne povas mensogi nek trompiĝi, tial ĝi nepre ne povas emani el Dio: ĝi devas esti rigardata kiel produkto de homa konceptado.

4. – Kia estas la rolo de instruisto antaŭ ties lernantoj, se ne tiu de ia revelacianto? Li instruas al ili, kion ili ne scias, kion ili ne havus la tempon nek la eblon mem malkovri, ĉar la scienco estas la kolektiva verko de la jarcentoj kaj de multego da homoj, kiuj alportis, ĉiu en sia kampo, sian provizon da observoj, utilaj al siaj posteuloj. La instruado estas do, efektive, la malkaŝo de certaj veraĵoj, sciencaj aŭ moralaj, fizikaj aŭ

metafizikaj, fare de homoj ilin sciantaj al aliaj, kiuj ilin ne scias, kaj kiuj sen tio restus por ĉiam nesciantoj.

5. – Sed instruisto instruas nur tion, kion li lernis: li estas duaranga revelacianto; la genio instruas tion, kion li mem malkovris: li estas originala revelacianto, portanto de la lumo, kiu iom post iom disvastiĝas. Kio fariĝus el la homaro sen la revelaciado de tiuj genioj, kiuj aperas de tempo al tempo?

Sed kiuj estas tiuj genioj? Kial ili estas geniaj? De kie ili venas? Kio fariĝas el ili? Ni rimarku, ke ilia plimulto naskiĝas portante transcendantajn fakultojn kaj denaskajn sciojn, por kies disvolvo sufiĉas malmulte da peno. Ili efektive apartenas al la homaro, ĉar ili ja naskiĝas, vivas kaj mortas kiel ni. Kie do ili ĉerpis tiujn sciojn, kiujn ili ne povis akiri dum la vivo? Ĉu oni asertu, kun la materialistoj, ke la hazardo havigis al ili cerban materialon en pli granda kvanto kaj de pli bona kvalito? Ĉi-okaze ilia merito ne estus pli alta ol tiu de legomo pli dika kaj pli bongusta ol alia. Ĉu oni asertu, kun certaj spiritualistoj, ke Dio donis al ili animon pli dotitan ol tiu de la ordinaraj homoj? Supozo ankaŭ tute mallogika, ĉar ĝi kredigus, ke Dio estas partia. La sola racia solvo troviĝas en la antaŭekzisto de la animo kaj en la plureco de la ekzistadoj. La genio estas Spirito, kiu vivis pli longan tempon; kiu sekve akiris kaj progresis pli ol tiuj malpli evoluintaj. Enkarniĝinte, li kunportas tion, kion li scias, kaj ĉar li scias multe pli ol la ceteraj homoj kaj do ne bezonas lerni, tial li estas nomata genio. Sed kion li scias, tio ankaŭ estas frukto de antaŭa laboro, ne la rezulto de ia privilegio. Antaŭ sia naskiĝo, li do estis progresinta Spirito; li reenkarniĝas, ĉu por profitigi al aliaj sian sciadon, ĉu por pliigi siajn proprajn akirojn.

La homoj nekontesteble progresas per si mem kaj per la penado de sia inteligento; sed, forlasitaj al siaj propraj fortoj,

ili tre malrapide progresus, se ilin ne helpus pli kleraj homoj, same kiel lernanto estas helpata de instruistoj. Ĉiuj popoloj havis siajn geniojn, aperintajn en diversaj epokoj kun la celo ilin impulsi kaj forpreni el ilia inercio.

6. – Se oni rekonas la prizorgadon de Dio al siaj kreitoj, kial ne rekonu, ke Spiritoj, kapablaj pro sia energio kaj pro la supereco de sia sciado antaŭenigi la homaron, enkarniĝas laŭ la volo de Dio kun la celo helpi la progreson en difinita direkto? ke ili ricevas mision, same kiel ambasadoro ĝin ricevas de sia suvereno? Tia estas la rolo de la eminentaj genioj. Kion ili venas fari, se ne instrui la homojn pri veraĵoj, kiujn ili ne konas kaj ankoraŭ longan tempon ja ne konus, celante doni al la homoj ian apogpunkton, per kiu ili povus pli rapide altiĝi? Tiuj genioj, kiuj aperas tra la jarcentoj kiel brilaj steloj, postlasante longan luman strion super la homaro, estas misiuloj, aŭ, se oni volas, mesioj. La novaĵoj, kiujn ili instruas al la homoj, ĉu en la kampo fizika, ĉu en la kampo filozofia, estas *revelacioj*. Se Dio starigas revelaciintojn por la sciencaj veraĵoj, li povas des pli prave ilin starigi por la moralaj veraĵoj, kiuj ja estas esencaj elementoj de la progreso. Tiaj estas la filozofoj, kies ideoj trairas la jarcentojn.

7. – Laŭ la speciala senco de la religia fido, la revelacio aparte koncernas la spiritajn aferojn, kiujn la homo ne povas per si mem scii, kiujn li ne povas malkovri helpe de siaj sensoj, kaj kies konado al li estas donita de Dio aŭ de ties kurieroj, ĉu per rekta parolo, ĉu per inspirado. En ĉi tiu okazo, la revelacio estas ĉiam farita al homoj speciale dotitaj, alnomataj *profetoj* aŭ *mesioj*, tio estas, *senditoj*, *misiuloj*, portantaj la *mision* ĝin transigi al la homoj. Rigardata el ĉi tiu vidpunkto, la revelacio

implicas absolutan pasivecon, oni ĝin akceptas sen kontrolo, sen ekzameno, sen diskuto.

8. – Ĉiuj religioj havis siajn revelaciintojn, kaj kvankam ili restis malproksime de la konado de la tuta vero, ili tamen havis sian pravon de ekzisto, ĉar ili konformiĝis al la tempo kaj al la medio, en kiu ili vivis, al la aparta karaktero de la popoloj, al kiuj ili parolis kaj al kiuj ili estis relative superaj.

Malgraŭ la eraroj de siaj doktrinoj, ili ja skuis la spiritojn kaj per tio semis ĝermojn de progreso, kiuj poste disvolviĝis, aŭ ankoraŭ disvolviĝos en la brila lumo de Kristanismo.

Malprave do oni ilin anatemas en nomo de la ortodoksismo, ĉar iam venos tago, kiam tiuj kredoj, tiel diversaj laŭforme sed kiuj efektive sidas sur unu sama fundamenta principo: *Dio kaj la senmorteco de la animoj*, fandiĝos en unu grandan kaj vastan unuecon, post kiam la racio triumfos super la antaŭjuĝoj.

Bedaŭrinde la religioj estis ĉiam instrumentoj de superregado; la profeta rolo tentis la malsuperajn ambiciojn kaj oni vidis aperi multegon da ŝajnaj profetoj aŭ mesioj, kiuj, elprofitante la prestiĝon de ĉi tiu titolo, ekspluatis la kredemon profite al sia orgojlo, al sia avidemo, aŭ al sia nenifaremo, trovante pli komforta vivi koste de siaj trompitoj. La kristana religio ne povis sin ŝirmi kontraŭ tiuj parazitaj. Ĉi-rilate ni alvokas ĉies seriozan atenton al la ĉapitro XXI de *La Evangelio laŭ Spiritismo*: “Estos falsaj Kristoj kaj falsaj profetoj”.

9. – Ĉu estas senperaj revelacioj de Dio al la homoj? Tio estas demando, kiun ni ne kuraĝus solvi, nek pozitive, nek negative, en absoluta maniero. Ĝi ne estas tute neebla, sed nenio donas pri ĝi nediskuteblan pruvon. Estas tamen eksterdube, ke la Spiritoj pli proksimaj al Dio pro sia perfekteco

penetriĝas de lia penso kaj povas ĝin transsendi. Koncerne la enkarnajn revelaciintojn, ili povas, konforme al la hierarkia ordo, al kiu ili apartenas, kaj al sia sciogrado, ĉerpi siajn instruojn en sia propra scioprovizo, aŭ ilin ricevi de pli progresintaj Spiritoj, eĉ de la senperaj kurieroj de Dio, kiuj, parolante en ties nomo, estas kelkfoje prenitaj por Dio mem.

Neniel fremdas tiaspecaj komunikaĵoj al tiuj konantaj la spiritismajn fenomenojn kaj la manieron, per kiuj ekestas la rilatoj inter enkarniĝintoj kaj elkarniĝintoj. La instruoj povas esti transigataj per diversaj rimedoj: per la nura kaj simpla inspiro, per la aŭdigo de parolo, per la vidiĝo de la instruantaj Spiritoj, en vizioj kaj aperoj, ĉu en sonĝo, ĉu dum vigilo, pri kio estas multe da ekzemploj en la Biblio, en la Evangelio kaj en la sanktaj libroj de ĉiuj popoloj. Oni do nepre pravus, dirante, ke la plimulto de la revelaciintoj estas mediumoj inspirataj, aŭdivaj aŭ vidivaj. Sed el tio ne sekvas, ke ĉiuj mediumoj estas revelaciintoj kaj, des malpli, rektaj perantoj de Dio aŭ de ties kurieroj.

10. – Nur la puraj Spiritoj senpere ricevas la parolon de Dio kaj la mision ĝin transigi; sed oni nun scias, ke ne ĉiuj Spiritoj estas perfektaj kaj ke multaj prenas falsan eksterajon, kio igis Sanktan Johanon admoni: “Amataj, kredis al ĉiu spirito, sed provu la spiritojn, ĉu ili estas el Dio.” (*Unua Epistolo*, ĉap. 4^a, par. 1.)

Povas do ekzisti revelacioj seriozaj kaj veraj, kiel ankaŭ estas tiuj mensogaj kaj apokrifaj. *La esenca karaktero de la dia revelacio estas tiu de eterna vero. Ĉiu revelacio erarmakulita aŭ povanta suferi ŝanĝojn certe ne emanis el Dio.* Tiel do la leĝo de la Dekalogo havas ĉiujn karakterojn de sia origino, dum la ceteraj moseaj leĝoj, esence provizoraj, ofte nekonformaj al la Sinaja leĝo, estas persona, politika verko de la hebrea

leĝdoninto. La moroj de la popolo mildiĝis kaj tiuj leĝoj per si mem kadukiĝis, dum la Dekalogo restis stare kiel lumturo de la homaro. La Kristo faris el ĝi la bazon de sia konstruaĵo, sed la ceterajn leĝojn li nuligis. Se ili estus verko de Dio, li ilin konservus netuŝitaj. La Kristo kaj Moseo estis la du grandaj revelaciintoj, kiuj ŝanĝis la karakteron de la mondo, kaj en tio kuŝas la pruvo de ilia dia misio. Al pure homa verko ja mankus tia povo.

11. – En la nuna tempo plenumiĝas grava revelacio, kiu al ni montras la eblecon de komuniĝo kun la loĝantoj de la spirita mondo. Tio sendube tute ne estas io nova; sed ĝis nun ĝi restis kiel malviva litero, tio estas, sen ia utilo al la homaro. La nescio pri la leĝoj, regantaj tiujn rilatojn, ĝin sufokis sub la superstiĉo; la homo ne kapablis el ĝi tiri ian edifan konkludon; al nia epoko estis destinite ĝin malimpliki el ĝiaj ridindaj akcesoraĵoj, kompreni ĝian amplekson kaj el ĝi aperigi la lumon klarigontan la vojon de la estonteco.

12. – Spiritismo, konigante al ni la nevideblan mondon, kiu nin ĉirkaŭas kaj en kiu ni vivis ne suspektante ĝian ekziston; konigante la leĝojn, kiuj ĝin regas, ĝiajn rilatojn kun la videbla mondo, la naturon kaj la staton de ĝiaj loĝantoj, kaj sekve la postmortan destinion de la homo, ja estas vera revelacio laŭ la scienca senco de ĉi tiu vorto.

13. – Pro sia naturo, la spiritisma revelacio havas duoblan karakteron: ĝi samtempe havas la karakterojn de la dia kaj de la scienca revelacioj. De la unua, ĉar ĝia apero estis providenca kaj ne rezultis el homaj iniciativo kaj antaŭpensita plano; ĉar la fundamentaj principoj de la doktrino fontas el la instruado de la Spiritoj komisiitaj de Dio instrui la homojn pri

aferoj, kiujn ili ne konis, kiujn ili ne povis kompreni per si mem kaj kiujn ili nepre devas koni nuntempe, kiam ili kapabliĝis al ties kompreno. De la dua, ĉar tiu instruado ne estas privilegio de unu sola homo sed ja estas samprocede donata al ĉiuj; ĉar kiuj ĝin transigas kaj kiuj ĝin ricevas tute ne estas *pasivuloj*, sendevigitaj disde la laboro de observado kaj esplorado, pro tio, ke ili ne rezignas sian juĝon kaj sian libervolon; ĉar al ili la kontrolo ne estas malpermesita sed kontraŭe ja rekomendata; fine, ĉar la doktrino ne estis *komplete diktita, nek trudita al la blinda kredo*; ĉar ĝi estis induktita, per laboro de l' homo, el la observado de l' faktoj, kiujn la Spiritoj metas antaŭ liajn okulojn, kaj de la instruoj, kiujn la Spiritoj al li donas, kiujn instruojn li studas, komentarias, komparas, kaj el kiuj li mem tiras la konsekvencojn kaj la aplikojn. Unuvorte, *karaktizas la spiritisman revelacion ja tio, ke ĝia origino estas dia, ĝia iniciato venas de la Spiritoj kaj ĝia ellaborado estas frukto de la homa penado.*

14. – Kiel rimedo de ellaborado, Spiritismo procedas tute same kiel la pozitivaj sciencoj, nome ĝi uzas la eksperimentan metodon. Novspecaj faktoj prezentiĝas, kiujn oni ne povas klarigi per la konataj leĝoj; ĝi ilin observas, komparas, analizas kaj, paŝante returne de la efikoj al ties kaŭzoj, ĝi venas al la leĝo ilin reganta; poste ĝi deduktas iliajn sekvojn kaj serĉas iliajn utilajn aplikojn. *Ĝi starigis nenian antaŭe pretan teorion*; tiel ĝi ne prezentis kiel hipotezojn la ekziston kaj la manifestiĝon de la Spiritoj, nek la perispiriton, nek la reenkar-niĝon, nek iun ajn el la principoj de la doktrino; ĝi konkludis al la ekzisto de la Spiritoj, kiam tiu ekzisto evidente montriĝis el la observado de la faktoj; tiel same ĝi procedis rilate al aliaj principoj. Ne la faktoj postvenis por konfirmi la teorion, sed ja la teorio venis poste klarigi kaj resumi la faktojn. Estas do

rigore ĝusta la aserto, ke Spiritismo estas observoscienco, tute ne ia produkto de la imago. La sciencoj faris seriozan progreson nur post kiam iliaj studoj baziĝis sur la eksperimenta metodo; ĝis tiam oni kredis ĉi tiun aplikebla nur al la materio, dum efektive ĝi ankaŭ aplikeblas al la metafizikaj aferoj.

15. – Ni donu ekzemplon. Okazas en la spirita mondo tre kurioza fakto, kiun certe neniu iam suspektis, nome ke estas Spiritoj, kiuj rigardas sin ne mortintaj. Nu, la superaj Spiritoj, kiuj perfekte konas tiun fakton, ne venis anticipe malkaŝi: “Estas Spiritoj kredantaj, ke ili ankoraŭ vivas la surteran vivon kaj kiuj konservas siajn gustojn, kutimojn kaj instinktojn.” Ili ja okazigis la manifestiĝon de tiaj Spiritoj, ke ni mem ilin observu. Vidinte do Spiritojn necertaj pri sia stato aŭ asertantaj, ke ili ankoraŭ apartenas al ĉi tiu mondo kaj sin donas al siaj ordinaraj okupoj, oni el la ekzemploj deduktis la regulon. La multego da similaj faktoj pruvis, ke tute ne temas pri ia escepto sed ja pri unu el la fazoj de la spirita vivo; oni povis do studi ĉiujn ties variojn kaj la kaŭzojn de tiel stranga iluzio, krom ankaŭ konstati, ke tiu situacio karakterizas Spiritojn morale malpli progresintajn, estas propra al certaj specoj de morto, krom ankaŭ kelkatempa, kvankam ĝi povas tamen daŭri semajnojn, monatojn kaj jarojn. Tiel do la teorio naskiĝis el observado. La samo okazis rilate al ĉiuj ceteraj principoj de la doktrino.

16. – Kiel la objekto de la Scienco mem estas la studo de la leĝoj regantaj la materian principon, tiel la speciala objekto de Spiritismo estas la konado de la leĝoj regantaj la principon spiritan. Nu, ĉar ĉi tiu principo estas unu el la fortoj de la Naturo, kiu senĉese reagis sur la materian principon, kaj reciproke, el tio sekvas, ke la konado de unu ne povas esti

kompleta sen la konado de la dua. *Spiritismo kaj Scienco sin reciproke kompletigas*: la Scienco, sen Spiritismo, estas senpova por klarigi certajn fenomenojn ekskluzive per la leĝoj de la materio; al Spiritismo, sen la Scienco, mankus apogo kaj konfirmo. La studo pri la leĝoj de la materio devus antaŭi al tiu pri la spiritaĵoj, ĉar estas la materio, kiu la unua frapas la sensojn. Se Spiritismo estus veninta antaŭ la sciencaj malkovroj, ĝi estus abortinta kiel ĉio aperinta antaŭtempe.

17. – Ĉiuj sciencoj sin interĉenas kaj intersekvas laŭ racia ordo; ili naskiĝas, unuj de la aliaj, trovinte apogpunkton en la antaŭaj ideoj kaj scioj. La Astronomio, unu el tiuj pli frue kulturataj, konservis la frutempajn erarojn tiel longe, ĝis la Fiziko venis malkaŝi la leĝon pri la fortoj de la naturaj agantoj; la Kemio, povante nenion sen la Fiziko, devis ĝin akompani de proksime, kaj poste ambaŭ marŝis en akordo, sin reciproke apogante. La Anatomio, Fiziologio, Zoologio, Botaniko, Mineralogio iĝis seriozaj sciencoj nur kun la helpo de la lumoj alportitaj de la Fiziko kaj de la Kemio. Al la Geologio, hieraŭ naskiĝinta, sen la Astronomio, Fiziko, Kemio kaj ĉiuj ceteraj sciencoj estus mankintaj elementoj de vivipoveco; nur poste ĝi povus aperi.

18. – La moderna scienco forlasis la kvar primitivajn elementojn de la antikvuloj kaj, post sinsekvaj observoj, venis al la koncepto pri la *unusola elemento*, generanta ĉiujn transformojn de la materio; sed la materio, en si mem, estas inerta, havas nek vivon, nek penson, nek senton; ĝi bezonas ligiĝi al la spirita principo. Spiritismo ne malkovris nek elpensis tiun principon, sed ĝi la unua, per nekontestablaj pruvoj, elmontris ties ekziston; ĝin studante kaj analizante, Spiritismo evidentiĝis ĝian influon. *Al la materia elemento* ĝi aldonis la

elementon spiritan. Materia elemento kaj spirita elemento, jen la du principoj, la du vivaj fortoj de la Naturo. Per ilia nedisigebla kuniĝo oni facile klarigas multegon da faktoj ĝis nun neklarigeblaj.¹

Havante kiel objekton la studon de unu el la du elementoj konsistigantaj la Universon, Spiritismo nepre tuŝas la pli grandan parton de la sciencoj; ĝi do povus veni nur post ilia ellaboriĝo kaj ĝi naskiĝis de la forto mem de la aferoj, de la neebleco ĉion klarigi nur helpe de la leĝoj de la materio.

19. – Oni akuzas Spiritismon pri parenceco kun magio kaj sorĉarto; sed oni forgesas, ke la Astronomio havas kiel pli aĝan fraton la Astrologion, kiu ne tiel longe malproksimas de ni; ke la Kemio estas filo de la Alkemio, pri kiu kuraĝus sin okupi hodiaŭ neniu prudenta homo. Neniu tamen neas, ke la Astrologio kaj la Alkemio enhavis la ĝermon de la veraĵoj, el kiuj fontis la nuntempaj sciencoj. Malgraŭ siaj ridindaj formuloj, la Alkemio kondukis al la malkovro de la simplaj korpoj kaj de la leĝo pri la afinecoj. La Astrologio sin apogis sur la pozicio kaj la movado de la astroj, kiujn ĝi studis; sed, pro la nesciado pri la veraj leĝoj regantaj la mekanismon de la Universo, la vulgarularo rigardis la astrojn kiel misterajn estaĵojn, al kiuj la superstiĉo atribuis ian moralan influon kaj ian revelacian karakteron. Kiam Galileo, Neŭtono, Kepler konatigis tiujn leĝojn, kaj la teleskopo forŝiris la vualon kaj ĵetis en la profun-

¹ La vorto *elemento* estas ĉi tie uzata ne laŭ la senco de *korpo simpla, elementa, el primitivaj molekuloj*, sed laŭ la senco de *konsista parto de tutaĵo*. Ĉi-sence, oni povas diri, ke la *spirita elemento* aktive partoprenas en la ekonomio de la Universo, same kiel oni diras, ke la *civila elemento* kaj la *militista elemento* estas kalkulataj en la nombro de loĝantaro; ke la *religia elemento* estas entenata en la edukado; ke en Alĝerio ekzistas la *araba elemento* kaj la *eŭropa elemento*.

daĵojn de la spaco rigardon, kiun kelkaj homoj opiniis maldiskreta, tiam la planedoj montriĝis al ni kiel simplaj mondoj similaj al la nia kaj la kastelo de l' miregindo tuta disfalis.

La samo okazas kun Spiritismo rilate al la magio kaj la sorĉarto, kiuj ankaŭ sin apogis sur la manifestiĝo de la Spiritoj, kiel la Astrologio sur la movo de la astroj; sed ne sciante pri la leĝoj regantaj la spiritan mondon, ili miksis kun tiuj rilatoj ridindajn praktikojn kaj kredojn, al kiuj la moderna Spiritismo, frukto de eksperimentado kaj observado, metis finon. Efektive, la distanco apartiganta Spiritismon de magio kaj sorĉarto estas pli granda ol tiu inter Astronomio kaj Astrologio, inter Kemio kaj Alkemio; ilin konfuzi estas pruvo, ke pri ili oni scias nenion.

20. – La nura fakto, ke al la homo eblas komunikiĝi kun la estuloj de la spirita mondo, alportas plej gravajn, netakseblajn sekvojn; jen tuta nova mondo sin malkaŝas al ni, kio des pli gravas, ĉar al ĝi ĉiuj homoj senescepte revenos.

La konado de tiu fakto, ĝenerale disvastiĝante, ne povas ne estigi profundan ŝanĝon en la moroj, karakteroj, kutimoj, krom ankaŭ en la kredoj, kiuj ja forte influis la sociajn rilatojn. Temas pri tuta revolucio, ŝanĝanta la ideojn, revolucio des pli vasta, des pli potenca, ĉar ĝi ne limiĝas je unu popolo, je unu kasto, sed samtempe atingas, per la koro, ĉiujn klasojn, ĉiujn naciecojn, ĉiujn kultojn.

Prave do Spiritismo estas rigardata kiel la tria el la grandaj revelacioj. Ni vidu, per kio tiuj revelacioj diferencas inter si kaj per kio ili sin interligas, unu al la alia.

21. – Moseo, kiel profeto, revelacie konigis al la homoj la ekziston de la unusola Dio, Superega Mastro kaj Kreinto de ĉiuj ekzistaĵoj; li publike anoncis la leĝon de la Sinajo kaj starigis la fundamentojn de la vera fido; kiel homo, li estis

leĝdonanto de la popolo, per kiu tiu primitiva kredo, puriĝante, devis disvastiĝi sur la tuta Tero.

22. – La Kristo, prenante el la antikva leĝo tion, kio estas eterna kaj dia, kaj forĵetante tion, kio estis transira, pure disciplina kaj homkonceptita, aldonis la *revelacion pri la estonta vivo*, pri kiu Moseo ne parolis, krom ankaŭ tiu pri la punoj kaj rekompencoj, kiuj atendas la homon post la morto.

23. – La parto plej grava de la revelacio de la Kristo, en la senco de primara fonto, angulŝtono de lia tuta doktrino, estas la tute nova vidpunkto, laŭ kiu li prezentas Dion. Ĉi tiu jam ne plu estas la Dio terura, ĵaluzema, venĝema de Moseo; la Dio kruela kaj senkompata, kiu priverŝas la teron per homa sango, kiu ordonas la masakron kaj la ekstermadon de la popoloj, ne domaĝante virinojn, infanojn kaj maljunulojn, kaj kiu turmentas tiujn, kiuj indulgas viktimojn; jam ne plu la Dio maljusta, kiu punas tutan popolon pro la kulpo de ties estro, kiu sin venĝas kontraŭ kulpinto en la persono de senkulpulo, kiu frapas filojn pro la pekoj de ties gepatroj; sed ja la Dio superege justa kaj bona, plena de indulgemo kaj korfavoro, kiu pardonas la pentintan pekulon *kaj al ĉiu donas laŭ liaj faroj*; jam ne plu la Dio de unu sola, privilegiita popolo, *la Dio de la armeoj*, gvidanta batalojn, por subteni sian propran intereson, kontraŭ la Dio de aliaj popoloj, sed ja la komuna Patro de la homa gento, kiu etendas sian protekton al ĉiuj siaj filoj kaj ilin ĉiujn vokas al si; ne plu la Dio, kiu nur rekompencas kaj punas pro la surteraj bonaĵoj, kiu igas la gloron kaj la feliĉon konsisti en la sklavigado de la malamikaj popoloj kaj en la multobleco de lia idaro, sed ja la Dio, kiu diras al la homoj: “Via vera patrolando ne estas en ĉi tiu mondo sed en la ĉiela regno, kie la korhumilaj estos altigitaj kaj la fieraj estos humiligitaj.” Ne

plu la Dio, kiu el venĝemo faras virton kaj ordonas, ke oni repagu okulon pro okulo, denton pro dento; sed ja la Dio korfavora, kiu admonas: “Pardonu la ofendojn, se vi volas esti pardonitaj; repagu malbonon per bono; ne faru al iu, kion vi ne volus, ke li faru al vi.” Ne plu la Dio malgrandanima kaj pedanta, kiu trudas, per minaco de plej rigoraj punoj, la manieron, laŭ kiu li devas esti adorata, kiu ofendiĝas pro la malobservo de ia formulo; sed ja la Dio granda, kiu atentis la penson kaj ne sin gloras pro la formo. Fine, ne plu la Dio, kiu volas esti timata, sed la Dio, kiu volas esti amata.

24. – Ĉar Dio estas la akso de ĉiuj religiaj kredoj kaj la celo de ĉiuj kultoj, *la karaktero de ĉiuj religioj konformas al la ideo, kiun ili donas pri Dio*. La religioj, kiuj el Dio faras estaĵon venĝeman kaj kruelan, kredas lin honori per agoj de krueleco, per ŝtiparumoj kaj torturoj; tiuj, kiuj faras el Dio estaĵon partian kaj ĵaluzan, estas netoleremaj kaj rigardas lin pli aŭ malpli makulita per la homaj malfortaĵoj kaj pitanimaĵoj.

25. – La tuta doktrino de la Kristo estas bazita sur la karaktero, kiun li atribuas al Dio. Per ia Dio senpartia, superege justa, bona kaj korfavora, li povis fari el la amo de Dio kaj el la karitato al la proksimulo la nepran kondiĉon de la savo, kaj tiel admoni: *Amu Dion super ĉio kaj vian proksimulon kiel vin mem; ĉar ĉi tio estas la leĝo kaj la profetoj; ne ekzistas alia leĝo*. Sur ĉi tiu kredo li sidigis la principon de la egaleco de l’ homoj antaŭ Dio kaj tiun de la universala frateco. Sed ĉu estis eble ami la Dion de Moseo? Ne; oni povis nur timi lin.

Tiu revelacio pri la veraj atributoj de Dio, kune kun tiuj pri la senmorteco de la animo kaj pri la estonta vivo, profunde ŝanĝis la reciprokajn rilatojn inter la homoj, trudis al ili novajn devojn, igis ilin rigardi la nunan vivon el alia vidpunkto kaj

devis, ĝuste pro tio, reagi sur la morojn kaj la sociajn rilatojn. En tio nekontesteble kuŝas, pro siaj sekvoj, la ĉefa punkto de la revelacio de la Kristo, kies gravecon oni ne sufiĉe komprenis, kaj, kun bedaŭro ni asertas, tio ankaŭ estas la punkto, de kiu la homaro pli malproksimiĝis, kiun ĝi malpli konsideris en la interpreto de liaj instruoj.

26. – Sed la Kristo aldonas: “Multon el tio, kion mi parolas, vi ankoraŭ ne komprenas, kaj multon alian mi havas por diri, kion vi ne komprenus; ja pro tio mi parolas al vi per paraboloj; sed mi poste sendos al vi la *Konsolanton*, la *Spiriton de Vero*, kiu restarigos ĉiujn aferojn kaj ilin ĉiujn al vi klarigos.” (Sankta Johano, ĉap. XIV, XVI; Sankta Mateo, ĉap. XIII.)

Se la Kristo ne diris ĉion, kion li povus diri, tio estas tial, ĉar li trovis konvena lasi certajn veraĵojn en la ombro tiel longe ĝis la homoj fariĝus kapablaj ilin kompreni. Kiel li mem konfesis, lia instruado estis nekompleta, ĉar li anoncis la venon de tiu, kiu ĝin kompletigos; li do antaŭvidis, ke oni misinterpretos liajn parolojn, ke oni deflankiĝos de lia instruado; unuvorte, ke oni malfaros, kion li faris, ĉar ja ĉio devos esti restarigita; nu, oni *restarigas* nur tion, kio estis malfarita.

27. – Kial li nomas *Konsolanto* la novan mesion? Tiu signifoplena kaj nedubasenca nomo enhavas tutan revelacion. Li do antaŭvidis, ke la homoj bezonos konsolojn, kio implicas la nesufiĉecon de tiuj, kiujn ili trovas en la kredo, kiun ili estis fondontaj. Eble la Kristo neniam parolis tiel klare kaj eksplicite kiel ĉe tiuj lastaj vortoj, kiujn malmulte da personoj sufiĉe atentis, verŝajne tial ĉar oni evitis meti ilin en lumon kaj funde esplori ilian profetan sencon.

28. – Se la Kristo ne povis komplete disvolvi sian instruadon, tio estas tial, ĉar al la homoj mankis sciojn, kiujn ili povus akiri nur kun la tempo kaj sen kiuj ili ne povus ĝin kompreni; multaj aferoj ŝajnus al ili absurdaj laŭ la stato de la tiama sciado. La kompletigon de lia instruado oni do devas kompreni kiel *klarigon* kaj *disvolvon*, ne kiel aldonon de novaj veraĵoj, ĉar en ĝi ĉio troviĝas en ĝermostato; mankis nur la ŝlosilo por kompreni la sencon de liaj paroloj.

29. – Sed kiu kuraĝas permesi al si interpreti la Sanktajn Skribojn? Kiu havas tiun rajton? Kiu, krom la teologoj, posedas la necesajn lumojn? Kiu ĝin kuraĝas? Unue la Scienco, kiu neniun petas pri permeso por diskonigi la leĝojn de la Naturo kaj kiu saltas trans la erarojn kaj la antaŭjuĝojn. – Kiu havas tiun rajton? En ĉi tiu jarcento de intelekta emancipiĝo kaj libereco de konscienco, la rajto de ekzameno apartenas al ĉiuj, kaj la Skriboj ne plu estas ia sankta kesto, kiun neniu aŭdacus fingre tuŝi sen elmetiĝi al la risko esti fulmotrafita. Koncerne la necesajn, specialajn lumojn, oni ne povas nei tiujn de la teologoj, sed kiom ajn kleraj ili estis en la Mezepoko, precipe la Patroj de la Eklezio, ili tamen tiaj ne estis sufiĉe por ne kondamni, kiel herezon, la movon de la Tero kaj la kredon pri la antipoduloj; kaj oni eĉ ne bezonas iri tiel malproksimen: ĉu la nuntempaj teologoj mem ne ĵetis anatemon kontraŭ la periodoj de formiĝo de la Tero?

La homoj povis klarigi la Skribojn nur helpe de siatempa sciado, de siaj malveraj aŭ nekompletaj konoj pri la leĝoj de la Naturo, kiujn la Scienco poste malkaŝis: jen kial la teologoj mem tute bonafide miskomprenis la sencon de certaj vortoj kaj faktoj de la Evangelio. Volante ĉiakoste en ĝi trovi la konfirmon de antaŭjuĝa ideo, ili ĉiam giradis en la sama rondo, restante ĉe sia vidpunkto en tia maniero, ke ili vidis nur

tion, kion ili volis vidi. Kiom ajn kleraj estis tiuj teologoj, ili tamen ne povis kompreni kaŭzojn regatajn de leĝoj, kiujn ili ne konis.

Sed kiu juĝos pri diversaj, ofte kontraŭdiraj interpretoj, donitaj ekster la kampo de la Teologio? – La estonteco, la logiko kaj la komuna saĝo. La homoj, ĉiam pli kaj pli kleraj laŭmezure kiel novaj faktoj kaj novaj leĝoj malkaŝiĝos, scios apartigi la utopiajn sistemojn disde la realo. Nu, la Scienco konatigas certajn leĝojn; Spiritismo malkaŝas aliajn; ĉiuj estas nepre necesaj por la komprenado de la Sanktaj Skriboj de ĉiuj religioj, de Konfuceo kaj Budho ĝis la Kristanismo. Koncerne la Teologion, ĝi ne povos aŭtoritate elmontri kontraŭdirojn de la Scienco, ĉar ankaŭ ĝi ne ĉiam akordas kun si mem.

30. – Spiritismo, deirante de la instruoj mem de la Kristo, same kiel la Kristo deiris de la instruoj de Moseo, estas rekta sekvo de lia doktrino. Al la svaga ideo de la estonta vivo ĝi aldonas la revelacion pri la ekzisto de la nevidebla mondo, kiu nin ĉirkaŭas kaj plenigas la spacon, kaj per tio ĝi precizigas la kredon, al ĉi tiu donas korpon, konsiston, realecon en la penso. Ĝi difinas la ligilojn kunigantajn la animon kun la korpo kaj levas la vualon, kiu kaŝis al la homo la misterojn de la naskiĝo kaj de la morto. Dank' al Spiritismo, la homo scias, de kie li venas, kien li iras, kial li estas sur la Tero, kial li ĉi tie provizore suferas, kaj do ĉie li vidas la Dian justecon. Li scias, ke la animo senĉese progresas tra serio da sinsekvaj ekzistadoj ĝis ĝi atingos tiun gradon de perfekteco, kiu ĝin proksimigas al Dio. Li scias, ke ĉiuj animoj havas saman deirpunkton, estas kreitaj egalaj, kun sama progreso-kapablo pro ilia libervolo; ke ĉiuj estas samesencaj kaj ke ili inter si ne diferencas, krom per la farita progreso; ke ĉiuj havas la saman destinon kaj atingos

la saman celon, pli aŭ malpli rapide, laŭ sia penado kaj bonvolo.

Li scias, ke ne estas kreitaĵoj malfavoritaj, nek unuj pli favoritaj ol aliaj; ke Dio kreis neniun privilegiita kaj sendevigita je la laboro trudita al aliaj por progresi; ke ne ekzistas estaĵoj eterne destinitaj al malbono kaj sufero; ke tiuj, kiujn oni nomas *demonoj*, estas Spiritoj ankoraŭ neprogresintaj kaj neperfektaj, kiuj faras la malbonon en la spaco, kiel ankaŭ ili ĝin faris sur la Tero, sed kiuj progresos kaj perfektigos; ke la anĝeloj aŭ puraj Spiritoj ne estas estaĵoj apartaj en la kreitaro, sed Spiritoj, kiuj atingis la celon irinte sur la vojo de l' progreso; ke do ne estas multoblaj kreaĵaroj nek malsamaj kategorioj inter la inteligentaj estaĵoj, sed ja ke la tuta kreaĵaro devenas de la granda leĝo de unueco reganta la Universon, kaj ke ĉiuj estaĵoj altiriĝas al komuna celo, kiu estas la perfekteco, sen tio, ke unuj estus favoritaj koste de aliaj, ĉar ĉiuj ja estas frukto de sia propra laboro.

31. – Pro la rilatoj, kiujn li hodiaŭ povas starigi kun tiuj forlasintaj la Teron, la homo ne nur havas la materian pruvon pri la ekzisto kaj la individueco de la animo, sed li ankaŭ komprenas la solidarecon, kiu ligas inter si la ĉi-mondajn vivantojn kaj mortintojn kaj ĉi tiujn al tiuj de la ceteraj mondoj. Li konas ilian situacion en la spirita mondo; ilin sekvas en iliaj migradoj; ĉeestas iliajn ĝojojn kaj suferojn; scias, kial ili estas feliĉaj aŭ malfeliĉaj, kaj la sorton, kiu lin mem atendas laŭ la bono aŭ la malbono de li farita. Tiuj rilatoj incas lin pri la estonta vivo, kiun li povas observi en ĉiuj ties fazoj, en ĉiuj ties peripetioj; la estonteco ne plu montriĝas kiel svaga espero: ĝi estas pozitiva fakto, ia matematika certaĵo. La morto do ne plu estas io terura, ĉar por li ĝi signifas la liberigon, la pordon al la vera vivo.

32. – Per la studo de la situacio de la Spiritoj, la homo scias, ke feliĉo kaj malfeliĉo en la spirita vivo dependas de la gradoj de perfekteco kaj neperfekto; ke ĉiu suferas la rektajn, naturajn sekvojn de siaj eraroj: alivorte, ke li estas punata laŭ sia peko; ke tiuj sekvoj daŭras tiel longe kiel la kaŭzo, kiu ilin estigis; ke pro tio la kulpulo eterne suferus se li obstinus en la malbono, sed ke la sufero ĉesas pro la pento kaj la riparado; nu, ĉar de ĉiu mem dependas lia pliboniĝo, ĉiuj do povas, pro sia libervolo, plilongigi aŭ malplidaŭrigi siajn suferojn, same kiel malsanulo suferas pro siaj ekscesoĵ tiel longe ĝis li metas finon al ili.

33. – Se la racio repuŝas, kiel nekonforman al la boneco de Dio, la ideon de la nenuligeblaj punoj, eternaj kaj absolutaj, ofte truditaj pro unu sola eraro; la ideon de la inferaj turmentoj, kiujn ne povas mildigi eĉ la plej arda kaj sincera pento, ĝi, la racio, sin klinas antaŭ tiu distribua kaj senpartia justeco, kiu ĉion prenas en kalkulon, neniam fermas la pordon de pento kaj konstante etendas la manon al la ŝiprompulo, anstataŭ lin puŝi en la abismon.

34. – La plureco de la ekzistadoj, kies principon la Kristo starigis en la Evangelio, sen tamen ĝin difini, same kiel multajn aliajn, estas unu el la plej gravaj leĝoj revelaciitaj de Spiritismo, ĉar ĝiajn realecon kaj necesecon por la progreso Spiritismo pruvis. Per ĉi tiu leĝo, la homo klarigas al si ĉiujn ŝajnajn anomaliojn de la homa vivo; la soci-poziciajn diferencojn; la tro fruajn mortojn, kiuj, sen la reenkarniĝo, farus senutilaj por la animo la mallongajn ekzistadojn; la malegalecon de la intelektaj kaj moralaj kapabloj pro la maljuneco de la Spirito, kiu pli aŭ malpli lernis kaj progresis, kaj kiu, naski-

ĝinte, kunportas tion, kion li akiris en siaj antaŭaj ekzistadoj (n-ro 5).

35. – Ĉe la doktrino pri la kreado de la animo okaze de la naskiĝo, oni refalas en la sistemon de la privilegiitaj kreitaĵoj; la homoj estas fremdaj, unuj al la aliaj, nenio ilin interligas, pure karnaj estas la familio-ligiloj; ili neniel sentas sin solidaraj kun ia pasinteco, en kiu ili ne ekzistis; ĉe la doktrino pri la postmorta neekzisto, ĉiuj rilatoj malaperas, kiam la vivo ĉesas; la homoj ne sentas sin solidaraj kun la estonteco. Ĉe la reenkarniĝo, ili estas solidaraj kun la estinteco kaj la estonteco, kaj, ĉar iliaj rilatoj senĉese daŭras tiel en la spirita, kiel ankaŭ en la korpa mondo, tial la frateco havas kiel bazon la leĝojn mem de la Naturo; la bono havas ian celon, kaj la malbono, neeviteblajn sekvojn.

36. – Ĉe la reenkarniĝo, formalaperas la antaŭjuĝoj pri rasoj kaj kastoj, ĉar la sama Spirito povas renaskiĝi riĉa aŭ malriĉa, grandsinjoro aŭ proleto, mastro aŭ subulo, liberulo aŭ sklavo, viro aŭ virino. El ĉiuj argumentoj, prezentitaj kontraŭ la maljusteco de servuteco kaj sklaveco, kontraŭ la subigo de la virino al la leĝo de l' pli forta, neniu superas, per logikeco, la materian fakton de la reenkarniĝo. Se do la reenkarniĝo sidigas sur iu natura leĝo la principon de la universala frateco, sur la sama leĝo ĝi sidigas tiun pri la egaleco de la sociaj rajtoj kaj sekve tiun de la libereco.

37. – Forprenu de la homo la Spiriton liberan, sendependan, postvivantan la korpon, kaj el li vi faros ian organizitan maŝinon, havantan nek celon nek respondecon; sen alia brido krom la civila leĝo kaj *taŭgan por ekspluatado* kiel inteligenta besto. Ĉar li nenion esperas post la morto, tial

nenio detenas lin pli multigi la ĝuojn en la nuna vivo; se li suferas, li nur havas, kiel perspektivon, la malesperon, kaj kiel rifuĝejon, la nenion. Pro la certeco pri la estonteco, pri la retrovo de tiuj, kiujn li amis, kaj pro la *timo revidi tiujn, kiujn li ofendis*, ĉiuj liaj ideoj ŝanĝiĝas. Eĉ se ĝi nur forigus de la homo la dubon pri la estonta vivo, Spiritismo multe pli farus por lia morala pliboniĝo ol ĉiuj disciplinaj leĝoj, kiuj lin kelkfoje detenas sed lin ne transformas.

38. – Sen la antaŭekzistado de la animo, la doktrino de la origina peko estus ne nur nekonforma al la dia justeco, kiu respondecigus ĉiujn homojn pri la eraro de unu sola: ĝi ankaŭ estus sensencaĵo kaj des malpli pravigebla, ĉar, laŭ tiu doktrino, la animo ne ekzistis en tiu tempo, al kiu oni volas etendi ĝian respondecon. Ĉe la antaŭekzisto, la homo kunportas, *renaskiĝante*, la ĝermon de siaj neperfektaĵoj, de la malbonaj kvalitoj, de kiuj li sin ne korektis kaj kiuj manifestiĝas per la naturaj instinktoj kaj la inklinoj al tiu aŭ tiu alia malvirto. En tio ja konsistas lia vera origina peko, kies sekvojn li nature suferas, sed kun tia diferenco, ke li suferas pro siaj propraj eraroj, ne pro aliulaj; kaj kun tiu alia diferenco, samtempe konsola, kuraĝiga kaj superege justa, nome ke ĉiu ekzistado disponigas al li rimedojn por sin mem elaĉeti per la riparado kaj progresi, ĉu sin liberigante de iu neperfektaĵo, ĉu akirante novajn sciojn, kaj tiel ĝis li, sufiĉe puriĝinta, ne plu bezonos la enkorpan vivon kaj povos vivi ekskluzive la spiritan vivon, eternan kaj feliĉan.

Pro la sama kialo, tiu, kiu morale progresis, kunportas, *renaskiĝante*, naturajn kvalitojn, same kiel tiu, intelekte progresinta, kunportas denaskajn ideojn; alkonformiĝinta al la bono, li ĝin praktikas sen peno, sen kalkulo kaj, por tiel diri, sen pensi pri ĝi. Tiu, devanta kontraŭbatali siajn malbonajn

inklinojn, ankoraŭ vivas en lukto; la unua jam venkis, la dua estas survoje al la venko. Ekzistas do la *origina virto*, krom ankaŭ la *origina sciado*, same kiel la *peko*, aŭ pli ĝuste, la *malvirto origina*.

39. – La eksperimenta Spiritismo studis la proprecojn de la spiritaĵoj kaj ties efikon sur la materion. Ĝi elmontris la ekziston de la *perispirito*, suspektatan ekde la antikveco, kaj kiun Sankta Paŭlo nomis *spirita korpo*, tio estas, fluideca korpo de la animo post la pereco de la fizika korpo. Oni hodiaŭ scias, ke tiu envolaĵo estas *nedisigebla de la animo*; ke ĝi estas unu el la konsistaj elementoj de la homa estaĵo; ke ĝi estas la transigilo de la penso kaj ke, dum la korpa vivo, ĝi servas kiel ligilo inter la Spirito kaj la materio. La perispirito ludas tiel gravan rolon en la organismo kaj en granda nombro da afekcioj, ke ĝi tuŝas la fiziologion kaj la psikologion.

40. – La studo de la perispiritaĵoj proprecoj, de la spiritaĵoj kaj de la fiziologiaj atributoj de la animo malfermas novajn horizontojn al la scienco kaj havigas la ŝlosilon por granda nombro da fenomenoj ĝis nun ne komprenataj pro nekonado de la leĝo ilin reganta – fenomenoj neataj de materialismo pro tio, ke ili havas spiritecan karakteron, kaj klasataj de aliaj kredoj kiel mirakloj aŭ sorĉaĵoj. Tio estis, interalie, la fenomenoj de duobla vidado, transvidado, natura kaj nenatura somnambulismo, psikaj efikoj de katalepsio kaj letargio, antaŭsciado, antaŭsentoj, aperiaĵoj, transfigurigo, transsendo de la penso, fascino, subitaj resaniĝoj, obsedoj kaj posedoj, ktp. Elmontrante, ke tiuj fenomenoj sidas sur leĝoj naturaj, kiel ankaŭ la elektraĵoj fenomenoj, kaj en kiuj kondiĉoj ili povas ekesti, Spiritismo eldetruas la potencon de tio mirakleca kaj de tio supernatura, sekve la fonton de la plej-

parto el la superstiĉoj. Se ĝi kredigas la eblecon de certaj fenomenoj, de iuj rigardataj kiel ĥimeraj, ĝi ankaŭ kontraŭstaras la kredon je multaj aliaj, kies neeblecon kaj neraciecon ĝi elmontras.

41. – Spiritismo tute ne neas aŭ detruas la Evangelion, sed male konfirmas, eksplikas kaj disvolvas, per la novaj leĝoj de la Naturo, kiujn ĝi rivelas, ĉion, kion la Kristo diris kaj faris; ĝi klarigas la obskurajn punktojn de lia instruado en tia maniero, ke tiuj, por kiuj certaj partoj de la Evangelio estis ne kompreneblaj aŭ ŝajnis neakcepteblaj, ilin senpene komprenas kaj akceptas helpo de Spiritismo; ili pli klare vidas ĝian gravecon kaj povas distingi inter la realo kaj la alegorio; la Kristo montriĝas al ili pli granda: jam ne plu temas simple pri ia filozofo, sed ja pri Dia Mesio.

42. – Krom tio, se oni konsideras la moraligan povon de Spiritismo, pro la celo, kiun ĝi asignas al ĉiuj agoj en la vivo, kaj pro la fakto, ke ĝi faras preskaŭ palpeblaj la sekvojn de bono kaj malbono; se oni konsideras la moralan forton, la kuraĝon, la konsolojn, kiujn ĝi havigas ĉe la afliktoj pere de neŝanĝebla fido al la estonteco, per la penso, ke ĉiu havas proksimaj al si tiujn personojn, kiujn li amis, per la certeco ilin ĉiujn revidi, per la ebleco kun ili interparoli; fine per la certeco, ke ĉio, kion oni faris, kion oni akiris koncerne inteligentecon, sciadon kaj moralecon, *ĝis la lasta horo de la vivo*, neniel estas perdita, sed male estas plene profita al la progreso, oni do nepre agnoskas, ke Spiritismo plenumas ĉiujn promesojn de la Kristo koncerne la anoncitan *Konsolanton*. Nu, ĉar kiu prezidas en la granda regenera movado, tiu estas la *Spirito de Vero*, tial

la promeso pri lia veno estas tiamaniere plenumita, ĉar efektive ĝi estas la vera *Konsolanto*.¹

43. – Se al tiuj rezultatoj oni aldonas la miregindan rapidecon, kun kiu Spiritismo disvastiĝas, malgraŭ ĉio farata por ĝin pereigi, oni ne povas nei, ke ĝia alveno estas providenca, ĉar ĝi ja triumfas super ĉiuj fortoj kaj ĉia malbonvolo de l' homoj. La facileco, kun kiu granda nombro da personoj ĝin akceptas, sen trudo kaj pro la nura potenco de la ideo, pravas, ke ĝi respondas al unu bezono, nome ke la homo ion kredu por plenigi la vakuon faritan de nekredemo, kaj ke ĝi tial alvenis en la ĝusta tempo.

44. – Granda estas la nombro de la afliktitoj; ne mirindas do, ke tiom da personoj akceptas doktrinion, kiu konsolas, prefere al doktrinoj, kiuj malesperigas, ĉar Spiritismo sin turnas ja al la malfavoritoj, prefere al la ĉi-mondaj feliĉuloj.

¹ Multaj gepatroj priploras la tro fruan morton de siaj infanoj, por kies edukado ili faris grandajn oferojn, kaj ili diras al si mem, ke ĉio estis pura perdo. Sed ĉe la lumo de Spiritismo ili ne bedaŭras tiujn oferojn kaj ja pretus ilin fari, eĉ havante la certecon, ke la infanojn ili vidus morti, ĉar ili scias, ke, se ĉi tiuj ne profitis tiun edukadon en la nuna vivo, ĝi antaŭ ĉio utilis al ilia progreso kiel Spiritoj; kaj plie, ke ĝi reprezentos novan akiron por nova ekzistado kaj ke, kiam ili revenos al ĉi tiu mondo, ili disponos intelektan havaĵon, kiu faros ilin pli kapablaj por la akiro de novaj scioj. Tiaj estas tiuj infanoj, kiuj, ĉe la naskiĝo, kunportas denaskajn ideojn kaj kiuj, por tiel diri, scias sen la bezono lerni.

Se eĉ la gepatroj ne tuj havas la feliĉon vidi siajn filojn profiti tiun edukadon, ili certe ĝuos ĝin, ĉu kiel Spiritoj, ĉu kiel homoj. Eble ili denove estos gepatroj al tiuj samaj filoj, kiujn oni rigardos favore dotitaj de la Naturo sed kiuj ja ŝuldas siajn kapablojn al antaŭa edukado; tiel same, se la filoj devojiĝas al malbono pro neglektado de la gepatroj, ĉi tiuj povos poste suferi malĝojojn kaj ĉagrenojn, kiujn la filoj estigos en nova ekzistado. (*La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉap. V, n-ro 21; “Antaŭnaskiĝaj mortoj”).

Malsanulo pli ĝojas pro la alveno de kuracisto, ol tiu, kiu fartas bone; nu, la afliktitoj estas la malsanuloj, kaj la Konsolanto estas la kuracisto.

Se vi, kiuj kontraŭbatalas Spiritismon, volas, ke ni ĝin forlasu kaj vin sekvu, donu al ni multon pli, kaj des pli bonan, ol tion, kion ĝi donas; kuracu pli sekure la vundojn de la animo. Havigu pli da konsoloj, da ĝojoj al la koro, pli pravajn esperojn, pli grandajn certecojn; de la estonteco faru pli rician kaj pli allogan bildon; sed ne kredu, ke vi ĝin venkos prezentante la nenion kiel perspektivon, aŭ, kiel alternativon, la inferajn flamojn aŭ la beatecan, senutilan eterman kontemplanon.

45. – La unua revelacio estas personigita en Moseo, la dua en la Kristo, la tria en neniu individuo. La du unuaj estas individuaj, la tria estas kolektiva kaj en ĉi tio kuŝas tre grava esenca karaktero. Ĝi estas kolektiva en tiu senco, ke ĝi ne estis privilegie donita al unu persono; sekve neniu povas pretendi, ke li estas ĝia ekskluziva profeto. Ĝi estis donita samtempe sur la tuta Tero al milionoj da personoj, de ĉiuj aĝoj kaj en ĉiuj statoj, ekde tiu plej malalte ĝis tiu plej alte lokita en la skalo, konforme al ĉi tiu antaŭdiro registrita de la aŭtoro de La Agoj de la Apostoloj: “Kaj en la lasta tempo, diras Dio, Mi elverŝos Mian spiriton sur ĉiun karnon; kaj viaj filoj kaj viaj filinoj profetos, kaj viaj junuloj havos viziojn, kaj viaj maljunuloj havos sonĝojn.” (La Agoj, ĉap. II, par. 17.) Ĝi venis de neniu aparta kulto pro tio, ke ĝi iam servu al ĉiuj kiel interligilo.¹

¹ Nia persona rolo en la granda movado de ideoj, naskota de Spiritismo kaj kiu komencas ekesti, estas tiu de atenta observanto, kiu studas la faktojn por malkovri ilian kaŭzon kaj el ili tiri la sekvojn. Ni kontrolis ĉiujn, kiujn al ni eblis kolekti; ni komparis kaj komentis la instruojn donitajn de la Spiritoj en ĉiuj partoj de la mondo; ni poste metode kunordigis la tuton;

46. – Estante la rezulto de persona instruado, la du unuaj revelacioj nepre restis limitaj, tio estas, ili aperis en unu sola punkto, ĉirkaŭ kiu la ideo iom post iom disvastiĝis; sed necesis multe da jarcentoj por ke ili atingu la ekstrecojn de la mondo, kiun ili tamen ne tute invadis. La tria havas tiun apartaĵon: ne estante personigita en unu sola individuo, ĝi samtempe aperis en miloj da malsamaj punktoj, kiuj fariĝis centroj aŭ fokuso de disradiado. Pro la multobliĝo de tiuj centroj, iliaj radioj iom post iom kuniĝas, simile al la cirkloj formitaj de amaso da ŝtonoj ĵetitaj sur akvon, tiel ke, post difinita tempo, ili fine kovros la tutan supraĵon de la terĝlobo.

En tio kuŝas unu el la kaŭzoj de la rapida disvastiĝo de la doktrino. Se ĝi estus aperinta en unu sola punkto, kiel verko de unu sola homo, ĝi nepre estus forminta sektojn ĉirkaŭ li; sed tiuokaze, post paso de duona jarcento, ĝi eble ankoraŭ ne atingus la limojn de la lando, kie ĝi naskiĝis, dum ĝi nun, post dek jaroj, etendas siajn radikojn de unu poluso ĝis la alia.

47. – Ĉi tiu cirkonstanco, senprecedenta en la historio de la doktrinoj, havigas al ĝi eksterordinaran forton kaj nekontraŭstareblan agpovon; efektive, se oni ĝin premas en iu

unuvorte, ni studis kaj donis al la publiko la frukton de niaj esploroj, atribuante al nia laboro ne alian valoron ol tiun de ia filozofia verko, naskita de observado kaj eksperimentado, neniam nin poze rigardante kiel ĉefon de doktrino, nek volante trudi niajn ideojn al iu ajn persono. Ni ilin publikigis, uzante komunan rajton, kaj kiuj ilin akceptis, tiuj ĝin faris libervole. Se tiuj ideoj renkontis multenombrajn simpatiantojn, tio estas tial, ke ili havis la avantaĝon respondi al la aspiroj de multego da personoj, sed tio nin tute ne vantigas, ĉar ilia origino ne sidas en ni. Nia tuta merito kuŝas en la persisto kaj en la fordoniĝo al la afero, kiun ni alprenis. En ĉio ĉi ni faris, kion povus fari iu ajn alia anstataŭ ni, kaj pro tio ni neniam pretendis nin rigardi profeto aŭ mesio, des malpli nin prezenti kiel tian.

loko de unu lando, tute ne eblos ĝin premi ĉie en ĉiuj landoj. Kontraŭpeze al iu loko, kie ĝi renkontos barojn, troviĝos miloj da aliaj, kie ĝi florados. Cetere, se oni ĝin trafas ĉe iu indivi-
duo, oni ne povas ĝin trafi ĉe la Spiritoj, el kiuj ĝi fontas. Nu,
ĉar la Spiritoj troviĝas en ĉiuj lokoj kaj ja ĉiam ekzistos, tial, se
pro neebla hazardo oni sukcesus sufoki ĝin sur la tuta terglo-
bo, ĝi nepre post nelonge reaperus, ĉar ĝi sidas sur *fakto*
ekzistanta en la Naturo kaj ĉar la leĝojn de la Naturo oni ne
povas forigi. Jen tio, pri kio devas konvinkiĝi tiuj, kiuj revas la
ekstermon de Spiritismo (*Revue Spirite*, febr. 1865, p. 38:
Ĉiameco de Spiritismo.)

48. – Tamen, tiuj dissemitaj centroj povus ankoraŭ
longe resti izolitaj, unuj disde la aliaj, ĉar ja kelkaj aparte sidas
en foraj landoj. Mankis inter ili ia ligilo, per kiu ili starigus
komunecon de ideoj kun siaj samkredanoj, ilin informante pri
tio, kion oni faras aliloke. Tiu ligilo, kiu en la antikveco
mankus al Spiritismo, nun troviĝas en la presaĵoj, kiuj iras
ĉien, resumante unuece, koncize kaj metode, la instruadon
universale donitan sub multoblaj formoj kaj en diversaj
lingvoj.¹

49. – La du unuaj revelacioj povis esti nur la rezulto de
senpera instruado; ĉar la homoj ankoraŭ ne havis sufiĉan
progreson por kontribui al ilia ellaborado, tial ili devis sin trudi
al la fido per la aŭtoritato de la parolo de la Majstro.

Ni tamen rimarku inter ili ian bone senteblan nuancon
rilatan al la progreso de la moroj kaj ideoj, malgraŭ ke ili estis
donitaj al sama popolo en sama medio, tamen ja kun dekok-
jarcenta interspaco. La doktrino de Moseo estas absoluta,

¹ *Noto de la Brazila Spiritisma Federacio al sia portugallingva eldono:*
Tiel komprenante, la Brazila Spiritisma Federacio iniciatis la eldonadon de
spiritismaj verkoj en la internacia lingvo – Esperanto.

despota; ne permesas diskuton kaj sin trudas al la popolo per la forto. Tiu de Jesuo estas esence *konsila*; estas libervole akceptita kaj ne sin trudas krom per la persvado; ĝi estigis malkonsentojn ekde la tempo de sia fondinto, kiu ne disdegnis diskuti kun siaj kontraŭuloj.

50. – La tria revelacio, veninta en epoko de emancipiĝo kaj matureco intelektaj, kiam la jam elvolviĝinta inteligento ne akceptas ludi pasivan rolon, kiam la homo nenion blinde kredas sed ja volas vidi, kien oni lin kondukas, volas scii la kialon kaj la kielon de ĉiu afero – tiu revelacio devis esti samtempe la produkto de instruado kaj la frukto de laboro, esploro kaj libera ekzameno. *La Spiritoj instruas nur tion, kio necesas por konduki sur la vojon de vero, sed ili sin detenas malkaŝi, kion la homo povas mem trovi*, lasante al li la zorgon ne nur diskuti, kontroli kaj ĉion submeti al la provilo de la racio, sed ankaŭ ofte akiri sperton je sia propra kosto (n-ro 15).

51. – Ĉar la elementoj de la spiritisma revelacio estis samtempe donitaj en multaj lokoj al homoj de ĉiuj sociaj rangoj kaj diversaj gradoj de instruiteco, tial estas memkompreneble, ke la observoj ne povis ĉie rezultigi la samajn fruktojn; ke la tirotaj sekvoj, la indukto de la leĝoj regantaj tiun klason de fenomenoj, unuvorte la konkludo, sur kiu devis baziĝi la ideoj, povis eliri nur el la kolekto kaj interrilateco de la faktoj. Nu, ĉar ĉiu izolita centro, enfermita en malvasta rondo, en la plejmultaj okazoj vidis nenion alian krom aparta klaso de faktoj, ne malofte ŝajne kontraŭdiraj, ordinare fontantaj el unu sama kategorio de Spiritoj, kaj, cetere, malhelpataj de lokaj influoj kaj de l' partiececo, tial tiu centro statis en la materia neebleco ĉirkaŭpreni la tuton kaj, ĝuste

tial, nekapabla kunigi tiujn izolitajn observojn ĉe unu komuna principo. Se ĉiu rigardus la faktojn laŭ la vidpunkto de sia sciado kaj de siaj pasintaj kredoj, aŭ de la aparta opinio de la komunikiĝantaj Spiritoj, tre frue aperus tiom da teorioj kaj sistemoj, kiom estus la centroj, kaj neniu povus esti kompleta pro manko de elementoj por komparo kaj kontrolo. Unuvorte, ĉiu kristaliĝus en sia parta revelacio, kredante, ke ĝi posedas la tutan veron, kaj ne sciante, ke en cent aliaj lokoj oni pli multon aŭ pli bonan ricevis.

52. – Krom tio, rimarkindas, ke nenie la spiritisma instruado estis komplete donita; ĝi rilatas al tiel granda nombro da observoj, al tiel malsamaj temoj, postulantaj specialajn konojn kaj mediumajn kapablecojn, ke estis neebla la kolektiĝo, en unu sola punkto, de ĉiuj necesaj kondiĉoj. Ĉar la instruado devis esti ne individua sed kolektiva, la Spiritoj dividis la laboron, dissemante la temojn por studado kaj observado, same kiel en iuj fabrikoj la farado de ĉiu parto de unu sama objekto estas komisiata al diversaj laboristoj.

Tiel la revelacio estis parte donita, en diversaj lokoj, de granda nombro da perantoj, kaj same tiel ĝi ankoraŭ nun okazas, ĉar ne ĉio estas revelaciita. Ĉiu centro trovas, en la aliaj centroj, la komplementon de tio, kion ĝi ricevas, kaj ja estis la kolekto, la kunordigo de ĉiuj partaj instruoj, kio konsistigis la *spiritisman doktrinon*.

Estis do necese grupigi la dissematajn faktojn por vidi ilian interrilatecon, kunmeti la diversajn dokumentojn, la instruojn donitajn de la Spiritoj pri ĉiuj punktoj kaj pri ĉiuj temoj, por ilin kompari, analizi, kaj studi iliajn analogiojn kaj diferencojn. Ĉar la komunikaĵojn donis Spiritoj de ĉiuj klasoj, pli aŭ malpli kleraj, estis necese taksi la gradon de konfido, kiun la racio permesis konsenti al ili, distingi la sistemajn

ideojn, individuajn kaj apartajn, disde tiuj sankciitaj de la ĝenerala instruado, la utopiojn disde la praktikaj ideoj; elimini tiujn malkonfirmitajn de la donitaĵoj de la pozitiva scienco kaj de la logiko, krom ankaŭ utiligi la erarojn, la informojn liveritajn de la Spiritoj, eĉ de tiuj plej malaltrangaj, por la konado de la stato de la nevidebla mondo kaj per tio formi homogenan tutaĵon.

Necesis, unuvorte, ia centro de ellaborado, sendependa de ĉia antaŭe preta ideo, de ĉia sekta antaŭjuĝo, *celanta nepre akcepti la evidentiĝintan veron, eĉ se kontraŭan al personaj opinioj*. Tiu ĉi centro formiĝis per si mem, per la forto de la aferoj kaj sen antaŭe preta decido.¹

¹ *La Libro de la Spiritoj*, la verko, kiu unua igis Spiritismon eniri la filozofian vojon, induktante el la faktoj ties moralajn sekvojn; kiu pritraktis ĉiujn partojn de la doktrino, tuŝante la plej gravajn demandojn de ĝi proponatajn, estis, ekde sia apero, la punkto, al kiu spontanee konverĝis la individuaj laboroj. Estas al ĉiuj konate, ke de la publikigo de tiu libro datiĝas la erao de la filozofia Spiritismo, kiu ĝis nun restis en la limoj de la kuriozaj eksperimentoj. Tiu libro konkeris la simpation de la plejmulto ja tial, ke ĝi esprimis la sentojn de tiu plejmulto, respondis al ties aspiroj, krom ankaŭ tial, ke ĉiu en ĝi trovis la konfirmon kaj la racian klarigon pri tio, kion ĉiu private ricevis. Se ĝi malakordus kun la ĝenerala instruado de la Spiritoj, ĝi falintus en nefidindecon kaj en forgeson. Nu, kio estis tiu punkto de konverĝo? certe ne la homo, kiu per si mem neniom valoras, kiu mortas kaj malaperas; sed ja la ideo, kiu ne pereas se ĝi emanis el fonto supera al la homo.

Tiu spontanea koncentriĝo de disigitaj fortoj estigis vastegan korespondadon, unikan monumenton en la mondo, vivantan bildon de la vera historio de la moderna Spiritismo, kie samtempe reflektiĝas la partaj laboroj, la multoblaj sentoj naskitaj de la doktrino, la moralaj rezultatoj, la sindediĉoj, la senfortiĝoj; altvaloraj arkivoj por la posteularo, kiu povos juĝi homojn kaj aferojn surbaze de aŭtentikaj dokumentoj. Ĉe tiaj nekontesteblaj atestoj, kio fariĝos, kun la tempo, el ĉiuj falsaj asertoj, el ĉiuj misfamoj de la envio kaj de la ĵaluzo?...

53. – El tiu stato de la aferoj rezultis duobla fluo da ideoj: unuj irantaj de la ekstretoj al la centro; aliaj, de la centro al la cirklo. Tiel la doktrino rapide atingis la unuecon, malgraŭ la diverseco de la fontoj, el kiuj ĝi eliĝis; la neakordantaj sistemoj iom post iom falis, pro sia izoliteco, antaŭ la aŭtoritato de la opinio de l' plimulto, ĉe kiu ili ne renkontis simpatian. De tiam stariĝis ia komuneco de ideoj inter la diversaj partiaj centroj; parolante la saman spiritan lingvon, ili interkompreniĝas kaj sin reciproke simpatias de unu ekstremo de la mondo ĝis la alia.

La spiritistoj pro tio sentis sin pli fortaj, pli kuraĝe luktis, marŝis pli firme, ĉar ili vidis sin ne plu izolitaj, eksentis, ke ia apogpunkto, ia ligilo ilin altenas al la granda familio; la fenomenoj, kiujn ili ĉeestis, ne plu ŝajnis al ili strangaj, nenormalaj, kontraŭdiraj, kiam ili povis rilatigi ilin al ĝeneralaj leĝoj, ĉirkaŭpreni per unu rigardo la konstruaĵon kaj vidi en la tuto grandiozan, homaman celon.¹

¹ Signifoplena atesto, tiel rimarkinda kiel kortuŝa, pri la komuneco de ideoj, kiu ekestis ĉe la spiritistoj pro la akordo inter iliaj kredoj, estas la petoj pri preĝoj, venantaj al ni de la plej foraj landoj, de Peruo ĝis la ekstretoj de Azio, kiujn adresas personoj de diversaj naciecoj kaj religioj kaj kiuj al ni estas tute nekonataj. Ĉu tio ne estas ia preludo al la prepariĝanta granda unuiĝo? La pruvo, ke Spiritismo ĉie etendas fortajn radikojn?

Ankaŭ notindas, ke el ĉiuj grupoj, kiuj estis fonditaj kun la antaŭe preta decido krei skismojn, proklamante malkonsentajn principojn, aŭ kiuj, pro memamaj aŭ alispecaj motivoj kaj por ne ŝajni, ke ili sin submetas al la komuna leĝo, rigardis sin sufiĉe fortaj por iri unuope, sufiĉe sciaj por malbezoni konsilojn, – neniu sukcesis estigi ideon, kiu estus influa kaj efektivebla; ĉiuj estingiĝis aŭ vegetis en ombro. Kiel povus okazi alie, se, anstataŭ klopodi por havigi pli grandan kvanton da bonoj, ili, por sin mem altigi, forpuŝadis principojn de la doktrino, ĝuste tion, kio en ĝi estas pli forte alloga, pli konsola, pli kuraĝiga kaj pli racia. Se ili estus komprenintaj la potencon de la moralaj elementoj, kiuj formis ĝian unuecon, ili ne lasus sin luli de ia kimerila iluzio. Sed, prenante por la Universo sian malvastan rondon, ili vidis en la

Sed kiel scii, ĉu iu principo estas ĉie instruata, aŭ ĉu ĝi nur esprimas personan opinion? Ĉar la memstaraj grupoj ne troviĝis en favoraj kondiĉoj por scii, kion oni diras aliloke, ja necesis, ke ia centro kolektu ĉiujn instruojn por fari iaspecan voĉkontrolon kaj al ĉiuj transsendi la opinion de la plimulto.¹

54. – Ekzistas neniu scienco, kiu estus elirinta kompleta el la cerbo de unu homo; ĉiuj senescepte rezultas el sinsekvaj observoj, sin apogantaj sur antaŭaj observoj, kiel sur konata punkto, por atingi tion nekonatan. Ja tiel agis la Spiritoj rilate al Spiritismo; tiakauze ilia instruado estas laŭgrada; ili pritraktas la demandojn nur post kiam la principoj, sur kiuj ili devas sidi, sufiĉe ellaboriĝis kaj jam tre maturiĝis la juĝo por ilin asimili. Eĉ rimarkindas, ke ĉiufoje kiam la apartaj centroj volis pritrakti antaŭtempajn demandojn, ili ricevis nenion alian krom kontraŭdiraj, neniel konkludigaj respondoj. Kiam, male, estas alveninta la oportuna momento, la instruo ĝeneraliga kaj fariĝas unueca ĉe preskaŭ ĉiuj centroj.

Ekzistas tamen inter la irado de Spiritismo kaj tiu de la sciencoj ia esenca diferenco, nome ke ĉi tiuj atingis sian celpunkton nur post longaj tempofluoj, dum al Spiritismo

adeptaro nenion alian ol ian koterion facile renverseblan por alia koterio. Tio estis kurioza trompiĝo pri la esencaj karakteroj de la doktrino, kaj tia eraro ne povis ne kuntreni elreviĝojn; anstataŭ la unuecon, ili ja rompis la solan ligilon, kiu povus al ili certigi forton kaj vivon. (Vidu *Revue Spirite*, aprilo, 1866, paĝoj 106 kaj 111: “Spiritismo sen Spiritoj; sendependa Spiritismo”.)

¹ Ĝuste tion celas niaj publikigaĵoj, kiuj povas esti rigardataj kiel la rezultato de tiu kontrolo. En ili ĉiuj opinioj estas pridiskutataj, sed la demandoj estas prezentataj kiel principoj nur post kiam ili ricevis la aprobon de ĉiuj kontroloj, kiuj solaj povas doni al ili leĝoforton kaj permesi asertojn. Jen kial ni ne senpripense diskonigas iun teorion, kaj ĝuste en tio kuŝas la fakto, ke nia doktrino, rezultanta el la ĝenerala instruado, ne estas la produkto de antaŭe preta sistemo; tio ankaŭ havigas al ĝi forton kaj garantias ĝian estontecon.

sufiĉis kelke da jaroj, se ne por atingi la kulminan punkton, almenaŭ por rikolti tre grandan kolekton da observoj kaj per ili formi iun doktrinion. Tio estas ŝuldata al la sennombra amaso da Spiritoj, kiuj, laŭ la volo de Dio, samtempe manifestiĝis kaj kunportis, ĉiu el ili, sian provizon da scioj. El tio rezultis, ke ĉiuj partoj de la doktrino, anstataŭ ellaboriĝi sinsekve dum longaj jaroj, tion atingis preskaŭ samtempe, en nur kelke da jaroj, kaj ke estis sufiĉe tiujn partojn kunigi, por ke el ili formiĝu unu tutaĵo.

Dio volis, ke tiel estu, unue por ke la konstruaĵo pli rapide venu al sia kulmino; due por ke oni povu, per komparado, fari kontrolon por tiel diri tujan kaj konstantan pri la universaleco de la instruado, laŭ kiu universaleco ĉiu parto havus valoron kaj aŭtoritaton nur per sia konekseco kun la tuto kaj ĉiuj devus harmonii inter si, trovi sian konvenan lokon kaj alveni en la oportuna momento.

Ne komisiante al unu sola Spirito la taskon diskonigi la doktrinion, Dio cetere volis, ke tiel la malplej eminentaj kiel ankaŭ la plej eminentaj inter la Spiritoj kaj la homoj alportu sian ŝtonon al la konstruaĵo, por ke inter ili ekestu ligilo de kunlabora solidareco, kio mankis al ĉiuj doktrinoj eliĝintaj el unu sola fonto.

Aliflanke, ĉar ĉiu Spirito, same kiel ĉiu homo, disponis nur limitan kapitalon da scioj, ili individue ne kapablis pritrakti *ex professo*¹ la sennombrajn demandojn, kiujn Spiritismo ampleksas.

En tio ankaŭ kuŝas la kaŭzo, kial la doktrino, por plenumi la planojn de la Kreinto, ne povus esti verko de unu

¹ Latinaĵo: *Funde konante la demandon.*

sola Spirito, nek de unu sola mediumo; ĝi nepre devus eliĝi el la kolektiveco de la laboroj, kontrolitaj unuj de la aliaj.¹

55. – Plia kaj lasta karaktero de la spiritisma revelacio, rezultanta el la kondiĉoj mem, en kiuj ĝi fariĝas, estas ke, sin apogante sur faktoj, ĝi estas, kaj ne povas ne esti, esence progresiva kiel ĉiuj observosciencoj. Pro sia esenco, ĝi faras interligon kun la scienco, kiu, estante la elmontrado de certa klaso de faktoj, ne povas kontraŭstari la volon de Dio, aŭtoro de tiuj leĝoj. *La malkovroj de la scienco gloras Dion, tute ne Lin malaltigas; ili detruas nur tion, kion la homoj konstruis sur la falsaj ideoj, kiujn ili faris al si pri Dio.*

Spiritismo do starigas kiel absolutan principon nur tion, kio estas evidente demonstrita, aŭ tion, kio logike elfluas el la observado. Tuŝante ĉiujn branĉojn de la socia ekonomio, al kiuj ĝi donas la apogon de siaj propraj malkovroj, ĝi ĉiam asimilos ĉiujn progresivajn sciencojn, al kiu ajn klaso ili apartenas, atingintajn la staton de *praktikaj veraĵoj* kaj forlasintajn la regionon de l' utopio, sen kio ĝi sin mortigus; ĉesante esti, kio ĝi estas, ĝi malkonfesus sian originon kaj sian providencan celon. *Marŝante kune kun la progreso, Spiritismo neniam estos superita, ĉar, se novaj malkovroj elmontras, ke ĝi eraras pri iu punkto, ĝi ŝanĝiĝos ĉe tiu punkto; se riveliĝos nova veraĵo, ĝi tiun ĉi akceptos.*

¹ Vidu en *La Evangelio laŭ Spiritismo*, “Enkonduko”, n-ro II, kaj *Revue Spirite*, aprilo, 1864, p. 99: “Aŭtoritateco de la spiritisma doktrino; universala kontrolo de la instruado de la Spiritoj”.

² Ĉe tiel klaraj kaj tiel kategoriaj asertoj, kiaj tiuj entenataj en ĉi tiu ĉapitro, terenfalas ĉiuj akuzoj pri tendencoj al absolutismo kaj al aŭtokrateco de principoj, aŭ pri asimiloj, kiujn antaŭjuĝaj aŭ misinformitaj personoj atribuas al la doktrino. Cetere, tiuj asertoj ne estas novaj; ni ilin tre ofte ripetis en niaj skriboj, por lasi pri tio nenian dubon. Krome, ili atentigas pri la vera

56. – Kiel utilas la morala doktrino de la Spiritoj, se ĝi estas la sama kiel tiu de la Kristo? Ĉu la homo ja bezonas ian revelacion? Ĉu li ne povas trovi en si mem ĉion, kio al li estas necesa, por ke li sin gvidu?

El la morala vidpunkto, estas eksterdube, ke Dio donis al la homo, kiel gvidilon, la konsciencon, kiu lin admonas: “Ne faru al la homoj, kion vi ne volas, ke ili faru al vi.” La natura moralo certe estas enskribita en la koro de l’ homoj, sed ĉu ĉiuj scias ĝin legi en tiu libro? Ĉu oni neniam malŝatis ĝiajn saĝajn preskribojn? Kion oni faris el la moralo de la Kristo? Kiel ĝin praktikas tiuj mem, kiuj ĝin instruas? Ĉu ĝi ne fariĝis senvaloraĵo, ia bela teorio, sekvena por la aliaj sed ne por ili? Ĉu vi riproĉos patron, ke li dekfoje, centfoje rediras la samajn instruojn al siaj filoj, kiuj ilin ne sekvas? Kiel Dio agus malpli bone ol patro de familio? Kial Li ne sendus, de tempo al tempo, specialajn kurierojn al la homoj kun la komisiono ilin realvoki al iliaj devoj kaj rekonduki ilin sur la bonan vojon, kiam de ĝi ili deflankiĝas? malfermi la okulojn de la inteligento al tiuj, kiuj ilin tenas fermitaj, tiel same kiel la pli progresintaj homoj sendas misiistojn inter sovaĝulojn kaj barbarojn?

La Spiritoj instruas la moralon de la Kristo ja tial, ke ne ekzistas alia pli bona. Sed por kio do utilas ilia instruado, se ili nur ripetas, kion ni scias? La samon oni povus diri pri la moralo de la Kristo, kiun kvincent jarojn antaŭ li estis instruata de Sokrato kaj Platono per preskaŭ identaj vortoj; ankaŭ pri ĉiuj moralistoj, kiuj ripetas la samajn aferojn ĉiatone kaj ĉiaforme. Nu bone! La Spiritoj venas simple kaj nure pligrandigi la nombron de la moralistoj, sed kun la diferenco, ke, komunikiĝante ĉialoke, ili sin aŭdigas kiel en palaco, tiel ankaŭ en kabano, kiel al kleruloj, tiel ankaŭ al sensciuloj.

rolo, kiu nin koncernas, la sola, kiun ni aspiras, nome tiu de nura laboristo.

Kion la instruado de la Spiritoj aldonas al la moralo de la Kristo, tio estas la konado de la principoj regantaj la rilatojn inter mortintoj kaj vivantoj, kiuj principoj kompletigas la svagajn instruojn, kiujn li havigis pri la animo, pri ties pasinteco kaj estonteco, kaj kiuj al ilia doktrino donas, kiel sankcion, la leĝojn mem de la Naturo. Helpe de la novaj lumoj alportitaj de Spiritismo kaj de la Spiritoj, la homo komprenas la solidarecon interligantan ĉiujn estaĵojn; karitato kaj frateco montriĝas kiel socia bezono; li faras pro konvinkiteco, kion li faris nur pro devo, kaj ĝin faras pli bone.

Nur kiam ili praktikos la moralon de la Kristo, la homoj povos aserti, ke ili ne plu bezonas moralistojn, enkarniĝintajn aŭ elkarniĝintajn. Sed tiam, Dio ne plu ilin sendos.

57. – Unu el la plej gravaj demandoj, el tiuj prezentitaj en la komenco de ĉi tiu ĉapitro, estas jena: kian aŭtoritaton havas la spiritisma revelacio, konsiderante, ke ĝi fontas el estaĵoj, kies lumoj estas limitaj kaj kiuj ne estas neeraremaj?

La objeto estus grava, se tiu revelacio konsistus nur el la instruoj de la Spiritoj, se ni devus ĝin ricevi ekskluzive de ili, ĝin akcepti kun fermitaj okuloj; sed tiu objeto senvaloriĝas, se nur la homo al ĝi donas la kunhelpon de sia inteligento kaj de sia ekzameno; se la Spiritoj limigas sin meti lin sur la vojon al la induktoj, kiujn li povas tiri el la observado de la faktoj. Nu, la manifestiĝoj kaj iliaj sennombraj varioj ja estas faktoj, kiujn la homo studas por el ili indukti la koncernan leĝon, kaj en tiu laboro lin helpas ĉiuklasaj Spiritoj, kiuj estas pli ĝuste *kunlaborantoj* ol *revelaciantoj*, laŭ la komunuza signifo de ĉi tiu vorto. Li submetas iliajn dirojn al la kontrolo de la logiko kaj de la komuna saĝo: ĉi-maniere li profitas, sen rezigni la propran racion, el la specialaj scioj, kiujn la Spiritoj posedas dank' al sia pozicio. Ĉar la Spiritoj estas nenio alia, ol la animoj de la

homoj, ni, komunikiĝante kun ili, *ne troviĝas ekster la kadro de la homaro*, kio estas grava, konsiderinda cirkonstanco. La geniaj homoj, kiuj estis lumiloj por la homaro, do venis el la mondo de la Spiritoj kaj tien revenis, forlasinte la Teron. Se do la Spiritoj povas komunikiĝi kun la homoj, tiuj genioj povas ilin instruadi sub spirita formo, same kiel ili faris sub la korpa formo. Ili povas ilin instrui postmorte, tute same kiel ili faris dumvive; la sola diferenco kuŝas en tio, ke ili nun, anstataŭ videblaj, estas nevideblaj. Iliaj sperto kaj sciado ne devas esti malpli grandaj ol antaŭe, kaj se ilia parolo, kiel homoj, estis aŭtoritata, ĝi nun ne povas esti malpli nur pro tio, ke ili troviĝas en la mondo de la Spiritoj.

58. – Ja manifestiĝas ĉiaklasaj Spiritoj, ne nur la superaj, kaj tio estis necesa por inici nin pri la vera karaktero de la spirita mondo, montrante ĉiujn ĝiajn aspektojn. Dank' al tio, la rilatoj inter la videbla kaj la nevidebla mondoj estas pli intimaj kaj pli evidenta ilia interligiteco; ni pli klare vidas, de kie ni venas kaj kien ni iros: tia estas la esenca celo de tiuj manifestiĝoj. Ĉiuj Spiritoj do, kiun ajn progreso-gradon ili atingis, ja ion instruas al ni; sed ĉar ili estas pli aŭ malpli kleraj, tial koncernas nin distingi, en ilia parolo, inter tio bona kaj tio malbona kaj kiel eble profiti el ilia instruado. Nu, ĉiuj, kiaj ajn ili estas, povas nin instrui aŭ al ni riveli aferojn, kiujn ni ne konas kaj pri kies ekzisto ni, sen ili, neniam ekscius.

59. – La eminentaj enkarniĝintaj Spiritoj nekontesteble estas potencaj individuoj sed kies agado efikas malvastlime kaj tre lante disetendiĝas. Eĉ se unu sola el ili, ĉu Elija aŭ Moseo, Sokrato aŭ Platono, venus nuntempe malkaŝi al la homoj la staton de la spirita mondo, – kiu ja pruvus la verecon de iliaj asertoj en niaj tempoj de skeptikeco? Ĉu oni lin ne rigardus

kiel revemulon aŭ utopiiston? Kaj eĉ se li dirus la absolutan veron, jarcentoj devus flui antaŭ ol la homamasoj agnoskus liajn ideojn. Dio, laŭ sia saĝeco, ne volis, ke tiel okazu; li volis, ke la instruadon havigu la *Spiritoj mem*, ne la enkarnuloj, por ke ĉi tiuj konvinkiĝu pri ilia ekzisto; Dio ankaŭ volis, ke tio samtempe okazu sur la tuta Tero, ĉu por ke la instruado pli rapide disvastiĝu, ĉu por ke oni vidu en tiu koincideco de la instruado unu pruvon de la vero, kaj tiel ĉiu havu la rimedon por sin mem konvinki.

60. – La Spiritoj venas ne por liberigi la homon el la studoj kaj esploroj, nek por alporti al li iun tute pretan sciencon; koncerne tion, kion li mem povas trovi, ili lasas lin al liaj propraj fortoj, kion la spiritistoj nun tre bone scias. De antaŭ longe la sperto demonstris la eraron de la opinio, ke la Spiritoj havus la tutan saĝon, la tutan scion, kaj ke sufiĉus sin turni al la unue veninta Spirito por ekscii ĉiujn aferojn. Eliĝintaj el la homaro, la Spiritoj estas unu el ties partoj; same kiel sur la Tero, inter li ankaŭ ekzistas tiuj superaj kaj tiuj vulgarej, kaj sekve multaj, kiuj filozofie kaj science scias malpli ol certaj homoj; la Spiritoj diras, kion ili scias, nek pli, nek malpli; same kiel inter la homoj, la pli progresintaj kapablas nin instrui pri pli da aferoj, esprimi al ni pli saĝajn opiniojn, ol kiel povas la malpli progresintaj. *Peti konsilojn al la Spiritoj ne signifas sin turni al supernaturaj potencoj, sed ja interrilati kun egaluloj, kun tiuj mem, al kiuj oni sin turnus en ĉi tiu mondo, nome al siaj parencoj, al siaj amikoj, aŭ al personoj pli kleraj ol li.* Pri tio do gravas, ke oni konvinkiĝu, kaj tion ne scias tiuj, kiuj, ne studinte Spiritismon, faras al si ideon tute falsan pri la naturo de l' mondo de la Spiritoj kaj pri la transtombaj interrilatoj.

61. – Kian utilon do havas tiuj manifestiĝoj, aŭ, se vi volas, tiu revelacio, se la Spiritoj ne scias pli ol ni aŭ se ili ne diras al ni ĉion, kion ili scias?

Unue, kiel ni diris, ĉar ili sin detenas havigi al ni, kion ni povas akiri per laboro; due, ĉar estas aferoj, kies malkaŝo ne estas al ili permesata pro tio, ke ilin ne eltenus nia progreso-grado. Sed, flanklase de tio, la kondiĉoj de ilia nova vivo vastigas la limojn de ilia perceptado; ili vidas, kion ili ne vidis sur la Tero; liberaj el la materiaj baroj, el la zorgoj de la korpa vivo, ili juĝas la aferojn de pli alta, kaj do pli saĝa, vidpunkto; ilia sagaceco ampleksas pli vastan horizonton; ili komprenas siajn erarojn, reĝustigas siajn ideojn kaj liberiĝas de la homaj antaŭjuĝoj.

En tio konsistas la supereco de la Spiritoj antaŭ la korpa homaro, kaj ja pro tio iliaj konsiloj povas esti, laŭ ilia grado de progreso, pli saĝaj kaj pli neprofitamaj ol tiuj de la enkarnuloj. Cetere, la medio, en kiu ili sin trovas, permesas al ili inici nin pri aferoj rilataj al la estonta vivo, kiujn ni ne konas kaj kiujn ni ne povas malkovri en nia medio. Ĝis nun, la homo nur elpensis hipotezojn pri sia estonteco; kaj en tio kuŝis la kaŭzo, kial liaj koncernaj kredoj dividiĝis en tiel multenombrajn kaj inter si malakordajn sistemojn, ekde la neniismo ĝis la fantastaj konceptoj pri la infero kaj la paradizo. Hodiaŭ estas ĝuste la vidatestantoj, la rolantoj mem sur la transtomba scenejo, kiuj al ni venas diri tion, kio ĝi ja estas, kaj *nur ili povus tion fari*. Tiuj manifestiĝoj do servis por al ni konatigi la nevideblan mondon, kiu nin ĉirkaŭas kaj pri kiu ni ne suspektis; kaj tiu sola scio estus esence grava, eĉ se la Spiritoj povus nenion pli instrui al ni.

Ironte al nekonata lando, ĉu vi rifuzus la informojn de la plej humila kampulo, kiun vi renkontus? Ĉu vi ne demandus lin pri la stato de la vojo nur pro tio, ke li estas nura kampulo?

Vi certe ne esperos ricevi de li vastampleksajn klarigojn, sed laŭ tio, kiel li stas en sia rondo, li povos, pri certaj punktoj, informi al vi pli bone ol sciencisto, kiu ne konus tiun landon. Vi tiros el liaj indikoj konkludojn, kiujn li mem ne kapablus tiri, sen ke tio senigus lin je la karaktero de instrumento utila al viaj observoj, kvankam li nur servis por konatigi al vi la kutimojn de la kampuloj. Same okazas koncerne la rilatojn kun la Spiritoj, el kiuj la plej malgranda povas utili, instruante nin pri iu ajn afero.

62. – Vulgara komparo igos nin ankoraŭ pli bone kompreni la aferon.

Ŝipo plena de migruloj forveturas al malproksima loko, transportante ĉioklasajn homojn, parencajn al tiuj, kiuj restas surtere. Tiam oni ekscias, ke la ŝipo dronis, lasis nenian postesignon, kaj pri ĝia sorto alvenas nenia sciigo. Oni pensas, ke la vojaĝantoj pereis, kaj funebro regas iliajn familiojn. Sed la tuta ŝipanaro, escepte de eĉ ne unu sola homo, atingis la bordon de nekonata lando, riĉega kaj grasa, kie ĉiuj ekvivas feliĉaj sub malavara ĉielo. Sed tion neniu scias. Nu, unu tagon alia ŝipo alboridiĝas al tiu lando kaj tie trovas la dronintojn sanaj kaj sekuraj. La ĝojiga novaĵo disvastiĝas kun fulma rapideco. Ĉiuj ekkrias: “Niaj amikoj ne estas perditaj!”, kaj ili eldiras dankon al Dio. Ili ne povas intervidiĝi, sed ili korespondas inter si, interŝanĝas reciprokajn elmontojn de amikeco, kaj tiel ĝojo anstataŭe sekvas malĝojon.

Tia estas la bildo de la vivo surtera kaj de la transtomba vivo, antaŭ kaj post la moderna revelacio; ĉi tiu lasta, simile al la dua ŝipo, portas al ni la bonan novaĵon pri la postvivo de niaj karuloj kaj la certecon, ke ni iam rekolektiĝos al ili; la dubo pri ilia kaj pri nia sorto ĉesas ekzisti; senkuraĝeco forneniĝas antaŭ espero.

Sed aliaj rezultatoj fekundigas tiun revelacion. Rigardante la homaron matura por penetri la misteron de sia destino kaj sentime kontempli novajn mirindaĵojn, Dio permesis la levon de la vualo, kiu apartigis la videblan de la nevidebla mondo. La manifestiĝoj havas nenion eksterhoman; *tio estas la spirita homaro, kiu venas interparoli kun la korpa homaro* kaj diri al ili:

“Ni ekzistas, do ne ekzistas la nenio; jen kio ni estas kaj kio vi iam estos; la estonteco apartenas al vi, same kiel al ni. Vi paŝas en mallumo, ni venas klarigi al vi la vojon kaj starigi al vi la itineron; vi iras sencele, ni montras al vi la celon. La surtera vivo ĉion signifis por vi, ĉar vi nenion vidis transe de ĝi; ni venas diri al vi, montrante la spiritan vivon: la surtera vivo estas nenio. Via vidado haltis ĉe la tombo; ni malfermas al vi transan, splendan horizonton. Vi ne sciis, kial vi suferas sur la Tero; nun, en la sufero vi vidas la justecon de Dio. La bono ŝajnis doni nenian frukton en la estonteco, sed de nun ĝi havos celon kaj ja estos necesa; la frateco estis nenio alia krom bela teorio, sed nun ĝi sidas sur natura leĝo. Sub la regado de l’ kredo, ke ĉio finiĝas kun la vivo, la senlimaĵo estas malplena, egoismo mastre regas inter vi, kaj via devizo estas: “Ĉiu por si!”. Ĉe la certeco pri la estonto, la senfinaj spacoj senlime loĝatiĝas kaj nenie ekzistas malpleno kaj soleco; solidareco interligas ĉiujn estaĵojn trans kaj cis la tombo. Tio estas la regno de la karitato, portanta la devizon: “Unu por ĉiuj kaj ĉiuj por unu”. Fine, ĉe la estingiĝo de la vivo, vi diradis porĉiaman adiaŭon al viaj karuloj; nun vi diras al ili: “Ĝis baldaŭa revido!”

Jen, resume, la rezultatoj de la nova revelacio, kiu venis plenigi la vakuon faritan de la nekredemo, relevi la korojn senkuraĝigitajn de la dubo aŭ de la perspektivo de l’ nenio, kaj doni al ĉiuj aferoj ties pravon de ekzisto. Ĉu tiuj rezultatoj do

malhavus gravecon nur tial, ke la Spiritoj venas ne por solvi la problemojn de la scienco, nek por havigi scion al malkleruloj, nek por liveri al pigruloj rimedojn por riĉiĝi senlabore? Sed koncernas ne sole la estontecon la fruktoj, kiujn la homo devas rikolti el la revelacio. Li ilin ĝuos sur la Tero per la transformado, kiun la novaj kredoj nepre estigos en lia karaktero, en liaj gustoj, en liaj inklinoj, kaj sekve en la moroj kaj en la sociaj interrilatoj. Metante finon al la regno de egoismo, orgojlo kaj nekredemo, ili preparas tiun de la bono, kiu estas la regno de Dio anoncita de la Kristo.¹

¹ La antaŭmeto de la artikolo al la vorto *Kristo* (el la greka *Christos*, sanktoleito), uzata laŭ absoluta senco, estas pli ĝusta, se ni konsideras, ke tiu vorto ne estas la nomo de la Mesio el Nazareto sed ja substantivigita kvalito. Oni do diru: *Jesuo estis Kristo*; li estis *la* anoncita *Kristo*; la morto *de la Kristo* sed ne *de Kristo*, dum oni diras: la morto *de Jesuo* sed ne *de la Jesuo*. En *Jesuo-Kristo*, ambaŭ vortoj, kunigitaj, formas unu solan propran nomon. Samkiale oni diras: *la Budho*; *Gotama* akiris la *Budhecon* per siaj virtoj kaj aŭsteraj moroj; la vivo *de la Budho*, samkiel oni diras: la armeo *de la Faraono* sed ne *de Faraono*; Henriko IV estis *reĝo*; la titolo *de reĝo*; la morto *de la reĝo* sed ne *de reĝo*.

ĈAPITRO II

DIO

Ekzisto de Dio – Pri la dia naturo – La Providenco
La vido de Dio

Ekzisto de Dio

1. – Estante la primara kaŭzo de ĉiuj estaĵoj, la origino de ĉio ekzistanta, la bazo, sur kiu sidas la konstruaĵo de la kreado, Dio estas la punkto, kiun ni nepre konsideru antaŭ ĉio.

2. – Estas elementa principo, ke oni juĝas pri kaŭzo laŭ ties efiko, eĉ se oni tiun kaŭzon ne vidas.

Se, fendante la aeron, birdo estas atingita de mortiga plumbero, oni konkludas, ke lerta pafisto ĝin trafis, eĉ se oni lin ne vidas. Ne ĉiam necesas do vidi ion, por scii, ke ĝi ekzistas. Estas do per observado de la efikoj, ke oni venas al la konado de la kaŭzoj.

3. – Alia same elementa principo, iĝinta aksiomo pro sia vereco, estas, ke ĉiu inteligenta efiko nepre havas inteligentan kaŭzon.

Se oni demandus, kiu estas la konstruinto de lerte elpensita maŝino, kion oni pensus pri tiu, kiu respondus, ke ĝi estiĝis per si mem? Rigardante artan aŭ industrian majstroverkon, oni diras, ke ĝin produktis genia homo, ĉar nur eminenta inteligento povus ĝin koncepti; oni tamen rekonas, ke temas ja pri homa faro, ĉar konstateblas, ke ĝi ne transpasas la homan kapablon; sed al neniu venas la penso aserti, ke ĝi fontis el la cerbo de idioto aŭ de malklerulo, nek, des malpli, ke ĝi estas verko de besto aŭ produkto de la hazardo.

4. – Ĉie la ĉeesto de l' homo estas rekonata per liaj verkoj. La ekzisto de la antaŭdiluvaj homoj pruviĝis ne nur per la homaj fosilioj, sed ankaŭ, kaj kun granda certeco, per la ĉeesto, en tiuepokaj terenoj, de objektoj ellaboritaj de homoj; fragmento de vazo, tajlita ŝtono, armilo, briko sufiĉos por atesti lian ĉeeston. Laŭ la krudeco aŭ perfekteco de la laboro oni ekkonos la gradon de inteligenteco kaj de progreso de tiuj, kiuj ĝin faris. Se, trairante landon loĝatan ekskluzive de sovaĝuloj, vi eltrovus statuon indan je Fidio, vi tute ne hezitus aserti, ke, ĉar la sovaĝuloj ne kapablas ĝin fari, ĝi devas esti verko de inteligento supera al tiu de la sovaĝuloj.

5. – Nu bone! ĵetante sian rigardon ĉirkaŭen, sur la kreaĵojn de la Naturo, rimarkante la providencon, la saĝon, la harmonion direktantajn tiujn kreaĵojn, oni rekonas, ke estas neniu, kiu ne translimus la plej vastan amplekson de la homa inteligento. Se la homo ne povas ilin fari, ili do estas produkto de iu inteligento supera al la homaro, krom se oni akceptus, ke estas efikoj sen ia kaŭzo.

6. – Al tio kelkaj objetas per jena rezonado:

La tiel nomatajn kreaĵojn de la Naturo produktas materiaj fortoj, kiuj agas mekanike pro la leĝoj de altiro kaj de repuŝo; la molekuloj de la inertaj korpoj agregiĝas kaj malagregiĝas sub la potenco de tiuj leĝoj. La plantoj naskiĝas, ekĝermas, kreskas kaj multiĝas ĉiam per la sama maniero, ĉiu laŭ sia speco, pro la efiko de tiuj samaj leĝoj; ĉiu individuo similas tiun, el kiu ĝi devenis; la kreskado, la florado, la fruktiĝo, la koloro dependas de materiaj kaŭzoj, kiel varmo, elektro, lumo, humido, ktp. Same okazas al la bestoj. La astroj formiĝas per la molekula altiriĝemo kaj eterne moviĝas en siaj orbitoj pro la efiko de la gravito. Tiu mekanika reguleco en la agado de la naturaj fortoj vidigas nenian liberan inteligenton. La homo movas sian brakon, kiam kaj kiel li volas; sed tiu, kiu ĝin movus en la sama direkto ekde la naskiĝo ĝis la morto, estus ia aŭtomato; nu, la organaj fortoj de la Naturo ja estas pure aŭtomataj. Ĉio tio estas vera; sed tiuj fortoj estas efikoj, kiuj nepre havas ian kaŭzon, kaj neniuj povas aserti, ke ili estas Dio mem. Ili estas materiaj kaj mekanikaj; kaj ke ili tute ne estas inteligentaj en si mem tio ankaŭ estas vera; sed ilin agigas, distribuas kaj konformigas al la bezonoj de ĉiu afero iu inteligento, kiu ne estas homdevena. La utila aplikado de tiuj fortoj estas ja inteligenta efiko elmontranta inteligentan kaŭzon. Pendolo moviĝas kun aŭtomata reguleco kaj ĝuste en tiu reguleco sidas ĝia valoro. La forto, kiu ĝin movas estas absolute materia, tute ne inteligenta, sed kiom valorus tiu pendolo, se iu inteligento ne estus kombininta, kalkulinta, distribuinta la aplikon de tiu forto por ĝin funkciigi kun ekzakteco? El tio, ke la inteligento ne troviĝas en la mekanismo de la pendolo kaj ke oni ĝin ne vidas, ĉu estus prave indukti, ke ĝi ne ekzistas? Oni ĝin induktas el ĝiaj efikoj.

La ekzisto de horloĝo atestas pri la ekzisto de horloĝisto; la lerta aranĝo de la mekanismo atestas pri la inteligenteco kaj

la scio de la horloĝisto. Kiam horloĝo ĝustatempe havigas al vi la bezonatan indikon, ĉu al iu ajn venus la penso diri: jen tre inteligenta horloĝo?

Tio sama okazas rilate la mekanismon de la Universo: *Dio ne sin montras, sed manifestiĝas per siaj verkoj.*

7. – La ekzisto de Dio estas do realaĵo pruvita ne nur de la revelacio sed ankaŭ de la faktoj. La sovaĝaj popoloj ricevis nenian revelacion, sed tamen ili instinkte kredas la ekziston de ia superhoma potenco; ili vidas aferojn starantajn super la homa povo kaj el tio ili konkludas, ke tiuj aferoj devenas de ia estaĵo supera al la homaro. Ĉu ili ne sin montras pli logikaj ol tiuj asertantaj, ke tiuj aferoj fariĝis per si mem?

Pri la dia naturo

8. – Al la homo ne estas eble sondi la intiman naturon de Dio. *Por kompreni Dion ankoraŭ mankas al ni la koncerna sento, kiun oni ne akiras krom per la kompleta elpuriĝo de la Spirito.* Sed se li ne povas penetri la esencon de Dio, la homo, akceptante lian ekziston kiel premison, povas per rezonado ekkoni liajn necesajn atributojn: komprenante tion, kio li ne povas esti, ĉar li tiel ĉesus esti Dio, la homo induktas tion, kio li ja estas.

Sen la konado de la atributoj de Dio, estus neeble kompreni la verkon de la kreado. Tio estas la deirpunkto de ĉiuj religiaj kredoj, kaj ĝuste tial, ke ili tion ne konsideris, kvazaŭ lumturon kapablan ilin gvidi, la plimulto el la religioj eraris per siaj dogmoj. Kiuj ne atribuis al Dio la ĉiopovecon, tiuj konceptis plurajn diojn; kiuj ne atribuis al li superegan bonecon, tiuj faris el li ian Dion ĵaluzan, kolereman, partian kaj venĝeman.

9. – *Dio estas la superega kaj plejpotenca intelekto.* La homa intelekto estas limita, ĉar li ne povas fari, nek kompreni ĉion, kio ekzistas. Tiu de Dio, kiu ampleksas la infiniton, nepre estas infinita. Se oni supozus ĝin limita ĉe iu ajn punkto, oni ja povus koncepti estaĵon pli inteligentan, kapablan kompreni kaj fari, kion la alia ne povus fari, kaj tiel plu senfine.

10. – *Dio estas eterna, t.e.,* li ne havis komencon kaj ne havos finon. Se li estus iam komenciĝinta, li do estus elveninta el la nenio. Nu, ĉar la nenio ne ekzistas, ĝi nenion povas produkti. Aŭ lin estus kreinta iu alia antaŭekzistanta estaĵo, kaj do ĉi tiu estus Dio. Se oni supozas al li ian komencon aŭ finon, oni do povus koncepti estaĵon jam ekzistantan antaŭ li, aŭ povantan lin postvivi, kaj tiel plu senfine.

11. – *Dio estas neŝanĝema.* Se li povus ricevi aliiĝojn, la leĝoj regantaj la Universon havus neniom da stabileco.

12. – *Dio estas nemateria, t.e.,* lia naturo diferencas de ĉio, kion *ni nomas materio*; alie li ne estus neŝanĝema, ĉar li devus sperti la aliiĝojn de la materio. Dio ne havas formon koncepteblan por niaj sensoj, ĉar kontraŭe li estus materio. Ni diras: la mano de Dio, la okulo de Dio, la buŝo de Dio, ĉar la homo, konante nur sin mem, prenas sin por komparo rilate al ĉio, kion li ne komprenas. Ridindaj ja estas tiuj bildoj, per kiuj oni figuras Dion kiel maljunulon kun longa barbo kaj surhavantantan mantelon; ili kunportas la malbonaĵon malaltigi la superegan Estaĵon ĝis la mizeraj proporcioj de la homaro; de tie, ĝis oni atribuas al li la homajn pasiojn kaj el li farus ian Dion koleran kaj ĵaluzan, estas ne pli ol unu paŝo.

13. – *Dio estas ĉiopova*. Se li ne havus la superegan povon, oni povus koncepti pli povan estaĵon, kaj tiel plu sinsekve, ĝis tiu estaĵo, kiun neniu alia povus superi en potenco, kaj ĉi tiu ja estus Dio.

14. – *Dio estas superege justa kaj bona*. La providenca saĝeco de la diaj leĝoj elmontriĝas ĉe la plej malgrandaj aferoj, kiel ĉe la plej grandaj, kaj tiu saĝeco ne lasas, ke ni dubu pri liaj justeco kaj boneco.

La infiniteco de ia kvalito forigas la eblecon de ekzisto de kontraŭa kvalito, kiu ĝin malgrandigus aŭ nuligus. Estaĵo senfine bona ne povus enhavi la plej malgrandan eron da maliceco, same kiel estaĵo senfine malbona ne povus enhavi la plej malgrandan eron da boneco; tiel same, ia objekto ne povus esti absolute nigra kun plej malforta nuanco de blanko, nek absolute blanka kun plej eta nigra makulo.

Dio do ne povus esti samtempe bona kaj malbona, ĉar tiel, posedante neniun el tiuj kvalitoj en plej alta grado, li ne estus Dio; ĉiuj aferoj dependus de lia kaprico kaj havus neniom da stabileco. Li do ne povus ne esti aŭ senfine bona, aŭ senfine malbona; nu, ĉar liaj verkoj atestas pri lia saĝeco, pri lia boneco kaj pri lia antaŭzorgo, oni nepre konkludos, ke, ne povante esti samtempe bona kaj malbona kaj do ne plu esti Dio, li nepre devas esti senfine bona.

La superega boneco implicas la superegan justecon, ĉar, se li agus maljuste aŭ partie *en iu ajn cirkonstanco*, aŭ koncerne *iun ajn el siaj kreitoj*, li do ne estus superege justa kaj sekve ne estus superege bona.

15. – *Dio estas senfine perfekta*. Estas neeble koncepti Dion sen la infinita perfekteco; kontraŭe li ne estus Dio, ĉar oni ĉiam povus koncepti ian estaĵon, kiu posedus tion, kio mankus

al li. Por ke neniu estaĵo povu lin superi, nepre necesas, ke li estu senfina laŭ ĉio.

Estante senfinaj, la atributoj de Dio povas sperti nek grandiĝon, nek malgrandiĝon, ĉar kontraŭe ili ne estus senfinaj kaj Dio ne estus perfekta. Se oni forprenus plej etan parton de unu sola el liaj atributoj, oni ne plu havus Dion, ĉar povus ekzisti ia pli perfekta estaĵo.

16. – *Dio estas unika.* La unikeco de Dio estas konsekvenca sekvo de la absoluta infiniteco de liaj perfektaĵoj. La alia Dio ne povus ekzisti, krom sub la kondiĉo esti same senfina en ĉio, ĉar se inter ili ekzistus la plej eta diferenco, unu estus malsupera al la alia, subordigita al ties potenco, kaj do ne estus Dio. Se ambaŭ estus inter si absolute egalaj, ekzistus do, de la tuta eterna tempo, unu sama penso, unu sama volo, unu sama potenco. Tiel interkonfuzitaj pro la identeco, ili efektive estus nenio alia ol unu sola Dio. Se ĉiu havus apartajn funkciojn, unu farus, kion ne farus la alia, kaj do inter ili ne ekzistus perfekta egaleco, ĉar neniu havus la superegan aŭtoritaton.

17. – La nescio pri tiu principo, ke estas infinitaj la perfektaĵoj de Dio, naskis politeismon, kredon komunan al ĉiuj primitivaj popoloj, atribuintaj diecon al ĉiuj potencoj, kiuj al ili ŝajnis esti super la homaro. Poste, la racio igis ilin kunfandi tiujn diversajn potencojn en unu solan. Pli malfrue, laŭmezure kiel la homoj komprenadis la esencon de la diaj atributoj, ili fortiris de la simboloj, kiujn ili kreis, la kredojn negantajn tiujn atributojn.

18. – Resume, Dio ne povas esti Dio, krom sub la kondiĉo, ke per nenio li estu superita de alia estaĵo, ĉar la

estaĵo, kiu lin superus per kio ajn, eĉ se nur per la dikeco de kapharo, ja estus la vera Dio. Nepre necesas do, ke li estu senfina en ĉio.

Kaj tiel, konstatinte la ekziston de Dio per liaj verkoj, oni ja sukcesas, per nura logika dedukto, difini la atributojn, kiuj lin karakterizas.

19. – Dio estas do *la superega kaj suverena inteligento; li estas unika, eterna, senŝanĝa, nemateria, ĉiopova, superege justa kaj bona, infinita laŭ ĉiuj siaj perfektajoj*, kaj alia li ne povas esti.

Tia estas la bazo, sur kiu sidas la universa konstruaĵo, la lumturo, kies radioj etendiĝas tra la tuta Universo kaj kiu sola povas gvidi la homon en la esplorado de la vero; sekvante ĝian orientadon, li neniam devojiĝos, kaj se li tiel ofte eraris, tio okazis nur tial, ke li ne prenis la direkton al li montritan.

Tia ankaŭ estas la *senerara kriterio de ĉiuj doktrinoj, filozofiaj kaj religiaj*; por ilin juĝi, la homo disponas rigore ekzaktan mezuron en la atributoj de Dio, kaj li povas al si mem aserti, ke *ĉiu teorio, ĉiu principo, ĉiu dogmo, ĉiu kredo, ĉiu praktiko, kontraŭdiranta unu solan el tiuj atributoj kaj celanta ne nur nuligi sed simple ĝin malfortigi, ne povas esprimi la veron.*

En filozofio, psikologio, moralo, religio, vera estas nur tio, kio ne malproksimiĝas, eĉ per joto, de la esencaj kvalitoj de Dio. La perfekta religio estos tia, el kies ĉefaj principoj neniu kontraŭdirus tiujn kvalitojn; kies ĉiuj dogmoj povus elporti la provon de tiu kontrolo sen de tio ion ajn suferi.

La Providenco

20. – La providenco estas la zorgado de Dio pri siaj kreitoj. Dio estas ĉie, ĉion vidas kaj ĉion direktas, eĉ la plej malgrandajn aferojn: ja en tio konsistas la providenca agado.

“Kiel povas Dio, tiel granda, tiel potenca, tiel supera al ĉio, enmiksiĝi en tiel malgravajn detalojn, okupiĝi pri la plej bagatelaj agoj kaj pensoj de ĉiu individuo?” Tiun demandon al si mem faras la nekredanto, kaj li konklude asertas, ke, akceptante la ekziston de Dio, oni nur povas akcepti, ke lia agado ekskluzive koncernas la ĝeneralajn leĝojn de la Universo; ke la Universo funkcias de la tuta eterneco dank’ al tiuj leĝoj, al kiuj submetiĝas ĉiu kreito, en la sfero de sia agado, sen neceso de la senĉesa interveno de la Providenco.

21. – En sia nuna stato de malsupereco, la homoj nur tre malfacile komprenas, ke Dio estas senfina; ĉar ili mem estas difinitaj kaj limitaj, ili tial figuras Dion ankaŭ limita kaj difinita, lin prezentas kiel difinitan estaĵon kaj lin bildigas laŭ sia propra bildo. Niaj pentraĵoj, kiuj lin prezentas kun homaj trajtoj, ne malmulte kontribuas por tenadi tiun eraron en la spirito de la amasoj, kiuj, koncerne Dion, pli adoras la formon ol la penson. Por la plimulto, li estas potenca suvereno sur nealirebla *trono*, perdita en la ĉiela senlimaĵo. Kaj ĉar iliaj fakultoj kaj perceptoj estas limitaj, ili ne komprenas, ke Dio povas kaj bonvolas rekte interveni en la malgrandajn aferojn.

22. – En sia senpoveco kompreni la esencon mem de Dio, la homo povas fari pri ĝi nur proksimuman ideon helpe de nepre tre neperfektaj komparoj, kiuj tamen povas almenaŭ montri al li la eblecon de tio, kio, unuavide, ŝajnas al li nebla.

Ni supozu ian fluidon tre subtilan por penetri ĉiujn korpojn. Estante neinteligenta, tiu fluido agas mekanike, sole nur pere de la materiaj fortoj. Sed se ni ĝin supozas inteligenta, dotita per perceptivaj kaj sentivaj fakultoj, ĝi do ne plu blinde agos, sed ja kriterie, memvole kaj libere: ĝi vidos, aŭdos kaj komprenos.

23. – La proprecoj de la perispirita fluido povas pri tio doni al ni ian ideon. En si mem ĝi ne estas inteligenta, ĉar ĝia konsisto estas materia, sed ĝi servas kiel vehiklo de la penso, de la sensacoj kaj de la perceptoj de la Spirito.

La perispirita fluido estas ne la penso de la Spirito, sed ties instrumento kaj perilo. Ĉar estas ĝi, kiu transigas la penson, tiu fluido iel de ĝi *saturiĝas*. Pro la neebleco izoli la penson, al ni ŝajnas, ke ĝi konfuziĝas kun tiu fluido, same kiel la sono ŝajnas konfuziĝi kun la aero en tia maniero, ke ni povas, por tiel diri, ĝin materiigi. Kiel ni diras, ke la aero fariĝas sonora, tiel same ni povus diri, prenante la efikon por la kaŭzo, ke la fluido fariĝas inteligenta.

24. – Ĉu tiel estas aŭ ne estas koncerne la penson de Dio, nome ĉu ĝi agas senpere aŭ helpe de ia fluido, ni ĝin figuru, por faciligi al nia inteligento la komprenon, sub la konkreta formo de ia inteligenta fluido pleniganta la senfinan Universon, penetranta ĉiujn partojn de la kreaĵaro: *la tuta Naturo dronas en la dia fluido*. Nu, sekve de la principo, ke la partoj de tutaĵo havas ties saman naturon kaj ties samajn proprecojn, ĉiu atomo de tiu fluido, se oni povas tiel diri, posedas la penson, tio estas la esencajn atributojn de Dio; kaj ĉar tiu fluido ĉie troviĝas, tial ĉio estas submetita al ĝia inteligenta agado, al ĝia antaŭzorgo, al ĝia prizorgado. Nenia estaĵo ekzistas, kiel ajn malsupera ni ĝin supozas, kiu de ĝi ne

estus saturita. Ni do konstante troviĝas en la ĉeesto de Dio; eĉ ne unu solan el niaj agoj ni povus kaŝi antaŭ lia rigardo; nia penso estas en senĉesa kontakto kun lia penso, kaj nepre prave oni asertas, ke Dio legas en la plej kaŝaj anguloj de nia koro. *Ni estas en li, kiel li en ni*, laŭ la parolo de la Kristo.

Por etendi sian prizorgon al ĉiuj kreitoj, Dio do ne bezonas ĵeti sian rigardon desupre de la senfinaĵo; por esti de li aŭskultataj, niaj preĝoj ne bezonas trakuri la spacon, nek esti dirataj per tondra voĉo, ĉar, pro tio ke li ĉiam apudas al ni, niaj pensoj eĥas en li. Niaj pensoj estas kvazaŭ la sonoj de sonorilo, kiuj vibrigas la ĉirkaŭan medion.

25. – Ni tute ne pensas materiigi Dion; la bildo pri ia universa, inteligenta fluido evidente estas nenio alia, ol komparo taŭga por doni pri Dio ideon pli ĝustan ol tiu de la pentraĵoj, kiuj lin prezentas sub la formo de homa figuro. Ĝi celas komprenigi la eblon, kiun havas Dio ĉie esti kaj pri ĉio okupiĝi.

26. – Ni konstante havas antaŭ la okuloj iun ekzemplon, kiu povas doni al ni ideon pri la maniero, kiel la agado de Dio povas efiki sur la plej internajn partojn de ĉiuj estaĵoj kaj, sekve, pri la maniero, kiel venas al li la plej subtilaj impresoj de nia animo. Tiun ekzemplon ni ĉerpis el instruo, kiun Spirito liveris pri la temo.

27. – “La homo estas malgranda mondo, en kiu la Spirito direktas kaj la korpo estas direktata. En ĉi tiu universo, la korpo prezentas ian kreaĵon, kies Dio estas la Spirito. (Komprenu, ke ĉi tie temas nur pri analogio, ne pri identeco). La membroj de tiu korpo, la diversaj organoj, kiuj ĝin konsistigas, la muskoloj, la nervoj, la artikoj prezentas aliajn materiajn

individuojn, se oni tiel povas diri, lokitajn en apartaj punktoj de la korpo. Kvankam estas granda la nombro de ĝiaj konsistigaj partoj, tiel malsamaj kaj variaj laŭ ilia naturo, tamen neniu pridubas, ke ne povas ekesti movoj nek impresoj, ie ajn en tiu korpo, sen ke la Spirito tion konscius. Ĉu okazas diversaj sensacoj samtempe en pluraj lokoj? La Spirito ĉiujn sentas, distingas, analizas, al ĉiu difinas la koncernan kaŭzon kaj ties lokon de agado pere de la perispirita fluido.

“Analoga fenomeno okazas inter la kreaĵaro kaj Dio. Dio estas ĉie en la Naturo, same kiel la Spirito estas ĉie en la korpo. Ĉiuj elementoj de la kreaĵaro estas en konstanta rilato kun li, same kiel la ĉeloj de la homa korpo estas en senĉesa kontakto kun la spirita estaĵo. Neniu motivo do ekzistas, por ke samklasaj fenomenoj ne fariĝu sammaniere, en unu kazo kaj en la dua.

“Iu membro moviĝas: la Spirito ĝin sentas; iu kreito pensas: Dio ĝin scias. Ĉiuj membroj moviĝas, la diversaj organoj ekvibras: la Spirito sentas ĉiun manifestiĝon, ilin distingas kaj lokalizas. La diversaj kreaĵoj, la diversaj kreitoj sin ekmovas, pensas, diversmaniere agas: Dio ekscias ĉion okazantan kaj al ĉiu difinas tion, kio al li koncernas.

“El tio oni povas indukti la solidarecon inter la materio kaj la inteligento, la solidarecon inter ĉiuj estaĵoj de unu mondo, inter ĉiuj mondoj kaj, fine, inter ĉiuj kreaĵoj kaj Dio.” (Quinemant, *Pariza Societo*, 1867.)

28. – Ni komprenas la efikon: tio jam signifas multon. De la efiko ni iras ĝis la kaŭzo, kies grandecon ni taksas laŭ la grandeco de la efiko. Sed al ni nealireblas tiel ĝia intima esenco kiel ankaŭ la esenco de nekalkulebla kvanto da fenomenoj. Ni konas la efikojn de elektro, varmo, lumo, gravito; ni ilin kalkulas, sed tamen ni ne konas la intiman

naturon de la principo, kiu ilin estigas. Ĉu do estus pli racia la neado de la dia principo tial, ĉar ni ĝin ne komprenas?

29. – Nenio malhelpas, ke oni agnosku, kiel principon de la superega inteligento, unu ĉefan fokuson, kiu senĉese radius, inundante la Universon per siaj emanajoj, kiel la Suno per sia lumo. Sed kie troviĝas tiu fokuso? Jen kion povas diri neni. Verŝajne ĝi ne estas fiksita en difinita punkto, kiel ankaŭ ne estas ĝia agado, kaj same verŝajne ĝi konstante trakuras la regionojn de la senfina spaco. Se simplaj Spiritoj estas nature dotitaj per la kapablo de ĉieestado, en Dio do tiu kapablo nepre devas esti senlima. Ĉar Dio plenigas la Universon, oni ankaŭ povus akcepti, kiel hipotezon, ke tiu fokuso ne bezonas translokiĝi, ke ĝi formiĝas ĉie, kie ajn la superega volo rigardas konvena tiun formiĝon, pro kio oni povas aserti, ke ĝi troviĝas ĉie kaj nenie.

30. – Antaŭ tiaj nesondeblaj problemoj, nia racio devas sin teni humiliĝe. Dio ekzistas: tion ni ne povas pridubi. Li estas senfine justa kaj bona: jen lia esenco. Al ĉio li etendas sian prizorgon: ni tion komprenas. Nur nian bonon do li povas deziri, el kio sekvas, ke ni devas konfidi lin: jen la esenca afero. Koncerne la ceteron, ni atendu, ke ni indu lin kompreni.

La vido de Dio

31. – Se Dio estas ĉie, kial ni ne vidas lin? Ĉu ni lin vidos, forlasinte la Teron? Tiajn demandojn oni ĉiutage elmovas.

La unua estas facile solvebla: niaj materiaj vidorganoj havas limitajn perceptojn, kiuj ilin nekapabligas por la vido de certaj aferoj, eĉ se materiaj. Jen kial certaj fluidoj tute netrafef-

blas por nia vidkapablo kaj por niaj esploraj instrumentoj, sed tamen ni ne pridubas ilian ekziston. Ni vidas la efikojn de la pesto, kaj tamen ni ne vidas la fluidon, kiu ĝin transportas; ni vidas la korpojn moviĝantaj sub la efiko de la gravita forto, sed ni ne vidas tiun forton.

32. – La spiritesencaj aferoj ne povas esti perceptataj de materiaj organoj; nur per la spirita vidkapablo ni povas vidi la Spiritojn kaj la aferojn de la nemateria mondo; nur nia animo do povas percepti Dion. Ĉu ĝi vidas lin tuj post la morto? Nur la transtombaj komunikaĵoj povas tion al ni instrui. Laŭ ili, ni ekscias, ke la vido de Dio estas privilegio de la plej elpurigitaj animoj kaj ke por tio tre malmultaj posedas, forlasinte sian materian envolvajon, la necesan gradon de senmateriigo. La banala komparo tion facile komprenebligas.

33. – Kiu troviĝas en la fundo de valo, droninta en densa nebulo, tiu ne vidas la Sunon. Sed ĉe la difuza lumo li konkludas, ke la Suno brilas. Se li supreniras la monton, tiam laŭmezure kiel li altiĝas, la nebulo fariĝas pli klara, la lumo ĉiam pli kaj pli viva, sed li ankoraŭ ne vidas la Sunon. Nur post kiam li altiĝis super la nebultavolo kaj ektrovas sin ene de perfekte pura aero, li vidas ĝin en ties tuta brilego.

Same okazas al la animo. La perispirita envolvajo, kvankam por ni nevidebla kaj nepalpebla, tamen estas, por la animo, efektiva materio, ankoraŭ tro maldelikata por certaj perceptoj. Tiu envolvajo malmateriigas laŭmezure kiel la animo morale altiĝas. La neperfektaĵoj de la animo kvazaŭ estas nebultavoloj nebligantaj al ĝi klaran vidon. La seniĝo je ĉiu neperfektaĵo signifas unu malplian makulon, sed nur post sia kompleta elpurigo, ĝi plene ekĝuas siajn fakultojn.

34. – Ĉar Dio estas la plej altgrada spirita esenco, lin povas percepti, en ties tuta splendo, nur tiuj Spiritoj, kiuj atingis la plej altan gradon de senmateriigo. La fakto, ke la neperfektaj Spiritoj ne vidas lin, ne signifas, ke ili estas de li pli distancaj ol la aliaj; kiel la ceteraj Spiritoj, kiel ĉiuj estaĵoj de la Naturo, ili dronas en la dia fluido, same kiel ni dronas en la lumo; la sola kaŭzo estas, ke iliaj neperfektaĵoj efikas kvazaŭ vaporoj, kiuj lin kaŝas antaŭ ilia vidado. Kiam la nebulo fordisiĝos, ili vidos lian brilegon. Por tio, ili ne bezonos ascendi, nek serĉi lin en la profundaĵoj de la senfino. Post kiam la spirita vidado liberiĝos de la moralaj nebuloj, kiuj ĝin malklarigis, ili lin vidos ĉiuloke kie ajn ili troviĝos, eĉ sur la Tero, ĉar Dio estas ĉie.

35. – La Spirito elpuriĝas nur kun la tempo, kaj la diversaj enkarniĝoj estas kvazaŭ alambikoj, en kies fundo li, en ĉiu fojo, restigas kelke da malpuraĵoj. Forlasinte sian korpan envolvajon, li ne tuj seniĝas je siaj neperfektaĵoj, kaj tio estas la kaŭzo, kial li postmorte ne vidas Dion pli ol dumvive; sed laŭmezure kiel ili elpuriĝas, ili havas pli klaran intuicion pri li. Ili ne vidas lin, sed lin pli bone komprenas: la lumo estas malpli difuza: Kiam iuj Spiritoj diras, ke Dio al ili malpermesas respondi al iu demando, tio ne signifas, ke Dio aperas al ili aŭ al ili direktas la parolon por preskribi aŭ malpermesi tiun aŭ tiun alian aferon, ne; sed ili sentas lin, ricevas la vibrojn de lia penso, same kiel okazas al ni koncerne la Spiritojn, kiuj nin envolas en siaj fluidoj, kvankam ni ilin ne vidas.

36. – Sekvas do, ke neniu homo povas vidi Dion per la karnaj okuloj. Se tiu favoro estus konsentita al iuj, ĝi nur efektivigiĝus en stato de ekstazo, kiam la animo sin trovas tiele liberiĝinta el la materiaj ligiloj, ke tia afero eblus dum la

enkarniĝo. Cetere, unu tia privilegio ekskluzive apartenus al elitaj animoj, enkarniĝintaj por misio, ne por *kulpelpago*. Sed ĉar la Spiritoj el la plej altaj ordoj splendas per blindiga brilego, povas okazi, ke malpli progresintaj Spiritoj, enkarniĝintaj aŭ elkarniĝintaj, ege ravitaj de la brilego, kiu tiujn ĉirkaŭas, supozas, ke ili vidas Dion mem. Ja tiel same kiel iu, kiu, vidante ministron, lin prenas por la suvereno mem.

37. – Sub kia eksteraĵo Dio sin montras al tiuj, kiuj fariĝis indaj vidi lin? Ĉu sub ia formo? Laŭ homa bildo aŭ kiel lumsplenda fokuso? La homa lingvo estas nekapabla ĝin vortigi, ĉar por ni ekzistas nenia komparo taŭga por havigi al ni ian koncernan ideon. Ni estas kvazaŭ denaskaj blinduloj, al kiuj oni vane provus komprenebligi la sunbrilon. Nia lingvo estas limita de niaj bezonoj kaj de la rondo de niaj ideoj; tiu de la sovaĝaj popoloj ne povus priskribi la mirindaĵojn de la civilizacio; tiu de la pli civilizitaj popoloj estas treege malriĉa por priskribi la belegajojn de la ĉieloj, nia inteligento estas tre malvasta por ilin kompreni, kaj nia vidado, estante tre malforta, de ili certe blindiĝus.

ĈAPITRO III

BONO KAJ MALBONO

Origino de bono kaj malbono – Instinkto kaj inteligento
Reciproka sindetruado de la vivaj estaĵoj

Origino de bono kaj malbono

1. – Ĉar Dio estas la principo de ĉiuj ekzistaĵoj, kaj ĉar li havas la tutan saĝon, la tutan bonecon, la tutan justecon, sekve ĉio de li devenanta nepre posedas liajn atributojn, ĉar, kio estas senfine saĝa, justa kaj bona, povas produkti nenion malintelligentan, malbonan kaj maljustan. La malbono, kiun ni vidas, ne povas do deveni de li.

2. – Se malbono estus atributo de ia aparta estaĵo, ĉu oni lin nomas Arimano, ĉu Satano, tiam el du aferoj unu: aŭ tiu estaĵo estus egala al Dio kaj, sekve, tiel potenca kiel li, de la tuta eterna tempo, aŭ li estus malsupera al Dio.

En la unua okazo, ekzistus du konkurantaj potencoj en senĉesa luktado, unu provanta malfari, kion faris la dua, ambaŭ sin reciproke kontraŭstarantaj. Tiu hipotezo ne konformas al la plan-unueco montriĝanta en la strukturo de la Universo.

En la dua okazo, tiu estaĵo, ĉar malsupera al Dio, estus al li subordigita. Ne povante esti ekzistinta, kiel Dio, de la tuta eterna tempo, sen esti al li egala, tiu estaĵo estus iam havinta komencon. Se li estis kreita, lin kreis neniu alia krom Dio, kiu do estus kreinta la Spiriton de malbono, kio implicus la neadon de la senfina boneco. (Vidu: *La ĉielo kaj la Infero*, ĉap. X, “La Demonoj”).¹

3. – Tamen, malbono ekzistas kaj havas ian kaŭzon.

La malbonoj ĉiuspecaj, fizikaj aŭ moralaj, kiuj turmentas la homaron, prezentas du kategoriojn, kiujn nepras distingi: tiun de la malbonoj, kiujn la homo povas eviti, kaj tiun de la malbonoj ne dependantaj de ilia volo. Inter la unuaj interviciĝas la natur-katastrofoj.

La homo, kies fakultoj ja estas limitaj, ne povas penetri nek ampleksi la tutaĵon de la planoj de la Kreinto; li taksas la aferojn laŭ la vidpunkto de sia personeco, de siaj interesoj fiktivaj kaj konvencijaj, kiujn li kreis al si kaj kiuj ne apartenas al la Naturo; jen kial li ofte rigardas malbona kaj maljusta, kion li opinius justa kaj admirinda, se li vidus ties kaŭzon, celon kaj definitivan rezultaton. Se li serĉos la ekzisto-pravon kaj la utilon de ĉiu afero, li rekonos, ke ĉio portas la stampon de la senfina saĝeco, kaj li sin klinos antaŭ tiu saĝeco, eĉ rilate al aferoj por li nekompreneblaj.

4. – La homo ricevis, kiel dividitaĵon, inteligenton, kun kies helpo li povas deturni, aŭ almenaŭ mildigi, la efikojn de ĉiuj natur-katastrofoj. Ju pli li akiras scion kaj progresas laŭ la civilizacio, des malpli ruinigaj fariĝas tiaj katastrofoj. Per saĝa

¹ Jam esperantigita kaj eldonita de la Brazilia Spiritisma Federacio. – *Noto de la Trad.*

kaj antaŭzorga sociala organizo, li eĉ sukcesos nuligi iliajn sekvojn, en la okazo se ili ne povos esti tute evitataj. Tiel, koncerne eĉ tiujn katastrofojn, kiuj havas sian utilon por la ĝenerala ordo de la Naturo kaj por la estonteco, sed kiuj damaĝas en la nuno, Dio havigis al la homo, en la fakultoj per kiuj li dotis ties Spiriton, la rimedojn por haltigi iliajn efikojn.

Tiamaniere li rebonigas nesalubrajn regionojn, imunigas kontraŭ pestodonaj miasmoj, igas fekundaj nekultivitajn terojn kaj lernas kiel ilin antaŭgardi kontraŭ inundoj; li ankaŭ konstruas siajn loĝejojn pli salubraj, pli solidaj por rezisti kontraŭ la ventoj tiel necesaj por la purigo de la atmosfero, kaj tiel li sin ŝirmas kontraŭ la malbonaj veteroj. Kaj tiel, fine, la neceso igis lin iom post iom krei la sciencojn, per kiuj li plibonigas la loĝeblecon de la mondo kaj pligrandigas sian propran bonstaton.

5. – Ĉar la homo devas progresi, la malbonoj, al kiuj li estas elmetata, lin stimulas por la ekzercado de sia intelekto, de ĉiuj siaj fizikaj kaj moralaj kapabloj, lin instigante al serĉado de rimedoj por ilin eviti. Se li nenion devus timi, nenia bezono igus lin serĉi la plibonon; lia spirito malvigligiĝus en la senfareco; li nenion elpensus nek eltrovus. *La doloro estas la pikilo, kiu puŝas la homon antaŭen, sur la vojon de la progreso.*

6. – Sed la plimulton el la malbonoj estigas la homo mem per siaj malvirtoj, kaj ili do fontas el lia orgojlo, egoismo, ambicio, avidemo, el liaj ekscesoj en ĉiuj aferoj: tie sidas la kaŭzo de la militoj kaj katastrofoj, kiujn ili kuntrenas, de la malpaciĝoj, de la opreso de l' fortaj kontraŭ la malfortaj, fine de la pliparto el la malsanoj.

Dio starigis leĝojn plenajn de saĝeco, kies sola celo estas la bono. La homo trovas en si mem ĉion necesan por ilin

sekvi. La konscienco al li difinas la vojon, la dia leĝo estas gravurita en lia koro, kaj cetere Dio senĉese memorigas pri ili pere de siaj mesioj kaj profetoj, per ĉiuj enkarniĝintaj Spiritoj, kiuj ricevis la mision lin instrui, moraligi, plibonigi, kaj, en la lastaj tempoj, per la amaso da elkarniĝintaj Spiritoj, kiuj ĉie manifestiĝas. *Se la homo skrupule submetiĝus al la diaj leĝoj, li sendube evitigus al si la plej akrajn malbonojn kaj vivus feliĉa sur la Tero.* Se li tiel ne kondutas, tion li ŝuldas al sia libervolo, kaj li tiam suferas ties sekvojn. (*La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉap. V, n-roj 4, 5, 6 kaj sekvantaj.)

7. – Sed Dio Plejbona metis la kuracilon apud la malsanon, tio estas, el la malbono li eltiras la bonon. Venas momento, kiam la eksceso de la morala malbono fariĝas netolerebla kaj trudas al la homo la bezonon ŝanĝi sian direkton. Instruita de la sperto, li estas devigita serĉi la kuracilon en la bono, ĉiam laŭ sia libera volo. Prenante pli bonan direkton, li agas laŭ sia volo kaj kaŭze de tio, ke li rekonis la malbonaĵojn de la alia direkto. La neceso do premdevigas lin morale pliboniĝi, por ke li estu pli feliĉa, same kiel ĝi ankaŭ lin devigis plibonigi la materialajn kondiĉojn de sia ekzistado (n-ro 5).

8. – Oni povas diri, ke malbono estas neesto de bono, same kiel malvarmo estas neesto de varmo. *Kiel malvarmo ne estas ia aparta fluido, tiel same malbono ne estas aparta atributo; unu estas la negativo de la dua.* Kie bono ne estas, tie nepre estas malbono. Ne fari malbonon jam estas la komenco de bono. *Dio volas nur bonon; nur de l' homo venas malbono. Se en la kreaĵaro ekzistus ia estaĵo ekskluzive destinita al malbono, neniu povus ĝin eviti; sed ĉar la homo havas EN SI*

MEM la kaŭzon de malbono, krome sian libervolon kaj, kiel gvidilon, la diajn leĝojn, li ĝin evitos kiam ajn li volos.

Ni prenu, por komparo, ordinaran fakton. Bienmastro scias, ke en la ekstremaĵoj de sia kampo estas danĝera loko, kie povus perei aŭ vundiĝi tiu, kiu riskus tien iri. Kion li faras por antaŭforigi akcidentojn? Li sendas meti, proksiman al la loko, avizon malpermesantan, ke oni iru transen, pro la risko de danĝero. Jen tie la leĝo, saĝa kaj antaŭgarda. Se, malgraŭ tio, senprudentulo malobeas la avizon, ĝin transpasas kaj trafiĝas de damaĝo, kontraŭ kiu li plendu se ne kontraŭ si mem?

Tiel same okazas rilate al malbono: la homo ĝin evitus, se li obeus la diajn leĝojn. Ekzemple: Dio difinis limon al la kontentigo de bezonoj; sateco lin atentigas pri tiu limo; se li ĝin transpasas, tion li ja volonte faras. La malsanoj, la difektoj, la morto, kiuj el tio povas rezulti, devenas do de lia neantaŭzorgemo, ne de Dio.

9. – Ĉar malbono rezultas el la neperfektaĵoj de la homo, kiu ja estas kreita de Dio, oni diros, Dio kreis nenion alian ol malbonon, aŭ almenaŭ ties kaŭzon; se li estus kreinta la homon perfekta, malbono ne ekzistus.

Se la homo estus kreita perfekta, li fatale inklinus al bono; nu, pro sia libera volo, li ne fatale inklinas al bono, nek al malbono. Dio volis, ke li submetiĝu al la leĝo de progreso kaj ke tiu progreso estu la frukto de lia laboro mem, por ke li ĝin meritu, same kiel li devas respondi pri la malbono, kiun li libervole faris. La demando do konsistas en tio, nome ekscii, kio estas la origino, en la homo, de lia inklino al malbono.¹

¹ La eraro kuŝas en la kredo, ke la animo eliris perfekta el la manoj de la Kreinto, dum, kontraŭe, li volis, ke la perfekteco rezultu el la laŭgrada puriĝado de la Spirito kaj ja estu ties verko mem. Dio volis, ke la animo, laŭ

10. – Studante ĉiujn pasiojn, eĉ ĉiujn malvirtojn, oni konstatas, ke iliaj radikoj kuŝas en la instinkto de memkonservado. Tiu instinkto plene potencas en la bestoj kaj en tiuj primitivaj estuloj plej proksimaj al la besta naturo, en kiuj ĝi absolute regas sen la kontraŭpezo de la morala senso, ĉar ili ankoraŭ ne vekiĝis por la intelekta vivo. La instinkto malfortiĝas laŭmezure kiel disvolviĝas la intelekto, ĉar ĉi tiu ja regas la materion.

La Spirito estas destinita por la spirita vivo, sed en la unuaj etapoj de sia korpa ekzistado li devas kontentigi nur materiajn bezonojn. Por tiu celo, kaj ni parolas el *materiala vidpunkto*, la spertiĝo per la pasioj estas necesa por la konservado de la specio kaj de la individuoj. Sed, elirinte el tiu etapo, li renkontas aliajn bezonojn, komence duonmoralajn kaj duonmateriajn, kaj poste ekskluzive moralajn. Tiam la Spirito ekregas la materion. Se li forskuas ĝian jugon, li antaŭeniras sur la vojo al li strekita de la Providenco kaj proksimiĝas al sia fina destino. Se, male, li lasas, ke la materio lin potencu, li malfruas kaj similiĝas al la bruto. En ĉi tiu okazo, *kio iam estis ia bono, kiel bezono de lia naturo, tio aliĝas en malbonon, ne nur tial, ke ĝi ne plu estas necesa, sed ankaŭ ĉar ĝi fariĝas malutila al la spiritiĝo de la estaĵo*. Tiel same, kio estas kvalito ĉe infano, tio fariĝas riproĉindaĵo ĉe plenkreskulo. Malbono estas do relativa, kaj la koncerna prirespondeco estas konforma al la grado de progreso.

Ĉiuj pasioj do havas sian providencan utilecon. Se tiel ne estus, Dio estus farinta aferojn senutilajn, eĉ nocajn.

sia libera volo, povu elekti inter bono kaj malbono, kaj ke ĝi atingu siajn lastajn celojn proprapene kaj kontraŭstarante malbonon. Se li estus kreinta la animon tiel perfekta kia li mem kaj, post ĝia eliro el liaj manoj, igus ĝin partopreni en lia eterna beateco, li ja farus ĝin ne laŭ sia bildo, sed simila al li. (Bonnamy: *La Praveco de Spiritismo*, ĉap. VI.)

Malbono kuŝas en la misuzo, kaj la homo misuzas pro sia libera volo. Poste, instruite de sia intereso mem, li libere elektas inter bono kaj malbono.

Instinkto kaj intelekto

11. – Kia diferenco estas inter instinkto kaj intelekto? Kie unu finiĝas kaj komenciĝas la dua? Ĉu la instinkto estas ia rudimenta inteligento aŭ ia aparta fakulto, ia atributo ekskluziva de la materio?

La instinkto estas tiu kaŝita forto instiganta la organajn estaĵojn al spontanaj, nevolaj agoj celantaj ilian konservadon. En la instinktaj agoj estas nek pripenso, nek planado, nek intenco. Estas pro ĝi, ke la planto serĉas la aeron, sin turnas al la lumo, direktas siajn radikojn al la akvo kaj al la nutra grundo; ke la floro alterne sin malfermas kaj fermas laŭbezone; ke la grimpoplantoj volviĝas ĉirkaŭ ia apogilo aŭ al ĝi alkroĉiĝas per siaj ciroj. Per la instinkto la bestoj estas avertitaj pri tio, kio ilin povas utili aŭ noci; serĉas, laŭ la sezono, la favorajn klimatojn; konstruas, sen antaŭa lernado, pli aŭ malpli arte, laŭ la specioj, molajn kuŝejojn kaj ŝirmejojn por sia idaro, kaptilojn por kapti la predon, per kiu ili sin nutras; lerte uzas la atakajn aŭ defendajn armilojn, per kiuj ili estas dotitaj. Pro la instinkto, la seksoj sin reciproke altiras; la ino kovas siajn idojn kaj ĉi tiuj serĉas la patrinan sinon. Ĉe la homo, la instinkto superregas nur en la komenco de la vivo; la infano instinkte faras siajn unuajn movojn, prenas sian manĝon, krias por esprimi siajn bezonojn, imitas la voĉsonon, provas paroli kaj paŝi. Eĉ ĉe la plenkreskuloj certaj agoj estas instinktaj: nome la nevolaj movoj por eviti ian riskon, por eskapi ian danĝeron, por teni la korpan ekvilibron, same kiel la palpebrumo por

malpliintensigi la lumbrilon, la nevola malfermo de la buŝo por enspiri, ktp.

12. – *La intelekto elmontriĝas per agoj memvolaj, pripensitaj, antaŭdeciditaj, intencitaj, laŭ la cirkonstancaj oportunoj. Ĝi nekontesteble estas ekskluziva atributo de la animo. Ĉia maŝineca ago estas instinkta; sed tiu, kiu elmontras pripenson, intencon, decidon, estas intelekta. Unu estas libera, tia ne estas la alia.*

La instinkto estas fidinda guidanto, kiu neniam eraras; la intelekto, pro tio, ke ĝi estas libera, iafoje povas erari.

Se la instinkta ago ne havas la karakteron de la ago intelekta, ĝi tamen elmontras *ian kaŭzon intelektan*, esence antaŭvideman. Se oni akceptas, ke la instinkto originas el la materio, oni devas do nepre akcepti, ke la materio estas inteligenta, efektive eĉ pli inteligenta kaj antaŭvidema ol la animo, ĉar la instinkto ja ne eraras, dum la intelekto trompiĝas.

Se oni rigardas la instinkton kiel ian rudimentan intelekton, kiel klarigi, ke, en certaj okazoj, ĝi estas supera al la rezon-kapabla intelekto? ke ĝi ebligas fari agojn, kiujn la intelekto ne povas plenumi?

Se ĝi estas atributo de ia specialnatura principo, kio ja estas tiu principo? Ĉar la instinkto estingiĝas, ĉu tio signifas, ke tiu principo forneniĝos? Se la bestoj estas dotitaj nur per la instinkto, ilia estonteco estas do senelira, iliaj suferoj havas nenian kompenson, kio ne konformus al la justeco, nek al la boneco de Dio (ĉap. II, n-ro 19).

13. – Laŭ aliaj sistemoj, instinkto kaj intelekto originas el unu sola principo: atinginte certan evolugradon, tiu principo,

kiu en la komenco havis nur la ecojn de la instinkto, spertus transformiĝon, kiu al ĝi donus la kvalitojn de la intelekto.

Se tiel estus, ĉe la inteligenta homo, kiu perdis la prudenton kaj estus gvidata nur de la instinkto, la intelekto revenus al sia primitiva stato, kaj, kiam li reakirus sian prudenton, la instinkto denove fariĝus intelekto, kaj tiel okazus alterne, ĉe ĉiu kriza atako, kio estas neakceptebla.

Cetere, intelekto kaj instinkto ofte elmontriĝas simultane en la sama ago. Ĉe marŝado, ekzemple, la movo de la gamboj estas instinkta; la homo maŝine metas unu piedon antaŭ la duan sen ia pripenso; sed kiam li volas rapidigi aŭ malrapidigi siajn paŝojn, levi la piedon aŭ sin deturni por eviti ian obstaklon, tiam estas kalkulo, decido; li agas laŭ decidita intenco. *La nevola impulso de la movo estas la instinkta ago; la antaŭdecidita direkto de la movo estas la inteligenta ago.* La karnomanĝa besto estas pelata de la instinkto sin nutri per karno, sed la antaŭzorgoj, kiujn ĝi faras kaj kiuj diversas laŭ la cirkonstancoj, por ke ĝi kaptu sian predon, krom ankaŭ ĝia antaŭvido pri la eventualaĵoj, estas agoj de la intelekto.

14. – Iu alia hipotezo, kiu krome perfekte kongruas kun la ideo pri unueco de principo, elfluas el la esence antaŭvide-ma karaktero de la instinkto kaj akordas kun tio, kion al ni instruas Spiritismo koncerne la rilatojn inter la spirita kaj la korpa mondoj.

Oni nun scias, ke, inter la elkarniĝintaj Spiritoj, iuj havas la mision prigardi la enkarnulojn, kies protektantoj kaj gvidantoj ili estas; ke ili envolvas la enkarnulojn en siajn fluidecajn emanaĵojn; ke la homo multfoje agas *nekonscie*, sub la efiko de tiuj emanaĵoj.

Oni krome scias, ke la instinkto, kiu per si mem estigas nekonsciajn agojn, superregas ĉe la infanoj kaj, ĝenerale, ĉe la

homoj kun malforta prudento. Nu, laŭ tiu hipotezo, la instinkto estus atributo nek de la animo, nek de la materio; ĝi propre ne apartenus al la vivanta estaĵo, ĝi ja estus ia *efiko* de la senpera agado de la nevideblaj protektantoj, kiuj helpus la nesufiĉecon de la intelekto, mem estigante la nekonsciajn agojn necesajn al la konservado de la estaĵo. Ĝi estus kvazaŭ paŝlernilo, per kiu oni subtenas la infanojn ankoraŭ ne sciantajn paŝi. Kaj kiel oni iom post iom forlasas la uzon de la paŝlernilo laŭmezure kiel la infano mem sin tenas, tiel same la protektantaj Spiritoj lasas siajn protektatojn agi per si mem, laŭmezure kiel ĉi tiuj povas sin gvidi per sia propra intelekto.

Tiel, anstataŭ ke ĝi estus la efiko de ia rudimenta kaj nekompleta intelekto, la instinkto ja estus la frukto de ia fremda inteligento *en la pleneco de sia forto*, inteligento protektanta, helpanta la nesufiĉecon, ĉu de iu inteligento pli juna, kiun la unua devigus fari, senkonscie, por sia bono, kion tiu ankoraŭ ne kapablas mem fari, ĉu de iu inteligento matura sed momente nebligita uzi siajn fakultojn, kiel ĉe la homo dum la infanaĝo kaj en la okazoj de idioteco kaj mensaj afekcioj.

Oni proverbe diras, ke ekzistas unu dio por la infanoj, frenezuloj kaj ebruloj, kaj tiu proverbo estas pli vera ol oni supozas. Tiu dio estas neniu alia, ol la protektanta Spirito, kiu prigradas la estulon nekapablan sin mem protekti per la propra prudento.

15. – En ĉi tiu klaso de ideoj, oni povas iri ankoraŭ pli malproksimen. Tiu teorio, kiel ajn racia ĝi estas, ne solvas ĉiujn malfacilaĵojn de la demando.

Se oni observas la efikojn de la instinkto, oni unue rimarkas ian unuecon laŭ la planado kaj laŭ la tuto, ian certecon pri rezultoj, kiuj ĉesas, kiam la instinkton anstataŭas

la libera intelekto. Krom tio, profunda saĝeco estas rekonata en la tiel perfekta kaj tiel konstanta alkonformiĝo de la instinktaj fakultoj al la bezonoj de ĉiu specio. Tia unueco de planado ne povus ekzisti sen la unueco de pensado, kaj ĉi tiu estas neakordigebla kun la diverseco de la individuaj kapabloj; nur ĝi povus estigi tiun tutajon tiel perfekte harmonian, kiu manifestiĝas ekde la origino de l' tempoj kaj en ĉiuj regionoj, kun reguleco kaj precizeco matematikaj, ne forestante iam ajn. La unuformeco en tio, rezultanta el la instinktaj fakultoj, estas karakteriza fakto, kiu nepre kuntrenas la *unuecon de la kaŭzo*. Se tiu kaŭzo estus esence propra al ĉiu individuo, ekzistus tiom da diversaj instinktoj, kiom da individuoj, ekde la vegetaĵo ĝis la homo. Efiko ĝenerala, unuforma kaj konstanta nepre devas havi kaŭzon ĝeneralan, unuforman kaj konstantan; efiko atestanta saĝon kaj antaŭvidon nepre devas havi kaŭzon saĝan kaj antaŭvidan. Nu, ĉar ia kaŭzo saĝa kaj antaŭvida nepre devas esti inteligenta, ĝi do tute ne povas esti ekskluzive materia. Ĉar ne troviĝas en la kreitoj, enkarniĝintaj aŭ elkarniĝintaj, la kvalitoj necesaj por estigi tian rezultaton, tial oni devas iri pli supren, nome ĝis la Kreinto mem. Se oni denove legas la klarigon donitan pri tio, kiel oni povas koncepti la providencan agadon (ĉap. II, n-ro 24); se oni imagas ĉiujn ekzistaĵojn penetritaj de la dia, superege inteligenta fluido, oni komprenas la antaŭvidan saĝecon kaj la unuecon de planado, kiuj direktas ĉiujn instinktajn movojn por la bono de ĉiu individuo. Des pli aktiva estas tiu prizorgo, ju malpli da rimedoj la individuo havas en si mem kaj en sia intelekto. Jen kial ĝi sin montras pli granda kaj absoluta ĉe la bestoj kaj la malsuperaj estaĵoj, ol ĉe la homo.

Laŭ tiu teorio, oni komprenas, ke la instinkto ĉiam estas fidinda gvidanto. La patrina instinkto, el ĉiuj la plej nobla, sed kiun materialismo mallevas ĝis la nivelo de la altirfortoj de la

materio, gajnas reliefon kaj noblecon. Pro siaj sekvoj, ĝi ne devus resti forlasita al la kapricaj eventualaĵoj de la intelekto kaj de la libervolo. *Pere de la patrino, Dio mem prigardas siajn naskiĝantajn kreitojn.*

16. – Tiu teorio neniel nuligas la rolon de la protektantaj Spiritoj, kies kunhelpado estas fakto efektiva, pruvita de la sperto; sed rimarkindas, ke ilia agado estas esence individua; ke ĝi aliiĝas, laŭ la esence propraj kvalitoj de l' protektanto kaj ties protektato, kaj ke nenie ĝi prezentas la unuformecon kaj la ĝeneralecon de la instinkto. Dio, laŭ sia saĝeco, kondukas, li mem, la blindulojn, sed li konfidas al liberaj intelektoj la zorgon gvidi la klarvidulojn, por ke ĉiu havu la respondecon pri siaj agoj. La misio de la protektantaj Spiritoj estas devo, kiu al ili havigas rimedon por progresi, depende de la maniero kiel ili tiun devon plenumas.

17. – Ĉiuj tiuj manieroj konsideri la instinkton nepre estas hipotezaj, kaj neniu el ili posedas sufiĉan verecon por esti rigardata kiel definitiva solvo. Certe la demando iam solviĝos, kiam kolektiĝos la ankoraŭ mankantaj elementoj de observado. Dume ni devas limiĝi al tio, ke ni submetu la diversajn opiniojn al la provilo de la racio kaj de la logiko, atendante, ke la lumo fariĝu. La solvo plej proksima al la vero nepre estas tiu, kiu plej bone konformiĝas al la atributoj de Dio, nome al la superega boneco kaj al la superega justeco. (Ĉap. II, n-ro 19.)

18. – Ĉar la animo havas, en la komenca fazo de sia disvolviĝo, la instinkton, kiel gvidanton, kaj la pasiojn, kiel instigantojn, kelkfoje unu kaj aliaj interkonfuziĝas ĉe siaj efikoj.

Estas tamen, inter ambaŭ principoj, diferencoj, kiujn oni nepre devas konsideri.

La instinkto estas fidinda, ĉiam bona gvidanto, kiu post certa tempo povas ja fariĝi senutila, sed kiu tamen neniam nocos. Ĝi malfortiĝas pro la superregado de la intelekto.

En la unuaj aĝoj de la animo, la pasioj havas tion komunan kun la instinkto, nome ke la estaĵoj tiam estas instigataj de egale nekonsciaj fortoj. La pasioj ĉefe originas el la korpaj bezonoj kaj pli dependas de la organismo ol kiel la instinkto. Distingas ilin de la instinkto ĉefe tio, ke ili estas individuaj kaj ne naskas, kiel ĉi tiu lasta, efikojn ĝeneralajn kaj unuformajn; male ili diversas, per la intenseco kaj per la naturo, laŭ la individuoj. Kiel stimuloj, ili utilas ĝis la ekapero de la morala senso, kiu, el pasiva, faras racian estaĵon; en ĉi tiu momento la pasioj fariĝas ne nur senutilaj sed ja nocaj al la progreso de la Spirito, kies liberiĝon el la materio ili malfruiĝas; ili mildiĝas kun la disvolviĝo de la racio.

19. – La homo, kiu ĉiam agas nur laŭ la instinkto, povus ja esti tre bona, sed li tenus dormanta sian inteligenton; li similus infanon, kiu, ne forlasante la paŝlernilojn, ne scius uzi siajn membrojn. Kiu ne regas siajn pasiojn, tiu povas esti tre inteligenta sed samtempe tre malbona. *La instinkto per si mem neniĝas; la pasiojn oni povas bridi nur per la forto de la volo.*

Reciproka sindetruado de la vivantaj estaĵoj

20. – La reciproka sindetruado de la vivantaj estaĵoj estas unu el la leĝoj de la Naturo, kiuj unuavide ŝajnas malplej konformiĝi al la boneco de Dio. Oni sin demandas, kial li

starigis al ili la neceson sin reciproke detrui, por ke unuj sin nutru koste de la vivo de la aliaj.

Por tiu, kiu vidas nenion pli krom la materio kaj limigas sian vidon al la nuna vivo, tio efektive ŝajnas esti ia neperfektaĵo en la dia verko. Tiel okazas, ĉar la homoj ĝenerale taksas la perfektecon de Dio laŭ sia propra vidpunkto; laŭ sia propra juĝo ili mezuras lian saĝon kaj tiel pensas, ke Dio ne povus fari pli bone, ol kiel ili mem farus. Ĉar ilia limita vido ne permesas al ili taksi la tuton, ili tial ne komprenas, ke reala bono povus rezulti el ŝajna malbono. Nur la konado de la spirita principo, laŭ ties vera esenco, kaj de la granda leĝo de unueco, el kiu fontas la harmonio de la kreaĵaro, povas havigi al la homo la ŝlosilon de tiu mistero kaj al li montri la providencan saĝecon kaj la harmonion ĝuste tie, kie li nur vidas anomalion kaj kontraŭdiron.

21. – *La vera vivo, kiel de la homo, tiel ankaŭ de la besto, ne estas en la korpa envolaĵo, kiel ankaŭ ne en la vestaro; ĝi troviĝas en la inteligenta principo, kiu antaŭekzistas kaj postvivas la korpon.* Tiu principo bezonas la korpon por disvolviĝi per la laboro, kiun ĝi devas fari super la kruda materio; la korpo konsumiĝas ĉe tiu laboro sed la Spirito ne eluziĝas; tute male, la Spirito ĉiufoje el ĝi eliras pli forta, pli klarmensa, kaj pli kapabla. Kio do gravas, ke la Spirito pli aŭ malpli ofte ŝanĝas sian envolaĵon?! Ĝi pro tio ne ĉesas esti Spirito. Okazas absolute tiel same, kiel se homo ŝanĝus siajn vestojn centfoje en jaro. Li pro tio ne ĉesus esti homo. Per la senĉesa spektaklo de la detruado, Dio instruas al la homoj, ke ili atribuu malmultan gravecon al la materia envolaĵo, kaj vekas en ili la ideon pri la spirita vivo, igante ilin deziri tiun vivon kiel ian kompenson. Oni objekto: ĉu Dio ne povus atingi la saman rezultaton per aliaj rimedoj, ne altrudante al la

vivantaj estaĵoj la reciprokan sindetruadon? Se ĉio en lia verko elmontras saĝecon, ni sekve devas supozi, ke tiu saĝeco nepre ne mankas ĉe tiu punkto, same kiel ĉe ĉiuj ceteraj; se ni tiel ne komprenas, tion ja kaŭzas nia malmulta progreso. Ni tamen povas provi la esploradon pri la kialo de la nekomprenataĵo, nin orientante laŭ la jena principo: *Dio nepre estas senfine justa kaj saĝa*; ni do en ĉio serĉu lian justecon kaj lian saĝecon kaj nin klinu antaŭ tio, kio translimas nian komprenon.

22. – La utilo, kiu unua elmontriĝas ĉe tia detruado – utilo sendube pure fizika – estas jena: la organaj korpoj konserviĝas nur helpo de la organikaj substancoj, kiuj solaj enhavas la nutraĵn elementojn necesajn al ties transformiĝo. Ĉar la korpoj, kiel instrumentoj por la agado de la inteligenta principo, bezonas konstante renoviĝi, tial la Providenco igas ilin servi al sia propra reciproka sinkonservado. Jen kial la estaĵoj sin nutras, unuj per la aliaj; ĉi-okaze estas la korpo, kiu sin nutras per la korpo, sed la Spirito ne estingiĝas nek ŝanĝiĝas; ĝi nur seniĝas je sia envolvajĝo.¹

23. – Cetere, estas moralaj konsideroj de pli alta nivelo.

La lukto necesas por la disvolviĝo de la Spirito. Ja en la lukto li agigas siajn kapablojn. Kiu atakas por al si havigi nutraĵon, kaj kiu sin defendas por konservi la propran vivon, tiuj ekzercas sin al ruzo kaj inteligento kaj sekve pligrandigas siajn intelektajn fortojn. Unu el ambaŭ pereas; sed efektive kion la pli forta aŭ pli lerta forprenis de la malpli forta? Nenion alian ol la karnan veston; poste, la Spirito, kiu ne mortis, surmetos alian.

¹ Vidu: *Revue Spirite*, Aŭgusto 1864, p. 241, “Estingiĝo de la rasoj”.

24. – Ĉe la malsuperaj estaĵoj de la kreaĵaro, nome tiuj, en kiuj la morala sento ne ekzistas kaj la inteligento ankoraŭ ne anstataŭis la instinkton, la lukton nur povas motivi la kontentigo de iu materia bezono. Nu, unu el la plej kontentigendaj bezonoj estas tiu de sinnutrado. Ili do luktas ekskluzive por la vivteno, nome por kapti aŭ defendi iun predon, ĉar pli alta motivo ne povus ilin impulsi. Dum tiu unua evolufazo la animo ellaboriĝas kaj sin preparas por la vivo. Ĉe la homo, estas iu transira fazo, en kiu li apenaŭ distingiĝas de la bruto. En la unuaj aĝoj superregas la besta instinkto, kaj la lukton ankoraŭ motivas la kontentigo de la materialaj bezonoj. Poste ekestas ekvilibro inter la besta instinkto kaj la morala sento; tiam la homo luktas ne plu por sin nutri sed por kontentigi la ambicion, la orgojlon, la strebon al superregado. Por tiu celo li ankoraŭ bezonas detruai. Sed, laŭmezure kiel lin pli influas la morala sento, disvolviĝas la sentemo, malfortiĝas la bezono de detruado, kiu fine malaperas pro tio, ke ĝi fariĝas abomena. Tiam la homo eksentas abomenon antaŭ sango.

Tamen, la lukto ĉiam estas necesa al la disvolviĝo de la Spirito, ĉar, eĉ atinginte tiun punkton, kiu al ni ŝajnas kulmina, li ankoraŭ estas tre malproksima de la perfekteco. Ne alie ol koste de sia aktiveco li akiras sciadon, sperton kaj seniĝas je la lastaj postsignoj de la besteco. Sed de tiam la lukto, kiu estis kruda kaj sanga, fariĝas pure intelekta. La homo luktas kontraŭ la malfacilaĵoj, ne plu kontraŭ siaj similuloj.¹

¹ Ne antaŭjuĝante la sekvojn, kiujn oni povus tiri el tiu principo, ni nur volis elmontri, per ĉi tiu klarigo, ke la reciproka sindetruado de la vivantaj estaĵoj neniel malkonfirmas la dian saĝecon kaj ke ĉio enĉeniĝas en la leĝoj de la Naturo. Tiu enĉeniĝo nepre rompiĝas se oni flanken metas la spiritan principon. Multaj demandoj restas nesolveblaj, se oni prenas en kalkulon nur la materion. La materialismaj doktrinoj portas en si memdetruan principon. Kontraŭ si ili havas ne nur la antagonismon al la universalismaj aspiroj de l'

ĈAPITRO IV

ROLO DE LA SCIENCO EN LA GENEZO

1. – La historio de la origino de preskaŭ ĉiuj antikvaj popoloj miksiĝas kun la historio de ilia religio, el kio rezultis, ke iliaj unuaj libroj estis religiaj; kaj ĉar ĉiuj religioj estas ligitaj al la principo de la ekzistaĵoj, kiu same estas la principo de la homaro, ili donis pri la formiĝo kaj strukturo de la Universo klarigojn konformajn tiel al la siatempaj scioj, kiel ankaŭ al la scioj de siaj fondintoj. El tio rezultis, ke la unuaj sanktaj libroj estis siatempe ne nur la unuaj sciencaj libroj, sed ankaŭ, dum longa tempo, la sola kodo de civilaj leĝoj.

2. – Ĉar en la primitivaj tempoj la rimedoj de observado neeviteble estis tre neperfektaj, la unuajn teoriojn pri la mondsistemo nepre difektis krudaj eraroj; sed eĉ se tiuj rimedoj estus tiel kompletaj kiel la hodiaŭaj, la tiamaj homoj

homoj kaj ties moralaj sekvoj, kiuj igos ilin esti repuŝataj kiel socikoruptantaj, sed ankaŭ la bezonon, kiun la homo spertas, ekscii ĉion rezultantan el la progreso. La intelekta disvolviĝo kondukas la homon al la esplorado pri la kaŭzoj. Nu, kiel ajn malmulte li pripensus, li ne malfrue rekonos kiel senpova estas materialismo por ĉion klarigi. Kiel eblus, ke venkus tiaj doktrinoj, kiuj kontentigas nek la koron, nek la racion, nek la intelekton; kiuj restigas problemaj la plej esencajn demandojn? La progreso de la ideoj mortigos materialismon, samkiel ĝi mortigis la fanatikecon.

ne scius ilin utiligi; cetere ili povus esti nenio alia ol la frukto de la disvolviĝo de la inteligento kaj de la konsekvenca konado pri la naturaj leĝoj. Laŭmezure kiel la homo progresis en la konado de tiuj leĝoj, li ankaŭ penetris la misterojn de la kreitaro kaj ĝustigis la ideojn, kiujn li faris pri la origino de la ekzistaĵoj.

3. – La homo restis senpova por solvi la problemon pri la kreado ĝis la Scienco al li donis la ŝlosilon. Necesis atendi, ĝis la Astronomio malfermis la pordojn de la senfina spaco kaj permesis al li tien penetrigi sian rigardon; ĝis li povis, per la potenco de l' kalkulado, precizigi, kun rigora ekzakteco, la movon, la pozicion, la volumenon, la naturon kaj la rolon de la ĉielaj korpoj; ĝis la Fiziko al li malkaŝis la leĝojn pri la gravito, la varmo, la lumo kaj la elektro; ĝis la Kemio al li montris la transformiĝojn de la materio kaj la Mineralogio la materialojn konsistigantajn la globsupraĵon; ĝis la Geologio instruis lin legi, en la surteraj tavoloj, la laŭgradan formiĝon de la globo. La Botaniko, la Zoologio, la Paleontologio, la Antropologio devis inici lin en la devenon kaj en la sinsekvon de la organaj estaĵoj; per la Arkeologio li povis spuri la postsignojn de la homaro tra la aĝoj; unuvorte, ĉiuj sciencoj, sin reciproke kompletigante, alportis sian kontribuaĵon nepre necesan por la konado de la monda historio. Manke de tiuj kontribuaĵoj la homo havis kiel gvidon nur siajn unuajn hipotezojn.

Tial, antaŭ ol la homo ekhavis tiujn rimedojn de observado, ĉiuj komentariintoj pri la Genezo, kies racio renkontis la baron de materialaj neeblecoj, turniĝadis en unu sama cirklo kaj el ĝi ne povis eliri. Ili sukcesis nur tiam, kiam la Scienco malfermis la vojon, farante breĉon en la malnova konstruaĵo de la kredoj. De tiam ĉio ŝanĝiĝis: eltroviĝis la

kondukanta fadeno kaj tuj glatiĝis la malfacilaĵoj. Anstataŭ ia imaga Genezo, stariĝis Genezo pozitiva kaj iagrade eksperimenta; la kampo de la Universo etendiĝis ĝis la senfino; oni ekvidis la Teron kaj la astrojn grade formiĝi laŭ leĝoj eternaj kaj neŝanĝeblaj, kiuj pli bone atestas pri la grandeco kaj la saĝeco de Dio ol ia mirakla kreaĵaro, unufrape elirinta el la nenio, kvazaŭ tuj videbla ŝanĝiĝo, pro ia subita ideo de la Dia Estaĵo post eterna nenifarado. Ĉar estas neeble koncepti la Genezon sen la donitaĵoj liverataj de la Scienco, oni povas laŭ la tuta vero aserti, ke: *la Sciencon koncernas starigi la veran Genezon, laŭ la leĝoj de la Naturo.*

4. – Ĉe la punkto, kiun ĝi atingis en la dek-naŭa jarcento, ĉu la Scienco solvis ĉiujn malfacilaĵojn de la problemo pri la Genezo?

Certe ne; sed estas nekontesteble, ke ĝi definitive disbatis ĉiujn ĉefajn erarojn kaj al ĝi starigis la esencajn fundamentojn surbaze de nerefuteblaj donitaĵoj. La ankoraŭ dubaj punktoj estas ĝustadire nenio alia ol pridetalaj aferoj, kies solvo, kia ajn ĝi estos en la estonteco, ne povos malutili al la tuto. Krom tio, malgraŭ la rimedoj, kiujn ĝi disponis, grava elemento al ĝi mankis ĝis nun, sen kiu la verko neniam povus kompletiĝi.

5. – El ĉiuj antikvaj Genezoj, la plej proksima al la modernaj sciencaj donitaĵoj, malgraŭ ĝiaj nun evidentigitaj eraroj, sendube estas tiu de Moseo. Kelkaj el tiuj eraroj estas eĉ pli ŝajnaj ol realaj kaj ja devenas, ĉu de malĝusta interpretaĵo de certaj vortoj, kies primitiva signifo perdiĝis ĉe ilia pertraduka transpaso de unu lingvo al alia, aŭ kies senco ŝanĝiĝis kun la moroj de l' popoloj, ĉu ankaŭ de la alegoria

formo esence propra al la orienta stilo, kiun oni prenis laŭlitere anstataŭ serĉi ties spiriton.

6. – La Biblio evidente enhavas faktojn, kiujn la racio, disvolvita de la Scienco, ne povus hodiaŭ akcepti, krom ankaŭ aliaj, kiuj impresas strange kaj abomene, pro tio, ke ili fontas el moroj, kiujn ni ne plu sekvas. Sed, krom tio, estus partiece ne agnoski, ke ĝi entenas grandajn kaj belajn aferojn. La alegorio tie okupas rimarkindan spacon kaj kaŝas sub sia vualo sublimajn veraĵojn, kiuj elmontriĝas se oni serĉas la fundon de la penso, ĉar tiam tuj malaperas la absurdaĵo.

Kial do oni ne pli frue levis tiun vualon? De unu flanko, pro la manko de lumoj, kiujn povus havigi nur la Scienco kaj ia sana filozofio, kaj, de alia flanko, pro la principo de la absoluta neŝanĝebleco de la fido, bazita sur tro blinda respekto al la litero, antaŭ kiu la racio devis sin klini, sekve do pro la timo kompromiti la strukturon de la kredoj, sidigitan sur la laŭlitera senco. Ĉar tiuj kredoj deiris de unu primitiva punkto, oni timis, ke, en la okazo se rompiĝus la unua ero de la ĉeno, fine malligiĝus ĉiuj maŝoj de la reto; jen kial oni obstine tenis fermitaj la okulojn; sed oni ne evitas danĝeron fermante antaŭ ĝi la okulojn. Kiam konstruaĵo kliniĝas, ĉu ne estas pli prudente tuj anstataŭigi la malbonajn ŝtonojn per bonaj, prefere ol atendi, pro respekto al la malnoveco de la konstruaĵo, ke la malbono iĝu neriparebla kaj ke tiel oni estu devigita ĝin tute rekonstrui?

7. – Kondukante siajn esplorojn ĝis la internaĵoj de la Tero kaj la profundaĵoj de la ĉieloj, la Scienco nerefuteble elmontris la erarojn de la mosea Genezo, prenita laŭlitere, kaj la materian neeblecon, ke la aferoj okazis ĝuste tiel, kiel ili estas tie laŭvorte rakontitaj. Ja per tio ĝi donis fundan baton al

jarcentaj kredoj. La ortodoksa fido ekstremis, kredante vidi elmovita sian fundamentan ŝtonon. Sed kiu ja pravis: ĉu la Scienco, kiu marŝis prudente kaj progresive sur la solida tereno de la ciferoj kaj de la observado, nenion asertante antaŭ ol ekhavi la pruvon, aŭ ĉu rakonto skribita en epoko, kiam absolute mankis rimedoj de observado? Kiu fine nepre venkos: ĉu tiu, kiu diras, ke 2 kaj 2 faras 5, kaj rifuzas ĉian kontrolon, aŭ ĉu tiu, asertanta, ke 2 kaj 2 faras 4, kaj ĝin pravas?

8. – Sed ĉi-okaze, oni diras, se la Biblio estas dia revelacio, ĉu Dio trompiĝis? Se ĝi ne estas ia dia revelacio, ĝi ne plu havas aŭtoritaton, kaj do la religio disfalas manke de bazo.

El du aferoj, unu: aŭ la Scienco eraris, aŭ ĝi pravas. Se ĝi pravas, ĝi ne povas fari vera opinion, kiu ĝin kontraŭdiras. Ne estas revelacio, kiu povus superstari la aŭtoritatecon de la faktoj.

Nekontestebly Dio, estante mem la tuta vero, ne povas konduki la homojn, scie aŭ sence, en eraron, ĉar kontraŭe li ne estus Dio. Se do la faktoj kontraŭdiras la vortojn al li atribuatajn, nepras logike konkludi, ke li ilin ne eldiris, aŭ ke ili estis prenitaj kontraŭ sia propra senco.

Se, pro tiuj kontraŭdiroj, la religio suferas difektojn, kulpas ne la Scienco, kiu ne povas neestigi tion, kio estas; kulpas ja la homoj, kiuj antaŭtempe starigis absolutajn dogmojn, kies tenadon ili faris afero pri vivo kaj morto, surbaze de hipotezoj, kiujn la sperto povus malkonfirmi.

Estas aferoj, pri kies rezigno ni devas, vole aŭ nevole, rezignacii, kiam ni ilin ne povas eviti. Se la mondo marŝas, nehaltigebla por la volo de kelkiuj, estas do pli saĝe akompani la mondon kaj adaptiĝi al la nova stato de la aferoj, anstataŭ alkroĉiĝi al la disfalanta pasinteco, riskante fali kun ĝi.

9. – Ĉu oni devus, pro respekto al tekstoj rigardataj kiel sanktaj, trudi silenton al la Scienco? Tio estus tiel neebla kiel haltigi la giradon de la Tero. La religioj, kiuj ajn ili estas, neniam gajnis iom ajn subtenante evidentajn erarojn. La misio de la Scienco estas malkovri la leĝojn de la Naturo. Nu, ĉar tiujn leĝojn faris Dio, ili ne povas kontraŭdiri la religiojn, kiuj sin bazas sur la vero. Anatemu la progreson kiel atencanton kontraŭ la religio estas anatemi la verkon mem de Dio. Cetere, tio estas vana peno, ĉar eĉ ne ĉiuj anatemoj de la mondo kapablas neebliĝi, ke la Scienco antaŭeniĝu kaj la vero brilu. *Se la Religio rifuzas marŝi kun la Scienco, ĉi tiu marŝos sola.*

10. – Nur la sensanĝaj religioj povas timi la malkovrojn de la Scienco, kiuj estas pereigaj nur al tiuj, kiuj lasas sin apartigi pro la progresigaj ideoj, senmoviĝante en la absoluteco de siaj instruoj. Ili ĝenerale faras al si tiel mizeran ideon pri la Dia Estaĵo, ke ili ne komprenas, ke asimili la leĝojn de la Naturo malkaŝitajn de la Scienco ja estas glori Dion en liaj verkoj. Sed pro sia blindeco ili preferas omaĝi la Spiriton de malbono. *Religio, kiu, eĉ per unu punkto, ne kontraŭdirus la leĝojn de la Naturo, ja neniel devus timi la progreson kaj estus do neatingebla.*

11. – La Genezo entenas du partojn: la historion pri la formado de la materia mondo kaj la historion de la homaro, el la vidpunkto de ties duobla principo, nome la korpa kaj la spirita. La Scienco limigis sin al la esplorado pri la leĝoj regantaj la materion. Koncerne la homon mem ĝi nur studis la karnan envolaĵon. Ĉi-rilate ĝi atingis la konadon, kun nekontestebla ekzakteco, de la ĉefaj partoj de la mekanismo de l' Universo kaj de la homa organismo. Ĝi tiel povis, koncerne

tiun gravan punkton, kompletigi la Genezon de Moseo kaj korekti ties erarojn.

Sed la historio de la homo, rigardata kiel spirita estaĵo, estas ligita al aparta klaso de ideoj, kiuj ne apartenas al la ĝustasenca Scienco kaj kiujn, pro tio, ĝi ne faris objekton de sia esplorado. La Filozofio, kies celado pli aparte entenas tiun klason de studoj, formulis pri tiu punkto nur kontraŭdirajn sistemojn, ekde la pura spiriteco ĝis la neado de la spirita principo kaj de Dio mem, sin bazante sur nenio alia krom la personaj ideoj de ties aŭtoroj. Ĝi do lasis la aferon nesolvita manke de sufiĉa kontrolo.

12. – Tiu demando tamen estas la plej grava por la homo, ĉar temas pri la problemo de lia pasinteco kaj de lia estonteco. Tiu pri la materia mondo nur nerekte lin tuŝas. Antaŭ ĉio gravas al li scii, de kie li venis, kien li iras, ĉu li ankoraŭ vivos, kia sorto estas al li rezervita. Pri ĉiuj ĉi punktoj la Scienco daŭre silentas. La Filozofio, nur liverante opiniojn, kies konkludoj montras al diametre kontraŭa direkto, tamen almenaŭ permesas la diskuton, kio igas multajn personojn al ĝi alflankiĝi prefere ol resti ĉe la Religio, kiu diskuton ja ne ebligas.

13. – Ĉiuj religioj estas en akordo pri la principo de la ekzisto de la animo, sed tion ne elmontras. Ili tamen ne interakordas koncerne ties originon, pasintecon, estontecon, nek precipe – kaj tio ja estas esenca afero –, koncerne la kondiĉojn, de kiuj dependas ĝia estonta sorto. Ili pliparte prezentas pri ĝia estonteco bildon, kiun ili trudkredigas al siaj adeptoj kaj kiun nur la blinda fido povas akcepti, ĉar ĝi ja ne eltenas seriozan ekzamenon. Ligita, laŭ iliaj dogmoj, al la ideoj, kiujn, en la primitivaj tempoj, oni havis pri la materia

mondo kaj pri la mekanismo de la Universo, la destino, kiun ili difinis por la animo, estas neakordigebla kun la nuntempa nivelo de la homa sciaro. Devante do nur perdi ĉe la ekzameno kaj la diskutado, la religioj trovas pli simpla ambaŭ proskribi.

14. – De tiuj malkonsentoj koncernantaj la estontecon de la homo naskiĝis dubo kaj nekredemo. Sed la nekredemo postlasas mornan vakuon. La homo angore rigardas la nekonataĵon, en kiun li, pli aŭ malpli frue, devas fatale eniri. Frostigas lin la ideo pri la nenio. La konscienco diras al li, ke io, trans la nuno, estas al li rezervita. Sed kio? Lia racio, jam disvolviĝinta, ne permesas al li kredi la historiojn, per kiuj oni luladis lin en la infaneco, nek preni alegorion por la realo. Kiun sencon havas tiu alegorio? La Scienco deŝiris anguleton de la vualo, sed ĝi ne malkaŝis al li, kion plej gravan li devas scii. Vane li demandas, ĉar ĝi nenion respondas en maniero kategoria kaj taŭga por kvietigi lian maltrankvilon. Ĉie li trovas la aserton kolizianta kun la neado, sen pozitivaj pruvoj, nek de unu flanko, nek de la alia. De tio venas la necerteco, *kaj la necerteco pri la estonta vivo igas la homon sin ĵeti, kun iaspeca frenezo, al la aferoj de la materia vivo.*

Tiu ja estas la neevitebla efiko de la transiraj epokoj: disfalas la konstruaĵo de la pasinteco dum ankoraŭ ne stariĝis tiu de la estonteco. La homo similas adoleskanton, kiu, ne plu havante la naivan kredon de siaj unuaj jaroj, tamen ankoraŭ ne posedas la sciojn proprajn al la matura aĝo. Li nur eksentas svagajn aspirojn, kiujn li ne scias difini.

15. – Se la demando pri la spirita homo restis ĝis nun kiel teorio, tio ĉi estas tial, ke mankis rimedoj por rekta observado, kiajn oni disponis por konstati la staton de la

materia mondo, pro kio tiu kampo restis aperta al la konceptoj de la homa spirito. Dum la homo ne konis la leĝojn regantajn la materion kaj ne povis apliki la eksperimentan metodon, li eraris de sistemo al sistemo koncerne la mekanismon de la Universo kaj la formiĝon de la Tero. Kaj kiel okazis en la fizika, tiel same fariĝis en la morala sfero. Mankis, por la fiksado de la ideoj, la esenca elemento, nome la konado de la leĝoj, al kiuj submetiĝas la spirita principo. Tiu konado estis rezervita al nia epoko, kiel la konado de la leĝoj pri la materio estis la konkero de la du lastaj jarcentoj.

16. – Ĝis nun, la studo pri la spirita principo, enfermita en la limoj de Metafiziko, estis pure spekulativa kaj teoria. Ĉe Spiritismo ĝi estas tute eksperimenta. Helpe de la mediuma kapablo, nuntempe pli disvolviĝinta kaj pli funde studita, la homo ekdisponis novan instrumenton de esplorado. La mediumeco estis por la spirita mondo tio sama kiel la teleskopoj por la astra mondo kaj la mikroskopo por la mondo de la malgrandegaĵoj. Ĝi ebligis, ke oni, por tiel diri *de visu*, esploru, studu la rilatojn inter tiu mondo kaj la korpa mondo; ke ĉe la vivanta homo oni apartigu la intelektan disde la materia estaĵo kaj observu ilin ambaŭ malkune agantaj. Post kiam efektiviĝis la interrilatoj kun la loĝantoj de la spirita mondo, oni povis sekvi la animon en ties ascenda marŝo, en ties migradoj, en ties transformiĝoj; fine, oni povis studi la spiritan elementon. Jen kio mankis al la antaŭaj komentariantoj pri la Genezo por ĝin kompreni kaj korekti ĝiajn erarojn.

17. – Estante en senĉesa kontakto, la spirita kaj la materia mondoj estas reciproke solidaraj; ambaŭ partoprenas per sia agado en la Genezo. Sen la konado de la leĝoj regantaj la unuan, starigi kompletan Genezon estus tiel same neeble,

kiel al statuisto havigi vivon al statuo. Nur nun, kvankam nek la materia scienco, nek la spirita scienco, diris sian lastan vorton, la homo posedas la du elementojn taŭgajn por prilumi tiun vastegan problemon. Tiuj du ŝlosiloj estis al li nepre necesaj por ke li venu al ia solvo, eĉ se nur proksimuma.

ĈAPITRO V

ANTIKAJ KAJ MODERNAJ SISTEMOJ DE LA MONDO

1. – La unua ideo, kiun la homoj faris al si pri la Tero, pri la movado de la astroj, pri la konsisto de la Universo nepre estis, en la komenco, ekskluzive bazita sur la atesto de la sensoj. Neniom sciante pri la plej elementaj leĝoj de la Fiziko kaj pri la fortoj de la Naturo, kaj nur disponante sian limigitan vidadon kiel rimedon de observado, la homoj povis juĝi nur laŭ la ŝajnoj.

Vidante la Sunon matene aperi sur unu flanko de la horizonto kaj vespere malaperi sur la flanko kontraŭa, ili nature konkludis, ke ĝi rondiras ĉirkaŭ la Tero dum ĉi tiu restas senmova. Se oni tiam asertus al ili, ke okazas ĝuste la malo, ili kontraŭdirus, ke tio ja ne eblas, kaj ili objektus: ni vidas la Sunon delokiĝi kaj ni ne sentas, ke la Tero moviĝas.

2. – La nelongdistancaj vojaĝoj, kiuj tiam ne transpasis la limojn de la tribo aŭ de la valo, ne permesis, ke oni konstatu la sferecon de la Tero. Cetere, kiel supozi, ke la Tero povus esti ia bulo? La homoj nur povus sin teni sur ties plej alta punkto, kaj ĝin supozante tutsupraĝe loĝata, kiel ili vivus sur la kontraŭa hemisfero, la kapon malsupren kaj la piedojn

supren? Tio ŝajnus ankoraŭ malpli ebla ĉe la okazo de ia rotacia movo. Kiam oni vidas ankoraŭ en la nunaj tagoj, en kiuj ja estas konata la leĝo de gravito, ke personoj relative instruitaj ne perceptas tiun fenomenon, oni devas ne surpriziĝi de tio, ke la homoj vivintaj en la unuaj epokoj eĉ ne suspektis ĝin.

La Tero estis do por ili ia ebenaĵo, ronda kiel muelŝtono, horizontale etendiĝanta ĝis nevidebliĝo. De tio venas la ankoraŭ uzata esprimo: iri ĝis la fino de la mondo. Al ili estis nekonataj ĝiaj limoj, dikeco, interno, ĝia malsupra surfaco kaj tio, kio estis sub ĝi.¹

3. – Montriĝante konkava, la ĉielo, laŭ la vulgara kredo, estis rigardata kiel reala volbo, kies malsupraj randoj sidis sur la Tero kaj difinis ties limojn; ia vasta kupolo, kies internon la aero tute plenigis. Neniom sciante pri la senfina spaco, estante ja nekapablaj ĝin koncepti, la homoj imagis, ke tiu volbo konsistas el solida materio, de kio venas la nomo *firmamento*,

¹ “La hinda mitologio instruis, ke ĉe vesperiĝo la astro de la tago seniĝas je sia lumo kaj kun malluma vizaĝo dumnokte trairas la ĉielon. La greka mitologio prezentis la ĉaron de Apolono tirata de kvar ĉevaloj. Laŭ Plutarko, Anaksimandro el Mileto asertadis, ke la Suno estas ia ĉaro plena de tre viva fajro, kiu elŝprucas tra ronda aperturo. Laŭ unuj, Epikuro eldiris la opinion, ke la Suno eklumas matene kaj mallumiĝas dum la nokto en la akvoj de la oceano; laŭ aliaj, li rigardis tiun astron ia pumiko varmigita ĝis la inkandesko. Anaksagoro ĝin prenis por ardeganta feraĵo granda kiel la Peloponezo. Kurioza rimarkindaĵo! la antikvuloj estis tiel nerezisteble instigataj kredi reala la ŝajnan grandecon de tiu astro, ke ili persekutis tiun temeraran filozofon, kiu atribuis tielan volumon al la torĉo de la tago, pro kio necesis la tuta aŭtoritato de Periklo por lin savi de mortkondamno kaj indulge ŝanĝi tiun punon en ekzilon.” (Flammarion, *Studoj kaj legaĵoj pri Astronomio*, p. 6.)

Ĉe tiaj ideoj, eldiritaj en la kvina jarcento antaŭ la Kristo, en la tempo kiam Grekujo plene floradis, oni ne povas miri pro tiuj, kiujn la homoj de la unuaj epokoj faris pri la sistemo de la mondo.

nomo transvivinta tiun kredon kaj signifanta: *firma, rezista* (el la latina *firmamentum*, derivita el *firmus*, kaj el la greka *herma, hermatos*, firma, subtenilo, subapogilo, apogpunkto).

4. – La steloj, pri kies naturo ili ne povis suspekti, estis simplaj lumaj punktoj, pli aŭ malpli volumenaj, alfiksitaj al la volbo kvazaŭ pendantaj lampoj, dismetitaj sur unusola surfaco, kaj konsekvence situantaj je sama distanco de la Tero, kiaj oni ilin prezentas en la interno de certaj kupoloj, blue farbitaj kiel refiguraĵo de la kupolo ĉiela.

Kvankam tute aliaj estas la hodiaŭaj ideoj, tamen daŭre restis la uzado de la antikvaj esprimoj. Oni ankoraŭ diras, por komparo: la stelplena volbo, sub la ĉiela kupolo.

5. – Same nekonata estis tiam la formiĝo de la nuboj el la vaporigo de la surteraj akvoj. Al neniu povus veni la ideo, ke la pluvo, falanta de la ĉielo, havas sian originon sur la Tero, de kie ja neniu vidis la akvon supreniri. De tio venas la kredo je la ekzisto de *akvoj supraj* kaj *akvoj malsupraj*, de fontoj ĉielaj kaj fontoj surteraj, de akvujoj starantaj en altaj regionoj, kaj tiu supozo perfekte akordas kun la ideo de ia solida volbo kapabla ĉion ĉi subteni. La supraj akvoj, eliĝante tra la fendoj de la volbo, faladis pluvoforme kaj, laŭ tio, ĉu la fendoj estis pli aŭ malpli larĝaj, la pluvo estis modera, torenta aŭ diluva.

6. – La absoluta nesciado pri la Universo kiel tutaĵo, pri la leĝoj ĝin regantaj, pri la naturo, konsisto kaj celo de la astroj, kiuj cetere ŝajnis tiel malgrandaj kompare kun la Tero, nepre kaŭzis, ke ĉi tiun oni rigardu la ĉefaĵo, la sola celo de la kreado, kaj ke oni rigardu la astrojn kiel akcesoraĵojn kreitajn ekskluzive por ties loĝantoj. Tiu eraro daŭre restis ĝis hodiaŭ malgraŭ la malkovroj de la Scienco, kiuj ŝanĝis, por la homo,

la vizaĝon de la mondo. Kiom multaj ankoraŭ kredas, ke la steloj estas ornamaĵoj de la ĉielo destinitaj plezurigi la okulojn de la surteraj loĝantoj!

7. – Sed pasis ne longa tempo ĝis oni perceptis la ŝajnan movon de la steloj, kiuj amase translokiĝas de la oriento al la okcidento, leviĝante ĉe la vesperiĝo, kaŝiĝante en la mateno, ĉiam restante ĉe siaj respektivaj pozicioj. Sed tiu observo longatempe havis ne alian sekvon, ol konfirmi la ideon pri ia solida volbo kuntrenanta la stelojn en sia rotacia movo.

Tiuj unuaj naivaj ideoj konsistigis, dum longaj jarcentaj periodoj, la fundamenton de la religiaj kredoj kaj servis kiel bazo al ĉiuj antikvaj kosmogonioj

8. – Poste, pro la direkto de la movo de la steloj kaj pro ilia perioda reveno laŭ la sama vico, oni komprenis, ke la ĉiela volbo simple ne povas esti ia duonsfero metita sur la Tero, sed ja tuta malplena sfero, en kies centro troviĝas la Tero, ĉiam plata, aŭ maksimume konvekso, kaj loĝata nur sur la supra surfaco. Tio jam prezentis ian progreson.

Sed sur kio sidis la Tero? Estus senutile raporti ĉiujn ridindajn supozojn, naskitajn de la imago, ekde tiuj de la hindoj, kiuj ĝin asertis tenata de kvar blankaj elefantoj starantaj sur la flugiloj de enorma vulturo. La plej saĝaj konfesis, ke pri tio ili scias nenion.

9. – Sed ia opinio, ĝenerale dissemita ĉe la paganaj teogonioj, tamen situigis en la *malaltaj lokoj*, alivorte en la profundaĵoj de la Tero, aŭ sub ĝi, oni tion ne precize sciis, la loĝejon de la damnitaj, nomatan *infero*, tio estas, *malsupraj lokoj*, kaj en la *altaj lokoj*, trans la regiono de la steloj, la

loĝejon de la beatuloj. La vorto *infero* restis ĝis la hodiaŭaj tagoj, kvankam ĝi perdis sian etimologian signifon de post kiam la Geologio fortiris el la internaĵo de la Tero la lokon de la eternaj turmentoj, kaj la Astronomio elmontris, ke en la senfina spaco estas nek supro nek malsupro.

10. – Sub la pura ĉielo de Ĥaldeujo, Hindujo kaj Egiptujo, lulilo de la plej antikvaj civilizacioj, oni povis observi la movon de la astroj kun tiom da precizeco, kiom ĝin permesis la manko de specialaj instrumentoj. Oni unue rimarkis, ke certaj steloj havas propran movon, ne dependan de la maso, kio ne allasis la supozon, ke ili estas fiksitaj al la volbo. Tiujn oni nomis *vagantaj steloj* aŭ *planedoj*, por ilin distingi de la fiksaj steloj. Oni kalkulis iliajn movojn kaj periodajn revenojn. Ĉe la diurna movo de la stelplena sfero, oni rimarkis la senmovecon de la Polusa Stelo, ĉirkaŭ kiu la aliaj strekis, en dudek kvar horoj, paralelajn, oblikvajn cirklojn, pli aŭ malpli grandajn laŭ la distancoj, kiuj ilin apartigis de la centra stelo. Ĉi tio prezentis la unuan paŝon al la konado de la oblikveco de la monda akso. Pli longaj vojaĝoj permesis, ke oni observu kiel inter si diferencas la aspektoj de la ĉielo laŭ la latitudoj kaj la sezonoj. La konstato, ke la alteco de la Polusa Stelo super la horizonto varias laŭ la latitudo, malfermis la vojon al la ekscio pri la rondecigo de la Tero. Estis ja tiel, ke oni iom post iom faris al si ideon pli ĝustan pri la sistemo de la mondo. Ĉirkaŭ la jaro 600 antaŭ la Kristo, *Taleso*, el Mileto (Malgrandazio) malkovris la sferecon de la Tero, la oblikvecon de la ekliptiko kaj la kaŭzon de la eklipsoj.

Unu jarcenton poste, *Pitagoro*, el Samoso, malkovras la diurnan movon de la Tero ĉirkaŭ sia akso, ĝian jaran movon ĉirkaŭ la Suno, kaj alligas la planedojn kaj la kometojn al la sunsistemo.

160 jarojn antaŭ Kristo, *Hiparko*, el Aleksandrio (Egiptujo), inventas la astrolabon, kalkulas kaj antaŭdiras la eklipsojn, observas la sunajn makulojn, determinas la tropikan jaron, la daŭron de la lunaj rivoluoj.

Kiel ajn valoraj estis tiuj malkovroj por la progreso de la Scienco, ili tamen devis atendi ĉirkaŭ 2000 jarojn por populariĝi. Tiam disponante, por disvastiĝi, nenion alian krom raraj manuskriptoj, la novaj ideoj restis posedaĵo de kelkaj filozofoj, kiuj ilin instruadis al privilegiitaj disĉiploj. La amasoj, pri kies klerigo oni apenaŭ zorgis, el ili neniom profitis kaj daŭre sin nutradis per la malnovaj kredoj.

11. – Ĉirkaŭ la jaro 140 de la kristana erao, *Ptolemeo*, unu el la plej eminentaj figuroj de la Aleksandria Skolo, kombinante siajn proprajn ideojn kun la vulgare kredoj kaj kun kelkaj el la tiamaj freŝaj astronomiaj malkovroj, formis sistemon, portantan lian nomon, kiun oni povas klasigi kiel mikskonsistan kaj kiu, dum preskaŭ dek-kvin jarcentoj, restis la sola adoptita de la civilizita mondo.

Laŭ la sistemo de Ptolemeo, la Tero estas sfero situanta en la centro de la Universo kaj konsistanta el kvar elementoj: tero, akvo, aero kaj fajro. Ĉi tio prezentis la unuan regionon, nomatan *elementa*. La dua regiono, nomata *etera*, ampleksis dek-unu ĉielojn, aŭ samcentrajn sferojn, kiuj rondiris ĉirkaŭ la Tero, nome la ĉielo de la Luno, tiuj de Merkuro, de Venuso, de la Suno, de Marso, de Jupitero, de Saturno, de la fiksj steloj, de la unua kristalino, ia solida, travidebla sfero; de la dua kristalino kaj, laste, de la unua movilo, kiu komunikis movon al ĉiuj malsupraj ĉieloj kaj igis ilin fari unu rivoluon en dudek kvar horoj. Transe de tiuj dek-unu ĉieloj troviĝis la *Empireo*, loĝejo de la beatuloj. Tiu nomo devenis de la greka

pur aŭ *pur*, kiu signifas *fajron*, ĉar oni kredis, ke tiu regiono lumbrilegis kiel la fajro.

Longan tempon regis la kredo je pluraj supermetitaj ĉieloj, kies nombro tamen variadis. La sepa ĉielo estis ĝenerale rigardata kiel la plej supera, kaj de tio venas la esprimo: esti levita en la sepan ĉielon. Sankta Paŭlo diris, ke li estis levita ĝis en la trian ĉielon.

Krom la ordinara movo, la astroj havis, laŭ Ptolemeo, proprajn movojn, pli aŭ malpli vastajn konforme al siaj distancoj de la centro. La fiksj steloj faris kompletan rivoluon en 25.816 jaroj. Ĉi tiu kalkulo elmontras la konadon de la ekvinoxsa precesio, kiu efektive kompletiĝas en 25.868 jaroj.

12. – En la komenco de la dek-sesa jarcento, *Koperniko*, mondfama astronomo naskita en Thorn (Prusujo), en 1472, kaj mortinta en 1543, reprenis la ideojn de Pitagoro kaj publikigis sistemon, kiu, ĉiutage konfirmata de novaj observoj, renkontis favoran akcepton kaj baldaŭ renversis tiun de Ptolemeo. Laŭ la Kopernika sistemo, la Suno lokiĝas en la centro, la planedoj laŭiras cirklajn orbitojn ĉirkaŭ ĝi, kaj la Luno estas satelito de la Tero.

Post unu jarcento, en 1609, Galileo, naskita en Florenco, inventas la teleskopon; en 1610, li malkovras la kvar¹ satelitojn de Jupitero kaj kalkulas ties rivoluojn; li konstatas, ke la planedoj, diference de la steloj, ne havas propran lumon sed estas prilumataj de la Suno; ke ili estas sferoj similaj al la Tero; li observas iliajn fazojn kaj determinas la daŭron de ilia rotacio ĉirkaŭ la propraj aksoj, tiel liverante, per materiaj pruvoj, definitivan sankcion al la sistemo de Koperniko.

¹ Ĝis nun estas jam malkovritaj 16 Jupiteraj satelitoj. – *Noto de la Trad.*

De tiam disfalis la konstruo de la supermetitaj ĉieloj; oni rekonis, ke la planedoj estas mondoj similaj al la Tero kaj, same kiel ĝi, sendube loĝataj; ke la steloj estas sennombraj sunoj, verŝajnaj centroj de aliaj planedsistemoj, dum la Sunon oni rekonis kiel stelon, centron de ia kirlo el planedoj al ĝi submetitaj.

La steloj ne plu estas enfermitaj en iu regiono de la ĉiela sfero sed troviĝas dissemataj en la senlima spaco; tiuj, ŝajne kuntuŝiĝantaj, ja malproksimas inter si je nemezureblaj distancoj; la ŝajne malplej grandaj estas tiuj plej fore distancaj de ni, dum la plej grandaj estas tiuj plej proksimaj, kvankam, eĉ tiel, ili foras je centoj da miliardoj da leŭgoj.

La grupoj, kiujn oni nomis *konstelacioj*, estas nenio alia, ol ŝajnaj agregaĵoj estigitaj de la distanco; iliaj figuroj rezultas el la efiko de la perspektivo, similaj al tiuj, kiujn la lumoj dissemataj en vasta ebenaĵo, aŭ la arboj en arbaro, prezentas al la vido de iu lokita en fiksa punkto. Sed efektive tiuj grupoj ne ekzistas. Se al ni eblus transportiĝi en la regionon de unu el tiuj konstelacioj, ties formo, laŭmezure kiel ni proksimiĝus al ĝi, malaperus, dum novaj grupoj desegniĝus al nia vido.

Se tiaj grupoj ne ekzistas, krom laŭŝajne, do la signifo, kiun vulgara, superstiĉa kredo al ili atribuas, estas iluzia, kaj ilia influo ne povas ekzisti krom en la imago.

Por distingi la konstelaciojn, unujn de la aliaj, oni al ili donis tiajn nomojn, kiel jenaj: *Leono, Taŭro, Ĝemeloj, Virgo, Pesilo, Kaprikorno, Kankro, Oriono, Herkulo, Granda Ursino* aŭ *ĉaro de Davido, Malgranda Ursino, Liro*, ktp, kaj oni ilin reprezentis per figuroj, plejparte fantaziaj, kiujn tiuj nomoj memorigas, figuroj neniel respondaj, en ĉiuj kazoj, al la ŝajna formo de tiuj stelgrupoj. Estus ja vane serĉi tiajn formojn en la ĉielo.

La kredo je la influo de la konstelacioj, precipe de tiuj formantaj la dek-du signojn de la zodiako, devenis de la ideo ligita al iliaj nomoj. Se tiun, nomatan *leono*, oni nomintus *azeno* aŭ *ŝafino*, oni certe al ĝi estus atribuinta tute alian influon.

13. – De post Koperniko kaj Galileo, la malnovaj kosmogonioj por ĉiam malaperis: la Astronomio povis nur antaŭeniĝi, neniel regresi. La Historio atestas pri la luktoj, kiujn tiuj genioj devis tenadi kontraŭ la antaŭjuĝoj kaj, precipe, kontraŭ la sektismo, kiun interesis subteni erarojn, sur kiuj stariĝis kredoj laŭŝajne sidantaj sur neskueblaj bazoj. Sufiĉis la invento de optika instrumento por renversi multjarmilan konstruon. Nenio povus superforti veraĵon, kiel tia rigardatan. Dank'al la tipografio, la publiko, incita en la novajn ideojn, komencis ne lasi sin luli de iluzioj kaj ekpartoprenis la lukton; jam necesis batali ne kontraŭ kelkaj individuoj sed kontraŭ la ĝenerala opinio, kiu partianiĝis al la vero.

Kiel grandiozas la Universo antaŭ la mizeraj proporcioj, kiujn al ĝi atribuis niaj prapatroj! Kiel sublimes montriĝas la verko de Dio, kiam ni vidas ĝin plenumiĝi laŭ la eternaj leĝoj de la Naturo! Sed ankaŭ kiom da tempo, da geniaj penadoj, da sinoferoj necesis por al ĉiuj malfermi la okulojn kaj fine deŝiri la vualon de nesciado!

14. – De tiam malfermiĝis la vojo, kiun multenombraj, eminentaj scienculoj estis enirontaj por kompletigi la skizitan verkon. Kepler, en Germanujo, malkovras la famajn leĝojn, kiuj portas lian nomon kaj per kiuj li rekonas, ke la planedoj laŭiras ne cirklaĵojn sed ja elipsajn orbitojn, en kies unu el la fokuso estas la Suno. Neŭtono, en Anglujo, malkovras la leĝon de la universala altirforto. Laplace, en Francujo, elpen-

sas la ĉielmekanikon. Fine, la Astronomio ne plu estas ia sistemo fondita sur konjektoj aŭ probabloj sed fariĝas scienco sidanta sur la plej rigoraj bazoj, nome tiuj de kalkulo kaj de geometrio. Estas tiel metita unu el la fundamentaj ŝtonoj de la Genezo, ĉirkaŭ 3.300 jarojn post Moseo.

ĈAPITRO VI

ĜENERALA URANOGRAFIO ¹

Spaco kaj tempo – La materio – La leĝoj kaj la fortoj – La primara kreado
La universala kreado – La sunoj kaj la planedoj – La satelitoj
La kometoj – La Lakta Vojo – La fiksj steloj
La dezertoj de la spaco – Eterna sinsekvo de l' mondoj
La universa vivo – Diverseco de l' mondoj.

Spaco kaj tempo

1. – Jam estas donitaj pluraj difinoj de spaco, el kiuj la ĉefa estas jena: spaco estas la etendaĵo apartiganta du korpojn. El tio certaj sofistoj konkludis, ke, kie ne estas korpoj, tie spaco ne ekzistas. Surbaze de tio kelkaj doktoroj pri teologio asertis, ke la spaco nepre estas finhava, argumentan-

¹ Ĉi tiu ĉapitro estas laŭteksta reprodukto de serio da komunikaĵoj diktitaj al la Spiritisma Societo el Parizo, en 1862 kaj 1863, sub la titolo *Uranografiaj Studoj* kaj subskribitaj de Galileo; mediumo C.F. – *Noto de la tradukinto en la portugallingva eldono de Brazila Spiritisma Federacio*: ĉi tiuj estas la komencliteroj de la nomo Camille Flammarion. – *Noto de la eldonistoj en la franclingva eldono de Éditions de L' Union Spirite (Belgio)* – 1952: Vidu: Enkondukon, paragrafojn 7^a-n kaj sekvantajn, krom ankaŭ la tuta kolekto de la fundamentaj spiritismaj verkoj, de Allan Kardec.

te, ke difinita nombro da limhavaj korpoj ne povus formi senfinan serion, kaj ke, kie finiĝus la korpoj, tie ankaŭ finiĝus la spaco. Oni ankoraŭ jene difinis spacon: loko, kie moviĝas la mondoj, la malpleno, kie agas la materio, ktp. Ni lasu ĉiujn ĉi difinojn, kiuj ja nenion difinas, kuŝantaj en la koncernaj traktatoj.

Spaco estas unu el tiuj vortoj prezentantaj primitivan, aksioman ideon, evidentan per si mem, pri kiu la diversaj difinoj, kiujn oni povas doni pri ĝi, servas nur por ĝin malklariĝi. Ni ĉiuj scias, kio estas spaco, kaj mi nur volas pruvi ĝian senfinecon, por ke niaj postaj studoj renkontu nenian baron, kiu malhelpus la esplorojn de nia rigardo.

Nu, mi diras, ke spaco estas senfina pro la fakto, ke ne eblas imagi por ĝi ian ajn limon, kaj ke, malgraŭ la malfacileco koncepti la senfinon, estas al ni pli facile, per la penso, eterne trairi la spacon, ol halti ĉe iu ajn loko, post kiu ni ne plu trovas traireblan etendaĵon.

Por prezenti al ni – kiom al ni ebligas niaj limitaj fakultoj – la senfinecon de la spaco, ni supozu, ke, foririnte de la Tero, perdita en la sino de la senfino, direkte al iu ajn punkto de la Universo, kun la mireginda rapideco de la elektra fajrero, kiu iras *milojn da leŭgoj en unu sekundo*, ni apenaŭ forlasis ĉi globon; ke, trakurinte milionojn da leŭgoj, ni nin trovas en iu loko, de kiu ni vidas la Teron aspektanta kiel palbrila stelo. Post momento, ĉiam irante la saman direkton, ni atingas tiujn forajn stelojn, kiujn vi apenaŭ distingas de via surtera stacio. De tie, tute malaperas el nia vido, en la ĉielaj profundaĵoj, ne nur la Tero, sed ankaŭ via Suno mem, eklipsita, kun sia tuta brilego, de la etendaĵo, kiu disde ĝi nin apartigas. Ĉiam impulsataj de la sama fulma rapideco, ni transpasas, ĉe ĉiu paŝo antaŭen en la etendaĵo, sistemojn de mondoj, insulojn el etera lumo, stelplenajn vojojn, luksajn regionojn, kiujn Dio

prisemis per mondoj samabunde kiel li, per plantoj, prisemis la surterajn herbejojn.

Nu, antaŭ nur kelke da minutoj ni ekiris kaj jam centoj da milionoj da leŭgoj nin apartigas disde la Tero, miliardoj da mondoj preterpasis antaŭ niaj okuloj, sed tamen atentu! ni efektive ne antaŭeniĝis eĉ unu solan paŝon en la Universo.

Se ni plu iros dum jaroj, jarcentoj, miloj da jarcentoj, milionoj da centoble jarcentaj periodoj kaj *ĉiam kun la rapideco de la fulmo*, ni jam neniom estos irintaj antaŭen, de kiu ajn flanko ni nin turnis, al kiu ajn punkto ni nin direktis, deire de tiu nevidebla grajneto, kiun ni forlasis kaj kiu estas nomata Tero!

Jen kio ja estas spaco!

2. – Tempo, same kiel spaco, estas vorto per si mem difinebla. Pri ĝi oni faras pli ĝustan ideon, ĝin rilatigante al la senfina tuto.

La tempo estas la sinsekvo de la aferoj. Ĝi estas ligita al la eterneco same kiel la aĵoj estas ligitaj al la senfino. Ni imagu nin en la origino de nia mondo, en tiu epoko primitiva, kiam la Tero ankoraŭ ne moviĝis sub la dia impulsado: unuvorte, en la komenco de la Genezo. Tiam la tempo ankoraŭ ne eliris el la mistera lulilo de la Naturo kaj neniu povas diri, en kiu jarcenta epoko ni troviĝas, ĉar la balanciero de la jarcentoj ankoraŭ ne ekmoviĝis.

Sed, silenton! per la eterna sonorilo sonas la unua horo de iu izolita Tero, la planedo ekmoviĝas en la spaco, kaj de tiam estas *vespero* kaj *mateno*. Transe de la Tero la eterneco restas indiferenta kaj senmova, kvankam la tempo marŝas rilate al multaj aliaj mondoj. Sur la Tero, la tempo ĝin anstataŭas kaj dum difinita sinsekvo da generacioj oni kalkulos la jarojn kaj la jarcentojn.

Ni nun transportiĝu al la lasta tago de ĉi tiu mondo, al tiu horo, kiam, kurbigita sub la pezo de profundaĝo, la Tero forviŝiĝos el la libro de la vivo, kie ĝi ne plu reaperos. Ne plu estas la sinsekvo de la eventoj, ĉesas la planedaj movoj, kiuj mezuris la tempon, kaj kun ili la tempo finiĝas. Ĉi tiu simpla prezento de la naturaj aferoj, kiuj naskas la tempon, kiuj ĝin nutras kaj lasas ĝin estingiĝi, sufiĉas por montri, ke, vidate de la punkto kie ni devas lokiĝi por niaj studoj, la tempo estas kvazaŭ akvoguto falanta el nubo en la maron kaj kies falo estas mezurata.

Kiom da mondoj en la vasta etendaĵo, tiom da tempoj, diversaj kaj inter si neakordigeblaj. Ekster la mondoj nur la eterneco substituiĝas al tiuj efemeraj sinsekvoj kaj serene plenigas, per sia senmova lumo, la ĉielan senlimajon. Vastegeco sen limoj kaj eterneco sen limoj, jen la du grandaj proprecoj de la universa naturo.

La rigardo de la observanto, kiu trakuras, neniam renkontante baron, la nemezureblajn distancojn de la spaco, kaj tiu de la geologo, kiu iras trans la limojn de la epokoj, aŭ kiu malsupreniras en la profundaĵojn de la faŭkanta eterneco, kie ambaŭ iam dronos, agas akorde, ĉiu laŭ sia direkto, por akiri tiun duoblan nocion pri la senfino: longo kaj daŭro.

Nu, ĉe tiu ordo de ideoj, estos al ni facile kompreni, ke, konsiderante la tempon nura rilato inter aferoj pasemaj kaj sole dependanta de aferoj mezurataj, se ni prenas la surterajn jarcentojn kiel unuon kaj ilin milope amasigus por formi kolosan numeron, tiu numero ĉiam prezentus nenion alian ol ian punkton en la eterneco, same kiel miloj da leŭgoj, aldonitaj al miloj da leŭgoj, formas nenion alian ol punkton en la spaco.

Tiel, por ekzemplo, ĉar la jarcentoj troviĝas ekster la etera vivo de la animo, ni povus skribi numeron tiel longan kiel la tera ekvatoro kaj imagi nin maljuniĝintaj je tiu nombro da

jarcentoj, kaj tamen nia animo pliaĝus eĉ ne unu solan tagon. Kaj, aldonante al ĉi neesprimebla nombro da jarcentoj serion da similaj numeroj, longdistancon kiel de ĉi tie ĝis la Suno, aŭ eĉ da pli grandaj numeroj, se ni imagus nin vivantaj dum tiu mireginda sinsekvo da jarcentaj periodoj, esprimata per la adicio de tielaj numeroj, kiam ni atingus la finon, tiu nekonceptebla amaso da jarcentoj, kiu pezus sur niaj kapoj, aperus kvazaŭ ĝi ne ekzistus: antaŭ ni ĉiam starus la tuta eterneco.

La tempo estas nenio alia ol relativa mezuro de la sinsekvo da pasemaj aferoj; la eterneco per nenio mezureblas, el la vidpunkto de la daŭro; por ĝi ekzistas nek komenco nek fino: ĉio por ĝi estas nun.

Se jarcentoj da jarcentoj estas malpli ol unu sekundo rilate la eternecon, kio do ja estas la daŭro de la homa vivo?!

La materio

3. – Unuavide, nenio ŝajnas tiel profunde varia, tiel esence distingiĝa, ol la diversaj substancoj, kiuj konsistigas la mondon. Inter la objektoj, kiujn la Arto aŭ la Naturo pasigas antaŭ niaj okuloj, ĉu estas du montrantaj perfektan identecon aŭ, almenaŭ, egalkonsistecon? Kia malsimilo, sub la aspektoj de solideco, de kunpremebleco, de pezeco kaj de la multoblaj proprecoj de l' korpoj, inter la atmosferaj gasoj kaj orfadeneto, inter la akva molekulo de nubo kaj tiu de mineralo formanta la skeleton de la globo! kiela diverseco inter la kemia histo de la multspecaj plantoj ornamantaj la vegetalan regnon kaj tiu de la reprezentantoj, ne malpli nombraj, de la surtera besta regno!

Ni tamen povas starigi, kiel absolutan principon, ke ĉiuj substancoj, konataj kaj nekonataj, kiel ajn inter si malsimilaj ili ŝajnas, ĉu el la vidpunkto de la interna konsisto, ĉu koncerne

ilian agadon, unuj sur la aliajn, efektive estas nenio alia ol diversaj modeloj, laŭ kiuj la materio sin montras; varioj, en kiujn ĝi transformiĝas sub la direkto de la sennombraj fortoj ĝin regantaj.

4. – La Kemio, tiel rapide progresanta depost mia epoko, en kiu aliaj adeptoj mem ankoraŭ ĝin forpuŝis en la sekretan kampon de magio; tiu scienco, kiun oni povas juste rigardi kiel idon de la jarcento de observado kaj kiel sole bazitan, multe pli solide ol siaj pli antikvaj fratoj, sur la eksperimenta metodo; la Kemio, mi diras, forpuŝe ignoris la kvar primitivajn elementojn, kiujn la antikvuloj konsente agnoskis en la Naturo; ĝi elmontris, ke la tera elemento estas nenio alia ol la kombiniĝo de diversaj substancoj senfine variaj; ke la aero kaj la akvo ankaŭ estas malkompreneblaj kaj produktoj de certa nombro da gasaj ekvivalentoj; ke la fajro, anstataŭ esti ia ĉefa elemento, ja estas nura stato de la materio, rezultanta el la universa movado, al kiu ĝi estas submetata, kaj el ia sensebla aŭ latentata brulo.

Kompense, ĝi aperigis rimarkindan nombron da principoj ĝis tiam nekonataj, kiuj al ĝi ŝajnis formi, per difinitaj kombinoj, la diversajn korpojn, kiujn ĝi studis kaj kiuj simultane agas laŭ certaj leĝoj kaj en difinitaj proporcioj, ĉe la laboroj efektiviĝantaj en la granda laboratorio de la Naturo. Tiujn principojn ĝi nomis *simplaj korpoj*, kaj per tio ĝi montris, ke ĝi ilin rigardas primitivaj kaj nemalkompreneblaj, kaj ke ĝis nun nenio procedo povas ilin redukti al eroj pli simplaj, ol ili mem estas.¹

¹ La ĉefaj simplaj korpoj estas: inter la metaloidoj, oksigeno, hidrogeno, azoto, kloro, karbono, fosforo, sulfuro, jodo; inter la metaloj, oro, arĝento, plateno, hidrargo, plumbo, stano, zinko, fero, kupro, arseno, natrio, kalio, kalcio, aluminio, ktp. – *Noto de la Brazila Spiritisma Federacio al sia*

5. – Sed kie ne plu eblas la taksadoj de l' homo, eĉ se lin helpas la plej impresaj artefaritaj sensoj, tie kontinuas la verko de la Naturo; kie la vulgara homo prenas la ŝajnon por la realo, kie la praktikulo levas la vualon kaj distingas la komencon de la aferoj, tie la rigardo de tiu, kiu povas kompreni la agmanieron de la Naturo, vidas en la mondkonsistaj materialoj nenion alian ol la primitivan *kosman materion*, simplan kaj unuecan, diversigitan en certaj regionoj en la tempo de ĉi-ties apero, dividitan en korpojn dumvive solidarajn inter si, sed kiuj unu tagon dismembriĝas pro sia malkomponiĝo en la tenejo de la spaco.

6. – Estas demandoj, kiujn ni mem, Spiritoj, amantaj la Sciencon, ne povas profundigi kaj pri kiuj ni povas eldiri nur personajn opiniojn, pli aŭ malpli hipotezajn. Pri tiuj demandoj mi silentos aŭ pravigos mian vidmanieron. Sed tiu ĵus pritraktita ne apartenas al tiu klaso. Al tiuj, do, kiuj estus tentataj rigardi mian parolon nur kiel aŭdacan teorion, mi diros: ampleksu, se eble, per esplora rigardo, la multoblecon de la operacioj de la Naturo, kaj vi konsentos, ke se oni ne akceptas la unuecon de la materio, ne eblas ekspliki ne nur la sunojn kaj la sferojn, sed ja, ne irante tiel malproksimen, la ĝermadon de semo en la tero, aŭ la formiĝon de insekto.

portugallingva eldono, 1973: Koncerne la simplajn korpojn, aluditajn de Allan Kardec, konvenas, por pli detalaj informoj, konsulti la "naturan periodan klasigon de la elementoj", de Mendelejev (Grande Enciclopédia Delta Larousse, p. 2.361, Rio, 1971). Kaj por interesaj kompletigaj konkludoj tre utilos legi la ĉapitrojn XV (La evoluo de la materio per kemiaj individuigoj – La hidrogeno kaj la nebulozoj), XVI (La serio de la kemiaj individuigoj, de H ĝis U, laŭ atoma pezo kaj periodaj izovalentoj) kaj XVII (La stekiogenezo kaj la nekonataj kemiaj specioj) de La Granda Sintezo, mediuma verko de Pietro Ubaldi, tradukita de Guillon Ribeiro, eldonita de BSF en 1939.

7. – Se ekzistas tiela diverseco en la materio, tion kaŭzas la fakto, ke, ĉar estas senlima la nombro, tiel de la fortoj direktintaj ĝiajn transformiĝojn, kiel ankaŭ de la kondiĉoj, en kiuj ili okazis, tial la diversaj kombinoj de la materio ankaŭ ne povis ne esti nombre senlimaj.

Sekve, ĉu la koncernata substanco apartenas al la ĝustediraj fluidoĵoj, tio estas, al la senpezaj korpoj, ĉu ĝi havas la karakterojn kaj la ordinarajn proprecojn de la materio, ekzistas en la tuta Universo nenio alia, krom unu sola primitiva substanco: la *kosmo* aŭ *kosma materio* de la uranografoj.

La leĝoj kaj la fortoj

8. – Se unu el tiuj nekonataj estaĵoj, kiuj konsumas sian efemeran vivon en la fundo de la tenebraj oceanaj regionoj; se unu el tiuj poligastruloj, unu el tiuj nereoj – mizeraj bestetoj, kiuj pri la Naturo konas nenion, krom la iĥtiefagaj fiŝoj kaj la submaraj arbaroj – subite ricevas kiel doton la intelekton, la kapablon studi sian mondon kaj bazi sur siaj observoj ian konjektan rezonadon, kiu ampleksus la universan tuton, kiun ideon ĝi farus al si pri la vivanta naturo disvolviĝanta en la medio, kie ĝi loĝas, kaj pri la surtera mondo ne apartenanta al la kampo de ĝiaj observoj?

Se nun, pro mireginda efiko de sia nova povo, tiu sama estaĵo leviĝus super siajn eternajn tenebrojn kaj atingus la marsupraĵon, ne malproksime de la grasaj bordoj de ia insulo kun luksa vegetaĵaro, lumbanata de la fekundiga Suno disdonanta bonfaran varmon, kiel ĝi rigardus siajn antaŭe pretajn teoriojn pri la universa kreado? Ĉu ĝi ilin ne tuj forĵetus kaj anstataŭigus per rigardo pli ampleksa, kvankam relative tiel

nekompleta kiel la unua? Tia estas, ho homoj!, la bildo de via tute spekulativa scienco.¹

9. – Veninte do ĉi tien pritrakti la demandojn pri la leĝoj kaj fortoj regantaj la Universon, mi, kiu, samkiel vi, nur estas relative nescia pri la reala scienco, malgraŭ la ŝajna supereco, kiun, rilate al miaj surteraj fratoj, al mi havigas la ebleco studi naturajn problemojn ankoraŭ al ili malpermesatajn, mi portas la solan celon al vi doni ian ĝeneralan nocion pri la universaj leĝoj, sen detale ekspliki la agadmanieron kaj la naturon de tiuj specialaj fortoj al ili submetitaj.

10. – Ekzistas ia etera fluido, kiu plenigas la spacon kaj penetras la korpojn. Tiu fluido estas la *etero* aŭ primitiva *kosma materio*, generinto de la mondoj kaj de la estaĵoj. Al la etero estas esence propraj la fortoj, kiuj direktis la metamorfozojn de la materio, kaj la leĝoj, necesaj kaj neŝanĝeblaj, regantaj la mondon. Tiuj multoblaj fortoj, senfine variaj laŭ la kombiniĝoj de la materio, lokitaj laŭ la masoj, diversigitaj en siaj agmanieroj laŭ la cirkonstancoj kaj medioj, estas konataj sur la Tero sub la nomoj *gravito*, *kohero*, *afineco*, *altiro*, *magnetismo*, *aktiva elektro*. La vibraj movoj de la aganto estas konataj sub la nomoj *sono*, *varmo*, *lumo*, ktp. En aliaj mondoj, ili montriĝas sub aliaj aspektoj, havas aliajn karakterojn nekonatajn sur la Tero, kaj, en la senmezura ĉiela vastaĵo,

¹ Tia ankaŭ estas la situacio de tiuj neadantaj la mondon de la Spiritoj, kiam, seniĝinte je sia karna envolvajo, ili vidas la horizontojn de tiu mondo sternaĵe antaŭ iliaj okuloj. Tiam ili komprenas la malplendon de la teorioj, per kiuj ili pretendis ĉion ekspliki nur surbaze de la materio. Tamen tiuj horizontoj ankoraŭ kaŝas al ili misterojn, kiuj nur iom post iom senvualiĝas, laŭmezure kiel, elpurigante, ili spirite altiĝas. Sed ekde iliaj unuaj paŝoj en tiu nova mondo, ili estas devigataj rekoni sian blindecon kaj kiel malproksimaj de la vero ili estis.

senlime nombraj fortoj disvolviĝis laŭ neimagebla skalo, kies grandecon ni estas tiel nekapablaj taksi, kiel la krustulo, en la fundo de la oceano, por kompreni la universalecon de la surteraj fenomenoj.¹

Nu, kiel ekzistas nur unu sola substanco simpla, primitiva, generanta ĉiujn korpojn, sed diversigita en siaj kombinoj, tiel same ĉiuj tiuj fortoj dependas de unu universa leĝo diversigita en siaj efikoj, kiu leĝo, laŭ la eternaj decidoj, estis suverene trudita al la kreaĵaro por al ĝi havigi harmonion kaj stabilecon.

11. – La Naturo neniam kontraŭstaras sin mem. Unu solan devizon portas la blazono de la Universo: *unueco-diverseco*. Laŭirante la skalon de la mondoj, oni trovas *unuecon* laŭ harmonio kaj kreado, krom ankaŭ senfina diverseco en tiu vastega ĝardeno de steloj. Kiam oni supreniras la ŝtupojn de la vivo, ekde la lasta el la estaĵoj ĝis Dio, evidentiĝas la granda leĝo de kontinueco. Konsiderante la fortojn en

¹ Ĉion ni rilatigas al tio, kion ni konas, kaj kio nealireblas por niaj sensoj, tion ni ne komprenas tiel same, kiel denaska blindulo ne komprenas la efikojn de la lumo nek la utilecon de la okuloj. Estas do eble, ke en aliaj medioj la kosma fluido havas aliajn proprecojn, povas sperti kombinojn, pri kiuj ni faras al ni nenian ideon, estigi efikojn alkonformajn al necesoj, kiujn ni ne konas, tiel kaŭzante novajn perceptojn aŭ aliajn perceptmanierojn. Ni ekzemple ne komprenas, ke oni povus vidi sen la korpaj okuloj kaj sen la lumo. Sed kiu povas aserti, ke, krom la lumo, ne ekzistas aliaj agantoj, al kiuj estas konformaj specialaj organismoj? La somnambula vidado, kiun baras nek la distanco, nek materiaj obstakloj, nek la obskuro, pri tio estas al ni ekzemplo. Ni supozu, ke, en iu ajn mondo, la estuloj *normale* estas tiaj, kiaj nur escepte estas niaj somnambuloj; bezonante nek nian lumon, nek niajn okulojn, ili vidos, kion ni ne povos vidi. La samo okazas ĉe ĉiuj ceteraj sensacoj. La kondiĉoj de vivipoveco kaj perceptiveco, la sensacoj kaj la bezonoj varias laŭ la medioj.

si mem, oni povas per ĝi formi serion, kies rezultanto, konfuziĝante kun la generanto, estas la universa leĝo.

Vi ne povus taksi tiun leĝon laŭ ties tuta amplekso, ĉar la fortoj, kiuj ĝin reprezentas en la kampo de viaj observoj, estas malvastaj kaj limigitaj. Sed gravito kaj elektro povas esti rigardataj kiel ampleksa apliko de tiu ĉefa leĝo reganta trans la ĉieloj. Ĉiuj tiuj fortoj estas eternaj – tiun vorton ni klarigos – kaj universaj kiel la kreaĵaro. Estante esence propraj al la kosma fluido, ili necese agas ĉie kaj sur ĉion, modifante sian agadon per simultaneco aŭ sinsekveco, superregante ĉi tie, estingiĝante aliloke, potencaj kaj aktivaj en unuj punktoj, latentaj aŭ kaŝitaj en aliaj, sed fine preparante, direktante, konservante kaj detruante la mondojn en ties diversaj vivperiodoj, kondukante la miregindajn laborojn de la Naturo, kie ajn ili plenumiĝas, por ĉiam certigante la eternan splendon de la kreaĵaro.

La primara kreado

12. – Konsiderinte la Universon el la ĝeneralaj vidpunktoj de ĝia konsisto, de ĝiaj leĝoj kaj de ĝiaj proprecoj, ni povas etendi niajn studojn al la maniero de kreado, kiu naskis la mondojn kaj la estaĵojn. Ni poste aparte pritraktos la kreadon de la Tero kaj ties nunan staton en la universaleco de la ekzistaĵoj, kaj de tie, prenante tiun globon kiel deirpunkton kaj kiel relativan unuon, ni komencos niajn planedajn kaj siderajn studojn.

13. – Se ni bone komprenis la rilaton, aŭ, pli ĝuste, la kontraŭecon inter eterneco kaj tempo, se ni alkitimiĝis al tiu ideo, ke la tempo estas nenio alia, ol ia relativa mezuro pri la sinsekvo de pasemaj aferoj, dum la eterneco estas esence unueca, senmova kaj seninterrompa, neniel ajn mezurebla el

la vidpunkto de la daŭro, ni komprenos, ke por ĝi estas nek komenco nek fino.

Aliflanke, se ni faras al ni ĝustan ideon – kvankam ja nepre tre malfortan – pri la senlimeco de la dia povo, ni komprenos, kiel estas eble, ke la Universo ĉiam ekzistis kaj ekzistos. De kiam Dio ekzistis, liaj eternaj perfektaĵoj parolis. Antaŭ ol la tempoj estis naskitaj, la nemezurebla eterneco ricevis la dian parolon kaj fekundigis la spacon, eternan kiel ĝi.

14. – Ekzistante, pro sia naturo, ekde la tuta eterneco, Dio kreis ekde la tuta eterneco, kaj alie ne povus esti, ĉar kiel ajn malproksima troviĝus la epoko, kien per la imago ni retroŝovus la supozatajn limojn de la kreado, ĉiam estos, trans tiu limo, ia eterneco – pripensu bone ĉi tiun ideon – ia eterneco, dum kiu la diaj hipostazoj, la senlimaj voladoj restintus enterigitaj en ia muta letargio, senaga kaj senfrukta, en ia eterneco de ŝajna morto por la eterna Patro, kiu donas vivon al la estaĵoj; de indiferenta muteco por la Vorto, kiu ilin direktas, de sterileco frida kaj egoisma por la Spirito de amo kaj vivigo.

Ni pli bone komprenu la grandecon de la dia agado kaj ties eternecon sub la mano de la absoluta Estaĵo! Dio estas la Suno de la estaĵoj, la Lumo de la mondo. Nu, la apero de la Suno tuj naskas lumondojn, kiuj ĉien disjetoĝas en la spaco. Tiel same, la Universo, naskita de la Eternulo, originas en la neimageblaj periodoj de la senfina daŭro, en la *Fiat lux!* de la komenco.

15. – La absoluta komenco de la ekzistaĵoj estas do en Dio. Iliaj sinsekvaj aperoj en la kampo de la ekzistado konsistigas la ordon de la eterna kreado.

Kiu mortemulo povus parolesprimi la grandiozaĵojn nekonatajn kaj majeste vualitajn sub la nokto de la epokoj disvolviĝintaj en tiuj antikvaj tempoj, en kiuj ekzistis neniu el la miregindaĵoj de la nuntempa Universo; en tiu antikva epoko, en kiu, post kiam sonis la voĉo de la Sinjoro, la materialoj, kiuj en la futuro, per si mem kaj simetrie, kunmetiĝos por konstrui la templon de la Naturo, subite renkontiĝis en la sino de la senlimaj vakuoj; kiam tiu mistera voĉo, kiun ĉiu kreito respektegas kaj estimas kiel la voĉon de iu patrino, estigis harmonie diversajn notojn, ke ili kune vibradu kaj ludu la koncerton de la vastaj ĉieloj?

La mondo, en sia lulilo, ne montriĝis sidanta sur sia matureco kaj en la pleneco de sia vivo. Ne! La kreiva povo neniam sin kontraŭdiras kaj, kiel ĉiaj ekzistaĵoj, la Universo naskiĝis infano. Sub la direktado de la supre menciitaj leĝoj kaj de la komenca impulso esence propra al sia formiĝo mem, la primitiva kosma materio sinsekve naskis kirlegojn, aglomeraĵojn el tiu dissemita fluido, amasojn da nebuleca materio, kiuj per si mem dividiĝis kaj senlime ŝanĝiĝis por generi, en la neimageblaj regionoj de la spaco, plurajn centrojn de simultanaj aŭ sinsekvaj kreadoj.

Pro la fortoj, kiuj superregis ĉe unuj aŭ ĉe aliaj el ili, kaj pro postaj cirkonstancoj, kiuj direktis ilian disvolviĝon, tiuj primitivaj centroj fariĝis fokuso de ia speciala vivo: unuj, malpli dissemitaj en la spaco kaj pli riĉaj je agantaj principoj kaj fortoj, tuj komencis sian apartan astran vivon; aliaj, okupante senliman spacon, kreskis kun ekstrema malrapideco, aŭ denove dividiĝis en aliajn duarangajn centrojn.

16. – Reen irante nur kelke da milionoj da jarcentoj antaŭ la nuna epoko, ni konstatas, ke nia Tero ankoraŭ ne ekzistas, ke eĉ nia sunsistemo ne komencis la evoluojn de la

planeda vivo; sed jam splendaj sunoj lumigas la eteron; jam loĝataj planedoj havigas vivon kaj ekzistadon al amasoj da estaĵoj nin antaŭvenintaj en la homa evoluado; ke la luksaj produktoj de iu nekonata naturo kaj la miregindaj ĉielaj fenomenoj elmetas, sub aliulaj rigardoj, la bildojn de la senlima kreaĵaro. Kion mi diras! jam ne plu ekzistas splendoj, kiuj iam batigis la koron al aliaj mortemuloj sub la penso de la senlima potenco! Kaj ni, povraj estaĵetoj, venintaj post ia eterneco da vivo, ni nin rigardas samtempuloj de la kreado!

Unu fojon ankoraŭ: ni pli bone komprenu la Naturon. Ni sciu, ke, kiel antaŭ ni, tiel ankaŭ post ni etendiĝas la eterneco; ke la spaco estas la scenejo de neimageblaj kreadoj, simultanaj kaj sinsekvaj. Tiaj nebulozoj, kiujn ni apenaŭ distingas en la ĉielaj foraĵoj, estas aglomeraĵoj da formiĝantaj sunoj; tiaj aliaj estas laktaj vojoj el loĝataj mondoj; aliaj, fine, estas okazejoj de kataklismoj aŭ de ruiniĝoj. Ni sciu, ke, kiel ni estas lokitaj en la mezo de senlima nombro da mondoj, tiel same ni troviĝas en la mezo de duobla senlimo da daŭroj, antaŭaj kaj postaj; ke la universa kreado ne limiĝas al ni, ke ni ne povas apliki tiun esprimon al la aparta formado de nia eta globo.

La universa kreado

17. – Irinte, kiom al ni permesis nia malforteco, ĝis la kaŝita fonto, de kiu devenas la mondoj, same kiel, de rivero, la akvogutoj, ni konsideru la marŝon de la sinsekvaj kreadoj kaj de ties seriaj disvolviĝoj.

La primitiva kosma materio entenis la materiajn elementojn, fluidecajn kaj vivipovajn, de ĉiuj universo parade elmontrantaj siajn pompojn antaŭ la eterneco. Ĝi estas la fekunda patrino de ĉiuj ekzistaĵoj, la unua praavino, kaj antaŭ

ĉio la eterna generantino. Tiu substanco, de kiu devenas la sideraj sferoj, absolute ne malaperis; ne mortis tiu potenco, ĉar ĝi ankoraŭ naskas novajn kreaĵojn kaj senĉese ricevas, rearanĝitaj, la principojn de la mondoj, kiuj forstrekiĝas el la eterna libro.

La etera materio, pli aŭ malpli maldensiĝinta, kiu dissemiĝas en la interplanedaj spacoj; tiu kosma fluido, kiu plenigas la mondon, pli aŭ malpli maldensiĝinta en tiuj vastegaj regionoj riĉaj je stel-aglomeraĵoj; pli aŭ malpli densiĝinta tie, kie la astra ĉielo ankoraŭ ne brilas; pli aŭ malpli ŝanĝita, pro diversaj kombiniĝoj, laŭ la lokoj en la spaco; tiu materio estas nenio alia ol la primitiva substanco, sidejo de la universaj fortoj, el kiu la Naturo ĉerpis ĉiujn ekzistaĵojn.¹

18. – Tiu fluido penetras la korpojn kiel senlima oceano. En ĝi kuŝas la vitala principo, kiu liveras la vivon al ĉiuj estaĵoj kaj ĝin ĉiamigas sur ĉiu globo laŭ ties kondiĉoj, principo kiu, en latentata stato, restas dormanta, kie ĝin ne vokas la voĉo de iu estaĵo. Ĉia kreito, minerala, vegetala, besta aŭ ajnaspeca – ĉar estas multe da aliaj naturaj regnoj, kies ekziston vi eĉ ne suspektas – scipovas, dank'al tiu universa, vitala principo, proprigi al si la kondiĉojn de sia ekzistado kaj daŭro.

La molekuloj de mineralo havas certan kvanton da tiu vivo, same kiel la semo kaj la embrio, kaj, kiel en organismo, ili grupiĝas laŭ simetriaj figuroj, kiuj konsistigas la individuojn.

¹ Se oni demandus, kiu estas la principo de tiuj fortoj kaj kiel ĝi povas troviĝi en la substanco mem, kiu ĝin produktas, ni respondus, ke pri tio la mekaniko liveras al ni multe da ekzemploj. Ĉu la elasteco, kiu igas risorton streĉiĝi, ne troviĝas en la risorto mem, kaj ĉu ĝi ne dependas de la maniero kiel agregiĝas la molekuloj? La korpo, obeanta la centrifugan forton, ricevas sian impulson de la primitiva movo al ĝi komunikita.

Tre gravas al ni akcepti tiun nocion, ke la primitiva kosma materio estis penetrita ne nur de la leĝoj certigantaj la stabilecon de l' mondoj, sed ankaŭ de la universa vivoprincipo, kiu formas spontanajn generadojn en ĉiu mondo, laŭgrade kiel manifestiĝas la kondiĉoj por la sinsekva ekzistado de la estaĵoj, kaj kiam sonas la horo por apero de la idoj de la vivo dum la krea periodo.

Tiel efektiviĝas la universa kreado. Estas do ĝuste diri, ke ĉar la operacioj de la Naturo esprimas la dian volon, Dio ĉiam kreadis, kreas senĉese kaj neniam ĉesos kreadi.

19. – Sed ĝis tie ĉi ni silentis pri la *spirita mondo*, kiu mem estas parto de la kreaĵaro kaj plenumas siajn destinojn laŭ respektigindaj preskriboj de la Sinjoro.

Pri la maniero kiel la Spiritoj estas kreataj mi povas doni nur tre limigitan instruon, tiel pro mia propra nescio, kiel ankaŭ pro tio, ke mi devas ankoraŭ prisilenti certajn demandojn, kvankam al mi jam estis permesite ilin pli funde pritrakti.

Al tiuj religie dezirantaj ekscii la temon kaj kiuj sin tenas humilaj antaŭ Dio, mi diros, tamen ilin petegante konstrui neniun antaŭtempan sistemon surbaze de miaj vortoj: la Spirito ricevas la dian lumon, kiu al li havigas, kune kun la libervolo kaj la konscienco, la konscion pri liaj altaj destinoj, nur post kiam li trapasis la die fatalan vicon de la malsuperaj estaĵoj, ĉe kiuj malrapide ellaboriĝas la verko de lia individuiĝo. Nur depost tiu tago, kiam la Sinjoro stampas al li sur la frunto sian subliman tipon, la Spirito prenas sian lokon en la sino de la homaroj.

Ankoraŭ unu fojon: ne konstruu surbaze de miaj vortoj viajn rezonadojn, tiel bedaŭrinde famajn en la historio de la Metafiziko. Mi milfoje preferus prisilenti demandojn, tiel alte starantajn super niaj ordinaraj meditoj, ol elmeti vin al la

ebleco falsi la sencon de mia instruo kaj vin miakulpe enfermi en la nemalimplikeblajn labirintojn de deismo aŭ de fatalismo.

La sunoj kaj la planedoj

20. – Nu, okazis, ke en iu punkto de la Universo, perdita inter miriadoj da mondoj, la kosma materio densiĝis sub la formo de nemezurebla nebulozo. Ĉi tiun nebulozon animis la universaj leĝoj regantaj la materion, kaj pro tiuj leĝoj, ĉefe pro tiu de la molekula altirforto, ĝi prenis la formon de sferoido, kiun solan povas preni iu maso da materio izolita en la spaco.

La cirkla movo, ekzakte egala, de ĉiuj molekulaĵoj zone direktite al la centro, estigita de la gravito, tuj aliigis la primitivan sferon, celante akceptigi al ĝi, movo post movo, la lensan formon. – Ni parolas pri la nebulozo entute.

21. – Novaj fortoj aperis sekve de tiu rotacia movo: la fortoj centripeta kaj centrifuga; la unua emis kolekti ĉiujn partojn en la centron, la dua emis ilin de la centro malproksimigi. Nu, ĉar la movo akceliĝis, laŭgrade kiel la nebulozo densiĝadis, krom ankaŭ ĝia radio grandiĝis laŭmezure kiel ĝi proksimiĝadis al la lensa formo, tial la centrifuga forto, senĉese intensigata de tiuj du kaŭzoj, tuj superpotencis la centran altiron.

Kiel tro rapida movo de la ŝtonĵetilo rompas ties ŝnuron, malproksimen faligante la ĵetaĵon, tiel same la superpotenco de la centrifuga forto deapartigis la ekvatoran cirklon de la nebulozo, kaj el tiu ringo formiĝis nova maso, izolita disde la unua sed tamen submetita al ties potenco. Tiu maso konservis sian ekvatoran movon, kiu, aliĝinte, transformiĝis en translaci-

an movon ĉirkaŭ la Suno. Krom tio, ĝia nova stato havigis al ĝi rotacian movon ĉirkaŭ ĝia centro mem.

22. – La generinta nebulozo, kiu naskis tiun novan mondon, densiĝis kaj reprenis la sferan formon; sed ĉar la primitiva varmo, kreskigita de ĝiaj diversaj movoj, nur treege malrapide malfortiĝis, tial la ĵus priskribita fenomeno multfoje kaj dum longa periodo ripetigos, ĝis la nebulozo estos fariĝinta tre densa, sufiĉe solida por efike rezisti kontraŭ la formoŝanĝoj sinsekve truditaj de ĝia rotacia movo.

Ĝi do estos naskinta ne nur astron sed ja centojn da mondoj, apartigitaj disde la centra fokuso, el ĝi eliĝintaj per la supredirita proceso de formiĝo. Nu, ĉiu el ĝiaj mondoj, penetrita, kiel la origina mondo, de la naturaj fortoj direktantaj la formadon de la universoj, sinsekve naskos novajn globojn, kiuj de tiam gravitos ĉirkaŭ ĝi tiel same, kiel ĝi, kune kun siaj fratoj, gravitas ĉirkaŭ la fokuso, kiu al ili donis ekziston kaj vivon. Ĉiu el tiuj mondoj estos ia suno, centro de ia kirlo el planedoj sinsekve apartigitaj disde ties ekvatoro. Tiuj planedoj ricevos specialan, apartan vivon, kvankam dependantan de la astro ilin generinta.

23. – La planedoj estas do formataj el masoj da densiĝinta, tamen ankoraŭ ne solidiĝinta materio, apartigitaj disde la centra maso pro la agado de la centrifuga forto. Tiuj masoj, sub la efiko de la leĝoj de movo, prenas sferoidan, pli malpli elipsan formon, laŭ la grado de fluideco, kiun ili konservis. Unu el tiuj planedoj estos la Tero, kiu antaŭ ol malvarmiĝi kaj tegiĝi per solida krusto, naskos la Lunon per la sama proceso de astra formiĝo, al kiu ĝi ŝuldis sian propran ekziston; la Tero, kiu de nun restos enskribita en la libro de la vivo, lulilo de kreitoj, kies malforteco ricevos protekton sub la

flugiloj de la dia Providenco, nova kordo sur la senfina harpo, kiu, sur sia loko, devos vibri en la universa koncerto de l' mondoj.

La satelitoj

24. – Antaŭ ol la planedaj masoj atingis malvarmogradon sufiĉan por ilin solidigi, malpli grandaj masoj, veraj likvaj globetoj, deapartiĝis de kelkiuj ĉe ties ekvatora ebena, kie pli granda estas la centrifuga forto. Pro la efiko de la samaj leĝoj, ili ricevis translacian movon ĉirkaŭ la origina planedo, same kiel okazis al ĉi tiuj lastaj rilate al la centra astro, de kiu ili originis.

Ja tiel la Tero naskis la Lunon, kies maso, malpli granda, devis suferi pli rapidan malvarmiĝon. Nu, la leĝoj kaj la fortoj, kiuj direktis ĝian apartiĝon de la tera ekvatoro, krom ankaŭ ĝia translacia movo sur tiu sama ebena, efikis en tia maniero, ke tiu mondo, anstataŭ ricevi formon sferoidan, prenis tiun de ovoida globo, tio estas, la formon pli longan de ovo, kun pezocentro sidanta en la malsupra parto.

25. – La kondiĉoj, en kiuj efektiviĝis la deapartiĝo de la Luno, apenaŭ permesis al ĝi malproksimiĝi de la Tero kaj ĝin devigis resti eterne pendanta en ties ĉielo, kiel ovoida figuro, kies pli pezaj partoj formis la malsupran surfacon turnitan al la Tero, kaj kies malpli densaj partoj okupis la verdon, se oni nomas per tiu vorto la surfacon, kiu, inversflanka rilate al la Tero, estas turnita al la ĉielo. Estas ĝuste pro tio, ke tiu astro ĉiam montras al ni la saman vizaĝon. Oni povas ĝin kompari, por pli bone komprenigi ĝian geologian staton, al korka globo, kies surfaco turnita al la Tero estus formita el plumbo.

Rezulte de tio, du esence distingiĝaj naturoj estas sur la supraĵo de la luna mondo: unu, sen ia ebla analogio kun la

nia, ĉar al tiu fremdas la korpoj fluidaj kaj eteraj; la alia, malpeza rilate al la Tero, ĉar ĉiuj malpli densaj substancoj portiĝis sur tiun hemisferon. La unua, konstante turnita al la Tero, sen akvoj kaj sen atmosfero, krom tie ĉi kaj tie en la limoj de tiu kontraŭtera hemisfero; la dua, riĉa je fluidoj, konstante inversflanka rilate al nia mondo.¹

¹ Tiu tute nova teorio pri la Luno eksplikas, per la leĝo de gravito, la kaŭzon, kial tiu astro ĉiam montras la saman surfacon al la Tero. Ĝia pezocentro, anstataŭ esti en la centro de la sfero, troviĝas en unu el la punktoj de ĝia surfaco kaj sekve estas altirata al la Tero de unu forto pli granda ol tiu altiranta la malpli pezajn partojn. Rezulte de tio, la Luno estigus la saman efikon kiel tiuj nefaligeblaj pupoj, kiuj ĉiam restariĝas sur sia bazo, dum la planedoj, kies pezocentro troviĝas je egalaj distancoj de la surfaco, regule giras ĉirkaŭ sia propra akso. La vivigaj fluidoj, gasaj aŭ likvaj, troviĝus, pro sia specifa malpezeco, akumulitaj en la supra hemisfero, konstante inversflanka rilate al la Tero. La malsupra hemisfero, la sola, kiun ni vidas, malhavus tiujn fluidojn kaj do estus netaŭga por la vivo, kiu tamen regus sur la alia. Se do ĝia supra hemisfero estas loĝata, ĝiaj loĝantoj neniam vidis la Teron, krom se ili ekskursus en la alian hemisferon, kio al ili estus neebla se ĝi ne prezentas la necesajn kondiĉojn por vivipoveco.

Ĉar ĉi tiun teorion, kiel ajn racia kaj scienca ĝi estas, ankoraŭ konfirmis neniu rekta observo, tial nur hipoteze ĝi povas esti akceptata kiel ideo markŝtona por la Scienco. Sed oni ne povas ne konsenti, ke ĝi estas ĝis nun la sola, kiu liveras kontentigan klarigon pri la apartaĵoj de la lunglobo. – *Noto de la Brazila Spiritisma Federacio en la 16^a eldono portugallingva de 1973: Teorio pri la Luno* – ĉe tiu teorio pri la Luno, prezentita en la Ĉapitro VI, n-roj 24 kaj 25, kaj la koncerna komentario de Allan Kardec en la respektiva piednoto, ke tiun teorion oni povas akcepti nur kiel hipotezon, malgraŭ ke ĝis tiam ĝi estis la sola, liveranta kontentigan klarigon pri la lunsfero – al la leganto ni prezentas la konkludojn de nuntempaj scienculoj, en la sekvantaj verkoj, celante faciligi al ili rapidan, sintezan komprenon pri la afero:

a) – A TERRA, OS PLANETAS E AS ESTRELAS (La Tero, la planedoj kaj la steloj), de K. E. Edgeworth, Editorial Verbo, Lisbono, 1964, p. 37/38 kaj 40: “Interesa apartaĵo de la Luno, de ĉiuj tre konata, estas tio, ke ĝi senŝanĝe montras la saman surfacon al la Tero. Alia fakto, malpli konata sed ankaŭ tre interesa kaj ne malpli grava, estas la formo de la luna ekvatoro: anstataŭ

26. – La nombro kaj la stato de la satelitoj de ĉiu planedo variis laŭ la apartaj kondiĉoj, en kiuj ili formiĝis. Kelkaj naskis neniun akcesoran astron, kiel Merkuro, Venuso

ĉirka, kiel tiu de la Tero, la luna ekvatoro estas elipsa kaj montras al ni sian pli grandan akson. La ĝenerale akceptita klarigo pri tiu fakto estas, ke en sia origino la korpo de la Luno estis sufiĉe plasteca por akcepti tiun apartan modladon de sia formo, kaj ke tia modlado okazis, kiam la satelito troviĝis multe pli proksima al la Tero ol en la hodiaŭaj tagoj. La nuntempa formo respondus al unu multe malpli longa luntago, ekvivalenta al $3\frac{1}{2}$ surteraj tagoj, kaj oni supozas, ke la tajda ondo, preskaŭ subite ĉesinta, por ĉiam donis al la Luno ĝian apartan formon.” “... la rotacia movo de la Luno malfruiĝadis en tia maniero, ke la luntago koincidis kun la lunmonato; ja pro ĉi tio la Luno ĉiam tenas la saman surfacon turnita al la Tero”.

b) – *Astronomie, les astres, l' univers* (Astronomio, la Astroj, la Universo), de L. Rudaux kaj G. de Vaucouleurs, Librairie Larousse, Parizo, 1948, p. 118/120: La aŭtoroj ekzamenas multe da detaloj, prezentas ilustraĵojn kaj egale konkludas kiel ĉi-supre.

c) – *Astronomia e Astronáutica – Dicionário Brasileiro* (Astromio kaj Astronaŭtiko – Brazila Vortaro) de Pastro Jorge O'Grady de Paiva, Rio, 1969, p. 145, eldono de la aŭtoro: “... Movo – 2 ĉefaj: rotacio kaj rivoluo, la unua ĉirkaŭ la akso, la dua ĉirkaŭ la Tero. Karakterizaĵo de tiu duobla movo estas, ke ili plenumiĝas en unu sama periodo de 1 monato, pro kio la lunaj tago kaj nokto preskaŭ daŭras po 1 duonmonato; tio ankaŭ estas la kaŭzo, ke ĝi ĉiam montras al ni la saman surfacon”.

d) – *Grande Enciclopédia Delta Larousse* (Granda Enciklopedio Delta Larousse), vol. 9, p. 4106, Rio, 1971: “La Luno havas rotacian movon ĉirkaŭ si mem, sur akso klinita je $83^{\circ}30'$ super la orbita ebena. La daŭro de la rotacio ekzakte egalas je ĝia rivoluo ĉirkaŭ la Tero. Tial la Luno ĉiam prezentas la saman surfacon al la Tero.”

Ĉe tio supre elvolvita, ni atendu estontajn manifestiĝojn de la Scienco pri tiu teorio enhavata en “La Genezo”, de Allan Kardec, en la espero, ke la misioj de la *Programo Apolo* – surluniĝo de astronaŭtoj-esploristoj – , kiuj sukcese efektiviĝis, kontribuu, post rigora analizo de la tuta kolektita materialo, per aliaj konkludoj por formuli novan aŭ konfirmi unu el la ekzistantaj teorioj pri la luno.

kaj Marso¹, dum aliaj, kiel la Tero, Jupitero, Saturno k.a., formis unu aŭ plurajn el tiuj akcesoraj astroj.

27. – Krom siaj satelitoj aŭ lunoj, la planedo Saturno prezentas, kiel apartan fenomenon, tiun ringon, kiu, vidate de malproksime, ŝajnas ĝin ĉirkaŭi kiel ia blanka aŭreolo. Efektive, tiu ringo rezultis el deapartiĝo okazinta ĉe la Saturna ekvatoro, ankoraŭ en la primitivaj tempoj, same kiel ekvatora zono deapartiĝis de la Tero kaj formis ĝian sateliton. La diferenco konsistas en tio, ke la saturna ringo formiĝis, en ĉiuj siaj partoj, el homogenaj molekuloj, verŝajne jam en certa stato de densiĝo, kaj tiel povis daŭrigi sian rotacian movon en sama direkto kaj en tempo preskaŭ egala al tiu de la planedo mem. Se unu el la punktoj de tiu ringo fariĝintus pli densa ol alia, tiam unu aŭ multe da aglomeraĵoj de substanco estus subite aperintaj, kaj sekve Saturno havus pli multe da satelitoj. Ekde la tempo de sia formiĝo, tiu ringo solidiĝas same kiel la aliaj planedaj korpoj.

La kometoj

28. – Erarvagantaj astroj, la kometoj, ankoraŭ pli ol la planedoj, kiuj konservis sian etimologian nomon, estos la gvidantoj, kiuj nin helpas transpasi la limojn de la sistemo, al kiu la Tero apartenas, por nin porti ĝis la foraj regionoj de la sidera spaco.

Sed antaŭ ol ni esploros, kun la helpo de tiuj vojaĝantoj de l' Universo, la ĉielajn regionojn, estos bone konigi, kiom

¹*Noto de la Brazila Spiritisma Federacio al sia portugallingva eldono:*
En 1877, estis malkovritaj du satelitoj de Marso: Foboso kaj Dejmoso.

nur eble, ilian internan naturon kaj ilian rolon en la planeda ekonomio.

29. – Unuj vidis, en tiuj astroj, havantaj hararsimilan trenaĵon, mondojn naskiĝantajn, kie formiĝas en ties primitiva ĥaoso, la kondiĉoj de la vivo kaj de la ekzistado, destinataj al la loĝataj mondoj; aliaj imagis, ke tiuj eksterordinaraj korpoj estas mondoj en stato de ruiniĝo, dum, por multaj, ilia stranga eksteraĵo estis objekto de eraraj opinioj pri ilia naturo, en tia maniero, ke estis neniu, inkluzive ĉe la sortodivena astrologio, kiu ilin ne rigardis kiel aŭguristojn de malfeliĉegoj, senditajn, laŭ providencaj decidoj, al la Tero konsternita kaj tremanta.

30. – La leĝo de diverseco aplikiĝas tiel vaste en la laboroj de la Naturo, ke oni demandas al si kiel la naturesploristoj, la astronomoj aŭ la filozofoj elpensis tiom da sistemoj por similigi la kometojn al la planedaj astroj kaj por ilin rigardi nur kiel astrojn en pli aŭ malpli alta grado de disvolviĝo aŭ de kadukeco. Tamen la kadroj de la Naturo devus vaste sufiĉi por evitigi al la observanto la zorgon reserĉi rilatojn ne ekzistantajn kaj lasi al la kometoj la modestan sed utilan rolon de erarvagaĵaj astroj, kiuj servas kiel esploristoj al la sunaj imperioj. Ĉar ja la ĉi-traktataj ĉielaj korpoj estas tute malsamaj al la planedaj korpoj; ili ne estas destinataj, kiel ĉi tiuj, servi kiel loĝejo al homaroj. Iafoje riĉiĝante, sur sia vojo, per planedaj fragmentoj reduktitaj al la vaporstato, ili iras la sinsekvon de l' sunoj ĉerpi en ties fokuso la vivigajn kaj renovigajn principojn, por ilin verŝi sur la termondojn. (Ĉap. IX, n-ro 12.)

31. – Se, kiam unu el tiuj astroj proksimiĝas al nia malgranda globo por trairi ĝian orbiton kaj reveni al sia apogeo situanta je nemezurebla distanco de la Suno, ni ĝin

akompanus per la penso por viziti kun ĝi la siderajn regionojn, ni transpasus tiun miregindan etendaĵon da etereca materio, kiu apartigas la Sunon disde la plej najbaraj steloj. Observante la kombinitajn movojn de tiu astro, kiun oni supozus devojiĝinta en la dezerta senfino, ni tie ankoraŭ trovus elokventan pruvon pri la universeco de la naturaj leĝoj, kiuj agas je distancoj apenaŭ imageblaj por la plej aktiva menso.

Tie la elipsa formo prenas tiun parabolon kaj la irado tiel forte malakceliĝas, ke la kometo kuras ne pli ol kelke da metroj en la sama tempo, kiun, en sia apogeo, ĝi uzis por kuri plurajn milojn da leŭgoj. Eble ia suno pli potenca, pli grava ol tiu, kiun ĝi ĵus forlasis, efikas sur tiun kometon per supera altirforto kaj ĝin akceptas kiel unu el siaj regatoj. Tiam, sur via malgranda Tero, la timiĝintaj infanoj vane atendas ĝian revenon, kiun oni antaŭdiris surbaze de nekompletaj observoj. Ĉi-okaze, ni, kiu per la penso akompanis la erarvagantan kometon en tiuj nekonataj regionoj, renkontos novan nacion netroveblan por la surteraj okuloj, neimageblan por la Spiritoj loĝantaj sur la Tero, eĉ nekoncepteblan por iliaj mensoj, ĉar tio estas scenejo de neesplorataj miregindaĵoj.

Ni alvenis al la astra mondo, al tiu ravega mondo de l' vastaj sunoj, radiantaj en la senfina spaco, kaj kiuj estas la splendaj floroj en la grandioza ĝardeno de la kreaĵaro. Tie alveninte, ni apenaŭ scios, kio estas la Tero.

La Lakta Vojo

32. – En la belaj, stelplenaj noktoj senlunaj, ĉiu jam povis rimarki tiun lumon, kiu trafranĉas la ĉielon, de unu ekstremo al la alia, kaj kiun la Antikvuloj nomis, pro ties lakteca aspekto, *Lakta Vojo*. Tiun difuzan lumaĵon la teleskopoj, en la modernaj tempoj, longe esploris; tiu orpulfora

vojo, aŭ lakta roĵo, de la antikva mitologio, transformiĝis en vastan kampon de neimageblaj miregindaĵoj. La esploroj de la observistoj kondukis al la konado de ties naturo kaj montris tie, kie la erarvaganta rigardo nur trovis palan lumecon, milionojn da sunoj pli brilajn kaj gravajn ol tiu prilumanta la Teron.

33. – Efektive, la Lakta Vojo estas kampo prisemita per floroj sunaj aŭ planedaj, brilantaj sur ĝia vasta etendaĵo. Nia Suno kaj ĉiuj korpoj, kiuj ĝin akompanas, apartenas al tiuj radilumaj globoj formantaj la Laktan Vojon. Sed malgraŭ ĝiaj gigantaj dimensioj rilate al la Tero, ĝi tamen okupas nur sensignifan lokon en tiu vasta kreaĵo. Oni povas taksi je tridek milionoj la nombron da sunoj, kiuj, kiel ĝi, gravitas en tiu nemezurebla regiono, apartigitaj, unuj disde aliaj, je distancoj centmiloble pli grandaj ol la radio de la tera orbito.¹

34. – Oni povas taksi, per tiu aproksima nombro, la longon de tiu sidera regiono kaj la rilaton ekzistantan inter nia sistemo kaj la universaleco de la sistemoj, kiuj tiun regionon okupas. Oni ankaŭ povas taksi la malvastegecon de la suna regno kaj, *a fortiori*, la neniecon de nia eta Tero. Kio do estus, se oni konsiderus la estaĵojn, kiuj ĝin loĝatigas!

Mi diras – “neniecon” – ĉar niaj taksoj aplikiĝas ne nur al la longo materia, fizika, de la ĉi-studataj korpoj – kio ja prezentus malmulton – sed ankaŭ kaj precipe al ilia morala stato kiel loĝejo kaj al la grado, kiun ili okupas en la eterna hierarkio de la estaĵoj. Tie la kreaĵaro sin montras per sia tuta majesteco, kreante kaj disvastigante ĉirkaŭ la suna mondo kaj en ĉiu el la sistemoj, de ĉiuj flankoj ĝin ĉirkaŭantaj, la manifestiĝojn de la vivo kaj de la intelekto.

¹ Pli ol 3 duilionoj kaj 4 miliardoj da leŭgoj.

35. – Oni tiel ekscias la pozicion, kiun nia Suno aŭ la Tero okupas en la mondo de la steloj. Ankoraŭ pli da graveco ricevos tiuj konsideroj, se ni pripensos la staton mem de la Lakta Vojo, kiu, ĉe la vastegeco de la sideraj kreaĵoj, prezentas, vidate de malproksime, nekonsiderindan kaj nesenteblan punkton, ĉar ĝi efektive estas nenio alia ol unu stelkonsista nebulozo inter tiuj milionoj ekzistantaj en la spaco. Se ĝi ŝajnas al ni pli vasta kaj pli riĉa ol aliaj, tio estas pro la sola kialo, ke ĝi nin ĉirkaŭas kaj etendiĝas laŭ sia tuta longo antaŭ niaj okuloj, dum la aliaj, perdiĝintaj en la nesondeblaj profundaĵoj, apenaŭ lasas sin duonvidi.

36. – Nu, se oni scias, ke la Tero estas neniaĵo, aŭ preskaŭa neniaĵo, en la sunsistemo; ke ĉi tiu ankaŭ estas preskaŭa neniaĵo, en la Lakta Vojo; ke ĉi tiu, siavice, nenio, aŭ preskaŭ nenio, estas rilate al la universeco de la nebulozoj, kaj ke ĉi tiu universeco mem tre malmulton signifas en la nemezurebla senfino, oni tiel komencas kompreni, kia ja estas la terglobo.

La fiksj steloj

37. – La steloj, kiujn oni nomas “fiksj” kaj kiuj plenigas ambaŭ hemisferojn de la firmamento, ne estas, kiel oni ĝenerale supozas, tute liberaj je ĉia ekstera altiro. Tute male, ĉiuj apartenas al unu sama aglomeraĵo da stelaj astroj. Tiu aglomeraĵo estas nenio alia, ol la granda nebulozo, al kiu ni estas ligitaj kaj kies ekvatora zono, projekciita sur la ĉielo, ricevis la nomon *Lakta Vojo*. Ĉiuj sunoj, kiuj ĝin konsistigas, estas solidaraj inter si; iliaj multoblaj influoj eterne reagas, unuj sur la aliajn, kaj la universa gravito ilin kunigas en unu saman familion.

38. – La pliparto el tiuj diversaj sunoj estas, kiel la nia, ĉirkaŭitaj de duarangaj mondoj, kiujn ili prilumas kaj fekundigas pere de tiuj samaj leĝoj, kiuj direktas la vivon de nia planeda sistemo. Unuj, kiel Siriuso, estas milmillionoble pli grandiozaj, laŭ dimensioj kaj riĉaĵoj, ol la nia, kaj ludas pli gravan rolon en la Universo. Ilin ankaŭ ĉirkaŭas planedoj, sed en pli granda nombro kaj tre superaj al la niaj, dum aliaj tre malsimilas per siaj astraj funkcioj. Tiel, certa nombro da tiuj sunoj, ja veraj ĝemeloj en la sidera ordo, estas akompanataj de siaj samaĝaj fratoj kaj formas, en la spaco, binarajn sistemojn, al kiuj la Naturo komisiis funkciojn tute aliajn, ol tiuj koncernantaj nian Sunon.¹

Tie la jaroj ne mezuriĝas per la samaj periodoj, nek la tagoj per la samaj sunoj, kaj tiuj mondoj, prilumataj de duobla torĉo, estas dotitaj per ekzistokondiĉoj neimageblaj por tiuj, kiuj ankoraŭ ne eliris el ĉi tiu malgranda surtera mondo.

Aliaj astroj, sen akompanantaro, sen planedoj, ricevis elementojn de loĝebleco pli bonajn, ol tiuj havigitaj al ĉiuj ceteraj. La leĝoj de la Naturo diversas en ties senmezura vasteco, kaj, se unueco estas la granda esprimo de la Universo, la senfina diverseco ankaŭ same estas ĝia eterna atributo.

¹ Tion oni nomas, en Astronomio, “duoblaj steloj”. Temas pri du sunoj, el kiuj unu rondiras ĉirkaŭ la alia, same kiel planedo ĉirkaŭ sia suno. Kian neordinaran kaj grandiozan spektaklon certe ĝuas la loĝantoj de la mondoj apartenantaj al tiuj sistemoj prilumataj de ia duobla suno! Sed ankaŭ kiel, en tiuj mondoj, malsamaj devas esti la kondiĉoj por la vivipoveco!

En komunikaĵo, poste diktita, la Spirito Galileo aldonis: “Eĉ ekzistas sistemoj ankoraŭ pli kompleksaj, en kiuj diversaj sunoj ludas, unuj rilate al aliaj, la rolon de satelitoj. Tiam montriĝas miregindaj lumefektoj al la loĝantoj de la globoj prilumataj de tiuj sunoj, des pli ke, malgraŭ ilia ŝajna proksimeco, loĝataj mondoj povas cirkuli inter ili kaj alterne ricevi la diverskolorajn lumondojn, kies kuniĝo rekonsistigas la blankan lumon.”

39. – Malgraŭ la eksterordinara nombro da tiaj steloj kaj ties sistemoj, malgraŭ la nemezureblaj distancoj, kiuj ilin disigas, ili ĉiuj tamen apartenas al unu sama stelkonsista nebulozo, kiun la plej potencaj teleskopoj apenaŭ povas trapenetri, kiun la konceptoj de la plej aŭdaca imago apenaŭ povas atingi, sed kiu simple estas nenio alia ol ia ero en la vico de la nebulozoj konsistigantaj la astran mondon.

40. – La tiel nomataj fiksaĵoj steloj ne estas senmovaj en la senlimaĵo. La konstelacioj figuritaj sur la firmamenta volbo ne estas realaj kreaĵoj simbolaj. Ilia *distanco* disde la Tero kaj la perspektivo, en kiu oni mezuras la Universon, de tiu planeda stacio, estas la du kaŭzoj de tiu duobla optika iluzio (ĉap. V, n-ro 12.)

41. – Ni vidis, ke la totalo de la astroj scintilantaj en la blua kupolo estas enfermita en ia kosma aglomeraĵo, en unu sama nebulozo, kiun vi nomas Lakta Vojo. Sed la aparteno de ĉiuj al sama grupo ne signifas, ke ĉiu el tiuj astroj ne estas animata de propra translacia movo en la spaco. Nenie ekzistas la absoluta ripozo. Ilin regas la universaj leĝoj de gravito, kaj ili ruliĝas en la senlimaĵo senĉese impulsate de tiu senmezura forto. Ili ruliĝas ne sur vojoj strekitaj de l' hazardo, sed en limitaj orbitoj, kies centron okupas supera astro. Por fari miajn vortojn pli kompreneblaj per iu ekzemplo, mi aparte parolos pri via Suno.

42. – Oni scias, pro la modernaj observoj, ke ĝi estas nek fiksa, nek centra, kiel oni supozis en la unuaj tempoj de la nova astronomio, sed ke ĝi iras tra la spaco, trenante kun si sian vastan sistemon el planedoj, satelitoj kaj kometoj.

Nu, ne hazarda estas ĝia irado, kaj ĝi ne devojigos, erarvagante en la senfinaj malplenaĵoj, siajn filojn kaj regatojn for de tiuj regionoj al ili asignitaj. Ne, ĝia orbito estas difinita, kaj konkure kun aliaj samordaj sunoj, ĉiuj ĉirkaŭitaj de certa nombro da loĝataj mondoj, ĝi gravitas ĉirkaŭ unu centra suno. Ĝia gravita movado, kiel tiu de ĝiaj suno-fratoj, estas netaksebla por jaraj observoj, ĉar multenombraj jarcentaj periodoj apenaŭ sufiĉus por mezuri la tempon de unu el tiuj astraj jaroj.

43. – Tiu centra suno, pri kiu ni ĵus parolis, ankaŭ estas mem globo duaranga rilate al alia ankoraŭ pli grava, ĉirkaŭ kiu ĝi tenas konstantan iradon, malrapidan kaj egalmezuran, en la kompanio de aliaj samordaj sunoj.

Ni povas konstati tiun sinsekvan subordiĝon de sunoj al sunoj ĝis nia imago laciĝos supreniri tian hierarkion, ĉar, ni tion ne forgesu, oni povas rondcifere kalkuli je trideko da milionoj, en la Lakta Vojo, la nombron de la sunoj, kiuj sin subordigas, unuj al aliaj, kvazaŭ ĝigantaj radoj de senmezura sistemo.

44. – Kaj tiuj astroj, nombre nekalkuleblaj, vivas solidare inter si. Kiel, en la ekonomio de via tera mondeto, nenio restas en izolo, tiel same okazas en la nemezurebla Universo.

De malproksime, antaŭ la explorema rigardo de la filozofo, kiu povus ampleksi la bildon prezentatan de la spaco kaj la tempo, tiuj sistemoj el sistemoj ŝajnus ia polvo el orgrajnoj kirle levita de la dia blovo, kiu igas la siderajn mondojn flugi en la ĉieloj same kiel sableroj flugas sur la dorso de l' dezerto.

Nenie senmoveco, nek silento, nek nokto! La granda spektaklo, kiu tiam malvolviĝus antaŭ niaj okuloj, estus ja la

reala kreaĵaro, senmezura kaj plena je tiu etera vivo, kies grandiozan tuton la senlima rigardo de la Kreinto ampleksas.

Sed ĝis tie ĉi ni nur parolis pri unu sola nebulozo, kies milionoj da sunoj, da loĝataj mondoj nur konsistigas, kiel ni jam diris, ian insulon en la senlima arkipelago.

La dezertoj de la spaco

45. – Senmezura, senlima dezerto etendiĝas trans tiu stelaglomeraĵo ĉi-supre preparolita kaj ĝin envolvas. Solecaj vastaĵoj sin sekvas, unu post alia, kaj nemezureblaj regionoj de la malplenaĵo sterniĝas transfore. La amasoj da kosma materio troviĝas izolitaj en la spaco, kvazaŭ flosantaj insuloj de senlima arkipelago, kaj se oni iel volas taksu la enorman distancon disigantan tiun stelamason, al kiu ni apartenas, disde tiuj pli proksimaj aglomeraĵoj, oni sciu, ke tiuj stelinsuloj estas dis-semitaj kaj maloftaj sur la vasta ĉieloceano, kaj ke la distanco, kiu ilin disigas, unuj de aliaj, estas netakseble pli granda ol la longo de iliaj respektivaj dimensioj.

Nu, oni scias, ke la stelkonsista nebulozo rondcifere samlongas la miloblan distancon al la pli proksimaj steloj, distancon ĉi-prenitan kiel unuon, tio estas, kelkcentmil duilionoj da leŭgoj. Ĉar la distanco inter ili estas multe pli granda, ĝi ne povas esprimiĝi per nombroj kompreneblaj por nia spirito. Nur la imago, per siaj pli altaj konceptoj, povas transpasi tiun miregigan senlimajon, tiujn solecajn vastaĵojn, silentajn kaj sen ia ŝajno de vivo, kaj iamaniere rekte rigardi la ideon pri tiu relativa senfineco.

46. – Sed tiu ĉiela dezerto, kiu envolvas nian sideran universon kaj kiu ŝajne sterniĝas kiel la foraj randoj de nia astra mondo, estas ĉirkaŭprenita de la vido kaj de la senfina

povo de la Plejalta, kiu, trans tiuj ĉieloj de niaj ĉieloj, teksis la intrigon de sia senlima kreado.

47. – Efektive, trans tiuj solecaj vastaĵoj, same kiel en la regionoj alireblaj por la homa esplorado, mondoj pompe lumradias; trans tiuj dezertoj, vagas en la klara etero splendaj oazoj, kiuj senĉese renovigas la miregindajn scenojn de la ekzistado kaj de la vivo. Tie sinsekve montriĝas la foraj aglomeraĵoj da kosma substanco, kiujn la fundpenetra rigardo de la teleskopo perceptas en la travidaj regionoj de nia ĉielo, aglomeraĵoj, kiujn vi nomas nesolveblaj nebulozoj kaj kiuj al vi ŝajnas leĝeraj nuboj el blanka polvo, perditaj en iu nekonata punkto de la etera spaco. Tie elmontriĝas kaj disvolviĝas novaj mondoj, kies kondiĉoj, diversaj kaj diferencaj de tiuj propraj al via globo, havigas al ili ian vivon neimageblan por viaj mensoj, nekonstateblan por viaj studoj. Ja tie brilegas, en sia tuta pleneco, la kreiva povo. Al tiu devenanta de la regionoj, kiujn via sistemo okupas, sin montras en agado aliaj leĝoj, kies fortoj regas la manifestiĝojn de la vivo. Kaj la novaj vojoj, kiujn ni iras sur tiuj strangaj regionoj, malfermas al ni nekonatajn perspektivojn.¹

¹ En Astronomio, oni nomas *nesolveblaj* tiujn nebulozojn, kies konsistigajn stelojn oni ankoraŭ ne povis distingi. Komence, oni ilin rigardis kiel amasojn da kosma materio, densiĝantajn por formado de mondoj. Sed nun oni ĝenerale pensas, ke tiun ŝajnon kaŭzas ilia malproksimeco, kaj ke, helpe de sufiĉe potencaj instrumentoj, ĉiuj fariĝus *solveblaj*.

Iu ordinara komparo povas doni ideon, kvankam tre neperfektan, pri la *nesolveblaj nebulozoj*: temas pri la aroj da fajreroj elĵetataj de la eksplodantaj krakfajraĵoj. Ĉiu fajrero figuras iun stelon kaj ilia tuto figuras la nebulozon, aŭ la aron de la steloj kolektiĝintaj en iu punkto de la spaco kaj submetitaj al komuna leĝo de altiro kaj de movo. Vidate de certa distanco, tiuj fajreroj apenaŭ distingiĝas, kaj ilia kolekto aspektas kiel fuma nubeto. Tiu komparo ne estus ĝusta, se temus pri masoj el densiĝinta kosma materio.

Nia Lakta Vojo estas unu el tiaj nebulozoj. Ĝi enkalkulas ĉirkaŭ 30 miliardojn da steloj aŭ sunoj, okupantaj spacon ne malpli longan ol kelkcent duilionoj da leŭgoj, sed ĝi tamen ne estas la plej granda. Ni supozu, ke averaĝe nur 20 loĝataj planedoj rondiras ĉirkaŭ ĉiu suno: tio donus nur al nia grupo la ĉirkaŭan nombron da 600 milionoj da mondoj.

Se ni povus transportiĝi de nia nebulozo en iun alian, tie ni troviĝus kvazaŭ en la mezo de nia Lakta Vojo, sed sub stelplena ĉielo kun tute malsama aspekto; kaj tiu nebulozo, malgraŭ siaj kolosaj dimensioj, aperus al ni en la malproksimo kiel lensoforma fokuso perdita en la senlimaĵo. Sed antaŭ ol atingi la novan nebulozon, ni status kiel la vojaĝanto, kiu forlasas urbon kaj trairas vastan neloĝatan regionon ĝis li atingos alian urbon. Ni estus transpasintaj nemezureblajn spacojn senigitajn je steloj kaj mondoj, kion Galileo nomis la dezertoj de la spaco. Laŭgrade kiel ni antaŭenirus, ni vidus nian nebulozon foriĝi post ni, malpligrandiĝante al nia vido, dum antaŭ ni aperus tiu, al kiu ni nin direktus, ĉiam pli kaj pli neta, simila al la fajrera maso de la krakfajraĵo. Transportiĝante per la penso en la regionojn de la spaco, situantajn trans la *arkipelago* de nia nebulozo, ni vidos ĉirkaŭ ni milionojn da similaj arkipelagoj kaj da diversaj formoj enhavantaj po milionojn da sunoj kaj centmilionojn da loĝataj mondoj.

Ĉio, kio povas nin alkonformigi al la senlimeco de la spaco kaj al la strukturo de la Universo, estas utila al la plivastigo de la ideoj ja tiel malvastigitaj de la vulgaraj kredoj. Dio grandiĝas antaŭ niaj okuloj laŭmezure kiel ni pli bone komprenas la grandiozecon de liaj verkoj kaj nian malsuperegecon. Kiel oni vidas, ni staras malproksime de tiu kredo enplantita de la mosea Genezo, kiu faras el nia eta, neperceptebla Tero la ĉefan kreaĵon de Dio kaj el ĝiaj loĝantoj la solajn objektojn de lia prizorgado. Ni komprenas la vantecon de tiuj homoj kredantaj, ke ĉio en la Universo estas farita por ili, kaj ankaŭ de tiuj aliaj, kiuj kuraĝas kontesti la ekziston de la Superega Estaĵo. Post kelke da jarcentoj oni forte miros, ke iu religio, kiu devus glori Dion, lin tamen malaltigis ĝis tiel mizeraj proporcioj kaj repuŝis, kiel kreaĵon de la Spirito de l' Malbono, tiujn eltrovojn, kiuj kontraŭe nur pligrandigis nian admiron al lia ĉiopoveco, nin incante en la grandiozajn misterojn de la kreado. Ankoraŭ pli forta estos la mirego, kiam oni ekscios, ke ili estis repuŝitaj pro tio, ke ili emancipus la homan spiriton kaj estingus la superregadon de tiuj sin deklarantaj reprezentantoj de Dio sur la Tero.

Eterna sinsekvo de l' mondoj

48. – Ni vidis, ke unu sola, ĉefa kaj ĝenerala leĝo estis donita al la Universo, por al ĝi certigi eternan stabilecon, kaj ke tiu leĝo percepteblas por niaj sensoj per pluraj apartaj agoj, kiujn ni nomas direktantaj fortoj de la Naturo. Ni nun montros, ke la harmonio de la tuta mondo, rigardata sub la duobla aspekto de la eterneco kaj de la spaco, estas certigita de tiu superega leĝo.

49. – Efektive, se ni reiros al la praa origino de la primitivaj aglomeraĵoj da kosma substanco, ni rimarkos, ke jam tiam, sub la regado de tiu leĝo, la materio suferas la necesajn transformiĝojn, kiuj ĝin kondukas de la ĝermo ĝis la matura frukto, kaj ke, impulsate de la diversaj fortoj naskitaj de tiu leĝo, ĝi pasas la skalon de la periodaj evoluoj. Komence fluideca centro de movoj, poste generanto de mondoj, fine centra kaj altira kerno de la sferoj naskitaj en ĝia sino.

Ni jam scias, ke tiuj leĝoj direktas la historion de la Kosmo; kio nun gravas scii estas, ke ili ankaŭ direktas la detruon de la astroj, ĉar la morto estas ne nur ia metamorfozo de la vivanta estaĵo, sed ankaŭ ia transformiĝo de la neanimita materio. Kaj, se estas ĝuste diri, laŭ litera senco, ke nur la vivo estas trafebla por la la falĉilo de la morto, ne malpli ĝuste estas aldoni, ke al la substanco nepre necesas suferi la transformiĝojn esence proprajn al sia konsisto.

50. – Jen mondo trapasinta, ekde sia primitiva lulilo, la tutan serion da jaroj, kiun ĝia speciala organizo al ĝi permesis trapasi. Ĝia interna ekzisto-forto estingiĝis, ĝiaj elementoj perdis la komencan povon; la fenomenoj de la Naturo, kiuj

postulis, por manifestiĝi, la ĉeeston kaj agadon de la fortoj al ĝi havigitaj, jam ne povas fariĝi, ĉar la levilo de ilia agado ne plu disponas tiun apogpunkton, kiu al ili ebligis plene potenci.

Nu, ĉu eblas kredi, ke tiu tero, estingiĝinta kaj senviva, daŭre kaj sencele gravitos en la ĉielaj spacoj kaj cirkulos kiel senutila cindro en la ĉielaj kirloj? Ĉu eblas kredi, ke ĝi restos enskribita en la libro de la universa vivo, post kiam ĝi fariĝis nenio alia ol malviva litero, tute sensenca? Ne. La samaj leĝoj, kiuj ĝin levis super la tenebra ĥaoso kaj kiuj ĝin ornamis per la pompoj de la vivo, la samaj fortoj, kiuj ĝin regis dum ĝiaj adoleskaj jarcentoj, kiuj al ĝi firmigis la unuajn paŝojn en la ekzistado kaj ĝin kondukis al maturaĝo kaj grandaĝo, tiuj leĝoj ankaŭ direktos la diseriĝon de ĝiaj konsistaj elementoj por ilin revenigi al la laboratorio, kie la kreiva potenco senĉese ĉerpas la kondiĉojn de la ĝenerala stabileco. Tiuj elementoj revenos al la komuna maso de la etero, por asimiliĝi al aliaj korpoj aŭ por regeneri aliajn sunojn. Kaj tiu morto ne estos okazaĵo senutila, nek al tiu mondo, nek al ĝiaj fratoj: en aliaj regionoj, ĝi renovigos malsamnaturajn kreaĵojn kaj tie, kie disnieniĝis aliaj mondsistemoj, baldaŭ reaperos nova ĝardeno el pli brilaj kaj pli bonodoraj floroj.

51. – Tiel, la reala, efektiva eterneco de la Universo estas certigita de la samaj leĝoj, kiuj direktas la operaciojn de l' tempo; tiel, mondoj sekvas mondojn, sunoj sekvas sunojn, sen ke la senmezura mekanismo de la vastaj ĉieloj suferus difekton en siaj gigantaj risortoj.

Tie, kie viaj okuloj admiras splendajn stelojn sub la nokta volbo, kie via spirito kontemplas grandiozajn lumradiojn, kiuj brilegas en la foraj spacoj, tie jam de longe la fingro de la morto estingis tiujn miregindaĵojn, de longe malpleno anstataŭis tiujn splendojn kaj eĉ akceptis novajn, ankoraŭ

nekonatajn kreaĵojn. La nemezurebla distanco, nin disiganta de tiuj astroj, pro kiu la lumo de ili sendata nin atingas post miloj da jaroj, estas la kaŭzo, kial nur nun ni ricevas la radiojn, kiujn ili sendis longe antaŭ la formado de la Tero, kaj kial ni ilin admiras milojn da jaroj post ilia efektiva estingiĝo¹. Ĉe tiuj jarcentaj periodoj, kio ja estas la sesmiljara aĝo de la historia homaro? Sekundoj, laŭ viaj jarcentoj. Ĉe la absoluta stato de la mondo, kio ja estas viaj astronomiaj observoj? Ombro neniigita de la Suno.

52. – Ni do agnosku, ĉi tie same kiel en niaj aliaj studoj, ke la Tero kaj la homo estas nenio kompare kun ĉio, kio ekzistas, kaj ke la plej kolosaj operacioj de nia penso ankoraŭ ampleksas nur kampon, kiu nepercepteblas antaŭ la senlimeco kaj la eterneco de ia universo neniam estingiĝonta.

Kaj, kiam tiuj periodoj de nia senmorteco estos pasintaj super niaj kapoj, kiam la aktuala historio de la Tero montriĝos al ni kvazaŭ vaporeca ombro en la fundo de nia memoro; kiam, dum nekalkuleblaj jarcentoj, ni estos loĝintaj tiujn diversajn gradojn de nia kosmologia hierarkio; kiam la plej foraj kampoj de la estontaj aĝoj estos de ni trakuritaj dum nenombreblaj migradoj, tiam ni havos antaŭ ni la senliman sinsekvon de l' mondoj kaj, kiel perspektivon, la senmovan eternecon.

¹ Tio rezultas el la tempo, kiun la lumo uzas por trairi la spacon. Ĉar ĝia rapido estas 70.000 leŭgoj en sekundo, ĝi atingas nin deire de la Suno en 8 minutoj kaj 13 sekundoj. El tio sekvas, ke ni vidas fenomenon okazantan sur la suna supraĝo ne pli frue ol post 8 minutoj kaj, pro la sama kialo, ni ĝin ankoraŭ vidos 8 minutojn post ĝia ĉeso. Se, pro ĝia malproksimo, la lumo de iu stelo uzas mil jarojn por nin atingi, ni do vidos tiun stelon nur post mil jaroj de ĝia formado. (Por klarigo kaj kompleta priskribo de tiu fenomeno, vidu *Revue Spirite* de marto kaj majoj de 1867, p. 93 kaj 151; raporto de *Lumen*, laŭ C. Flammarion.)

La universa vivo

53. – Tiu senmorteco de la animoj, kies bazo estas la sistemo de la fizika mondo, ŝajnis imaga al iuj antaŭjuĝaj pensuloj, kiuj ĝin ironie nomis vojaĝanta senmorteco kaj ne komprenis, ke nur ĝi estas vera en la spektaklo de la kreado. Tamen, povas iĝi komprenebla ĝia tuta grandeco, kaj mi preskaŭ dirus: ĝia tuta perfekteco.

54. – Ke la verkoj de Dio estas kreitaj por la penso kaj la inteligento; ke la mondoj estas loĝejoj de estaĵoj, kiuj ilin kontemplas kaj en ili malkovras, sub ilia vualo, la potencon kaj la saĝon de tiu, kiu ilin formis, jen demandoj, pri kiuj estas jam nenia dubo; sed ke la animoj, kiuj ilin loĝas, estas inter si solidaraj, jen kio ja gravas scii.

55. – Efektive, al la homa inteligento ne estas facile rigardi tiujn radilumajn globojn, scintilantajn en la vastaĵo, kiel simplajn masojn el inerta kaj senviva materio; al ĝi malfacilas pensi, ke en tiuj foraj regionoj ne estus grandiozaj krepuskoj kaj ravegaj noktoj, sunoj fekundaj kaj lumplenaj tagoj, valoj kaj montoj, kie la multoblaj produktoj de la Naturo disvolviĝas per sia tuta riĉega pompo; al ĝi malfacilas imagi, mi diras, ke tiu dia spektaklo, ĉe kiu la animo povas revigliĝi kiel ĉe sia vivo, ne ekzistus kaj malhavirus pensivajn estaĵojn, kiuj ĝin povus koni.

56. – Sed al tiu treege ĝusta ideo pri la kreado necesas alligi tiun pri la intersolidara homaro, kaj ja en tio konsistas la mistero de la estonta eterneco.

Unu sama homa familio estis kreita en la universa tutaĵo de l' mondoj, al kiuj estis metitaj la ligiloj de unu ankoraŭ por vi netaksebla frateco. *Se la astroj, kiuj inter si harmonias en siaj vastaj sistemoj, estas loĝataj de inteligentaj estaĵoj, ĉi tiuj ja ne estas nekonataj unuj al la aliaj, sed male portas, stampita sur la fruntoj, la saman destinon, nepre renkontiĝos, dumtempe, laŭ siaj vivfunkcioj, kaj denove renkontiĝos laŭ siaj reciprokaj simpatioj.* Tio estas la granda familio de la Spiritoj, loĝantaj la ĉielajn terojn; la granda radiado de la dia Spirito, kiu ampleksas la etendaĵon de la ĉieloj kaj kiu restas kiel primitiva kaj fina tipo de la spirita perfekteco.

57. – Per kia stranga deflankiĝo de la ideoj oni kredis necesa ne konsenti senmortecon al la vastaj regionoj de la etero, kiam oni ĝin tenadis enfermita en neakcepteblaj limoj kaj en absoluta dualeco? Ĉu do la vera sistemo de l' mondo devus antaŭveni la veran dogmisman doktrinon, kaj la Scienco antaŭveni la Teologion? Ĉu tiu ĉi tiele devojiĝos, ke ĝia bazo sidos sur la Metafiziko? Facila estas la respondo, kiu al ni montras, ke la nova filozofio triumfe sidos sur la ruinoj de la antikva, ĉar ĝia bazo venke stariĝos sur la malnovaj eraroj.

Diverseco de l' mondoj

58. – Akompanante nin en niaj ĉielaj ekskursoj, vi kun ni vizitis la senlimajn regionojn de la spaco. Sub nia rigardo, sunoj venis post sunoj, sistemoj post sistemoj, nebulozoj post nebulozoj; dum nia irado, antaŭ ni elvolviĝis la splendaj panoramoj de la harmonio de l' Kosmo, kaj ni antaŭĝuis la ideon pri la senfino, kiun ni povos kompreni en ties tuta pleneco nur konforme al nia perfektigiĝado en la estonteco. La misteroj de la etero al ni malkaŝis sian ĝis nun nedeĉifreblan

enigmon, kaj ni almenaŭ konceptis la ideon pri la universeco de la ekzistaĵoj. Gravus nun, ke ni faru paŭzon por pripensi.

59. – Bele estas, sendube, ke ni rekonis la malsuperegecon de la Tero kaj ties signifan gravecon en la hierarkio de la mondoj; estas bele, ke ni faligis la al ni tiel karan homan vantecon kaj humiliĝis antaŭ la absoluta grandeco; sed ankoraŭ pli bele estos moralsence interpreti la spektaklon, kiun ni ĉeestis. Mi aludas la senliman potencon de la Naturo kaj la ideon, kiun ni devas fari al ni pri ĝia agmaniero en ĉiuj kampoj de la vasta Universo.

60. – Kutimintaj, kiel ni ja estas, juĝi la aferojn laŭ nia modesta, signifa loĝejo, ni imagas, ke la Naturo povas, aŭ devis, agi en aliaj mondoj nur laŭ tiuj reguloj de ni konataj sur la Tero. Nu, ĝuste koncerne ĉi tion ni devas ŝanĝi nian juĝon.

Ĵetu momentan rigardon al ia ajn regiono de via globo kaj sur unu el la produktoj de via Naturo. Ĉu vi tie ne rekonas la stampon de ia senlima diverseco kaj la pruvon de ia senegala aktiveco? Ĉu vi ne vidas en la flugilo de Kanaria birdo, en la petalo de rozburĝono, la imponan fekundecon de tiu bela Naturo?

Viajn studojn direktu al la estaĵoj, kiuj flugas en la aero; turnu ilin malsupren ĝis la kampaj violoj; ilin dronigu en la profundaĵoj de la oceano, kaj en ĉio, en ĉiu loko vi legos ĉi tiun universalan veraĵon: La ĉiopova Naturo agas konforme al la lokoj, la tempoj kaj la cirkonstancoj; ĝi estas unueca laŭ sia ĝenerala harmonio sed multobla laŭ siaj produktoj; ĝi ludas kun sunoj tiel same kiel kun akvogutoj; ĝi loĝatigas vastegan mondon per vivaj estaĵoj same facile kiel ĝi rompas ovon demetitan de papilio.

61. – Nu, se tia estas la diverseco, kiun la Naturo al ni elmontris sur ĉiuj lokoj de ĉi tiu eta mondo, tiel malvasta, tiel limigita, kiom pli ampleksa vi devas rigardi tiun agmanieron, pripensante la perspektivojn proprajn al la grandegaj mondoj! kiom pli evoluinta kaj potenca vi devas rekoni ĝin, ĉe ĝia agado sur tiuj miregindaj mondoj, kiuj, pli ol la Tero, atestas ĝian netakseblan perfektecon!

Vi do ne vidu, ĉirkaŭ ĉiu el la sunoj de la spaco, nur planedajn sistemojn similajn al la via; ne vidu, sur tiuj nekona-taj planedoj, nur la tri regnojn de la Naturo, kiuj paradas ĉirkaŭ vi. Vi male pensu, ke, kiel ne estas unu homa vizaĝo tute simila al alia vizaĝo en la tuta homaro, tiel same potenca, neimagebla diverseco dissemiĝas tra la eterecaj loĝejoj vagantaj en la sino de la spacoj.

El la fakto, ke via animata naturo komenciĝas ĉe la zoofitoj kaj finiĝas ĉe la homo; ke la atmosfero nutras la surteran vivon; ke la likva elemento senĉese renoviĝas; ke viaj sezonoj iĝas sin sekvi en ĉi tiu vivo la fenomenojn, kiuj ilin karakterizas, vi ne konkludu, ke la milionoj kaj milionoj da teroj vagantaj en la spaco estas similaj al via loĝejo. Tute male, ili diferenciĝas laŭ la diversaj al ili asignitaj kondiĉoj kaj laŭ siaj respektivaj roloj sur la scenejo de l' mondo. Ili estas kvazaŭ diversaj gemoj de ia senmezura mozaiko, bunta floraro de admirinda parko.

ĈAPITRO VII

GEOLOGIA SKIZO DE LA TERO ¹

Geologiaj epokoj – Primitiva stato de la globo – Primara epoko
Transira epoko – Sekundara epoko – Terciara epoko
Diluvia epoko – Postdiluvia aŭ nuntempa epoko – Apero de la homo.

Geologiaj epokoj

1. – La Tero konservas en si la evidentajn postsignojn de sia formiĝo, kies fazojn oni sekvas, kun matematika precizeco, en la terenoj, kiuj konsistigas ĝian skeleton. La tutaĵo de tiuj studoj konstituas la sciencan nomatan *Geologio*, kiu naskiĝis en ĉi tiu jarcento (19-a) kaj ĵetis lumon sur la tiel disputatan demandon pri la origino de la globo kaj de la vivaj estaĵoj, kiuj en ĝi loĝas. Ĉi tie estas jam nenia hipotezo; temas ja pri la rigora rezultato de la observado de faktoj, kaj antaŭ faktoj praviĝas nenia dubo. La historio de la formiĝo de nia globo estas skribita sur la geologiaj tavoloj en maniero multe pli ĝusta ol en la antaŭjuĝaj libroj, ĉar ja parolas la Naturo mem, kiu sin malkaŝas, ne la homa imago elpensanta sistemojn. Se oni ie vidas fajrospurojn, oni povas aserti, ke tie certe

¹ Vidu notojn ĉe la *Enkonduko*.

estis fajro; se vidiĝas spuroj de akvo, oni povas aserti, ne malpli certe, ke tie ja estis akvo; se tiuj estas de bestoj, oni prave asertas, ke tie vivis bestoj.

Geologio estas do entute ia observoscienco; ĝi deduktas nur el tio, kion ĝi vidas; pri dubaj punktoj ĝi nenion asertas: ĝi nur esprimas diskuteblajn opiniojn, kies definitiva solvo devas atendi pli ĝustajn observojn. *Sen la eltrovoj tiel de la Geologio, kiel ankaŭ de la Astronomio, la Genezo de la mondo ankoraŭ restus en la mallumoj de la legendo.* Dank'al ĝi la homo nun scias la historion de sia loĝejo, kaj ja disfalis, por ne plu releviĝi, la ĉarpentaĵo de la fabeloj, kiuj envolvis ĝian lulilon.

2. – En ĉiuj terenoj, kie troviĝas fosaĵoj, naturaj aŭ homfaritaj kavaĵoj, oni rimarkas la tiel nomatajn *stratumojn*, tio estas, tavoloj sinsekve sidantaj, unu sur la alia. La terenoj prezentantaj tian aranĝon ricevas la nomon *tavoliĝintaj terenoj*. Tiuj tavoloj, kies dikeco varias de kelkaj centimetroj ĝis 100 metroj, kaj eĉ pli, distingiĝas inter si per la koloro kaj per la naturo de la ilin konsistigantaj substancoj. La artlaboroj, la putborado, la ekspluatado de ŝtonejoj kaj precipe de minoj ebligis, ke oni ilin observis ĝis granda profundeco.

3. – Tiuj tavoloj ĝenerale estas homogenaj, tio estas, formitaj el unu sama substanco, aŭ de diversaj substancoj, kiuj, kunmetiĝinte, konsistigis kompaktan tutaĵon. La limlinio, kiu ilin apartigas, unu de la alia, estas nete strekita simile al la brikvicoj de konstruaĵo. Nenie oni ilin vidas intermiksiĝintaj aŭ kaŝe eniĝintaj, unu en alian, ĉe siaj respektivaj limoj, kiel male okazas kun la koloroj de prismo aŭ de la ĉielarko.

Pro tiuj karakterizoj, oni rekonas, ke ili sinsekve formiĝis, demetiĝante unu sur la alian, en malsamaj kondiĉoj kaj pro malsamaj kaŭzoj. La pli profundaj memkompreneble estas

tiuj, kiuj formiĝis la unuaj. La lasta, nome tiu kuŝanta sur la supraĵo, estas la tavolo vegetaĵa, kies proprecoj fontas el la malkomponiĝintaj restaĵoj el organikaj materioj devenantaj de plantoj kaj bestoj.

4. – La malsupraj tavoloj, lokiĝintaj sub la vegetaĵa tavolo, ricevis en la Geologio la nomon *rokoj*, vorto, kiu ĉi-sence ne ĉiam implicas la ideon de ŝtona substanco sed ja signifas ian kuŝejon aŭ benkon el ajna minerala substanco. Unuj estas formitaj el sablo, el argilo aŭ argilriĉa tero, el marno, el rulŝtonoj; aliaj, el ĝustediraj ŝtonoj, pli aŭ malpli duraj, kiel grejsoj, marmoroj, kreto, kalkoj aŭ kalkoŝtonoj, muelŝtonoj, ŝtonkarboj, asfaltoj, ktp. Oni diras, ke roko estas pli aŭ malpli fortika laŭ tio, ĉu pli aŭ malpli granda estas ĝia dikeco.

Per la esploro de la naturo de tiuj rokoj aŭ tavoloj oni rekonas, pro certaj signoj, ke unuj devenas de materialoj fanditaj kaj, iafoje, vitritaj sub la agado de fajro; aliaj, de terecaj substancoj demetitaj de la akvoj; iuj el tiuj substancoj restis diseriĝintaj, kiel la sabloj; aliaj, komence pastecaj, poste malmoliĝis pro la agado de certaj kemiaj agantoj aŭ pro aliaj kaŭzoj kaj kun la tempo alprenis la ŝtonan staton. La benkoj el ŝtonoj, kuŝantaj unu sur la alia, elmontras sinsekvajn demetiĝojn. Fajro kaj akvo do partoprenis en la formiĝo de la materialoj, kiuj konsistigas la solidan strukturon de la terglobo.

5. – La normala pozicio de la terecaj aŭ ŝtonriĉaj tavoloj, devenintaj de la akvaj demetaĵoj, estas horizontaldirekta. Kiam oni rigardas tiujn senmezurajn ebenojn, iafoje etendiĝantajn ĝis perdo el la vido, perfekte horizontalajn, glatajn kvazaŭ oni ilin nivelis per ŝoserulilo; aŭ tiujn profundajn valojn, tiel ebenajn kiel la supraĵo de lago, oni povas esti

certa, ke, en epoko pli aŭ malpli fora, tiuj lokoj longe restis kovritaj de kvietaj akvoj, kiuj, retiriĝinte, lasis kiel sekaĵon la terojn, kiujn ili tien demetis dum sia restado. Post la retiriĝo de la akvoj, tiuj teroj kovriĝis per kreskaĵoj. Se anstataŭ teroj grasaj, ŝlimaj, argilaj aŭ marnaj, do taŭgaj por la asimilado de nutraj principoj, la akvoj nur demetis silikajn neagregiĝintajn sablojn, oni havas tiujn sabloriĉajn ebenaĵojn, kiuj formas la stepojn kaj la dezertojn kaj pri kiuj povas doni malgrandan ideon la demetaĵoj lasitaj de la partaj inundoj, krom ankaŭ tiuj formantaj la aluviojn ĉe la enfluejo de la riveroj.

6. – Kvankam horizontaleco estas la normala kaj ĝenerala pozicio de la akvodevenaj formacioj, ne malofte vidiĝas, en la montarplenaj landoj aŭ sur tre vastaj regionoj, duraj rokoj, el akvodevena naturo, kiuj dum sia formado ricevis klinan kaj foje eĉ vertikalan pozicion. Nu, ĉar, laŭ la leĝoj de la ekvilibro de l' likvoj kaj de la gravito, la akvodevenaj demetaĵoj povas formiĝi nur horizontale pro la fakto, ke tiuj formiĝantaj sur klinebenoj estas trenataj de la fluoj kaj de sia propra pezo, evidentas do, ke tiujn demetaĵojn levis ia ajn forto, post ilia solidiĝo aŭ transformiĝo en ŝtonojn.

El tiuj konsideroj oni povas konkludi kun certeco, ke ĉiuj ŝtonecaj tavoloj, kiuj, deveninte de akvaj demetaĵoj, troviĝas en perfekte horizontala pozicio, estis formataj, dum jarcentoj, de kvietaj akvoj, kaj ke ĉiuj troviĝantaj en klina pozicio signas terenon skuegitan kaj poste dislokitan de ĝeneralaj aŭ partaj renversadoj pli aŭ malpli ampleksaj.

7. – Karakteriza kaj plej grava fakto, pro la nerefutebla atesto, kiun ĝi liveras, estas la fosiliaj restaĵoj de bestoj kaj vegetaĵoj troveblaj, en grandega kvanto, ene de la diversaj tavoloj. Ĉar la restaĵoj troviĝas eĉ en la plej duraj ŝtonoj,

nepras konkludi, ke la ekzisto de tiuj estaĵoj estas antaŭa al la formiĝo de tiuj ŝtonoj. Nu, se oni konsideras la eksterordinaran nombron da jarcentoj necesaj por ke ili hardiĝu kaj atingu la staton, en kiu ili restas ekde nememorebla tempo, oni nepre venas al la konkludo, ke la apero de la organaj estaĵoj sur la Tero perdiĝas en la nokto de l' tempoj kaj sekve estas tre antaŭa al la dato, kiun pri ĝi difinas la Genezo.¹

8. – Inter la restaĵoj de plantoj kaj bestoj, estas unuj, kiuj, sen ŝanĝo de formo, montriĝas penetritaj, en ĉiuj partoj de sia substanco, de silikaj aŭ kalkaj materialoj ilin transformintaj en ŝtonojn, el kiuj unuj havas la durecon de marmoro. Tio estas la ĝustediraj organikaj ŝtonaĵoj. Aliaj nur estis envolvitaj de la materio en mola stato; ili troveblas sendifektaj, iuj eĉ integraj, en la plej duraj ŝtonoj. Aliaj fine nur lasis signojn sed ja perfekte netajn kaj delikatajn. Ene de iuj ŝtonoj oni eĉ trovis spurojn, kaj laŭ la formo de la piedo, de la fingroj kaj de la ungoj oni rekonis al kiu bestospecio ili apartenis.

¹ *Fosilio*, el la latina *fossilia*, *fossilis*, derivita el *fossa*, *fosse*, kaj el *fodere*, fosi, fosi la teron. Per ĉi tiu vorto oni nomas, en Geologio, organikajn korpojn, aŭ restaĵojn de korpoj, de estaĵoj vivintaj antaŭ la historiaj tempoj. Pro sencovastigo, ĝi ankaŭ signifas tiujn mineralajn substancojn, kiuj portas signojn de la ekzisto de organaj estaĵoj, kiaj la spuroj lasitaj de vegetaĵoj aŭ de bestoj.

La vorto *ŝtoniĝo* rilatas nur al la korpoj, kiuj transformiĝis en ŝtonon pro la infiltrigo de silikaj aŭ kalkaj materialoj en la organikajn histojn. Ĉiuj organikaj ŝtonaĵoj nepre estas fosilioj, sed ne ĉiuj fosilioj estas organikaj ŝtonaĵoj.

La objektoj, kiuj, trempite en certajn akvojn saturitajn de kalkaj substancoj, kiel tiuj de la roĝo de Saint Allyre, apud Clermont, kovriĝas per ia ŝtoneca tavolo, ne estas ĝustediraj organikaj ŝtonaĵoj sed ja simplaj kalktegaĵoj.

La monumentoj, enskribaj kaj objektoj homfaritaj apartenas al la Arkeologio.

9. – La bestfosilioj prezentas nur, kaj tio estas facile komprenebla, la solidajn kaj rezistajn partojn, nome ostaron, skvamojn kaj kornojn; temas ne malofte pri kompletaj skeletoj; sed plejofte estas nur disigitaj partoj, kies deveno tamen facile rekoneblas. Ekzamenante makzelon, denton, oni tuj konstatas, ĉu ĝi apartenis al herbovora aŭ al karnovora besto. Ĉar ĉiuj partoj de besto nepre interrespondas, la formo de kapo, de skapolo, de krurosto, de piedo sufiĉas por difini la korpamplakson, la ĝeneralan formon, la vivmanieron de la besto.¹ La surteraj bestoj havas tian organisman strukturon, kia ne permesas, ke oni ilin konfuzu kun la akvaj bestoj.

Tre multnombraj estas la fosiliaj fiŝoj kaj konkuloj; nur ĉi-lastaj iafoje formas tutajn benkojn de granda diko. Laŭ ilia naturo oni senpene konstatas, ĉu ili estas maraj aŭ riveraj.

10. – La rulŝtonoj, kiuj en iuj lokoj formas grandegajn rokojn, prezentas senduban signon pri sia origino. Ili estas rondaj kiel la marbordaj silikoj, kio certige atestas ilian interfrotaĝon pro la agado de la akvoj. La regionojn, kie ili grandamas estas enterigitaj, nekontesteble okupis la oceano aŭ aliaj akvoj longe aŭ intensege kirliĝantaj.

11. – Krom tio, la terenoj de la diversaj formacioj estas karakterizitaj per la naturo mem de la fosilioj, kiujn ili enhavas. La plej antikvaj enhavas speciojn de bestoj aŭ vegetaĵoj, kiuj tute malaperis el la supraĵo de la terĝlobo. Certaj pli novaj specioj ankaŭ malaperis, sed konserviĝis aliaj al ili analogaj, kiuj de tiuj diferencigis nur per la alteco kaj per iaj formnuancoj. Fine, aliaj, kies lastajn reprezentantojn ni ankoraŭ vidas,

¹ Ĉe la grado, al kiu Georgo Cuvier progresigis la paleontologian sciencon, ofte sufiĉas unu nura ostoj por determini la genron, la specion, la formon de ia besto, ties kutimojn kaj por ĝin tutan rekonstrui.

evidente emas malaperi en pli aŭ malpli proksima estonteco, kiel elefantoj, rinoceroj, hipopotamoj, k.a. Tiel, laŭgrade kiel la tertavoloj proksimas al nia epoko, ankaŭ la tie enhavataj specioj de bestoj kaj vegetaĵoj proksimas al tiuj hodiaŭ ekzistantaj.

La perturboj, la kataklismoj, okazintaj sur la Tero ekde ĝia origino, ŝanĝis al ĝi la kondiĉojn de adekvateco al subtenado de la vivo kaj malaperigis tutajn generaciojn da vivaj estaĵoj.

12. – Esplorante la naturon de la geologiaj tavoloj, oni ekscias plej pozitive, ĉu, en la tempo de ilia formiĝo, la regionon, kie ili troviĝas, okupis la maro, la lagoj aŭ arbaroj kaj ebenaĵoj loĝataj de teraj bestoj. Sekve, se en unu sama regiono troviĝas serio da tavoloj sidantaj, unu sur la alia, alterne havantaj fosiliojn el la maro, el la tero kaj el nesala akvo, kaj plurfoje ripetiĝintaj, tio estas nerefutebla pruvo, ke tiu regiono estis plurfoje inundita de la maro, kovrita de lagoj kaj fariĝinta sekaĵo.

Kaj certe kiom da jarcentoj da jarcentoj, eble miloj da jarcentoj necesis por la kompletiĝo de ĉiu periodo! Kia potenca forto estis necesa por deloki kaj reloki la oceanon, por levi la montojn! Kiom da fizikaj renversiĝoj, da violentaj skuegoj la Tero devis trapasi, antaŭ ol fariĝi tia, kia ni ĝin vidas ekde la historiaj tempoj! Kaj oni volas, ke tia verko plenumiĝis en malpli da tempo ol planto necesas por ekĝermi!

13. – La studo de la geologiaj tavoloj atestas, kiel jam dirite, pri sinsekvaj formacioj, kiuj ŝanĝis la aspekton de la terglobo kaj dividas ĝian historion en multajn epokojn, nomatajn *geologiajn epokojn*, kies konado estas esenca, por difini la Genezon. La ĉefaj estas en la nombro de ses, nomataj

primara, transira, sekundara, terciara, diluvia, postdiluvia aŭ nuntempa. La terenoj formiĝintaj dum ĉiu epoko ankaŭ estas nomataj: terenoj primitivaj, transiraj, sekundaraj, ktp. Oni tiel diras, ke tia aŭ tia tavolo aŭ roko, tia aŭ tia fosilio troviĝas en la terenoj de tia aŭ tia epoko.

14. – Gravas rimarki, ke la nombro de tiuj epokoj tute ne estas absoluta, ĉar ĝi dependas de la sistemoj de klasifiko. Tiujn ses ĉefajn ĉi-supre menciitajn oni nur komprenu kiel epokojn karakterizitajn per grava ĝenerala ŝanĝo en la stato de la planedo; sed la observado pruvas la estiĝon de multaj sinsekvaj formacioj dum la daŭro de ĉiu el ili. Tial ili estas dividitaj en periodojn, karakterizitajn per la naturo de la koncernaj terenoj, kaj kreskas ĝis 26 la nombro de la ĝenerallaj, nete karakterizitaj formacioj, al kiuj ne estas alkalkulitaj tiuj devenintaj de pure lokaj ŝanĝoj.

Primitiva stato de la terglobo

15. – La platiĝo de la polusoj, krom ankaŭ aliaj konkludigaj faktoj, estas certaj signoj, ke la stato de la Tero, en ties origino, devis esti fluida aŭ mola kaŭze de tio, ke la materio troviĝis aŭ likviĝinta pro la fajro aŭ solviĝinta en la akvo.

Oni proverbe asertas: ne ekzistas fumo sen fajro. Tiu propozicio, rigore vera, estas apliko de ĉi tiu principo: ne estas efiko sen ia kaŭzo. Oni povas samkaŭze aserti: ne ekzistas fajro sen ia fokuso. Nu, laŭ la faktoj okazantaj antaŭ niaj okuloj, montriĝas ne nur fumo sed ja plej reala fajro, kiu nepre devas havi ian fokuson. Ĉar tiu fajro venas el la interno de la Tero, ne de la supro, ties fokuso nepre devas esti interna, kaj ĉar la fajro estas konstanta, same konstanta devas esti la fokuso.

La varmo, kiu kreskas laŭgrade kiel oni penetras en la internon de la Tero kaj kiu, je certa distanco de la supraĵo, atingas altegan temperaturon; la termofontoj, des pli varmaj ju pli profunde kuŝas ilia naskiĝejo; la fajroj kaj la masoj el fandiĝinta materio, elŝprucantaj el la vulkanoj kvazaŭ tra enormaj ventolejoj aŭ tra fendoj malfermitaj de iuj tertremoj, ĉio ĉi lasas nenian dubon pri la ekzisto de ia interna fajro.

16. – Estas eksperimente demonstrite, ke la temperaturo altiĝas je 1 grado ĉe ĉiu 30-metra profundiĝo, el kio sekvas, ke en 300-metra profundo ĝi altiĝas je 10 gradoj; en 3000-metra, je 100 gradoj, la temperaturo de bolanta akvo; en 30000-metra, tio estas 7 aŭ 8 leŭgoj, je 1000 gradoj; en 25-leŭga, je pli ol 3300 gradoj, temperaturo, je kiu neniam konata materio povas rezisti al fandiĝo. De tiu punkto ĝis la centro estas la distanco de 1400 leŭgoj, aŭ 2800 leŭgoj diametre, kaj tiun spacon plenigus fandiĝintaj materioj.

Kvankam tio estas nenio alia ol nuraj konjektoj, se oni juĝas la kaŭzon laŭ ties efiko, tamen ĝi prezentas ĉiujn karakterizojn de probableco kaj portas al la konkludo, ke la Tero ankoraŭ restas ia brulanta maso tegita per solida krusto maksimume 25-leŭga, kio ekvivalentas al nura 120-ona parto de ĝia diametro. Proporcie tio malpli longus ol plej maldika oranĝoŝelo.

Cetere, tre varias la dikeco de la terkrusto, ĉar ekzistas regionoj, precipe sur la vulkanaj terenoj, kie la varmo kaj la fleksebleco de la grundo montras, ke ĝi estas ne tre granda. La alta temperaturo de la termofontoj ankaŭ signas proksimecon al la centra fokuso.

17. – Ĉe tio, montriĝas evidenta, ke la primitiva stato de fluideco aŭ moleco de la Tero nepre havis kiel kaŭzon la

agadon de la fajro, ne de la akvo. Ĝi do estis, en sia origino, ia brulanta maso. Pro la disradiado de la varmo, fariĝis tio, kio okazas al ĉia fandiĝinta materio: iompostioma malvarmiĝo, memkompreneble komenciĝinta en la supraĵo, kiu tial malmoliĝis, dum la interno konserviĝis fluida. Oni povas do kompari la Teron kun ia bloko el karbono eliranta ruĝarda el la forno kaj kies supraĵo malruĝiĝas kaj malvarmiĝas ĉe la kontakto kun la aero, sed kiu, rompite, elmontras, ke ĝia interno ankoraŭ brulas.

18. – En la epoko, kiam la Tero ankoraŭ estis ia brulanta maso, ĝi enhavis eĉ ne unu atomon pli aŭ malpli, ol ĝi enhavas nun;¹ nur okazis, ke, sub la influo de la alta temperaturo, pli granda parto el la substancoj, kiuj ĝin konsistigas kaj kiujn ni vidas sub la formo de likvoj aŭ de solidoj, de teroj, de ŝtonoj, de metaloj kaj de kristaloj, troviĝis en tre malsama stato. Ili nur suferis ian transformiĝon. Sekve de la malvarmiĝo kaj de miksiĝoj la elementoj formis novajn kombinaĵojn. La aero, pleje dilatiĝinta, certe etendiĝis je senmezura distanco; la tuta akvo, neeviteble transformiĝinta en vaporon, estis miksitita kun la aero; ĉiuj materioj volatiligemaj, kiel la metaloj, sulfuro, karbono, troviĝis en gasa stato. La stato de la tiama atmosfero neniel kompareblis kun la hodiaŭa; la denseco de ĉiuj tiuj vaporoj faris ĝin tiele opaka, ke ĝin ne povis trapasi eĉ unu sunradio. Se tiam povus ekzisti ia viva estaĵo sur la supraĵo de la planedo, ĝin lumigus nur la sinistra helo de la fornego kuŝanta sub ĝiaj piedoj kaj de la flamruĝa atmosfero; ĝi eĉ ne suspektus pri la ekzisto de la Suno.

¹ *Noto de la Brazila Spiritisma Federacio al sia portugallingva eldono:* Al ni ŝajnas, ke Kardec aludis ekskluzive la Teron mem, ne prenante en kalkulon la aerolitojn kaj la kosman pulvon, kiuj aldoniĝas al la Tero.

Primara epoko

19. – La unua efiko de la malvarmiĝo estis la solidiĝo de la ekstera supraĵo de l' fandiĝinta maso kaj sekva formiĝo de ia rezista krusto, kiu, komence maldika, iom post iom dikiĝis. Tiu krusto konsistas el la ekstreme dura roko *granito*, tiel nomata pro sia grajneca aspekto. En ĝi distingiĝas tri ĉefaj substancoj: feldspato, kvarco aŭ roka kristalo kaj glimo. Ĉi tiu lasta, kvankam ĝi ne estas metalo, tamen havas metalbrilon.

La granita tavolo estas do tiu, kiu formiĝis la unua sur la terglobo kaj kiu ĝin tutan envolvas, estante, iasence, ĝia osteca strukturo. Tiu tavolo senpere rezultis el la solidiĝo de la fandiĝinta materio. Sur ĝin kaj en la kavojn de ĝia taŭzita supraĵo sinsekve demetiĝis la tavoloj de aliaj terenoj poste formiĝintaj. Kio ĝin distingas de ĉi-lastaj estas la foresto de ĉia ajn tavolo, tio estas, ĝi konsistas el maso kompakta kaj unuforma en sia tuta diko, ne aranĝita laŭ tavoloj. La efervesko de la brulanta materio certe estigis en ĝi multenombrajn kaj profundajn fendojn, tra kiuj elverŝiĝis tiu materio.

20. – La dua efiko de la malvarmiĝo estis la likviĝo de kelkaj materioj, kiu troviĝis vaporstate en la aero kaj kiuj ĵetiĝis sur la terenan supraĵon. Tiam ekestis pluvoj kaj lagoj el sulfuro kaj bitumo, veraj rojoj el fero, kupro, plumbo kaj aliaj fandiĝintaj metaloj, kiuj, penetrinte tra la fendoj, formis metalajn vejnojn kaj tavolojn.

Sub la potenco de tiuj diversaj agantoj, la granita supraĵo suferis alternajn malkombiniĝojn. Fariĝis miksaĵoj, kiuj formis la ĝustadirajn primitivajn terenojn, distingiĝajn de la granita roko sed en masoj konfuzaj kaj sen regulaj tavoloj.

Poste venis la akvoj, kiuj, falinte sur la brulantan grundon, denove vaporiĝis por refali kiel torentaj pluvoj, kaj tiel sinsekve ĝis la temperaturo permesis al ili resti sur la grundo en likva stato.

Ĝuste la formiĝo de la granitaj terenoj komencas la serion de la geologiaj epokoj, al kiuj konvenus alkalkuli tiun de la primitiva stato, nome la globa brulanteco.

21. – Tia estis la aspekto de la unua epoko, nome ia vera ĥaoso de ĉiuj interkonfuzitaj elementoj serĉantaj sian ekvilibron, en kiu epoko nenia viva estaĵo povus ekzisti. Ĝuste tial, unu el ĝiaj distingiĝaj karakteroj, en Geologio, estas la foresto de ĉia vestiĝo de vegetaĵa aŭ besta vivo.

Estas neeble determini ĝustan daton al tiu unua epoko, same kiel al la sekvantaj. Sed laŭ la tempo necesa, ke la supraĵo de kuglo kun difinita volumo, varmigita ĝis blankardo, malvarmiĝus ĝis tiu punkto, ke akvoguto povus resti sur ĝi en likva stato, oni kalkulis, ke, se tiu kuglo estus tiel granda kiel la Tero, necesus por tio pli ol miliono da jaroj.

Transira epoko

22. – En la komenco de la transira epoko, la solida krusto granita ankoraŭ estis nemulte dika kaj havis nur malfortan reziston kontraŭ la efervesko de la brulardaj materialoj, kiujn ĝi kovris kaj premis. Ekstis ŝveloj, multenombraj fendoj, tra kiuj elverŝiĝis la interna lafo. La grundo nur prezentis ne tre rimarkindajn malglataĵojn.

La akvoj, ne tre profundaj, kovris preskaŭ la tutan supraĵon de la globo, escepte de tiuj partoj leviĝintaj, kiuj formis basajn, ofte subakvajn terenojn.

La aero iom post iom elpuriĝis el la pli pezaj, dumtempe gasformaj materioj, kiuj, densiĝinte pro la malvarmiĝo, ĵetiĝis sur la grundosupraĵon kaj estis poste fortrenitaj kaj dissolvitaj de la akvoj.

Parolante pri tiama malvarmiĝo, oni devas kompreni tiun vorton laŭ relativa senco, nome rilate al la primitiva stato, ĉar ankoraŭ nepre arda estis la tiama temperaturo.

La densegaj akvovaporoj, ĉie leviĝantaj el la senmezura likva supraĵo, refalis kiel abundaj, varmaj pluvoj, kiuj malklariĝis la aeron. Sed jam la sunradioj komencis aperi tra tiu bruma atmosfero.

Unu el la lastaj substancoj, el kiuj la aero elpuriĝis, pro ties nature gasa stato, estis la karbonata acido, kiu tiam estis unu el ĝiaj komponantoj.

23. – En tiu epoko ekformiĝis la tavoloj de la sedimentaj terenoj, demetiĝintaj de la akvoj riĉaj je ŝlimo kaj je diversaj materioj taŭgaj por la organa vivo.

Tiam aperas la unuaj vivaj estaĵoj de la regnoj vegetaĵa kaj besta. Komence malmultnombre, iliaj signoj troviĝas pli kaj pli ofte laŭgrade kiel oni transiras al la pli supraj tavoloj de tiu formacio. Rimarkindas, ke la vivo manifestiĝas tuj kiam ekestas favoraj kondiĉoj, kaj ke ĉiu specio aperas se nur fariĝas la kondiĉoj taŭgaj por ĝia ekzistado.

24. – La organaj estaĵoj, kiuj aperis la unuaj sur la Tero, estis la vegetaĵoj kun malpli kompleksa strukturo, nomataj, en Botaniko, kriptogamoj, senkotiledonuloj, unukotiledonuloj, tio estas, likenoj, ĉampinjonoj, muskoj, filikoj kaj herbecaj plantoj. Ankoraŭ tute ne vidiĝas arboj kun ligneca trunko sed nur tiuj el la palmo-genro, kies spongeca tigo analogas al tiu de la herboj.

La bestoj de tiu epoko, kiuj postvenis la unuajn vegetaĵojn, estas ekskluzive maraj: unue la polipoj, radiuloj, zoofitoj, nome bestoj kies strukturo simpla kaj, por tiel diri, rudimenta, plej proksimas al la vegetaĵoj. Poste aperas krustuloj krom ankaŭ fiŝoj, kies specioj ne plu ekzistas nuntempe.

25. – Sub la potenco de varmo kaj humideco kaj pro la efiko de la ekscesa karbonata acido disemita en la aero, gaso netaŭga por la spirado de la surteraj bestoj sed necesa al la plantoj, la liberaeraj terenoj rapide kovriĝis per fortika vegetaĵaro, dum akvaj plantoj multobliĝis en la sino de l' marĉoj. Plantoj el la genro de tiuj, kiuj nuntempe estas simplaj, kelkcentimetraj herboj, atingis altecon kaj dikecon ja miregindajn, kaj tiel ekzistis arbaroj el arbformaj filikoj kun 8 ĝis 10-metra alto kaj laŭproportia diko. Likopodioj (marubio, genro de musko) de sama alteco; ekvizetoj¹ 4 ĝis 5-metraj, kies nuntempa alteco atingas ne pli ol unu metron, kaj sennombra kvanto da nun ne plu ekzistantaj specioj. En la fino de tiu epoko ekaperas kelkaj arboj el la genro konifera, nome la pinoj.

26. – Sekve de la translokiĝo de la akvoj, la terenoj produktantaj tiun amasan vegetaĵaron subakviĝis, kovriĝis per novaj teraj sedimentoj, dum tiuj elakviĝintaj siavice ornamigis per simila vegetaĵaro. Estis do multaj generacioj de plantoj alterne estingitaj kaj renovigitaj. Ne same okazis al la bestoj, ĉar ĉiuj estis akvaj kaj do ne povis sperti tiun alternadon.

Tiuj restaĵoj, akumuligintaj dum longa serio da jarcentoj, formis tre dikajn tavolojn. Sub la agado de varmo, humideco, de la premo farata de la postvenintaj teraj demeta-

¹ Marĉa planto, vulgare konata kiel *ĉevalvosto*.

ĵoj, kaj sendube sub la agado de diversaj kemiaj efikantoj, de gasoj, acidoj kaj saloj produktitaj de la kombiniĝo de la primitivaj elementoj, tiuj vegetaĵaj materioj suferis fermentadon, kiu ilin transformis en *minkarbon* aŭ *terkarbon*. La karbominoj estas do rekta produkto de la malkomponiĝo de la vegetaĵaj masoj, akumuliĝintaj dum la transira epoko. Ja tial ili troviĝas en preskaŭ ĉiuj regionoj.¹

27. – Ĉar la fosiliaj restaĵoj de la tiuepoka fortika vegetaĵaro troviĝas hodiaŭ tiel sub la glacioj de la polusaj regionoj, kiel ankaŭ en la varmegaj regionoj, oni nepre devas konkludi, ke, se la vegetaĵaro estis unuforma, ankaŭ tia estis la temperaturo. La polusoj ne estis do glacikovritaj kiel nuntempe, ĉar tiam la Tero ĉerpis varmon el si mem, el la centra fajro, kiu samgrade varmigis la tutan solidan, sed ankoraŭ ne tre dikan, kruston. Tiu varmo multe superis tiun, kiun povis liveri la sunradioj, cetere malfortigitaj de la atmosfera denseco. Nur poste, kiam la efiko de la centra varmo sur la ekstera supraĵo de la globo fariĝis tre malforta aŭ nula, tiu de la Suno superregis, kaj la polusaj regionoj, kiujn trafis nur oblikvaj radioj portantaj tre malmultan varmon, kovriĝis per glacio. Oni komprenas, ke en la priparolata epoko, kaj ankoraŭ longe post ĝi, glacio ne ekzistis sur la Tero.

Tiu epoko devis havi tre longan daŭron, se juĝi laŭ la nombro kaj la dikeco de la minkarbaj tavoloj.²

¹ La torfo formiĝis sammaniere, nome per la malkomponiĝo de la vegetaĵaj amasoj en marĉaj terenoj; sed kun tiu diferenco, ke, estante multe pli nova kaj formiĝante sendube en aliaj kondiĉoj, ĝi ne havis tempon por karbiĝi.

² En la golfo de Fundy (Nova-Skotio), S-ro M. Lyell trovis, en minkarbo 400 metrojn dika, 68 malsamajn nivelojn, kiuj prezentis la evidentajn signojn de multe da arbaraj grundoj, en kiuj la arbotrunkoj

Sekundara epoko

28. – Ĉe la transira epoko, malaperas la kolosa vegetaĵaro kaj la bestoj ĝin karakterizantaj, ĉu pro tio, ke jam ne samaj estis la atmosferaj kondiĉoj, ĉu pro tio, ke serio da kataklismoj pereigis ĉian surteran vivantaĵon. Verŝajne ambaŭ kaŭzoj kunefikis por tiu ŝanĝo tial, ĉar unuflanke la studo de la terenoj signantaj la finon de tiu epoko pravas la ekeston de grandaj renversoj rezultintaj el leviĝoj kaj erupcioj, kiuj surverŝis la grundon per grandaj kvantoj da lafo, kaj ĉar aliflanke rimarkindaj ŝanĝoj fariĝis en la tri regnoj.

29. – La sekundara epoko estas karakterizita, laŭ minerala aspekto, per multnombraj kaj fortikaj tavoloj, atestantaj pri malrapida formiĝo en la sino de la akvoj kaj signantaj malsamajn, nete karakterizitajn periodojn.

La vegetaĵaro estas malpli nedaŭra kaj malpli kolosa ol en la antaŭa epoko, sendube pro la malpliigo de varmo kaj humideco kaj pro la ŝanĝoj okazintaj al la konsistaj elementoj de la atmosfero. Al la plantoj herbecaj kaj pulporiĉaj aldoniĝas tiuj kun ligna trunko kaj la unuaj ĝustediraj arboj.

30. – La bestoj ankoraŭ estas akvaj, aŭ maksimume amfibiaj; la besta vivo malmulte progresas sur la seka tero. Pro la formiĝo de kalkaj materioj, disvolviĝas en la maro granda kvanto da konkuloj. Naskiĝas novaj fiŝoj kun organismo pli perfekta ol en la antaŭa epoko. Aperas la unuaj cetacoj. La

ankoraŭ estis garnitaj per siaj radikoj (L.Figuier).

Atribuante ne pli ol mil jarojn al la formiĝo de ĉiu el tiuj niveloj, ni jam havus 68.000 jarojn nur por tiu minkarba tavolo.

plej karakterizaj bestoj en tiu epoko estas la monstraj reptilioj, el kiuj rimarkindas:

La *iĥtiosaŭro*, iaspeca lacerto-fiŝo, kiu kreskis ĝis 10-metra longo kaj kies makzelojn, ankaŭ tre longajn, garnis 180 dentoj. Ĝia ĝenerala formo iel memorigas tiun de la krokodilo sed sen ties skvameca karapaco. La volumeno de ĝiaj okuloj egalas tiun de homa kapo, kaj, kiel la balenoj, ĝi havis naĝilojn kaj elŝprucigis akvon tra laŭcelaj aperturoj.

La *plesiosaŭro*, alia mara reptilio, tiel granda kiel la *iĥtiosaŭro*, kies longega kolo fleksiĝis kiel tiu de cigno kaj al ĝi donis la aspekton de enorma serpento ligita al testuda korpo. Ĝi havis lacertan kapon kaj krokodilajn dentojn. Ĝia haŭto devis esti glata kiel tiu de la ĉi-supra besto, ĉar oni trovis nenian postsignon de skvamoj aŭ de konko.¹

La *teleosaŭro*, pli simila al la nuntempaj krokodiloj, kiuj verŝajne estas ĝia reduktaĵo. Kiel ĉi lastaj, ĝi havis skvamecan karapacon kaj vivis samtempe en la akvo kaj sur la tero. Ĝi havis altecon de ĉirkaŭ 10 metroj, el kiuj 3 aŭ 4 ampleksis nur la kapo. Ĝia larĝega faŭko havis 2-metran aperturon.

La *megalosaŭro*, granda lacerto, iaspeca krokodilo longa je 14 ĝis 15 metroj, esence karnomanĝa, kiu sin nutris per reptilioj, malgrandaj krokodiloj kaj testudoj. Ĝia kolosa mandiblo estis garnita per ambaŭtranĉaj, stucilformaj dentoj, retroklinitaj en tia maniero, ke post ilia penetro en kaptajon, al ĉi tiu estus neeble elŝiriĝi.

La *iguanodonto*, la plej granda el la lacertoj aperintaj sur la Tero: ĝi longis 20 ĝis 25 metrojn, de la kapo ĝis la vostfino, kaj havis sur la muzelo ostecan kornon similan al tiu de la nuntempa igvano, de kiu ĝi ŝajne diferencis nur per la

¹ La unuan fosilion de tiu ĉi besto oni malkovris en Anglujo, en 1823. Poste oni malkovris aliajn en Francujo kaj Germanujo.

grandeco, ĉar ĉi lasta estas nur unu metron longa. La formo de ĝiaj dentoj pruvas, ke ĝi estis herbomanĝa kaj, laŭ la piedformo, terbesto.¹

La *pterodaktilo*, stranga besto, granda kiel cigno, kiu samtempe partoprenis la naturon de reptilio laŭ la korpo, de birdo laŭ la kapo, kaj de vesperto laŭ la karna membrano interliganta al ĝi la eksterordinare longajn fingrojn, kiu membrano efikis paraŝute, kiam ĝi sin ĵetis sur predon desupre de arbo aŭ roko. Ĝi ne havis kornecan bekon, kiel la birdoj, sed la makzelaj ostoj, longaj je duono de ĝia korpo kaj garnitaj per dentoj, finiĝis akrepite kiel beko.

31. – Dum tiu epoko, kiu certe tre longe daŭris, kiel ĝin pruvas la nombro kaj la fortikeco de la geologiaj tavoloj, la besta vivo tre vigle disvolviĝis en la akvoj, same kiel okazis al la vegetaĵaro en la ĵus antaŭa epoko. Pli purigita kaj pli favora por la spirado, la aero komencis ebligi al multaj bestoj vivadi sur la seka tero. La maro multfoje delokiĝis sed sen fortegaj renversoj. En tiu epoko, malaperas siavice tiuj specioj de gigantaj marbestoj, kiujn poste anstataŭis analogaj specioj kun malpli misproporciaj formoj kaj malpli granda alteco.

32. – La orgojlo igis la homon aserti, ke ĉiuj bestoj estis kreitaj pro li kaj por la kontentigo de liaj bezonoj. Sed kiom nombras tiuj lin rekte servantaj, tiuj kiujn li povis subigi al si,

¹ *Nota de la Brazila Spiritisma Federacio* al sia 16^a eldono portugalingva, en 1973: Nur post la elkarniĝo de la aŭtoro, en 1869, estis malkovritaj, en Anglujo, fragmentoj sufiĉaj por muntado de kompleta specimeno, fare de paleontologoj, kio permesis klarigi detalojn de la priskribo de tiu dinosaŭro. Tiam fariĝis senduba la fakto, ke ĝi havis ostecan kalajon sur la muzelo, ian doman kreston sur la dorso, kiel la igvanedoj, sed ne havis kornojn, kiuj tamen klare evidentiĝis ĉe aliaj monstroj, kiel la saŭropodoj.

kompore kun la nekalkulebla nombro de tiuj, kun kiuj li neniam havis kaj neniam havos ian ajn rilaton? Kiel subteni tian tezon ĉe tiuj nekalkuleblaj specioj, kiuj solaj loĝatigis la Teron dum miloj da miloj da jarcentoj, antaŭ ol li ĉi tie aperis, kaj kiuj fine estingiĝis? Ĉu oni povus aserti, ke ili estis kreitaj por lia profito? Sed tamen ĉiuj havis sian pravon de ekzisto, sian utilecon. Dio certe ilin kreis ne pro ia simpla kaprico de sia volo nek por fari al si mem la plezuron ilin neniigi, ĉar ĉiuj ja havis vivon, instinktojn, sentivon por la doloro kaj por la bonstato. Por kiu celo li do tiel agis? Por celo ja superege saĝa, kvankam ankoraŭ ne komprenebla por ni. Eble iam estos donite al la homo ĝin koni, por ke lia orgojlo estu konfuzita; sed dum tio ne okazas, kiom vastiĝas la ideoj ĉe tiuj novaj horizontoj, en kiujn al li nun estas permesite ĵeti sian rigardon, antaŭ la impona spektaklo de tiu kreado, tiel majesta en sia lanta irado, tiel admirinda en sia antaŭvidemo, tiel akurata, tiel preciza kaj tiel neŝanĝema en siaj rezultoj!

Terciara epoko

33. – Ĉe la terciara epoko komenciĝas nova ordo de la aferoj sur la Tero; tute ŝanĝiĝas laŭaspekte la stato de ĝia supraĵo; la vivkondiĉoj profunde aliiĝas kaj proksimiĝas al la nuntempaj. La unuaj tempoj de tiu epoko karakteriziĝas per ĉeso de la vegetaĵa kaj besta generado; ĉio portas la signojn de ia ĝenerala detruado de la vivaj estaĵoj, post kio sinsekve aperas novaj specioj, kies pli perfekta strukturo estas adaptita al la medio kie ili devas vivi.

34. – Dum la antaŭaj epokoj, la solida krusto de la globo, pro sia eta dikeco, havis, kiel jam dirite, tre malfortan reziston kontraŭ la agado de la interna fajro. Tiu envolaĵo, kiu

facile rompiĝadis, permesis al la fanditaj materioj libere disverŝiĝi sur la supraĵo de la grundo. Ne same okazis, kiam ĉi tiu fariĝis iom pli dika; la ardantaj, ĉiufanke kunpremitaj materioj, kiel akvo bolanta en fermita ujo, fine estigis ian eksplodon; la granita maso, forte rompita ĉe multege da lokoj, pleniĝis per fendoj kvazaŭ *krevita vazo*. *Laŭlonge de tiuj fendoj*, la solida krusto, levita kaj rearanĝita, formis la pint-montojn, la montoĉenojn kaj ties branĉojn. Certaj partoj ne rompiĝintaj de tiu envolvado apenaŭ altiĝis, dum aliloke fariĝis kavoj kaj fosaĵoj.

Tre malebena fariĝis la supraĵo de la grundo; la akvoj, kiuj ĝis tiam ĝin grandparte kovris preskaŭ unuforme, dispeliĝis en la plej malaltajn lokojn kaj lasis sekaj vastajn kontinentojn, aŭ izolitajn montosuprojn, kiuj do estigis insulojn.

Tia estis la granda fenomeno, kiu okazis en la terciara epoko kaj ŝanĝis la aspekton de la globo. Ĝi okazis nek subite nek samtempe en ĉiuj lokoj, sed ja sinsekve kaj en epokoj pli aŭ malpli malproksimaj.

35. – Unu el la unuaj sekvoj de tiuj leviĝoj estis, kiel dirite, la kliniĝo de la sedimentaj tavoloj, kiuj en sia origino kuŝis horizontale kaj kiuj restis en tia pozicio tie, kie la grundo ne suferis renversojn. Tial tiuj kliniĝoj pli reliefigiĝis ĉe la flankoj de la montoj kaj en ties ĉirkaŭaĵoj.

36. – En la regionoj, kie la sedimentaj tavoloj konservis sian horizontalecon, oni devas, por atingi tiujn primare formiĝintajn, trapasi ĉiujn ceterajn ĝis granda profundo, ĉe kies fino oni nepre trovas la granitan rokon. Sed, kiam tiuj tavoloj leviĝis montoforme, ili estis suprenportitaj super sia normala nivelo, kelkfoje eĉ ĝis granda alteco, en tia maniero, ke se oni

faras vertikalan tranĉon ĉe la montoflanko, ili montriĝas laŭ sia tuta dikeco kaj surmetitaj kvazaŭ la brikvicoj de konstruaĵo.

Ja tial troveblas, ĉe grandaj altaĵoj, vastegaj benkoj el konkoj, kiuj primitive formiĝis en la marfundo. Estas hodiaŭ plene pruvite, ke la maro neniam epoke povis atingi tiel altajn nivelojn, ĉar por tio ne sufiĉus ĉiuj akvoj ekzistantaj sur la Tero, eĉ se ilia kvanto estus centoble pli granda. Oni devus do supozi, ke la akvokvanto malpliĝis, kaj ĉe tio oni prave demandus al si, kio fariĝis el la malaperinta parto. La leviĝoj, kiuj hodiaŭ montriĝas kiel nekontestebla fakto, klarigas logike kaj rigore la ekziston de la maraj demetaĵoj troveblaj en iuj montoj.¹

37. – En tiuj lokoj, kie la leviĝo de la primitiva roko estigis kompletan ŝiron en la grundo, ĉu pro la rapideco de la fenomeno, ĉu pro la formo, alteco kaj volumeno de la levita maso, la granito montriĝis nuda *kvazaŭ dento eliĝinta tra la gingivo*. Levitaj, rompitaĵoj kaj rearanĝitaj, la ĝin envolvantaj tavoloj malkovriĝis: ĝuste tial terenoj, kiuj apartenas al la plej antikvaj formacioj kaj kiuj en sia primitiva pozicio kuŝis plej profunde, konsistigas nuntempe la grundon de certaj regionoj.

38. – Delokita pro tiuj leviĝoj, la granita maso postlasis en kelkaj lokoj fendojn, tra kiuj eliĝas la interna fajro kaj elfluas la fanditaj materioj; la vulkanoj estas kvazaŭaj kamentuboj de la enorma fajrejo, aŭ, pli ĝuste, *savoklapoj*, kiuj ebligante eliron al la troo da fajraj materioj, antaŭgardas la globon kontraŭ multe pli teruraj skuoj. El tio, oni povas aserti, ke la aktivaj vulkanoj estas sekurigiloj por la tuta grunda supraĵo.

¹ Tavolojn el konkeca kalko oni trovis en la Andoj, Ameriko, 5.000 metrojn super la oceannivelo.

Oni povas fari al si ideon pri la intenseco de tiu fajro, konsiderante, ke eĉ en la sino de la maroj malfermiĝas vulkanoj kaj ke la akvomaso, kiu ilin kovras kaj penetras, ne sufiĉe potencas por ilin estingi.

39. – La leviĝoj de la solida maso nepre delokis la akvojn kaj ilin puŝis en la kavojn, kiuj jam fariĝis pli fundaj pro la altiĝo de la elakviĝintaj terenoj kaj pro la malaltiĝo de aliaj. Sed ĉi tiuj, siavice altiĝinte jen en unu loko, jen en alia, forpuŝis la akvojn, kiuj plu defluadis en aliajn lokojn ĝis ili povis trovi pli fiksan fluejon.

La sinsekvaj delokiĝoj de la likva maso nepre prilaboris kaj tordis la supraĵon de la grundo. Forfluante, la akvoj kuntrenis parton de la terenoj el antaŭaj formacioj malkovriĝintaj pro la leviĝoj, nudigis kelkajn montojn de ili kovritajn kaj malkaŝis ilian bazon, kalkan aŭ granitan. Kaviĝis profundaj valoj, dum aliaj terpleniĝis.

Estas do montoj rekte formitaj de la interna fajro: ĉefe tiuj granitaj; aliaj formiĝis pro la agado de la akvoj, kiuj, fortrenante la malfirmajn terojn kaj la solveblajn materiojn, kavis valojn ĉirkaŭ ia rezista bazo, kalka aŭ alispeca.

La materioj fortrenitaj de la akva fluo formis la tavolojn de la terciara epoko, kiuj facile distingiĝas de tiuj de la antaŭaj epokoj, malpli pro la konsisto, kiu estas preskaŭ la sama, ol pro ilia dispozicio.

La tavoloj de la epokoj primara, transira kaj sekundara, formiĝintaj sur ne tre malebena supraĵo, estas pli-malpli unuformaj sur la tuta Tero; tiuj de la terciara epoko, kiuj male formiĝis sur tre malebena bazo pro la kuntrena agado de la akvoj, prezentas pli lokan karakteron. Ĉie, kie oni prifosas ĝis certa profundo, troveblas ĉiuj antaŭterciaraj tavoloj, laŭvice

kiel ili formiĝis, dum ne ĉie troveblas la terciara tereno nek ĉiuj ties tavoloj.

40. – Dum la grundo-renversoj, okazintaj en la komenco de ĉi tiu epoko, la organa vivo kompreneble devis suferi dumtempan halton, kio konstateblas per la esploro de senfosiliaj terenoj. Sed post la ekesto de pli serena stato, reaperis vegetaĵoj kaj bestoj. Pro la ŝanĝo de la vivpovaj kondiĉoj kaj plipuriĝo de la atmosfero, formiĝis novaj specioj pli perfekte organizitaj. La plantoj, el struktura vidpunkto, ne multe diferencas de tiuj nuntempaj.

41. – Dum la du antaŭaj epokoj, la terenoj ne kovritaj de la akvoj estis ne tre vastaj; krome ili estis marĉaj kaj ofte subakviĝis; jen kial tiam ekzistis nur akvaj aŭ amfibiaj bestoj. La terciara epoko, dum kiu formiĝis vastaj kontinentoj, karakteriziĝis per la apero de la terbestoj.

Kiel la transira epoko vidis la aperon de kolosa vegetaĵaro kaj la sekundara la aperon de monstra reptilioj, tiel la terciara vidis aperi gigantajn mamulojn, kiaj la *elefanto*, la *rinocero*, la *hipopotamo*, la *paleoterio*, la *megaterio*, la *dinoterio*, la *mastodonto*, la *mamuto*, ktp. Ĉi tiuj du lastaj, varioj de la elefanto, estis 5 ĝis 6 metrojn alta kaj iliaj dentegoj atingis 4 metrojn da longo. Tiu epoko ankaŭ vidis la naskiĝon de la birdoj krom ankaŭ de la plimulto el bestospecioj ankoraŭ hodiaŭ ekzistantaj. Kelkaj tiuepokaj specioj supervivis postajn kataklismojn; aliaj, ĝenerale klasitaj kiel *antaŭdiluviaj bestoj*, tute formalaperis aŭ estis anstataŭitaj de analogaj specioj kun malpli pezaj kaj malpli masivaj formoj, kies unuaj tipoj estis kvazaŭaj skizoj. Tiaj estis la *felis spelæa*, karnomanĝa, taŭro-granda besto, kun la anatomiaj trajtoj de tigro kaj de leono; la

cervus megaceron, vario de cervo, kies kornoj, 3 metrojn longaj, distancis inter siaj ekstremoj je 3 ĝis 4 metroj.

Diluvia epoko

42. – Tiu epoko estis karakterizita de unu el la plej grandaj kataklismoj, kiuj iam renversis la globon, ŝanĝis ankoraŭfoje la aspekton de ties supraĵo kaj senrevene detruis grandan nombron da vivaj specioj, el kiuj troveblas nur restaĵoj. Ĉie ĝi postlasis signojn atestantajn pri ĝia ĝeneraleco. La akvoj, fortege puŝitaj for de siaj fluejoj, invadis la kontinentojn, kuntrenante terojn kaj rokojn, nudigante la montojn kaj elradikigante la jarcentajn arbarojn. La novaj demetaĵoj, kiujn formis la akvoj, estas nomataj, en Geologio, *diluviaj terenoj*.

43. – Unu el la plej signifaj postsignoj de tiu granda katastrofo estas la rokoj nomataj *translokitaĵoj*. Temas pri granitaj rokoj, kiuj troveblas izolitaj sur la ebenaĵoj kaj sidantaj sur terciaraj terenoj kaj en la mezo de diluviaj terenoj, kelkfoje plurcentojn da leŭgoj for de la montoj, de kiuj ili estis detranĉitaj. Estas memevidente, ke nur la fortegeco de la torentoj povis ilin transloki je tiel grandaj distancoj.¹

44. – Alia fakto, ne malpli karakteriza, kies kaŭzon oni ankoraŭ ne klarigis, estas tio, ke en la diluviaj terenoj troviĝas la unuaj *aerolitoj*. Ĉar ili komencis fali nur en tiu epoko, sekve antaŭe ne ekzistis la kaŭzo, kiu ilin produktas.

¹ Unu el tiuj blokoj, kiu evidente devenis, pro sia konsisto, de norvegaj montaroj, servas kiel piedestalo al la statuo de Petro, la Granda, en Sankta Peterburgo.

45. – Ankaŭ dum tiu epoko la polusoj ekkovriĝis per glacio kaj formiĝis la montaraj glaciejaj, kio signas rimarkindan ŝanĝon en la temperaturo de la Tero. Tiu ŝanĝo devis fariĝi subite, ĉar, se ĝi estus laŭgrade okazinta, bestoj, kiel la elefantoj, kiuj hodiaŭ vivas nur en varmaj klimatoj kaj kiuj tiel grandnombre troveblas fosilie en la polusaj regionoj, estus havintaj tempon por iom post iom foriri al pli mildtemperaturaj regionoj. Male, ĉio montras, ke ili verŝajne estis subite trafitaj de intensega malvarmo kaj englaciigitaj.¹

46. – Tio do estis la vera diluvo. Malsamas la opinioj pri la kaŭzoj, kiuj ĝin estigis. Kiuj ajn tamen ili estas, ĝi ja sendube okazis.

Oni ĝenerale supozas, ke *subite* okazis la pozici-ŝanĝo de la tera akso kaj de ties polusoj, el kio rezultis ĝenerala ĵetiĝo de la akvoj sur la tersupraĵon. Se la ŝanĝo estintus malrapida, la retiriĝo de la akvoj estus fariĝinta laŭgrade, sen renversoj, sed ĉio signas ian subitan kaj fortegan skuon. Ĉe la nesciado pri la vera kaŭzo, oni devas resti sur la kampo de la hipotezoj.

Tiu subita delokiĝo de la akvoj ankaŭ okazis pro la leviĝo de certaj partoj de la solida krusto kaj pro la formiĝo de novaj montoj en la sino de l' maroj, kiel okazis en la komenco

¹ En 1771, la rusa naturscienculo Pallas trovis en la Nordiaj glaciarioj tutan korpon de mamuto ankoraŭ felhava kaj havanta parton de sia karno. En 1799, oni malkovris alian, same enfermitan en grandega glacibloko, ĉe la enfluejo de la rivero Lena, en Siberio, kiun mamuton priskribis la naturscienculo Adams. La tie loĝantaj Jakutoj disŝiradis al ĝi la karnon por nutri siajn hundojn. Ĝian felon kovris nigraj haroj kaj la kolo estis garnita de densa kolhararo. La kapo, jam sen la dentegoj, kiuj longis pli ol 4 metrojn, pezis pli ol 400 funtojn (200 kilogramojn). Ĝia skeleto troviĝas en la muzeo de Sankta Petersburgo. En la insuloj kaj ĉe la bordoj de la glacia maro troviĝas tiel granda kvanto da dentegoj, ke ili estas objekto de vigla komerco sub la nomo fosilia aŭ Siberia eburo.

de la terciara epoko. Sed krom la fakto, ke ĉi-okaze la kataklismo ne estintus ĝenerala, tio ja ne klarigus la subitan ŝanĝon de la temperaturo en la polusaj regionoj.

47. – En la tempesto, kiun kaŭzis la delokiĝo de la akvoj, pereis multege da bestoj; aliaj, por eskapi el la inundo, retiriĝis en altaĵojn, kavernojn kaj fendojn, kie ili amase mortis, ĉu pro malsato, ĉu pro reciproka sinvorado, ĉu eble ankaŭ pro la enverŝiĝo de la akvoj en la lokojn kie ili rifuĝis kaj de kie ili ne povis forsaviĝi. Tio eksplikas la ekziston de grandkvanta ostaro de diversaj bestoj, karnomanĝaj kaj alispecaj, mikse trovitaj en certaj kavernoj, kiuj ĝuste pro tio estas nomataj *ostarhavaj fendoj aŭ kavernoj*. Ili pli ofte troveblas sub la stalagmitoj. Ĉe kelkaj kavernoj, la ostaroj ŝajne estis tien trenitaj de la akvofluo.¹

Postdiluvia aŭ nuntempa epoko. Apero de la homo

48. – La vivo vegetaĵa kaj besta tuj reprenis sian iradon, post kiam restariĝis la ekvilibro sur la supraĵo de la globo. Plifirmiĝinte, la grundo sidis pli stabile; la aero, elpuriĝinta, adekvatiĝis al pli delikataj organoj. La Suno, plenele brilanta tra plej klara atmosfero, disradiis, per la lumo, varmon malpli sufokan kaj pli vivigan ol tiu de la interna fornego. La Tero loĝatiĝis de malpli ferocaj kaj pli societemaj bestoj; la vegetaĵoj, pli sukulentaj, liveris malpli krudan manĝaĵon; ĉio, fine,

¹ Estas konata granda nombro da tiaj kavernoj, el kiuj kelkaj estas tre longaj. En Meksiko ekzistas pluraj, longaj je multaj leŭgoj. Tiu apud Aldesberg, en Karniolo (Aŭstrujo) havas longon je ne malpli ol tri leŭgoj. Unu el la plej famaj estas tiu apud Gailenreuth, en Würtemberg. Estas multaj en Francujo, Anglujo, Germanujo, Italujo (Sicilio) kaj aliaj landoj en Eŭropo.

estis preta por la nova, ĝin loĝonta gasto. Kaj ekaperis la *homo*, la laste kreita estaĵo, kiu, mem progresante, kunhelpos per sia inteligento por la ĝenerala progreso.

49. – Ĉu la homo ekzistis sur la Tero nur post la diluvia epoko aŭ ĉu li aperis jam antaŭ ĝi? Temas pri demando nuntempe tre diskutata, sed kies solvo, kiu ajn ĝi estos, neniel ŝanĝos la jam konstatitan faktaron, nek faros, ke la apero de la homa specio ne estis malpli frua, per multaj miloj da jaroj, ol la dato, kiun al ĝi difinas la biblia Genezo.

Kio igis supozi, ke la apero de la homoj okazis antaŭ la diluvo, tio estis la fakto, ke oni trovis neniun fidindan postsignon de ilia ekzisto dum la antaŭa epoko. La ostaroj, malkovritaj en diversaj lokoj kaj kredigitaj pri la ekzisto de ia raso de antaŭdiluvaĵaj gigantoj, estis rekonataj kiel elefantaj ostaroj.

Kion oni tute ne povas pridubi estas tio, ke la homo ne ekzistis en la primara, nek en la transira, nek en la sekundara epoko, ne nur tial, ke oni trovis de li neniun postsignon, sed ankaŭ tial, ĉar tiam ekzistis por li nenia vivipova kondiĉo. Se li aperis dum la terciaro, ĝi nepre okazis en ties fino, kiam li certe tre malmultnombro multobliĝis.

Cetere, pro sia mallonga daŭro, la antaŭdiluvia epoko ne estigis rimarkindajn ŝanĝojn en la atmosferaj kondiĉoj, kaj tion des pli atestas la fakto, ke samaj estis la bestoj antaŭ kaj post ĝi; ne estas do neeble, ke la apero de la homo antaŭis tiun grandan kataklismon; hodiaŭ estas pruvita la ekzisto de la simio en tiu epoko, kaj freŝaj malkovroj ŝajnas konfirmi, ke ankaŭ la homo tiam ekzistis.¹

¹ Vidu: *La antaŭdiluva homo*, de Boucher de Perthes. – La ŝtonaj iloj, same. – *Parolado pri la terglobaj revolucioj*, de Georges Cuvier, prinotita de D-ro Hoefler.

Kiel ajn tio estas, ĉu la homo aperis, aŭ ne, antaŭ la granda universala diluvo, kio certas estas, ke lia homkaraktera rolo komencis skiziĝi nur en la postdiluvia epoko. Oni povas do rigardi tiun epokon karakterizita de la ĉeesto de la homo.

ĈAPITRO VIII

TEORIOJ PRI LA TERO ¹

Teorio de la ekĵeto – Teorio de la densiĝo – Teorio de la inkrustado
Animo de la Tero

Teorio de la ekĵeto

1. – El ĉiuj teorioj, koncernantaj la originon de la Tero, plej disvastiĝis lastatempe tiu de *Buffon*, ĉu pro la rango de la aŭtoro en la rondo de la scienculoj, ĉu pro tio, ke ĝin ne superis la tiama sciaro.

Vidante, ke ĉiuj planedoj moviĝas en la sama direkto, de okcidento orienten, sur la sama ebenaĵo, kaj ke la klino de iliaj orbitoj ne superas 7 gradojn kaj duonon, Buffon konkludis el tiu unuformeco, ke ilin movis unu sama kaŭzo. Ĉar, lia opinio, la Suno estis ia bruleganta maso en fandostato, li supozis, ke iu kometo, oblikve koliziinte kontraŭ ĝi, forskrapis el ĝia supraĵo ian parton, kiu, ĵetegite en la spacon pro la violento de la kolizio, dividiĝis en plurajn fragmentojn. Tiuj fragmentoj formis la planedojn, kiuj daŭre rondiradis pro la

¹ Vidu notojn ĉe la *Enkonduko*.

kombino de la fortoj centripeta kaj centrifuga, laŭ la direkto donita de la primitiva kolizio, tio estas, sur la ekliptika ebena.

Laŭ tio, la planedoj estus do partoj de la bruleganta substanco de la Suno kaj, sekve, ankaŭ estis brulegantaj en sia origino. Por malvarmiĝi kaj solidiĝi, ili bezonis tempon proporcion al siaj respektivaj volumenoj, kaj, kiam la temperaturo ĝin permesis, la vivo aperis sur ilia supraĵo.

Pro la laŭgrada malfortiĝo de la interna varmo, la Tero atingus, post difinita tempo, staton de kompleta malvarmiĝo; la likva maso tute glaciigus, kaj la aero, ĉiam pli kaj pli densa, fine malaperus. La malaltiĝo de la temperaturo, nebligante la vivon, rezultigus la malpliigon kaj poste la estingiĝon de ĉiuj organikaj estaĵoj. Komenciĝinte en la polusoj, la malvarmiĝo sinsekve atingus ĉiujn regionojn, ĝis la ekvatoro.

Tia estas, laŭ Buffon, la stato de la Luno, kiu, malpli granda ol la Tero, estus hodiaŭ ia mortinta mondo, el kiu la vivo por ĉiam malaperis. Eĉ la Sunon mem iam trafus la sama sorto. Laŭ liaj kalkuloj, al la Tero estis necesaj ĉirkaŭ 74.000 jaroj por atingi sian nunan temperaturon, kaj post 93.000 jaroj ĉesos ekzisti sur ĝi la organika Naturo.

2. – La teorio de Buffon, kiun kontraŭdiras la novaj malkovroj de la Scienco, estas nun preskaŭ tute forlasita pro jenaj kialoj:

1^a. Longtempe oni kredis, ke la kometoj estas solidaj korpoj, kaj ke ilia kolizio kun planedo povos kaŭzi ties detruon. Ĉe tiu hipotezo, la supozo de Buffon neniel malprobablus. Sed oni scias nun, ke ili konsistas el gasa materio, tamen sufiĉe maldensa, ke oni povas vidi mezgrandajn stelojn tra ilia kerno. Neeblas do, ke en tia stato, estante malpli solida ol la Suno, ia

kometo, pro violenta kolizio kun ĝi, povus ĵetegi malproksimen parton de ĝia maso.

2^a. La bruleganta naturo de la Suno ankaŭ estas ia hipotezo, kiun nenio ĝis nun konfirmas, sed kiun male la observoj ŝajne malkonfirmas. Kvankam oni ankoraŭ ne havas certecon pri ĝia naturo, la potencaj observrimedoj, kiujn la Scienco disponas, tamen permesas, ke oni ĝin pli bone esploru. La Scienco nun ĝenerale akceptas, ke la Suno estas globo konsistanta el solida materio, ĉirkaŭita de ia luma atmosfero, aŭ fotosfero, kiu ne kontaktas ĝian supraĵon.¹

3^a. En la tempo de Buffon, oni nur sciis pri la ekzisto de tiuj ses planedoj konataj de la antikvuloj, nome Merkuro, Venuso, Tero, Marso, Jupitero kaj Saturno. Poste granda nombro da ili estis malkovrita, el kiuj ĉefe tri – Junona, Ceresa kaj Palasa – havas orbitojn klinitajn respektive je 13, 10 kaj 34 gradoj, kio ne akordiĝas kun la hipotezo pri ia unusola movdirekto.²

4^a. La kalkulojn de Buffon pri la malvarmiĝo oni rigardis tute eraraj, post kiam Fourier malkovris la leĝon pri la malkresko de varmo. La Tero bezonis ne nur 74.000 jarojn por atingi sian nunan temperaturon, sed ja kelke da jarmilionoj.

¹ Kompleta disertacio, responda al la moderna Scienco, pri la naturo de la Suno kaj de la kometoj troviĝas en la *Studoj kaj legaĵoj pri Astronomio*, de Camille Flammarion.

² *Noto de la Brazila Spiritisma Federacio al sia portugallingva eldono*: La asteroidoj Junona, Ceresa kaj Palasa, krom ankaŭ multaj aliaj, cirkulas inter la orbitoj de Jupitero kaj Marso.

5^a. Buffon nur konsideris la centran varmon de la Tero, ne prenante en kalkulon tiun de la sunradioj. Nu, estas nun sciate, dank'al rigore precizaj sciencaj donitaĵoj, sidantaj sur la eksperimentado, ke, pro la dikeco de la terkrusto, la interna varmo de la globo de longe tre sensignife efikas sur la temperaturo de la ekstera supraĵo. La varioj de tiu temperaturo estas periodaj kaj rezultas precipe el la agado de la suna varmo (ĉap. VII, n-ro 25). Ĉar konstantas la efiko de tiu kaŭzo, dum estas nula, aŭ preskaŭ nula, la efiko de la centra varmo, tial ties malpliigo ne povas estigi palpeblajn aliiĝojn en la tersupraĵo. Por ke la Tero fariĝu nelogebla pro malvarmiĝo, necesus, ke la Suno estingiĝu.¹

Teorio de la kondensiĝo

3. – La teorio pri la formiĝo de la Tero el la kondensiĝo de la kosma materio nuntempe regas en la Scienco kiel tiu la plej bone pravigita de la observado, solvanta pli grandan nombron da malfacilaĵoj kaj sin bazanta, pli ol ĉiuj ceteraj, sur la granda principo de la universa unueco. Ĝin ni ĉi-supre prezentis en la ĉapitro VI: *Ĝenerala Uranografio*.

Tiuj du teorioj, kiel oni vidas, kondukas al unu sama rezultato: primitiva bruleganta stato de la globo; formiĝo de solida krusto pro la malvarmiĝo; ekzisto de ia centra fajro kaj apero de la organika vivo post kiam ĝin permesis la temperaturo. Ili tamen diferencas inter si per esencaj punktoj, kaj se Buffon vivus nuntempe, li verŝajne havus aliajn ideojn.

¹ Vidu, por pliaj detaloj pri tiu temo kaj pri la leĝo pri la malkresko de varmo: *Leteroj pri la transformiĝoj de la globo*, de D-ro Bertrand, ekslernanto de la Politeknika Lernejo en Parizo, letero II. – Tiu verko, konforma al la moderna Scienco, skribita kun simpleco kaj sen spirito de sistemo, enhavas grandinteresan geologian studon.

La Geologio rigardas la Teron de tie, kie eblas rekta observado. Ne trafbla por la observado, ĝia antaŭa stato nur povas esti konjektata. Nu, ĉe du hipotezoj, la komuna saĝo montras elektinda tiun sankciitan de la logiko kaj plej akordantan al la observitaj faktoj.

Teorio de la inkrustiĝo

4. – Nur por ne lasi ĝin ne menciita, ni prezentas tiun teorion, kiu, kvankam absolute ne scienca, tamen lastatempe estigis ian bruon kaj allogis iujn personojn. Ĝi estas resumita en la jena letero:

“Dio, laŭ la Biblio, kreis la mondon en ses tagoj, kvar mil jarojn antaŭ la kristana erao. Ĉi tiun aserton kontestas la geologoj per la studado de la fosilioj kaj de la miloj da sendubaj signoj de antikveco, kiuj datas la originon de la Tero je milionoj da jaroj pli frue. Sed la veron asertis tiel la Sankta Skribo kiel ankaŭ la geologoj. Ilin akordigis simpla kampulo,¹ instruante, ke nia globo estas nenio alia ol planedo *inkrustformita*, tre moderna kaj konsistanta el tre antikvaj materialoj. Post la forporto de la *nekonata planedo*, kiu atingis sian maturecon, aŭ en harmonio kun tiu ekzistinta en la loko, kiun ni nun okupas, la animo de la Tero ricevis la ordonon unuigi siajn satelitojn por formi la nunan terglobon, laŭ la reguloj de la progreso, en ĉio kaj por ĉio. Nur kvar el tiuj astroj konsentis la proponitan kuniĝon; la Luno sola persistis en sia aŭtonomeco, ĉar *la globoj ankaŭ havas sian libervolon*. Por efektiviĝi tiun fandiĝon, la animo de la Tero elsendis al siaj satelitoj magnetaltiran radion, kiu metis en katalepsian staton la tutan ekzistantaron, vegetaĵan, bestan kaj homan, kiujn ili posedis kaj

¹ M. Michel, el Figagnères (Var), aŭtoro de *La Slosilo de la Vivo*.

kunportis en la komunumon. La operacion nur ĉeestis la animo de la Tero kaj la grandaj ĉielaj kurieroj, kiuj ĝin helpis por tiu granda entrepreno, malfermante tiujn globojn por komunigi ties internaĵojn. Post la lutado, la akvoj elfluis en la malplenaĵojn kaŭzitaĵn de la foresto de la Luno. La atmosferoj intermiksiĝis, kaj tiam ekestis la vekiĝo aŭ reviviĝo de la ĝermoj, kiuj restis en *katalepsia stato*. La homo estis eltirita la lasta el sia hipnota stato kaj sin trovis ĉirkaŭita de la sukriĉa vegetaĵaro de la surtera edeno krom ankaŭ de la bestaro pace paŝtiĝanta ĉirkaŭ li. Ĉio ĉi tio ja estis farebla en ses tagoj kun la helpo de tiuj tre potencaj laboristoj, al kiuj Dio komisiis tian taskon. La planedo Azio alportis la flavan rason, tiun plej frue civilizitan; Afriko alportis la nigran rason; Eŭropo, la blankan, kaj Ameriko, la ruĝan.

“Tiel, certaj bestoj, el kiuj troveblas nur la restaĵoj, estus neniam loĝintaj en la nuna Tero, sed ja transportitaj el aliaj mondoj, kiuj disruiniĝis pro malnoveco. La fosilioj trovataj en regionoj, sub kies klimatoj ili ne povus ekzisti en ĉi tiu mondo, sendube vivis en tre malsamaj regionoj sur la globoj kie ili naskiĝis. Sur la Tero, tiaj restaĵoj troviĝas en la polusaj regionoj, dum la koncernaj bestoj vivis en la ekvatora regiono de la globoj, al kiuj ili apartenis.”

5. – Tiu teorio renkontas kontraŭ si la plej pozitivajn atingojn de la eksperimenta Scienco, kaj krome ĝi lasas tute netuŝita la demandon mem, kiun ĝi pretendas solvi, nome la demandon pri la origino. Ĝi efektive priskribas kiel la Tero estus formiĝinta, sed ĝi ne klarigas kiel formiĝis tiuj kvar mondoj, kiuj kunmetiĝis por ĝin konstitui.

Se tiel okazis, kiel klarigi la fakton, ke oni nenie trovas postsignojn de tiuj enormaj juntoj, kiuj longus ĝis la internaĵoj de la globo? Ĉar ĉiu el tiuj mondoj, nome Azio, Afriko,

Eŭropo, Ameriko, portis siajn proprajn materialojn, tial ĉiu devus havi aparte malsaman geologion, *sed ne tiel estas*. Male, oni unue konstatas la unuformecon de la granita kerno, kies konsisto estas homogena en ĉiuj partoj de la globo, *sen rompo de kontinueco*. Poste, la gelogiaj tavoloj, samformaj, samkonsistaj, ĉie samvice surmetiĝintaj, kontinue kaj seninterrompe etendiĝas de unu flanko al alia tra la maroj, Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko, kaj inverse. Tiuj tavoloj, kiuj ja pravas la transformiĝojn de la globo, atestas, ke tiuj transformiĝoj okazis sur ties tuta supraĵo, ne nur sur parto de ĝi; montras la periodojn, dum kiuj aperis, ekzistis kaj malaperis samaj animalaj kaj vegetaĵaj specioj egale en la diversaj partoj de la mondo; montras, ke la faŭno kaj la flaŭro de tiuj tre antikvaj periodoj ĉie kaj samtempe disvolviĝis sub la influo de konstanta temperaturo kaj ĉie prenis alian karakteron laŭgrade kiel la temperaturo variis. Tia stato de aferoj ne konformas al formiĝo de la Tero per kunmetiĝo de pluraj malsamaj mondoj.

Cetere, oni rajtas demandi, kio fariĝus el la maro, kiu okupas la malplenon lasitan de la Luno, se ĉi tiu ne estus rifuzinta kolektiĝi al siaj fratinoj. Kio fariĝus el la nuna Tero, se iam la Luno kaprice dezirus repreni sian lokon kaj por tio forpuŝus la maron?

6. – Tiu sistemo logis kelkajn personojn, ĉar ĝi ŝajnis klarigi la ekziston kaj la lokiĝon de la malsamaj surteraj homrasoj. Sed, se tiuj rasoj povis disvolviĝi en apartaj mondoj, kial ili ne povus la samon en diversaj lokoj de unu sola globo? Tio estas solvi malfacilaĵon per ankoraŭ pli granda malfacilaĵo. Efektive, kiel ajn rapide kaj *lerte* fariĝus tiu kunmeto, ĝi ne povus okazi sen violentaj skuoj, kaj ju pli rapide ĝi efektiviĝus, des pli katastrofaj nepre estus la kataklismoj. Ŝajnas do neebbla, ke *estaĵoj nur falintaj en katalepsian dormon povus supervivi*

tiujn kataklismojn kaj poste trankvile vekigi. Se ili estus nuraj ĝermoj, el kio do ili konsistus? Kiel plene formitaj estaĵoj reduktiĝus al la stato de ĝermoj? Restus ĉiam la demando scii kiel tiuj ĝermoj denove disvolviĝis. Tio ankoraŭ signifus, ke la Tero formiĝis per proceso ja mirakla, sed tamen malpli poezia kaj malpli grandioza ol tiu de la biblia Genezo, dum la naturaj leĝoj liveras, pri ĝia formiĝo, klarigon multe pli kompletan kaj, antaŭ ĉio, pli racian, deduktitan el la observado.¹

Animo de la Tero

7. – La animo de la Tero ĉefrolas en la teorio de la inkrustiĝo. Ni vidu, ĉu tiu ideo sidas sur pli bona fundamento.

La organisma disvolviĝo estas ĉiam proporcia al la disvolviĝo de la spirita principo. La organismo kompletiĝas laŭmezure kiel multobliĝas la fakultoj de la animo. La organisma skalo senŝanĝe akompanas, ĉe ĉiuj estaĵoj, la progresadon de la intelekto, ekde la polipo ĝis la homo, kaj ne alie povus esti pro tio, ke la animo bezonas instrumenton konforman al la graveco de la funkcioj, kiujn ĝi devas plenumi. Kion utilis al la ostro posedi la inteligentecon de la simio, se ĝi ne havus la organojn necesajn al ĝia manifestiĝo? Se do la Tero estis animita estaĵo, servanta kiel korpo al ia speciala animo, tiu animo, pro la konsisto mem de la Tero, devus esti ankoraŭ pli *rudimenta* ol tiu de la polipo, ĉar la Tero ne havas eĉ la

¹ Kiam sur tia sistemo sidas tuta kosmogonio, oni rajtas al si demandi, sur kia racia bazo povas sidi la cetero.

La akordo, kiun, per tia sistemo, oni intencas starigi inter la biblia Genezo kaj la Scienco, estas tute iluzia, ĉar ĝin kontraŭdiras la Scienco mem.

La aŭtoro de la ĉi-supra letero, ja tre klera homo, kiu por momento logiĝis de tiu teorio, tuj rimarkis ties malfortajn flankojn kaj ne prokrastis ĝin kontraŭbatali per la armiloj de la Scienco.

vivoforton de la vegetaĵo, dum, pro la rolo, kiun oni atribuis al tiu animo, oni el la Tero faris ian estaĵon dotitan per prudento kaj per la plej kompleta libera volo, unuvorte ian kvazaŭan superan Spiriton, kio estas neracia, ĉar ja neniu Spirito iam ajn troviĝis tiel malbone provizita, nek tiel forte malliberigita. La ideo pri la animo de la Tero, ĉi-sence komprenata, devas do esti alkalkulita al la nombro de la konceptoj sistemecaj kaj kimeraj.

Kiel animon de la Tero oni povas, pli racie, kompreni la kolektivon de la Spiritoj komisiitaj ellabori kaj direkti ĝiajn konsistajn elementojn, kio jam supozigas certan gradon da intelekta disvolviĝo; aŭ, ankoraŭ pli ĝuste: la Spiriton, al kiu estas konfidita la supera direktado de la moralaj destinoj kaj de la progreso de la surteraj loĝantoj, misio, kiu povas esti donata nur al estaĵo eminente supera laŭ scio kaj saĝo. En ĉi tiu okazo, tiu Spirito ne estas ĝustadire la animo de la Tero, ĉar li ne troviĝas enkarniĝinta en ĝia korpo, nek submetita al ĝia materia stato. Li estas ĉefo komisiita por ĝia regado, same kiel generalo estas komisiita por komandi armeon.

Spirito ŝarĝita per misio tiel grava, kiel la regado de iu mondo, ne povus havi kapricojn, ĉar, ĉi-okaze, Dio agus tre neantaŭzorge, konfidante la aplikadon de siaj leĝoj al estaĵoj, kiuj ilin laŭplaĉe malobservus. Nu, laŭ la doktrino pri la inkruŝtiĝo, la malvolonto de la Luno estis la kaŭzo de tio, ke la Tero restis nekompleta. Estas ideoj, kiuj sin mem refutas. (*Revue* de septembro 1868, p. 261).

ĈAPITRO IX

TRANSFORMIĜOJ DE LA GLOBO ¹

Ĝeneralaj aŭ partaj transformiĝoj – Aĝo de la montoj
Biblia diluvo – Periodaj revoluoĵoj – Estontaj kataklismoj
Pligrandiĝo aŭ malpligrandiĝo de la volumeno de la Tero.

Ĝeneralaj aŭ partaj transformiĝoj

1. – La geologiaj epokoj signas la fazojn de la ĝenerala aspekto de la globo, rezultintajn el ties transformiĝo. Sed, escepte de la diluvia epoko, kiun karakterizis subita renverso, ĉiuj ceteraj pasis malrapide, per neabrupta transiro. Dum la tuta tempo, kiun la konsistaj elementoj de la globo uzis por trovi sian ekvilibron, la ŝanĝoj nepre estis ĝeneralaj. Post kiam la bazo firme solidiĝis, nur partaj ŝanĝoj devis esti okazintaj en la supraĵo.

2. – Krom la ĝeneralaj transformiĝoj, la Tero suferis grandan nombron da lokaj perturboj, kiuj ŝanĝis la aspekton

¹ Vidu notojn ĉe la *Enkonduko*.

de iuj regionoj. Kiel por la aliaj, tiel ankaŭ du kaŭzoj efikis por tiuj perturboj: la fajro kaj la akvo.

La fajro efikis: aŭ per vulkanaj erupcioj, kiuj enterigis, sub dikaj tavoloj el cindro kaj lafo, la ĉirkaŭajn terenojn kaj malaperigis urbojn kun ties loĝantoj; aŭ per tertremoj; aŭ per leviĝoj de la solida krusto, kiuj pelis la akvojn en pli malaltajn regionojn; aŭ per pli aŭ malpli vasta enfaliĝo de tiu krusto, en kelkaj lokoj, kie la akvoj enverŝiĝis kaj sekve lasis aliajn terenojn malkovritaj. Tiel ekaperis insuloj sur la oceano, dum aliaj malaperis; partoj de kontinentoj apartiĝis kaj formis insulojn; markoloj, sekiĝinte, interligis insulojn kaj kontinentojn.

La akvo efikis: aŭ per marinundoj aŭ marretiriĝo ĉe kelkaj bordoj; aŭ per disfaloj, kiuj baris la akvofluojn kaj formis lagojn; aŭ per superbordiĝoj kaj inundoj; aŭ fine per talusoj ĉe la enfluejo de la riveroj. Tiuj talusoj, repuŝante la maron, kreis novajn regionojn, kaj el tio originis la delto de Nilo, aŭ Mal-supra Egiptujo; la delto de Rodano, aŭ Kamargo.

Aĝo de la montoj

3. – Esplorante la terenojn, kiujn deŝiris la leviĝo de la montoj kaj de la tavoloj, formantaj ties flankojn, oni povas determini ilian geologian aĝon. Kiel geologian aĝon de la montoj oni komprenu ne la jamombron de ilia ekzistado, sed la periodon, en kiu ili formiĝis, sekve ilian relativan malnovecon. Estus erare kredi, ke tiun malnovecon difinas ilia alteco aŭ ilia ekskluzive granita naturo, ĉar, leviĝinte, la granita maso eble traboris kaj disigis la surmetiĝintajn tavolojn.

Oni tiel konstatis, per la observado, ke la montoj Vogeaj, Bretonaj kaj de la Côte-d'Or, en Francio, kiuj estas ne tre altaj, viciĝas inter la plej antikvaj formacioj. Ili datiĝas de

la transira epoko kaj aperis antaŭ la terkarbaj demetaĵoj. La Ĵuraso formiĝis ĉirkaŭ la mezo de la sekundara epoko kaj samtempas kiel la gigantaj reptilioj. La Pireneoj formiĝis pli malfrue, en la komenco de la terciara epoko. La Monto Blanka kaj la okcidentaj Alpoj aperis post la Pireneoj kaj datiĝas de la mezo de l' terciara epoko. La orientaj Alpoj, konsistantaj el la Tiroloj, estas ankoraŭ pli novaj, ĉar ili formiĝis ĉirkaŭ la fino de tiu sama epoko. Kelkaj montoj en Azio eĉ aperis post la diluvia epoko aŭ samtempas kiel ĝi.

Tiuj leviĝoj certe okazigis lokajn perturbojn kaj pli aŭ malpli vastajn inundojn pro la translokiĝo de la akvoj, pro la baro kaj la ŝanĝo de la fluo de l' riveroj.¹

¹ La lasta jarcento donas rimarkindan ekzemplon de tiaspeca fenomeno. Ekzistis en 1750, je sestaga piediro de la urbo Meksiko, iu fruktodona, bone kultivata regiono, kie abunde kreskadis rizo, maizo kaj bananoj. En junio, la grundo estis skuegata de teruraj tertremoj, kiuj senĉese ripetiĝadis du plenajn monatojn. En la nokto inter la 28^a kaj la 29^a de septembro, la tero suferis fortegan renverson: multleŭga tereno iom post iom leviĝis kaj atingis la altecon de 500 futoj sur 10 kvadrataj leŭgoj. La tereno ondadis kvazaŭ marakvaj masoj blovataj de la tempesto, miloj da montetoj alterne leviĝis kaj enfalis; fine ekfaŭkis abismo je proksimume 3 leŭgoj, el kiu ŝprucis mireginde alten fumo, fajro, ruĝardaj ŝtonoj kaj cindroj. El tiu oscedanta abismo leviĝis ses montoj, inkluzive de la vulkano, kiun oni nomis *Jorullo* kaj kiu nun altas je 550 metroj super la malnova ebenaĵo. En la momento, kiam komenciĝis la terskuo, la du riveroj *Kuitimba* kaj *Sankta Petro* kontraŭfluis kaj inundis la tutan ebenaĵon, kiun hodiaŭ okupas la vulkano *Jorullo*; sed en la tereno, senĉese leviĝanta, ekfaŭkis alia profundegaĵo, kiu ambaŭ riverojn englutis. Tiuj riveroj poste reaparis okcidente en loko tre malproksima de siaj iamaj fluejoj. (Louis Figuier, *La Tero antaŭ la diluvo*, p. 370.)

Biblia diluvo

4. – La biblia diluvo, ankaŭ konata per la nomo “granda Azia diluvo”, estas fakto kies realecon oni ne povas kontesti. Ĝin verŝajne okazigis, same kiel en Meksiko, la leviĝo de parto el la montaro de tiu regiono. Tiun supozon pravigas la ekzisto de ia interna maro iam etendiĝanta de la Maro Nigra ĝis la Maro Boreala, kiel atestas la geologiaj esploroj. La Azova, la Kaspia maroj, kies akvoj estas salaj, malgraŭ ke ili komuniĝas kun nenia maro; la Aralo kaj pluraj lagoj dissemi-taj sur la senmezuraj ebenaĵoj de Tartario; krom ankaŭ la stepoj de Rusio, verŝajne estas restaĵoj de tiu antikva maro. Okaze de la leviĝo de la Kaŭkazaj montaroj, kiu postsekvas la universalan diluvon, parto de tiuj akvoj puŝiĝis norden, al la Boreala oceano; alia parto puŝiĝis suden, al la Hindia oceano. La akvoj inundis kaj ruinigis ĝuste Mezopotamion kaj la regionon kie loĝis la prauloj de la Hebrea gento. Kvankam tiu diluvo etendiĝis sur tre vasta areo, estas nuntempe pruvite, ke ĝi havis nur lokan amplekson; ke ĝi ne estis kaŭzita de la pluvo, ĉar, kiel ajn abunda kaj longedaŭra ĝi estis, eĉ se kvardektaga, la kalkuloj pruvas, ke la kvanto de la defalinta akvo ne povus esti sufiĉe granda por kovri *la tutan teron*, ĝis super la plej altaj montoj.

Por la tiamaj homoj, kiuj konis ne pli ol tre malvastan supraĵon de la globo kaj kiuj havis nenian ideon pri ties formo, la inundo de la konataj landoj signifis la inundon de la tuta Tero. Se al tiu kredo ni aldonas la formon troimagan kaj hiperbolan, karakterize propran al la orienta stilo, tiam nin jam ne surprizos la troeco de la biblia rakonto.

5. – La Azia diluvo evidente postvenis la aperon de la homo sur la Tero, ĉar la memoro pri ĝi konserviĝis en la tradicio de ĉiuj popoloj de tiu mondparto, kiuj ĝin konfirmis en siaj teogonioj.¹ Ĝi ankaŭ postvenis la grandan universalan diluvon, kiu signis la komencon de la nuntempa geologia epoko. Kaj kiam oni parolas pri homoj kaj bestoj antaŭdiluvaj, oni aludas tiun unuan kataklismon.

Periodaj revoluoj

6. – Krom la jara rondiro ĉirkaŭ la Suno, naskanta la sezonojn, kaj la rotacia movo ĉirkaŭ si mem, kiu estigas tagon kaj nokton, la Tero havas trian movon, kiu kompletiĝas en proksimume 25.000 jaroj (pli ĝuste en 25.868 jaroj) kaj kiu estigas la fenomenon nomatan, en Astronomio, *precesio de la ekvinoksoj* (ĉap. V, n-ro 11). Ĉi tiu movo, kiun ne eblas klarigi per malmultaj vortoj sen la helpo de figuroj kaj geometria demonstracio, konsistas en iaspeca cirkla oscilado komparebla

¹ La hinda legendo pri la diluvo rakontas, laŭ la Vedioj, ke Bramo, transformiĝinte en fiŝon, sin turnis al la kompatema monarko Vaivaswata kaj diris: “Venis la momento, kiam pereos la Universo; baldaŭ ĉio ekzistanta sur la Tero estos detruita. Necesas, ke vi konstruu ŝipon kaj, enŝipiginte semojn de ĉiuj vegetaĵoj, vi ankaŭ enŝipiĝu. Atendu min, ĉar mi venos al vi, portante sur la kapo kornon, laŭ kiu vi rekonos min.” La sanktulo obeis: konstruis ŝipon, enŝipigis kaj ligis ĝin per tre fortika kablo al la korno de la fiŝo. La ŝipo estis trenata kun pleja rapideco dum multaj jaroj tra la tenebroj de terura tempesto kaj fine alboridiĝis al la pinto de la monto Himawata (Himalajo). Bramo poste ordonis al Vaivaswata, ke li kreu ĉiujn estaĵojn kaj per ili loĝatigu la Teron.

Estas okulfrapa la analogio de tiu legendo kun la biblia rakonto de Noa. El Hindio, ĝi pasis al Egiptio same kiel multego da aliaj kredoj. Nu, ĉar la Vedaj libroj antaŭas tiun de Moseo, la rakonto pri la diluvo, kiu en tiuj troviĝas, ne povas esti kopio el ĉi tiu lasta. Verŝajne Moseo, kiu lernis la doktrinojn de la egiptaj pastroj, prenis de ili sian priskribon.

kun la oscilado de finturniĝanta turbo. Pro ĝi la akso de la Tero, ŝanĝante sian klinon, desegnas duoblan konuson, kies vertico estas en la centro de la planedo kaj kies bazoj ampleksas la areon ĉirkaŭlimitan de la polusaj cirkloj, nome iun amplitudon kun 23 gradoj kaj duono.

7. – Ekvinokso estas la momento, kiam la Suno, pasante de unu hemisfero al la alia, pozicias perpendikulare al la ekvatoro, kio okazas dufoje en la jaro, je la 21^a de marto, kiam la Suno pasas al la boreala hemisfero, kaj je la 22^a de septembro, kiam ĝi revenas al la aŭstrala hemisfero.

Sed pro la laŭgrada ŝanĝo de la akso oblikveco, kio kaŭzas ŝanĝon en la oblikveco de la ekvatoro sur la ekliptiko, la momento de la ekvinokso plifruigās ĉiujare po kelke da minutoj (25 minutoj kaj 7 sekundoj). Ja tiun plifruigon oni nomis *precesio de la ekvinoksoj* (el la latina “*procedere*”, antaŭiri, kunmetaĵo el “*proe*”, antaŭe, kaj “*cedere*”, iri).

Kun la tempo, tiuj malmultaj minutoj faras horojn, tagojn, monatojn kaj jarojn, el kio rezultas, ke la printempa ekvinokso, kiu nuntempe okazas en marto, post certa tempo okazos en februaro, poste en januaro, poste en decembro. Tiam la monato decembro havos la temperaturon de marto, la monato marto tiun de junio, kaj tiel plu ĝis la afero revenos al la monato marto kaj denove troviĝos en la nuna stato, kio okazos post 25.868 jaroj, kiam senfine rekomenciĝos la sama revoluo.¹

¹ La precesio de la ekvinoksoj estigas alian ŝanĝon, nome tiun de la pozicio de la zodiakaj signoj. Ĉar la Tero rondiras ĉirkaŭ la Suno en unu jaro, tial, laŭgrade kiel ĝi moviĝas, la Suno ĉiun monaton troviĝas antaŭ unu konstelacio. Ĉi tiuj nombras dek du, nome: *Arieso*, *Taŭro*, *Ĝemeloj*, *Kankro*, *Leono*, *Virgo*, *Pesilo*, *Skorpio*, *Sagitario*, *Kaprikorno*, *Amforo*, *Fiŝoj*. Ili estas nomataj zodiakaj konstelacioj, aŭ signoj de la Zodiako, kaj formas cirklon sur

8. – El tiu konusforma movo de la akso rezultas, ke la polusoj de la Tero ne konstante rigardas la samajn punktojn en la ĉielo; ke la Polusa Stelo ne por ĉiam estos polusa stelo; ke la polusoj grade kliniĝas pli aŭ malpli al la Suno kaj de ĉi tiu ricevas pli aŭ malpli rektajn radiojn, el kio sekvas, ke ekzemple Islando kaj Laponio, kiuj situas sub la polusa cirklo, povos, post certa tempo, ricevi la sunradiojn kiel se ili troviĝus sur la latitudo de Hispanio kaj Italio, kaj ke, sur la ekstreme kontraŭa flanko, Hispanio kaj Italio povos havi la temperaturon de Islando kaj Laponio, kaj tiel plu, ĉe ĉiu renoviĝo de la 25.000-jara periodo.¹

9. – Ankoraŭ ne povis esti precize difinitaj la sekvoj de tiu movo, ĉar oni povis observi nur tre malgrandan parton de tiu revoluo. Estas do pri ĝi nenio alia ol supozoj, el kiuj kelkaj havas ian probablecon.

Jenaj estas tiuj sekvoj:

1^a – La alternaj varmiĝo kaj malvarmiĝo de la polusoj, kun sekva fandiĝo de la polusa glaciario dum duono de la 25.000-jara periodo kaj ilia renoviĝo dum la alia duono de tiu periodo. El tio rezultus, ke la polusoj ne estus kondamnitaj al

la ebena de la tergloba ekvatoro. Laŭ la naskiĝmonato de iu, oni diras, ke li naskiĝis sub tiu aŭ tiu alia signo, kaj de tio venas la Astrologiaj prognozoj. Sed, pro la precesio de la ekvinoksoj, okazas ke la monatoj jam ne respondas al la samaj konstelacioj. Iu naskiĝinta en la monato julio jam ne troviĝas sub la signo de Leono, sed de Kankro. Tiel falas la superstiĉa ideo pri la influo de l' signoj. (Ĉap. V, n-ro 12.)

¹ La laŭgrada translokiĝo de la izotermaj linioj, kiun la Scienco agnoskas tiel pozitive kiel la translokiĝon de la maro, estas materia fakto apoganta tiun teorion.

eterna sterileco, sed ja povus siavice ĝui la bonaĵojn de la fekundeco.

2^a – La grada translokiĝo de la maro, kiu iom post iom invadas unujn terpartojn kaj samtempe malkovras aliajn, por denove forlasi la unuajn kaj reveni al sia iama kuŝejo. Tiu perioda movo, senĉese renovigata, prezentus vere universalan, 25.000-jaran tajdon.

La malrapideco de tiu marmovo faras ĝin neperceptebla por ĉiu generacio. Sed ĝi rimarkeblas post paso de kelke da jarcentoj. Neniu subitan kataklismon ĝi povas kaŭzi, ĉar la homoj, generacion post generacio, retiriĝas, laŭgrade kiel la maro antaŭeniĝas, dum ili okupadas la teron, de kiu la maro retiriĝas. Ĝuste al tiu kaŭzo, ja pli ol probable, kelkaj scienculoj atribuas la retiriĝon de la maro el certaj bordoj kaj ĝian invadon en aliajn.

10. – La malrapida, laŭgrada kaj perioda translokiĝo de la maro estas fakto, kiun, en ĉiuj punktoj de la globo, la sperto pravas kaj multenombraj ekzemploj atestas. Ĝi havas kiel celon la subtenadon de la produktivaj fortoj de la Tero.

Por la terenoj la longa subakviĝo estas ripoztempo, dum kiu ili rricevas la vivoprincipojn elĉerpiĝintajn pro ne malpli longa produktado. La grandegaj demetaĵoj el organaj materioj, formiĝantaj el la restado de la akvoj dum sinsekvaj jarcentoj, estas naturaj sterkadoj, periode renoviĝintaj, kaj la generacioj sin sekvas, ne perceptante tiajn ŝanĝojn.¹

¹ El inter la plej freŝaj faktoj, pruvantaj la translokiĝon de la maro, menciindas jenaj:

En la Gaskonia Golfo, inter la malnova Soulac kaj la Turo de Cordouan, kiam la maro estas kvieta videblas en la fundo pecoj de murego: tio estas restaĵoj de la antikva kaj granda urbo *Noviomagus*, kiun la ondoj

Estontaj kataklismoj

11. – La grandaj terskuoj okazis en tiuj epokoj, kiam la solida krusto de la Tero, pro sia negranda dikeco, apenaŭ kontraŭstaris la boladon de la materioj brulegantaj en ĝia interno. Tiaj skuoj malpliigadis laŭmezure kiel la krusto plisolidiĝis. Multenombraj vulkanoj nun jam estingiĝis, aliaj restas kovritaj de la terenoj poste formiĝintaj.

Sendube ankoraŭ povos ekesti lokaj perturboj pro vulkanaj erupcioj, apero de novaj vulkanoj, subita inundo de iuj regionoj; el la maro povos eliri iuj insuloj, kaj aliaj en ĝin

invadis en 580. La rokmondo Cordouan, kiu tiam estis ligita al la marbordo, nun troviĝas malproksima je 12 kilometroj.

Sur la Manika Maro, ĉe la Havra marbordo, la akvo kun ĉiu tago invadas la teron kaj subfosas la klifojn de Sainte-Adresse, kiuj iom post iom disfalas. Je 2 kilometroj de la marbordo, inter Sainte-Adresse kaj la Kabo Hève, estas benko nomata Éclat, kiu iam estis seka kaj ligita al la firma tero. Malnovaj dokumentoj atestas, ke en tiu loko, super kiu oni hodiaŭ navigas, ekzistis la vilaĝo Saint-Denis-chef-de-Caux. La maro inundis la teron en la dek-kvara jarcento kaj la preĝejo estis subakvigita en 1378. Laŭdire, ĉe bona vetero ĝiaj restaĵoj videblas en la marfundo.

Sur preskaŭ la tuta longo de la Nederlanda marbordo, la maro estas retenata de digoj, kiuj iam kaj iam rompiĝas. La malnova lago *Flevo*, kiu ligiĝis al la maro en 1225, hodiaŭ formas la golfon *Zuyderzee*.

Laŭ tio, la teritorio de Parizo kaj de la tuta Francio estos iam denove kovrita de la maro, kiel jam multfoje okazis laŭ la atesto de la geologiaj observoj. Tiam la montaraj regionoj formos insulojn, kiaj nun estas Ĵerzejo, Gernezejo kaj Anglio, kiuj iam estis ligitaj al la kontinento.

Oni navigos super regionoj, kiujn oni hodiaŭ traveturas ferveje; la ŝipoj alboriĝos ĉe Monmartro, ĉe la monto Valérien, ĉe la montetoj Saint-Cloud kaj Meudon; la boskoj kaj arbaroj, kiuj nun estas promenejoj, subakviĝos, ŝlimkovriĝos kaj loĝatiĝos per fiŝoj, kiuj anstataŭos la birdojn.

La biblia diluvo certe ne havis tiun kaŭzon, ĉar la inundo de la akvoj estis subita kaj ilia restado mallongdaŭra. Alie, tiu restado estus daŭrinta multajn jarmilojn kaj ankoraŭ nun ĝi daŭrus, sen ke la homoj tion konscius.

enabismiĝi; sed jam pasis la tempo de la ĝeneralaj kataklismoj kiel tiuj signintaj la grandajn geologiajn epokojn. La Tero atingis tian stabilecon, kiu, kvankam tute ne estante sensanĝa, tamen de nun tenas la homan specion ŝirmita kontraŭ ĝeneralaj perturboj, escepte nur tiujn el kaŭzoj nekonataj, fremdaj al ĝi, kiujn oni neniel povus antaŭvidi.

12. – Koncerne la kometojn, ni hodiaŭ estas tute trankvilaj pri ilia influo, ja pli bonfara ol malutila, ĉar ili verŝajne estas destinitaj reprovizi la mondojn, se ni tiel povas diri, al ĉi tiu alportante vivoprincipojn, kiujn ili rikoltas dum sia irado tra la spaco kaj proksimiĝado al sunoj. Ili do estus pli ĝuste fontoj de prospero ol anoncistoj de malfeliĉegoj.

Pro ilia fluideca naturo, nun jam plene pruvita (ĉap. VI, n-roj 28 kaj sekvantaj), praviĝas nenia timo je fortega kolizio, ĉar se unu el ili trafus la Teron, ja ĉi tiu trapasus la kometon kvazaŭ ĝi trairus nebulegon.

Ankoraŭ malpli timinda estas ilia vostforma trenaĵo, ĉar ĝi estas nenio alia ol la reflektado de la sunlumo en la senmezura, ilin envolvanta atmosfero, deŝ pli ke ĝi montriĝas konstante turnita al la flanko kontraŭa al la Suno kaj ŝanĝas sian direkton laŭ ties pozicio. Tiu gasa materio ankaŭ povus, pro la rapideco de ilia irado, formi iaspecan hararon similan al la poststrio de veturanta ŝipo, aŭ al la fumstrio de lokomotivo. Cetere jam multe da kometoj proksimiĝis al la Tero kaj al ĝi kaŭzis nenian difekton. Pro iliaj respektivaj densecoj la altirforto de la Tero efikus sur la kometon pli potence, ol ĉi ties sur ĝin. Nur iaj restaĵoj de malnovaj antaŭjuĝoj povas inspiri timon antaŭ ilia apero.¹

¹ La kometo de 1861 trapasis la orbiton de la Tero je dudekhora distanco de nia planedo, kiu do certe dronis en ĝia atmosfero, sed el tio rezultis nenia akcidento.

13. – Oni ankaŭ devas rigardi kiel kimeran hipotezon la eblecon de kolizio inter la Tero kaj alia planedo. La reguleco kaj neŝanĝebleco de la leĝoj direktantaj la movadon de la ĉielaj korpoj tute senprobablighas unu tian kolizion.

Tamen la Tero iam havos finon. Kiel? Tio ankoraŭ kuŝas en la kampo de la konjektoj; sed ĉar ĝi ankoraŭ tre malproksimas de la atingebla perfekteco kaj de la malnoveco, kiu signus ĝian kadukiĝon, ĝiaj nunaj loĝantoj povas esti certaj, ke tio ne okazos dum ilia tempo (ĉap. VI, n-roj 48 kaj sekvantaj).

14. – Fizike, la Tero travivis la skuojn de sia infaneco; ĝi nun eniris periodon de relativa stabileco: tiun de senskua progreso, kiu efektiviĝas per la regula ripetigo de la samaj fizikaj fenomenoj kaj per la inteligenta kunhelpo de la homo. *Ĝi tamen ankoraŭ troviĝas en plena ellaboriĝo de la morala progreso. En ĉi tio kuŝos la kaŭzo de ĝiaj pli grandaj skuoj. Tiel longe ĝis la homaro estos sufiĉe progresinta en sia perfektigiĝado, per la intelekto kaj la observado de la diaj leĝoj, la plej grandajn perturbojn ankoraŭ kaŭzos la homoj, pli ol la Naturo, alivorte ili estos prefere moralaj kaj sociaj ol fizikaj.*

Pligrandiĝo aŭ malpligrandiĝo de la volumeno de la Tero

15. – Ĉu la volumeno de la Tero pligrandiĝas, malpligrandiĝas aŭ restas sensanĝa?

Apoge al sia certeco, ke la volumeno de la Tero pligrandiĝas, kelkaj personoj baziĝas sur tio, ke la plantoj al la grundo pli donas ol de ĝi forprenas, kio estas vera en unu senco, sed en alia ne estas. La plantoj sin nutras tiom, eĉ pli, per la gasaj substancoj ĉerpataj en la atmosfero, kiom per tiuj

ensuĉataj de ties radikoj. Nu, la atmosfero ja estas konsista parto de la globo; la gasoj, kiuj ĝin konsistigas, devenas de la malkomponiĝo de la solidaj korpoj, kaj ĉi tiuj, rekomponiĝante, reprenas al si, kion ili al ĝi liveris. Temas do pri ia interŝanĝo, aŭ prefere ia ĉiama transformiĝo, en tia maniero, ke, malgraŭ la kreskado de la vegetaĵoj kaj bestoj helpe de la konsistaj elementoj de la globo, iliaj restaĵoj tamen, kiel ajn grandaj, eĉ ne per atomo pligrandigas ĝian mason. Se la solida parto de la globo konstante pligrandiĝus pro tiu kaŭzo, tio fariĝus koste de la atmosfero, kiu do sammezure malpligrandiĝus kaj fine fariĝus netaŭga por la vivo, se ĝi ne rehavigus al si, pro la malkomponiĝo de la solidaj korpoj, kion ĝi perdas pro ties formiĝo.

En la origino de la Tero, la unuaj geologiaj tavoloj formiĝis el la solidaj materioj, kiuj momente vaporiziĝis pro la alta temperaturo kaj kiuj, poste kondensiĝinte pro la malvarmiĝo, precipitiĝis. Ili nekontesteble iom altigis la tersupraĵon sed sen aldoni ion ajn al la totala maso, ĉar temis ja pri nenio alia ol translokiĝo de materio. Kiam la atmosfero, seniĝinte je la malpropraj elementoj, en ĝi suspensie miksitaj, atingis sian normalan staton, la aferoj ekprenis tiun regulan kurson, kiun ili poste sekvis. Hodiaŭ la plej malgranda ŝanĝo en la konsisto de la atmosfero nepre rezultigus la detruon de la nunaj surteraj loĝantoj; sed ankaŭ povas esti, ke novaj rasoj formiĝus en aliaj kondiĉoj.

De tiu vidpunkto, la maso de la globo, tio estas, la ĉiomo de la molekuloj konsistigantaj la tutajn de ĝiaj partoj solidaj, likvaj kaj gasaj, nekontesteble restas la sama ekde ĝia origino. Se ĝi suferus ian dilatiĝon aŭ ian kondensiĝon, ĝia volumeno pligrandiĝus aŭ malpligrandiĝus, sen ke la maso suferus ian ŝanĝon. Se do la Tero laŭmase pligrandiĝus, tio

estus pro la efiko de ia ekstera kaŭzo, ĉar ĝi ne povus ĉerpi en si mem la elementojn necesajn al sia pligrandiĝo.

Laŭ certa opinio, la globo pligrandiĝus laŭ maso kaj volumeno pro la alfluo de la kosma interplaneda materio. Nenio malracia estas en ĉi tiu ideo, sed ĝi estas tro hipoteza, ke oni ĝin principe akceptu. Temas pri nenio alia ol ia sistemo oponata de kontraŭaj sistemoj, pri kiuj la Scienco ankoraŭ nenion formulis. Jen ĉi-koncerna opinio de la eminenta Spirito, kiu diktis la klerajn studojn *uranografiajn* ĉi-supre prezentitajn en la ĉapitro VI:

“La mondoj elĉerpiĝas pro malnoviĝo kaj emas dissolviĝi por servi kiel elementoj al formiĝo de aliaj universo. Ili iom post iom redonas al la universa kosma fluidaĵo de la spaco tion, kion ili el ĝi ĉerpis por formiĝi. Krom tio, ĉiuj korpoj eluziĝas de froto; la rapida kaj senĉesa movado de la globo tra la kosma fluidaĵo donas kiel rezulton, ke ĝia maso konstante malpliĝas kvankam en kvanto senlime malgranda, en iu difinita tempo.¹

“La ekzisto de l' mondoj povas, miaopinie, esti dividita en tri periodoj. – Unua periodo: kondensiĝo de la materio, dum kiu la volumeno de la Tero tre malpligrandiĝas, tamen konservante la saman mason. Tio estas la infana periodo. – Dua periodo: kuntiriĝo, solidiĝo de la krusto; apero de la ĝermoj, disvolviĝo de la vivo ĝis la apero de pli progresinta tipo. En tiu momento, la globo troviĝas en sia tuta pleneco, en la aĝo de vigeleco; ĝi perdas, sed tre malmulte, siajn konsistajn elementojn. – Laŭmezure kiel ĝiaj loĝantoj progresas *spirite*, ĝi pasas al la periodo de *materiala* malpligrandiĝo; ĝi perdas ne

¹ En ties translacia movo ĉirkaŭ la Suno, la rapido de la Tero estas 400 leŭgoj en minuto. Ĉar ĝia cirkonferenco longas 9.000 leŭgojn, tial ĉiu punkto de la ekvatoro, dum ĝia rotacia movo ĉirkaŭ ĝia akso, trakuras 9.000 leŭgojn en 24 horoj, aŭ 6,3 leŭgojn en unu minuto.

nur pro la froto sed ankaŭ pro la malagregiĝo de la molekuloj, same kiel dura ŝtono, kiu, korodita de la tempo, fine reduktiĝas al polvo. En sia duobla movado, rotacia kaj translacia, ĝi ellasas al la spaco partojn de sia substanco ĝis la momento, kiam estos kompleta ĝia dissolviĝo.

“Sed tiam, ĉar la altirpovo estas proporcia al la maso – mi ne diras al la volumeno –, tial, pro la malgrandiĝo de la globa maso, ĝiaj kondiĉoj de ekvilibro en la spaco ŝanĝiĝas. Pro la reganta influo de pli potencaj planedoj, al kiuj ĝi ne povas fari kontraŭpezon, rezultas devioj en ĝiaj movoj kaj, sekve, ankaŭ profundaj ŝanĝoj en la vivkondiĉoj sur ĝia supraĵo. Tiel, naskiĝo, vivo kaj morto; aŭ infaneco, vikleco, kadukeco estas la tri etapoj, kiujn trapasas ĉia aglomeraĵo da organa aŭ neorganica materio. Nedetruibla nur la Spirito, kiu tute ne estas materio.” (Galileo, *Pariza Societo*, 1868).

ĈAPITRO X

ORGANA GENEZO ¹

Primara formado de la vivaj estaĵoj. – Vivoprincipo.
Spontana generado. Skalo de la organaj estaĵoj. – La korpa homo.

Primara formado de la vivantaj estaĵoj

1. – Iam estis tempo, kiam bestoj ne ekzistis; ili do havis komencon. Ĉiu specio aperis laŭmezure kiel la globo akiris la kondiĉojn necesajn al ilia ekzistado: jen pozitiva afero. Kiel formiĝis la unuaj individuoj de ĉiu specio? Estas kompreneble, ke, deire de unua paro, la individuoj multiĝis; sed de kie venis tiu unua paro? Tio estas unu el tiaj misteroj, ligitaj al la komenco de la aferoj, kaj pri kiuj oni povas nur formuli hipotezojn. Se la Scienco ankoraŭ ne povis plene solvi la problemon, ĝi povas almenaŭ klarigi ĝin.

2. – La unua demando, kiu elŝoviĝas, estas jena: ĉu ĉiu besta specio devenis de iu *praa paro* aŭ de pluraj paroj kreitaj, aŭ, se oni preferas, simultane *ekĝermintaj* en diversaj lokoj?

¹ Vidu notojn ĉe la *Enkonduko*.

Ĉi tiu lasta supozo estas la plej probabla. Oni povas eĉ diri, ke ĝi fontas el la observado. Efektive, la studo de la geologiaj tavoloj atestas la ekziston, en la samformaciaj terenoj kaj en grandega kvanto, de unu sama specio sur lokoj de la globo plej malproksimaj inter si. Tiu multiĝo, ja tiel ĝeneraliginta kaj iel samtempa, estus neebla per unusola primitiva tipo.

Aliflanke, la vivo de unu individuo, ĉefe de individuo naskiĝanta, estas elmetata al tiom da eventualaĵoj, ke tuta kreaĵaro povus, sen la plureco de tipoj, esti endanĝerigita, kio implicas neakcepteblan neantaŭzorgemon flanke de la superega Kreinto. Cetere, se iu tipo povis formiĝi en unu loko, ĝi ankaŭ povus, pro la sama kaŭzo, formiĝi en diversaj aliaj lokoj. Ĉio do kunagas por pruvi, ke okazis samtempa kaj multobla kreado de la unuaj paroj de ĉiu specio, besta kaj vegetaĵa.

3. – La formadon de la unuaj vivaj estaĵoj oni povas dedukti, pro analogio, el tiu sama leĝo, laŭ kiu formiĝis kaj ĉiutage formiĝas ĉiuj organaj korpoj. Laŭmezure kiel oni enprofundiĝas en la leĝojn de la Naturo, oni vidas, ke ĝiaj dentradoaroj, kiuj unuarigarde ŝajnas tiel kompleksaj, simpliĝas kaj kunfandiĝas en la grandan leĝon de unueco, kiu direktas la tutan verkon de la kreado. Oni tion pli bone komprenos, kiam estos komprenita la formado de la neorganaj estaĵoj, kiu estas la unua ŝtupo de tiu alia formado.

4. – La Kemio klasas elementaj iujn substancojn, kiel oksigenon, hidrogenon, azoton, karbonon, kloron, jodon, fluoron, sulfuron, fosforon kaj ĉiujn metalojn. El ilia kombiniĝo formiĝas la kombinitaj korpoj: oksidoj, acidoj, alkaloj, saloj kaj la sennombraj varioj, kiujn ĉi-lastaj komponas.

La kombiniĝo de du korpoj por formado de iu tria postulas apartan kunagadon de cirkonstancoj, nome iu difinita grado da varmo, sekeco aŭ malsekeco; movo aŭ senmovo; ia elektra kurento, ktp. Se ne ekestas tiuj cirkonstancoj, ne okazos la kombiniĝo.

5. – Post kombiniĝo, la komponitaj korpoj perdas siajn karakterizajn proprecojn kaj la rezultinta komponaĵo akiras proprecojn malsamajn ol tiuj de la unuaj. Tiel, ekzemple, la oksigeno kaj la hidrogeno, kiuj estas nevideblaj gasoj, kemie kombiniĝinte, formas la akvon, kiu estas, laŭ la temperaturo, likva, solida aŭ gasa. En la akvo ĝustadire jam ne plu estas oksigeno nek hidrogeno, sed iu nova korpo. Pro la malkombiniĝo de la akvo, la du gasoj, denove apartigitaj, reprenas siajn proprecojn, kaj jam ne plu estas akvo. Tiel, la sama kvanto da akvo povas, alterne kaj senfine, esti malkombinata kaj rekombinata.

6. – La komponiĝo kaj malkomponiĝo de la korpoj okazas laŭ la gradoj de afineco, kiujn la elementaj principoj havas inter si. Ekzemple, la formiĝo de la akvo rezultas el la reciproka afineco inter oksigeno kaj hidrogeno; sed se oni kun la akvo kontaktigas korpon pli afinantan al oksigeno ol ĉi tiu al hidrogeno, tiam la akvo malkomponiĝas; la oksigeno estas sorbita, la hidrogeno ellasiĝas kaj jam ne plu estas akvo.

7. – La kombinitaj korpoj ĉiam formiĝas laŭ difinitaj proporcioj, tio estas, per la kombiniĝo de difinita kvanto de la konsistaj elementoj. Tiel, por la formado de la akvo necesas unu parto de oksigeno kaj du partoj de hidrogeno. Se du partoj de oksigeno kombiniĝas kun du partoj de hidrogeno, anstataŭ akvon oni havos hidrogenan dioksidon, likvaĵon

korodan sed konsistantan el la samaj elementoj de la akvo, kvankam laŭ malsama proporcio.

8. – Tia estas, per malmultaj vortoj, la leĝo, kiu direktas la formadon de ĉiuj korpoj en la Naturo. La sennombra diverseco de tiuj korpoj rezultas el tre malgranda nombro da elementaj principoj, kombinitaj laŭ malsamaj proporcioj.

Tiel, oksigeno, kombinita laŭ difinitaj proporcioj kun karbono, sulfuro, fosforo, formas la acidojn karbonatan, sulfatan kaj fosforatan; oksigeno kaj fero formas la feroksidon aŭ ruston; oksigeno kaj plumbo, ambaŭ nenocaj, kombinite estigas la plumboksidon, nome litargiron, ceruzon, minion, kiuj estas venenaj. Oksigeno, kombinite kun la metaloj nomataj kalcio, natrio, kalio, formas respektive kalkon, sodon, potason. Kalko kombinita kun karbonata acido formas la karbonatojn de kalko aŭ la kalkŝtonojn, kiel marmoron, kreton, betonŝtonon kaj la stalaktitojn; kun la sulfurata acido ĝi formas la kalcian sulfaton, aŭ gipson, kaj la alabastron; kun la fosfata acido: la kalkfosfaton, solidan elementon de la ostoj; kloro kaj hidrogeno formas la kloridan aŭ klorhidran acidon; kloro kaj natrio formas la natrian kloridon aŭ marsalon.

9. – Ĉiujn tiujn kombinaĵojn kaj milojn da aliaj oni ricevas malgrandkvante, per artaj procedoj, en la kemiaj laboratorioj; ili spontane, larĝgaskale fariĝas en la granda laboratorio de la Naturo.

En sia origino, la Tero ne enhavis tiujn materiojn kombinitaj sed nur ties konsistajn principojn en volatila stato. Ĝiam sur ĝia supraĵo demetiĝis la kalkaj teroj krom ankaŭ aliaj, kiuj kun la tempo fariĝis ŝtonecaj, tiam tiuj materioj ekzistis ankoraŭ ne tute formitaj; sed en la aero troviĝis, en gasa stato, ĉiuj primitivaj substancoj. Precipitiĝinte pro la malvarmiĝo, tiuj

substancoj, sub la efiko de favoraj cirkonstancoj, kombiniĝis laŭ la grado de siaj molekulaĵaj afinecoj. Ja tiam formiĝis la diversaj specoj de karbonatoj, sulfatoj, k.a., komence dissolvitaj en la akvo, poste demetiĝintaj sur la grundsupraĵo.

Ni supozu, ke pro ia ajn kaŭzo la Tero revenus al la primitiva stato de brulanteco; ĉio malkomponiĝus; la elementoj dispartiĝus; ĉiuj fandeblaj substancoj fandiĝus; ĉiuj volatiligeblaj volatiliĝus. Poste, alia malvarmiĝo estigus novan precipitiĝon kaj denove ekestus la malnovaj kombinaĵoj.

10. – Tiu konsidero pruvas, kiom necesa estis la Kemio por la kompreno de la Genezo. Antaŭ ol oni konatiĝis kun la leĝoj de la molekula afineco, estis neeble kompreni la formadon de la Tero. Ĉi tiu scienco klarigis la demandon per tute nova lumo, same kiel la Astronomio kaj la Geologio el aliaj vidpunktoj.

11. – Ĉe la formado de la solidaj korpoj, unu el la plej rimarkindaj fenomenoj estas la kristaliĝo, konsistanta en la regula formo, kiun prenas certaj substancoj, pasante de la likva aŭ gasa stato al la stato solida. Tiu formo, kiu varias laŭ la naturo de la substanco, ĝenerale prezentas la geometriajn solidojn, kiel la prismon, la romboedron, la kubon, la piramidon. Ĉiuj konas la kando-kristalojn; la kvarco, aŭ kristaliĝinta siliko, estas sesedra prismo finiĝanta per same heksagona piramido. La diamanto estas pura karbono aŭ kristaliĝinta karbo. La desegnoj, kiuj dumvintre formiĝas sur la fenestraj vitroj, havas kiel kaŭzon la kristaliĝon de la akvovaporo, okaze de la glaciĝo, sub la formo de prismaj nadloj.

La regula dispozicio de la kristaloj respondas al la aparta formo de la molekuloj de ĉiu korpo. Tiu partikloj, kiuj por ni estas senfine malgrandaj sed kiuj, eĉ tiaj, nepre okupas

ian spacon, interproksimiĝinte, pro la molekula altirforto, sin aranĝas kaj apudmetiĝas laŭ tio, kiel trudas iliaj formoj, en tia maniero, ke ĉiu prenas sian lokon ĉirkaŭ la kerno, aŭ altircentro, kaj konsistigas simetrian tutajon.

La kristaliĝo estiĝas nur ĉe difinitaj, favoraj cirkonstancoj, sen kiuj ĝi ne povas okazi. Esencaj kondiĉoj estas la grado da temperaturo kaj la absoluta senmoveco. Estas kompreneble, ke tre forta varmo, tenanta la molekulojn apartigitaj, al ĉi tiuj ne permesus kondensiĝi, kaj ke la moviĝado, kontraŭaganta ilian simetrian aranĝon, al ili ebligis nur la formadon de ia konfuza kaj neregula maso, neniel de ĝustadira kristaliĝo.

12. – La leĝo direktanta la formadon de la mineraloj nature kondukas al la formado de la organaj korpoj.

La kemia analizo montras, ke ĉiuj bestaj kaj vegetaĵaj substancoj konsistas el la samaj elementoj kiel la neorganaj korpoj. El tiuj elementoj, la ĉefan rolon ludas oksigeno, hidrogeno, azoto kaj karbono, dum la ceteraj rolas akcesore. Kiel ĉe la minerala regno, tiel same la diferenco de proporcioj en la kombiniĝo de ĉi tiuj elementoj produktas ĉiujn variojn de organaj substancoj kaj ties diversaj proprecoj, nome muskoloj, ostoj, sango, galo, nervoj, cerba materio, graso, ĉe la bestoj; suko, ligno, folioj, fruktoj, esencoj, oleoj, rezinoj, ktp, ĉe la vegetaĵoj. Tiel, ĉe la formado de bestoj kaj plantoj, eniras en ilian konsiston neniu speciala korpo, kiu ne troveblus ankaŭ en la minerala regno.¹

¹ La ĉi-suba tabelo, prezentanta la analizon de kelkaj substancoj, montras, ke la malsameco inter ties proprecoj rezultas sole nur el la malsameco inter la proporcioj de la konsistaj elementoj. En rilato al 100 partoj:

13. – Kelke da ordinaraj ekzemploj komprenigos la transformiĝojn, kiuj okazas en la organa regno sole nur per la aliigo de la konsistaj elementoj.

En la vinbersuko estas nek vino, nek alkoholo, sed nur akvo kaj sukero. Kiam la suko estas maturiĝinta kaj statas en kondiĉoj favoraj, estiĝas ia intima proceso, nomata fermentiĝo. En tiu proceso, parto de la sukero malkomponiĝas; la oksigeno, la hidrogeno kaj la karbono apartiĝas kaj kombiniĝas laŭ la proporcioj necesaj por produkti alkoholon, pro kio oni, trinkante vinbersukon, efektive ne trinkas alkoholon, ĉar ĉi tiu ankoraŭ ne ekzistas. Ĝi formiĝas el la konsistaj partoj de akvo kaj de sukero, sen pliiĝo aŭ malpliiĝo je unu sola molekulo.

En la pano aŭ la legomoj, kiujn oni manĝas, certe estas nek karno, nek sango, nek ostoj, nek galo, nek cerba materio, sed tamen tiuj samaj manĝaĵoj, malkomponiĝante kaj rekomboniĝante pro la digesta proceso, produktas tiujn malsamajn substancojn sole nur per la transmutacio de iliaj konsistaj elementoj.

Ankaŭ en la semo de arbo estas nek ligno, nek folioj, nek floroj, nek fruktoj, kaj estus ja infana eraro kredi, ke la tuta arbo troviĝas en la grajno en mikroskopa formo. Des malpli, ne ekzistas en la semo sufiĉa kvanto da oksigeno, hidrogeno

	Karbono	Hidrogeno	Oksigeno	Azoto
Kansukero	42,470	6,900	50,630	–
Vinber-sukero	36,710	6,780	56,510	–
Alkoholo	51,980	13,700	34,320	–
Oliva oleo	77,210	13,360	9,430	–
Nuksa oleo	79,774	10,570	9,122	0,534
Graso	78,996	11,700	9,304	–
Fibrino	53,360	7,021	19,685	19,934

kaj karbono por formado de unu ties folio. La grajno entenas ĝermon, kiu elburĝonas en favoraj kondiĉoj. Tiu ĝermo disvolviĝas pro la fluidoj, kiujn ĝi ĉerpas en la tero kaj en la gasoj sorbataj el la aero. Tiuj fluidoj, kiuj estas nek ligno, nek folioj, nek floroj, nek fruktoj, infiltriĝas en la planton kaj al ĝi formas la sukon, same kiel la nutraĵoj, ĉe la bestoj, formas la sangon. Portate de la cirkulado al ĉiuj partoj de la vegetaĵo, la suko, laŭ la organo, kiun ĝi atingas kaj en kiu ĝi suferas specialan ellaboriĝon, transformiĝas en lignon, foliojn kaj fruktojn, same kiel la sango transformiĝas en karnon, ostojn, galon, ktp, ktp. Sed tamen tio ĉiam estas la samaj elementoj: oksigeno, hidrogeno, azoto kaj karbono, en diversaj kombinaĵoj.

14. – La malsamaj kombinaĵoj de la elementoj, por formado de mineralaj, vegetaĵaj kaj animalaj substancoj, povas do fariĝi nur en la favoraj medioj kaj cirkonstancoj; ekster tiuj cirkonstancoj la elementaj principoj restas en iaspeca inercio. Sed, se la cirkonstancoj montriĝas favoraj, komenciĝas ia ellaboriĝa proceso; la molekuloj ekmoviĝas, skuiĝas, reciproke sin altiras, alproksimiĝas kaj disiĝas pro la leĝo de la afinecoj kaj, per siaj multoblaj kombiniĝoj, estigas la senfinan diversecon de la substancoj. Nur malaperu tiuj kondiĉoj kaj la proceso subite ĉesas, por rekomenciĝi, kiam ili reapero. Ja tiel la vegetado vigliĝas, malvigliĝas, ĉesas kaj reaktivatas sub la efiko de varmo, lumo, humideco, malvarmo kaj sekeco; ankaŭ tiel tia planto prosperas en unu klimato aŭ en unu grundo, sed velkas aŭ pereas en aliaj.

15. – Kio ĉiutage fariĝas antaŭ niaj okuloj, tio povas meti nin sur la spuron de tio okazinta en la origino de l' tempo, ĉar la leĝoj de la Naturo estas neŝanĝeblaj.

Tial ke la konsistaj elementoj de la organaj kaj neorganaj estaĵoj estas la samaj; ke ni ilin vidas, sub la potenco de certaj cirkonstancoj, senĉese formadi ŝtonojn, plantojn kaj fruktojn, oni do povas konkludi, ke la korpoj de la unuaj vivaj estaĵoj formiĝis, kiel la unuaj ŝtonoj, per la kuniĝo de la elementaj molekuloj pro la leĝo de afineco, laŭgrade kiel la vivigaj kondiĉoj de la globo favoris tiun aŭ tiun alian specion.

La simileco, laŭ formo aŭ laŭ koloro, en la reproduktiĝo de la individuoj de ĉiu specio, povas esti komparata kun la formosimileco de ĉiu kristal-speco. Apudmetiĝante sub la efiko de la sama leĝo, la molekuloj estigas analogan tutaĵon.

Vivoprincipo

16. – La aserton, ke la plantoj kaj la bestoj estas formitaj de la samaj konsistaj elementoj, kiel la mineraloj, oni komprenu en ekskluzive materia senco: ĉi tie temas nur pri la korpo.

Ne parolante pri la inteligenta principo, kio estas aparta demando, ekzistas en la organa materio iu speciala principo, nepalpebla kaj ankoraŭ nedifinebla: la *vivoprincipo*. Tiu principo, kiu aktivas en la vivanta estaĵo, *estingiĝas* en tiu mortinta; sed eĉ ne pro tio ĝi ĉesas havigi al la substanco proprecojn, kiuj ĉi tiun distingas de la neorganaj substancoj. La Kemio, kiu malkomponas kaj rekomponas la pliparton el la neorganaj korpoj, ankaŭ sukcesis malkomponi la organajn korpojn, sed ĝi neniam sukcesis rekonstrui eĉ unu mortintan folion, ja evidenta pruvo, ke en ĉi tiuj korpoj io troviĝas, kio ne ekzistas en la aliaj.

17. – Ĉu la vivoprincipo estas io aparta, havanta propran ekziston? Aŭ, konforme al la sistemo pri la unueco de la generanta elemento, ĉu ĝi estas nur ia aparta stato, unu el

la modifoj de la universa kosma fluido, laŭ kiu tiu fluido fariĝas principo de vivo, same kiel ĝi fariĝas lumo, fajro, varmo, elektro? Ja en ĉi tiu senco la ĉi-supre prezentitaj komunikaĵoj solvas la demandon (ĉap. VI, *Ĝenerala Uranografio*).

Kia ajn tamen estas la ideo, kiun oni al si faras pri la naturo de la vivoprincipo, ĝi nepre ekzistas, ĉar vidiĝas ĝiaj efikoj. Oni povas do logike akcepti, ke ĉe sia formiĝo la organaj estaĵoj asimilis la vivoprincipon necesan al sia destino; aŭ, se oni preferas, ke tiu principo disvolviĝis en ĉiu individuo pro la efiko mem de la kombiniĝo de la elementoj, same kiel disvolviĝas, sub la potenco de certaj cirkonstancoj, la varmo, la lumo kaj la elektro.

18. – Interkombiniĝante sen la vivoprincipo, la oksigeno, hidrogeno, azoto kaj karbono formus nenion alian ol mineralon aŭ neorganan korpon; la vivoprincipo, ŝanĝante la molekulan konsiston de ĉi tiu korpo, havigas al ĝi specialajn proprecojn. Anstataŭ minerala molekulo, oni havas molekulon de organa materio.

La aktiveco de la vivoprincipo estas tenata, dum la vivo, de la funkcia agado de la organoj, same kiel la varmon tenas la rotacia movo de rado. Kiam, pro la morto, tiu funkciado ĉesas, la vivoprincipo *estingiĝas*, same kiel la varmo, kiam ĉesas la rotacio de la rado. Sed la *efiko*, kaŭzita de la vivoprincipo sur la molekula stato de la korpo, pludaŭras post la estingiĝo de tiu principo, same kiel daŭras la karbonizado de la ligno post la estingiĝo de la varmo. Ĉe la analizado de la organaj korpoj, la Kemio retrovas iliajn konsistajn elementojn, nome oksigenon, hidrogenon, azoton kaj karbonon, sed ĝi ne povas ilin rekonstitui, ĉar, pro la fakto, ke jam ne ekzistas la kaŭzo, al ĝi estas neeble ree produkti la *efikon*, malgraŭ ke al ĝi eblas rekonstitui ŝtonon.

19. – Ni prenis por komparo la varmon, kiu estiĝas pro la movo de rado, ĉar temas pri ordinara efiko, de ĉiuj konata kaj pli facile komprenebla. Sed estus pli ĝuste diri, ke, ĉe la kombiniĝo de la elementoj por formado de la organaj korpoj, estiĝas *elektro*. La organaj korpoj estus do veraj *elektraj piloj*, kiuj funkcias dum ties elementoj troviĝas en la necesaj kondiĉoj por produkti elektron: tio estas la vivo; kiuj ĉesas funkcii, kiam malaperas tiuj kondiĉoj: tio estas la morto. Laŭ tio, la vivoprincipo estus nenio alia ol ia aparta speco de elektro, nomata *animala elektro*, kiu dumvive elliberiĝas pro la agado de la organoj kaj kies produktado ĉesas okaze de la morto pro la ĉeso de tiu agado.

Spontana generado

20. – Komprenebla estas la demando, kial ne plu formiĝas vivaj estaĵoj sammaniere kiel formiĝis tiuj aperintaj la unuaj sur la Tero.

Kvankam ankoraŭ plurdirekte solvita, la demando pri la spontana generado, kiu nuntempe okupas la Sciencon, ne povas ne ĵeti lumon sur tiun temon. Jena estas la proponita problemo: ĉu nuntempe formiĝas organaj estaĵoj el la nura kuniĝo de ties konsistaj elementoj, sen ĝermoj antaŭe produktitaj laŭ la ordinara proceso, alivorte sen patroj nek patrinoj?

Jese respondas la adeptoj de la spontana generado, sin bazante sur rektaj, ŝajne konvinkaj observoj. Aliaj pensas, ke ĉiuj vivaj estaĵoj reproduktiĝas, unuj el la aliaj, kaj ili sin apogas sur tiu fakto, konstatita de la sperto, nome ke la ĝermoj de certaj specioj vegetaĵaj kaj animalaj, eĉ se dissemitaj, konservas latentan vivipovecon dum longa tempo ĝis la cirkonstancoj favoros ilian ekburĝonon. Tiu opinio lasas ĉiam

nefermita la demandon pri la formado de la pratipoj de ĉiu specio.

21. – Sen pridiskuti ambaŭ sistemojn, konvenas rimarkigi, ke la principo pri la spontana generado povas aplikiĝi nur al la estaĵoj de la plej malsuperaj ordoj de la regnoj vegetaĵa kaj animala, nome al tiuj, ĉe kiuj la vivo burĝonas kaj kies organismo estas iamaniere rudimenta. Ja tiuj, efektive aperis la unuaj sur la Tero, kaj ilia formiĝo nepre estis spontana. Ni tiel ĉeestus ian kreadon konstantan, analogan al tiu okazinta en la unuaj epokoj de la mondo.

22. – Sed kial do oni ne vidas sammaniere formiĝi la estaĵojn kun pli kompleksa organizo? Ke tiaj estaĵoj ne ĉiam ekzistis, tio estas pozitiva fakto; ili do havis komencon. Se la musko, la likeno, la zoofito, la infuzorio, la intestaj vermoj kaj aliaj povas spontane formiĝi, kial ne same okazas kun la arboj, fiŝoj, hundoj, ĉevaloj?

Ĉi tie haltas, nun, la esploroj; malaperas la kondukanta fadeno, kaj tiel longe, ĝis ĝi estos retrovita, la kampo restos malfermita al hipotezoj. Estus do neprudente kaj tro frue prezenti sistemojn kiel absolutajn veraĵojn.

23. – Se la spontana generado estas pruvita fakto, kiel ajn limita, ĝi ne povas ne montriĝi kiel fakto decida, ia markŝtono indikanta la vojon al novaj observoj. La kompleksaj organaj estaĵoj ja ne tiamaniere formiĝas, sed kiu scias, kiel ili komenciĝis? Kiu scias la sekreton de ĉiuj transformiĝoj? Kiu povas, vidante la kverkon elkreski el la glano, aserti, ke ne ekzistus ia mistera ligilo inter la polipo kaj la elefanto? (N-ro 25).

En la nuna stato de nia sciaro, ni povas starigi la teorion pri la *konstanta* spontana generado nur kiel hipotezon proba-

blan, kiu iam eble prenos lokon inter la nekontestebraj sciencaj veraĵoj.¹

Skalo de la organaj estaĵoj

24. – Nenia neta limo ekzistas inter la regnoj vegetaĵa kaj animala. Ĉe iliaj ekstremoj troviĝas la *zoofitoj* aŭ *bestoplantoj*, kies nomo montras, ke ili samtempe apartenas al unu regno kaj al la alia.

Kiel la bestoj, la plantoj naskiĝas, vivas, kreskas, sin nutras, spiras, reproduktiĝas kaj mortas. Kiel tiuj, ili bezonas, por vivi, lumon, varmon kaj akvon; velkas kaj mortas se al ili mankas tiuj elementoj. La sorbado de malpura aero kaj de nocaĵ substancoj venenas ilin. Ilia plej karakteriza distingiĝa trajto estas tio, ke ili restas fiksitaj al la grundo kaj el ĉi tiu ĉerpas la nutraĵon ne moviĝante.

Zoofito ekstere aspektas kiel planto; kiel planto ĝi restas fiksita al la grundo; kiel besto, la vivo en ĝi pli viglas: sian nutraĵon ĝi ĉerpas el la ĉirkaŭa medio.

Unu ŝtupon supre la besto estas libera kaj serĉas sian nutraĵon: unuavice montriĝas la sennombraj varioj da polipoj, kun gelatenecaj korpoj, sen nete difinitaj organoj, kiuj diferencas de la plantoj nur per la kapableco moviĝi; sekvas, viciĝintaj laŭ la disvolviĝo de la organoj, de la vitala aktiveco kaj de la instinkto: la helmintoj aŭ intestaj vermoj; la moluskoj, karnecaj senostaj bestoj, el kiuj unuj estas nudaj kiel la limakoj, polpoj, kaj aliaj konkohavuloj kiel heliko kaj ostro; la krustacoj, kies haŭto estas kovrita de malmola krusto, kiel kankroj, omaroj; la insektoj, ĉe kiuj la vivo montriĝas mireginde aktiva kaj mani-

¹ *Revue Spirite*, julio 1868, p. 201: “Evolviĝo de la teorio pri la spontana generado”.

festiĝas instinkto de laborado, kiel formiko, abelo kaj araneo. Kelkaj suferas ian metamorfozon, kiel la raŭpo, kiu transformiĝas en ĉarman papilion. Sekvas la ordo de la vertebruloj, bestoj kun osteca armaturo, kiu ordo ampleksas la fiŝojn, reptiliojn, birdojn; kaj fine la mamuloj, kun pli perfekta strukturo.

25. – Se oni nur konsideras la ekstremaĵojn de la ĉeno, sendube montriĝas nenia laŭeksteraĵa analogeco; sed se oni pasas de unu ĉenero al la sekvanta, sen rompo de la kontinueco, oni iras, sen abrupta transiĝo, de la planto ĝis la vertebruloj. Oni tiel komprenas la eblecon de tio, ke la bestoj kun kompleksa strukturo estas nenio alia ol ia transformiĝo, aŭ, se oni preferas, ia laŭgrada disvolviĝo, komence ne perceptebla, de la tuj malsupera specio, kaj tiel plu sinsekve, ĝis la primitiva elementa estaĵo. Granda estas la diferenco inter la glano kaj la kverko, sed se oni akompanas paŝo post paŝo la disvolviĝon de la glano, oni atingas la kverkon kaj ne plu miras, ke ĝi devenas de tiel eta semo. Nu, se la glano latente entenas la elementojn necesajn al la formado de giganta arbo, kial ne same okazus de la akaro ĝis la elefanto? (N-ro 23).

Laŭ tio supre dirita, oni komprenas, ke la spontana generado nur okazus ĉe la elementaj organaj estaĵoj; la superaj specioj estus la produkto de la sinsekvaj transformiĝoj de tiuj samaj estaĵoj, laŭgrade kiel ĉi tion favorus la veterkondiĉoj. Kiam ĉiu specio akiris la kapablon reproduktiĝi, la pariĝoj rezultigis sennombrajn variojn. Kaj post kiam unu specio sidis sur favoraj kondiĉoj, kiu scias ĉu la primitivaj ĝermoj, de kiuj ĝi fontis, ne malaperis por ĉiam pro senutileco? Kiu povas aserti, ke nia nuntempa akaro estus identa al tiu, kiu, post sinsekvaj transformiĝoj, estigis la elefanton? Tiel oni klarigus, kial ne estas spontana generado ĉe la bestoj kun kompleksa

strukturo. Ĉi tiu teorio, kvankam ankoraŭ ne definitive akceptita, destiniĝas nuntempe regi en la Scienco. Seriozaj esploristoj ĝin akceptas kiel la plej racian.

La korpa homo

26. – El la korpa, pure anatomia vidpunkto, la homo apartenas al la klaso de mamuloj, de kiuj li diferencas nur per kelkaj nuancoj eksteraj. Koncerne la ceteron: sama konsisto kiel ĉiuj bestoj, samaj organoj, samaj funkcioj, samaj procesoj de nutrado, spirado, sekreciado, reproduktiĝo. Li naskiĝas, vivas kaj mortas en samaj kondiĉoj, kaj, mortinte, li malkomponiĝas kiel ĉia vivantaĵo. Ne estas en lia sango, en lia karno, en liaj ostoj, eĉ unu atomo diferenca de tiuj, kiuj troviĝas en la korpo de la bestoj. Kiel ĉi tiuj, okaze de la morto li redonas al la tero la oksigenon, hidrogenon, azoton kaj karbonon, kiuj kombiniĝis por formi lin kaj kiuj, per novaj kombiniĝoj, formas aliajn novajn korpojn, mineralajn, vegetajn kaj bestajn. Tiel granda estas la analogio, ke oni studas liajn organajn funkciojn ĉe certaj bestoj, kiam oni ne povas fari la koncernajn eksperimentojn rekte en li mem.

27. – Ĉe la klaso de mamuloj, la homo apartenas al la ordo de la *dumanuloj*. Tuj malsupre viciĝas la *kvarmanuloj* (bestoj kun kvar manoj), aŭ simioj, el kiuj unuj, kiel la orangutango, la ĉimpanzo, faras certajn homajn gestojn en tia maniero, ke oni dum longa tempo ilin nomis *homoj de l' arbaroj*. Kiel la homoj, tiuj simioj paŝas rekte starantaj, tenas bastonojn, konstruas kabanojn kaj portas per la mano la manĝon al la buŝo: ja karakterizaj signoj.

28. – Kiel ajn supraĵe oni observas, el la vidpunkto de la organismo, la skalon de la vivaj estaĵoj, oni nepre rekonas, ke de la likeno ĝis la arbo, de la zoofito ĝis la homo, montriĝas ia ĉeno, kiu grade altiĝas, sen rompo de kontinueco, kaj kies ĉiu ĉenero havas punkton de kontakto kun la ĵus antaŭa ĉenero. *Akompanante, paŝo post paŝo, la serion de la estaĵoj, oni dirus, ke ĉiu specio estas ia perfektigo, ia transformiĝo de la tuj malsupra specio.* Ĉar la kondiĉoj de la homa korpo estas kemie kaj konstitucie identaj al tiuj de aliaj korpoj; ĉar ĝi naskiĝas, vivas kaj mortas sammaniere, ĝi do nepre estas formita en tiuj samaj kondiĉoj.

29. – Kiel ajn tio ofendas lian fieron, la homo devas rezignacie vidi en sia *materia korpo* nenion alian ol la lastan ĉeneron de la besta regno *sur la Tero*. En tio sidas la refleksibla argumento de l' faktoj, kontraŭ kiu restus vana ĉia protesto.

Sed ju malpli valoras la korpo en liaj okuloj, des pli kreskas laŭ graveco la spirita principo. Se la unua lin alniveliĝas al la bruto, la dua lin levas al nemezurebla alteco. Ni vidas la rondon, en kiu enfermiĝas la besto: ni ne vidas la limon atingeban por la homa spirito.

30. – Materialismo povas el tio vidi, ke Spiritismo, tute ne timante la malkovrojn de la Scienco kaj ties pozitivismon, male ilin alfrontas kaj defias, ĉar ĝi estas certa, ke la spirita principo, *kiu havas propran ekziston*, neniom povas suferi de ili.

Spiritismo marŝas kune kun materialismo sur la kampo de la materio, akceptas ĉion, kion ĉi tiu akceptas; sed ĝi transpasas la punkton, kie ĉi tiu haltas. Spiritismo kaj materialismo estas kvazaŭ du vojaĝantoj, kiuj kune vojas, deirinte de

la sama punkto; alveninte je certa distanco, unu diras: “Mi ne povas iri pli malproksimen”; la dua plu iras sian vojon kaj malkovras novan mondon. Kial do la unua diras, ke la dua frenezas, ĉar ĉi tiu, duonvidante novajn horizontojn, volas transpasi la limon, kie al la alia konvenas halti? Ĉu ankaŭ Kristoforo Kolumbo ne estis alnomata freneza, ĉar li kredis la ekziston de ia transoceana mondo? Kiom multe ne nombras la Historio da tiaj frenezuloj, kiuj antaŭenigis la homaron kaj al kiuj oni plektas kronojn post ol priĵeti ilin per koto?

Nu bone! Spiritismo, tiu frenezaĵo de la dek-naŭa jarcento laŭ la opinio de tiuj, kiuj volas resti ĉe borde, malkovras al ni tutan mondon, mondon multe pli gravan por la homo ol Ameriko, ĉar ne ĉiuj homoj iras Amerikon, sed ĉiuj senescepte iras la mondon de la Spiritoj, farante senĉesajn migradojn de unu al la alia.

Atinginte la punkton, kie ni troviĝas rilate al la Genezo, materialismo haltas, dum Spiritismo pluigas siajn esplorojn sur la kampo de la *spirita Genezo*.

ĈAPITRO XI

SPIRITA GENEZO

Spirita principo. – Kuniĝo de la spirita principo kun la materio.
Hipotezo pri la origino de la homa korpo. – Enkarniĝo de la Spiritoj.
Reenkarniĝoj. – Elmigradoj kaj enmigradoj de la Spiritoj.
Adama raso. – Doktrino de la falintaj anĝeloj.

Spirita principo

1. – La ekzisto de la spirita principo estas fakto, kiu, por tiel diri, jam ne bezonas demonstiron, same kiel la principo materia; ĝi iel estas aksioma veraĵo, kiu pruviĝas per siaj efikoj, same kiel la materio per la siaj.

Laŭ ĉi tiu principo: “ĉar ĉiu efiko havas kaŭzon, tial ĉiu inteligenta efiko nepre havas inteligentan kaŭzon”, ekzistas ja neniuj, kiu ne farus distingon inter la mekanika movo de sonorilo svingata de la vento kaj la movo de tiu sama sonorilo kiel signalo, avizo, kio per tio sola atestas ies penson, ies intencon. Nu, ĉar al neniuj venus la ideo atribui pensokapablon al la sonorila materio, oni nepre devas konkludi, ke ĝin movas iu intelekto, al kiu ĝi servas kiel instrumento por ties manifestiĝo.

Samkiale, neniu havos la ideon atribui pensokapablon al la korpo de mortinta homo. Se do la vivanta homo pensas, tio estas tial, ke en li troviĝas io, kio ne plu troviĝas kiam li estas mortinta. La diferenco inter li kaj la sonorilo kuŝas en tio, ke la intelekto, kiu igas ĉi tiun moviĝi, troviĝas ekster ĝi, dum tiu, kiu movas la homon, troviĝas en li mem.

2. – La spirita principo estas korolario de la ekzistado de Dio; sen tiu principo, al Dio ne estus pravo de ekzisto, ĉar oni ne povus kompreni la superegan intelekton poreterne reĝanta sole nur super la kruda materio, iun surteran monarkon reĝanta dum sia tuta vivo ekskluzive super ŝtonoj. Oni ne povas koncepti Dion sen la esencaj atributoj de la Diaĵo, nome la justeco kaj la boneco, ĉar tiaj ecoj senutilus se ili devus efiki sole nur sur la materion.

3. – Aliflanke, oni ne povus kompreni iun Dion superege justan kaj bonan, kreanta inteligentajn kaj sentivajn estaĵojn por ilin ĵeti en la nenion post kelkaj tagoj de senkompensa suferado, plezuranta ĉe la vido de tiu senfina sinsekvo de estaĵoj, kiuj naskiĝas ĝin ne petinte, momente pensas por nur sperti doloron kaj por ĉiam estingiĝas post efemera ekzistado.

Sen la postvivo de la pensanta estaĵo, la suferoj dum la vivo ja estus, flanke de Dio, ia sencela kruelaĵo. Jen kial materialismo kaj ateismo estas korolarioj, unu de la alia; neante la kaŭzojn, ili ne povas agnoski la efikon; neante la efikon, ili ne povas agnoski la kaŭzon. Materialismo estas do konsekvenca kun si mem, kvankam ne konsekvenca kun la racio.

4. – La ideo pri la senmorteco de la spirita estaĵo estas denaska en la homo; ĝi troviĝas en li en la formo de intuicio

kaj aspiro. Li komprenas, ke nur tie sidas la kompenso al la mizeraĵoj de la vivo. Jen kial ĉiam estis kaj estos pli da spiritualistoj ol da materialistoj, pli da teistoj ol da ateistoj.

Al la intuicia ideo kaj al la potenco de la rezonado Spiritismo aligas la sankcion de l' faktoj, la materialan pruvon pri la ekzisto de la spirita estaĵo, de ties postvivo, de ties senmorteco kaj de ties individueco. Ĝi precizigas kaj difinas tion, kio estis svaga kaj abstrakta en tiu ideo. Ĝi montras la inteligentan estaĵon aganta ekster la materio, tiel dum kiel ankaŭ post la korpa vivo.

5. – Ĉu la spirita principo kaj la vivoprinĉipo estas unu sola kaj sama afero?

Deirante, kiel ĉiam, de la observado de l' faktoj, ni diras, ke ja estus ia motivo por ilin ambaŭ interkonfuzi, se la vivoprinĉipo estus neapartigebla disde la inteligenta principo. Sed tial, ke ja ekzistas estaĵoj, kiuj vivas sed ne pensas, kiel la plantoj; ke estas homaj korpoj ankoraŭ animataj de organa vivo dum en ili montriĝas jam nenia manifestiĝo de la penso; ke en la viva estaĵo ekestas vitalaj movoj nedependaj de ia ajn volado; ke dum la dormo la organa vivo plene aktivas, dum la intelekta vivo ne manifestiĝas per ia ajn ekstera signo, do praviĝas la agnosko, ke la organa vivo sidas en ia principo esence propra al la materio, nedependa de la spirita vivo, kiu estas esence propra al la Spirito. Nu, se la vivipoveco de la materio ne dependas de la Spirito, kaj la vivipoveco de la Spirito ne dependas de la materio, evidentas do, ke tiu duobla vivipoveco sidas en du malsamaj principoj. (Ĉap. X, n-roj 16 ĝis 19.)

6. – Ĉu la spirita principo havas kiel fonton la universan kosman elementon? Ĉu ĝi estas nura transformiĝo, ia modalo de tiu elemento, kiel la lumo, la elektro, la varmo, ktp?

Se tiel estus, la spirita principo suferus la ŝanĝojn de la materio; estingiĝus pro la malagregiĝo, kiel la vivoprincipo; la inteligenta estaĵo havus nur momentan ekzistadon, kiel la korpo, kaj okaze de la morto ĝi revenus en la nenion, aŭ, kio estus la samo, en la universan tutajn. Tio estus, unuvorte, la sankcio de la materialismaj doktrinoj.

La proprecoj *sui generis*, kiujn oni agnoskas ĉe la spirita principo, pruvas, ke ĝi havas propran ekziston, ĉar, se ĝia origino kuŝus en la materio, ĝi ne havus tiujn proprecojn. Ĉar inteligento kaj penso ne povas esti atributoj de la materio, oni venas al la konkludo, irante de la efikoj al la kaŭzo, ke la materia elemento kaj la spirita elemento estas du konsistaj principoj de la Universo. La individuigita spirita elemento konsistigas la estaĵojn nomatajn *Spiritoj*, kaj la individuigita materia elemento konsistigas la malsamajn korpojn de la Naturo, organajn kaj neorganajn.

7. – Ĉe la agnosko de la spirita estaĵo, kiu ja ne povas fonto el la materio, kio do estas ĝia origino, ĝia deirpunkto?

Ĉi tie absolute mankas la rimedoj de esplorado, same kiel por ĉio koncernanta la originon de la ekzistaĵoj. La homo povas konstati nur tion ekzistantan; pri ĉio cetera li povas nur formuli hipotezojn, kaj, ĉu pro tio, ke tiu scio restas neatingebla por lia nuna inteligento, ĉu pro tio, ke ĝi nuntempe estus al li neutila aŭ malutila, Dio al li ne malkaŝas ĝin, eĉ ne per la revelacio.

Kion Dio al li sciigas per siaj kurieroj, kaj kion cetere la homo mem povas dedukti el la principo de la suverena justeco, esenca atributo de la Diaĵo, tio estas, ke ĉiuj havas

unu saman deirpunkton; ke ĉiuj estas kreitaj simplaj kaj senciaj kun egala kapableco por progresi per sia individua agado; ke ĉiuj atingos la plej altan gradon de perfekteco per siaj personaj klopodoj; ke ĉiuj, estante filoj de la sama Patro, estas objektoj de sama zorgo; ke neniu estas pli favorata aŭ pli bone dotita ol la aliaj, nek sendevigita el la laboro trudita al la ceteraj por atingi la celon.

8. – Samtempe kiel li kreis materiajn mondojn de la tuta eterneco, Dio ankaŭ kreis spiritajn estaĵojn de la tuta eterneco: se ne tiel estus, la materiaj mondoj havus nenian celon. Oni prefere konceptus la spiritajn estaĵojn sen materiaj mondoj, ol ĉi tiuj sen la spiritaj estaĵoj. Ja la materiaj mondoj devas liveri al la spiritaj estaĵoj elementojn de aktiveco por la disvolviĝo de ties intelekto.

9. – Progresado estas la normala kondiĉo de la spiritaj estaĵoj, kaj la relativa perfekteco estas la celo, kiun ili devas atingi. Nu, ĉar Dio kreis de la tuta eterneco kaj ja senĉese kreas, ankaŭ de la tuta eterneco ekzistas estaĵoj, kiuj atingis la kulminon de la skalo.

Antaŭ ol la Tero ekzistis, mondoj sinsekve aperis, unuj post aliaj, kaj kiam la Tero eliris el la kaoso de la elementoj, la spaco estis loĝata de spiritaj estaĵoj en ĉiuj gradoj de disvolviĝo, ekde tiuj ĵus naskiĝintaj por la vivo ĝis tiuj, kiuj de la tuta eterneco rangis kiel puraj Spiritoj, vulgare nomataj anĝeloj.

Kuniĝo de la spirita principo kun la materio

10. – Ĉar la materio devas servi al la Spirito kiel objekto de lia prilaboro, cele al la disvolviĝo de liaj kapabloj, necesas, ke li povu agi sur ĝin. Ja tial li venis loĝi en ĝi, kiel la lignoha-

kisto loĝas en la arbaro. Kaj ĉar la materio devis samtempe esti objekto kaj instrumento de laboro, Dio, anstataŭ kunigi la Spiriton kun la rigida ŝtono, kreis, por lia uzado, korpojn organizitajn, flekseblajn, kapablajn ricevi la impulsojn de lia volo kaj plenumi ĉiujn liajn movojn.

La korpo estas do samtempe la envolaĵo kaj la instrumento de la Spirito, kaj laŭmezure kiel li akiras novajn kapablojn, li sin vestas per envolaĵo adekvata al la nova speco de laboro, kiun li devas plenumi, same kiel oni liveras al laboristo malpli krudan instrumenton, laŭgrade kiel li kapablas fari pli rafinitan laboron.

11. – Por esti pli preciza, necesas diri, ke la Spirito mem formas sian envolaĵon kaj ĝin adaptas al siaj novaj bezonoj; li ĝin perfektigas kaj al ĝi disvolvas kaj kompletigas la organismon, laŭgrade kiel li spertas la bezonon manifesti siajn novajn kapablojn; unuvorte, li ĝin alfaras laŭ sia intelekto. Dio al li liveras la koncernajn materialojn: lin koncernas ilia utiligo. Ja tial la progresintaj rasoj havas organismon, aŭ se oni preferas, cerban aparaton pli perfektan ol tiu de la primitivaj rasoj. Ankaŭ tial klariĝas la speciala stampo, kiun la karaktero de la Spirito donas al la fizionomiaj trajtoj kaj al la korpaj teniĝoj. (Ĉap. VIII, n-ro 7: *Animo de la Tero.*)

12. – Naskiĝinte por la spirita vivo, la Spirito devas, por progresi, uzi siajn komence rudimentajn kapablojn; jen kial li surmetas envolaĵon adekvatan al sia stato de intelekta infaneco, kiun envolaĵon li forlasas por surmeti alian, laŭgrade kiel kreskas liaj fortoj. Nu, ĉar en ĉiuj tempoj ekzistis mondoj, kaj tiuj mondoj ebligis la naskiĝon de organizitaj korpoj taŭgaj por loĝigi Spiritojn, en ĉiuj tempoj la Spiritoj, kia

ajn la grado de ilia progreso, trovis la elementojn necesajn al sia enkarna vivo.

13. – Estante ekskluzive materia, la korpo suferas la ŝanĝojn de la materio. Post kelkatempa funkciado ĝi malorganiziĝas kaj malkomponiĝas. Ne plu disponante elementojn por sia aktiveco, la vivoprincipo estingiĝas kaj la korpo mortas. La Spirito, por kiu la korpo senigita je la vivo estas de nun senutila, ĝin forlasas, kiel oni forlasas ruiniĝintan domon aŭ sentaŭgan vestaĵon.

14. – La korpo do estas nenio alia ol envolvaĵo destinita enloĝigi la Spiriton. Ĉe ĉi tiu punkto, malmulte gravas ĝia origino kaj la materialoj, el kiuj ĝi estas farita. Ĉu la homa korpo estas, aŭ ne, ia speciala kreaĵo, tio tamen ne malpli veras, nome ke ĝi konsistas el la samaj elementoj kiel tiu de la bestoj, ke ĝin animas la sama vivoprincipo, aŭ, alivorte, ĝin varmigas la sama fajro, same kiel ĝi estas prilumata de la sama lumo kaj submetita al la samaj sortoŝanĝoj kaj bezonoj: jen tute ne kontestebla afero.

Se oni konsideras nur la materion, abstraktante la Spiriton, la homo havas nenion, kio lin distingas de la besto. Ĉio tamen ŝanĝiĝas, se oni faras distingon inter la *loĝejo* kaj la *loĝanto*. Ĉu li troviĝas en kabano, ĉu li estas vestita kiel kampulo, nobela sinjoro tute ne ĉesas esti nobela sinjoro. La samo okazas rilate al la homo: ne lia karna vesto lin lokas super la bruto kaj faras el li apartan estaĵon, sed ja lia spirito esto, lia Spirito.

Hipotezo pri la origino de la homa korpo

15. – El la simileco, laŭ eksteraj formoj, ekzistanta inter la korpo de homo kaj tiu de simio, kelkaj fiziologoj konkludis, ke la unua estas nura transformiĝo de la dua. Neniel neebla estas tio, kaj, se ja tiel estas, ĝi tute ne ofendas la homan dignon. Tre povas esti, ke simiaj korpoj servis kiel vestaĵo al tiuj homaj Spiritoj, ja ankoraŭ nepre malpli progresintaj, kiuj la unuaj enkarniĝis sur la Tero; kaj tiu vestaĵo estis pli konforma al iliaj bezonoj kaj pli adekvata al la utiligo de iliaj kapabloj, ol la korpo de iu ajn alia besto. Anstataŭ tio, ke speciala vestaĵo estus farita por la Spirito, ĉi tiu estus trovinta unu jam tute pretan. Li do povis surmeti la simian haŭton, ne ĉesante esti homa Spirito, same kiel la homo iafoje sin vestas per la haŭto de certaj bestoj, ne ĉesante esti homo.

Oni bone komprenu, ke ĉi tie temas ja pri hipotezo tute ne metita kiel principo, sed prezentita nur por montri, ke la origino de la korpo neniel malaltigas la Spiriton, kiu ja estas la ĉefa estaĵo; kaj ke la simileco inter la homa korpo kaj tiu de la simio ne implicas egalecon inter lia Spirito kaj tiu de la simio.

16. – Akceptinte tiun ĉi hipotezon, oni povas diri, ke sub la influo kaj pro la efiko de la intelekta aktiveco de sia nova loĝanto, la envolvaĵo aliĝis, plibeliĝis laŭ la detaloj, tamen konservante la formon de la tutaĵo (n-ro 11). Plibonigite, la korpoj, pro la generado, reproduktiĝis en la samaj kondiĉoj kiel ĉe greftitaj arboj. Ili naskis novan specion, kiu iom post iom diferenciĝis de la primitiva tipo laŭgrade kiel la Spirito progresis. La simia Spirito, kiu ne estis estingita, daŭre generis simiajn korpojn por sia uzado, same kiel la frukto de sovaĝa arbo reproduktas sovaĝajn arbojn, kaj la homa Spirito generis

homajn korpojn, variaĵojn de la unua muldilo, en kiu li enloĝiĝis. La trunko disduiĝis, produktis branĉon, kiu siavice fariĝis trunko.

Ĉar ne estas abruptaj transiĝoj en la Naturo, verŝajne la homoj, kiuj la unuaj aperis sur la Tero, malmulte diferencis de la simio laŭ la eksterajo krom ankaŭ laŭ la intelekto. Nuntempe ankoraŭ estas sovaĝuloj, kiuj, pro la longeco de la brakoj kaj piedoj, krom ankaŭ pro la formo de la kapo, havas trajtojn tiel similajn al tiuj de la simio, ke al ili mankas nur esti vilaj por la plena simileco.

Enkarniĝo de la Spirito

17. – Spiritismo malkaŝas, kiamaniere fariĝas la kuniĝo de la Spirito kun la korpo ĉe la enkarniĝo.

Pro sia spirita esenco, la Spirito estas estaĵo nedefinita, abstrakta, kiu ne povas rekte agi sur la materion; li bezonas ian perilon; tiu perilo estas la fluideca envolvaĵo, kiu iel apartenas al li kiel konsista parto. Tiu envolvaĵo estas duonmateria, tio estas, ĝi apartenas al la materio pro sia origino kaj al la spirita principo pro sia etereca naturo. Kiel ĉia materio, ĝi estas variaĵo de la universa kosma fluido, kiu ĉi-rilate akceptas specialan modifon. Tiu envolvaĵo, nomata *perispirito*, faras el abstrakta estaĵo, el la Spirito, ian estaĵon konkretan, difinitan, ĉirkaŭpreneblan por la penso kaj povantan agi sur la palpeblan materion, same kiel okazas al ĉiuj nepeseblaj fluidoj, kiuj, kiel sciate, estas la plej potencaj motoroj.

La perispirita fluido estas do la ligilo inter la Spirito kaj la materio. Dum ĝia ligiteco kun la korpo, ĝi servas kiel komunikilo al lia penso por transsendi la movon al la diversaj partoj de la organismo, kiuj agas sub la impulsado de lia volo, krom ankaŭ por igi la sensacojn produktitajn de eksteraj

agantoj refrapi en la Spirito. Al ĝi servas kiel kondukfadenoj la nervoj, same kiel, ĉe la telegrafo, la metalfadeno servas kiel konduktilo al la elektra fluido.

18. – Kiam la Spirito devas enkarniĝi en formiĝantan korpon, iu fluideca ligilo, kiu estas nenio alia ol plietendiĝo de lia perispirito, ligas lin al la ĝermo, al kiu li estas altirata, per nekontraŭstarebla forto, ekde la momento de la koncipio. Laŭmezure kiel la ĝermo disvolviĝas, la ligilo kuntiriĝas. Sub la influo de la *vital-materia principo de la ĝermo*, la perispirito, kiu havas kelkajn proprecojn de la materio, kuniĝas, *molekulo post molekulo*, kun la formiĝanta korpo, pro kio oni povas aserti, ke la Spirito, pere de sia perispirito, iel *enradikiĝas* en tiu ĝermo, same kiel planto en la tero. Kiam la ĝermo atingas sian plenan disvolvitecon, la kuniĝo estas kompleta kaj la estaĵo naskiĝas por la ekstera vivo.

Pro kontraŭa efiko, la kuniĝo de la perispirito kun la karna materio, kiu efektiviĝis sub la influo de la vivoprincipo ekzistanta en la ĝermo, ĉesas post kiam tiu principo ne plu agas kaŭze de la malorganizigo de la korpo. Kaj tiu kuniĝo, kiu estis tenata de aganta forto, rompiĝas tuj post kiam ĉesas la agado de tiu forto. Tiam la perispirito disiĝas, *molekulo post molekulo*, tute same kiel ĝi kuniĝis, kaj al la Spirito estas redonita la libereco. Tiel, *ne la foriro de la Spirito kaŭzas la morton de la korpo, sed ja ĉi tiu kaŭzas la foriron de la Spirito*.

Ĉar, tuj post la morto, plena estas la integreco de la Spirito, kaj ĉar tiam liaj fakultoj akiras eĉ pli grandan akrecon, dum la vivoprincipo jam estingiĝis en la korpo, restas evidente pruvita, ke la vivoprincipo kaj la spirita principo ja estas du inter si diferencaj aferoj.

19. – Spiritismo, per la faktoj, kiujn ĝi ebligas observi, konigas al ni la fenomenojn akompanantajn tiun disiĝon, kiu en iuj okazoj estas rapida, facila, milda kaj nesentebla, kaj en aliaj okazoj estas malrapida, malfacila, terure penega, laŭ la morala stato de la Spirito, kaj povanta daŭri tutajn monatojn.

20. – Aparta fenomeno, ankaŭ registrita de la observado, ĉiam akompanas la enkarniĝon de la Spirito. De la momento, kiam li estas kaptita de la fluideca ligilo lin katenanta al la ĝermo, perturbo lin ekposedas, kaj tiu perturbo kreskas laŭgrade kiel streĉiĝas la ligilo. En la lastaj momentoj, la Spirito tute perdas la konscion pri si mem, en tia maniero, ke li neniam estas atestanto pri sia naskiĝo. Kiam la infano ekspiras, la Spirito komencas reakiri siajn fakultojn, kiuj disvolviĝas laŭgrade kiel formiĝas kaj plene elvolviĝas la organoj, kiuj devos servi al liaj manifestiĝoj.

21. – Sed, samtempe kiel la Spirito reakiras la konscion pri si mem, li perdas la memoron pri sia pasinteco, sen perdi siajn fakultojn, la kvalitojn kaj la kapablojn antaŭe akiritajn, kiuj kapabloj dumtempe restis en latentaj stato kaj kiuj, reaktivigante, lin helpas fari pli multe aŭ pli bone, ol kiel li antaŭe faris. Li renaskiĝas tia, kia li sin mem faris per sia antaŭa laborado; tio estas por li ia nova deirpunkto, nova ascendota ŝtupo. Ankoraŭ ĉi tie manifestiĝas la boneco de la Kreinto, ĉar la memoro pri ia ofte aflikta aŭ humiliga pasinteco, aldoniĝante al la amaraĵoj de lia nova ekzistado, povus lin maltrankviligi kaj malhelpi. Li nur rememoras, kion li lernis, ĉar tio estas al li utila. Se li iaforte konservas svagan intuicion pri la pasintaj okazaĵoj, ĉi tiu aperas kvazaŭ la memoro pri forpasanta sonĝobildo. Tio estas do nova homo, kiel ajn maljuna estas lia Spirito. Helpate de siaj pasintaj akiroj, li alprenas novajn

procedojn. Reveninte al la spirita vivo, li vidas sian pasintecon malvolviĝi antaŭ liaj okuloj kaj li juĝas, ĉu li bone aŭ malbone uzis sian tempon.

22. – Ne estas do rompo de kontinueco en la spirita vivo malgraŭ la forgeso pri la pasinteco. La Spirito ĉiam estas *li mem* antaŭ, dum kaj post la enkarniĝo, kaj ĉi tiu estas nur ia speciala etapo de lia ekzistado. Tiu forgeso okazas ja nur dum la ekstera vivo de interrilato. Dum la dormo, parte liberiĝinte de la karnaj ligiloj kaj redonite al la libereco kaj al la spirita vivo, la Spirito rememoras, ĉar lia vidado ne estas tiel forte nebuligita de la materio.

23. – Konsiderante la homaron en la plej malalta grado de la intelekta skalo, kiel ĉe la malplej progresintaj sovaĝuloj, oni al si demandas, ĉu tie troviĝas la deirpunkto de la homa animo.

Laŭ la opinio de kelkaj spiritualistaj filozofoj, la intelekta principo, diferenca de la principo materia, individuigiĝas kaj ellaboriĝas, trapasante la diversajn gradojn de la besta naturo. Ĝuste tie la animo prepariĝas por la vivo kaj disvolvas, per ekzercado, siajn unuajn fakultojn. Tio prezentus, por tiel diri, ĝian tempon de elkoviĝo. Veninte al la grado de disvolviĝo, kiun ĉi tiu stato akceptas, ĝi ricevas tiujn specialajn fakultojn, kiuj karakterizas la homan animon. Laŭ tio, estus devenrilato spirita inter la besto kaj la homo, same kiel inter ili estas devenrilato korpa.

Tiu sistemo, bazita sur la granda leĝo de unueco direktanta la kreadon, estas konforma, oni nepre konfesu, al la justeco kaj al la boneco de la Kreinto; ĝi donas ian perspektivon, ian celon, ian destinon al la bestoj, kiuj tiel ĉesas esti malfavoritoj kaj ja trovas, en la al ili rezervita estonteco,

kompenson al siaj suferoj. La esenco de la spirita homo kuŝas ne en lia origino, sed ja en la specialaj atributoj, per kiuj li estas dotita ĉe sia eniro en la homan stadion, kiuj atributoj lin transformas kaj el li faras apartan estaĵon, same kiel la bongusta frukto diferencas de la amara radiko, de kiu ĝi devenis. Pro tio, ke li trapasis la bestan vicon, la homo ne ĉesus esti homo; li jam ne estas besto, same kiel la frukto ne estas radiko, la saĝulo ne estas la senforma feto, per kiu li debutis en la mondo.

Sed tiu sistemo elmovas multenombrajn demandojn, kies por kaj kontraŭ estas neoportune ĉi tie pridiskuti, same kiel neoportuna estas la ekzameno de la diversaj hipotezoj formulitaj pri tiu temo. Ne esplorante do pri la origino de la animo, nek pri la vicoj, kiujn ĝi trapasis, ni ĝin prenas ĉe *ĝia eniro en la homan stadion*, de la punkto kie ĝi, jam dotita per morala sento kaj libera volo, komencas respondi pri siaj agoj.

24. – La devo de la enkarniĝinta Spirito zorgi pri la nutrado de sia korpo, pri sia sekureco, pri sia bonstato, devigas lin apliki siajn fakultojn al esploroj, ilin ekzerci kaj disvolvi. Lia kuniĝo kun la materio estas do utila al lia progreso; jen kial *la enkarniĝo estas ia neceso*. Krom tio, per la intelekta laboro, kiun li, por sia profito, plenumas super la materio, li kunhelpas por la transformiĝo kaj materiala progreso de la globo, kie li loĝas. Tiel, progresante, li kunlaboras en la verko de la Kreinto, kiel nekonscia aganto.

25. – Sed la enkarniĝo de la Spirito estas nek konstanta nek porĉiama; ja nur provizora. Forlasinte unu korpon, li ne tuj reprenas alian. Dum pli aŭ malpli longa tempo, li vivas la spiritan vivon, kiu ja estas lia normala vivo; tiel, la entuta

daŭro de liaj enkarniĝoj tre mallongas kompare kun la tempo de lia vivo en la stato de libera Spirito.

En la intertempo de siaj enkarniĝoj, la Spirito ankaŭ progresas en tiu senco, ke li, por antaŭeniĝi, praktikas la sciojn kaj spertojn akiritajn dum la enkorpora vivo; li ekzamenas, kion li faris dum sia surtera migrado, revuas, kion li lernis, rekonas siajn erarojn, skizas siajn planojn kaj prenas decidojn, laŭ kiuj li esperas sin gvidi en nova ekzistado, celante pli bone konduti. Tiel, ĉiu ekzistado ja estas antaŭenpaŝo sur la vojo de l' progreso, iaspeca lernejo por praktikado.

26. – La enkarniĝoj ne estas ordinare, kiel pensas kelkaj personoj, ia puno por la Spirito, sed ja ia kondiĉo konforma al la malsupereco de la Spirito, krom ankaŭ ia rimedo por progresi. (*La Ĉielo kaj la Infero*, ĉap. III, n-ro 8 kaj sekvantaj).

Laŭmezure kiel li morale progresas, la Spirito senmateriiĝas, tio estas, liberiĝante de la influo de la materio, li elpuriĝas; lia vivo pli konformiĝas al la spirita naturo, liaj fakultoj kaj perceptoj ampleksiĝas; estas proporcio inter lia feliĉo kaj la farita progreso. Sed ĉar li agas laŭ sia libervolo, li povas, pro neglekto aŭ malvolonto, malrapidigi sian progreson; kaŭze de tio, li plilongigas la daŭron de siaj materialaj enkarniĝoj, kiuj tiam fariĝas al li ia puno, ĉar pro sia kulpo li restas en la malsupraj rangoj, devigita rekomenci la saman taskon. Dependas do de la Spirito mallongigi, per sia penado por elpuriĝi, la entutan tempon de la enkarniĝoj.

27. – La materiala progreso de iu ĝlombo akompanas la moralan progreson de ties loĝantoj. Nu, ĉar estas senĉesa la kreado de mondoj kaj Spiritoj kaj ĉar ĉi tiuj progresas pli aŭ malpli rapide laŭ sia libera volo, el tio rezultas, ke estas mondoj pli aŭ malpli malnovaj, en malsamaj gradoj de

progreso, fizika aŭ morala, en kiuj la enkarniĝo estas pli aŭ malpli materia, kaj kie, pro tio, la laboro por la Spiritoj estas pli aŭ malpli kruda. El tiu vidpunkto, la Tero estas unu el tiuj malplej progresintaj. Loĝata de Spiritoj relative malsuperaj, sur ĝi la korpa vivo estas pli peniga ol en aliaj mondoj, sed ankaŭ ekzistas aliaj malpli progresintaj, en kiuj la vivo estas ankoraŭ pli peniga ol sur la Tero kaj kompare kun kiuj la nia ja estus mondo relative feliĉa.

28. – Kiam, en unu mondo, la Spiritoj estas akirintaj la tutan progreson, kiun akceptas la stato de tiu mondo, ili ĝin forlasas por enkarniĝi en alia pli progresinta, kie ili akiru novajn sciojn, kaj tiel plu ĝis tiam, kiam, pro la fakto ke enkarniĝo en materia korpo jam portas al ili nenian utilon, ili vivas nur la spiritan vivon, en kiu ili ankoraŭ progresas sed en alia senco kaj per aliaj rimedoj. Atinginte la kulminon de la progreso, ili ĝuas la superegan feliĉon. Enlasite en la konsiliĝojn de la ĉiopova, ili ekkonas lian penson kaj fariĝas liaj kurieroj, liaj senperaj ministroj en la regado de l' mondoj, havante sub sia ordonpovo ĉiujn Spiritojn en ĉiuj malsamaj gradoj de progreso.

Tiel, kia ajn estas ilia grado en la spirita hierarkio, de la plej malsupera ĝis la plej altranga, ĉiuj Spiritoj, enkarniĝintaj aŭ elkarniĝintaj, havas siajn komisionojn en la granda universa mekanismo; ĉiuj estas utilaj, tiel al la tuto kiel al si mem. Al la malpli progresintaj, kvazaŭ al simplaj servistoj, koncernas la plenumo de ia materiala tasko, komence nekonscie kaj poste ĉiam pli kaj pli inteligente. Ĉie, en la spirita mondo, la aktiveco, nenie la senutila senfareco.

La tutaĵo de la Spiritoj iasence konsistigas la animon de la Universo. Kio agas ĉie kaj en ĉio, tio estas la spirita elemento sub la impulsado de la dia penso. Sen tiu elemento, estas

nur la inerta materio, sencela, seninteligenta, sen alia motoro krom la materiaj fortoj, kies unusoleco lasas nesolveblaj grandegan nombron da problemoj. Per la agado de la *individuigita* spirita elemento, ĉio havas ian celon, ian pravon de ekzisto, ĉio klariĝas. Sen la spirita elemento, oni albatigias al nesupereblaj malfacilaĵoj.

29. – Kiam la Tero sin trovis en la klimataj kondiĉoj taŭgaj por la ekzistado de la homa specio, la homaj Spiritoj enkarniĝis sur ĝi. De kie ili venis? Ĉu ili estis kreitaj ĝuste en tiu tempo, ĉu ili devenis, tute elformitaj, de la spaco, de la Tero mem, aŭ de aliaj mondoj, ilia ĉeesto sur ĝi, ekde difinita epoko, ja estas fakto, ĉar antaŭ ili ekzistis nur bestoj. Ili surmetis korpojn adekvatajn al siaj specialaj bezonoj, al siaj kapablecoj, kiuj korpoj fiziologie havis la bestan naturon. Sub ilia influo kaj per la ekzercado de iliaj fakultoj, tiuj korpoj suferis modifojn kaj perfektigiĝis: tion ja pruvas la observado. Ni do lasu flanke la demandon pri la origino, ankoraŭ nun nesolveblan; ni prenu la Spiriton ne ĉe lia deirpunkto, sed en la momento, kiam, pro la manifestiĝo en li de la unuaj ĝermoj de la libervolo kaj de la morala sento, ni lin vidas ludanta sian homan rolon, tute ne zorgante pri la medio kie li trapasis sian tempon de infaneco, aŭ, se oni preferas, de embriiĝo. Malgraŭ la analogeco inter lia korpo kaj tiu de la bestoj, ni povas lin diferencigi disde ĉi tiuj per la lin karakterizantaj fakultoj, intelektaj kaj moralaj, same kiel ni povas distingi, sub samaj krudaj vestoj, sovaĝulon disde civilizito.

30. – Kvankam tiuj, venintaj la unuaj, devis ja esti malmulte progresintaj, pro la fakto mem ke ili devis enkarniĝi en tre malperfektaj korpoj, tamen certe ekzistis palpeblaj diferencoj inter iliaj karakteroj kaj kapabloj. La Spiritoj similaj

inter si nature grupiĝis pro analogeco kaj simpatio. Tiel la Tero loĝatiĝis per diversklasaj Spiritoj, pli aŭ malpli inklinaj aŭ malemaj al progreso. Ĉar la korpoj estis stampitaj per la karaktero de la Spirito kaj reproduktiĝis laŭ siaj respektivaj tipoj, el tio rezultis la malsamaj rasoj, ĉu el la vidpunkto fizika, ĉu el tiu morala (n-ro 11). Daŭre kaj prefere enkarniĝante inter siaj similuloj, la Spiritoj similaj inter si ĉiamigis la distingiĝan karakteron, fizikan kaj moralan, de la rasoj kaj de la popoloj, kiu karaktero malaperas nur kun la tempopaso, per ilia progreso kaj kunfandiĝo. (*Revue Spirite*, julio 1860, paĝo 198: “Frenologio kaj fiziognomiko”).

31. – Oni povas kompari la Spiritojn, kiuj venis loĝatigi la Teron, kun tiuj bandoj da diversoriginaj migruloj, kiuj iras por ekloĝi virgan teron. Tie ili trovas lignon kaj ŝtonon por konstrui siajn loĝejojn, kaj ĉiu donas al la sia ian specialan stampon konforman al la grado de sia sciado kaj al sia propra talento. Tiam ili formas grupojn laŭ analogeco de originoj kaj gustoj, kaj tiuj grupoj fine formas tribojn, poste popolojn, el kiuj ĉiu havas proprajn karakteron kaj morojn.

32. – Ne estis do unuforma la progreso en la tuta homa specio. La pli inteligentaj rasoj memkompreneble antaŭeniris la ceterajn, sen paroli pri tio, ke Spiritoj ĵus naskitaj por la spirita vivo, enkarniĝinte sur la Tero kune kun tiuj venintaj la unuaj sur ĝi, faris ankoraŭ pli sentebla la diferencon pri progreso. Estus ja neeble atribui saman malnovecon, koncerne la kreadon, al la sovaĝuloj, apenaŭ distingiĝantaj disde la simio, kaj al la ĉinoj, kaj ankoraŭ des malpli al la civilizitaj eŭropanoj.

Tamen la Spiritoj de la sovaĝuloj ankaŭ apartenas al la homaro kaj iam atingos la nivelon de siaj pli maljunaj fratoj,

kio nepre ne okazos en korpoj de la sama fizika raso, netaŭgaj por certa disvolviteco intelekta kaj morala. Kiam la instrumento ne plu estos responde al ilia progreso, ili formigros el tiu medio por enkarniĝi en pli alta ŝtupo, kaj tiel plu, ĝis ili estos konkerintaj ĉiujn surterajn gradojn, post kio ili forlasos la Teron por transiri en pli progresintajn mondojn. (*Revue Spirite*, Aprilo 1862, p. 97: “Perfektigebleco de la nigra raso”.)

Reenkarniĝoj

33. – La principo de reenkarnejo estas nepra sekvo de la leĝo de progreso. Kiel klarigi, sen la reenkarnejo, la diferencon ekzistantan inter la nuntempa socia stato kaj tiu en la tempoj de barbareco? Se la animoj estas kreataj samtempe kiel la korpoj, tiuj nune naskitaj estas tiel novaj, tiel primitivaj kiel tiuj vivintaj antaŭ mil jaroj; ni krome rimarkigu, ke inter ili ekzistus nenia ligiteco, nenia necesa rilato; ke ili estus tute fremdaj, unuj al la aliaj. Kial do la nuntempajn animojn Dio pli bone dotus, ol tiujn, kiuj ilin antaŭvenis? Kial la unuaj havas pli bonan komprenpovon? Kial ili havas pli elpuriĝintajn instinktojn, pli mildajn kutimojn? Kial ili havas intuician konon pri certaj aferoj, ilin ne antaŭe lerninte? Ni defias iun ajn elturni sin el tiuj demandoj, krom se per la akcepto, ke Dio kreas animojn diverskvalitajn laŭ la tempoj kaj la lokoj, kio estus neakordigebla kun la ideo pri superega justeco. (Ĉap. II, n-ro 14.)

Diru, male, ke la nuntempaj animoj jam vivis en foraj epokoj; ke ili ankaŭ estis barbaraj konforme al siatempa jarcento sed ja progresis; ke al ĉiu nova ekzistado ili portas tion, kion ili akiris en pasintaj ekzistadoj; ke, pro tio, la animoj de la civilizitaj epokoj ne estis kreitaj pli perfektaj sed ja sin mem perfektigis kun la tempo, kaj vi havigos la solan akcepte-

blan klarigon pri la kaŭzo de la socia progreso. (*La Libro de la Spiritoj*, 2-a Parto, ĉap. IV kaj V).

34. – Iuj pensas, ke la diversaj ekzistadoj de la animo vice efektiviĝas en malsamaj mondoj, unu post alia, ne en unu sola mondo, kien ĉiu Spirito venus unu solan fojon.

Tiu doktrino estus akceptebla, se nur ĉiuj loĝantoj de la Tero starus sur la sama nivelo, intelekta kaj morala. Tiel ili povus progresi, nur pasante de unu mondo en alian, kaj nenian utilon portus al ili la reenkarniĝo sur la Tero. Nu, Dio faras nenion senutilan. Se tie troviĝas ĉiuj gradoj de inteligenteco kaj moraleco, ekde la sovaĝeco randumanta la bestan naturon ĝis la plej progresinta civilizacio, ĝi do prezentas vastan kampon por progreso. Oni al si demandus, kial la sovaĝulo devus serĉi aliloke la tuj superan progresogradon, se tiu grado troviĝas apude, kaj tiel plu sinsekve? Kial la progresinta homo devus trapasi siajn unuajn etapojn nur en primitivaj mondoj, se ĉirkaŭ li troviĝas estuloj analogaj al la loĝantoj de tiaj mondoj? se oni ja trovas malsamajn gradojn de progreso, ne nur pasante de unu mondo en alian, sed en la sino de unu sama popolo, de unu sama familio? Se tiel estus, Dio estus farinta senutilan verkon, metante, unu apud la alia, sencion kaj scion, barbarecon kaj civilizacion, bonon kaj malbonon, dum ĝuste tia kontakto progresigas la malfruiĝemulojn.

Ne estas do necese, ke la homoj transloĝiĝu en alian mondon ĉe ĉiu progreso-etapo, same kiel ne necesas, ke lerneĵano forlasu sian lernejon ĉe ŝanĝo de klaso. Anstataŭ esti profita al lia progreso, tio ja estus malhelpo, ĉar la Spirito seniĝus ne nur je la ekzemplo, kiun li havigus al si per la vido de la superaj gradoj, sed ankaŭ je la ebleco ripari siajn erarojn en la medio mem, kie li ilin faris, kaj en la ĉeesto de tiuj, kiujn

li ofendis, kaj tiu ebleco estas por li la plej potenca rimedo efektiviĝi sian moralan progreson. Post mallonga kunloĝado, la Spiritoj nepre disiĝus, ja reciproke fremdiĝus, kaj la familio-ligiloj rompiĝus manke de tempo por solidiĝi.

Al la malbonaĵo morala aldoniĝus malbonaĵo materiala. La naturo de la elementoj, la organaj leĝoj, la kondiĉoj de ekzistado diversas laŭ la mondoj; en ĉi tiu rilato ne ekzistas du perfekte identaj. Niaj traktatoj pri Fiziko, Kemio, Anatomio, Medicino, Botaniko, ktp, neniel utilis en aliaj mondoj, sed tamen oni tute ne perdas, kion oni en ili lernas; tio ne nur disvolvas la intelekton sed la ideoj tie ĉerpitaj kunhelpas por akiro de novaj ideoj. (Ĉap. VI, n-roj 61 kaj sekvantaj.) Se la Spirito aperus en unu mondo nur unu fojon, ja ofte tre mallongan, ĉe ĉiu enmigro li troviĝus en tute malsamaj kondiĉoj; li ĉiufoje laborus super novaj elementoj, per fortoj kaj laŭ leĝoj al li nekonataj, ne havinte tempon por ellabori la konatajn elementojn, ilin studi kaj apliki. Ĉe ĉiu fojo li devus fari novan lernadon, kaj tiuj senĉesaj ŝanĝoj prezentus baron al la progreso. La Spirito devas do resti en la sama mondo tiel longe ĝis li estos akirinta la tutaĵon de scioj kaj la gradon de perfekteco eblajn en tiu mondo. (N-ro 31.)

La Spiritoj forlasas, celante iun pli progresintan, la mondon, en kiu ili povas jam nenion pli akiri: jen kio devas okazi kaj ja nepre okazas. Tia estas la principo. Se iuj Spiritoj tion faras antaŭtempe, sendube tiel okazas pro individuaj motivoj, kiujn Dio penas laŭ sia saĝo. Ĉio en la kreaĵaro havas ian celon, sen kio Dio estus nek prudenta nek saĝa. Nu, se la Tero devus prezenti okazon por unu sola etapo de la progreso de ĉiu individuo, kiel utilis al infanoj, mortintaj en tre frua aĝo, veni tien por pasigi kelke da jaroj, monatoj, horoj, dum kiuj ili povas nenion ĉerpi? Same okazus koncerne la idiotojn kaj la kretenojn. Teorio estas bona se nur ĝi solvas ĉiujn koncernajn

demandojn. La demando pri la tro fruaj mortoj montriĝas kiel ŝtono de falpuŝiĝo por ĉiuj doktrinoj krom por la Spiritisma Doktrino, kiu sola ĝin solvis racie kaj komplete.

Por la progreso de tiuj, kiuj sur la Tero plenumas normalan mision, estas reala avantaĝo reveni al la sama medio por tie daŭrigi la laboron, kiun ili lasis nefinita, ofte en la sama familio aŭ en rilatoj kun la samaj personoj, por ripari la malbonon, kiun ili faris, aŭ por suferi la egalan repunon.

Elmigradoj kaj enmigradoj de la Spiritoj

35. – En la intertempoj inter siaj enkorpaj ekzistadoj, la Spiritoj troviĝas en stato de vaganteco kaj konsistigas la spiritan loĝantaron ĉirkaŭan al la Tero. Per mortoj kaj naskiĝoj, ambaŭ loĝantaroj, surtera kaj spirita, senĉese enversiĝas, unu en la duan. Ĉiutage do estas migradoj, tiel el la korpa en la spiritan mondon, kiel ankaŭ el ĉi tiu en la korpan mondon: tia estas la normala stato.

36. – En certaj epokoj, laŭ decido de la dia saĝo, tiujn elmigradojn kaj enmigradojn partoprenas pli aŭ malpli grandaj amasoj, kaŭze de vastaj transformiĝoj, kiuj estigas ilian samtempan foriron en grandaj kvantoj, tuj kompensatan per samnombra kvanto da enkarniĝoj. Oni do rigardu detruajn plagojn kaj kataklimojn kiel okazajn de kolektivaj alveno kaj foriro, providencajn rimedojn por renovigo de la enkorpa loĝantaro de l' globo, por ĝia refreŝigo per enkonduko de novaj, pli purigitaj spiritaĵoj. Se, dum tiuj katastrofoj, detruigis granda nombro da korpoj, nenio alia ĝi estas krom *ia disŝiro de vestoj*, sed neniu Spirito pereas; ili nur translokiĝas en alian medion; anstataŭ foriri unuope, ili foriras multope, kaj

en ĉi tio kuŝas la sola diferenco, ĉar, ĉu pro unu kaŭzo, ĉu pro alia, ili ne malpli fatale, frue aŭ malfrue, devas foriri.

La rapidaj kaj preskaŭ subitaj renoviĝoj, kiuj efektiviĝas ĉe la spirita elemento de la loĝantaro kaŭze de la detruaj plagoj, akcelas la socian progreson; sen la elmigradoj kaj enmigraĵoj, kiuj de tempo al tempo al ĝi donas fortegan impulson, nur treege malrapide efektiviĝus tiu progreso.

Rimarkindas, ke ĉiuj grandaj plagoj, kiuj ekstermas la loĝantarojn, ĉiam estas sekvataj de ia tempo de progreso en la sferoj fizika, intelekta aŭ morala, sekve do en la socia stato de la landoj, kiuj ilin suferas. Tiel okazas, ĉar ili havas kiel celon estigi ian rearanĝon ĉe la spirita loĝantaro, kiu ja estas la normala kaj aktiva loĝantaro de la globo.

37. – Tiu reciproka transfluiĝo inter la loĝantaroj enkarneiginta kaj elkarneiginta de unu sama globo ankaŭ efektiviĝas inter la mondoj, ĉu individue laŭ la normalaj kondiĉoj, ĉu amase en specialaj cirkonstancoj. Estas do elmigradoj kaj enmigraĵoj kolektivaj de unu mondo al alia, el kio rezultas la enkonduko, en la loĝantaron de unu el ili, de tute novaj elementoj. Novaj rasoj de Spiritoj, kiuj venas miksiĝi kun tiuj ekzistantaj, formas novajn rasojn de homoj. Nu, ĉar la Spiritoj neniam perdas, kion ili akiris, ili do kunportas sian inteligenton kaj la intuicion pri la scioj, kiujn ili posedas. Sekve de tio, ili stampas sian karakteron en la korpa raso, kiun ili estas animontaj. Por tio ili nur bezonas, ke novaj korpoj estu speciale kreataj por ilia uzado. Ĉar ekzistas la korpa specio, ili ĉiam trovas korpojn pretajn por ilin akcepti. Ili do simple estas novaj loĝantoj. Alveninte al la Tero, ili komence apartenas al ties spirita loĝantaro kaj poste enkarneiĝas same kiel la ceteraj.

Adama raso

38. – Laŭ la instruado de la Spiritoj, ĝuste el unu el tiuj grandaj enmigraĵoj, aŭ, se oni volas, unu el tiuj *kolonioj da Spiritoj*, veninta de alia sfero, originis la raso simboligita per la persono de Adamo kaj, pro tio, nomita *adama raso*. Kiam ĝi alvenis, la Tero, ekde nememorebla tempo, jam estis loĝata, *same kiel Ameriko, kiam en ĝi alvenis la eŭropanoj*.

La adama raso, pli progresinta ol tiuj ĝin antaŭvenintaj sur la Tero, efektive estas la plej inteligenta; estas ĝi, kiu puŝas ĉiujn aliajn al progreso. La Genezo montras ĝin al ni, ekde la origino, laborema, kapabla por la artoj kaj la sciencoj, ne trapasinta spiritan infanecon, kio ne estas karakterizaĵo de la primitivaj rasoj sed akordas kun la opinio, ke ĝi konsistis el Spiritoj jam tre progresintaj. Ĉio atestas, ke ĝi ne estas antikva sur la Tero, ke ĝi ĉi tie loĝas de antaŭ nur kelke da jarmiloj, kio malakordus nek kun la geologiaj faktoj, nek kun la antropologiaj observoj, sed ja prefere ĉi tiujn lastajn konfirmus.

39. – Ne akcepteblas, en la nuna stato de la homa sciaro, tiu doktrino, laŭ kiu la tuta homa gento devenus de unu sola individuo de antaŭ ses mil jaroj. La ĉefaj ĝin kontraŭdirantaj argumentoj, prenitaj tiel en la fizika kiel ankaŭ en la morala kampo, resumiĝas jene:

El la vidpunkto fiziologia, kelkaj rasoj prezentas apartajn, karakterizajn tipojn, kiuj ne permesas, ke oni al ili atribuu komunan originon. Estas diferencoj, kiuj evidente ne rezultas el la efiko de la klimato, ĉar blankuloj reproduktiĝantaj en nigrolaj landoj ne fariĝas negroj, kaj inverse. La suna ardo rostas kaj brunigas la epidermon sed neniam transformis blankulon en nigrolon, ne platiĝis al iu la nazon, aŭ ŝanĝis

trajtojn de ies fizionomio, nek faris krispaj kaj lanecaj harojn longajn kaj silkecajn. Oni nuntempe scias, ke la haŭtkoloro de nigrolo fontas el speciala, subhaŭta histo esence propra al tiu raso.¹

Oni do rigardu la rasojn nigran, mongolan, kaŭkazan kiel havantajn propran originon, naskiĝintajn samtempe aŭ sinsekve en diversaj partoj de la globo. Ilia kruciĝado produktis la miksitajn, malĉefajn rasojn. La fiziologiaj karakteroj de la primitivaj rasoj estas evidenta signo, ke ili devenas de apartaj tipoj. La samaj konsideroj do aplikiĝas tiel al homoj kiel al bestoj koncerne la plurecon de la trunkoj. (Ĉap. X, n-roj 2 kaj sekvantaj.)

40. – Adamo kaj liaj idoj estas prezentataj en la Genezo kiel homoj esence inteligentaj, ĉar detempe de la dua generacio ili konstruas urbojn, kulturis la teron, prilaboras metalojn. Rapidaj kaj konstante subtenataj estas iliaj progresoj en la artoj kaj en la sciencoj. Oni do ne konsentus, ke tiu trunko estus havinta, kiel branĉojn, multenombrajn popolojn tiel malprogresintajn, kun tiel rudimenta inteligenteco, ankoraŭ hodiaŭ randumantaj la bestecon, krom ankaŭ perdintaj ĉiujn trajtojn de siaj prapatroj kaj eĉ la plej malgrandan tradician memoron pri tio, kion ĉi tiuj faris. Tiel radikala diferenco laŭ intelektaj kapabloj kaj morala disvolviteco atestas, ne malpli evidente, ian priorigan diferencan.

41. – Krom el la geologiaj faktoj, la pruvon pri la ekzisto de l' homo sur la Tero, antaŭ la epoko difinita de la Genezo, oni ankaŭ tiras el la loĝantaro de la globo.

¹ Vidu notojn ĉe la *Enkonduko*.

Sen paroli pri la ĉina kronologio, laŭdire datiĝanta de antaŭ tridek mil jaroj, pli aŭtentikaj dokumentoj pruvas, ke Egiptujo, Hindujo kaj aliaj landoj jam estis loĝataj kaj floradis almenaŭ tri mil jarojn antaŭ la kristana erao, sekve post la kreo de la unua homo laŭ la biblia kronologio. Freŝdataj dokumentoj kaj observoj nun allasas nenian dubon pri la rilatoj ekzistantaj inter Ameriko kaj la antikvaj egiptoj, el kio oni nepre devas konkludi, ke tiu regiono en tiu epoko jam estis loĝata. Oni do nepre devus konsenti, ke en mil jaroj la posteularo de unu sola homo povis loĝatigi plej grandan parton de la Tero. Nu, tiela fekundeco estus kontraŭa al ĉiuj antropologiaj leĝoj.¹

42. – Tiu neebleco montriĝas ankoraŭ pli evidenta, se oni konsentas, laŭ la Genezo, ke la diluvo eksternis *la tutan homan genton*, escepte de Noa kaj lia familio, kiu ne estis multenombra, en la 1656^a jaro de la mondo, tio estas, 2348 jarojn antaŭ la kristana erao. La loĝatigo de la globo do nepre datiĝus de Noa. Nu, kiam la hebreoj ekloĝis en Egiptujo, 612 jarojn post la diluvo, tiu lando jam estis potenca imperio, kiun jam antaŭe, en malpli ol ses jarcentoj, loĝatigis la idaro de

¹ La Universala Ekspozicio en 1867 prezentis antikvaĵojn el Meksikio, kiuj allasas nenian dubon pri la rilatoj, kiujn la popoloj de tiu lando tenadis kun la antikvaj egiptoj. S-ro Léon Méchedin, per noto alfiksis en la meksika templo ĉe la Ekspozicio, tiel sin esprimis:

“Ne konvenas antaŭtempe publikigi la malkovrojn faritajn, en rilato al la historio de l' homo, de la freŝdata scienca ekspedicio de Meksikio. Nenio tamen malpermesas, ke la publiko jam nun eksciuj, ke la esplorado pruvis la ekziston de granda nombro da urboj malaperintaj kun la tempo sed kiujn la pioĉo kaj la brulego povas eltiri el iliaj mortotukoj. La prifosoj ĉie elmetis *tri tavolojn el civilizacioj*, kiuj verŝajne havigas al la amerika mondo ian eksterordinaran antikvecon.” Tiel la Scienco ĉiutage malkonfirmas per faktoj la doktrinon, kiu limigas je 6000 jaroj la aperon de la homo sur la Tero kaj pretendas, ke li devenas de unu sola trunko.

Noa, sen paroli pri aliaj landoj, kio ja estas tute neakceptebla. Ni flanke rimarku, ke la egiptoj akceptis la hebreaĵojn kiel fremdulojn. Tre mirigus, ke ili estus perdintaj la memoron pri tiel proksima komuna origino, dum ili tamen religie konservis la monumentojn de sia historio.

Rigora logiko, konfirmita de la faktoj, elmontras do, ke la homo troviĝas sur la Tero ekde nedefinita tempo tre antaŭa al la epoko indikita de la Genezo. Same okazas ĉe la diverseco de la primitivaj trunkoj, ĉar demonstri la neeblecon de propozicio estas demonstri la propozicion kontraŭan. Se la Geologio malkovras aŭtentajn postsignojn de la ekzisto de la homo antaŭ la granda diluvia epoko, sekve pli absoluta fariĝas la demonstrado.

Doktrino pri la defalintaj anĝeloj kaj pri la perdita paradizo

43. – La mondoj progresas fizike per la ellaboriĝado de la materio, morale per la elpuriĝado de la Spiritoj en ili loĝantaj. La tiea feliĉo estas rekte proporcia al la superregado de bono super malbono, kaj la superregado de bono rezultas el la morala progreso de la Spiritoj. Ne sufiĉas nur intelekta progreso, ĉar per la intelekto ili povas fari malbonon.

Kiam iu mondo estas atinginta unu el la stadioj de sia transformiĝo, kiu ĝin altigos en la hierarkio, ekestas ŝanĝoj en ĝia loĝantaro, enkarniĝinta kaj elkarniĝinta. Ĝuste tiam okazas la grandaj elmigradoj kaj enmigradoj (n-roj 34 kaj 35). Kiu, malgraŭ siaj inteligenteco kaj sciado, obstinis en malbonfarado kaj en sia ribelemo kontraŭ Dio kaj ties leĝoj, tiuj de tiam fariĝus ia malhelpo al la posta progreso, ia konstanta kaŭzo de perturbo kontraŭ la trankvileco kaj la feliĉo de la bonaj; pro tio ili estos elpelitaj kaj elsenditaj en malpli progresintajn mon-

dojn, kie ili utiligos sian intelekton kaj la intuicion pri siaj akiritaj scioj profite al la progreso de tiuj, inter kiuj ili nun devas vivi; krome ili samtempe elpagos, dum serio da dolorplena ekzistadoj kaj per tre peniga laborado, siajn pasintajn kulpojn kaj sian *memvolan* obstiniĝon. Kio ili estos inter tiuj por ili novaj loĝantaroj ankoraŭ en la komenco de la barbareco, krom ja anĝeloj aŭ defalintaj Spiritoj tien senditaj por kulpelpago? Ĉu la tero, *el kiu ili estis elpelitaj*, ne estas ia *perdita paradizo*? Ĉu ĝi ne estis por ili ia *plezurejo* kompare kun la sendanka medio, kie ili restos elpelitaj dum miloj da jarcentoj, ĝis ili meritos la liberiĝon? La svaga, intuicia rememoro, kiun ili konservas pri ĝi, aperas kvazaŭ fora miraĝo ilin rememoriganta pri tio, kion ili *perdis per sia kulpo*.

44. – Sed dum la malbonaj foriĝas el la mondo, en kiu ili loĝis, pli bonaj Spiritoj ilin tie anstataŭas, venintaj, ĉu de la spiritaĵaj sferoj apartenantaj al tiu mondo, ĉu de malpli progresinta mondo, kiun ili meritis forlasi; por ĉi tiuj la nova loĝejo ja estas ia rekompenco. Post kiam la spirita loĝantaro estas tiamaniere renovigita kaj elpurigita el siaj plej malbonaj elementoj, pasas kelka tempo kaj la morala stato de la mondo troviĝas plibonigita.

Tiuj ŝanĝoj iaforte estas partaj, tio estas, limiĝas al unu popolo, al unu raso; aliffoje ili estas ĝeneralaj, kiam al tiu globo estas veninta la tempo de renoviĝo.

45. – La adama raso prezentas ĉiujn karakterojn de ia elpelita raso. La Spiritoj al ĝi apartenantaj estis ekzilitaj sur la Tero, tiam jam loĝata sed de primitivaj homoj dronantaj en senscienco, kiujn homojn la unuaj estis komisiitaj progresigi, al ili portante la lumojn de jam disvolviĝinta intelekto. Ĉu efektive ne tian rolon ludas tiu raso ĝis nun? Ĝia intelekta

supereco pruvas, ke la mondo, de kiu foriris la Spiritoj, al ĝi apartenantaj, estis pli progresinta ol la Tero. Ĉar tiu mondo devis eniri novan etapon de progreso, kaj ĉar tiuj Spiritoj ne volis, pro obstineco, indigi sin al tiu progreso, ili tie nepre sentis sin fremdaj kaj starus kiel malhelpo al la providenca irado de la aferoj. Ja tial ili estis el tie elpelitaj, dum aliaj meritis ilin anstataŭi.

Elpelinte tiun rason en tiun teron de laboroj kaj suferoj, Dio prave al ĝi admonis: “En la ŝvito de via frunto vi el la tero prenos vian manĝon”. Laŭ sia mildeco, li promesis sendi al ĝi iun *Savonton*, tio estas tiun, al ĝi instruontan pri la vojo, kiun ĝi devus sekvi por eliri el tiu loko de mizero, el tiu *infero*, kaj akiri la feliĉon de la elektitoj. Tiun *Savonton* li efektive sendis al ĝi en la persono de la Kristo, kiu al ĝi instruis pri la leĝo de amo kaj karitato, kiun leĝon ĝi ne konis kaj kiu al ĝi devus esti vera ankro de savo.

Egale celante, ke la homaro antaŭeniru en difinita direkto, superaj Spiritoj, kvankam ne havante la kvalitojn de la Kristo, de tempo al tempo enkarniĝas sur la Tero por plenumi specialajn misiojn, kiuj samtempe profitos al ilia persona progreso, se tiujn misiojn ili plenumos konforme al la decidoj de la Kreinto.

46. – Sen la reenkarneigo, tiel la misio de la Kristo, kiel ankaŭ la promeso farita de Dio estus senencaĵo. Ni supozu, ke fakte la animo de ĉiu homo estas kreita samtempe kun la naskiĝo de lia korpo kaj ke ĝi nur devas aperi kaj malaperi sur la Tero; nenia rilato ekzistas do inter tiuj aperintaj detempe de Adamo ĝis Jesuo Kristo, nek inter tiuj, kiuj aperis poste; ĉiuj estas fremdaj, unuj al aliaj. La promeso de Dio pri ia *Savonto* ne povus aplikiĝi al la idaro de Adamo, ĉar ties animoj ankoraŭ ne estis kreitaj. Por ke la misio de la Kristo povu rilati

al la vortoj de Dio, necesus, ke tiuj vortoj aplikiĝu al samaj animoj. Se tiuj animoj estas novaj, ili do ne povas esti makulitaj pro la kulpo de la unua patro, kiu estas nur patro karna, ne spirita. Se ne tiel okazis, Dio estus do *kreinta* animojn makulitaj de ia kulpo, kiu ne povus forviŝiĝi tial, ke ili tute ne ekzistis. La vulgara doktrino pri la origina peko sekve neprigas ian rilaton inter la animoj, kiuj vivis en la tempo de Jesuo, kaj tiuj vivintaj en la tempo de Adamo; ĝi neprigas do la reenkarmoniĝon.

Diru tamen, ke ĉiuj tiuj animoj apartenis al tiu kolonio da Spiritoj ekzilitaj sur la Tero en la tempo de Adamo kaj ke ili troviĝas makulitaj de malvirtoj, kiuj al ili rezultigis elpelon el pli bona mondo, kaj vi havos la solan racian interpreton de la origina peko, peko ja propra al ĉiu individuo, ne rezultinta el la respondeco pri kulpo de alia homo, kiun li neniam konis. Diru, ke tiuj animoj aŭ Spiritoj plurfoje reenkarmoniĝas sur la Tero por la enkorpora vivo, celante progresi, elpuriĝi; ke la Kristo venis instrui *tiujn samajn animojn* ne nur pri ties ekzistadoj pasintaj, sed ankaŭ pri la estontaj, kaj nur tiam vi donos al lia misio realan kaj seriozan celon, akcepteblan por la racio.

47. – Iu ekzemplo, familia sed frapanta pro sia analogeco, ankoraŭ pli komprenebligas la ĵus prezentitajn principojn:

La 24-an de majo 1861, la fregato *Ifigenia* transportis al Nov-Kaledonio disciplinan kompanion konsistantan el 291 viroj. Ĉe la alveno, la komandanto adresis al ili tagordon jene tekstantan:

“Metante la piedojn sur tiun foran regionon, vi certe jam komprenis la rolon, kiu al vi estas rezervita.

“Laŭ la ekzemplo de la bravaj soldatoj de la mararmeo, servantaj antaŭ viaj okuloj, vi helpos nin brile porti la torĉon de la civilizacio al miloj da triboj de Nov-Kaledonio. Ĉu ĝi ne

estas – mi demandas al vi – bela kaj nobla misio? Vi ĝin ja inde plenumos.

“Aŭskultu la voĉon kaj la konsilojn de viaj ĉefoj. Mi estras super ili, kaj miajn vortojn vi bone komprenu.

“La elekto de via komandanto, de viaj oficiroj, de viaj suboficiroj kaj kaporaloj prezentas certan garantion pri ĉiuj klopodoj, kiuj estos efektivigataj por el vi fari bonegajn soldatojn; kaj mi plue diras: por altiĝi vin al la rango de bonaj civitanoj kaj vin transformi en honorindajn kolonianojn, *se tion vi volos.*”

“Severa estas via disciplino; tia ĝi devas esti. Metita en niaj manoj, vi bone sciuj, ĝi estos firma kaj nefleksebla; sed, justa kaj patrea, ĝi scios distingi eraron disde malvirto kaj malnobleco...”

Jen homoj elpelitaj, pro sia malbona konduto, el civilizita lando kaj puncele senditaj en la sinon de barbara popolo. Kion diras al ili la estro? – “Vi malobeis la leĝon de via lando; en ĝi vi fariĝis kaŭzo de malordo kaj skandalo, kaj pro tio oni vin elpelis; ĉi tien oni vin sendis, sed en ĉi tiu loko vi povos elpigi vian pasintecon; vi povos, per laborado, havigi al vi ĉi tie honoran pozicion kaj fariĝi honestaj civitanoj. Belan mision vi devas plenumi: porti la civilizacion al ĉi tiuj sovaĝaj triboj. La disciplino estos severa sed justa, kaj ni scios distingi tiujn, kiuj bone kondutas. Vian sorton vi tenas en viaj manoj; vi ĝin povos plibonigi, *se vi deziras*, ĉar vi havas vian liberan volon.”

Por tiuj homoj, elpelitaj en la sinon de la sovaĝularo, ĉu la naskolando ne estas kvazaŭ ia paradizo, kiun ili perdis pro siaj kulpoj kaj pro sia ribelo kontraŭ la leĝo? Ĉu ili ne estas, en tiu fora regiono, kvazaŭ defalintaj anĝeloj? Ĉu la parolo de la estro ne egalas tiun, kiun Dio adresis al la Spiritoj ekzilitaj sur la Tero: “Vi malobeis miajn leĝojn, tial mi vin elpelis el la

mondo, kie vi povus vivi feliĉaj kaj en paco; ĉi tie vi estos kondamnitaj al penado, sed per via bona konduto vi povos meriti pardonon kaj reakiri la patrolandon, kiun vi perdis pro via kulpo, nome la ĉielon?”

48. – Unuavide, la ideo pri defalo ŝajnas kontraŭdiri la principon, laŭ kiu la Spirito ne povas retropaŝi. Oni devas tamen konsideri, ke ne temas pri ia regreso en la primitivan staton. La Spirito, eĉ se li troviĝas en malsupera pozicio, perdas neniom el tio, kion li akiris; lia disvolviteco morala kaj intelekta konserviĝas la sama, kia ajn estas la medio, en kiu li troviĝas. Li statas en la situacio de homo kondamnita pro siaj deliktoj al enkarcerigo. Certe tiu homo estas senhonorita, defalinta, el la socia vidpunkto, sed li pro tio fariĝis nek pli stulta nek pli malklera.

49. – Ĉu ni nun kredu, ke tiuj homoj forsenditaj en Nov-Kaledonion subite transformiĝos en modelojn de virte-mo? ke ili subite forlasos siajn pasintajn erarojn? tion supozus nur tiu, kiu ne konus la homaron. Pro la sama kaŭzo, la Spiritoj de la adama raso, unu fojon transplantitaj sur la teron de ekzilo, ne momente seniĝis je sia orgojlo kaj je siaj malbonaj instinktoj; ankoraŭ longe ili konservis la originajn inklinojn, ian restaĵon el la malnova fermento. Nu, ĉu ne tio estas la origina peko?

ĈAPITRO XII

MOSEA GENEZO

La ses tagoj – La perdita paradizo.

La ses tagoj

1. – ĈAPITRO I. – 1. En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron. – 2. Kaj la tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super la abismo; kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvo. – 3. Kaj Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo. – 4. Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estas bona; kaj Dio apartigis la lumon de la mallumo. – 5. Kaj Dio nomis la lumon Tago, kaj la mallumon Li nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, unu tago.

6. Kaj Dio diris: Estu firmaĵo inter la akvo, kaj ĝi apartigu akvon de akvo. – 7. Kaj Dio kreis la firmaĵon, kaj apartigis la akvon, kiu estas sub la firmaĵo, de la akvo, kiu estas super la firmaĵo; kaj fariĝis tiel. – 8. Kaj Dio nomis la firmaĵon ĉielo. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la dua tago.

9. Kaj Dio diris: Kolektiĝu la akvo de sub la ĉielo en unu lokon, kaj aperu la sekaĵo; kaj fariĝis tiel. – 10. Kaj Dio nomis la sekaĵon Tero, kaj la kolektiĝojn de la akvo Li nomis Maroj. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. – 11. Kaj Dio diris: Kreskigu la Tero verdajon, herbon, kiu naskas semon, fruktaron, kiu donas laŭ sia speco frukton, kies semo estas en ĝi mem, sur la tero; kaj fariĝis tiel. 12. Kaj la tero elkreskigis verdajon, herbon, kiu naskas semon laŭ sia speco, kaj arbon, kiu donas frukton, kies semo estas en ĝi mem laŭ sia speco. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. – 13. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la tria tago.

14. Kaj Dio diris: Estu lumajoj en la ĉiela firmaĵo, por apartigi la tagon de la nokto, kaj ili prezentu signojn, tempojn, tagojn kaj jarojn; – 15. kaj ili estu lumajoj en la ĉiela firmaĵo, por lumi super la tero; kaj fariĝis tiel. – 16. Kaj Dio faris la du grandajn lumajojn: la pli grandan lumajon, por regi la tagon, kaj la malpli grandan lumajon, por regi la nokton, kaj la stelojn. – 17. Kaj Dio starigis ilin sur la ĉiela firmaĵo, por ke ili lumu sur la teron, – 18. kaj por ke ili regu la tagon kaj la nokton kaj faru diferencon inter la lumo kaj la mallumo. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. 19. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvara tago.

20. Kaj Dio diris: La akvo aperigu moviĝantaĵojn, vivajn estaĵojn, kaj birdoj ekflugu super la tero, sub la ĉiela firmaĵo. 21. Kaj Dio kreis la grandajn balenojn, kaj ĉiujn vivajn estaĵojn moviĝantajn, kiujn aperigis la akvo, laŭ ilia speco, kaj ĉiujn flugilhavajn birdojn laŭ ilia speco. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. – 22. Kaj Dio ilin benis, dirante: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la akvon en la maroj, kaj la birdoj multiĝu sur la tero. – 23. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvina tago.

24. Kaj Dio diris: La tero aperigu vivajn estaĵojn, laŭ ilia speco, brutojn kaj rampaĵojn kaj surterajn bestojn, laŭ ilia speco; kaj fariĝis tiel. – 25. Kaj Dio kreis la bestojn de la tero, laŭ ilia speco, kaj la brutojn, laŭ ilia speco, kaj ĉiujn rampaĵojn de la tero, laŭ ilia speco. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona.

26. Kaj Dio diris: Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero. – 27. Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin. – 28. Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero. – 29. Kaj Dio diris: Jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur la tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton, kiu semas semon; tio estu por vi manĝaĵo. – 30. Kaj al ĉiuj bestoj de la tero kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj rampaĵoj sur la tero, kiuj havas en si vivan animon, la tutan verdan herbaĵon kiel manĝaĵon. Kaj fariĝis tiel. – 31. Kaj Dio rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la sesa tago.

ĈAPITRO II. – 1. Kaj estis finitaj la ĉielo kaj la tero kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj. – 2. Kaj Dio finis en la sepa tago Sian laboron, kiun Li faris, kaj Li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun Li faris. – 3. Kaj Dio benis la sepan tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis de Sia tuta laboro, kiun Li faris kreante. – 4. Tia estas la naskiĝo de la ĉielo kaj la tero, kiam ili estis

kreitaj, kiam Dio la Eternulo faris la teron kaj la ĉielon. – 5. Kaj nenia kampa arbeto ankoraŭ estis sur la tero, kaj nenia kampa herbo ankoraŭ kreskis, ĉar Dio la Eternulo ne pluvigis sur la teron, kaj ne ekzistis homo, por prilabori la teron. – 6. Sed nebulo leviĝadis de la tero kaj donadis malsekecon al la tuta supraĵo de la tero.

7. Kaj Dio la Eternulo kreis la homon el polvo de la tero, kaj Li enblovis en lian nazon spiron de vivo, kaj la homo fariĝis viva animo.

2. – Post la elvolvoj, en la supraj ĉapitroj, pri la origino kaj la konsisto de la Universo, laŭ la scioj liveritaj de la Scienco, koncerne al la parto materiala, kaj laŭ Spiritismo, koncerne al la parto spirita, utilas ĉion kontraŭmeti al la teksto mem de Moseo, por ke ĉiu povu fari komparon kaj plenkonscie juĝi. Kelke da komplementaj eksplikoj sufiĉos por komprenigi tiujn partojn bezonantajn apartajn klarigojn.

3. – Pri kelkaj punktoj sendube estas rimarkinda akordo inter la mosea Genezo kaj la scienca doktrino; sed estus erare kredi, ke sufiĉas anstataŭigi la ses dudekkvar-horajn tagojn de la kreado per ses nedeterminitaj periodoj por starigi kompletan analogecon. Ne malpli erare estus kredi, ke, krom la alegoria senco de kelkaj vortoj, la Genezo kaj la Scienco paŝas flanko ĉe flanko kaj ke ambaŭ sin parafrasas, unu la duan.

4. – Ni unue rimarku, kiel jam dirite (ĉap. VII, n-ro 14), ke la nombro de ses geologiaj epokoj estas laŭvola, ĉar kalkuliĝas al pli ol dudek kvin la nombro da nete karakterizitaj formacioj. Tiu nombro determinas nur la grandajn ĝeneralajn periodojn, kaj oni en la komenco ĝin adoptis nur celante kiel eble plej konformigi la sciojn al la biblia teksto, en tempo, cetere ne multe fora, kiam oni opiniis, ke la Scienco devas esti kontrolata de la Biblio. Ĝuste tial la aŭtoroj de la pliparto el la kosmogoniaj teorioj, celante ties pli facilan akcepton, klopodis por ilin akordigi kun la sankta skribo. Kiam la Scienco sin

apogis sur la eksperimenta metodo, ĝi eksentis sin pli forta kaj emancipiĝis. Nuntempe estas ja ĝi, kiu kontrolas la Biblion.

Aliflanke, la Geologio, prenante kiel deirpunkton nur la formiĝon de la granitaj terenoj, ne ampleksas, en la nombrado de siaj epokoj, la primitivan staton de la Tero, ne okupas sin pri la Suno, pri la Luno kaj la steloj, nek pri la tutaĵo de la Universo, kio ja apartenas al la Astronomio. Por ĉion enkadrigi en la Genezon, necesas aldoni ian unuan epokon, kiu ampleksus tiun ordon de fenomenoj kaj kiun oni povus nomi – *astronomia epoko*. Krom tio, ne ĉiuj geologoj rigardas la diluvan kiel apartan periodon, sed ja kiel transiran, nedaŭran faktan, kiu ne rimarkinde ŝanĝis la klimaton de la globo, nek signis novan fazon por la vegetaĵaj kaj bestaj specioj, ĉar, kun malmultaj esceptoj, tiuj samaj specioj troveblas antaŭ kaj post la diluvo. Oni povas do, sen malkonsideri la veron, preterlasi tiun periodon.

5. – La ĉi-suba kompara tabelo, en kiu estas resume prezentitaj la fenomenoj karakterizantaj ĉiun el la ses epokoj, permesas ampleksi la tuton kaj pritaksi la rilatojn kaj la diferencojn ekzistantajn inter tiuj epokoj kaj la biblia Genezo.

SCIENCO (Vidu notojn ĉe *Enkonduko*)

GENEZO

I. ASTRONOMIA EPOKO. – Aglomerigo de la universa kosma materio, ĉe iu punkto de la spaco, en nebulozon, kiu naskis, pro plurloka kondensiĝo de la materio, la stelojn, la Sunon, la Teron, la Lunon kaj ĉiujn planedojn.

1-a TAGO. – La ĉielo kaj la Tero. – La luno.

Primitiva, fluideca, inkandeska stato de la Tero. – Vastega atmosfero ŝarĝita per la tuta akvo en vapora stato kaj per ĉiuj volatiligebaj materioj.

II. PRIMARA EPOKO. – Rigidiĝo de la Ter-supraĵo pro la malvarmiĝo; formiĝo de la granitaj tavoloj. – Densa kaj ardanta atmosfero nepenetrebla por la sunradioj. – Laŭgrada demetiĝo de la akvo kaj de la solidaj materioj volatiligitaj en la aero. – Neekzisto de ĉia organa vivo.

2-a TAGO. – La Firmaĵo. – Apartiĝo de la akvo, kiu estas super la firmaĵo, de la akvo, kiu estas sub ĝi.

III. TRANSIRA EPOKO. – La akvo kovras la tutan supraĵon de la globo. – Unuaj sedimentaj demetaĵoj formitaj de la akvo. – Humida varmo. – La Suno komencas trairi la nebulan atmosferon. – Unuaj plej rudimente strukturitaj organaj estaĵoj. – Likenoj, muskoj, fetoj, likopodioj, herbecaj plantoj. Kolosa vegetaĵaro. – Unuaj marestaĵoj: zoofitoj, polipoj, krustacoj. – Ŝtonkarbaj demetaĵoj.

3-a TAGO. – La akvo, kiu estas sub la firmaĵo, kolektiĝas; aperas la sekaĵo. – La tero kaj la maroj. – La kreskaĵoj.

IV. SEKUNDARA EPOKO. – Tersupraĵo ne multe malebena; akvoj marĉaj kaj ne tre profundaj. Malpli arda temperaturo; pli elpuriĝinta atmosfero. Grandaj kalkaj demetaĵoj portitaj de la akvoj. – Malpli kolosa vegetaĵaro; novaj specioj; lignecaj kreskaĵoj; unuaj arboj. – Fiŝoj; cetacoj; konkhavaj bestoj; grandaj akvaj reptilioj kaj amfibioj.

4-a TAGO. – La Suno, la Luno kaj la steloj.

V. TERCIARA EPOKO. – Grandaj ŝvelleviĝoj de la solida krusto; formiĝo de la kontinentoj. Retiriĝo de la akvoj en malaltaĵojn; formiĝo de la maroj. – Elpuriĝinta atmosfero; nuntempa temperaturo estigita de la suna varmo. – Gigantaj surteraj bestoj. Nuntempaj vegetaĵoj kaj bestoj. Birdoj.

5-a TAGO. – Fiŝoj kaj birdoj.

UNIVERSA DILUVO

VI. KVATERNARA AŬ POSTDILUVA EPOKO. – Aluviaj terenoj. – Nuntempaj vegetaĵoj kaj bestoj. La homo.

6-a TAGO. – La surteraj bestoj. La homo.

6. – En la supra tabelo elstaras kiel unua la fakto, ke la laboro en ĉiu el la ses tagoj ne rigore respondas, kiel multaj ĝin kredas, al ĉiu el la ses geologiaj epokoj. La plej rimarkinda akordo montriĝas en la intersekvo de la organaj estaĵoj, kiu, kun eta diferenco, preskaŭ samas, kaj en la apero, kiel lasta, de la homo; nu, tio estas grava fakto.

Estas ankaŭ koincido, ne koncerne la laŭnumeran ordon de la epokoj sed koncerne la fakton mem, en la loko kie estas dirite, ke, en la tria tago, “kolektiĝis la akvo de sub la ĉielo en unu lokon, kaj aperis la sekaĵo”, kio esprimas la bildon de tio okazinta dum la terciara epoko, kiam la leviĝoj de la solida krusto aperigis la kontinentojn kaj repuŝis la akvojn, kiuj formis la marojn. Nur tiam ekaperis la surteraj bestoj laŭ la Geologio kaj laŭ Moseo.

7. – Dirinte, ke la kreado fariĝis en ses tagoj, ĉu Moseo volis paroli pri dudekkvarhoraj tagoj aŭ uzis tiun vorton en la senco de periodo, daŭro? La unua hipotezo estas pli probabla, se oni konsideras la tekston mem; unue, ĉar tia estas la propra senco de la hebrea vorto *jôm*, kies signifo estas *tago*; krom tio, la difino de vespero kaj mateno kiel limoj de ĉiu el la ses tagoj pravigas la supozon, ke li volis paroli pri ordinaraj tagoj. Oni ja tute ne povas tion pridubi, ĉar estas dirite en la paragrafo 5-a: “Kaj Dio nomis la lumon Tago, kaj la mallumon Li nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, unu tago”. Ĉi tio evidente povas rilati nur al la dudekkvarhora tago, kiun dividas la lumo kaj la mallumo. Ankoraŭ pli preciziĝas la senco, kiam li asertas, en la paragrafo 17, parolante pri la Suno, la Luno kaj la steloj: “Kaj Dio starigis ilin sur la ĉiela firmaĵo, por ke ili lumu sur la teron, kaj por ke ili regu la tagon kaj la nokton kaj faru diferencon inter la lumo kaj la mallumo. Kaj Dio vidis, ke

ĝi estas bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvara tago.”

Cetere, ĉio en la kreado estis mirakla, kaj se oni eniras la vojon de la mirakloj, oni ja povas kredi, ke la Tero estis farita en ses dudekkvarhoraj tagoj, precipe kiam oni ne konas la unuajn naturajn leĝojn. Ĉiuj civilizitaj popoloj komune akceptis tiun kredon tiel longe, ĝis la Geologio venis por pruvi ĝian maleblecon.

8. – Unu el la plej kritikataj punktoj en la Genezo estas la kreado de la Suno post la lumo. Oni provis ĝin klarigi, helpe de la donitaĵoj mem liveritaj de la Geologio, asertante, ke la surtera atmosfero, en la unuaj tempoj de sia formiĝo, estis ŝarĝita per vaporoj densaj, netrasideblaj, kaj tial ne permesantaj, ke oni vidu la Sunon, kiu do tiam ne ekzistis por la Tero. Akcepteblas tia klarigo, se en tiu tempo jam troviĝus loĝantoj, kiuj povus konstati la ekziston aŭ neekziston de la Suno. Nu, laŭ Moseo mem tiam ekzistis nur vegetaĵoj, kiuj tamen ne povintus kreski kaj reproduktiĝi sen la suna varmo.

Estas do evidente anakronisma la ordo, kiun Moseo difinas por la kreado de la Suno; sed, pretervole aŭ ne, li ne eraris, asertante, ke la lumo antaŭvenis la Sunon.

La Suno ne estas la principo de la universa lumo, sed ja ia koncentriĝo de la luma elemento en iu punkto, ĝustadire de la fluido, kiu, en difinitaj cirkonstancoj, akiras la lumajn proprecojn. Tiu fluido, kiu estas kaŭzo, nepre devis antaŭveni la Sunon, kiu nenio alia estas ol efiko. La Suno estas *kaŭzo* rilate al la lumo, kiun ĝi disradias, sed *efiko* rilate al tiu, kiun ĝi ricevis.

En obskura ĉambro, brulanta kandelo estas eta suno. Kion oni faris por bruligi la kandelon? Oni disvolvis la heligan proprecon de la luma fluido kaj oni ĉi tiun koncentris sur iun

punkton. La kandelo estas la kaŭzo de la lumo disradianta en la ĉambro, sed se la luma principo ne ekzistus antaŭ la kandelo, ĉi tiun oni ne povus bruligi.

La samo okazas kun la Suno. La eraro devenas de la falsa, longe akceptata ideo, laŭ kiu la tuta Universo komenciĝis kun la Tero, kaj pro tio oni ne komprenas, ke la Suno povis esti kreita post la lumo. Oni nun scias, ke, antaŭ nia Suno kaj nia Tero, ekzistis milionoj da sunoj kaj da Teroj, kiuj sekve ĝuis la lumon. La aserto de Moseo estas do principe ekzakta; ĝi falsas, kredigante, ke la Tero estis kreita pli frue ol la Suno. Estante, pro sia translacia movo, submetita al la Suno, la Tero nepre estis formita post ĝi. Ĉi tion Moseo ne povus scii, ĉar li ne konis la leĝon de gravito.

Tiun saman ideon oni trovas en la Genezo de la antikvaj Persoj. En la unua ĉapitro de la Vendedad, Ormuzdo, rakontante la originon de la mondo, diras: “Mi kreis la lumon, heligontan la Sunon, la Lunon kaj la stelojn.” (*Vortaro pri Universala Mitologio.*) Ĉi tie la formo certe estas pli klara kaj pli scienca, ol ĉe Moseo, kaj ne bezonas komentariojn.

9. – Moseo evidente konfesis la plej primitivajn kosmogoniajn kredojn. Kiel siaj samtempuloj, li kredis la solidecon de la ĉiela volbo kaj la ekziston de supraj rezervujoj por la akvoj. Tiu ideo nealegorie kaj neambigue esprimiĝis en ĉi tiu loko (paragrafoj 6 kaj sekvantaj): “Kaj Dio diris: Estu firmaĵo inter la akvo, kaj ĝi apartigu akvon de akvo. Kaj Dio kreis la firmaĵon, kaj apartigis la akvon, kiu estas sub la firmaĵo, de la akvo, kiu estas super la firmaĵo; kaj fariĝis tiel.” (Vidu: ĉap. V, *Antikvaj kaj modernaj sistemoj pri la mondo*, n-roj 3, 4 kaj 5.)

Laŭ antikva kredo, la akvo estis rigardata kiel primitiva principo, genera elemento, kaj pro tio Moseo ne parolas pri la

kreado de la akvoj, kiuj ŝajne jam antaŭe ekzistis. “Mallumo estis super la abismo”, nome super la profundegaĵoj de la spaco, kiun la imago svage prezentis al si okupita de la akvoj kaj en mallumo antaŭ la kreado de la lumo. Jen kial Moseo diras: “La Spirito de Dio portiĝis (aŭ ŝvebis) super la akvo.” Ĉar oni rigardis la Teron formita en la sino de la akvoj, necesis apartigi ĝin. Oni tial supozis, ke Dio faris la firmaĵon, ian solidan volbon, por apartigi la akvojn, kiuj troviĝis en la supro, de tiuj, kiuj estis sur la Tero.

Por kompreni certajn partojn de la Genezo, nepre necesas, ke oni lokiĝu sur la vidpunkto de la kosmogoniaj ideoj de la tempo, kiun la Genezo reflektas.

10. – Ĉe la progreso de la Fiziko kaj Astronomio, ne plu defendeblas simila doktrino.¹ Moseo tamen atribuas tiujn vortojn al Dio mem. Nu, ĉar ili esprimas efektive falsan okazaĵon, el du aferoj unu: aŭ Dio trompiĝis en la rakontado de sia verko, aŭ tiu rakonto ne estas dia revelacio. Ĉar ne akcepteblas la unua hipotezo, nepras konkludi, ke Moseo esprimis siajn proprajn ideojn. (Ĉap. I, n-ro 3.)

11. – Moseo pli proksimas al la vero, dirante, ke Dio faris la homon el la ŝlimo de la tero.² Efektive, la Scienco montras (ĉap. X), ke la homa *korpo* konsistas el elementoj ĉerpitaj en la organa materio, alivorte en la ŝlimo de la tero.

¹ Malgraŭ la kruda eraro de tia kredo, tamen oni per ĝi ĉiam ankoraŭ lulas la infanojn, kvazaŭ temus pri sankta veraĵo. La edukistoj nur tremante riskas ian nekuraĝan interpreton. Kiel do voli, ke tio poste ne estigu nekredantojn?

² La hebrea vorto *haadam*, homo, de kiu devenis *Adamo*, kaj la vorto *haadama*, tero, havas saman radikon.

La formado de la virino el unu ripo de Adamo, ŝajne infaneca alegorio se prenita laŭlitere, estas tamen ja profunda laŭ la senco. Ĝi celas montri, ke la virino estas samnatura kiel la viro, sekve egala al li antaŭ Dio, tute ne ia aparta kreaĵo destinita al servuteco, al traktado kiel sklavo. Ĉar ŝi eliris el lia karno mem, la figuro de egaleco montriĝas pli signifoplena, ol se ŝi estus aparte formita el la sama ŝlimo. Ĝi estas la samo, kiel diri al la viro, ke ŝi egalas al li kaj tute ne estas ŝia sklavino, ke li devas ami ŝin kiel parton de si mem.

12. – Por malkleraj spiritoj, havantaj nenian ideon pri la ĝeneralaj leĝoj, nekapablaj ĉirkaŭpreni la tuton kaj koncepti la senfinon, tiu mirakla, momenta kreado prezentis ion fantastan, kiu frapis la imagon. La bildo de la Universo naskita el la nenio en kelke da tagoj, per nura ago de la kreanta volo, estis por ili la plej evidenta monstro de la povo de Dio. Kia figuro efektive prezentus pli sublime kaj poezie tiun povon ol jenaj vortoj: “Dio diris: Estu lumo, kaj fariĝis lumo!” Kreante la Universon per la malrapida, laŭgrada agado de la naturaj leĝoj, Dio ŝajnus al ili malpli granda, malpli pova. Al ili nepre necesus io mirakleca, ekster la naturaj kadroj, ĉar alimaniere ili dirus, ke Dio ne estas pli lerta ol la homoj. la scienca, racia teorio pri la kreado lasus ilin malvarmaj kaj indiferentaj.

Ni do ne forĵetu la biblian Genezon; male, ni ĝin studu kiel oni studas la historion pri la infaneco de la popoloj. Tio estas epoko riĉa je alegorioj, kies kaŝitan sencion oni devas esplori; kiujn oni nepre komentu kaj klarigu helpe de la lumoj de la racio kaj de la Scienco. Reliefigante ĝiajn poeziajn belaĵojn kaj la instruojn vualitajn de la imaga formo, oni tamen klare montru la erarojn, en la intereso mem de la religio. Ĉi tiun oni pli respektos, kiam ĝiaj eraroj ne plu estos trudataj al

la fido kiel veraĵoj, kaj Dio aspektos pli granda kaj pli potenca, kiam lia nomo ĉesos esti ligita al pure elpensitaj faktoj.

La perdita paradizo¹

13. – ĈAPITRO II. – 8. Kaj Dio la Eternulo plantis ĝardenon en Eden en la Oriento, kaj Li metis tien la homon, kiun Li kreis. – 9. Kaj Dio la Eternulo elkreskigis el la tero [*min haadama*] ĉiun arbon ĉarman por la vido kaj bonan por la manĝo, kaj la arbon de vivo [*vehetz hachayim*] en la mezo de la ĝardeno², kaj la arbon de sciado pri bono kaj malbono.

15. Kaj Dio la Eternulo prenis la homon kaj enloĝigis lin en la ĝardeno Edena, por ke li prilaboradu ĝin kaj gardu ĝin. – 16. Kaj Dio la Eternulo ordonis al la homo [*hal haadam*], dirante: De ĉiu arbo de la ĝardeno [*hagan*] vi manĝu; – 17. sed de la arbo de sciado pri bono kaj malbono [*oumehetz hadaat tob vara*] vi ne manĝu, ĉar en la tago, en kiu vi manĝos de ĝi, vi mortos.

14. – ĈAPITRO III. – 1. Kaj la serpento [*nâhâsch*] estis pli ruza, ol ĉiuj kampaj bestoj, kiujn kreis Dio la Eternulo. Kaj ĝi diris al la virino [*el haïscha*] : ĉu Dio diris, ke vi ne manĝu de ĉiuj arboj de la ĝardeno? – 2. Kaj la virino diris al la serpento: La fruktojn [*miperi*] de la arboj de la ĝardeno ni povas manĝi; – 3. sed pri la fruktoj de la arbo, kiu estas en la mezo de la ĝardeno, Dio diris: Ne manĝu ion de ili kaj ne tuŝu ilin, por ke vi ne mortu. – 4. Kaj la

¹ Apud kelkaj paraĝrafoj troviĝas la laŭlitera traduko de la hebrea teksto, kiu, pli fidele esprimante la primitivan penson, pli klare reliefigas la alegorian sencon. – *Noto de la tradukinto*: Ĉar ni ĉi tie uzis la Esperantan tekston de la Malnova Testamento, kiun Zamenhof tradukis ĝuste el la hebrea originalo, tial ni opiniis nenecesa sekvi tiun zorgon de Kardec koncernantan la franclingvan tradukon de la Biblio. Ni nur konservis, apud la koncernaj esprimoj, la hebrelingvajn tekstojn.

² En la franclingva traduko de la Biblio estas la vorto *paradis*, kaj Kardec aldonis jenan noton: Paradizo, el la latina *paradisus*, deveninta de la greka: *paradeisos*, ĝardeno, fruktejo, fruktoĝardeno, loko priplantita per arboj. La hebrea vorto uzita en la Genezo estas *hagan*, kiu havas saman signifon.

serpento diris al la virino: Ne, vi ne mortos; – 5. sed Dio scias, ke en la tago, en kiu vi manĝos ion de ili, malfermiĝos viaj okuloj kaj vi estos kiel Dio, vi scios bonon kaj malbonon.

6. Kaj la virino vidis, ke la arbo estas bona por manĝi kaj ĝi estas ĉarma por la okuloj, kaj la arbo estas dezirinda por saĝiĝi [*leaskil*]; kaj ŝi prenis de ĝiaj fruktoj, kaj ŝi manĝis, kaj ŝi donis kune ankaŭ al sia edzo, kaj li manĝis.

8. Kaj ili aŭdis la voĉon de Dio la Eternulo, kiu marŝis en la ĝardeno dum la malvarmeto de la tago; kaj Adam kaj lia edzino kaŝiĝis de Dio la Eternulo inter la arboj de la ĝardeno.

9. Kaj Dio la Eternulo vokis Adamon, kaj diris al li: Kie vi estas? – 10. Kaj tiu diris: Vian voĉon mi aŭdis en la ĝardeno, kaj mi ektimis, ĉar mi estas nuda; kaj mi kaŝis min. – 11. Kaj Dio diris: Kiu diris al vi, ke vi estas nuda? Ĉu vi ne manĝis de la arbo, pri kiu Mi ordonis al vi, ke vi ne manĝu de ĝi? – 12. Kaj Adam diris: La edzino, kiun vi donis al mi kiel kunulinon, ŝi donis al mi de la arbo, kaj mi manĝis. – 13. Kaj Dio la Eternulo diris al la virino: Kial vi tion faris? Kaj la virino diris: La serpento tromplogis min, kaj mi manĝis.

14. Kaj Dio la Eternulo diris al la serpento: ĉar vi tion faris, tial estu malbenita inter ĉiuj brutoj kaj inter ĉiuj bestoj de la kampo; sur via ventro vi irados kaj teron vi manĝados dum via tuta vivo. – 15. Kaj Mi metos malamikecon inter vi kaj la virino kaj inter via idaro kaj ŝia idaro; ĝi frapados vian kapon, kaj vi pikados ĝian kalkanon.

16. Al la virino Li diris: Mi multigos viajn suferojn dum via gravedeco; en doloro vi naskados infanojn; kaj al via viro vi vin tiros, kaj li regos super vi.

17. Kaj al Adam Li diris: ĉar vi obeis la voĉon de via edzino, kaj vi manĝis de la arbo, pri kiu Mi ordonis al vi, dirante, ke vi ne manĝu de ĝi, tial malbenita estu la tero pro vi; kun suferoj vi manĝados de ĝi dum via tuta vivo. – 18. Kaj domojn kaj pikajojn ĝi kreskigos por vi, kaj vi manĝados herbojn de kampo. – 19. En la ŝvito de via vizaĝo vi manĝados panon, ĝis vi revenos en la teron, el kiu vi estas prenita; ĉar vi estas polvo kaj refariĝos polvo.

20. Kaj Adam donis al sia edzino la nomon Eva, ĉar ŝi estis patrino de ĉiuj vivantoj.

21. Kaj Dio la Eternulo faris por Adam kaj por lia edzino vestojn el felo, kaj Li vestis ilin. – 22. Kaj Dio la Eternulo diris: Jen Adam fariĝis kiel unu el Ni, sciante bonon kaj malbonon; nun eble li etendos sian manon kaj prenos ankaŭ de la arbo de vivo [*vesta pen ischlachyado velakach mehetz hachayim*] kaj manĝos kaj vivos eterne.

23. Kaj Dio la Eternulo eligis lin el la Edena ĝardeno, por ke li prilaboradu la teron, el kiu li estis prenita. – 24. Kaj Li elpelis Adamon, kaj

lokis antaŭ la Edena ĝardeno la kerubon¹ kaj la turniĝantan flaman glavon, por gardi la vojon al la arbo de vivo.

15. – Sub infaneca kaj iafoje ridinda imago, se oni alligiĝas al la formo, la alegorio ofte kaŝas plej grandajn veraĵojn. Ĉu estas, unuavide, fabelo pli absurda ol tiu pri Saturno, la dio, kiu voradis ŝtonojn, ilin prenante por siaj filoj? Sed tamen, kio ja estas pli profunde filozofia kaj vera ol tiu figuro, se oni serĉas ties moralan sencon! Saturno estas la personigo de la tempo; ĉar ĉiuj ekzistaĵoj estas verko de la tempo, li do estas patro de ĉio ekzistanta; sed ankaŭ ĉio detruigiĝas kun la tempo. Saturno manĝeganta ŝtonojn simbolas la detruadon, far la tempo, de la plej duraj korpoj, kiuj ja estas liaj filoj, ĉar ili formiĝis kun la tempo. Kaj kiu, laŭ tiu sama alegorio, eskapas el tiu detruado? Ja Jupitero, simbolo de la supera inteligenteco, de la spirita principo, kiu estas nedetruenda. Tiel natura montriĝas tiu imago, ke en la moderna lingvo, sen aludo al la antikva fabelo, oni diras, parolante pri io fine ruiniĝinta, ke ĝi estis vorita de la tempo, rongiĝinta, ruinigita de la tempo.

La tuta pagana mitologio efektive estas nenio alia, ol vasta alegoria bildo pri la diversaj flankoj, bonaj kaj malbonaj, de la homaro. Por tiu, kiu serĉas ĝian spiriton, ĝi estas kompleta kurso de plej alta filozofio, same kiel niaj modernaj fabeloj. La absurdo kuŝis en tio, ke oni prenis la formon por la fundo.

16. – La samo estas kun la Genezo, kie oni devas duonvidi grandajn moralajn veraĵojn sub materialaj figuroj,

¹ El la hebrea *cherub*, *keroub*, bovo, *charab*, plugi: anĝelo de la dua ĥoro de la unua hierarkio, kiun oni figuris kun kvar flugiloj, kvar vizaĝoj kaj bovaj piedoj.

kiuj, prenite laŭlitere, estus tiel absurdaj kiel se, en niaj fabeloj, oni ankaŭ laŭlitere prenis la scenojn kaj la dialogojn atribuitajn al la bestoj.

Adamo personigas la homaron; lia kulpo individuigas la malfortecon de la homo, en kiu superregas la materiaj instinktoj, kiujn li ne scias kontraŭstari.¹

La arbo, kiel arbo de vivo, prezentas la emblemon de la spirita vivo; kiel arbo de la Sciado, ĝi estas la emblemo de la konscio, kiun la homo akiras pri bono kaj malbono per la disvolviĝo de sia intelekto kaj de la libera volo, laŭ kiu li elektas inter ambaŭ. Ĝi difinas la punkton, kie la homa animo, ĉesante esti gvidata sole nur de la instinktoj, ekposedas sian liberecon kaj fariĝas respondeca pri siaj agoj.

La frukto de la arbo simbolas la celon de la materialaj deziroj de la homo; ĝi alegorias avidon kaj volupton, konkretigas, per unu sola figuro, la motivojn de forlogiĝo en malbonon. Ĝin manĝi signifas cedi al la tento. La arbo staras en la mezo de la plezurĝardeno por montri, ke la logo troviĝas en la sino mem de la ĝuoj, kaj por atentigi, ke, sin fordonante al la materiaj ĝuoj, la homo alkroĉiĝas al la Tero kaj deflankiĝas for de sia spirita destino.²

¹ Estas hodiaŭ plene rekonate, ke la hebrea vorto *haadam* ne estas propra nomo kaj signifas: *la homoj entute, la homaro*, kio disbatas la tutan konstruaĵon starigitan sur la personeco de Adamo.

² En neniu teksto estas specifite, ke la frukto estas *pomo*; tiun vorton oni trovas nur ĉe porinfanaj versioj. La vorto en la hebrea teksto estas *peri*, kiu havas samajn signifojn kiel en la franca, sen difino pri la specio, kaj povas esti prenita laŭ la sencoj materiala, morala, alegoria, krom ankaŭ propra aŭ figura. Ĉe la Izraelidoj, ne estas deviga interpreto; kiam iu vorto havas plurajn signifojn, ĉiu ĝin laŭvole komprenas, se nur lia interpreto ne kontraŭus la gramatikon. La vorto *peri* estas tradukita en la latinan per *malum*, kiu respondas tiel al pomo kiel ankaŭ al ĉiaspeca frukto. Ĝi devenas de la greka

La morto, pri kiu li estas minacata en la okazo se li ne obeos la malpermeson al li faritan, estas averto pri la neeviteblaj sekvoj, fizikaj kaj moralaj, kiujn kuntrenas la malobeo de la diaj leĝoj, gravuritaj de Dio en lia konscienco. Klare evidentas, ke ĉi tie ne temas pri la korpa morto, ĉar, post sia kulpo, Adamo ankoraŭ longe vivis; temas ja pri la spirita morto, aŭ, alivorte, pri la perdo de la bonaĵoj rezultantaj el la morala progreso, perdo bildigita de lia forpelo el la plezurĝardeno.

17. – La serpento hodiaŭ estas tre malproksime de tio, ke ĝi estus rigardata kiel la tipo de ruzeco. Ĝi do ĉi tie rolas pli pro sia formo, ol pro sia karaktero, ja kiel aludo al la perfideco de la malbonaj konsiloj, kiuj, subŝoviĝante kiel serpento, ofte ne estas suspektataj de la homo. Krom tio, se la serpento, pro la trompo kontraŭ la virino, estis kondamnita rampadi sur la ventro, oni devas kompreni, ke en la komenco tiu besto havis krurojn kaj do ne estis ia serpento. Kial do trudi al la naiva kaj kredema fido de la infanoj, kiel veraĵon, tiel evidentajn alegoriojn, per kio oni erarigas ilian juĝon kaj igas ilin poste rigardi la Bibliion kiel ian plektaĵon el absurdaj fabeloj?

Oni devas krome rimarki, ke la hebrea vorto *nâhâsch*, kies traduko estas *serpento*, devenas de la radiko *nâhâsch*, kiu signifas *fari sorĉojn, diveni kaŝitaĵojn*, kaj kiu do povas havi la signifon: *sorĉisto, divenisto*. Ĝi troviĝas, kun tiu signifo, en la Genezo mem, ĉap. XLIV, par. 5 kaj 15, rilate al la pokalo, kiun Jozef ordonis meti en la sakon de Benjamin: “Ĝi estas ja tiu pokalo, el kiu trinkas mia sinjoro, kaj li ankaŭ aŭguras

melon, participo de la verbo *melo*, interesi, prizorgi, altiri.

(*nâhâsch*).¹ – ĉu vi ne scias, ke tia homo, kiel mi, facile divenos (*nâhâsch*)?” – En la libro *Nombroj*, ĉap. XXIII, par. 23: “ĉar ne ekzistas sorĉado (*nâhâsch*) en Jakob, nek aŭgurado en Izrael.” De tio venis, ke la vorto *nâhâsch* ankaŭ prenis la signifon de *serpento*, rampulo, kiun la sorĉistoj pretendis sorĉi, aŭ kiun ili uzis en siaj sorĉoj.

Ne aliloke krom en la traduko de la Sepdek – kiuj, laŭ Hutcheson, multloke mistradukis la hebrean tekston, – redaktita en la greka lingvo dum la dua jarcento de la kristana erao, la vorto *nâhâsch* estas tradukita kiel *serpento*. La malĝustajoj de tiu traduko sendube rezultis el la modifoj, kiujn la hebrea lingvo intertempe spertis, ĉar la hebrea en la tempo de Moseo estis morta lingvo, kiu diferencis de la vulgara hebrea tiel same, kiel la antikva greka kaj la literatura araba diferencas de la modernaj greka kaj araba.²

Estas do verŝajne, ke Moseo komprenis, kiel deloganton de la virino, la nesinĝenan deziron ekkoni la kaŝitaĵojn, deziron instigatan de la Spirito de divenado, kio konformas al la primitiva senco de la vorto *nâhâsch*, nome diveni, krom ankaŭ, aliflanke, al tiuj vortoj: “Dio scias, ke en la tago, en kiu vi manĝos ion de ili, malfermiĝos viaj okuloj kaj vi estos kiel Dio. – Kaj la virino vidis, ke la arbo estas dezirinda por saĝiĝi (léaskil), kaj ŝi prenis de ŝiaj fruktoj.” Oni nepre ne forgesu, ke Moseo volis malpermesi ĉe la Hebreoj la arton de divenado praktikata ĉe la Egiptoj, kiel ĝin atestas lia malpermeso, ke tiuj

¹ Ĉu el tiu fakto oni konkludu, ke la mediumeco per *glaso kun akvo* estis konata al la Egiptoj? (*Revue Spirite*, de junio 1868, p. 161).

² La vorto *nâhâsch* ekzistis en la egipta lingvo kun la signifo *nigrolo*, verŝajne tial, ke la nigrujoj estis dotitaj per sorĉpovo kaj divenpovo. Eble ankaŭ tial la asiri-devenaj sfinksoj havis la figuron de nigrolo.

konsultu la mortintojn kaj la Spiriton de Piton. (*La Ĉielo kaj la Infero*, laŭ Spiritismo, ĉap. XII.)

18. – La loko, kie estas dirite: “La Eternulo, (...) marŝis en la ĝardeno dum la malvarmeto de la tago”, estas naiva, iom infaneca bildo, kiun la kritiko ne preterrimarkis; sed ĝi neniel mirigas, se oni konsideras la ideon, kiun la Hebreoj de la primitivaj tempoj faris al si pri Dio. Por tiuj krudaj inteligentoj, nekapablaj koncepti abstraktaĵojn, Dio nepre havus konkretan formon, kaj ili ĉion rilatigis al la homaro kiel al sola konata afero. Tial Moseo parolis al ili, kiel al infanoj, pere de senseblaj imagoj. En la ĉi-traktata okazo, la superega Potenco estas personigita tiel same kiel la paganoj personigis, per alegoriaj figuroj, la virtojn, malvirtojn kaj abstraktajn ideojn. Pli poste la homoj senigis la ideon je la formo tiel same kiel infano, plenkreskinte, serĉas la moralan sencon de la rakontoj, per kiuj oni lin luladis. Oni devas do rigardi tiun lokon kiel ian alegorion de la Diaĵo, persone prizorganta siajn kreitaĵojn. La granda rabeno Wogue ĝin jene tradukis: “Ili aŭdis la voĉon de Dio la Eternulo, kiu marŝis en la ĝardeno, sur la flanko kie naskiĝas la tago.”

19. – Se la kulpo de Adamo litere konsistis en la manĝo de frukto, ĝi nekontesteble ne povus, pro sia preskaŭ infaneca naturo, pravigi la rigorecon, kun kiu ĝi estis punita. Oni ne povus, ankaŭ ne malpli racie, konsenti, ke la fakto estis ĝuste tia, kian oni ĝenerale supozas; alie Dio, ĝin juĝante ne-pardoninda krimo, estus kondamninta sian propran verkon, ĉar ja por ties disvastigo li kreis la homon. Se Adamo en ĉi senco komprenus la malpermeson tuŝi la frukton de la arbo kaj ĝin skrupule obeus, kio fariĝus el la homaro kaj el la decidoj de la Kreinto?

Dio kreis Adamon kaj Evan ne por tio, ke ili restu solaj sur la Tero; tion provas la parolo mem, kiun li diras al ili tuj post ilia formado, kiam ili ankoraŭ troviĝis en la surtera paradizo: “Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili: Fruktu kaj multiĝu, *kaj plenigu la Teron kaj submetu ĝin al vi.*” (*Genezo*, ĉap. I, par. 28.) Ĉar la multiĝado estis leĝo jam detempe de la surtera paradizo, ilia forpelo ne povus havi, kiel kaŭzon, tiun supozitan fakton.

Kio kreditigis tiun supozon, tio estis la sento de honto, kiu regis Adamon kaj Evan antaŭ la rigardo de Dio kaj kiu igis ilin sin kaŝi. Sed tiu honto mem estas komparfiguro: ĝi simbolas la konfuzon, kiun ĉiu kulpinto suferas en la ĉeesto de tiu, kiun li ofendis.

20. – Kia do, definitive, estis tiu kulpo, tiel grava, ke ĝi povis frapi per eterna kondamno la tutan idaron de tiu, kiu ĝin faris? Kain, la fratmurdinto, ne estis tiel severe traktita. Neniu teologo povas ĝin logike difini, ĉar ĉiuj, alkroĉitaj al la litero, turniĝadis en senelira rondo. Ni hodiaŭ scias, ke tiu kulpo ne estas izolita ago de individuo, sed ja ampleksas, kadre de unu sola alegoria fakto, la aron da devodekliniĝoj, kiujn la surtera homaro, ankoraŭ neperfekta, povas kulpi, kaj kiuj resumiĝas jene: *malobeo al la leĝo de Dio*. Jen kial la kulpo de la unua homo, kiu simbolas la homaron, estas simbolita de malobeo ago.

21. – Dirante al Adamo, ke en la ŝvito de sia vizaĝo li prenos manĝon el la tero, Dio simboligas la devigecon de laboro; sed kial el laboro li faris punon? Kia estus la homa inteligento, se li ne disvolvus ĝin per laboro? Kio fariĝus el la Tero, se ĝi ne estus fekundigita, transformita, sanigita per la inteligenta laboro de la homo?

Estas dirite (*Genezo*, ĉap. II, par. 5 kaj 7): “Dio la Eternulo ne pluvigis sur la teron (...) kaj ne ekzistis homo, por prilabori la teron. Kaj Dio la Eternulo kreis la homon el polvo de la tero.” Tiuj vortoj, apudmetitaj al ĉi tiuj: *Plenigu la Teron*, pravas, ne nur, ke la homo, ekde sia origino, estis destinita okupi *la tutan Teron kaj ĝin kultivi*, sed ankaŭ ke la paradizo ne estis ia loko limigita en iu angulo de la globo. Se la prilaboro de la tero devus esti rezulto el la kulpo de Adamo, sekvus do, ke, se Adamo ne pekus, la Tero restus nekulturita kaj ne plenumiĝus la decidoj de Dio.

Kial li diris al la virino, ke pro ŝia kulpo ŝi naskados en doloro? Kial la akuŝdoloro povas esti puno, se ĝi estas organa efiko krom ankaŭ fiziologie pruvita neceso? Kiel povas esti puno io apartenanta al la leĝoj de la Naturo? Ĝuste tion la teologoj absolute ne povis klarigi kaj ja ne povos tiel longe dum ili ne forlasos la vidpunkton, sur kiu ili lokiĝis. Kaj tamen tiuj vortoj, ŝajne tiel kontraŭdiraj, povas esti pravigitaj.

22. – Ni antaŭ ĉio rimarku, ke se, en la momento de la kreado de Adamo kaj Eva, iliaj animoj venis, kiel instruate, el la nenio, ambaŭ ja novicis pri ĉio kaj do nepre ne sciis, kion signifas morti. Estante *solaj* sur la Tero dum ili vivis en la paradizo, ili tial vidis la morton de neniu. Kiel ili do povis kompreni, en kio konsistas la minaco de morto, kiun Dio faris al ili? Kiel Eva povus kompreni, ke naskado en doloro estos puno, se, ĵus naskite por la vivo, ŝi neniam naskis filojn kaj estis la sola virino ekzistanta en la mondo?

La vortoj de Dio estus do tute sensencaj por Adamo kaj Eva. Apenaŭ tirite el la nenio, ili nepre ne sciis, kiel kaj kial ili de tie eliris; ili povis kompreni nek la Kreinton nek la motivon de lia malpermeso al ili. Tute senspertaj pri la kondiĉoj de la vivo, ili pekis kiel infanoj, kiuj agas senscie, kio faras ankoraŭ

pli nekomprenebla la teruran respondecon, per kiu Dio ŝarĝis ilin kaj la tutan homaron.

23. – Sed kio estas senelirejo por la Teologio, tion Spiritismo facile kaj racie klarigas pere de la antaŭekzisto de la animo kaj plureco de la ekzistadoj, sen kiu leĝo ĉio estas mistero kaj anomalio en la homa vivo. Efektive, ni konsentu, ke Adamo kaj Eva jam antaŭe vivis, kaj jen ĉio klariĝas: Dio al ili parolas ne kiel al infanoj sed kiel al estuloj kapablaj lin kompreni kaj kiuj ja lin komprenas, kio evidente pruvas, ke ambaŭ portas antaŭe faritajn akirojn. Ni krom tio konsentu, ke ili estis vivintaj en mondo pli progresinta kaj malpli materia ol la nia, en kiu mondo la spirita laboro anstataŭas la korpan; ke pro sia ribelo kontraŭ la leĝo de Dio, figurita per malobeo, ili estis de tie forpelitaj kaj punekzilitaj sur la Tero, kie la homo, pro la naturo de la globo, estas devigita al korpa laboro, kaj ni rekonos, ke Dio pravis, dirante al ili: En la mondo, kie de nun vi loĝos, “vi prilaboros la teron kaj el ĝi prenos manĝon en la ŝvito de via vizaĝo”; kaj al la virino: “En doloro vi naskados infanojn”, ĉar tia estas la kondiĉo de tiu mondo. (Ĉap. XI, n-roj 31 kaj sekvantaj.)

La surtera paradizo, kies postsignojn oni vane serĉadas sur la Tero, estis do la refiguraĵo de tiu feliĉa mondo, en kiu iam loĝis Adamo, aŭ, pli ĝuste, tiu raso de Spiritoj, kies personigo li estas. La elpelo el la paradizo signas tiel la momenton, kiam tiuj Spiritoj venis enkarniĝi inter la loĝantoj de nia mondo, kiel ankaŭ la sekvantan aliiĝon de situacio. La anĝelo, kiu, tenante flaman glavon, malpermesas eniron en la paradizon, simbolas la neebulon, por Spiritoj el malprogresintaj mondoj, eniri la mondojn progresintajn antaŭ ol ĝin meriti pro sia elpuriĝo. (Vidu ĉi-sube: ĉap. XIV, n-roj 8 kaj sekvantaj.)

24. – Kaj Kain (post la murdo de Habel) diris al la Eternulo: Pli granda estas mia puno, ol kiom mi povos elporti. – Jen Vi forpelis min hodiaŭ de sur la tero, kaj mi devas min kaŝi de antaŭ Via vizaĝo, kaj mi estos vaganto kaj forkuranto sur la tero, kaj iu ajn, kiu min renkontos, mortigos min. – Kaj la Eternulo diris al li: Sciu, ke al iu, kiu mortigos Kainon, estos venĝite sepoŭle. Kaj la Eternulo faris sur Kain signon, ke ne mortigu lin iu, kiu lin renkontos.

Kaj Kain foriris de antaŭ la Eternulo, kaj loĝiĝis en la lando Nod, oriente de Eden. – Kaj Kain ekkonis sian edzinon, kaj ŝi gravediĝis, kaj ŝi naskis Ĥanoĥon. Kaj li konstruis (*vaiehi bôné*; laŭlitere: *estis konstruanta*) urbon, kaj li donis al la urbo nomon laŭ nomo de sia filo: *Ĥanoĥ* (Enochia). (*Genezo*, ĉap. IV, par. 13 ĝis 16).

25. – Se oni sin kroĉas al la litero de la Genezo, oni venas al jenaj sekvoj: Adamo kaj Eva estis solaj en la mondo post sia elpelo el la surtera paradizo; nur poste ili havis siajn filojn Kain kaj Habel. Nu, Kain, murdinte sian fraton, loĝiĝis en alia lando kaj ne plu revidis sian patron kaj sian patrinon, kiuj denove restis solaj. Nur post tre longa tempo, en la aĝo de cent tridek jaroj, Adamo havis trian filon, kiu ricevis la nomon Set. Post la naskiĝo de Set, li ankoraŭ vivis, laŭ la biblia geneologio, okcent jarojn kaj havis pliajn filojn kaj filinojn. Kiam Kain do iris por loĝiĝi oriente de Edeno, nur tri personoj ekzistis sur la Tero: lia patro, lia patrino kaj li *sola* kun ambaŭ. Sed Kain havis edzinon kaj filon. Kiu povus esti tiu virino kaj kie li ŝin prenis kiel edzinon? Estas dirite en la hebrea teksto: *Li estis konstruanta urbon*, kaj ne *li konstruis*, kio indikas agon duman, ne postan. Sed urbo supozigas loĝantojn, ĉar ne imageblas, ke Kain ĝin konstruis por si, sia edzino kaj sia filo, nek ke li sola povus ĝin konstrui.

Oni do, el tiu rakonto mem, devas konkludi, ke tiu lando nepre jam havis loĝantaron, kiu tute ne povus esti idaro de Adam, ĉar tiam ĝi limiĝis al unu sola filo, nome Kain.

La ekzisto de aliaj loĝantoj ankaŭ estas atestata de jenaj vortoj de Kain: “Mi estos vaganto kaj forkuranto sur la tero, kaj

iu ajn, kiu min renkontos, mortigos min”, krom ankaŭ de la respondo de Dio al li. Kiun li timus, ke ĉi tiu lin mortigos, kaj kiel utilis la signo, kiun Dio faris sur li por lin antaŭgardi, se li ja neniu renkontos? Se do ekzistis sur la Tero aliaj homoj krom la familio de Adamo, tio estas tial, ke ili tie jam troviĝis antaŭ Adamo, kaj de tio oni deduktas ĉi tiun konkludon, tiritan el la teksto mem de la Genezo, nome ke Adamo estas nek la unua nek la sola patro de la homa genro. (Ĉap. XI, n-ro 34.)¹

26. – Necesis la scioj, kiujn Spiritismo alportis pri la rilatoj inter la spirita principo kaj la principo materia, pri la naturo de la animo, ties kreado en stato de simpleco kaj senscienco, ties kuniĝo kun la korpo, ties senĉesa progressa marŝo tra sinsekvaj ekzistadoj kaj tra la mondoj, kiuj prezentas aliajn ŝtupojn sur la vojo de l’ perfektiĝo, ties laŭgrada liberiĝo de la influo de la materio per la uzado de sia libera volo, pri la kaŭzo de ties bonaj aŭ malbonaj inklinoj kaj de ties kapablecoj, pri la fenomeno de naskiĝo kaj morto, pri la situacio de la Spirito en la vaganteco, kaj fine pri la estonteco kiel premio al ĝiaj klopodoj por pliboniĝi kaj al ĝia persistado en la bono, por ke lumo verŝiĝu sur ĉiujn partojn de la spirita Genezo.

Dank’ al tiu lumo, la homo de nun scias, de kie li venas, kien li iras, kial li troviĝas sur la Tero kaj kial li suferas. Li scias, ke sian estontecon li tenas en siaj manoj kaj ke la daŭro de lia mallibereco sur ĉi tiu mondo nur de li mem dependas. Senigita

¹ Ne estas nova ĉi tiu ideo. La Peyrère, klera teologo de la dek-sepa jarcento, en sia libro *Preadamitas*, verkita en la latina kaj publikigita en 1655, eltiris el la originala teksto mem de la Biblio, ŝanĝita de la tradukoj, la evidentan pruvon pri tio, ke la Tero estis loĝata antaŭ la veno de Adamo. Ĉi tiun opinionon hodiaŭ konsentas multaj kleraj ekleziuloj.

je la mizera kaj malvasta alegorio, la Genezo montriĝas al li grandioza kaj inda je la majesto, boneco kaj justeco de la Kreinto. Rigardata el ĉi tiu vidpunkto, la Genezo konfuzos la nekredemon kaj ĝin venkos.

LA MIRAKLOJ LAŬ SPIRITISMO

ĈAPITRO XIII

KARAKTEROJ DE LA MIRAKLOJ

La mirakloj en la teologia senco – Spiritismo ne faras miraklojn
Ĉu Dio faras miraklojn? – Tio supernatura kaj la religioj.

La mirakloj en la teologia senco

1. – En sia etimologia senco, la vorto *miraklo* (de *mirari*, miri) signifas: *mirinda, afero miriga, eksterordinara*. La Akademio difinis ĝin jene: *Ago de la dia povo kontraŭa al la konataj leĝoj de la Naturo*.

En sia ordinara senco, tiu vorto perdis, kiel tiom da aliaj, sian primitivan signifon, kiu, el karaktero ĝenerala, havis sian uzadon limigita al aparta ordo de faktoj. Laŭ la kompreno de la amasoj, *miraklo* entenas la ideon pri eksterordinara

fakto; en la teologia senco, ĝi estas nuligo de la leĝoj de la Naturo, per kiu Dio manifestas sian povon. Tia estas efektive ĝia vulgara signifo, kiu fariĝis ĝia propra senco, kaj oni nur por komparo kaj metafore aplikas la vorton al la ordinaraj cirkonstancoj de la vivo.

Unu el la karakteroj de la ĝustasenca miraklo estas ĝia neeksplikebleco kaŭze ĝuste de tio, ke ĝi efektiviĝas ekster la naturaj leĝoj. Kaj ĝuste tian ideon oni tiel forte ligas al ĝi, ke, se iu mirakleca fakto trovas sian klarigon, oni diras, ke jam ne temas pri miraklo, kiel ajn miriga ĝi estas. Por la Eklezio, la valoro de la mirakloj troviĝas ĝuste en ties supernatura origino kaj en ties neeksplikebleco, kaj ĝi tiel fortike fiksiĝis sur tiu punkto, ke ĉian similigon de la mirakloj al la fenomenoj de la Naturo ĝi rigardas herezo, atenco kontraŭ la fido; ke ĝi ekskomunikis kaj eĉ ŝtiparumis multe da personoj pro tio, ke ili ne volis kredi certajn miraklojn.

Ankoraŭ alian karakteron havas miraklo, nome ĝi estas eksterkutima, unuopa, escepta. Se iu fenomeno refariĝas, ĉu spontane, ĉu per ago de la volo, tio signifas, ke ĝi estas submetita al ia leĝo, kaj tiam, ĉu tiu leĝo estas konata aŭ ne, ĝi ne povas esti ia miraklo.

2. – Antaŭ la okuloj de nekleruloj, la Scienco ĉiutage faras miraklojn. Se homo efektive mortinta estos revekita en la vivon, tio estos vera miraklo, ĉar ĝi estos fakto kontraŭa al la leĝoj de la Naturo. Sed se ĉe tiu homo estas nur ŝajnoj de morto, se en li ankoraŭ restas ia *latenta vivoforto*, kaj la Scienco, aŭ ia magneta ago, sukcesas lin reanimi, tiam por kleraj homoj okazis natura fenomeno, sed de la malklera vulgarularo tiu fakto estos rigardata kiel miraklo. Fizikisto suprenigu elektran kajton el la mezo de certaj herbokampoj, faligu fulmon sur arbon, kaj sendube tiun novan Prometeon

oni rigardos dotita per diabla povo. Sed se Josuo estus haltiginta la movon de la Suno, aŭ, prefere, de la Tero, jen oni tie havus la veran miraklon, ĉar ekzistas nenia magnetizisto sufiĉe pova por estigi tielan miregindaĵon.

La jarcentoj de malklereco estis riĉaj je mirakloj, ĉar oni tiam rigardis supernatura ĉion, kies kaŭzon oni ne konis. Laŭmezure kiel la Scienco malkaŝis novajn leĝojn, malvastiĝis la rondo de tio mirakleca; sed ĉar la Scienco ne estis esplorinta la tutan kampon de la Naturo, tial ankoraŭ unu ties larĝa parto restis sub la regado de tio mirakleca.

3. – Elpelite de la Scienco el la kampo de la materio, tio mirakleca retretis en la kampon de la spiriteco, kie ĝi trovis sian lastan ŝirmejon. Demonstrante, ke la spirita elemento estas unu el la vivaj fortoj de la Naturo, – forto senĉese konkuranta kun la materia forto – Spiritismo reveniĝas ties fenomenojn en la rondon de la naturaj efikoj, ĉar kiel la aliaj, ankaŭ tiuj efikoj estas submetitaj al leĝoj. Se tio mirakleca estos elpelita el la spirita kampo, ĝi ne plu havos pravon de ekzisto, kaj nur tiam oni povos aserti, ke jam forpasis la tempo de la mirakloj. (Ĉap. I, n-ro 18.)

Spiritismo ne faras miraklojn

4. – Spiritismo venas do siavice, fari, kion ĉiu Scienco faris ĉe sia alveno: malkaŝi novajn leĝojn kaj sekve klarigi la fenomenojn ampleksatajn de tiuj leĝoj.

Estas vere, ke tiuj fenomenoj estas ligitaj al la ekzisto de la Spiritoj kaj ties agado en la materia mondo; nu, jen, oni diras, en kio konsistas tio supernatura. Sed tiam necesus pruvi, ke la Spiritoj kaj ties manifestiĝoj estas kontraŭaj al la leĝoj de

la Naturo; ke tie ne plenumiĝas nek povas plenumiĝi iu el tiuj leĝoj.

Spirito estas nenio alia, ol la animo, kiu postvivas la korpon; li estas la ĉefa estaĵo, ĉar li ne mortas, dum la korpo estas nura pereema akcesoraĵo. Lia ekzisto do estas tute natura, kiel dum la enkarniĝo, tiel ankaŭ post ĝi; li estas submetita al la leĝoj regantaj la spiritan principon, kiel la korpo estas submetita al tiuj, kiuj regas la principon materian, sed ĉar ambaŭ principoj havas inter si ian necesan afinecon kaj senĉese reagas unu sur la duan; ĉar el ilia samtempa agado fontas la movo kaj la harmonio de la tuto, el tio rezultas, ke spiriteco kaj materieco estas du partoj egale naturaj de unu sama tutaĵo, kaj ke la unua ne estas ia escepto, ia anomalio en la ordo de la aferoj

5. – Dum sia enkarniĝo, la Spirito agas sur la materion pere de sia fluideca korpo aŭ perispirito, kio same fariĝas dum la neenkarniĝa stato. Kiel Spirito kaj en la limo de siaj kapablecoj, li faras, kion li faris kiel homo; ĉar li ne plu disponas la karnan korpon kiel instrumenton, li nur utiligas, kiam necese, la materiajn organojn de iu enkarnulo, kiu tiam iĝas tio, kion oni nomas *mediumo*. La Spirito tiam agas kiel iu, kiu, ne povante mem skribi, utiligas la manon de sekretario; aŭ kiu, ne scipovante iun lingvon, helpas sin per interpretisto. Sekretario kaj interpretisto estas la *mediumoj* por enkarnulo, dum *mediumo* estas la sekretario aŭ la interpretisto por iu Spirito.

6. – Ĉar ne samas, kiel en la stato de enkarniĝo, la medio, en kiu agas la Spiritoj, nek ties manieroj de agado, tial malsamaj estas la koncernaj efikoj. Tiuj efikoj ŝajnas supernaturaj nur tial, ke ili ekestas helpe de agantoj diferencaj de tiuj, kiujn ni uzas. Sed se tiuj agantoj troviĝas en la Naturo kaj se la

manifestiĝoj okazas laŭ certaj leĝoj, estas do en ili nenio supernatura aŭ mirakleca. Antaŭ ol estis konataj la proprecoj de la elektro, la elektraj fenomenoj estis rigardataj de certaj personoj kiel miregindaĵoj; de kiam la kaŭzo konatiĝis, malaperis tio mirakleca. Same okazas kun la spiritismaj fenomenoj, kiuj estas ne malpli fremdaj al la naturaj leĝoj, ol la fenomenoj elektraj, akustikaj, lumaj kaj alispecaj, kiuj estis la fonto de amaso da superstiĉaj kredoj.

7. – Sed, oni demandos, ĉu vi konsentas, ke Spirito povas levi tablon kaj teni ĝin pendants en la spaco sen apogpunkto; ĉu en tio ne estas nuligo de la leĝo de gravito? – Jes, de la leĝo konata; sed ĉu oni tamen konas ĉiujn leĝojn? Antaŭ ol oni eksperimentis pri la levoforto de certaj gasoj, kiu asertus, ke peza maŝino, portanta multe da homoj, povus superi la altiran forton? Ĉu tio ne devus ŝajni, en la okuloj de la vulgarularo, mirakleca, diabla? Kiu sin proponus, antaŭ jarcento, por transsendi mesaĝon je distanco de kvincent leŭgoj kaj ricevi respondon post kelke da minutoj, tiu estus rigardata kiel frenezulo; se li tion plenumus, oni kredus, ke li havas la diablon sub siaj ordonoj, ĉar tiam nur la diablo kapablus tiel rapide translokiĝi; tio tamen hodiaŭ estas rigardata kiel ne nur ebla sed ankaŭ tute natura afero. Kial do ia nekonata fluido ne havus la proprecon kontraŭpezi, en difinitaj cirkonstancoj, la efikon de la gravito, kiel hidrogeno senefikigas la pezon de balono? Jen kio efektive okazas ĉe la ĉi-pri-traktata afero. (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. IV.)

8. – Ĉar ili troviĝas en la Naturo, la spiritismaj fenomenoj okazis do en ĉiuj tempoj; sed ĝuste ĉar ili ne povis esti studataj per la materialaj rimedoj disponeblaj por la ordinara

Scienco, ili tial restis, multe pli longe ol aliaj, en la regiono de tio supernatura, el kie Spiritismo nun ilin elirigas.

Bazita sur neklarigeblaj ŝajnoj, tio supernatura lasas liberan kuron al la imago, kiu, erarvagante en la nekonataĵo, naskas la superstiĉajn kredojn. Racia klarigo, bazita sur la leĝoj de la Naturo, rekondukas la homon sur la kampon de la realo kaj tiel metas baron al la ekscesoj de la imago, krom ankaŭ detruas la superstiĉojn. Anstataŭ vastigi la terenon de tio supernatura, Spiritismo ĝin restriktas ĝis ties ekstremaj limoj kaj ĝin elpelas el ĝia lasta ŝirmejo. Se Spiritismo kredigas la eblecon de certaj faktoj, ĝi tamen nebligas, ke oni kreu multajn aliajn, ĉar ĝi demonstras, sur la kampo spirita, same kiel la Scienco sur la materia kampo, tion, kio eblas, kaj tion, kio neblas. Sed, ĉar ĝi ne pretendas eldiri la lastan vorton pri ĉiuj aferoj, eĉ ne pri siaj propraj objektoj, ĝi ne sin prezentas kiel absolutan regulatoron de tio ebla kaj flanke lasas la sciojn, kiuj estas rezervitaj por la estonteco.

9. – La spiritismaj fenomenoj konsistas en la malsamaj manieroj, kiel manifestiĝas la animo aŭ Spirito, ĉu dum la enkarniĝo, ĉu dum la elkarniĝa stato. Ĝuste per siaj manifestiĝoj la animo malkaŝas sian ekziston, sian supervivon, sian individuecon; pri ĝi oni juĝas laŭ ties efikoj; ĉar la kaŭzo estas natura, tia ankaŭ estas la efiko. Ja tiaj efikoj konsistigas la specialan objekton de la esploroj kaj studoj pri Spiritismo, cele al tio, ke oni akiru sciadon kiel eble plej kompletan, tiel pri la naturo kaj la atributoj de la animo, kiel ankaŭ pri la leĝoj regantaj la spiritan principon.

10. – Por tiuj, kiuj neas la ekziston de la memstara spirita principo kaj kiuj sekve neas la animon individuan kaj postvivantan, la tuta Naturo enteniĝas en la palpebla materio;

ĉiuj fenomenoj rilataj al la spiriteco estas, en iliaj okuloj, supernaturaj kaj do kimeraj. Ne konsentante la kaŭzon, ili ne povas konsenti ties efikojn, kaj kiam tiuj efikoj estas evidentaj, ili atribuas ilin al imagemo, iluzio, halucino, kaj rifuzas ilian profundigon. El tio fontas, ĉe ili, ia antaŭjuĝa opinio, kiu ilin nekapabligas por justa taksado de Spiritismo, ĉar tiu opinio deiras de la principo, kiu neas ĉion, kio ne estas materia.

11. – Sed el tio, ke Spiritismo akceptas tiujn efikojn rezultantajn el la ekzisto de la animo, ne sekvas, ke ĝi akceptas ĉiujn efikojn kvalifigitajn kiel miraklecaj kaj ke ĝi pretendas ilin pravigi kaj kreditigi; ke ĝi fariĝos la ĉampiono de ĉiuj viziuloj, de ĉiuj utopioj, de ĉiuj sistemaj strangaĵoj, de ĉiuj miraklecaj legendoj. Necesus ĝin tre supraĵe koni, por tiele pensi. Ĝiaj kontraŭuloj pretendas kontraŭmeti al ĝi nerefuteblan argumenton, kiam, farinte erudiciajn esplorojn pri la konvulsuloj de Saint-Médard, pri la Cevenaj kamizardoj aŭ pri la Loudunaj religuloj, ili sukcesis trovi evidentajn, por neniu kontesteblajn trompaĵojn. Sed ĉu tiaj historioj prezentas la evangelion de Spiritismo? Ĉu ĝiaj adeptoj iam neis, ke ĉarlatanismo profitcele ekspluatis certajn faktojn; ke la imago ilin elpensis; ke fanatikeco ilin pleje troigis? Spiritismo rilatas tiel same malfavore al la ekstravagancoj, kiujn oni faras en ĝia nomo, kiel la Scienco rilate al la misuzoj de la malklereco, kaj kiel la vera religio rilate al la ekscesoj de fanatikeco. Multaj kritikistoj taksas Spiritismon nur laŭ la ferakontoj kaj la popollegendoj, kiuj estas ties fikciaĵoj. Same valorus juĝi la Historion laŭ la historiaj romanoj aŭ laŭ la tragedioj.

12. – La spiritismaj fenomenoj estas ofte spontanaj kaj ekestas sen antaŭe farita ideo flanke de tiuj personoj, kiuj la plej malmulte pensas pri ili. Estas iuj, kiuj en certaj cirkonstan-

coj, povas esti okazigataj de agantoj nomataj *mediumoj*. En la unua okazo, la mediumo *ne konscias* tion, kio fariĝas pro lia perado; en la dua, li agas plenscie, kaj de tio venas la distingiĝo inter *mediumoj konsciaj* kaj *mediumoj preterkonsciaj*. Ĉi tiuj estas pli multnombraj kaj ofte troveblas inter la plej obstinaj nekredantoj, kiuj do praktikas Spiritismon senscie kaj nevole. Ĝuste pro tio la spontanaj fenomenoj havas ĉefan gravecon, ĉar oni ne povas rigardi suspektinda la sincerecon de tiuj, per kiuj ili okazas. Estas ĉi tie same kiel ĉe somnambulismo, kiu, ĉe unuj personoj estas natura kaj nevola, dum ĉe aliaj estas kaŭzata de magneta agado.¹

Sed egale ĉu tiuj fenomenoj rezultas, aŭ ne, de vola ago, ilia primara kaŭzo estas ja unu sama kaj neniel malproksimiĝas de la naturaj leĝoj. La mediumoj do estigas absolute nenion supernaturan kaj sekve faras *nenian miraklon*. Eĉ la subitaj resanigoj ne estas pli miraklaj ol la aliaj efikoj, ĉar ili rezultas el la agado de ia fluideca aganto, kiu rolas kiel terapeŭtika aganto, kies proprecoj ne estas malpli naturaj pro tio, ke ili ĝis nun restis nekonataj. Estas do tute malĝusta la nomo *miraklistoj*, kiun la kritikistoj, nesciantaj la principojn de Spiritismo, donas al certaj mediumoj. La karaktero de *mirakloj*, donita, por komparo, al tiu speco de fenomenoj, nur povas erarigi pri ilia vera karaktero.

13. – La partopreno de nevideblaj inteligentoj en la spiritismaj fenomenoj ne faras ĉi tiujn pli miraklaj ol ĉiuj ceteraj fenomenoj kaŭzataj de nevideblaj agantoj, ĉar tiuj nevideblaj estaĵoj, kiuj loĝas la spacojn, estas unu el la potencoj de la

¹ *La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. V. – *Revue Spirite*; ekzemploj: decembro 1865, p. 370; aŭgusto 1865, p. 231.

Naturo, potenco kies agado estas senĉesa, kiel sur la materian, tiel ankaŭ sur la moralan mondon.

Klarigante tiun potencon, Spiritismo havigas al ni la ŝlosilon de amaso da aferoj neklarigitaj kaj ja neklarigeblaj per aliaj rimedoj, kiuj aferoj, en tre foraj tempoj, estis rigardataj kiel mirakloj. Same kiel magnetismo, ĝi malkaŝas leĝon, se ne nekonatan, almenaŭ miskomprenatan; aŭ, por pli ĝuste diri, oni konis la efikojn, ĉar en ĉiuj tempoj ili okazis, sed oni ne konis la koncernan leĝon, kaj ja la nescio pri tiu leĝo naskis la superstiĉon. El la konado de tiu leĝo rezultas la malapero de tio mirakleca, kaj la fenomenoj eniras la vicon de la naturaj aferoj. Jen kial ne agas pli mirakle spiritistoj, kiuj igas tablon turniĝi aŭ forpasintojn skribi, ol kuracisto, kiu revivigas agonianton, aŭ fizikisto, kiu faligas fulmon. Kiu pretendus, helpe de tiu scienco, *fari miraklojn*, estus aŭ nekonanto pri tiu objekto, aŭ trompanto de stultuloj.

14. – Ĉar Spiritismo repuŝas ĉian ekzisteblon al miraklecaĵoj, ĉu ekster ĝi ekzistas mirakloj en la ordinara senco de ĉi tiu vorto?

Ni unue diru, ke inter la faktoj rigardataj kiel miraklaj, okazintaj antaŭ la alveno de Spiritismo kaj ankoraŭ nun okazantaj, la pliparto, se ne la tutaĵo, trovas sian klarigon en la novaj leĝoj, kiujn ĝi venis malkaŝi. Tiuj faktoj do enviciĝas, kvankam kun alia nomo, en la ordon de la spiritismaj fenomenoj, kaj kiel tiaj ili havas nenion supernaturan. Oni tamen bone komprenu, ke ĉi tie temas pri aŭtentaj faktoj, ne pri tiuj, kiuj, sub la nomo mirakloj, estas fruktoj de malnobla ĉarlatanado, celanta ekspluati la kredemon. Ni des malpli aludas certajn legendajn faktojn, kiuj eble havis, en sia origino, ian verecon, sed kiujn la superstiĉo troigis ĝis absurdo. Ĝuste sur tiujn

faktojn Spiritismo ĵetas lumon, havigante la rimedojn apartigi eraron de vero.

Ĉu Dio faras miraklojn?

15. – Koncerne la ĝustasencajn miraklojn, Dio, ĉar al li nenio neblas, sendube povas ilin fari. Ĉu li tamen ja ilin faras? aŭ, alivorte, ĉu li nuligas la leĝojn, kiujn li mem starigis? Ne apartenas al la homo antaŭjuĝi la agojn de la Dia Estaĵo, nek ilin subordigi al sia malforta komprenpovo. Ni tamen, koncerne la diajn aferojn, havas, kiel kriterion por nia juĝado, la atributojn mem de Dio. Al la superega povo aldoniĝas la superega saĝeco, el kio oni devas konkludi, ke li faras nenion neutilan.

Kial li do farus miraklojn? Por elmontri sian povon, oni diras. Sed ĉu la povo de Dio ne pli impone manifestiĝas per la grandioza tutaĵo de la verkoj de la kreaĵaro, per la antaŭvida saĝeco direktanta kiel ties plej etajn, tiel ankaŭ ties plej grandajn partojn, kaj per la harmonio de la leĝoj regantaj la mekanismon de la Universo, ol per iaj malgrandaj kaj infancaj nuligoj, kiujn ĉiuj iluziistoj scipovas imiti? Kion oni dirus pri lerta mekanikisto, kiu, por pruvi sian lertecon, malmuntus la horloĝon, sciencan majstroverkon, kiun li mem konstruis, por pruvi, ke li povas malfari, kion li faris? Ĉu lia sciado, male, ne pli elmontriĝas per la reguleco kaj precizeco de ĝia movo?

Ne koncernas do Spiritismon la demando pri la mirakloj; sed, surbaze de tiu rezono, ke Dio faras nenion neutilan, Spiritismo formulas jenan opinion: *ĉar mirakloj ne estas necesaj por la glorado de Dio, nenio en la Universo okazas ekster la ĝeneralaj leĝoj. Dio ne faras miraklojn tial, ke liaj leĝoj estas perfektaj kaj li do ne bezonas nuligi ilin. Se estas faktoj,*

kiujn ni ne komprenas, tio estas tial, ke al ni ankoraŭ mankas la necesa sciado.

16. – Akceptite, ke Dio povis, pro motivoj, kiujn ni ne kapablas taksi, okaze nuligi leĝojn de li starigitajn, tiuj leĝoj do ne estas neŝanĝeblaj; sed estas almenaŭ racie pensi, ke nur li havas tiun povon. Oni ne povus akcepti, sen al Dio nei la ĉiopovecon, ke al la Spirito de malbono estas konsentite malfari la verkon de Dio kaj de sia flanko estigi miregindaĵojn, kiuj forlogus eĉ la elektitojn, kio kuntrenus la ideon pri ia povo egala al la povo de Dio. Tamen ja ĉi tion oni instruas. Se Satano havas la povon interrompi, sen la permeso de Dio, la plenumiĝon de la diaj leĝoj, kiuj ja estas verko de Dio, li estas pli potenca ol Dio, kiu do ne havas la ĉiopovecon. Kaj se Dio, kiel oni pretendas, komisias al Satano tiun povon, por ke ĉi tiu pli facile konduku la homojn en la malbonon, Dio do ne havas la superegan bonecon. Ambaŭ okazoj prezentas la neadon de unu el la atributoj, sen kiuj Dio ne estus Dio.

Pro tio la Eklezio distingas la bonajn miraklojn, kiuj fontas el Dio, disde la malbonaj mirakloj, kiuj fontas el el Satano. Sed kiel diferencigi inter ili?

Ĉu satana aŭ dia, miraklo ĉiam estos nuligo de leĝoj, kiuj emanis el unu sola Dio. Se iu persono estas, por tiel diri, mirakle resanigita, ĉu de Dio aŭ de Satano, lia resaniĝo ja nepre okazis. Necesas fari al si tre mizeran ideon pri la homa inteligento por pretendi, ke tiaj doktrinoj povas hodiaŭ esti akceptataj.

Se oni agnoskas la eblecon de kelkaj faktoj rigardataj kiel miraklaj, oni nepre devas konkludi, ke, kia ajn estus la origino al ili atribuita, ili ja estas naturaj efikoj, kiujn *enkarniĝintaj* aŭ *elkarniĝintaj Spiritoj* povas utiligi, tiel same kiel ili utiligas ĉion, sian propran inteligenton, siajn sciencajn sciojn,

tiel por la bono kiel por la malbono, laŭ sia boneco aŭ sia maliceco. Malicegulo, uzante sian sciadon, povas do efektivigi farojn, kiuj aspektos kiel miregindaĵoj en la okuloj de malkleruloj; sed kiam tiuj efikoj rezultigas ajnan bonon, estus mallogike al ili atribui diablan originon.

17. – Sed la religio, laŭdire, sidas sur faktoj nek klarigitaj, nek klarigeblaj. Eble neklarigitaj; ĉu neklarigeblaj? jen tute alia demando. Ĉu al la homoj estas konataj la malkovroj kaj scioj, kiujn la estonteco rezervas al ni? Ne parolante pri la miraklo de la kreado, nekontesteble la plej granda el ĉiuj, jam nun apartenanta al la kadro de la universa leĝo, ĉu ni ne vidas hodiaŭ refariĝi, en la kampoj de magnetismo, somnambulismo, Spiritismo, la ekstazojn, la viziojn, la aperojn, la transvidaĵojn, la subitajn resanigojn, la levojn, la komunikiĝojn parolajn kaj alispecajn kun la estaĵoj de la nevidebla mondo, ja fenomenojn konatajn de nememoreblaj tempoj, iam rigardatajn kiel miraklaj kaj pri kiuj oni nuntempe demonstras, ke ili apartenas al la ordo de la naturaj aferoj, laŭ la leĝo pri la konsisto de la estaĵoj? La sanktaj libroj estas plenaj de tiaspecaj faktoj, kvaligitaj kiel supernaturaj; sed ĉar aliaj, analogaj kaj ankoraŭ pli miregindaj, troviĝas en ĉiuj paganaj religioj de la antikveco, tial, se la vereco de iu religio dependus de la nombro kaj de la naturo de tiaj faktoj, oni ne sciis montri, kiu la pli vera.

Tio supernatura kaj la religioj

18. – Pretendi, ke tio supernatura konsistigas la fundamenton de la tuta religio, ke ĝi estas la volbŝlosilo de la kristana konstruaĵo, estas subteni danĝeran tezon. Se oni sidigas la veraĵojn de Kristanismo sole nur sur la bazo de tio

mirakleca, oni al ĝi starigas malfortikan fundamenton, de kiu la ŝtonoj kun ĉiu tago defalas. Tiu tezo, kiun defendas eminentaj teologoj, rekte kondukas al la konkludo, ke post certa tempo ne eblas la ekzisto de religio, eĉ de la kristana religio, se oni demonstros natura tion, kion oni rigardis supernatura. Ĉar, kiom ajn oni alamasigos argumentojn, oni ne sukcesos subteni la kredon, ke iu fakto estas mirakla post kiam oni pruvis, ke ĝi tia ne estas. Nu, la pruvo, ke iu fakto ne estas escepta en la kadro de la naturaj leĝoj montriĝas tiam, kiam ĝi povas esti eksplikita per tiuj samaj leĝoj, kaj ke, povante refariĝi per la volo de iu ajn persono, ĝi ĉesas esti privilegio de la sanktuloj. Ne tio *supernatura* estas necesa al la religioj, sed ja la *spiritita principo*, kiun oni erare kutimas konfuzi kun tio mirakleca kaj sen kiu religio ne eblas.

Spiritismo rigardas la kristanan religion de pli alta vidpunkto; starigas al ĝi bazon pli solidan ol la mirakloj: la neŝanĝeblajn leĝojn de Dio, kiuj regas tiel la spiritan kiel ankaŭ la materialan principon. Tia bazo spitas la tempon kaj la Sciencon, ĉar ja la tempo kaj la Scienco ĝin iam sankcios. Dio ne estas malpli inda je nia admiro, je nia danko, je nia respekto pro tio, ke li ne nuligis siajn leĝojn, kiuj grandiozas ĉefe pro sia neŝanĝebleco. Ne necesas tio supernatura, por ke ni honoru Dion per inda adoro. Ĉu la Naturo ne estas per si mem tiel impona, ke oni al ĝi devus ion ajn aldoni por pruvi la superegan povon? La religio renkontos des malpli da nekredantoj, ju pli la racio ĝin sankcios koncerne ĉiujn ĝiajn punktojn. Kristanismo neniom perdos pro tia sankcio; ĝi male nur gajnos. Se io ĝin malutilis ĉe la opinio de certaj homoj, tio estis ĝuste la eraroj de tio mirakleca kaj de tio supernatura.

19. – Se oni prenas la vorton *miraklo* en ties etimologia senco, nome en la senco de *mirindaĵo*, oni senĉese havos

miraklojn antaŭ siaj okuloj; oni ilin spiros en la aero kaj premos sub la piedoj, ĉar ĉio en la Naturo estas miraklo.

Ĉu vi volas doni al la popolo, al la malkleruloj, al la malriĉaj en spirito ian ideon pri la povo de Dio? Montru ĝin en la senlima saĝo ĉion reganta, en la admirinda organismo de ĉio vivanta, en la fruktado de la plantoj, en la konformigo de ĉiuj partoj de ĉiu estaĵo al ties bezonoj, laŭ la medio, kie li devas vivi. Montru al ili la agadon de Dio en la tigo de la herbo, en la floro elvolviĝanta, en la Suno, kiu ĉion vivigas. Montru lian bonecon en la zorgado pri ĉiuj kreitaĵoj, kiel ajn malgrandaj ili estas, lian antaŭzorgon en la pravo de ekzisto de ĉiuj ekzistaĵoj, el kiuj neniu estas neutila, en la bono, kiu ĉiam rezultas el ŝajna kaj nedaŭra malbono. Precipe komprenigu al ili, ke la efektiva malbono estas verko de la homo, ne de Dio; ne provu ilin terurigi per la bildo de la eternaj flamoj, kiujn ili fine ne plu kredas kaj kiuj igas ilin pridubi la bonecon de Dio; prefere kuraĝigu ilin per la certigo, ke ili iam povos sin elaçeti kaj ripari la faritan malbonon. Montru al ili la malkovrojn de la Scienco kiel malkaŝon de la diaj leĝoj, ne kiel verkon de Satano. Fine lernigu al ili kiel legi en la libro de la Naturo, konstante malfermita antaŭ ili; en tiu neelĉerpebla libro, kie la saĝeco kaj la boneco de la Kreinto estas enskribitaj sur ĉiu paĝo. Kaj ili tiel komprenos, ke unu tiel granda Estaĵo, kiu pri ĉio sin okupas, pri ĉio zorgas, ĉion antaŭvidas, nepre havas la superegan povon. La terkulturisto lin vidos, fosante sian sulkon, kaj la malfeliĉulo lin gloros en siaj afliktoj, dirante: Se mi estas malfeliĉa, tio estas pro mia kulpo. Tiam la homoj estos vere religiaj, precipe racie religiaj, multe pli ol se ili kredus je ŝtonoj sangoŝvitantaj aŭ je statuoj, kiuj palpebrumas kaj verŝas larmojn.

ĈAPITRO XIV

LA FLUIDOJ

I. *Naturo kaj proprecoj de la fluidoj:*

Fluidecaj elementoj. – Formado kaj proprecoj de la perispirito.
Agado de la Spiritoj sur la fluidojn; fluidecaj kreaĵoj; fotografio de la penso.
Kvalitoj de la fluidoj.

II. *Klarigo de kelkaj fenomenoj rigardataj kiel supernaturaj:*

Spirita aŭ psika vidado; duobla vidado; somnambulismo.

Sonĝoj. – Katalepsio; reviviĝoj. – Resanigoj.

Aperaĵoj; transfiguriĝoj. – Materiaj manifestiĝoj; mediumeco.

Obsedoj kaj posedoj.

I. NATURO KAJ PROPRECOJ DE LA FLUIDOJ

Fluidecaj elementoj

1. – La Scienco liveris la ŝlosilon de la mirakloj, kiuj pli aparte fontas el la materia elemento, aŭ ilin klarigante, aŭ demonstrante ilian neeblecon per la leĝoj regantaj la materion. Sed la fenomenoj, en kiuj superregas la spirita elemento kaj kiuj ne povas esti klarigataj sole nur per la leĝoj de la materio, ne trafeblas por la esploroj de la Scienco. Jen kial ili, pli ol la ceteraj, prezentas la *ŝajnajn* karakterojn de tio mirakleca. Troveblas do nur en la leĝoj, regantaj la spiritan vivon, la ŝlosilo de tiaspecaj mirakloj.

2. – La kosma universa fluido, kiel jam demonstrite, estas la elementa primitiva materio, kies modifoj kaj transformiĝoj konsistigas la sennombran diversecon de la korpoj en la Naturo. (Ĉap. X.) Kiel universa elementa principo, ĝi prezentas du distingiĝajn statojn: tiun de etereco aŭ senpezeco, kiun oni povas rigardi kiel la primitivan normalan staton, kaj tiun de materieco aŭ pezeco, kiu sekvas la unuan. La transiĝa punkto troviĝas tie, kie la fluido transformiĝas en palpeblan materion. Sed eĉ tie ne estas abrupta transiĝo, ĉar oni povas rigardi niajn senpezajn fluidojn kiel interan staton inter tiuj du ekstremaj. (Ĉap. IV, n-roj 10 kaj sekvantaj.)

Ĉiu el ambaŭ statoj necese estigas specialajn fenomenojn: al la dua apartenas tiuj de la videbla mondo, kaj al la unua tiuj de la nevidebla mondo. Unuj, nomataj *materiaj fenomenoj*, troviĝas en la kadro de la ĝustedira Scienco; la aliaj, kvaligitaj kiel *spiritaj*, aŭ *psikaj fenomenoj*, pro tio, ke ili speciale ligiĝas al la ekzisto de la Spiritoj, troviĝas en la sfero de kompetenteco de Spiritismo. Sed ĉar estas senĉesa kontakto inter la vivo spirita kaj la korpa vivo, tial la fenomenoj de ambaŭ klasoj ofte okazas samtempe. Dum la enkarniĝa stato, la homo povas percepti nur tiujn psikajn fenomenojn, kiuj ligiĝas al la korpa vivo; tiuj *ekskluzive* apartenantaj al la spirita sfero estas netrafleblaj por la materiaj sentumoj kaj povas esti perceptataj nur en la spirita stato.¹

¹ La esprimo *psika* fenomeno pli ekzakte vortigas la penson ol la esprimo *spirita* fenomeno pro tio, ke tiuj fenomenoj sidas sur la proprecoj kaj atributoj de la animo, aŭ pli ĝuste, sur la perispiritaj fluidoj, kiuj estas neapartigeblaj disde la animo. Tiu kvalitigo ilin pli intime rilatigas al la ordo de la naturaj faktoj regataj de leĝoj; oni povas do ilin akcepti kiel psikajn efikojn, sen akcepti ilin kiel miraklojn.

3. – En la etereca stato, la kosma fluido ne estas unuforma; ne ĉesante esti etereca, ĝi suferas modifojn tiel diversajn laŭ aliaj specoj kaj eble pli multenombrajn ol en la stato de palpebla materio. Tiuj modifoj konsistigas malsamajn fluidojn, kiuj, kvankam devenantaj de la sama principo, estas dotitaj per specialaj proprecoj kaj okazigas la fenomenojn proprajn al la nevidebla mondo. Ĉar ĉio estas relativa, tiuj fluidoj havas por la Spiritoj, kiuj ankaŭ estas fluidecaj, aspekton tiel materian, kiel la palpeblaj objektoj por la enkarnuloj, kaj do estas por ili, kio por ni estas la substancoj de la surtera mondo. Ili prilaboras tiujn fluidojn kaj ilin kombinas por estigi difinitajn efikojn, kiel la homoj faras kun siaj materialoj, kvankam per malsamaj procedoj.

Sed tie, same kiel sur ĉi tiu mondo, nur la pli kleraj Spiritoj scias kompreni la rolon de la konsistaj elementoj de sia mondo. La malkleruloj de la nevidebla mondo estas tiel nekapablaj klarigi al si la fenomenojn, kiujn ili atestas kaj por kiuj ili ofte kunhelpas, kiel la surteraj malkleruloj por klarigi tiel la efikojn de la lumo aŭ de la elektro, kiel ankaŭ la manieron kiel ili vidas kaj aŭdas.

4. – La fluidecaj elementoj de la spirita mondo ne trafblas por niaj analizaj instrumentoj nek por la perceptado de niaj sensoj, sentivaj por la palpebla, ne por la etereca materio. Estas iuj, apartenantaj al medio tiele diferenca de la nia, ke pri ili ni povas fari al ni ideon nur per komparoj, ja tiel neperfektaj kiel tiuj, per kiuj denaska blindulo provas fari al si ideon pri la teorio de la koloroj.

Sed inter tiuj fluidoj kelkaj estas intime ligitaj al la korpa vivo kaj, pro tio, iel apartenas al la surtera medio. Manke de rekta observado, oni povas rimarki iliajn efikojn same kiel oni rimarkas tiujn de la magneta fluido, kiun oni neniam vidis, kaj

oni same povas akiri pri ilia naturo iel ekzaktajn sciojn. Tiu studo estas esenca, ĉar ĝi liveras la ŝlosilon de amaso da fenomenoj neklarigeblaj sole nur per la leĝoj de la materio.

5. – La deirpunkto de la universa fluido estas ĝia absoluta pureco, pri kiu nenio povas doni al ni ian ideon; la kontraŭa punkto estas ĝia transformiĝo en palpeblan materion. Inter tiuj du ekstretoj estas sennombraj transformiĝoj, pli aŭ malpli proksimaj de unu aŭ de la alia. La fluidoj pli najbaraj al materio, sekve malpli puraj, konsistigas tion, kion oni povas nomi *spiritita surtera atmosfero*. Ĝuste en ĉi tiu medio, kie ankaŭ troviĝas diversaj gradoj de pureco, la enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj Spiritoj ĉerpas la elementojn necesajn al la ekonomio de sia ekzistado. Tiuj fluidoj, kiel ajn subtilaj kaj nepalpeblaj ili estas por ni, ankoraŭ estas krudnaturaj kompare kun la eterecaj fluidoj de la superaj regionoj.

Same okazas sur la supraĵo de ĉiuj mondoj, rezerve de la diferencoj laŭ konsisto kaj de la vivdonaj kondiĉoj propraj al ĉiu el ili. Ju malpli materia estas la vivo sur ili, des malpli la spiritaj fluidoj afinas al la ĝustasenca materio.

La kvalifiko *spiritaj fluidoj* ne estas rigore ĝusta, ĉar efektive ĉiam temas pri materio, pli aŭ malpli kvintesenca. Reale *spiritita* estas nur la animo aŭ inteligenta principo. Oni ilin tiel nomas nur por komparo kaj, ĉefe, pro ilia afineco al la Spiritoj. Oni povas diri, ke ili konsistigas la materion de la spiritita mondo, kaj ja tial ili estas nomataj *spiritaj fluidoj*.

6. – Kiu cetere konas la intiman konsiston de la palpebla materio? Ĝi eble estas kompakta nur rilate al niaj sensoj, kion ja pruvus la facileco, kun kiu ĝin trairas la spiritaj fluidoj kaj la Spiritoj, kontraŭ kiuj ĝi ne pli obstaklas ol kiel la travideblaj korpoj kontraŭ la lumo.

Ĉar ĝi havas kiel primitivan elementon la eterecan kosman fluidon, la palpebla materio, *malagregiĝante*, certe povas reveni al la etereca stato, same kiel la diamanto, la plej dura el ĉiuj korpoj, povas volatiliĝi en nepalpeblan gason. *Efektive, la solidiĝo de la materio estas nenio alia, krom transiĝa stato de la universa fluido, kiu povas reveni al sia primitiva stato, kiam ĉesas ekzisti la kondiĉoj de kohereco.*

Kiu ja scias, ĉu, en stato de palpebleco, la materio ne akceptas iaspecan eterecon, kiu al ĝi donus apartajn proprecojn? Certaj fenomenoj, kiuj ŝajnas aŭtentaj, supozigas pri tio. Ni ankoraŭ staras ĉe la sojlo de la nevidebla mondo, kaj la estonteco sendube rezervas al ni la konadon de novaj leĝoj, kiuj al ni permesos kompreni tion, kio ankoraŭ kuŝas en la regiono de l' mistero.

Formado kaj proprecoj de la perispirito

7. – La perispirito, aŭ fluideca korpo de la Spiritoj, estas unu el la plej gravaj produktoj de la kosma fluido; ĝi estas ia kondensiĝo de tiu fluido ĉirkaŭ iu inteligenta fokuso aŭ *animo*. Ni vidis, ke la karna korpo ankaŭ havas sian principon en tiu sama fluido, kondensiĝinta kaj transformiĝinta en palpeblan materion. Ĉe la perispirito, la molekula transformiĝo malsame fariĝas, ĉar la fluido konservas sian malpezecon kaj siajn eterecajn kvalitojn. La perispirita korpo kaj la karna korpo havas do sian originon en la sama primitiva elemento; ambaŭ konsistas el materio, kvankam en du malsamaj statoj.

8. – La Spiritoj elprenas sian perispiriton el la medio, en kiu ili troviĝas, tio estas, tiun envolaĵon ili formas el la ĉirkaŭaj fluidoj, kaj el tio rezultas, ke la konsistaj elementoj de la perispirito certe varias laŭ la mondoj. Se, kiel akceptate,

Jupitero estas mondo tre progresinta, kompare kun la Tero, en kiu la korpa vivo ne prezentas tian materiecon, kiel la nia, la tieaj perispiritaj envolaĵoj devas esti el naturo multe pli kvintesenca ol sur la Tero. Nu, kiel ni ne povus vivi sur tiu mondo kun nia karna korpo, tiel same niaj Spiritoj ne povus tien eniri kun sia surtera perispirito. Foririnte de la Tero, la Spirito tie forlasas sian fluidecan envolaĵon kaj surmetas alian konforman al la mondo, kien li devas iri.

9. – La naturo de la fluideca envolaĵo ĉiam havas rilaton kun la grado de morala progreso de la Spirito. La malsuperaj Spiritoj ne povas laŭplaĉe ŝanĝi ĝin kaj sekve ne povas laŭvole transportiĝi de unu mondo al alia. Estas unuj, kies fluideca envolaĵo, kvankam etereca kaj senpeza rilate al la palpebla materio, tamen ankoraŭ estas tro peza, se ni tiel povas diri, en rilato al la spirita mondo, por al ili permesi la eliron el sia medio. Al tiu klaso oni devas alkalkuli tiujn, kies perispirito estas tiel maldelikata, ke ili ĝin konfuzas kun sia karna korpo kaj kredas, pro tio, ke ili ankoraŭ vivas. Tiaj Spiritoj, kies nombro estas granda, restas sur la supraĵo de la Tero same kiel la enkarnuloj, kredante, ke ili plenumas siajn surterajn okupojn. Aliaj, kvankam iom pli liberiĝintaj de la materio, tiaj ankoraŭ ne sufiĉe estas, por altiĝi super la surteraj regionoj.¹ La superaj Spiritoj, kontraŭe, povas veni en la malsuperajn mondojn kaj eĉ tie enkarniĝi. El la konsistaj elementoj de la mondo, kien ili eniras, ili ĉerpas la materialojn de la fluideca aŭ karna envolaĵo konforma al la medio, en kiu ili troviĝas. Ili agas kiel la grandsinjoro, kiu demetas siajn

¹ Ekzemploj de Spiritoj, kiuj kredas ankoraŭ aparteni al ĉi tiu mondo: *Revue Spirite*, decembro 1859, p. 310; novembro 1864, p. 339; aprilo 1865, p. 117.

belajn vestojn por provizore surmeti la plebanan kitelon, tamen ne ĉesante pro tio esti grandsinjoro.

Ja tiel Spiritoj plej altrangaj povas manifestiĝi al la surteraj loĝantoj aŭ misiocele enkarniĝi inter ili. Tiaj Spiritoj portas kun si ne la envovaĵon sed la intuician memoron pri la regionoj, de kiuj ili venas kaj kiujn ili vidas per la penso. Ili estas vidantoj inter blinduloj.

10. – La tavolo da spiritaj fluidoĵ ĉirkaŭanta la Teron povas esti komparata kun la malsupraj tavoloj de la atmosfero, pli pezaj, pli densaj, malpli puraj ol la supraj tavoloj. Tiuj fluidoĵ ne estas homogenaj; ili prezentas ian miksaĵon de diverskvalitaj molekuloj, inter kiuj nepre troviĝas la elementaj molekuloj, formantaj ties bazon sed pli aŭ malpli aliiĝintaj. La efikoj estigataj de tiuj fluidoĵ estos proporciaj al la *sumo* de la puraj partoj, kiujn ili entenas. Tia estas, por komparo, la alkoholo rektifikita aŭ miksitaj, en malsamaj proporcioj, kun akvo aŭ kun aliaj substancoj: ĝia specifa pezo kreskas efike de tia mikسادo, dum samtempe malkreskas ĝiaj fortoj kaj bruliveco, kvankam en la tutaĵo ĉiam ankoraŭ estas pura alkoholo.

La Spiritoj, devantaj vivi en tiu medio, en ĝi ĉerpas sian perispiriton; *sed laŭ tio, ĉu la Spirito estas pli aŭ malpli elpurigita, lia perispirito formiĝas el la pli puraj aŭ el la pli maldelikataj partoj de la fluido propra al la mondo, en kiu li enkarniĝas.* La Spirito tie estigas, kaj ni tiel nin esprimas ĉiam por komparo, ne por identigo, la efikon de ia kemia reakciilo, kiu altiras al si tiujn molekulojn asimileblajn pro sia naturo.

El tio rezultas ĉi tiu grava fakto: *la konsisto de la perispirito ne estas egala ĉe ĉiuj Spiritoj, enkarniĝintaj aŭ elkarniĝintaj, loĝantaj la Teron aŭ la spacon ĉirkaŭan al ĝi.* Ne same okazas kun la karna korpo, kiu, kiel jam montrite, konsistas el samaj elementoj, kiel ajn supera aŭ malsupera

estus la Spirito. Tial, ĉe ĉiuj la efikoj estigataj de la korpo estas la samaj, la bezonoj estas similaj, dum ili inter si diferencas en ĉio rilata al la perispirito.

El tio ankoraŭ rezultas, ke: *la perispirita envovaĵo de la Spirito aliĝas kun lia morala progreso en ĉiu enkarniĝo, kvankam li enkarniĝas en la sama medio; ke la superaj Spiritoj, escepte enkarniĝante por misio en iu malsupera mondo, havas perispiriton malpli krudan ol tiu de la indiĝenoj de tiu mondo.*

11. – La medio ĉiam troviĝas en rilato kun la estaĵoj, kiuj devas vivi en ĝi; la fiŝoj, en la akvo; la teraj estaĵoj, en la aero; la spiritaj estaĵoj, en la spirita aŭ etereca fluido, eĉ se ili estas sur la Tero. *La etereca fluido rilatas al la bezonoj de la Spirito, kiel la atmosfero al la bezonoj de la enkarnuloj.* Nu, kiel la fiŝoj ne povas vivi en la aero, kaj la teraj bestoj ne povas vivi en atmosfero tre maldensa por iliaj pulmoj, tiel ankaŭ la malsuperaj Spiritoj ne povas elporti la brilon kaj la impreson de la pli eterecaj fluidoj. Ili tie ne mortus, ĉar Spirito ne mortas, sed ia instinkta forto tenas ilin malproksime de tie, same kiel oni malproksimiĝas de tro arda flamo aŭ de tro hela lumo. Jen kial ili ne povas eliri el la medio konforma al sia naturo; por ŝanĝi la lokon, ili antaŭe devas ŝanĝi sian naturon, seniĝi je la materiaj instinktoj, kiuj ilin retenas en la materiaj medioj; unuvorte, ili devas elpuriĝi kaj morale transformiĝi. Tiam ili laŭgrade identiĝas kun pli elpurigita medio, kiu al ili fariĝas ia bezono, ia neceso, same kiel la okuloj de iu, longe vivinta en mallumo, apenaŭ senteble kutimiĝas al la taglumo kaj al la sunhelo.

12. – Tiel ĉio sin interligas, ĉio sin interĉenas en la Universo; ĉio estas submetita al la granda kaj harmonia leĝo de unueco, de la plej kompakta materieco ĝis la plej pura

spiriteco. La Tero estas kiel vazo, el kie eliĝas densa fumo, kiu klariĝas laŭmezure kiel ĝi altiĝas kaj kies maldensaj partoj perdiĝas en la senlima spaco.

La dia povo brilegas en ĉiuj partoj de tiu grandioza tutaĵo, kaj oni tamen volas, ke por pli bone pruvi sian povon, Dio, ne kontenta pri sia faritaĵo, venu rompi tiun harmonion! ke li malaltiĝu al la rolo de magiisto, estigante infanecajn efikojn indajn je prestidigitatoro! Kaj oni, krom tio, kuraĝas starigi Satanon mem kiel lian rivalon pri lerteco! Vere, oni neniam pleje malaltigis la dian majeston, kaj oni miras la kreskadon de nekredemo!

Vi pravas, dirante: “Foriĝas la fido!”, sed ja foriĝas la fido je ĉio ofendanta la komunan saĝon kaj la racion; la fido egala al tiu, kiu iam igis la homojn diri: “La dioj foriĝas!” Sed la fido je seriozaj aferoj, la fido je Dio kaj je la senmorteco, tiu fido estas ĉiam vigla en la homa koro, kaj kvankam ĝi estis sufokita sub la infanecaj historioj, per kiuj oni ĝin superŝarĝis, ĝi tamen releviĝos pli forta se ĝi nur estos liberigita, same kiel premita planto releviĝas se ĝi nur revidas la Sunon!

Jes, ĉio estas miraklo en la Naturo, ĉar ĉio estas admirinda kaj atestas la dian saĝon! Tiuj mirakloj montriĝas al la tuta mondo, al ĉiuj, kiuj havas okulojn por vidi kaj orelojn por aŭdi, kaj ne profite al nur kelkaj! Ne! ne estas mirakloj en la senco, kiun oni ordinare ligas al tiu vorto, ĉar ĉio rezultas el la eternaj, ja perfektaj leĝoj de la kreado.

Agado de la Spiritoj sur la fluidojn. Fluidecaj kreaĵoj. Fotografio de la penso

13. – La spiritaj fluido, kiuj prezentas unu el la statoj de la kosma universa fluido, estas ĝustadire la atmosfero de la spiritaj estaĵoj; la elemento, kie ili ĉerpas la

materialojn, sur kiujn ili agas; la medio, kie okazas tiuj specialaj fenomenoj, percepteblaj por la vidado kaj la aŭdado de la Spirito, sed ne trafteblaj por la karnaj sensoj, sentivaj nur al la palpebla materio; la medio kie estiĝas la lumo propra al la spirita mondo, kiu diferencas de la ordinara lumo pro sia kaŭzo kaj siaj efikoj; fine la transigilo de la penso, same kiel la aero estas la transigilo de la sono.

14. – La Spiritoj agas sur la spiritajn fluidojn, ne ilin manipulante kiel la homoj manipulas la gasojn, sed uzante la penson kaj la volon. La penso kaj la volo estas por la Spiritoj tio sama, kiel la mano por la homo. Per la penso ili komunikas al tiuj fluidoj tian aŭ alian direkton; ilin aglomeras, kombinas aŭ disigas; estigas tutaĵojn kun difinita aspekto, formo kaj koloro; ŝanĝas iliajn proprecojn, same kiel kemiisto ŝanĝas tiujn de la gasoj aŭ de aliaj korpoj, ilin kombinante laŭ certaj leĝoj. Tio estas la granda laborejo aŭ laboratorio de la spirita vivo.

Kelkfoje tiuj transformiĝoj rezultas el ia intenco; ofte ili estas la rezultato de senkonscia penso. Sufiĉas al la Spirito pensi ion, por ke ĝi ekestu, same kiel sufiĉas kanti arion, ke ĉi tiu resonu en la atmosfero.

Ja tiel, ekzemple, iu Spirito videbliĝas al enkarnulo, dotita per la psika vidado, kun la aspekto, kiun li havis dumvive en la tempo, kiam oni lin konis, eĉ se li poste spertis plurajn enkarniĝojn. Li prezentiĝas kun la vestoj, la eksteraj signoj – kriplaĵoj, cikatroj, stumpoj, ktp – kiujn li tiam havis; senkapigito sin montros sen la kapo. Tio tute ne signifas, ke li konservis tian ŝajnon, ĉar kiel Spirito li estas nek lama, nek brakstumpa, nek unuokula, nek senkapigita; sed ĉar lia *penso* revenas al la tempo, kiam li tia estis, tuj lia perispirito alprenas la koncernan ŝajnon, kiun li same tuje delasas kun la ĉeso de

la ĉi-rilata pensado. Se do li foje estis nigra kaj alifoje estis blanka, li sin prezentos kiel nigrulo aŭ kiel blankulo laŭ tiu enkarniĝo, kiun celas lia elvoko kaj al kiu lin venigos lia penso.

Per analogia efiko, la penso de la Spirito fluidece kreas la objektojn, kiujn li kutime uzadis; avarulo flegados oron per la manoj, militisto portos siajn armilojn kaj sian uniformon, fumanto sian pipon, terkulturisto sian plugilon kaj siajn brutojn, maljunulino sian ŝpinbastonon. Por la Spirito, kiu mem ankaŭ estas fluideca, tiuj fluidecaj objektoj estas tiel realaj, kiel ili estis, en la materia stato, por vivanta homo; sed pro la fakto mem, ke ili estas kreaĵoj de la penso, ilia ekzisto estas tiel pasema kiel la penso.¹

15. – Ĉar la fluidoj estas la transigilo de la penso, ĉi tiu agas sur la fluidojn tiel same, kiel la sono sur la aeron; ili transsendas al ni la penson tiel same kiel la aero al ni transsendas la sonon. Oni povas do diri, konforme al la pura vero, ke en tiuj fluidoj estas ondoj kaj radioj da pensoj, kiuj senkonfuze kruciĝas, tiel same kiel en la aero estas ondoj kaj radioj² sonoraj.

Ankoraŭ pli: Kreante *fluidecajn imagojn*, la penso rebildiĝas en la perispirita envolvajo kvazaŭ en spegulo; tie ĝi korpigiĝas kaj iel *fotografiĝas*. Al iu venas la penso murdi alian homon: kiel ajn inerta restas lia materia korpo, tamen lia fluideca korpo estas ekscitata de la penso, kies ĉiujn nuancojn

¹ *Revue Spirite*, julio 1859, p. 184. – *La Libro de la Mediumoj*, ĉap. VIII.

² *Nota de la Brazilia Spiritisma Federacio al la 16-a portugallingva eldono de 1973*: “Kiel tekstas en la franca originalo. Ni prefere uzas la vorton *vibroj*, klare difinitan en la modernaj vortaroj kaj plene akceptatan en nia spiritisma literaturo”.

ĝi rebildigas, kaj fluidece efektivigas la geston, la agon, kiun li intencas plenumi. La penso kreas la imagon de la viktimo, kaj la tuta sceno estas pentrita, kvazaŭ en bildo, tia, kia ĝi elvolviĝas en lia spirito.

Estas ja tiamaniere, ke la plej sekretaj movoj de la animo resonas en la fluideca envolvajo; ke iu animo povas legi en alia animo kvazaŭ en libro kaj vidi, kion al la korpaj okuloj ne eblas percepti. Sed, vidante la intencon, la animo povas antaŭsenti la efektivigon de la rezultonta ago, sed la tempon de ties plenumo ĝi ne povas antaŭdifini, ties detalojn ĝi ne povas precizigi, eĉ ne certigi, ke ĝi okazos, ĉar postaj cirkonstancoj povas aliigi la starigitajn planojn kaj ŝanĝi la dispoziciojn. Ĝi ne povas vidi tion, kio ankoraŭ ne ekzistas en alies penso; kion ĝi vidas, tio estas la kutima zorgo de aliulo, ties deziroj, ties projektoj, ties bonaj aŭ malbonaj decidoj.

Kvalitoj de la fluidoj

16. – La agado de la Spirito sur la spiritajn fluidojn havas gravajn kaj rektajn sekvojn por la enkarnuloj. Ĉar tiuj fluidoj estas la transigilo de la penso, kaj ĉar ĉi tiu povas modifi iliajn proprecojn, tial estas evidente, ke ili sorbiĝas de la bonaj aŭ malbonaj pensoj, kiuj ilin vibrigas, kaj aliigigas de la pureco aŭ malpureco de la sentoj. La malbonaj pensoj difektas la spiritajn fluidojn, tiel same kiel la malsanigaj miasmoj difektas la spireblan aeron. La fluidoj ĉirkaŭantaj la malbonajn Spiritojn, aŭ kiujn tiaj Spiritoj elĵetas, estas do difektitaj, dum tiuj ricevantaj la influon de la bonaj Spiritoj estas tiel puraj kiel ebligas ties grado de morala perfekteco.

17. – Estus neeble fari nombradon aŭ klasadon de la bonaj kaj malbonaj fluidoj, nek specifi iliajn respektivajn kvalitojn pro tio, ke ili tiel multe diversas kiel la pensoj.

La fluidoj ne havas proprajn kvalitojn sed nur tiujn, kiujn ili akiras en la medio kie ili ellaboriĝas; ili aliĝas pro la efluvo de tiu medio, same kiel la aero pro la elspiradoj, la akvo pro la salo de la tavoloj, kiujn ĝi trafluas. Konforme al la cirkonstancoj, ĝiaj kvalitoj, same kiel tiuj de la akvo kaj de la aero, estas nedaŭraj aŭ konstantaj, kio faras la fluidojn tre speciale taŭgaj por la estigo de tiaj aŭ aliaj efikoj.

La fluidoj ankaŭ malhavas apartajn nomojn. Kiel la odoroj, ili estas nomataj laŭ siaj proprecoj, siaj efikoj kaj siaj originaj tipoj. En rilato morala, ili estas stampitaj per la sentoj de malamo, envio, ĵaluzo, orgojlo, egoismo, violento, hipokriteco, boneco, bonvolemo, amo, karitato, dolĉeco, ktp; en rilato fizika ili estas ekscitaj, kvietigaj, penetremaj, adstringaj, iritaj, mildigaj, dormigaj, narkotaj, toksaj, revigligaj, elĵetaj; ili fariĝas fortoj de transsendo, de propulsado, ktp. La bildo de la fluidoj estas do la bildo de ĉiuj pasioj, de la virtoj kaj malvirtoj de la homaro, kaj de la proprecoj de la materio respondaj al la efikoj, kiujn ili estigas.

18. – Estante enkarniĝintaj Spiritoj, la homoj partoprenas en la spirita vivo, ĉar tian vivon ili vivas, tiel same kiel la korpan vivon: ĉefe dum la dormo kaj multfoje dum la maldorma stato. Enkarniĝinte, la Spirito konservas, kun ties propraj kvalitoj, sian perispiriton, kiu, kiel sciante, ne estas ĉirkaŭita de la korpo sed disradias ronde ĉirkaŭ ĝi kaj ĝin envolvas kvazaŭ en ia fluideca atmosfero.

Pro sia intima kuniĝo kun la korpo, la perispirito ludas ĉefinfluan rolon en la organismo. Pro sia ekspansiivo, ĝi metas

la Spiriton en pli rekta rilato tiel kun la liberaj Spiritoj kiel ankaŭ kun tiuj enkarniĝintaj.

La penso de la enkarniĝinta Spirito agas sur la spiritajn fluojn tiel same, kiel la penso de la elkarniĝintoj, kaj transsendiĝas de Spirito al Spirito per la samaj vojoj, kaj, konforme al tio, ĉu ĝi estas bona aŭ malbona, ĝi purigas aŭ difektas la ĉirkaŭajn fluojn.

Se la ĉirkaŭaj fluoj ŝanĝiĝas pro la pensoj elsenditaj de la Spirito, lia perispirita envolaĵo, kiu estas konsista parto de lia memo kaj kiu rekte kaj konstante ricevas la impreson de liaj pensoj, des pli devas porti la stampon de ties bonaj aŭ malbonaj kvalitoj. La fluoj difektitaj de la efluvoj de la malbonaj Spiritoj povas puriĝi per la forigo de ĉi tiuj, sed iliaj perispiritoj ĉiam restos tiaj samaj, dum la Spirito ne sin mem aliigos.

Ĉar la perispirito de la enkarnuloj havas saman naturon kiel tiu de la spiritaj fluoj, ĝi ilin facile asimilas, kiel spongo sorbiĝas de ia likvaĵo. Tiuj fluoj agas sur la perispiriton des pli rekte, ju pli, pro sia ekspansiivo kaj disradiado, la perispirito kun ili konfuziĝas.

Tiuj fluoj agas sur la perispiriton, kiu siavice reagas sur la materian organismon, al kiu ĝi sin ligas per molekula kontakto. Se la efluvoj havas bonan naturon, la korpo ricevas bonefikan impreson; se ilia naturo estas malbona, la impresoj efikas penige; se konstantaj kaj energiaj, la malbonaj efluvoj povas estigi fizikajn malordojn: ne alia estas la kaŭzo de certaj malsanoj.

La medioj kie svarmas la malbonaj Spiritoj estas do saturitaj de malbonaj fluoj, kiujn oni sorbas per ĉiuj perispiritaj poroj, same kiel oni sorbas la pestajn miasmojn per la poroj de la korpo.

19. – Tiel estas klarigataj la efikoj, kiuj estiĝas en la kunvenejoj. Kunvenantaro estas ia fokuso de disradiado de diversaj pensoj, kvazaŭ ia orkestro, ia koruso da pensoj, kie ĉiu elsendas sian noton. El tio rezultas abundo da fluidecaj fluoj kaj efluvoj, kies impreson ĉiu ricevas per la spirita senso, same kiel en muzika koruso ĉiu ricevas la sonan impreson per la aŭdado.

Sed kiel ekzistas sonradioj harmoniaj aŭ disonancaj, tiel same estas pensoj harmoniaj aŭ malakordaj. Se la tuto estas harmonia, la impresoj estas agrablaj; se malharmonia, la impresoj estas ĉagrenaj. Nu, por tio ne nepre necesas, ke la penso estu vortigata: tute egale, ĉu ĉi tiu estas esprimata, aŭ ne, la disradiado ĉiam ankoraŭ ekzistas.

En tio kuŝas la kaŭzo de la plezuro, kiun oni spertas en simpatia kunveno, animata de bonaj kaj bonvolemaj pensoj; en ĝi regas kvazaŭ ia salubra morala atmosfero, en kiu oni komforte spiras; el ĝi oni eliras renovigita, ĉar oni satoriĝis per sanigaj fluidecaj efluvoj. Sed se tie enmiksiĝas iuj malbonaj pensoj, ili estigas la efikon de glacia aerfluo en varmeta medio, aŭ de malĝusta noto en koncerto. Ankaŭ tiel estas klarigata la angoro, la nedifinebla misfarto, kiun oni spertas en malsimpatia kunveno, kie malbonvolaj pensoj estigas kvazaŭajn fluojn da naŭza aero.

20. – La penso do estigas ian specon de fizika efiko, kiu reagas sur la moralan staton, kaj ĉi tion nur Spiritismo povas komprenebligi. La homo ĝin instinkte sentas, ĉar li serĉas la kunvenojn homogenajn kaj simpatiajn, pri kiuj li scias, ke li tie povos ĉerpi novajn moralajn fortojn, kaj oni povas diri, ke en tiuj kunvenoj li kompensas al si la fluidecajn perdojn, kiujn li ĉiutage suferas pro la disradiado de la penso, same kiel li kompensas per la nutraĵoj la perdojn de la materia korpo. Tiel

okazas, ĉar efektive la penso estas elsendo kaŭzanta realan perdon ĉe la spiritaĵaj fluoj kaj, sekve, ĉe la materiaj fluoj, en tia maniero, ke la homo bezonas refreŝiĝi per la efluvoj, kiujn li ricevas de ekstere.

Kiam oni diras, ke kuracisto resanigas sian pacieron per bonaj paroloj, oni esprimas absolutan veron, ĉar bonvola penso kunportas rebonigajn fluojn, kiuj agas tiel sur la fizikan kiel ankaŭ sur la moralan staton.

21. – Sen ia dubo, oni diras, estas eble eviti tiujn homojn, pri kiuj oni ja scias, ke ili estas malbonintencaj, sed kiel evitigi al si la influon de la malicaj Spiritoj, kiuj svarmas ĉirkaŭ ni kaj ĉien enŝoviĝas nevidate?

La rimedo estas tre simpla, ĉar ĝi dependas de la volo de la homo mem, kiu portas kun si necesan antaŭgardilon. La fluoj kuniĝas pro la simileco de siaj naturoj; la malsimilaj sin reciproke repuŝas; same kiel inter oleo kaj akvo, estas nekompatibileco inter la bonaj kaj la malbonaj fluoj

Kion oni faras, kiam la aero estas malpura? Oni ĝin salubrigas, elpurigas, detruante miasmajn fokusojn, forpelante la malsanigajn efluvojn per pli fortaj fluoj da salubra aero. Al la invado de la malbonaj fluoj oni devas do kontraŭmeti la bonajn fluojn; kaj ĉar ĉiu havas en sia perispirito konstantan fluidecan fonton, oni do portas en si mem la kuracilon. Temas nur pri tio, ke oni purigu tiun fonton kaj al ĝi havigu tiajn kvalitojn, kiuj efiku sur la malbonajn influojn kiel ia *repuŝilo*, anstataŭ fariĝi ia altirforto. La perispirito estas do ia kiraso, kiun oni devas kiel eble plej forte hardi. Nu, ĉar ĝiaj kvalitoj rilatas al la kvalitoj de la animo, necesas, ke oni penadu por ĉi ties plibonigo, ĉar ja la neperfektaĵoj de la animo altiras la malbonajn Spiritojn.

La muŝoj flugas, kien ilin altiras fokusoĵ de putrado; detruu tiujn fokusoĵn kaj la muŝoj malaperos. Tiel same la malbonaj Spiritoj iras, kien ilin altiras la malbono; detruu la malbonon, kaj ili foriĝos. *La vere bonaj Spiritoj, enkarniĝintaj aŭ elkarniĝintaj, ja neniom timas la influon de la malbonaj Spiritoj.*

II. KLARIGO DE KELKAJ FENOMENOJ RIGARDATAJ KIEL SUPERNATURAJ

Spirita aŭ psika vidado; duobla vidado; sommambulismo; sonĝoj.

22. – La perispirito estas la ligilo inter la korpa vivo kaj la vivo spirita, kaj ja per ĝi la enkarniĝinta Spirito tenas konstantan rilaton kun la elkarniĝintoj. Per ĝi, unuvorte, estiĝas ĉe la homo specialaj fenomenoj, kies ĉefa kaŭzo tute ne sidas en la palpebla materio kaj kiuj, pro tio, ŝajnas supernaturaj.

Ja en la proprecoj kaj en la radiado de la perispirita fluido oni nepre serĉu la kaŭzon de la *duobla vidado*, aŭ *spirita vidado*, kiun oni povas ankaŭ nomi *psika vidado*, per kiu multaj homoj estas dotitaj, ofte malgraŭvole, krom ankaŭ per la somnambula vidado.

La perispirito estas la *sentiva organo* de la Spirito kaj per ĝi la enkarniĝinta Spirito perceptas spiritajn aĵojn netrafekblajn por la korpaj sensoj. Pro la korpaj organoj, la vidado, la aŭdado kaj la diversaj sensacoj estas lokitaj kaj limigitaj al la perceptado de la materiaj aferoj; pro la senso spirita, aŭ *psika*, ili ĝeneraliĝas: la Spirito vidas, aŭdas kaj sentas, per sia tuta memo, ĉion, kio troviĝas en la sfero de radiado de lia perispirita fluido.

Tiuj fenomenoj konstituas, ĉe la homo, la manifestiĝon de la spirita vivo; temas pri la animo aganta ekster la organismo. Ĉe la duobla vidado, aŭ perceptado per la psika senso, li ne vidas per la korpaj okuloj, kvankam ofte, pro la kutimo, li direktas la okulojn al tiu punkto, al kiu sin turnas lia atento. Li vidas per la okuloj de la animo, kaj la pruvo kuŝas en tio, ke li tute bone vidas kun la okuloj fermitaj kaj trans la atingo de lia rigardo; li legas la penson figuritan en la fluideca radio (n-ro 15).¹

23. – Kvankam, dum la vivo, la Spirito estas alĉenita al la korpo per la perispirito, li tamen tia ne troviĝas en tiel sklava maniero, ke li ne povus plilongigi sian ĉenon kaj transportiĝi malproksimen, kiel sur la Tero, tiel ankaŭ sur iu ajn loko en la spaco. La Spirito ja kontraŭvole estas ligita al sia korpo, ĉar lian normalan vivon karakterizas libereco, dum la korpa vivo egalas tiun de servutulo ligita al la tero.

La Spirito do sentas sin feliĉa, lasante sian korpon, same kiel la birdo, lasanta sian kaĝon, kaj pro tio li kaptas ĉiujn okazojn por liberiĝi, tiucele profitante ĉiujn momentojn, kiam lia ĉeesto ne estas necesa por la interrilata vivo. Tiel ekestas la fenomeno nomata *liberiĝo de la animo*, kiu ĉiam okazas dum la dormo. Ĉiufoje, kiam la korpo ripozas kaj la sensoj restas neaktivaj, la Spirito elliberiĝas. (*La Libro de la Spiritoj*, 2-a Parto, ĉap. VIII.)

En tiuj momentoj, la Spirito vivas la spiritan vivon, dum la korpo vivas nur vegetan vivon; li parte troviĝas en tiu stato, en kiu li sin trovos post la morto: li trakuras la spacon, komuni-

¹ Faktoj pri duobla vidado kaj somnambulisma klarvideco, raportitaj en la *Revue Spirite*: januaro 1858, p. 25; novembro 1858, p. 213; Julio 1861, p. 197; novembro 1865, p. 352.

kiĝas kun la amikoj kaj aliaj Spiritoj, liberaj aŭ, kiel li, ankaŭ *enkarniĝintaj*.

La fluideca ligilo lin altenanta al la korpo definitive ŝiriĝas nur okaze de la morto; la kompleta disiĝo efektiviĝas nur ĉe la absoluta estingiĝo de la vivoprincipo. Dum la korpo vivas, la Spirito, kiel ajn distanca li sin trovas, estas tuj vokita, se nur lia ĉeesto estas necesa; tiam li revenas al la ekstera, interrilata vivo. Kelkfoje, ĉe la vekigo, li konservas pri siaj migradoj ian memoron, ian pli aŭ malpli precizan imagon, kio konstituas la sonĝon. Ĉiuokaze li kunportas intuiciojn, kiuj al li sugestas novajn ideojn kaj pensojn kaj pravigas la proverbon: Post dorma trankvilo, venas bona konsilo.

Tiel same estas klarigataj certaj fenomenoj karakterizantaj la naturan kaj la magnetan somnambulismen, la letargion, la ekstazon, ktp, kiuj estas nenio alia ol manifestiĝoj de la spirita vivo.¹

24. – Ĉar la spirita vidado ne fariĝas per la korpaj okuloj, sekvas, ke la percepto de la aferoj ne efektiviĝas helpe de la ordinara lumo: fakte, la materia lumo estas farita por la materia mondo; por la spirita mondo ekzistas speciala lumo, kies naturo estas al ni nekonata sed kiu sendube prezentas unu el la proprecoj de la etereca fluido, konforma al la vidperceptoj de la animo. Ekzistas do materia lumo kaj spirita lumo. La unua havas siajn fokusojn limigitaj en la lumaj korpoj; la fokuso de la dua estas ĉie: ja tial ekzistas nenia baro al la spirita vidado, kiun malhelpas nek la distanco, nek la opakeco de la materio; por ĝi ne ekzistas obskuro. La spiritan mondon

¹ Okazoj de letargio kaj katalepsio: *Revue Spirite*: “Sinjorino Schwabenhaus”, septembro 1858, p. 255; – “La juna katalepsiulino de Ŝvabujo”, januaro 1866, p. 18.

do lumigas la spirita lumo, kiu estigas proprajn efikojn, same kiel la sunlumo lumigas la materian mondon.

25. – Envolvita en sia perispirito, la animo do kunportas sian luman principon. Pro sia etereca esenco, la animo penetras la materion, kaj tio estas la kaŭzo kial ne estas korpoj opakaj por ĝia vidado.

Tamen, ne sama estas la spirita vidado, ĉu laŭ atingopovo, ĉu laŭ penetriveco, ĉe ĉiuj Spiritoj; nur la puraj Spiritoj ĝin plenpove posedas. Ĉe la malsuperaj, ĝi estas malfortigita de la relativa maldelikateco de la perispirito, kiu sin intermetas kvazaŭ ia nebulogo.

Ĝi manifestiĝas en malsamaj gradoj, ĉe la enkarniĝintaj Spiritoj, per la fenomeno de la duobla vidado, ĉu ĉe la natura aŭ magneta somnambulismo, ĉu en stato de maldormo. Laŭ la grado de potenco de tiu kapablo, oni diras, ke la klarvideco estas pli aŭ malpli granda. Ja helpe de tiu kapablo certaj personoj vidas la internon de la homa organismo kaj priskribas la kaŭzojn de la malsanoj.

26. – La spirita vidado havigas do specialajn perceptojn, kiuj, ne havante kiel sidejon la materiajn organojn, fariĝas en kondiĉoj tre diferencaj de tiuj propraj al la korpa vivo. Pro tio, oni ne povas, rilate al ĝi, atendi identajn efikojn nek eksperimenti per la samaj procedoj. Fariĝante ekster la organismo, ĝi havas ian moviĝemon, kiu vanigas ĉiajn antaŭvidojn. Nepre necesas ĝin studi en ĝiaj efikoj kaj en ĝiaj kaŭzoj, kaj ne per similigado al la ordinara vidado, kiun ĝi ne estas destinita anstataŭi, krom nur en esceptaj okazoj, kiujn oni ne povus preni kiel regulon.

27. – Ĉe la enkarniĝintaj Spiritoj la spirita vidado nepre estas neperfekta, kaj sekve povas sperti aberaciojn. Ĉar la spirita vidado havas sian sidejon en la animo mem, ĉi ties stato devas do influi la perceptojn, kiujn ĝi liveras. Laŭ la grado de disvolviĝo, la cirkonstancoj kaj la morala stato de la individuo, ĝi povas doni, ĉu dum la dormo, ĉu dum maldorma stato: 1-e la percepton de certaj faktoj, materialaj kaj realaj, kiel la konado de okazaĵoj, kiuj fariĝas malproksime, la detala priskribo de iu loko, la kaŭzoj de malsano kaj konvenaj medikamentoj; 2-e la percepton de same realaj aferoj de la spirita mondo, kiel la vido de la Spiritoj; 3-e fantaziajn bildojn kreitajn de la imago, analogajn al la fluidecaj kreaĵoj de la penso (Vidu ĉi-supre, n-ro 14). Tiuj kreaĵoj ĉiam estas en rilato kun la moralaj dispozicioj de la Spirito, kiu ilin estigas. Ja tiel la penso de personoj forte penetritaj kaj absorbitaj de certaj religiaj kredoj prezentas al ili la inferon, ties fornegojn, ties torturojn kaj ties demonojn, nome ĝuste tiaj, kiaj tiuj personoj ilin imagas. Kelkfoje temas pri tuta epopeo. La paganoj vidis la Olimpon kaj la Tartaron, same kiel la kristanoj vidas la inferon kaj la paradizon. Se, ĉe la vekiĝo aŭ ĉe la eliro el la ekstazo, tiuj personoj konservas precizan memoron pri siaj vizioj, ili prenas ĉi tiujn por realaĵoj konfirmantaj iliajn kredojn, dum efektive ĉio estas nenio alia krom ia produkto de iliaj propraj pensoj¹. Necesas do fari rigoran distingon inter la ekstazaj vizioj, antaŭ ol akcepti ilin. Ĉi-rilate, la rimedo kontraŭ trokredemo estas la studado de la leĝoj direktantaj la spiritan mondon.

¹ Oni tiel povas klarigi la viziojn de fratino Elmerich, kiu, raportante pri la tempo de la pasiono de la Kristo, asertas esti vidinta materialajn aferojn, kiuj neniam ekzistis krom en la libroj, kiujn ŝi legis; tiujn de S-rino Cantamille (*Revue Spirite*, aŭgusto 1866, p. 240) kaj parton de tiuj de Swedenborg.

28. – La ĝustediraj sonĝoj prezentas la karakterojn de la ĉi-supre priskribitaj vizioj. Al la du unuaj apartenas la sonĝoj antaŭvidaj, antaŭsentaj kaj avertaj¹; ĉe la tria, nome ĉe la fluidecaj kreaĵoj de la penso, ja troviĝas la kaŭzo de certaj fantaziaj imagoj, kiuj kvankam neniel realaj rilate al la materia vivo, tamen iafoje prezentiĝas al la Spirito kun tiela realeco, ke la korpo suferas ilian refrapon, ke en iuj okazoj oni vidis la harojn blankiĝi sub la impreso de iu sonĝo. Tiajn kreaĵojn povas estiĝi: la ekzaltiteco de la kredoj; retrospektivaj rememoroj; inklinoj, deziroj, pasioj, timo, rimorsoj; kutimaj zorgoj; bezonoj de la korpo aŭ ia misfunkcio de la organismo; kaj fine aliaj Spiritoj kun bonfara aŭ malbonfara celo laŭ ties naturo.²

Katalepsio. – Reviviĝoj

29. – La inerta materio estas sensenta, kaj ankaŭ tia estas la perispirita fluido, sed ĉi tiu transigas la sensacon al la sentiva centro, kia ja estas la Spirito. La doloraj lezoj de la korpo refrapas do en la Spirito, kvazaŭ ia elektra malŝargo, pere de la perispirita fluido, kies konduktiloj verŝajne estas la nervoj. Ĝi estas la nerva fluo de la fiziologoj, kiuj, ne konante la rilatojn inter tiu fluido kaj la spirita principo, ankoraŭ ne povis klarigi ĉiujn efikojn.

La interrompo povas okazi pro la apartigo de iu membro aŭ pro la sekcado de iu nervo, sed ankaŭ, parte aŭ tute kaj sen ia lezo, en la momentoj de liberiĝo, de granda supereksciteco aŭ de absorba zorgo de la Spirito. En tiu stato, la Spirito ne pensas pri la korpo kaj, en sia febra aktiveco, li

¹ Vidu ĉi-sube la ĉap. XVI, “Teorio pri la antaŭscio”, n-roj 1, 2 kaj 3.

² *Revue Spirite*, junio 1866, p. 172; septembro 1866, p. 284; – *La Libro de la Spiritoj*, ĉap. VIII, n-ro 400.

altiras al si, por tiel diri, la perispirititan fluidon, kiu, retiriĝinte de la supraĵo, tie estigas momentan nesentivecon. Oni ankaŭ povus akcepti, ke, en certaj cirkonstancoj, ekzistas en la perispirita fluido mem ia molekula ŝanĝo, kiu ĝin nedaŭre senigas je la propreco de transigado. Jen kial ofte, en la ardo de batalo, militisto ne konscias, ke li estas vundita; kial iu, kies atento estas koncentrita sur iun laboron, ne aŭdas la ĉirkaŭan bruadon. Analoga, sed pli okulfrapa efiko fariĝas ĉe iuj somnambuloj, en okazoj de letargio kaj katalepsio. Fine, ankaŭ tiel oni povas klarigi la nesentivecon de la konvulsuloj kaj de iuj martiroj. (*Revue Spirite*, januaro 1868: “Studo pri la Aissaouas”.)

Paralizo absolute ne havas la saman kaŭzon: tie la efiko estas tute organa; ja la nervoj mem, nome la konduktiloj, fariĝas netaŭgaj por la fluideca cirkulado; la kordoj de la instrumento aliĝis.

30. – Ĉe certaj patologiaj statoj, kiam la Spirito forlasis la korpon kaj la perispirito al ĝi restas ligita nur per kelkaj punktoj, tiam la korpo prezentas ĉiujn eksterajn signojn de la morto kaj oni asertas absolutan veraĵon dirante, ke la vivo pendas sur nura fadeno. Tia stato povas daŭri pli aŭ malpli longe; certaj partoj de la korpo povas eĉ sperti malkomponiĝon, sen ke la vivo estus definitive estingiĝinta. Dum ne ankoraŭ rompiĝis la lasta ligilo, la Spirito povas, aŭ per energia agado de sia *propra* volo, aŭ per *fremda*, *same potenca fluideca influo*, esti revokita en la korpon. Tiel estas klarigitaj certaj plidaŭrigoj de la vivo kontraŭ ĉia probableco, krom ankaŭ certaj supozataj reviviĝoj. Ĝi estas kvazaŭ la planto, kiu sin elpuŝas iafoje havante unu solan radikan fibreton. Sed kiam disiĝis de la karna korpo la lastaj molekuloj de la korpo

fluideca, aŭ kiam ĉi tiu troviĝas en stato de neriparebla konsumiĝo, tiam reveno al la vivo fariĝas absolute neebla.¹

Resanigoj

31. – Kiel oni vidis, la universa fluido estas la primitiva elemento de la karna korpo kaj de la perispirito, kiuj de tiu fluido estas nuraj transformiĝoj. Pro la identeco de sia naturo, tiu fluido, kondensita en la perispirito, povas liveri rebonigajn principojn al la korpo; la Spirito, enkarniĝinta aŭ elkarniĝinta, estas la propulsa aganto, kiu sorbigas al konsumiĝinta korpo parton el la substanco de sia fluideca envolaĵo. La resaniĝo fariĝas per substituo de *sana* molekulo al molekulo *malsana*. La resaniga povo do rilatas al la pureco de la sorbigita substanco; sed ĝi ankaŭ dependas de la energio de la volo, kiu estigas pli abundan elĵeton de fluido, al ĉi tiu donante pli grandan penetran forton; fine ĝi ankaŭ dependas de la intencoj de tiu, kiu volas resanigi, *ĉu li estas homo aŭ Spirito*. La fluidoj emanantaj de malsupera fonto efikas kvazaŭ difektitaj medikamentaj substancoj.

32. – La efikoj de la fluideca agado sur la malsanojn treege varias laŭ la cirkonstancoj. Tiu agado kelkfoje estas malrapida kaj postulas longan kuracadon, kiel ĉe la ordinara magnetismo; aliajn fojojn ĝi estas rapida kiel elektra fluo. Ekzistas personoj dotitaj per tiela povo, ke ili ĉe kelkaj malsanuloj estigas subitajn resaniĝojn per la nura surmetado de manoj aŭ eĉ per sola ago de la volo. Inter ambaŭ ekstremoj de tiu kapablo senfine diversas la nuancoj. Ĉiuj ĉi-specaj resanigoj

¹ Ekzemploj: *Revue Spirite*: “Doktoro Cardon”, aŭgusto 1863, p. 251; – “La Korsika virino”, majo 1866, p. 134.

estas varioj de la magnetismo kaj diferencas inter si nur per la potenco kaj la rapideco de la agado. La principo restas ĉiam la sama, nome la fluido, kiu rolas kiel terapia aganto kaj kies efiko dependas de ĝia kvalito kaj de specialaj cirkonstancoj.

33. – La magneta agado povas fariĝi plurmaniere:

1-e Per la fluido mem de la magnetizanto; ĝi estas la ĝustasenca magnetismo, aŭ *homa magnetismo*, kies agado dependas de la potenco kaj ĉefe de la kvalito de la fluido;

2-e Per la fluido de la Spiritoj, agantaj rekte kaj *sen ia peranto* sur enkarnulon, ĉu por kuraci aŭ kvietigi ian suferadon, ĉu por estigi la spontan an somnambulan dormon, ĉu por efiki sur la individuon per ia fizika aŭ morala influo. Ĝi estas la *spirita magnetismo*, kies kvalito rekte rilatas al la kvalitoj de la Spirito.¹

3-e Per la fluido, per kiu la Spiritoj surverŝas la magnetizanton, kiu al ĝi servas kiel konduktilo. Ĝi estas la magnetismo *miksa, duonspirita* aŭ, se oni volas, *homa-spirita*. La spirita fluido, kombinita kun la homa fluido, havigas al ĉi tiu la al ĝi mankantajn kvalitojn. La helpo de la Spiritoj, en tiuj cirkonstancoj, estas iafoje spontana, sed plejofte ĝin venigas la alvoko de la magnetizanto.

34. – La kapablo resanigi per la fluideca influo estas tre ordinara kaj povas disvolviĝi per la praktikado; sed la subita resanigo per la surmetado de manoj estas malofta kaj ĝian

¹ Ekzemploj: *Revue Spirite*, februaro 1863, p. 64; aprilo 1865, p. 113; septembro 1865, p. 264.

apogeon oni povas rigardi escepta. Aperis tamen, en diversaj epokoj kaj preskaŭ ĉe ĉiuj popoloj, individuoj, kiuj ĝin posedis en eminenta grado. Lastatempe oni vidis plurajn rimarkindajn ekzemplojn, kies aŭtenteco ne povas esti kontestata. Ĉar tiaspecaj resanigoj sidas sur natura principo, kaj la povo ilin estigi ne konstituas ian privilegion, tial sekvas, ke ili ne fariĝas ekster la Naturo kaj estas miraklaj nur laŭŝajne.¹

Aperaĵoj. – Transfiguriĝoj

35. – La perispirito, en sia normala stato, estas al ni nevidebla, sed, ĉar ĝi konsistas el etereca materio, la Spirito povas, en certaj okazoj, per ago de sia volo, igi ĝin ricevi ian molekulan ŝanĝon, kiu ĝin momente videbligas. Ja tiel fariĝas la *aperaĵoj*, kiuj, same kiel aliaj fenomenoj, ne troviĝas ekster la leĝoj de la Naturo. Ĉi tiu estas ne pli eksterordinara, ol la fenomeno de vaporo, kiu nevidebliĝas, kiam ĝi estas tre maldensa, sed kiu fariĝas videbla pro kondensiĝo.

Laŭ la grado de densiĝo de la perispirita fluido, la aperaĵo kelkfoje estas svaga kaj vaporeca; iujn fojojn, ĝi montriĝas pli nete difinita; aliajn fojojn, fine, ĝi havas ĉiujn eksterajn signojn de la palpebla materio; ĝi eĉ povas atingi realan tuŝeblecon, ĝis tia grado, ke oni povas trompiĝi pri la naturo de la estulo staranta antaŭ li.

Estas oftaj la vaporecaj aperaĵoj, kaj multaj homoj postmorte prezentiĝas en tia formo al la personoj, kiujn ili amas. Pli maloftaj estas la palpeblaj aperaĵoj, kvankam pri ili

¹ Ekzemploj de subitaj resanigoj raportitaj en la *Revue Spirite*: “La princo de Hohenlohe”, decembro 1866, p. 368; – “Jakobo”, oktobro kaj novembro 1866, p. 312 kaj 345; oktobro kaj novembro 1867, p. 306 kaj 339; – “Simonet”, aŭgusto 1867, p. 232; – “Caid Hassan”, oktobro 1867, p. 303; – “Parokestro Gassner”, novembro 1867, p. 331.

estas multnombraj ekzemploj perfekte aŭtentaj. Se la Spirito volas rekonigi sin, li donas al sia envolaĵo ĉiujn eksterajn signojn, kiujn ĝi havis dum lia vivo.¹

36. – Rimarkindas, ke la palpeblaj aperaĵoj havas nur la ŝajnon de la karna materio; ili ne povas havi ties kvalitojn. Pro sia fluideca naturo, ili ne povas havi ties saman koherecon, ĉar efektive ili ne estas karno. Ili formiĝas subite kaj same subite malaperas, aŭ aerdisiĝas, pro la malagregiĝo de la fluidecaj molekuloj.² La estuloj, kiuj prezentiĝas en tiaj kondiĉoj, ne naskiĝas, nek mortas, kiel la aliaj homoj. Ili jen estas vidataj, jen ĉesas esti vidataj, sen ke oni scius, de kie ili venis, kiel ili venis, kien ili iros! Oni ne povus ilin mortigi, nek katenligi, nek enkarcerigi, ĉar ili ne havas karnan korpon. Frapas la malplenon la batoj, kiujn oni al ili donus.

Tia estas la karaktero de la *ageneruloj*, kun kiuj oni povas esti en rilatoj, ne suspektante, kiaj ili estas, sed kiuj neniam longe restadas ĉe la homoj, ne povas fariĝi ordinara kunvivanto en iu domo, nek alkalkuliĝi al la membroj de iu familio.³

Cetere, en ilia tuta memeco, en ĉiuj iliaj teniĝoj, vidiĝas io stranga kaj neordinara, kiu devenas samtempe de materieco kaj spiriteco: ilia rigardo, samtempe vaporeca kaj penetranta, ne havas la klarecon de la rigardo per la karnaj okuloj; ilia parolo, mallonga kaj preskaŭ ĉiam sentenca, neniom havas el

¹ *La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. VI kaj VII.

² *Noto de la Eldonejo de Brazila Spiritisma Federacio al sia portugallingva eldono de 1973*: “Tiam ankoraŭ ne estis konataj la longedaŭraj materiigoj, kiajn poste kontrolis William Crookes”.

³ *Same*: “Laŭ la Biblio, tiu fakto okazis ĉe la familio de Tobija”. (Vidu “La Libro de Tobija”.)

la brilo kaj ŝanĝiĝemo de la homa parolo; ilia alproksimiĝo kaŭzas strangan, nedifineblan impreson de surprizo, kiu inspiras iaspecan timon, kaj kvankam ilin prenante por individuoj egalaj al ĉiuj aliaj, oni tamen nevole diras: Jen neordinara estulo.¹

37. – Ĉar sama estas la perispirito tiel ĉe la enkarnuloj, kiel ankaŭ ĉe la elkarniĝintoj, iu enkarniĝinta Spirito, pro tute identa efiko, povas aperi, en momento de libereco, en loko alia ol tiu, en kiu lia korpo ripozas, kun siaj kutimaj trajtoj kaj kun ĉiuj signoj de sia identeco. Ĝuste tiu fenomeno, kies multaj okazoj estas konataj, naskis la kredon je la duoblaj homoj.²

38. – Karakteriza efiko ĉe tiaspecaj fenomenoj estas tio, ke la aperaĵoj vaporecaj, kaj eĉ tiuj palpeblaj, ne percepteblas por ĉiuj sendistinge; la Spiritoj sin montras nur kiam ili volas, kaj al kiuj ili volas. Iu Spirito povus do aperi ĉe iu kunsidantaro al unu aŭ al multaj ĉeestantoj kaj ne esti vidata de la ceteraj. Tiel okazas tial, ke tiaj perceptoj efektiviĝas per la spirita, ne per la karna vidado, ĉar la spirita vidado ne nur ne estas donita al ĉiuj homoj, sed ankaŭ povas, se necese, esti forprenita, laŭ la volo de la Spirito, el tiu, al kiu li ne volas sin montri,

¹ Ekzemploj de vaporecaj aŭ palpeblaj aperaĵoj kaj de ageneruloj: *Revue Spirite*, januaro 1858, p. 24; oktobro, p. 291; februaro 1859, p. 38; marto 1859, p. 80; januaro 1859, p. 11; novembro 1859, p. 303; aŭgusto 1859, p. 210; aprilo 1860, p. 117; majo 1860, p. 150; julio 1861, p. 199; aprilo 1866, p. 120; – “La Laboristo Marteno, prezentita al Ludoviko XVIII, kompletaj detaloj”, decembro 1866, p. 353.

² Ekzemploj de aperaĵoj de vivantaj personoj: *Revue Spirite*, decembro 1858, p. 329 kaj 331; februaro 1859, p. 41; aŭgusto 1859, p. 197; novembro 1860, p. 356.

krom ankaŭ esti de li por momento donita, se li tion rigardas necesa.

La kondensiĝo de la perispirita fluido ĉe la aperaĵoj, eĉ se ĝi atingas la tuŝeblecon, ne havas do la proprecojn de la ordinara materio: se ne estus tiel, la aperaĵoj, iĝante percepteblaj por la korpaj okuloj, estus vidataj de ĉiuj ĉeestantaj personoj.¹

39. – Ĉar la Spirito povas estigi transformiĝojn en la strukturo de sia perispirita envolaĵo, kaj ĉar tiu envolaĵo disradias ĉirkaŭ la korpo kvazaŭ ia fluideca atmosfero, tial ĉe la supraĵo mem de la korpo povas estiĝi ia fenomeno analoga al la aperaĵoj. La reala bildo de la korpo povas pli aŭ malpli komplete malaperi sub la fluideca tavolo kaj preni aliajn trajtojn; aŭ, vidate tra la modifita fluideca tavolo kvazaŭ tra ia prismo, la primitivaj trajtoj povus preni alian aspekton. Se la enkarniĝinta Spirito, liberiĝinte el la trivialeco, identiĝas kun la aferoj de la spirita mondo, tiam la esprimo de malbela vizaĝo povas fariĝi bela, radianta kaj eĉ luma; se, male, la Spirito estas regata de malbonaj pasioj, tiam bela vizaĝo povas preni hidan aspekton.

Ĝuste tiel estiĝas la *transfiguriĝoj*, kiuj ĉiam reflektas kvalitojn kaj sentojn superregantajn en la Spirito. Tiu fenomeno rezultas do el ia fluideca transformiĝo, estas iaspeca perispirita aperaĵo, kiu ekestas sur la vivanta korpo mem kaj kelkfoje en la momento de la morto, anstataŭ fariĝi malproksime kiel la ĝustasencaj aperaĵoj. Kio distingas tiaspecajn

¹ Oni devas akcepti kun ekstrema rezervo la rakontojn pri pure individuaj aperaĵoj, kiuj, en certaj okazoj, povus esti efiko de ia superekscitita imagemo kaj profitcela elpenso. Konvenas do skrupule pesi la cirkonstancojn, la honorindecon de la koncernata persono kaj krome lian eventualan intereson, ekspluati la kredemon de tro konfidemaj individuoj.

aperaĵojn estas tio, ke ili ĝenerale percepteblas por ĉiuj ĉeestantoj kaj per la korpaj okuloj, ĝuste tial, ke ili havas kiel bazon la videblan karnan materion, dum ĉe la pure fluidecaj aperaĵoj tute ne estas palpebla materio.¹

Fizikaj manifestiĝoj. – Mediumeco

40. – La fenomenoj de la turniĝantaj kaj parolantaj tabloj, de la etereca leviĝo de pezaj korpoj, de la mediuma skribo, tiel antikvaj kiel la mondo sed vulgaraĵoj en la nuntempo, liveras la ŝlosilon de kelkaj aliaj, analogaj kaj spontanaj, al kiuj oni atribuas, pro la nescio pri la leĝo ilin reganta, karakteron supernaturan kaj miraklecan. Tiaj fenomenoj havas kiel bazon la proprecojn de la perispirita fluido, ĉu de la enkarnuloj, ĉu de la liberaj Spiritoj.

41. – Per sia perispirito la Spirito agadis sur sian vivantan korpon, kaj ankoraŭ per tiu sama fluido li manifestiĝas agante sur la inertan materion, estigas bruojn, movojn de tabloj aŭ aliaj objektoj, kiujn li levas, renversas aŭ transportas. Neniel miriga estas tiu fenomeno, se oni konsideras, ke ĉe ni la pli potencaj motoroj troviĝas en la plej maldensaj kaj eĉ senpezaj fluidoj kiel la aero, la vaporo kaj la elektro.

Same per sia perispirito la Spirito igas la mediumojn skribi, paroli aŭ desegni. Ne havante palpeblan korpon por malkaŝe agadi en la okazoj, kiam li volas manifestiĝi, la Spirito uzas la korpon de la mediumo, kies organojn li al si pruntas, kaj tiun korpon li agigas, kvazaŭ ĝi estus sia propra, per la fluideca efluvo, kiun li verŝas sur ĝin.

¹ Ekzemplo kaj teorio de la transfiguriĝo. *Revue Spirite*, marto 1859, p. 62. (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. VII.)

42. – Per ĉi tiu sama procedo la Spirito agas sur la tablon, ĉu por al ĝi komuniki movon sen difinita signifo, ĉu por igi ĝin doni inteligentajn frapojn, kiuj, indikante la literojn de la alfabeto, formos vortojn kaj frazojn, tiel estigante la fenomenon nomatan *tiptologio*. Ĉi tie la tablo rolas nuran instrumenton, kiun la Spirito utiligas tiel same, kiel oni uzas krajonon por skribi. Tiucele li havigas al ĝi momentan vivoforton per la fluido, kiun li penetrigas en ĝin, sed *li tute ne identiĝas kun ĝi*.

Tiuj personoj, kiuj, regataj de emocio pro la manifestiĝo de iu karulo, brakumas la tablon, faras ja ridindan agon, ĉar estus tute same kiel se ili brakumus la bastonon, kiun amiko uzus por doni frapojn. Same agas tiuj, kiuj alparolas la tablon, kvazaŭ la Spirito estus enfermita en la ligno, aŭ kvazaŭ la ligno fariĝis Spirito.

Kiam okazas komunikiĝoj per ĉi tiu rimedo, oni prezentu al si, ke la Spirito troviĝas ne en la tablo, sed *apud ĝi*, kiel *li ja estus se ankoraŭ vivanta* kaj kiel oni lin vidus, se en tiu momento li povus videbliĝi. Same okazas ĉe la skribaj komunikadoj: oni vidus la Spiriton apudstanta la mediumon, direktanta lian manon aŭ al li transsendanta sian penson pere de fluideca fluo.

43. – Kiam la tablo leviĝas de la planko kaj ŝvebas en la spaco sen apogpunkto, la Spirito ne levas ĝin per brakforto; li ĝin envolvas kaj penetrigas per iaspeca fluideca atmosfero, kiu nuligas la graviton, same kiel la aero efikas sur balonoj kaj kajtoj. La fluido, per kiu ĝi estas penetrigita, momente havigas al la tablo pli grandan specifan malpezecon. Kiam ĝi restas fikse kroĉita al la planko, ĝi troviĝas en stato analoga al tiu de la pneŭmata kloŝo, en kiu oni faris vakuon. Ĉi tie estas nenio alia ol simplaj komparoj celantaj montri analogecon de efikoj,

ne ian absolutan similecon de kaŭzoj (*La Libro de la Mediu-
moj*, 2-a Parto, ĉap. VI).

Oni komprenas, sekve de tio, ke por Spirito ne pli malfacilas levi personon ol levi tablon, transporti objekton de unu loko al alia, ol ĵeti ĝin ien ajn. Tiuj fenomenoj efektiviĝas laŭ la sama leĝo.¹

Kiam la tablo persekutas iun personon, tio ne signifas, ke la Spirito kuras, sed ja ke li, povante trankvile resti sur la sama loko, donas al ĝi impulson per ia fluideca fluo, helpe de kiu li ĝin laŭvole movas.

Kiam la frapoj aŭdiĝas en la tablo aŭ aliloke, tiam ne la Spirito frapas per sia mano aŭ per ia ajn objekto. Li nur alsendas sur la punkton, de kiu venas la bruoj, fluidan ŝprucon, kiu estigas la efekton de elektra maŝargo. Li modifas la bruon tiel same kiel oni povas modifi la sonojn estigatajn de la aero.²

¹ Sur tia principo sidas la fenomeno de *alporto*, kiun, kvankam tre reala, konvenas akcepti nur kun ekstrema rezervo, ĉar ĝi estas unu el tiuj plej taŭgaj por imitado kaj jonglado. Oni devas preni en seriozan konsideron la nekontesteblan honorindecon de tiu, kiu ilin okazigas, lian absolutan malprofitemon, materialan kaj *moralan*, kaj la kunhelpon de la akcesoraj cirkonstancoj. Gravas precipe sin gardi kontraŭ la tro granda facileco, kun kiu tiaj efikoj fariĝas, krom ankaŭ suspekti tiujn, kiuj tro ofte kaj, por tiel diri, laŭvole ripetiĝas; la prestidigitatoroj okazigas plej eksterordinarajn aferojn.

La levo de iu persono estas fakto ne malpli pozitiva sed eble multe pli malofta, ĉar malfacile imitebla. Estas al ĉiuj sciate, ke S-ro Home pli ol unu fojon leviĝis ĝis la plafono kaj rondiris en la ĉambro. Laŭdire Sankta Kuperteno havis tiun saman kapablon, sed tio ne sekvigas, ke la fakto estas pli mirakleca ĉe unu ol ĉe la alia.

² Ekzemploj de materiaj manifestiĝoj kaj de perturboj estigitaj de la Spiritoj: *Revue Spirite*, “La junulino de la panoramoj”, januaro 1858, p. 13; – “Fraŭlino Clairon”, februaro 1858, p. 44; – “Frapanta Spirito de Bergzabern” (kompleta raporto), majo, junio, julio 1858, p. 125, 153, 184; – “Dibbelsdorf”, aprilo 1858, p. 219; – “Panisto de Dieppe”, marto 1860, p. 76; – “Komercesto de Sankta Petersburgo”, aprilo 1860, p. 115; – “Strato de

44. – Fenomeno tre ofta en la mediumeco estas la kapablo de certaj mediumoj por skribi en fremda lingvo; por elvolvi, parole aŭ skribe, temojn, kiuj translimas ilian instruitecon. Ne malofta estas la fakto, ke iuj flue skribas, neniam antaŭe lerninte tiun kapablon; ke aliaj, kiuj neniam dum la vivo kapablis verki unu verson, skribas poeziaĵojn; ke fine aliaj desegnas, pentras, skulptas, komponas muzikon, ludas ian muzikilon, sen antaŭa sciado pri desegnarto, pentrarto, skulpturo aŭ muziko. Ofte okazas, ke skribiva mediumo perfekte reproduktas la skribon kaj la subskribon, kiujn la Spiritoj per li komunikigantaj havis dum sia vivo, kvankam li neniam antaŭe konis tiajn karakterizaĵojn.

Sed nenio pli miregindas ĉe tiu fenomeno, ol vidi, ke oni igas infanon skribi, direktante al li la manon; oni povas ĉi-maniere igi lin plenumi ĉion, kion oni volas. Oni povas igi iun ajn skribi en iu ajn lingvo, al li diktante la vortojn litero post litero. Oni komprenas, ke la samo povas okazi ĉe la mediumeco, se oni konsideras la manieron, kiel la Spiritoj komunikigas kun la mediumoj, kiuj por ili efektive estas nenio alia ol nuraj pasivaj instrumentoj. Sed se la mediumo posedas la mekanismon, se li venkis la praktikajn malfacilaĵojn, se la esprimoj al li estas familiaraj, se li fine disponas en sia cerbo la elementojn de tio, kion la Spirito volas igi lin plenumi, tiam li statas kiel homo, kiu scias flue legi kaj skribi; la laboro iĝas pli facila kaj pli rapida; al la Spirito restas nur transsendi sian penson, kiun lia interpretanto reproduktas per la rimedoj al li disponeblaj.

l' Juglandarboj", aŭgusto 1860, p. 236; – "Frapanta Spirito de Aube", januaro 1861, p. 23; – Same, en la 16-a jarcento, januaro 1864, p. 32; – "Poitiers", majo 1864, p. 156, kaj majo 1865, p. 134; – "Fratino Maria", junio 1864, p. 185; – "Marsejlo", aprilo 1865, p. 121; – "Fives", aŭgusto 1865, p. 225; – "La musoj de Equihem", februaro 1866, p. 55.

La kapableco de mediumo por aferoj al li fremdaj ankaŭ ofte radikas en scioj, kiujn li posedis en iu alia ekzistado kaj kiujn lia Spirito intuicie konservis. Se ekzemple li estis poeto aŭ muzikisto, al li estos pli facile asimili la poezian aŭ muzikan penson, kiun oni volas igi lin reprodukti. Tiu lingvo, kiun li hodiaŭ ne scias, eble estis al li familiara en alia ekzistado, de kio venas lia pli granda kapableco por mediume skribi en tiu lingvo.¹

Obsedoj kaj posedoj

45. – La malbonaj Spiritoj svarmas ĉirkaŭ la Tero, sekve de la morala malsupereco de ĝiaj loĝantoj. Ilia malica agado estas unu el la plagoj, al kiuj la homaro estas elmetata sur ĉi tiu mondo. La obsedo, kiu estas unu el la efikoj de tiu agado, devas do esti rigardata, same kiel la malsanoj kaj ĉiuj ĉagrenoj de la vivo, kiel provo aŭ kiel elaĉeto, kaj tiel akceptata.

Obsedo estas la persista agado de malbona Spirito sur iun homon. Ĝi prezentas tre malsamajn karakterojn, ekde de la simpla morala influo, sen eksteraj sentebraj signoj, ĝis plena malordo de la organismo kaj de la mensaj kapabloj. Ĝi konfuzas ĉiujn mediumajn kapablojn; en la aŭdiva kaj en la skribiva mediumeco ĝi manifestiĝas per la obstineco de unu sola Spirito, kiu komuniĝas esceptante ĉiujn aliajn.

¹ La kapableco de certaj personoj por lingvoj, kiujn ili scias, ne farinte, por tiel diri, antaŭan lernadon, havas ne alian kaŭzon krom ia intuicia memoro pri tio, kion ili sciis en alia ekzistado. La ekzemplo de la poeto M. Mèry, raportita en la *Revue Spirite* de novembro 1864, p. 328, tion atestas. Estas evidente, ke, se M. Mèry estus mediumo dum sia juneco, li skribus en la latina tiel facile kiel en la franca, kaj oni tion rigardus kiel miregindaĵon.

46. – Same kiel la malsanoj estas rezultato de korpaj malperfektaĵoj, kiuj faras la korpon atingebla por la eksteraj pereigaj influoj, la obsedo ĉiam rezultas el morala malperfektaĵo, kiu ebligas la influon de malbona Spirito. Al fizika kaŭzo oni kontraŭmetas fizikan forton; al morala kaŭzo estas necese kontraŭstari per morala forto. Por eviti la malsanojn, oni fortikigas la korpon; por sin ŝirmi kontraŭ la obsedo, oni devas fortikigi la animon; tial la obsedato bezonas labori por sia propra pliboniĝo, kio ofte sufiĉas por liberigi lin de la obsedanto, sen helpo de fremdaj personoj. Tiu helpo fariĝas necesa, kiam la obsedo degeneras en subjugigon aŭ en posedon, ĉar tiam la turmentato iafoje perdas sian energion kaj liberan volon.

La obsedo estas preskaŭ ĉiam venĝo de iu Spirito, kaj plejofte havas sian fonton en la rilatoj de la obsedato kun tiu Spirito en antaŭa ekzistado.

En la okazo de grava obsedo, la obsedato estas kvazaŭ envolvita kaj saturita de noca fluido, kiu, nuligante la agadon de la bonefikaj fluidoj, ĉi tiujn repuŝas. Ja de tia fluido necesas lin liberigi; nu, malbona fluido ne povas esti repuŝata de alia malbona fluido. Per agado simila al tiu de sanigiva medio en la okazoj de malsano, *nepre necesas forpeli la malbonan fluidon per helpo de fluido pli bona.*

Tia estas la agado mekanika, kiu tamen ne ĉiam sufiĉas; estas necese ankaŭ kaj precipe *agi sur la inteligentan estulon*, al kiu oni devas havi la rajton *paroli kun aŭtoritateco*, kiun havas nur la morala supereco; ju pli granda la morala supereco, des pli granda la aŭtoritateco.

Tio tamen ne estas ĉio; por certigi la liberigon, oni devas admoni la malican Spiriton rezigni siajn malbonajn intencojn; necesas aperigi en li la penton kaj la deziron je bono, per instruoj lerte direktataj, en privataj seancoj celantaj

lian moralan edukon; tiam oni povas ricevi la duoblan ĝojon liberigi enkarnulon kaj konverti malperfektan Spiriton.

La tasko fariĝas pli facila, kiam la obsedato, komprenante sian situacion, kunhelpas per sia volo kaj preĝado; ne estas same, kiam ĉi tiu, ensorĉite de la trompema Spirito, iluziiĝas pri la kvalitoj de tiu, kiu lin mastras, kaj plezuras en la eraro, en kiu tenas lin la obsedanto; ĉar tiam, anstataŭ helpi, li forpuŝas ĉian helpon. Tiu estas la okazo de fascino, ĉiam treege pli malfacile kuracebla, ol la plej tirana subjugigo. (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. XXIII.)

47. – Ĉe la obsedo, la Spirito agas ekstere helpe de sia perispirito, kiun li identigas kun tiu de la enkarnulo; ĉi tiu sin trovas kvazaŭ kaptita en iu reto kaj devigita agi kontraŭ sia volo.

Ĉe la posedo, anstataŭ agi ekstere, la libera Spirito sin substituas, por tiel diri, al la enkarniĝinta Spirito, kies korpon li prenas kiel loĝejon, sen ke ĝi tamen estus forlasita de sia mastro, ĉar nur ĉe la morto tio povas fariĝi. Posedo ĉiam estas do kelkatempa kaj intermita, ĉar elkarniĝinta Spirito ne povas definitive okupi la lokon de enkarniĝinta Spirito pro tio, ke la molekula kuniĝo de la perispirito kun la korpo povas estiĝi nur okaze de la embriigo. (Ĉap. XI, n-ro 18.)

Momente posedante la korpon de la enkarnulo, la Spirito uzas ĝin kvazaŭ sian propran: li parolas per ĝia buŝo, vidas per ĝiaj okuloj, agas per ĝiaj brakoj, kiel li farus dum sia vivo. Ne estas same, kiel ĉe la paroliva mediumeco, ĉe kiu la enkarniĝinta Spirito parolas, transigante la personon de elkarniĝinta Spirito; ĉe la posedo, estas la Spirito mem, kiu parolas kaj agas, kaj se oni lin konis dum lia vivo, oni lin rekonas laŭ la parolo, voĉo, gestoj kaj eĉ la esprimo de lia vizaĝo.

48. – La obsedo ĉiam estas ago de malicaj Spiritoj. La posedo povas esti ago de bona Spirito, kiu volas paroli kaj kiu, por pli forte impresi siajn aŭskultantojn, *pruntas* la korpon de enkarnulo, kiu ĝin volonte al li pruntedonas, kiel oni pruntedonas sian veston. Tio fariĝas sen ia malordo aŭ ĝeno, kaj dume la Spirito troviĝas ekstere, kiel ĉe la stato de libereco, ofte restante apud sia anstataŭanto por ĉi tiun aŭskulti.

Kiam la posedanta Spirito estas malbona, fariĝas alimaniere; li prenas la korpon ne prunte, sed perforte, se ĝia mastro ne havas *moralan forton por al li kontraŭstari*. Li tiel agas pro malico kontraŭ ĉi tiu, kiun li ĉiamaniere turmentegas kaj martirigas, ĝis la deziro lin pereigi, ĉu per strangolado, ĉu per puŝado en la fajron aŭ en aliajn danĝerajn lokojn. Uzante la membrojn kaj la organojn de la malfeliĉa turmentato, li blasfemas, insultas kaj malbontraktas tiujn, kiuj lin ĉirkaŭas; li sin fordonas al strangajoj kaj al agoj prezentantaj ĉiujn karakterojn de la furioza frenezo. Tiaspecaj faktoj, en diversaj gradoj de intenseco, estas tre multenombraj, kaj ne alian kaŭzon havas multaj okazoj de frenezo. Ĉi-rilate ofte aldoniĝas patologiaj perturboj, kiuj nenio alia estas ol nuraj sekvoj kaj kontraŭ kiuj la medicinaj kuracadoj montriĝas senefikaj dum restas la primara kaŭzo. Malkaŝante tiun fonton de parto de la homaj mizeroj, Spiritismo indikas la rimedon por ĝin kuraci: agadi sur la aŭtoron de la malbono, kiu, estante inteligenta estulo, devas esti traktata per la inteligento.¹

49. – Obsedo kaj posedo ofte estas individuaj, sed iafoje ili fariĝas epidemiaj. Kiam aro da malbonaj Spiritoj svarme sin ĵetas sur iun lokon, tio estas kvazaŭ malamika

¹ Okazoj de kuracado de obsedoj kaj posedoj: *Revue Spirite*, decembro 1863, p. 373; januaro 1864, p. 11; junio 1864, p. 168; januaro 1865, p. 5; junio 1865, p. 172; februaro 1868, p. 38; junio 1867, p. 174.

trupo ĝin invadus. Tiuokaze, tre granda povas esti la nombro de la atakataj individuoj.¹

¹ Ĝuste unu tiaspeca epidemio antaŭ kelke da jaroj trafis la vilaĝon Morzine, en Savojo. Vidu la kompletan raporton pri tiu epidemio en la *Revue Spirite* de decembro 1862, p. 353; januaro, februaro, aprilo kaj majo 1863, p. 1, 33, 101, 133.

ĈAPITRO XV

LA MIRAKLOJ DE LA EVANGELIO

Supereco de la naturo de Jesuo. – Sonĝoj. – Stelo de l' magoj.
Duobla vidado. – Resanigoj. – Poseditoj. – Reviviĝoj.
Jesuo iras sur la maro. – Transfiguriĝo. – Kvietigita ventego.
Edziĝo en Kana. – Multobligo de panoj. – Tendo de Jesuo.
Miregindaĵoj okaze de la morto de Jesuo. – Postmortaj aperoj de Jesuo.
Malapero de la korpo de Jesuo.

Supereco de la naturo de Jesuo

1. – La faktoj, kiujn la Evangelio raportas kaj kiujn oni ĝis nun rigardas miraklaj, plejparte apartenas al la ordo de la *psikaj fenomenoj*, nome de tiuj havantaj kiel primaran kaŭzon la kapablojn kaj la atributojn de la animo. Ilin komparante kun tiuj priskribitaj kaj klarigitaj en la ĵus antaŭa ĉapitro, oni senpene rekonos, ke estas ĉe ili identeco de kaŭzo kaj efiko. La Historio raportas pri analogaj fenomenoj, en ĉiuj tempoj kaj ĉe ĉiuj popoloj, ĉar, se estas animoj enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj, do nepre fariĝis la samaj efikoj. Efektive oni povas kontesti, koncerne ĉi tiun punkton, la verecon de la Historio; sed ili hodiaŭ fariĝas sub niaj okuloj, por tiel diri laŭvole, kaj pere de individuoj neniel esceptaj. La sola fakto, ke iu fenomeno

refariĝas en egalaj kondiĉoj, sufiĉas por pruvi, ke ĝi estas ebla kaj submetita al iu leĝo, do tute ne mirakla.

La principo de la psikaj fenomenoj sidas, kiel oni vidis, sur la proprecoj de la perispirita fluido, kiu konsistigas la magnetan aganton; sur la manifestiĝoj de la spirita vivo dum la korpa vivo kaj post la morto: fine sur la esenca konsisto de la Spiritoj kaj ilia rolo kiel aganta forto de la Naturo. La konado de tiuj elementoj kaj la konstato de ties efikoj rezultigis la akcepton pri la ebleco de certaj faktoj, neataj dum oni al ili atribuis supernaturan originon.

2. – Ne antaŭjuĝante la naturon de la Kristo, kies ekzameno ne apartenas al la kadro de ĉi tiu verko, kaj lin hipoteze rigardante nur kiel superan Spiriton, oni ne povas ne rekoni en li unu el tiuj plej altrangaj, staranta, pro siaj virtoj, multege pli alte ol la surtera homaro. Pro siaj senmezure ampleksaj rezultoj, lia enkarniĝo en ĉi tiu mondo nepre estis unu el tiuj misioj, kiujn Dio komisias nur al siaj senperaj kurieroj, por plenumado de siaj decidoj. Supozante, ke li ne estis Dio mem, sed ja sendito de Dio por transigi ties parolon, li certe estus pli ol ia profeto, ĉar li estus iu dia Mesio.

Kiel homo, la havis la konstruon de la karnaj estuloj; sed kiel pura Spirito, liberigita el la materio, li certe pli vivis la spiritan, ol la korpan vivon, por kies malfortaĵoj li tute ne estis trafebla. *La supereco de Jesuo antaŭ la homoj tute ne fontis el apartaj kvalitoj de lia korpo, sed el tiuj de lia Spirito, kiu absolute superregadis la materion, kaj el la kvalitoj de lia perispirito, formita el la plej kvintesenca parto de la surteraj fluoj* (ĉap. XIV, n-ro 9). Lia animo certe estis altenita al la korpo nur per la nepre necesaj ligiloj; ĉiam en libereco, ĝi certe havigis al li ian duoblan vidadon ne nur konstantan sed ankaŭ escepte penetrikan kaj multe superan al tiu trovata ĉe la

ordinaraj homoj. Same estis ĉe li koncerne ĉiujn fenomenojn dependantajn de la perispiritaj aŭ psikaj fluoj. La kvalito de tiuj fluoj havigis al li senliman magnetan forton, subtenatan de la konstanta deziro fari bonon.

Ĉu li agis kiel *mediumo* ĉe la resanigoj, kiujn li estigis? Ĉu oni povas lin rigardi kiel potencon sanigivan mediumon? Ne, ĉar mediumo estas ia peranto, ia instrumento uzata de la elkarniĝintaj Spiritoj. Ne, la Kristo ne bezonis helpon, ĉar ja li mem helpis la aliajn. Li do agadis per si mem, dank'al sia persona povo, kiel povas fari, ĉe certaj okazoj, la enkarnuloj, en la limo de siaj fortoj. Cetere, kiu Spirito kuraĝus blovi al li siajn pensojn kaj al li komisi ilian transigon? Se ian fremdan influon li ricevis, ĝi certe venis nur de Dio. Laŭ difino donita de iu Spirito, li estis *mediumo de Dio*.

Songoj

3. – Estas dirite en la Evangelio, ke Jozef estis avertita de iu anĝelo, kiu aperis al li en sonĝo kaj al li konsilis fuĝi kun la Infano en Egiptujon. (Sankta Mateo, ĉap. II, par. 19-23.)

La personĝaj avizoj ludas gravan rolon en la sanktaj libroj de ĉiuj religioj. Eĉ se ni ne certigas la elkzaktecon de ĉiuj raportitaj fenomenoj, nek ilin pridiskutas, la fenomeno en si mem tute ne estas nenormala, ĉar oni ja scias, ke ĝuste dum la dormo la Spirito, liberiĝinte el la materiaj ligiloj, momente eniras la spiritan vivon, kie li renkontiĝas kun siaj konatoj. La superaj Spiritoj ofte uzas tiun okazon por manifestiĝi al siaj protektatoj kaj al ili doni pli rektajn konsilojn. Multenombraj estas la aŭtentaj okazoj de personĝaj avertoj, sed el tio oni ne devas konkludi, ke ĉiuj sonĝoj estas avertoj, nek, des malpli, ke ĉio, kion oni vidas en sonĝo, havas ian signifon. Necesas

meti en la vicon de la superstiĉaj kaj absurdaj kredoj la arton interpreti la sonĝojn. (Ĉap. XIV, n-roj 27 kaj 28.)

Stelo de l' magoj

4. – Estas dirite, ke unu stelo aperis al la magoj, kiuj venis por adorkliniĝi al Jesuo, ke ĝi antaŭiris ilin por al ili montri la vojon, kaj ke ĝi haltis, kiam ili alvenis. (Sankta Mateo, ĉap. II, par. 1 ĝis 12.)

Temas ne pri tio, ĉu la fakto rakontita de Sankta Mateo estas reala aŭ nenio alia krom ia figuro montranta, ke la magoj estis mistere gvidataj al la loko, kie troviĝis la Infano, ĉar ja disponeblas nenio rimedo por ĝin kontroli; temas ja pri tio, ĉu estas ebla unu tiaspeca fakto.

Certa estas nur tio, ke en tiu cirkonstanco la lumo ne povus esti ia stelo. Oni povus tion kredi en tempo, kiam oni pensis, ke la steloj estas lumaj punktoj fiksitaj sur la firmamento, povantaj fali sur la Teron; sed ne nuntempe, kiam la naturo de la steloj estas konata.

Sed, eĉ ne havante la kaŭzon, kiun oni al ĝi atribuas, la apero de lumo kun stela aspekto ja estas ebla. Iu Spirito povas aperi en luma formo, aŭ transformi parton de sia perispirita fluido en lumfokuson. Multaj tiaspecaj faktoj, freŝaj kaj perfekte aŭtentaj, ne fontas el alia kaŭzo, kiu havas nenion supernaturan. (Ĉap. XIV, n-roj 13 kaj sekvantaj.)

Duobla vidado

Eniro de Jesuo en Jerusalemon

5. – Kaj kiam ili alproksimiĝis al Jerusalemon, kaj venis al Betfage, al la monto Olivarba, tiam Jesuo sendis du disĉiplojn, – dirante al ili: Iru en la vilaĝon, kiu estas kontraŭ vi, kaj vi tuj trovos azeninon ligitan, kaj azenidon

kun ĝi. Ilin malligu kaj alkonduku al mi. – Kaj se iu diros ion al vi, respondu: La Sinjoro bezonas ilin; kaj tuj li sendos ilin. – Kaj ĉi tio okazis, por ke plenumiĝu tio, kio estis dirita per la profeto, nome: – Diru al la filino de Cion: Jen via Reĝo iras al vi, humila kaj rajdanta sur azeno, kaj azenido, filo de ŝarĝobesto. (Zeharja, ĉap. IX, par. 9 kaj 10.)

Kaj la disĉiploj iris, kaj faris, kiel Jesuo ordonis al ili, – kaj alkondukis la azeninon kaj la azenidon, kaj surmetis sur ilin siajn vestojn; kaj li sidis sur tion. (Sankta Mateo, ĉap. XXI, par. 1 ĝis 7.)

Kiso de Judas

6. – Leviĝu, ni iru; jen mia perfidanto alproksimiĝas. – Kaj dum li ankoraŭ parolis, jen venis Judas, unu el la dek du; kaj kun li granda homamaso kun glavoj kaj bastonoj venis de la ĉefpastroj kaj pliaĝuloj de la popolo. – Kaj lia perfidanto jam aranĝis kun ili signon, dirante: Kiun mi kisos, tiu estas li; kaptu lin. – Kaj tuj veninte al Jesuo, li diris: Saluton, Rabeno; kaj kisis lin. – Kaj Jesuo diris al li: Amiko, por kio vi venis? Tiam ili venis, kaj metis manojn sur Jesuon kaj arestis lin. (Sankta Mateo, ĉap. XXVI, par. 46 ĝis 50).

Mirakla fiŝkaptado

7. – Kaj dum la homamaso ĉirkaŭpremis lin kaj aŭskultis la vorton de Dio, li staris apud la lago Genesaret; – kaj li vidis du ŝipetojn starantajn apud la lago, sed la fiŝkaptistoj ĵus eliris el ili, kaj lavis la retojn. – Kaj li eniris en unu el la ŝipetoj, kiu apartenis al Simon, kaj petis, ke li forŝovu iom for de la bordo. Kaj li sidiĝis, kaj instruis la homamason el la ŝipeto. – Kaj kiam li ĉesis paroli, li diris al Simon: Forŝovu ĝis la profundo, kaj mallevu la retojn por akirado. – Kaj responde Simon diris: Estro, ni jam laboris la tutan nokton kaj kaptis nenion; tamen laŭ via diro mi mallevos la retojn. – Kaj tion farinte, ili enfermis grandan amason da fiŝoj, kaj iliaj retoj ekrompiĝis; – kaj ili geste signis al siaj kompanianoj en la alia ŝipeto, ke ili venu kaj helpu ilin. Kaj ili venis, kaj plenigis ambaŭ ŝipetojn, ĝis ekprofundiĝo. (Sankta Luko, ĉap. V, par. 1 ĝis 7).

Alvokiĝo de Petro, Andreo, Jakobo, Johano kaj Mateo

8. – Kaj piedirante apud la maro de Galileo, li vidis du fratojn, Simonon, kiu estis nomata Petro, kaj Andreon, lian fraton, ĵetantajn reton en

la maron, ĉar ili estis fiŝkaptistoj. – Kaj li diris al ili: Venu post mi, kaj mi faros vin kaptistoj de homoj. – Kaj ili tuj forlasis la retojn, kaj sekvis lin.

Kaj antaŭenirinte de tie, li vidis aliajn du fratojn, Jakobon, filon de Zebedeo, kaj Johanon, lian fraton, en la ŝipeto kun ilia patro Zebedeo, riparantajn siajn retojn; kaj li vokis ilin. – Kaj ili tuj forlasis la ŝipeton kaj sian patron, kaj sekvis lin. (Sankta Mateo, ĉap. IV, par. 18 ĝis 22.)

Kaj Jesuo, forpasante de tie, vidis viron nomatan Mateo, sidantan ĉe la impostejo; kaj li diris al li: Sekvu min. Kaj li stariĝis, kaj sekvis lin. (Sankta Mateo, ĉap. IX, par. 9.)

9. – Neniom surprizaj estas tiuj faktoj, se oni nur konas la povon de la duobla vidado kaj la tre naturan kaŭzon de tiu kapablo. Jesuo ĝin posedis en plej alta grado, kaj oni povas diri, ke ĝi prezentis lian normalan staton, kion atestas multenombraj agoj de lia vivo, kiuj nuntempe estas klarigitaj de la magnetismaj fenomenoj kaj de Spiritismo.

La fiŝkaptado, rigardata kiel mirakla, ankaŭ ricevas klarigon per la duobla vidado. Jesuo ne estigis spontanaperon de fiŝoj tie, kie ili ne troviĝis; li vidis, per la vidado de la animo, same kiel povas fari nedormanta klarvidulo, la lokon, kie troviĝas la fiŝoj, kaj povis kun certeco admoni la fiŝistojn, ke ili tien ĵetu siajn retojn.

La penetriveco de la penso kaj sekve certaj antaŭdiroj rezultas el la spirita vidado. Vokinte al si Petron, Andreon, Jakobon, Johanon kaj Mateon, Jesuo nepre devis koni iliajn intimajn dispoziciojn kaj scii, ke ili lin sekvos kaj kapablos plenumi la mision, kiun li komisiis al ili. Necesis ankaŭ, ke ili mem, por sin fordoni al Jesuo, havu intuicion pri tiu misio. Same okazis, kiam, dum la Sankta Manĝo, li sciigas, ke unu el la dek du lin perfidos, kaj tiun li montras, dirante, ke li estas tiu, kiu trempis kun li la manon en la pladon; same fariĝis en la okazo, kiam li antaŭdiris, ke Petro malkonfesos lin.

En multaj lokoj de la Evangelio estas dirite: “Kaj Jesuo, eksciante iliajn pensojn, diris...”. Nu, kiel li povus koni iliajn

pensojn, krom per la fluideca radiado de tiuj pensoj kaj per la spirita vidado, kiu ebligis al li legi en la konscienco de la homoj?

Ofte, kredante, ke iu penso estas enfermita en la faldoj de la animo, la homo ne suspektas, ke li portas en si ian spegulon, reflektantan tiun penson, ian rivelilon en sia propra fluideca radiado, saturita de tiu penso. Se oni vidus la mekanismon de la nin ĉirkaŭanta nevidebla mondo, la disbranĉiĝojn de la fadenoj, kiuj kondukas la pensojn interligantajn ĉiujn inteligentajn estulojn, enkorpajn kaj senkorpajn, la fluidecajn efluvojn ŝarĝitajn per la impresoj de la morala mondo, kiuj, same kiel la aerflujoj, trairas la spacon, oni malpli surpriziĝus de certaj efikoj, kiujn la nescienco atribuas al la hazardo. (Ĉap. XIV, n-roj 15, 22 kaj sekvantaj.)

Resanigoj

Sangelfluo

10. – Kaj virino, kiu jam dek du jarojn havis sangofluon, – kaj multe suferis pro multaj kuracistoj, kaj elspezis sian tutan havon, kaj estis neniel helpita, sed kontraŭe eĉ pli malsaniĝis, – aŭdinte pri Jesuo, venis en la homamaso malantaŭ lin, kaj tuŝis lian mantelon. – ĉar ŝi diris: Se mi nur tuŝos lian mantelon, mi estos sanigita. – Kaj tuj la fonto de ŝia sango sekiĝis, kaj ŝi korpe sentis, ke ŝi resaniĝis el sia malsano.

Kaj Jesuo, *tuj sentante en si, ke la potenco eliris*, turnis sin en la homamaso, kaj diris: Kiu tuŝis mian veston? – Kaj liaj disĉiploj diris al li: Vi vidas la homamason, premantan vin, kaj ĉu vi diras: Kiu min tuŝis? – Kaj li ĉirkaŭrigardis, por vidi tiun, kiu tion faris.

Sed la virino, timigita kaj tremanta, sciante, kio fariĝis al ŝi, venis kaj falis antaŭ li, kaj diris al li la tutan veron. – Kaj li diris al ŝi: Filino, via fido vin savis; iru en paco, kaj estu sana el via malsano. (Sankta Marko, ĉap. V, par. 25 ĝis 34.)

11. – Signifoplenaj estas tiuj vortoj: “Tuj sentante en si, ke la potenco eliris”; ili esprimas la fluidan movon, kiu ekestis en Jesuo ĉe la malsana virino; ambaŭ eksentis la ĵus fariĝintan agon. Rimarkindas, ke la efikon estigis neniu vola ago de Jesuo; ne okazis magnetizado, nek surmetado de manoj. Sufiĉa estis la normala fluideca radiado por kaŭzi la resanigon.

Sed kial la radiado direktiĝis al tiu virino kaj ne al aliaj personoj, se Jesuo ne pensis pri ŝi kaj estis ĉirkaŭita de la homamaso?

Pro tre simpla kialo. Estante terapeŭtika materio, la fluido devas atingi la organan malordon por ĝin ripari; ĝi povas esti direktata sur la perturbon laŭ la volo de la resaniganto, aŭ altirata de arda deziro, de konfido, unuvorte de la fido de la malsanulo. Koncerne la fluidan fluon, la unua agas kiel puŝpumpilo, kaj la dua kiel suĉpumpilo. Kelkfoje necesas samtempa ambaŭefika agado; aliffoje nur unu sufiĉas. Ĉi tiu lasta kazo fariĝis en la ĉi-traktata cirkonstanco.

Jesuo do pravis dirante: “Via fido vin savis.” Oni komprenas, ke ĉi tie la fido ne estas ia mistika virto, kia ĝin rigardas certaj personoj, sed ja ia vera *altirforto*; kiu do ĝin ne posedas, tiu kontraŭstaras la fluidan fluon per ia repuŝa forto, aŭ almenaŭ per ia inercia forto, kiu paralizas la agadon. Tiel, oni komprenas, ke, el du malsanuloj, kiuj sin prezentas al resaniganto trafita de unu sama malsano, unu povas esti resanigita kaj la alia ne. Ĉi tiu estas unu el la plej gravaj principoj de la sanigiva mediumeco, kaj tiu principo klarigas, per tre natura kaŭzo, certajn ŝajnajn anomaliojn. (Ĉap. XIV, n-roj 31, 32 kaj 33.)

La blindulo el Betsaida

12. – Kaj ili alvenis al Betsaida. Kaj oni alkondukis al li blindulon, kaj petegis, ke li tuŝu lin. – Kaj preninte la manon de la blindulo, li elkondukis lin

ekster la vilaĝon; kaj kraĉinte sur liajn okulojn, kaj surmetinte la manojn sur lin, li demandis lin: ĉu vi vidas ion? – Kaj li ekrigardis, kaj diris: Mi vidas homojn, ĉar mi vidas kvazaŭ arbojn irantajn. – Tiam denove li metis la manojn sur liajn okulojn; kaj li fikse rigardis, kaj resaniĝis, kaj vidis ĉion klare. – Kaj li forsendis lin al lia domo, dirante: Nepre ne eniru en la vilaĝon. (Sankta Marko, ĉap. VIII, par. 22 ĝis 26.)

13. – Ĉi tie evidentas la magnetisma efiko; la resanigo estis ne subita sed laŭgrada kaj rezultinta el daŭra, ripetata ago, kvankam pli rapida ol ĉe la ordinara magnetizado. La unua sensaco de tiu homo estis ĝuste tiu, kiun spertas blinduloj, reakirante la vidpovon. Pro optika efiko, la objektoj aspektas al ili tro grandaj.

Paralizulo

14. – Kaj enirinte en ŝipeton, li transiris, kaj venis en sian propran urbon. – Kaj jen oni alportis al li paralizulon, kuŝantan sur lito; kaj Jesuo, vidinte ilian fidon, diris al la paralizulo: Kuraĝu, filo, viaj pekoj estas pardonitaj.

Kaj jen iuj el la skribistoj diris en si: ĉi tiu blasfemas. – Kaj Jesuo, eksciante iliajn pensojn, diris: Kial vi pensas malbonon en viaj koroj? – ĉar kio estas pli facila, diri: Viaj pekoj estas pardonitaj; aŭ diri: Leviĝu kaj piediru? – Sed por ke vi sciu, ke la Filo de homo havas aŭtoritaton sur la tero pardoni pekojn – tiam li diris al la paralizulo: Leviĝu, prenu vian liton, kaj iru al via domo.

Kaj li leviĝis, kaj iris al sia domo. – Kaj vidinte tion, la homamasoj timis, kaj gloris Dion, kiu donis tian aŭtoritaton al homoj. (Sankta Mateo, ĉap. IX, par. 1 ĝis 8.)

15. – Kion povus signifi tiuj vortoj: “Viaj pekoj estas pardonitaj”, kaj per kio ili povis kunhelpi por la resanigo? Spiritismo liveras pri ili la ŝlosilon, kiel ankaŭ pri sennombraj aliaj vortoj ĝis nun ne komprenataj. Per la plureco de la ekzistadoj, ĝi al ni instruas, ke la malbonoj kaj afliktoj de la vivo ofte estas pago de kulpoj el la pasinteco, kaj ke ni suferas

dum la nuna vivo la sekvojn de la eraroj, kiujn ni faris en antaŭa ekzistado: tiel estos ĝis ni pagos la ŝuldojn pro niaj neperfektaĵoj, ĉar ĉiuj ekzistadoj estas inter si solidaraj.

Se la malsano de tiu homo estis elpago de kulpo, kiun li iam faris, do diri al li: “Viaj pekoj estas pardonitaj” estis la samo, kiel diri: “Vi pagis vian ŝuldon; via nuna fido elviŝis la kaŭzon de via malsano; vi sekve meritas esti liberigita el via malsano”. Tial Jesuo diris al la skribistoj: “Tiel facile estas diri: Viaj pekoj estas pardonitaj, kiel: Leviĝu kaj piediru”. Se la kaŭzo ĉesis, la efiko ja devas ĉesi. Ĝi estas la sama okazo de malliberulo, al kiu oni dirus: “Via krimo estas pagita kaj pardonita”; tio samvalorus kiel diri al li: “Vi povas eliri el la malliberejo”.

La dek lepruloj

16. – Kaj dum ili vojiris al Jerusalemo, li trapasis tra la mezo de Samario kaj de Galileo. – Kaj kiam ili eniris en unu vilaĝon, renkontis lin dek lepruloj, kiuj staris malproksime; – kaj ili levis sian voĉon, dirante: Jesuo, estro, kompatu nin. – Kaj vidinte ilin, li diris al ili: Iru, kaj montru vin al la pastroj. Kaj dum ili iris, ili fariĝis puraj.

Kaj unu el ili, vidinte, ke li resaniĝis, revenis, glorigante Dion per laŭta voĉo, – kaj falis sur sian vizaĝon ĉe liaj piedoj kaj dankis lin; kaj li estis Samariano.

Kaj Jesuo responde diris: ĉu ne la dek estis purigitaj? sed kie estas la naŭ? – ĉu ne troviĝis revenantoj, por doni gloron al Dio, krom ĉi tiu fremdulo? – Kaj li diris al li: Leviĝu kaj iru; via fido vin savis. (Sankta Luko, ĉap. 17, par. 11 ĝis 19.)

17. – La samarianoj estis skismuloj, iel simile al protestantoj en rilato al katolikoj, kaj la judoj ilin malŝatis kiel herezulojn. Sendistinge resanigante samarianojn kaj judojn, Jesuo samtempe donis lecionon kaj ekzemplon de toleremo; kaj reliefigante, ke nur la samariano revenis por doni gloron al Dio, li montris, ke en li estas pli da vera fido kaj da vera danko

ol ĉe tiuj, kiuj sin prezentis kiel ortodoksuloj. Aldonante: “Via fido vin savis”, li vidigas, ke Dio rigardas la fundon de la koro, ne la eksteran formon de adorado. Sed ankaŭ la aliaj estis resanigitaj; necesis tio, por ke li povu doni la koncernan lecionon kaj evidentigi ilian nedankemon. Kiu tamen scias, kio al ili rezultis el tio? Kiu scias, ĉu ili estis bonfaritaj per la favoro, kiu estis donita al ili? Dirante al la samariano: “Via fido vin savis”, Jesuo komprenigas, ke ne same okazis al la aliaj.

Velkinta mano

18. – Kaj denove li eniris en la sinagogon, kaj tie estis viro, havanta manon velkintan. – Kaj oni observis lin, ĉu en la sabato li lin sanigos, por ke ili povu lin akuzi. – Kaj li diris al la viro, kiu havis la velkintan manon: Stariĝu en la mezo. – Kaj li diris al ili: ĉu estas permesate bonfari en sabato, aŭ malbonfari? savi vivon, aŭ mortigi? Sed ili silentis. – Kaj kiam kun kolero li ĉirkaŭrigardis ilin, ĉagrenite pro la obstiniĝo de ilia koro, li diris al la viro: Etendu vian manon. Kaj li etendis ĝin, kaj lia mano resaniĝis.

Kaj la Fariseoj eliris, kaj tuj konsiliĝis kun la Herodanoj kontraŭ li, kiamaniere lin pereigi. – Kaj Jesuo kun siaj disĉiploj foriris ĝis la maro; kaj granda homamaso el Galileo sekvis lin. Kaj el Judujo – kaj el Jerusalemo kaj el Edom kaj el Transjordanio kaj el ĉirkaŭ Tiro kaj Sidon, grandnombra homamaso, aŭdinte ĉion, kion li faris, venis al li. (Sankta Marko, ĉap. III, par. 1 ĝis 8.)

La kurbiginta virino

19. – Kaj li instruadis en unu el la sinagogoj en la sabato. – Kaj jen virino, kiu dum dek ok jaroj havis spiriton de malforteco; kaj ŝi estis kunkurbita kaj neniel povis leviĝi. – Kaj vidinte ŝin, Jesuo vokis ŝin, kaj diris: Virino, vi estas liberigita el via malforteco. – Kaj li metis sur ŝin la manojn, kaj ŝi tuj rektiĝis kaj gloris Dion.

Kaj la sinagogestro, indignante, ke Jesuo resanigis en la sabato, respondis kaj diris al la homamaso: Ekzistas ses tagoj, en kiuj oni devas labori; en ili do venu, por esti resanigitaj, kaj ne en la sabata tago.

Sed la Sinjoro respondis al li kaj diris: Ho hipokrituloj! ĉu ne ĉiu el vi en la sabato malligas sian bovon aŭ sian azenon el la stalo, kaj forkondukas

ĝin, por trinkigi? – Kaj ĉu ne devis ĉi tiu virino, estante filino de Abraham, ligite de Satano jen dek ok jarojn, esti malligita el ĉi tiu kateno en la sabata tago?

Kaj kiam li tion diris, ĉiuj liaj kontraŭuloj hontiĝis; kaj la tuta homamaso ĝojis pro ĉiuj gloraj agoj, faritaj de li. (Sankta Luko, ĉap. XIII, par. 10 ĝis 17.)

20. – Ĉi tiu fakto pruvas, ke en tiu epoko la plejparto el la malsanoj estis atribuata al la demono, kaj ke oni konfuzis, kiel nuntempe, la poseditojn kun la malsanuloj, sed en inversa senco, tio estas, kiuj hodiaŭ ne kredas je malbonaj Spiritoj, tiuj konfuzas la obsedojn kun la patologiaj statoj.

La paralizulo de la laĝeto

21. – Post tio estis festo de la Judoj, kaj Jesuo supreniris al Jerusalema. – En Jerusalema apud la Pordego de Ŝafoj estas laĝeto¹, nomata en la Hebrea lingvo Betesda, havanta kvin portikojn. – En tiuj kuŝis amaso da malsanuloj, blinduloj, lamuloj, velkintoj, kiuj atendis la ekmovon de la akvo; – ĉar anĝelo de la Eternulo malsupreniris iafaje en la laĝeton kaj movis la akvon; kiu ajn do unua post la movado de la akvo enpaŝis, tiu resaniĝis, tute egale, de kia malsano li suferis.

Kaj tie estis unu viro, kiu estis tridek ok jarojn en sia malforteco. – Kiam Jesuo vidis lin kuŝantan, kaj sciis, ke li jam de longe malsanas, li diris al li: ĉu vi volas fariĝi sana? – La malsanulo respondis: Sinjoro, mi ne havas iun por enjeti min en la laĝeton, kiam la akvo moviĝis; sed dum mi venas, alia paŝas malsupren antaŭ mi; – Jesuo diris al li: Leviĝu, prenu vian liton, kaj iru. – Kaj la viro tuj fariĝis sana, kaj prenis sian liton, kaj iris. Kaj estis la sabato en tiu tago.

La Judoj do diris al la resanigito: Estas la sabato, kaj al vi ne konvenas porti vian liton. – Li respondis: Tiu, kiu min sanigis, diris al mi: Prenu vian liton, kaj iru. – Ili demandis lin: Kiu estas tiu homo, kiu diris al vi: Prenu kaj iru? – Sed la resanigito ne sciis, kiu tiu estas; ĉar Jesuo jam formoviĝis pro la tiea homamaso.

¹ *Piscine* en la franclingva teksto de la Evangelio, kaj *Piscina* en la portugallingva. – *Noto de la trad.*

Poste Jesuo trovis lin en la templo, kaj diris al li: Jen vi fariĝis sana; ne plu peku, por ke io pli malbona ne okazu al vi.

La viro foriris, kaj diris al la Judoj, ke Jesuo estas tiu, kiu lin sanigis. – Kaj la Judoj persekutis Jesuon pro tio, ke li tion faris en sabato. – Sed Jesuo respondis al ili: Mia Patro ĝis nun laboras, kaj mi laboras. (Sankta Johano, ĉap. V, par. 1 ĝis 17.)

22. – “Piscine”¹ [= fiŝujo] (el la latina vorto *piscis*, fiŝo), estis nomataj la rezervujoj aŭ tenejoj, en kiuj oni bredis fiŝojn. Poste la signifo de tiu vorto etendiĝis al la akvujoj destinitaj por komunaj banoj.

La lageto de Betesda, en Jerusalemo, estis ia baseno apud la Templo, nutrata de natura fonto, kies akvo verŝajne havis kuracajn proprecojn. Temis sendube pri intermita fonto, kiu, de tempo al tempo, forte ekŝprucis kaj agitis la akvon. Laŭ la vulgara kredo, tiu momento estis la plej favora por la resanigoj. Povas esti, efektive, ke, en la momento de la ŝpruco, la proprecoj de la akvo estis pli aktivaj, aŭ ke la agitiĝo estigita de la ŝprucanta akvo eklevis la ŝlimon sanige efikan kontraŭ certaj malsanoj. Tiuj efikoj estas tre naturaj kaj perfekte konataj nuntempe; sed tiam la sciencoj estis malmulte progresintaj, kaj al la plimulto el la nekomprenataj fenomenoj oni atribudis ian supernaturan kaŭzon. La judoj do atribudis la agitiĝon de la akvo al la ĉeesto de anĝelo, kaj des pli prava tiu kredo montriĝis al ili, ĉar en tiu momento la akvo fariĝis pli saniga.

Resaniginte tiun homon, Jesuo diris al li: “Ne plu peku, por ke io pli malbona ne okazu al vi”. Per tiuj vortoj, li komprenigis, ke lia malsano estis ia puno, kaj ke, se li ne pliboniĝos, li povos denove, kaj ankoraŭ pli rigore, esti punata. Tiu doktrino perfekte akordas kun tiu instruata de Spiritismo.

¹ Vidu antaŭan noton. – *Noto de la trad.*

23. – Ŝajnis, ke Jesuo nepre volis resanigi en la sabato, celante ian oportunon por protesti kontraŭ la rigoreco de la fariseoj koncerne la observon de tiu tago. Li volis montri al ili, ke la vera pieco ne konsistas en la plenumado de eksteraj agoj kaj de formalajtoj; sed ke ĝi ja kuŝas en la sentoj de la koro. Li pravigis sin, dirante: “Mia Patro ĝis nun laboras, kaj mi laboras”; tio estas, Dio ne interrompas siajn verkojn, nek sian agadon super la aferoj de la Naturo en la sabato. Li ne ĉesas estiĝi tion, kio necesas al via nutrado kaj al via sano, kaj mi sekvas lian ekzemplon.

Denaska blindulo

24. – Kaj preterirante, li vidis viron blindan de post la naskiĝo. – Kaj liaj disĉiploj demandis lin, dirante: Rabeno, kiu do pekis, ĉi tiu viro, aŭ liaj gepatroj, ke li naskiĝis blinda?

Jesuo respondis: Nek ĉi tiu viro pekis, nek liaj gepatroj; sed por ke la faroj de Dio aperu en li. – Dum estas tago, mi devas prilabori la farojn de Tiu, kiu min sendis; venas la nokto, kiam neniu povas labori. – Dum mi estas en la mondo, mi estas la lumo de la mondo.

Dirinte tion, li kraĉis sur la teron, kaj faris el la kraĉaĵo koton, kaj ŝmiris per la koto la okulojn de la blindulo, – kaj diris al li: Iru, lavu vin en la lageto de Ŝiloaĥ (tio estas, Sendito). Li do foriris, kaj sin lavis, kaj revenis vidanta.

La najbaroj do, kaj tiuj, kiuj antaŭe vidis lin, ke li estas almuzulo, diris: ĉu ĉi tiu ne estas tiu, kiu sidis kaj petis almozojn? – Unuj diris: Li estas; aliaj diris: Ne, sed li estas simila al tiu. Li diris: Tiu mi estas. – Ili do diris al li: Kiamaniere viaj okuloj malfermiĝis? – Li respondis kaj diris: La homo, nomata Jesuo, faris koton kaj ŝmiris miajn okulojn, kaj diris al mi: Iru al Ŝiloaĥ, kaj vin lavu; kaj mi iris, kaj lavis min, kaj mi ricevis vidpovon. – Tiam ili diris al li: Kie li estas? Li diris: Mi ne scias.

Ili kondukis al la Fariseoj la iam blindan viron. – Sed estis sabato la tago, en kiu Jesuo faris la koton kaj malfermis liajn okulojn.

La Fariseoj do denove demandis lin, kiamaniere li ricevis vidpovon. Kaj li diris al ili: Li metis koton sur miajn okulojn, kaj mi lavis min, kaj mi vidas. – Unuj do el la Fariseoj diris: ĉi tiu homo ne estas de Dio, ĉar li ne

observas la sabaton. Aliaj diris: Kiel povas homo pekulo fari tiajn signojn? Kaj malkonsento estis inter ili.

Denove ili diris al la blindulo: Kion vi diras pri li rilate tion, ke li malfermis viajn okulojn? Li diris: Li estas profeto. – La Judoj ne kredis pri li, ke li estis antaŭe blinda, kaj ke li ricevis vidpovon, ĝis ili alvokis la gepatrojn de tiu, kiu ricevis vidpovon, kaj demandis ilin, – dirante: ĉu ĉi tiu estas via filo, kiu, vi diras, naskiĝis blinda? kiel do li nun vidas? – Liaj gepatroj respondis kaj diris: Ni scias, ke ĉi tiu estas nia filo, kaj ke li naskiĝis blinda; – sed kiel li nun vidas, ni ne scias; kaj kiu malfermis liajn okulojn, ni ne scias; demandu lin, li havas plenaĝon; li pri si mem parolos.

Tion diris la gepatroj, ĉar ili timis la Judojn; ĉar la Judoj jam interkonsentis, ke se iu konfesos, ke li estas la Kristo, tiu estu forigita el la sinagogo. – Tial la gepatroj diris: Li havas plenaĝon, demandu lin.

Ili do denove alvokis la viron, kiu estis blinda, kaj diris al li: Donu gloron al Dio; ni certe scias, ke tiu homo estas pekulo. – Li do respondis: ĉu li estas pekulo, mi ne scias; unu aferon mi scias, ke mi estis blinda kaj nun vidas. – Tiam ili diris al li denove: Kion li faris al vi? – kiamaniere li malfermis viajn okulojn? – Li respondis al ili: Mi ĵus diris al vi, kaj vi ne atentis; kial vi volas denove ĝin aŭdi? Ĉu vi ankaŭ volas fariĝi liaj disĉiploj? – Tiam ili insultis lin, kaj diris: Vi estas lia disĉiplo, sed ni estas disĉiploj de Moseo. – Ni scias, ke Dio parolis al Moseo; sed pri ĉi tiu, ni ne scias, de kie li estas.

La viro respondis kaj diris al ili: Jen la mirindaĵo, ke vi ne scias, de kie li estas, kaj tamen li malfermis miajn okulojn. – Ni scias, ke Dio ne atentis pekulojn; sed se iu estas adoranto de Dio kaj plenumas Lian volon, tiun Li atentis. – De la komenco de la mondo oni neniam aŭdis, ke iu malfermis la okulojn de homo, kiu naskiĝis blinda. – Se ĉi tiu homo ne estus de Dio, li nenion povus fari.

Ili respondis kaj diris al li: Vi tute naskiĝis en pekoj, kaj ĉu vi nin instruas? Kaj ili forpelis lin eksteren. (Sankta Johano, ĉap. IX, par. 1 ĝis 34.)

25. – Ĉi tiu rakonto, tiel simpla kaj tiel naiva, portas en si evidentan karakteron de vereco. En ĝi estas nenio fantazia, nek mirakleca. Temas pri ia freŝe kaptita sceno de la reala vivo. La parolo de la blindulo estas ĝuste tia sama kiel la parolo de tiuj simplaj homoj, ĉe kiuj la komuna saĝo kompensas la mankon de klereco, kaj kiuj refutas la argumentojn de siaj kontraŭuloj kun korsimpleco, prezentante klarigojn, al kiuj mankas nek pravenco, nek oportuneco. Ĉu la tono de la fariseoj

ne samas kiel tiu de la orgojlaj homoj, kiuj akceptas nenion superan al sia inteligento kaj kiuj indignas ĉe la sola penso, ke plebano povus al ili fari rimarkojn? Escepte de la loka koloro de l' nomoj, oni kredus la fakton nuntempa.

Esti forigita el la sinagogo egalas forpelon el la eklezio, ian ekskomunikon. La spiritistoj, kies doktrino estas sama kiel tiu de la Kristo, interpretata laŭ la nuna progreso de la lumoj, estas same traktataj kiel la Judoj, kiuj en Jesuo rekonis la Mesion. Per ekskomuniko, la Eklezio forigas ilin el sia sino, same kiel la skribistoj kaj fariseoj faris kun la sekvantoj de Jesuo. Kaj jen tiel homo estas forpelita, ĉar li ne povas kredi, ke tiu, kiu lin resanigis, estas demonhavanto, kaj ĉar li gloras Dion pro sia resaniĝo!

Ĉu ne same oni faras kun la spiritistoj? Kion ili atingas, nome saĝajn konsilojn de la Spiritoj, revenon al Dio kaj al la bono, resanigojn, ĉio tio estas verko de la diablo, kaj sur ilin oni ĵetas anatemon. Ĉu oni ne vidis pastrojn deklari, de sur la predikseĝo, ke *preferindas resti senkreda, ol reakiri la fidon per Spiritismo?* Kaj unujn diri al malsanuloj, ke ili ne devis serĉi kuracadon ĉe la spiritistoj posedantaj tiun doton, ĉar ĝi estas doto satana? Kaj aliajn prediki, ke la senhavuloj devas ne akcepti la panon disdonatan de la spiritistoj, ĉar tiu pano venas de la diablo? Kion alian diradis kaj faradis la judaj pastroj kaj la fariseoj? Cetere, estas dirite, ke nun devas same okazi kiel en la tempo de la Kristo.

Tiu demando de la disĉiploj: ĉu ĉi tiu viro pekis, ke li *naskiĝis* blinda? indikas la intuicion pri iu antaŭa ekzistado; se ne tiel, al ĝi mankus senco, ĉar peko, kiu kaŭzus *denaskan* malsanon, nepre estus farita antaŭ la naskiĝo, sekve en antaŭa ekzistado. Se Jesuo en tio vidus falsan ideon, li dirus al ili: "Kiel tiu homo povus peki antaŭ ol esti naskita?" Sed, anstataŭ tio, li asertas, ke tiu homo estas blinda ne pro tio, ke li pekis,

sed por tio, ke en li manifestiĝu la povo de Dio, tio estas, ke li servu kiel instrumento por manifestiĝo de la povo de Dio. Se ĝi ne estis kulpelpago el la pasinteco, ĝi estis provo taŭga por lia progreso, ĉar Dio, kiu estas justa, ne trudus al li senkompensan suferadon.

Koncerne la rimedon uzitan por lia resanigo, estas evidente, ke tiu speco de koto, farita el salivo kaj tero, povus havi nenian potencon, krom pro la agado de la resaniga fluido, per kiu ĝi estis saturita. Ja tiel la plej sensignifaj substancoj, kiel ekzemple la akvo, povas akiri potencajn kaj efektivajn kvalitojn sub la agado de la spirita aŭ magneta fluido, al kiu ili servas kiel *perilo*, aŭ, se oni preferas, kiel *rezervujo*.

Multenombraj resanigoj faritaj de Jesuo

26. – Kaj Jesuo trairis tra la tuta Galileo, instruante en iliaj sinagogoj, kaj predikante la evangelion de la regno, kaj kuracante ĉian malsanon kaj ĉian malfortajon inter la popolo. – Kaj lia famo disvastiĝis en la tuta Sirio; kaj oni alkondukis al li ĉiujn malsanulojn, malfortigitajn de diversaj malsanoj kaj turmentoj, demonhavantojn, epilepsulojn, kaj paralizulojn, kaj li resanigis ilin. – Kaj grandaj homamasoj lin sekvis el Galileo kaj Dekapolis kaj Jerusalemo kaj Judujo kaj el trans Jordan. (Sankta Mateo, ĉap. IV, par. 23, 24, 25.)

27. – El ĉiuj faktoj atestantaj la povon de Jesuo, ne kontesteble la plejmultaj estas la resanigoj. Li per tio volis pruvi, ke la vera povo apartenas al tiu, kiu faras la bonon; ke lia celo estas fariĝi utila, kaj neniel kontentigi la scivolon de la indiferentuloj pere de mirindaĵoj.

Mildigante la suferojn, li ligis al si la personojn per la koro kaj varbis pli multenombrajn kaj pli sincerajn prozelitojn, ol se li ilin nur impresus per okulfrapantaj spektakloj. Tiamaniere li fariĝis amata, dum se li sin limigus estigi mirigajn, materialajn efikojn, laŭ la volo de la fariseoj, la plimultaj

personoj rigardus lin kiel nuran sorĉiston, lertan ĵongliston, kiun *senokupuloj irus spekti por sin amuzi*.

Pro tio, kiam Johano Baptisto sendas al li siajn disĉiplojn, por demandi, ĉu li estas la Kristo, li ne diras: “Mi estas”, kiel ja povus respondi ĉia trompisto. Li ne parolas al ili pri miregindaĵoj, nek pri miraklecaj faroj, sed li simple respondas al ili: “Iru kaj sciigu al Johano tion: blinduloj ricevas vidpovon, malsanuloj resaniĝas, surduloj aŭdas, al malriĉuloj evangelio estas predikata.” Ĝi estis la samo, kiel diri: “Rekonu min laŭ miaj faroj; juĝu arbon laŭ ties frukto”, ĉar tio estis la vera karaktero de lia dia misio.

28. – Same per la bono, kiun ĝi faras, Spiritismo pruvas sian providencan mision. Ĝi kuracas fizikajn malsanojn, sed ĝi precipe kuracas la malsanojn moralajn, kaj ja el ĉi tio konsistas la plej grandaj mirindaĵoj, per kiuj ĝi imponas. Ĝiaj plej sinceraj adeptoj ne estas tiuj, tuŝitaj nur de la vido je eksterordinaraj fenomenoj, sed ja tiuj, kies korojn tuŝis konsolado; kiujn ĝi liberigis el la turmentoj de la dubo; kies kuraĝon ĝi relevis en la afliktoj; kiuj ĉerpis forton en la certeco, kiun ĝi al ili portis, pri la estonteco, per la konado de ilia spirita esteco kaj de ilia destino. Ja tiuj portas la neskieblan fidon, ĉar ili sentas kaj komprenas.

Kiuj en Spiritismo nur vidas materialajn efikojn, tiuj ne povas kompreni ĝian moralan forton. Tiel same, la nekredantoj, kiuj ĝin konas nur laŭ fenomenoj, kies primaran kaŭzon ili ne agnoskas, rigardas la spiritistojn ne alie, ol kiel nurajn ĵonglistojn kaj ĉarlatanojn. Ne do per miregindaĵoj Spiritismo triumfos super nekredemo, sed ja per multobligo de siaj moralaj bonfaroj, ĉar se la nekredemuloj ne konsentas la miregindaĵojn, ili tamen, kiel ĉiuj aliaj homoj, konas la suferon

kaj la afliktojn, kaj neniu ekzistas, kiu rifuzus mildigon kaj konsolon.

Poseditoj

29. – Kaj ili iris en Kapernaumon, kaj tuj en la sabato li eniris en la sinagogon kaj instruis. – Kaj oni miris pro lia instruado; ĉar li instruis kiel havanta aŭtoritaton, kaj ne kiel la skribistoj.

Kaj en ilia sinagogo estis viro kun malpura spirito; kaj li ekkriis, – dirante: Kio estas inter vi kaj ni, Jesuo Nazaretano? Ĉu vi venis, por pereigi nin? mi scias, kiu vi estas: la Sanktulo de Dio. – Kaj Jesuo severe admonis lin, dirante: Silentu, kaj eliru el li. – Kaj la malpura spirito konvulsiigis lin, kaj laŭte kriinte, eliris el li.

Kaj ĉiuj miregis tiom, ke ili diskutis inter si, dirante: Kio estas ĉi tio? jen nova instruado! kun aŭtoritato li ordonas eĉ al la malpuraj spiritoj, kaj ili obeas lin. (Sankta Marko, ĉap. I, par. 21 ĝis 27.)

30. – Kaj dum ili eliris, jen oni alportis al li mutan demonhavanton. – Kaj kiam la demono estis elpelita, la mutulo parolis; kaj la homamasoj miris, dirante: Neniam tia afero estas vidita en Izrael.

Sed la Fariseoj diris: Per la estro de la demonoj li elpelas demonojn. (Sankta Mateo, ĉap. IX, par. 32, 33, 34.)

31. – Kaj veninte al la disĉiploj, li vidis grandan homamason ĉirkaŭ ili, kaj skribistojn diskutantajn kun ili. – Kaj tuj la homamaso, vidante lin, forte miris, kaj alkuris, kaj salutis lin.

Kaj li demandis ilin: Pri kio vi diskutas kun ili? – Kaj unu el la amaso respondis al li: Majstro, mi venigis al vi mian filon, kiu havas mutan spiriton; – kaj kie ajn ĝi kaptas lin, ĝi ŝiras lin, kaj li ŝaŭmas kaj grincigas la dentojn kaj kadukiĝas; kaj mi parolis al viaj disĉiploj, ke ili elpelu ĝin; kaj ili ne povis.

Kaj li respondis al ili, dirante: Ho senfida generacio, ĝis kiam mi estos kun vi? ĝis kiam mi toleros vin? venigu lin al mi. – Kaj ili venigis lin al li; kaj vidinte lin, tuj la spirito konvulsiigis lin, kaj li falis teren kaj ruliĝis ŝaŭmanta.

Kaj li demandis la patron: De kiom da tempo okazadas ĉi tio al li? Kaj li diris: De infaneco. – Kaj ofte ĝi ĵetis lin en fajron kaj en akvon, por pereigi lin; sed se vi povas fari ion, kompatu al ni kaj helpu nin.

Kaj Jesuo diris al li: Kiel, se vi povas! ĉio estas ebla por kredanto. – Tuj ekkriante, la patro de la infano diris: Mi kredas; helpu mian nekredemon.

Kaj kiam Jesuo vidis, ke homamaso alkuras, li severe admonis la spiriton, dirante al ĝi: Vi muta kaj surda spirito, mi ordonas al vi: Eliru el li, kaj

ne plu eniru en lin. – Kaj ekkriinte, kaj multe konvulsiiginte lin, ĝi eliris; kaj li fariĝis kvazaŭ mortinto, tiel ke la plimulto diris: Li mortis. – Sed Jesuo, preninte lin je la mano, levis lin; kaj li stariĝis.

Kaj kiam li eniris en la domon, liaj disĉiploj aparte demandis lin: Kial ni ne povis elpeli ĝin? – Kaj li diris al ili: ĉi tiu speco neniel povas eliri, krom per preĝado. (Sankta Marko, ĉap. IX, par. 14 ĝis 29.)

32. – Tiam oni kondukis al li demonhavanton, blindan kaj mutan; kaj li sanigis lin, tiel ke la mutulo parolis kaj vidis. – Kaj miris ĉiuj homamasoj, kaj diris: ĉu ĉi tiu estas la filo de David?

Sed la Fariseoj, aŭdinte, diris: ĉi tiu ne elpelas demonojn krom per Baal-Zebub, estro de la demonoj.

Kaj sciante iliajn pensojn, li diris al ili: ĉiu regno dividita kontraŭ si dezertiĝas, kaj ĉiu urbo aŭ domo dividita kontraŭ si ne starados; – kaj se Satano elpelas Satanon, li estas dividita kontraŭ si; kiel do staros lia regno? – Kaj se mi per Baal-Zebub elpelas demonojn, per kiu viaj filoj elpelas ilin? tial ili estos viaj juĝantoj. – Sed se mi per la Spirito de Dio elpelas demonojn, tiam la regno de Dio estas veninta sur vin. (Sankta Mateo, ĉap. XII, par. 22 ĝis 28.)

33. – La liberigoj de poseditoj troviĝas, kune kun la resanigoj, inter la plej multenombraj faroj de Jesuo. El inter tiaspecaj faktoj, estas unuj, kiel la ĉi-supre rakontita sub n-ro 30, ĉe kiu la posedo ne estas evidenta. Verŝajne, en tiu epoko, same kiel ankoraŭ nuntempe, oni atribuis al la demona influo ĉiujn malsanojn, kies kaŭzo estis nekonata, ĉefe muteco, epilepsio kaj katalepsio. Sed estas aliaj, ĉe kiuj neniel duba montriĝas la agado de la malicaj Spiritoj; ili havas tiel frapan-tan analogecon kun tiuj, pri kiuj ni estas atestantoj, ke en ili oni rekonas ĉiujn simptomojn de tiuspeca afekcio. Tiukaze, la pruvo de la partopreno de kaŝita inteligento elfluas el materia-la fakto: la multenombraj radikalaj resanigoj en kelkaj spiritis-maj centroj estas ricevataj per la sola elvoko kaj moraligo de la obsedantaj Spiritoj, sen magnetizado nek medikamentoj, kaj ofte en la foresto kaj malproksimeco de la paciento. La senmezura supereco de la Kristo havigis al li tielan aŭtoritaton super la neperfektaj Spiritoj, tiam nomataj demonoj, ke al li

sufiĉis ordoni ilian foriĝon, por ke ili ne povu ĝin kontraŭstari. (Ĉap. XIV, n-ro 46.)

34. – Kontraŭas ĉian probablecon la fakto, ke iuj malicaj Spiritoj estis forsenditaj en korpojn de porkoj. Cetere, malfacile klarigeblas la ekzisto de tiel multenombra grego da porkoj en lando, kie tiu besto vekis abomenegon kaj estis neniel utila por manĝado. Malica Spirito ĉiam ankoraŭ estas homa Spirito, kvankam tiel neperfekta, ke li postmorte daŭre faras malbonon, kiel li antaŭe ĝin faris, kaj estas kontraŭ la leĝoj de la Naturo, ke li povus animi la korpon de besto. Necesas do vidi en tio unu el tiuj trograndigoj tiel oftaj en la tempoj de nesciado kaj superstiĉo, aŭ eble ian alegorion por karakterizi la malpurajn inklinojn de certaj Spiritoj.

35. – Ŝajnas, ke en la tempo de Jesuo tre multenombraj estis, en Judujo, obsedatoj kaj poseditoj, kio al li donis la okazon resanigi multajn personojn. La malicaj Spiritoj sendube invadis tiun landon kaj kaŭzis epidemion de posedoj. (Ĉap. XIV, n-ro 49.)

Ne prezentante epidemian karakteron, la individuaj obsedoj estas tre oftaj kaj montriĝas sub tre diversaj aspektoj, kiujn oni facile rekonas per pli funda konado de Spiritismo. Ili ofte povas rezultigi malutilajn sekvojn por la sano, ĉu gravigante jam ekzistantajn organajn afekciojn, ĉu ilin estigante. Ili iam nekontesteble estos alkalkulitaj al la patologiaj kaŭzoj postulantaj, pro sia aparta naturo, specialajn kuracrimedojn. Malkaŝante la kaŭzon de la malbono, Spiritismo malfermas novan vojon al la kuracarto kaj liveras al la Scienco rimedon por atingi sukceson tie, kie ĝis nun la Scienco ĉiam fiaskas nur tial, ke ĝi ne atakas la ĉefan kaŭzon de la malbono. (*La Libro de la Mediumoj*, ĉap. XXIII.)

36. – La Fariseoj akuzadis Jesuon, ke li elpelas demonojn per la demonoj; laŭ ili, la bono, kiun li faris, estis verko de Satano; ili ne pripensis, ke Satano, sin mem elpelante, agas tre malsaĝe. Rimarkindas, ke la tiamaj Fariseoj jam pretendis, ke ĉia kapablo transcenda, kaj pro tio rigardata kiel supernatura, estas verko de la demono, ĉar, laŭ ilia opinio, ja de la demono Jesuo ricevis sian povon. Ĉi tio prezentas plian elementon de simileco kun la nuna epoko, kaj tian doktrinon la Eklezio provas superforti kontraŭ la spiritismaj manifestiĝoj.¹

Reviviĝoj

La filino de Jairo

37. – Kaj kiam Jesuo retransiris en la ŝipeto al la alia bordo, granda homamaso kolektiĝis al li; kaj li estis apud la maro. – Kaj venis unu el la sinagogestroj, nomata Jairo, kaj ekvidinte lin, falis antaŭ liaj piedoj, – kaj insiste lin petegis, dirante: Mia filineto estas en lasta ekstremo; venu do kaj metu viajn manojn sur ŝin, por ke ŝi saviĝu kaj vivu.

Kaj li iris kun li, kaj granda homamaso sekvis lin kaj premis lin.

¹ Ne ĉiuj teologoj konsentas tiel absolutajn opiniojn pri la demona doktrino. Jen unu, de iu ekleziulo, kies valoron la pastraro ne povas kontesti. La sekvanta teksto troviĝas en la *Konferencoj pri la religio*, de Monsinjoro Freyssinous, episkopo de Hermopolis, 2-a volumo, p. 341 (Parizo, 1825):

“Se Jesuo faris siajn miraklojn per la povo de la demono, ĉi tiu do estus klopodinta por la detruo de sia regno kaj uzinta sian povon kontraŭ sin mem. Efektive, *iu demono, kiu penus detruai la regnon de la malvirto por fondi tiun de la virto, ja estus ia stranga demono. Jen kial Jesuo, por rebati la absurdan akuzon de la Judoj, diris al ili: “Se mi estigas miregindaĵojn en la nomo de la demono, la demono estas dividita en si mem kaj sekve klopodas por sin mem detruai!”*, respondo ja permesanta nenian replikon.

Ĝuste ĉi tiun argumenton la spiritistoj kontraŭmetas al tiuj, kiuj atribuas al la demono la bonajn konsilojn, al ili donitajn de la Spiritoj. La demono agus kiel profesia rabisto, kiu redonus ĉion, kion li rabis kaj klopodus, por ke la ceteraj rabistoj fariĝu honestaj personoj.

Dum li (Jairo) ankoraŭ parolis, oni venis el la domo de la sinagogestro, dirante: Via filino mortis; kial vi ankoraŭ ĝenas la instruiston? – Sed Jesuo, ne atentante la parolon diritan, diris al la sinagogestro: Ne timu, nur kredu. – Kaj li ne permesis al iu sekvi kun li, krom Petro kaj Jakobo, kaj Johano, frato de Jakobo.

Kaj ili venis al la domo de la sinagogestro, kaj li vidis tumulton, kaj homojn plorantajn kaj funebre ĝemantajn. – Kaj enirinte, li diris al ili: Kial vi tumultas kaj ploras? la infanino ne mortis, sed dormas. – Kaj ili mokridis lin. Tamen, foriginte ĉiujn, li kondukis la patron de la infanino kaj la patrinon, kaj tiujn, kiuj estis kun li, kaj eniris tien, kie estis la infanino. – Kaj preninte la manon de la infanino, li diris al ŝi: Talita kumi; tio estas: Knabineto, mi diras al vi: Leviĝu. – Kaj tuj leviĝis la knabineto kaj piediris; kaj ŝi estis dekdujara. Kaj ili miris kun granda mirego. – Kaj li severe admonis ilin, ke neniu sciigu pri tio; kaj li ordonis doni al ŝi manĝi. (Sankta Marko, ĉap. V, par. 21 ĝis 24, kaj 35 ĝis 43.)

La filo de la vidvino el Nain

38. – Kaj post nelonge li iris al urbo nomata Nain, kaj akompanis lin liaj disĉiploj kaj granda homamaso. – Kaj kiam li alproksimiĝis al la pordego de la urbo, jen oni elportis mortinton, la solan filon de lia patrino, kaj ŝi estis vidvino; kaj granda homamaso el la urbo estis kun ŝi. – Kaj kiam la Sinjoro ŝin vidis, li kortuŝiĝis pri ŝi, kaj diris al ŝi: Ne ploru. – Kaj li alproksimiĝis, kaj tuŝis la portilon, kaj la portantoj haltis. Kaj li diris: Junulo, mi diras al vi: Leviĝu. – Kaj la mortinto side leviĝis kaj komencis paroli. Kaj li donis lin al lia patrino.

Kaj timo kaptis ĉiujn; kaj ili gloris Dion, dirante: Granda profeto leviĝis inter ni; kaj: Dio vizitis Stan popolon. – Kaj ĉi tiu famo pri li eliris tra la tuta Judujo, kaj tra la tuta ĉirkaŭaĵo. (Sankta Luko, ĉap. VII, par. 11 ĝis 17.)

39. – La reveno de efektive mortinta individuo en la korpan vivon estus kontraŭa al la leĝoj de la Naturo kaj sekve ja mirakla. Nu, ne necesas sin helpi per tia ordo de faktoj, por klarigi la reviviĝojn, kiujn Jesuo okazigis.

Se inter ni la ŝajnoj iafoje trompas eĉ profesiulojn, tiaspecaj akcidentoj certe estis pli oftaj en lando, kie oni faris nenian antaŭgardon kontraŭ ili kaj kie tujaj estis la

entombigoj.¹ Estas do tute probable, ke ĉe la du ĉi-supraj ekzemploj, nur okazis sinkopo aŭ letargio. Jesuo mem asertas, koncerne la filinon de Jairo: *La infanino*, li diras, *ne mortis, sed dormas*.

Se oni konsideras la fluidecan povon de Jesuo, neniom miregiga estas tio, ke tiu viviga fluido, direktata de forta volo, revigligis la torporigitajn sensojn; ke ĝi eĉ revenigis en la korpon la Spiriton, ĝin baldaŭ forlasontan, ĉar la perispirita ligilo ankoraŭ ne definitive rompiĝis. Por la tiamaj homoj, kiuj rigardis mortinta individuon, kies spiro ĉesis, tiaj okazoj prezentis reviviĝon, kion ili tre bonafide asertis; sed efektive okazis *resaniĝo*, ne reviviĝo laŭ la ĝusta senco de ĉi tiu vorto.

40. – La reviviĝo de Lazaro, kion ajn oni dirus, neniel malkonfirmas ĉi tiun principon. Li jam restis, laŭdire, kvar tagojn en la tombo; sed oni scias, ke estas letargioj, kiuj daŭras ok tagojn, eĉ pli. Oni aldonas, ke jam odoris malbone, kio estas signo de malkomponiĝo. Ankaŭ ĉi tiu argumento nenion pruvas, ĉar ĉe certaj individuoj okazas parta malkomponiĝo, eĉ antaŭ la morto, kunodoro de putrado. La morto efektiviĝas nur tiam, kiam estas atingitaj la organoj nepre necesaj al la vivo.

Kaj kiu povus scii, ĉu Lazaro jam malbonodoras? Tion diris lia fratino Maria, sed kiel ŝi tion eksciis? Ĉar, laŭ ŝia

¹ Pruvo de tiu kutimo troviĝas en “*La Agoj de la Apostoloj*”, Ĉap. V, par. 5 kaj sekvantaj:

“Kaj aŭdante ĉi tiujn vortojn, Ananias falis kaj senspiriĝis; kaj granda timo venis sur ĉiujn aŭdantojn. Kaj la junuloj leviĝis, kaj lin ĉirkaŭvindicis, kaj forportis kaj enterigis. Kaj post paso de ĉirkaŭ tri horoj eniris lia edzino, ne sciante, kio okazis. Kaj Petro ŝin demandis... ktp. Kaj ŝi tuj falis apud liaj piedoj kaj senspiriĝis; kaj la junuloj eniris, kaj trovis ŝin mortinta, kaj ŝin forportis kaj enterigis apud ŝia edzo.”

supozo, Lazaro estis enterigita de post kvar tagoj; sed pri tio ŝi povus havi nenian certecon. (Ĉap. XIV, n-ro 29.)¹

Jesuo iras sur la akvo

41. – Kaj tuj li devigis la disĉiplojn eniri en la ŝipeton kaj iri antaŭ li al la alia bordo, ĝis li forsendos la homamason. – Kaj forsendinte la homamason, li supreniris sur la monton sola, por preĝi; kaj kiam vesperiĝis, li estis tie sola.

Sed la ŝipeto jam estis meze de la maro, turmentata de la ondoj; ĉar la vento estis kontraŭa. – Kaj en la kvara gardoparto de la nokto li venis al ili, irante sur la maro.² – Sed la disĉiploj, vidante lin iranta sur la maro, maltrankviliĝis, dirante: Jen fantomo; kaj ili ekkriis pro timo. – Sed tuj Jesuo parolis al ili, dirante: Kuraĝu; ĝi estas mi; ne timu.

Kaj responde al li Petro diris: Sinjoro, se ĝi estas vi, ordonu min veni al vi sur la akvo. – Kaj li diris: Venu. Kaj Petro, malsuprenirinte el la ŝipeto, iris sur la akvo, por veni al Jesuo. – Sed vidante la venton, li timis, kaj komencante subakviĝi, li ekkriis, dirante: Sinjoro, savu min. – Kaj tuj Jesuo etendis la manon kaj ektenis lin, dirante al li: Ho malgrandfidulo, kial vi dubis? – Kaj kiam ili supreniris en la ŝipeton, la vento ĉesiĝis. – Kaj tiuj, kiuj estis en la ŝipeto, adorkliniĝis al li, dirante: Vere vi estas Filo de Dio. (Sankta Mateo, ĉap. XIV, par. 22 ĝis 33.)

42. – Ĉi tiu fenomeno ricevas naturan klarigon en la ĉi-supre prezentitaj principoj, ĉapitro XIV, n-ro 43.

¹ Ĉi tiu fakto pruvas, ke kelkfoje la malkomponiĝo antaŭas la morton. En la monaĥinejo Bona Paŝtisto, fondita en Tulono de pastro Marin, kapelano de la malliberejoj, kaj destinita por pentintaj pekulinaj, troviĝis juna virino, kiu elportis plej terurajn suferojn kun la trankvileco kaj sereneco de elaĉeta viktimo. Droninta en siaj doloroj, ŝi ŝajnis rideti al ĉiela vizio. Kiel Sankta Tereza, ŝi petis pri plua suferado, kvankam ŝiaj karnoj estis disŝiritaj kaj la gangreno jam trafis ŝiajn membrojn. Laŭ saĝa antaŭzorgo, la kuracistoj rekomendis entombigi la korpon tuj post la forpaso. Sed, stranga afero! Apenaŭ ŝi faris sian lastan spiron, tute ĉesis la malkomponiĝa proceso; malaperis la kadavraj haladzoj; ŝi restis elmetita por la preĝoj kaj respektiga honorado de la komunumo.

² La lago Genezareto aŭ Tiberiado.

Analogaj ekzemploj pruvas, ke ĝi estas nek malebla nek mirakla, ĉar ĝi troviĝas en la leĝoj de la Naturo. Ĝi povas fariĝi laŭ du manieroj.

Kvankam vivanta, Jesuo povis aperi sur la akvo sub palpebla formo, dum aliloke troviĝis lia karna korpo. Ĉi tiu estas la plej probabla hipotezo. Oni eĉ povas rekoni en la rakonto iujn karakterizajn signojn de la palpeblaj aperoj. (Ĉap. XIV, n-roj 35 ĝis 37.)

Aliflanke, lia korpo povus esti subtenata kaj lia pezo nuligita de tiu sama fluideca forto, kiu tenas tablon pendanta en la spaco sen apogpunkto. La sama efiko plurfoje fariĝis ĉe homaj korpoj.

Transfiguriĝo

43. – Kaj post ses tagoj Jesuo prenis kun si Petron kaj Jakobon kaj Johanon, kaj kondukis ilin solajn sur altan monton¹ aparte; kaj li estis aliformita antaŭ ili; – kaj liaj vestoj fariĝis brilantaj, treege blankaj, kiel fulisto sur la tero ne povas blankigi. – Kaj aperis al ili Elija kun Moseo, kaj ili interparoladis kun Jesuo.

Kaj Petro responde diris al Jesuo: Rabeno, estas bone por ni esti ĉi tie; kaj ni faru tri laŭbojn: unu por vi, kaj unu por Moseo, kaj unu por Elija. Ĉar li ne sciis, kion respondi, ĉar ili tre timiĝis.

Kaj nubo superombris ilin; kaj elvenis voĉo el la nubo: Ĉi tiu estas Mia Filo, la amata; aŭskultu lin.

Kaj subite, ĉirkaŭrigardinte, ili jam vidis neniun krom Jesuo sola.

Kaj dum ili malsupreniris de la monto, li admonis ilin, ke al neniuj ili rakontu tion, kion ili vidis, ĝis la Filo de homo releviĝos el la mortintoj. Kaj ili konservis la diron, demandante inter si, kion signifas la releviĝo el la mortintoj. (Sankta Marko, ĉap. IX, par. 2 ĝis 10.)

¹ Monto Tabor, sudokcidente de lago Tiberiada kaj 11 kilometrojn sudoriente de Nazareto, 561 metrojn alta.

44. – Ankoraŭ en la proprecoj de la perispirita fluido oni trovas la kaŭzon de tiu fenomeno. La transfiguriĝo, klarigita en la ĉapitro XIV, n-ro 39, estas tre ordinara fakto, laŭ kiu la aspekto de iu individuo povas aliĝi per la fluideca radiado; sed la pureco de la perispirito de Jesuo permesis al lia Spirito doni al li esceptan brilegon. Koncerne la aperon de Moseo kaj Elija, ĝi tute apartenas al la kadro de ĉiuj samspecaj fenomenoj. (Ĉap. XIV, n-roj 35 kaj sekvantaj.)

El ĉiuj fakultoj, manifestiĝintaj en Jesuo, estas neniu, kiu troviĝus ekster la heimco kaj kiun oni ne renkontus ĉe la ordinaraĵoj, ĉar tiuj fakultoj ja apartenas al la Naturo. Sed pro la supereco de lia morala esenco kaj de liaj fluidecaj kvalitoj, tiuj fakultoj atingis ĉe li proporcion superajn ol ĉe la vulgarularo. Aparte de lia karna envolvaĵo, li prezentis al ni la staton de la puraj Spiritoj.

Kvietigita ventego

45. – Kaj en unu el tiuj tagoj eniris en ŝipeton li kaj liaj disĉiploj; kaj li diris al ili: Ni transiru al la alia bordo de la lago; kaj ili surmariĝis. – Sed dum ili veturis, li endormiĝis; kaj falis ventego sur la lagon; kaj ili tute pleniĝis de akvo, kaj estis en danĝero. – Kaj ili venis al li, kaj vekis lin, dirante: Estro, ni pereas. Kaj li leviĝis, kaj admonis la venton kaj la furiozon de la akvo; kaj ili ĉesiĝis, kaj fariĝis sereno. – Kaj li diris al ili: Kie estas via fido? Kaj ili timis kaj miris, dirante unu al la alia: Kiu do estas ĉi tiu? Ĉar li ordonas eĉ al la ventoj kaj al la akvo, kaj ili obeas al li. (Sankta Luko, ĉap. VIII, par. 22 ĝis 25.)

46. – Ni ankoraŭ ne sufiĉe konas la sekretojn de la Naturo por aserti, ĉu estas, aŭ ne, kaŝitaj inteligentoj direktantaj la agadon de la elementoj. Ĉe la jesa hipotezo, la fenomeno povus esti la rezulto de iu aŭtoritata ago sur tiujn inteligentojn kaj atestus ian povon, kiun al neniu homo estas konsentite disponi.

Kiel ajn la afero estas, Jesuo, trankvile dormante dum la ventego, atestas senton de sekureco klarigeblan per la fakto, ke lia Spirito *vidas* la eblon de nenia danĝero kaj la baldaŭan kvietiĝon de la ventego.

Edziĝo en Kana

47. – Tiu miraklo, kiun mencias nur la Evangelio laŭ Sankta Johano, estas prezentita kiel la unua farita de Jesuo, kaj kiel tia ĝi certe estis unu el la plej konataj. Sed ĝi ŝajne estigis tre malfortan impreson, ĉar pri ĝi parolis neniu el la aliaj evangeliistoj. Unu tiel eksterordinara fakto devus plej altgrade miregigi la invititojn kaj ĉefe la domomastron, kiuj tamen ŝajne eĉ ne rimarkis ĝin.

Konsiderata en si, tiu fakto malmulte gravas kompare kun tiuj, kiuj vere atestas la spiritajn kvalitojn de Jesuo. Se oni konsentas, ke ĉio okazis laŭ la rakonto, ja rimarkindas, ke tiu fenomeno estas la sola, kiu, en sia speco, tiam fariĝis. Jesuo havis superege altan naturon por limiĝi al pure materialaj efikoj, taŭgaj nur por akriĝi la scivolon de la amaso, kiu lin prenis por iu magiisto. Li sciis, ke la utilaj faroj akirigus al li pli da simpatio kaj al li altirigus pli da adeptoj, ol tiuj, kiuj, ŝajnante ĵongladon, tute ne tuŝus la koron. (n-ro 27).

Kvankam, ĝustadire, la fakto estas klarigebla, ĝis ioma grado, per ia fluideca agado, kiu estus ŝanĝinta, same kiel multaj ekzemploj liveritaj de la magnetismo, la proprecojn de la akvo, donante al ĝi la guston de vino, tamen ĉi tiu hipotezo estas tre malprobabla, ĉar tiuokaze la akvo, havante nur la guston de vino, estus konservinta sian koloron, kio nepre estus rimarkita. Estas pli racie vidi en tio unu el tiuj paraboloj tiel oftaj en la instruoj de Jesuo, kiel tiu de la erarinta filo, de la edziĝa festo, de la malbona riĉulo, de la forvelkinta figarbo kaj

tiom multe da aliaj, kiuj tamen havas la karakteron de okazintaj faktoj. Dum la festeno, li verŝajne faris aludon al la vino kaj akvo, kaj el ambaŭ li tiris ian instruon. Pravigas tiun opinionon la vortoj, kiujn pri la afero la festenestro adresas al la fianĉo: “Ĉiu homo prezentas unue la bonan vinon, kaj kiam oni jam drinkis, tiam la malpli bonan; sed vi rezervis la bonan vinon ĝis nun.”

El tiuj du hipotezoj, oni devas elekti la pli racian, kaj la spiritistoj estas nek tiel kredemaj, ke ili ĉie vidas manifestiĝojn, nek tiel radikalaj en siaj opinioj, ke ili pretendas ĉion klarigi per la fluidoj.

Multobligo de panoj

48. – La multobligo de panoj estas unu el la mirakloj, kiuj plej ekscitas la scivolon de komentariistoj kaj samtempe nutras la vervon de nekredantoj. Ne donante al si la penon sondi ĝian alegorian sencon, ĉi-lastaj vidis en ĝi nenion alian krom ia porinfana rakonto. Sed la plimulto el la seriozaj personoj rigardis tiun rakonton, kvankam sub formo malsama ol la ordinara, kiel ian parabolon, en kiu la spirita nutraĵo estas komparata kun la korpa nutraĵo.

Oni povas tamen vidi en ĝi pli ol ian figuron kaj akcepti, el certa vidpunkto, la realecon de iu materiala fakto, sen la neceso, por tio, ĝin prezenti kiel miregindaĵon. Oni scias, ke forta spirita zorgo, ke streĉa atento al iu afero, forgesigas la malsaton. Nu, tiuj, kiuj akompanis Jesuon, estis homoj avidantaj aŭskulti lin; nenio miriga do estis en tio, ke, fascinate de lia parolo, krom ankaŭ eble de la potenca magneta influo, kiun li havis sur ilin, ili ne sentis la materialan bezonon manĝi.

Antaŭvidante tiun rezultaton, Jesuo do povis trankviligi siajn disĉiplojn kaj al ili diri, laŭ sia kutime figura parolo – kaj

se nur ili efektive kunportis kelke da panoj –, ke ĉi tiuj sufiĉos por satigi la homamason. Li samtempe donis lecionon al tiuj disĉiploj, dirante al ili: “Vi donu al ili manĝi”. Li per tio al ili instruis, ke ankaŭ ili povos nutri pere de la parolo.

Tiamaniere, krom la morala, alegoria senco, fariĝis efiko fiziologia, natura kaj tre konata. La miregindaĵo, en tiu okazo, troviĝas en la aŭtoritateco de la parolo de Jesuo, sufiĉe potenca por kapti la atenton de sennombra amaso en tia grado, ke ĝi forgesigis al ili la bezonon manĝi. Tiu morala povo pruvas la superecon de Jesuo, multe pli ol tiu pure materiala okazo de multobligo de panoj, kiun oni devas rigardi kiel ian alegorion.

Cetere, ĉi tiun klarigon Jesuo mem konfirmas en la du sekvantaj lokoj:

La fermentaĵo de la Fariseoj

49. – Kaj la disĉiploj, transirinte al la alia bordo, forgesis preni panojn. – Sed Jesuo diris al ili: Zorgu, kaj gardu vin kontraŭ la fermentaĵo de la Fariseoj kaj Sadukeoj. – Kaj ili diskutis inter si, dirante: ĉar ni ne prenis panojn.

Sed Jesuo, eksciante tion, diris: Kial vi diskutas inter vi, ho malgrand-fiduloj, pro tio, ke vi ne prenis panojn? – ĉu vi ankoraŭ ne konscias, nek memoras la kvin panojn de la kvin mil, kaj kiom da korboj vi kolektis? – Nek la sep panojn de la kvar mil, kaj kiom da korbegoj vi kolektis? – Kial vi ne komprenas, ke ne pri panoj mi diris al vi: Gardu vin kontraŭ la fermentaĵo de la Fariseoj kaj Sadukeoj?

Tiam ili ekkomprenis, ke li admonis ilin sin gardi ne kontraŭ la fermentaĵo de panoj, sed kontraŭ la instruado de la Fariseoj kaj Sadukeoj. (Sankta Mateo, ĉap. XVI, par. 5 ĝis 12.)

La ĉiela pano

50. – La sekvantan tagon, kiam la homamaso, kiu restis trans la maro, vidis, ke nenia ŝipeto estas tie krom unu, kaj ke Jesuo ne eniris kun la

disĉiploj en la ŝipon, sed la disĉiploj solaj veturis – (venis tamen ŝipetoj el Tiberias proksime al la loko, kie oni manĝis la panon, post kiam la Sinjoro donis dankon) – kiam do la homamaso vidis, ke Jesuo ne estas tie, nek liaj disĉiploj, ili ankaŭ eniris la ŝipetojn kaj veturis al Kapernaum, serĉante Jesuon. – Kaj trovinte lin trans la maro, ili diris al li: Rabeno, kiam vi venis ĉi tien?

Jesuo respondis al ili kaj diris: Vere, vere, mi diras al vi: Vi min serĉas, ne ĉar vi vidis signojn, sed ĉar vi manĝis el la panoj kaj satiĝis.

Laboru ne por la pereema nutraĵo, sed por la nutraĵo, kiu restas ĝis eterna vivo, kiun la Filo de homo donos al vi; ĉar lin Dio, la Patro, sigelis.

Ili do diris al li: Kiel ni agu, por ke ni faru la farojn de Dio? – Jesuo respondis kaj diris al ili: Jen la faro de Dio: kredi al tiu, kiun Li sendis.

Ili do diris al li: Kian signon vi montras, por ke ni vidu kaj kredu al vi? kion vi faras? – Niaj patroj manĝis la manaon en la dezerto, kiel estas skribite: Li donis al ili ĉielan panon por manĝi.

Jesuo do diris al ili: Vere, vere, mi diras al vi: Ne Moseo donis al vi tiun ĉielan panon; sed mia Patro donas al vi la veran ĉielan panon. – Ĉar la pano de Dio estas tiu, kiu malsupreniras de la ĉielo kaj donas vivon al la mondo.

Ili do diris al li: Sinjoro, ĉiam donu al ni tiun panon.

Jesuo diris al ili: *Mi estas la pano de vivo; kiu venas al mi, tiu neniam malsatos, kaj kiu kredas al mi, tiu neniam soifos.* – Sed mi diris al vi, ke vi min vidis, kaj tamen vi ne kredas.

Vere, vere, mi diras al vi: Kiu kredas, tiu havas vivon eternan. – Mi estas la pano de vivo. – Viaj patroj manĝis la manaon en la dezerto, kaj mortis. – Jen la pano, kiu malsupreniris de la ĉielo, por ke oni manĝu el ĝi kaj ne mortu. (Sankta Johano, ĉap. VI, par. 22 ĝis 36 kaj 47 ĝis 50.)

51. – En la unua loko, Jesuo, memorigante la antaŭe okazintan efikon, klare komprenigas, ke tute ne temis pri materiala pano, ĉar alie al lia komparo kun la fermentaĵo de la Fariseoj mankus objekto: “*Ĉu vi ankoraŭ ne konscias*, li diras, nek memoras, ke kvin panoj sufiĉis por kvar mil homoj, kaj ke sep panoj sufiĉis por kvar mil homoj? Kial vi ne komprenas, ke ne pri panoj mi diris al vi: Gardu vin kontraŭ la fermentaĵo de la Fariseoj?” Tiu komparo havus nenian pravon de ekzisto en la okazo de ia materiala multobligo. La fakto estintus sufiĉe

eksterordinara por forte impresi la imagon de liaj disĉiploj, kiuj tamen ŝajne ne plu ĝin memoris.

Tio ne malpli klare elfluas el la parolado de Jesuo pri la ĉiela pano, per kiu li penas komprenigi la veran sencon de la spirita nutraĵo. “Laboru, li diras, ne por la pereema nutraĵo, sed por la nutraĵo, kiu restas ĝis eterna vivo, kiun la Filo de homo donos al vi”. Tiu nutraĵo estas lia parolo, pano, kiu malsupreniris de la ĉielo kaj donas vivon al la mondo. “Mi estas, li diras, la pano de vivo; *kiu venas al mi, tiu neniam malsatos*, kaj kiu kredas al mi, tiu neniam soifos”.

Sed tiaj distingoj estis tro subtilaj por tiuj krudnaturaj homoj, kiuj nur komprenis palpeblajn aferojn. Por ili, la manao, kiu nutris la korpojn de iliaj prauloj, estis la vera ĉiela pano; ja tie troviĝis la miraklo. Se do la multobligo de panoj materiale okazis, kiel tiuj homoj, por kies bono ĝi fariĝis antaŭ kelke da tagoj, tre malforte impresiĝis de ĝi en tia grado, ke ili demandis Jesuon: “Kian signon vi montras, por ke ni vidu kaj kreu al vi? kion vi faras?” Ili komprenis, kiel miraklojn, la miregindaĵojn petatajn de la Fariseoj, tio estas, signoj, kiuj laŭordone aperus en la ĉielo, same kiel per magiista vergeto. Kion Jesuo faris, tio estis tre simpla kaj ne troviĝis ekster la leĝoj de la Naturo; eĉ la resanigoj ne havis tre strangan, nek tre eksterordinaran karakteron. Ne tre impresaj montriĝis al ili la spiritaĵ mirakloj.

Tento de Jesuo

52. – Jesuo, portita de la diablo sur la tegmentan pinton de la Templo, poste sur la supron de monto por esti tentata –

ĉi tio prezentas unu el tiuj paraboloj, kiuj estis al li familiaraj

kaj kiujn la popola kredemo transformis en konkretajn faktojn.¹

53. – “Jesuo ne estis suprenlevita. Li nur volis komprenigi al la homoj, ke la homaro estas erarema kaj ke ĝi devas ĉiam esti singarda kontraŭ la malbonaj inspiroj, al kiuj ĝia malforta naturo igas cedi. La tento de Jesuo estas do ia figuro, kaj necesus esti blinda por ĝin preni laŭlitere. Kiel vi kredus, ke la Mesio, la Vorto de Dio enkarniĝinta, estis submetita dum kelka tempo, kiel ajn mallonga ĝi estus, al la sugestoj de la demono, kaj ke, laŭ la Evangelio de Luko, la demono foriris de li *dum kelka tempo*, kio supozigus, ke la Kristo ankoraŭ restos submetita al lia povo? Ne; komprenu pli ĝuste la instruojn, kiuj al vi estis donitaj. La Spirito de malbono neniom potencus super la esenco de bono. Neniu asertis esti vidinta Jesuon sur la monto nek sur la tegmenta pinto de la Templo. Certe, unu tiela fakto disvastiĝus ĉe ĉiuj popoloj. La tento do ne estis ia ago materiala kaj fizika. Koncerne la moralan agon, ĉu vi povus konsenti, ke la Spirito de mallumo diris al tiu, kiu konsciis sian originon kaj povon: “Adorkliniĝu antaŭ mi, kaj mi donos al vi ĉiujn regnojn de la Tero?” La demono do ne konus tiun, al kiu li faris tiajn proponojn, kio ne estus probbla. Se li konis Jesuon, liaj proponoj estis sensencaj, ĉar li nepre sciis, ke li estos repuŝita de tiu, kiu venis detruilian regadon super la homoj.

“Komprenu do la sencon de tiu parabolo, ĉar ja tio ĝi estas, tiel same kiel tiuj de la *Erarinta filo* kaj de la *Bona Samaritano*. Unu montras al ni la danĝerojn, kiujn la homoj riskas, se ili ne kontraŭstaras tiun intiman voĉon, kiu al ili krias senĉese: “Ci povas esti pli, ol kia ci estas; ci povas posedi pli,

¹ La sekvanta klarigo estas laŭteksta reprodukto de instruo, kiun Spirito donis pri la temo.

ol kiom ci posedas; ci povas grandiĝi, multon akiri; cedu al la voĉo de la ambicio, kaj ĉiuj ciaj deziroj estos kontentigitaj.” Ĝi montras al vi la danĝeron kaj la rimedon, ke vi evitu ĝin, dirante al la malbonaj inspiroj: *Foriru, Satano!* alivorte: *For la tento!*

“La du aliaj paraboloj, kiujn mi memorigis, montras al vi, kion povas ankoraŭ atendi tiu, kiu, tro malforta por forpeli la demonon, cedis al lia tentado. Ili montras al vi la korfavoron de la patro de familio, metanta sian manon sur la frunton de la pentinta filo kaj al li donanta, kun amo, la petegatan pardonon. Ili montras al vi la kulpinton, la skismulon, la homon repuŝitan de siaj fratoj, pli valorantan, en la okuloj de la Superega Juĝisto, ol tiuj, kiuj lin malŝatis pro tio, ke li praktikas la virtojn predikatajn de la leĝo de amo.

“Bone taksu la instruojn donitajn de la Evangelio; sciu distingi en ĝi tion proprasencan de tio figursenca, kaj la eraroj, kiuj vin longatempe blindigis, iom post iom malaperos kaj cedos lokon al la brila lumo de la Vero”. – *Johano Evangeliiisto*, Bordoza, 1862.

Miregindaĵoj okaze de la morto de Jesuo

54. – Kaj de post la sesa horo fariĝis mallumo sur la tuta lando ĝis la naŭa horo.

Kaj jen la kurteno de la sanktejo disŝiriĝis en du pecojn de supre ĝis malsupre; kaj la tero tremis; kaj la rokoj diskrevis; – kaj la tomboj malfermiĝis, kaj multaj korpoj de dormantaj sanktuloj leviĝis, – kaj elirinte el la tombo post lia releviĝo, ili eniris en la sanktan urbon kaj aperis al multaj. (Sankta Mateo, ĉap. XXVII, par. 45, 51, 52, 53.)

55. – Estas strange, ke tiaj miregindaĵoj, okazante en la momento mem, kiam la tuta urbo atentis la martirigon de Jesuo, ja la plej gravan fakton en tiu tago, pasis nerimarkite, ĉar neniu historiisto ilin mencias. Ŝajnas neebbla, ke tertremo

kaj la dronado de la tuta Tero en mallumo dum tri horoj, en lando kie la ĉielo ĉiam estas perfekte klara, pasis nerimarkite.

La daŭro de tiu obskuro estas preskaŭ sama kiel tiu de suneklipso, sed tiaj eklipsoj fariĝas nur ĉe novluno, kaj la morto de Jesuo okazis dum la plenluna fazo, la 14-an de la monato Nisan, tago de la Pasko Juda.

La obskuriĝo de la Suno povas esti kaŭzata de la makuloj, kiujn oni vidas sur ĝia supraĵo. Tiaokaze la lumbrilo senteble malfortiĝas, sed neniam ĝis tia grado, ke ĝi estigus obskuron kaj mallumon. En la supozo, ke unu tiaspeca fenomeno okazis en tiu tempo, ĝi nepre estus rezultinta el perfekte natura kaŭzo.¹

Koncerne la mortintojn, kiuj reviviĝis, povas esti, ke *iuj personoj* havis viziojn aŭ vidis aperaĵojn, kio tute ne estas esceptokaza. Sed ĉar en tiu tempo oni ne konis la kaŭzon de tiu fenomeno, oni supozis, ke la vidataj figuroj eliris el la tomboj.

La disĉiploj de Jesuo, kortuŝitaj de la morto de sia Majstro, sendube ligis al ĝi kelkajn apartajn faktojn, kiujn aliokaze ili neniel atentus. Estis sufiĉe, ke rokfragmento deapartiĝis en tiu momento, por ke personoj inklinaj al tio mirakleca vidu en tiu fakto ian miregindaĵon kaj, ĝin trograndigante, diru, ke la ŝtonoj fendiĝis.

¹ Sur la supraĵo de la Suno ĉiam troviĝas fiksj makuloj, kiuj akompanas ĝian rotacion kaj pro tio servas por determini la daŭron de tiu movo. Sed iafoje tiuj makuloj kreskas, laŭ nombro, amplekso kaj intenseco. Ĝuste tiam ekestas malfortiĝo de la sunaj lumo kaj varmo. Tiu kresko de la nombro de makuloj ŝajnas koincidi kun certaj astronomiaj fenomenoj kaj kun la relativa pozicio de iuj planedoj, kio rezultigas ilian periodan reaperon. Tre varias la daŭro de tiu obskureco; kelkfoje ne pli ol du aŭ tri horojn, sed en la jaro 535 okazis unu, kiu daŭris dek kvar monatojn.

Jesuo estas granda pro siaj faroj, ne pro la fantaziaj bildoj, kiujn ia malpli sobra entuziasmo kredis utila ligi al lia persono.

Postmortaj aperoj de Jesuo

56. – Sed Maria (Magdalena) staris ekstere apud la tombo, plorante; kaj dum ŝi ploris, ŝi kliniĝis, kaj enrigardis en la tombon; – kaj ŝi vidis du anĝelojn en blankaj vestoj, sidantajn, unu ĉe la kaploko kaj unu ĉe la piedloko, kie la korpo de Jesuo antaŭe kuŝis. – Kaj ili diris al ŝi: Virino, kial vi ploras? Ŝi respondis: ĉar oni forprenis mian Sinjoron, kaj mi ne scias, kien oni lin metis.

Dirinte tion, ŝi sin turnis malantaŭen, kaj vidis Jesuon staranta, kaj ne sciis, ke ĝi estas Jesuo. – Jesuo diris al ŝi: Virino, kial vi ploras? kiun vi serĉas? Ŝi, supozante, ke li estas la ĝardenisto, diris al li: Sinjoro, se vi forportis lin, sciigu min, kien vi metis lin, kaj mi lin forprenos.

Jesuo diris al ŝi: Maria. Ŝi sin turnis, kaj diris al li Hebrelingve: Raboni; tio estas Majstro. – Jesuo diris al ŝi: Ne tuŝu min; ĉar mi ankoraŭ ne supreniris al la Patro; sed iru al miaj fratoj, kaj diru al ili: Mi supreniras al mia Patro kaj Via Patro, kaj al mia Dio kaj via Dio.

Maria Magdalena venis al la disĉiploj, sciigante: Mi vidis la Sinjoron; kaj ke li tion diris al ŝi. (Sankta Johano, ĉap. XX, par. 11 ĝis 18.)

57. – Kaj jen du el ili iris en tiu sama tago al vilaĝo nomata Emaus, kiu estas malproksime de Jerusalemo sesdek stadiojn. – Kaj ili interparolis inter si pri ĉio tio, kio okazis. – Kaj dum ili interparolis kaj diskutis inter si, Jesuo mem alproksimiĝis kaj iris kun ili. – Sed iliaj okuloj estis malhelpataj tiel, ke ili lin ne rekonis. – Kaj li diris al ili: Kiaj vortoj estas tiuj, kiujn vi interŝanĝas, dum vi iras? Kaj ili haltis kun malgaja mieno.

Kaj unu el ili, nomata Kleopas, responde diris al li: ĉu nur vi sola loĝas en Jerusalemo, kaj ne scias tion, kio tie okazis en ĉi tiuj tagoj? – Kaj li diris al ili: Kion? Kaj li diris al li: Pri Jesuo, la Nazaretano, kiu estis profeto potenca age kaj parole antaŭ Dio kaj la tuta popolo; – kaj kiel la ĉefpastroj kaj niaj regantoj transdonis lin por kondamno al morto, kaj lin krucumis. – Sed ni esperis, ke li estas tiu, kiu elaçetos Izraelon. Kaj plie, krom ĉio tio, hodiaŭ estas jam la tria tago, de kiam tio okazis. – Ankaŭ mirigis nin iuj virinoj el inter ni, kiuj estis frumatene apud la tombo, – kaj ne trovinte lian korpon, revenis, dirante, ke ili ankaŭ vidis vizon de anĝeloj, kiuj diris, ke li vivas. – Kaj iuj el

nia kunularo iris al la tombo, kaj trovis tiel, kiel diris la virinoj; sed lin ili ne vidis.

Kaj li diris al ili: Ho malsaĝuloj kaj kore malviglaj por kredi ĉion, kion la profetoj antaŭparolis! – ĉu la Kristo ne devis suferi ĉion tion, kaj eniri en sian gloron? – Kaj komencante de Moseo kaj de ĉiuj profetoj, li klarigis al ili el ĉiuj Skriboj la dirojn pri li mem.

Kaj ili alproksimiĝis al la vilaĝo, kien ili iris, kaj li ŝajnis al ili, kvazaŭ li pluen iros. – Kaj ili retenis lin, dirante: Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas. Kaj li eniris, por resti ĉe ili. – Kaj dum li sidis kun ili ĉe manĝo, li prenis panon, kaj ĝin benis kaj dispecigis kaj donis al ili. – Kaj iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis lin, kaj li fariĝis nevidebla por ili.

Kaj ili diris unu al alia: ĉu nia koro ne brulis en ni, dum li parolis kun ni sur la vojo, dum li klarigis al ni la Skribojn? – Kaj leviĝinte en tiu sama horo, ili reiris al Jerusalemo, kaj trovis la dek unu kunvenintaj, kun siaj kunuloj, kaj dirantaj: – La Sinjoro vere leviĝis, kaj aperis al Simon. – Kaj ili rakontis tion, kio okazis sur la vojo, kaj kiamaniere li rekonis al ili en la dispecigo de pano.

Kaj dum ili priparolis tion, li mem staris meze de ili, kaj diris al ili: Paco al vi. – Sed terurite kaj timigite, ili supozis, ke ili vidas spiriton.

Kaj li diris al ili: Kial vi maltrankviliĝas? kaj kial diskutoj leviĝas en viaj koroj? – Vidu miajn manojn kaj miajn piedojn, ke ĝi estas mi mem; palpu min kaj vidu; ĉar spirito ne havas karnon kaj ostojn, kiel vi vidas min havanta. – Kaj tion dirinte, li montris al ili siajn manojn kaj siajn piedojn.

Kaj dum ili ankoraŭ ne kredis pro ĝojo, kaj miris, li demandis ilin: ĉu vi havas ian manĝaĵon ĉi tie? – Kaj ili donis al li pecon de rostita fiŝo. – Kaj li prenis, kaj manĝis antaŭ ili. – Kaj li diris al ili: Jen estas miaj vortoj, kiujn mi parolis al vi, kiam mi ankoraŭ estis ĉe vi, ke devas plenumiĝi ĉio, kio estas skribita pri mi en la leĝo de Moseo kaj en la profetoj kaj en la psalmoj.

Tiam li malfermis ilian menson, por ke ili komprenu la Skribojn; – kaj li diris al ili: Tiel estas skribite, ke la Kristo devas suferi, kaj leviĝi el la mortintoj la trian tagon; – kaj ke pento kaj pardonado de pekoj estu predikataj en lia nomo al ĉiuj nacioj, komencante ĉe Jerusalemo. – Vi estas atestantoj pri tio. – Kaj jen mi elsendos sur vin la promeson de mia Patro; sed restu en la urbo, ĝis vi vestiĝos per potenco de supre. (Sankta Luko, ĉap. XXIV, par. 13 ĝis 49.)

58. – Sed Tomaso, unu el la dek du, nomata Didimo, ne ĉeestis kun ili, kiam Jesuo venis. – La aliaj disĉiploj do diris al li: Ni vidis la Sinjoron. Sed li diris al ili: Se mi ne vidos en liaj manoj la truon de la najloj, kaj se mi ne

metos mian fingron en la lokon de la najloj, kaj ne metos mian manon en lian flankon, mi tute ne kredos.

Kaj post ok tagoj la disĉiploj denove estis interne, kaj Tomaso kun ili. Kaj Jesuo venis, kiam la pordoj estis fermitaj, kaj staris en la mezo, kaj diris: Paco al vi.

Tiam li diris al Tomaso: Etendu ĉi tien vian fingron kaj vidu miajn manojn; kaj etendu vian manon kaj enmetu ĝin en mian flankon; kaj ne estu nekredema, sed estu kredanta. – Tomaso respondis al li kaj diris: Mia Sinjoro kaj mia Dio. – Jesuo diris al li: ĉar vi vidis min, vi kredas; feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis, kaj tamen kredas. (Sankta Johano, ĉap. XX, par. 24 ĝis 29.)

59. – Post tio Jesuo denove sin montris al la disĉiploj apud la maro de Tiberias; kaj li montris sin jene.

Estis kune Simon Petro, kaj Tomaso, nomata Didimo, kaj Natanael el Kana Galilea, kaj la filoj de Zebedeo, kaj aliaj du el liaj disĉiploj. – Simon Petro diris al ili: Mi iras, por fiŝkapti. Ili diris al li: Ni ankaŭ iras kun vi. Ili do eliris, kaj iris sur la ŝipon; kaj tiun nokton ili nenion kaptis.

Sed ĉe la tagiĝo Jesuo staris sur la marbordo; tamen la disĉiploj ne sciis, ke ĝi estas Jesuo. – Tiam Jesuo diris al ili: Infanoj, ĉu vi havas ian manĝaĵon? Ili respondis al li: Ne. – Kaj li diris al ili: Ĵetu la reton ĉe la dekstra flanko de la ŝipo, kaj vi trovos. Ili do ĝin elĵetis; kaj pro la multeco de la fiŝoj ili ne plu povis ĝin treni.

Tiu disĉiplo, kiun Jesuo amis, diris al Petro: Ĝi estas la Sinjoro. Kiam do Simon Petro aŭdis, ke ĝi estas la Sinjoro, li alzonis al si sian kitelon (ĉar li estis nuda) kaj ĵetis sin en la maron. – Sed la aliaj disĉiploj venis en la ŝipeto (ĉar ili estis ne malproksime de la tero, sed nur ĉirkaŭ ducent ulnoj), trenante la reton plenan de fiŝoj. (Sankta Johano, ĉap. XXI, par. 1 ĝis 8.)

60. – Kaj li elkondukis ilin ĝis apud Betania, kaj, levinte siajn manojn, li benis ilin. – Kaj dum li benis ilin, li foriĝis de ili kaj estis suprenporti-ta en la ĉielon.

Kaj adorkliniĝinte al li, ili revenis al Jerusalemo kun granda ĝojo; kaj estis konstante en la templo, glorante Dion. (Sankta Luko, ĉap. XXIV, par. 50 ĝis 53.)

61. – La postmortaj aperoj de Jesuo estas rakontitaj de ĉiuj evangeliistoj kun riĉeco de detaloj, kiuj allasas nenian dubon pri ilia fakta realeco. Cetere, ilin perfekte klarigas la leĝoj pri la fluidoj kaj la proprecoj de la perispirito, kaj nenion

nenormalan ili prezentas rilate al samspecaj fenomenoj, kies historio, antikva kaj nuntempa, liveras multenombrajn ekzemplojn, ne mankigante eĉ ties palpeblecon. Se oni atentas la cirkonstancojn, kiuj akompanis liajn kelkajn aperojn, oni rekonos ĉe li, en tiuj okazoj, ĉiujn karakterojn de la fluideca estaĵo. Li neatendite ekaperas, kaj sammaniere malaperas; unuj lin vidas, sed aliaj ne, sub aspektoj, kiuj lin ne rekonigas eĉ al liaj disĉiploj; li sin montras en fermitaj lokoj, kien karna korpo ne povus penetri; al lia parolo mem mankas la vervo de la parolo de korphava estaĵo; iliaj esprimoj havas karakteron malmultvortan kaj sentencan, propran al la Spiritoj, kiuj sammaniere manifestiĝas; ĉiuj liaj teniĝoj, unuvorte, vidigas ion ne apartenantan al la surtera mondo. Lia ĉeesto kaŭzas samtempe surprizon kaj timon; vidante lin, liaj disĉiploj ne alparolas lin kun la iama libereco; ili sentas, ke li ne plu estas homo.

Jesuo do sin montris kun sia perispirita korpo, kio klarigas, ke lin vidis nur tiuj, al kiuj li volis sin videbligi. Se li portus sian karnan korpon, lin estus vidinta, kiel vivulon, tiu, kiu la unua lin renkontus. Ne konante la primaran kaŭzon de tiu fenomeno, nome la aperaĵoj, liaj disĉiploj ne rimarkis tiajn apartaĵojn, kiujn ili verŝajne ne atentis. Vidante Jesuon kaj lin tuŝante, ili certe kredis, ke tio estas lia reviviĝinta korpo. (Ĉap. XIV, n-roj 14, kaj 35 ĝis 38.)

62. – Dum la nekredemo repuŝas ĉiujn faktojn estigitajn de Jesuo pro ilia supernatura ŝajno, kaj ilin senescepte rigardas kiel legendajn, Spiritismo liveras naturan klarigon pri ilia pliparto. Ĝi pravas ilian eblecon ne nur laŭ la teorio de la prifluidaj leĝoj sed ankaŭ laŭ ilia identeco kun analogaj faktoj estigitaj de sennombraj personoj en la plej ordinaraj kondiĉoj.

Ĉar tiaj faktoj iel estas publike konataj, ili do principe pruvas nenion koncerne la esceptan naturon de Jesuo.¹

63. – La plej granda miraklo farita de Jesuo; tiu, kiu vere atestas lian superecon, estis la revolucio, kiun liaj instruoj naskis en la mondo, malgraŭ liaj tre limigitaj rimedoj de agado.

Efektive, Jesuo, obskura, malriĉa, naskita en plej humila kondiĉo ĉe malgranda popolo preskaŭ nekonata kaj sen ia politika, artisma aŭ literatura influo, nur tri jarojn predikas sian doktrinon; dum tiu mallonga tempo, li estas nekomprenata kaj persekutata de siaj samurbanoj, kalumniata kaj traktata kiel trompisto; por ne suferi ŝtonumadon li estas devigita fuĝi; unu el liaj apostolo lin perfidas, alia lin forneas, kaj ĉiuj lin forlasas, kiam li falas en la manojn de siaj malamiko. Li nur faradis bonon, kaj tio ne ŝirmis lin de la malbonvolemo, kiu kontraŭ li akuzociele turnis liajn servojn mem. Kondamnite al turmento destinata nur por krimuloj, li mortas, kaj la mondo ĝin ne scias, ĉar la tiama Historio nenion diras pri li.² Li nenion skribis; tamen, kun la helpo de kelkaj homoj tiel obskuraj kiel li, lia parolo estis sufiĉa por regeneri la mondon; lia doktrino mortigis la ĉiopovan paganismon kaj fariĝis la torĉo de la civilizacio. Li havis kontraŭ si ĉion, kio povas fiaskigi la

¹ La nuntempaj, sennombraj okazoj de resanigoj, aperoj, posedoj, duobla vidado kaj aliaj, raportitaj en la *Revue Spirite* kaj memoritaj ĉi-supre, liveras, eĉ koncerne detalojn, tiel frapantan analogecon kun tiuj raportitaj en la Evangelio, ke la simileco de kaŭzoj kaj efikoj montriĝas evidenta. Oni tial sin demandas, kial unu sama fakto fontus nuntempe el natura kaŭzo kaj iam havus kaŭzon supernaturan; kaŭzo diabla ĉe unuj kaj dia ĉe aliaj. Se estus eble ĉi tie kontraŭmeti unujn al la aliaj, pli facila estus la komparo, sed tion ne permesas ilia nombro nek la elvolvoj, kiujn la pliparto postulas.

² Pri li parolas, cetere tre malmulte, nur la historiisto Flavio Jozefo.

homojn, pro kio ni asertas, ke la triumfo de lia doktrino estis la plej granda el liaj mirakloj kaj samtempe pruvas la dian originon de lia misio. Se, anstataŭ sociaj, regeneraj principoj, fonditaj sur la spirita estonteco de la homo, li nur postlasus kelkajn miregindajn faktojn al la posteularo, eble oni hodiaŭ apenaŭ konus lin laŭnome.

Malapero de la korpo de Jesuo

64. – La malapero de la korpo de Jesuo, post lia morto, estis objekto de sennombraj komentarioj. Pri tio atestas la kvar evangeliistoj, surbaze de la rakontoj de la virinoj, kiuj, irinte al la tombo en la tria tago post la krucumo, ĝin tie ne trovis. Unuj vidis miraklan fakton en tiu malapero, aliaj ĝin supozis ia kaŝita forpreno.

Laŭ alia opinio, Jesuo havis ne karnan, sed nur fluidecan korpon; li estus, dum sia tuta vivo, nenio alia krom ia palpebla aperaĵo; unuvorte: iaspeca agenerulo. Lia naskiĝo, lia morto kaj ĉiuj materialaj agoj de lia vivo estus nura ŝajno. Pro tio, laŭdire, lia korpo, reveninte al la fluideca stato, povis malaperi for de la tombo, kaj kun tiu sama korpo li sin montris post sia morto.

Sendube tian fakton oni ne povas rigardi kiel absolute neeban, laŭ tio, kion oni nuntempe scias pri la proprecoj de la fluido; sed ĝi almenaŭ estus tute escepta kaj formale kontraŭa al la karaktero de la ageneruloj. (Ĉap. XIV, n-ro 36.) La demando do estas scii, ĉu unu tia hipotezo estas akceptebla, ĉu la faktoj ĝin konfirmas aŭ malkonfirmas.

65. – La restado de Jesuo sur la Tero prezentas du periodojn: antaŭmortan kaj postmortan. En la unua, ekde la koncipiĝo ĝis la naskiĝo, ĉio fariĝas, koncerne lian patrinon,

tiel same kiel en la ordinaraj kondiĉoj de la vivo.¹ De lia naskiĝo ĝis lia morto, ĉio en liaj agoj, en lia parolo kaj en la diversaj cirkonstancoj de lia vivo prezentas la nedubeblajn karakterojn de la korpeco. La psikaj fenomenoj, fariĝantaj ĉe li, estas akcidentaj kaj prezentas nenion nenormalan, ĉar ilin klarigas la proprecoj de la perispirito, kaj ĉe aliaj individuoj ili okazas laŭ diversaj gradoj. Male, post lia morto ĉio en li vidigas la fluidecan estulon. La diferenco inter ambaŭ statoj estas tiel frapanta, ke ne eblas similigi unu al la alia.

La karna korpo havas proprecojn intime ligitajn al la ĝustasenca materio, kiuj proprecoj esence diferencas de tiuj de la eterecaj fluideoj; en la unua, la malorganizon kaŭzas la rompiĝo de la molekula kohero. Penetrante en materian korpon, tranĉa instrumento dividas al ĝi la histojn; se estas atakitaj la organoj nepre necesaj al la vivo, tiam ili ĉesas funkcii kaj okazas la morto, tio estas, la morto de la korpo. Ĉar tia kohero ne ekzistas en la fluidecaj korpoj, la vivo en ili ne sidas sur la funkciado de specialaj organoj, pro kio en ĝi ne povas ekesti analogaj malordoj. Tranĉa aŭ alispeca instrumento penetras fluidecan korpon kvazaŭ ĝi penetrus en vaporon, farante al ĝi nenian lezon. Jen kial tiaspecaj korpoj *ne povas morti*, kaj kial la fluidecaj estuloj nomataj *ageneruloj* ne povas esti mortigitaj.

Post la turmento de Jesuo, lia korpo konserviĝis inerta kaj senviva; ĝi estis entombigita tiel same kiel la ordinaraj korpoj, kaj ĉiu povis ĝin vidi kaj tuŝi. Post lia releviĝo, kiam li volis forlasi la Teron, li ne mortis; lia korpo leviĝis, disnieniĝis

¹ Ni ne parolas pri la mistero de la enkarniĝo, kiun ne koncernas nin ĉi tie pritrakti kaj kiun ni poste ekzamenos. – *Noto de la Brazila Spiritisma Federacio al sia portugallingva eldono*: Kardec ne povis dumvive plenumi ĉi tiun promeson, ĉar en la jaro sekvinta la publikigon de ĉi tiu verko li revenis en la Spiritan Patrolandon.

kaj malaperis, lasante nenian postsignon, kio evidente pruvas, ke tiu korpo havis alian naturon ol tiu de la korpo pereinta sur la kruco; kaj el tio ja trudiĝas la konkludo, ke se estis eble al Jesuo morti, li do nepre havis korpon el karno.

Pro ĝiaj materialaj proprecoj, la karna korpo estas la sidejo de la sensacoj kaj de la fizikaj doloroj, kiuj refrapas en la sentiva centro, aŭ Spirito. Ne la korpo suferas, sed ja la Spirito, kiu ricevas la reefikojn de la lezoj aŭ aliiĝoj de la organaj histoj. Ĉe korpo sen Spirito, absolute nula estas la sensaco; samkiale, la Spirito sen materia korpo ne povas sperti la suferojn, kiuj rezultas el la aliiĝo de la materio, el kio nepre trudiĝas la konkludo, ke, se Jesuo materiale suferis, kion oni ne povas pridubi, li do havis materialan korpon de naturo simila al tiu de la korpo de ĉiuj homoj.

66. – Al la materialaj faktoj aldoniĝas fortegaj moralaj konsideroj.

Se Jesuo, dum sia vivo, troviĝis en la stato de la fluidecaj estuloj, li do ne estus spertinta doloron, nek korpajn bezonojn. Supozi, ke tiel okazis, estas senhavigi lin je la merito de vivo plena de necesbezonoj kaj suferoj, kiun li elektis, kiel ekzemplon de rezignacio. Se ĉio ĉe li estus ŝajna, do ĉiuj agoj de lia vivo, la ripetata antaŭdiro pri lia morto, la dolora sceno sur la Monto Olivarba, lia preĝo al Dio, ke estu forportita de li la kaliko de amarajoj, lia suferado, lia agonio, ĉio, ĝis lia lasta ekkrio en la momento, kiam li ellasas sian Spiriton, estus nenio alia krom vana ŝajnigo, celanta trompi pri lia naturo kaj kredigi pri ia iluzia ofero de lia vivo, per komedio malinda je simple honesta homo, do des pli prave malinda je tiel supera estulo. Unuvorte: li estus ekspluatinta la konfidon de siaj samtempuloj kaj de la posteularo. Tiaj estas la logikaj sekvoj de tiu sistemo,

sekvoj ja ne akcepteblaj, ĉar, anstataŭ lin altigi, ili lin morale malaltigus.¹

67. – Ne estas nova tiu ideo pri la naturo de la korpo de Jesuo. En la kvara jarcento, Apolinario el Laodikeo, estro de la sekto de *apolinaristoj*, predikis, ke Jesuo ne prenis al si korpon kiel la nia, sed korpon *nesensivan*, kiu malsuprenvenis de la ĉielo en la sinon de la sankta Virgulino, kaj ne estis de ŝi naskita; ke, pro tio, Jesuo naskiĝis, suferis kaj mortis nur *ŝajne*. La apolinaristoj estis anatemitaj de la Koncilio en Aleksandrio, en 360; de tiu en Romo, en 374; kaj de tiu en Konstantinopolo, en 381.

La saman kredon konfesis la *Docetistoj* (el la greka *dokein*, ŝajni), multnombra sekto el la *Gnostikuloj*, kiu ekzistis dum la tri unuaj jarcentoj.²

¹ *Noto de la Brazila Spiritisma Federacio al sia portugallingva eldono:* ĉe la komunikiĝoj kaj fenomenoj aperintaj post la forpaso de Kardec, oni konkludis, ke efektive ne estis vana ŝajnigo, krom ankaŭ ne estis vana ŝajnigo fare de Jesuo, kiam li, post sia morto, eldiras jenajn vortojn, registritajn de Luko (24:39): – “Ĝi estas mi mem; palpu min kaj vidu; ĉar Spirito ne havas karnon kaj ostojn, kiel vi vidas min havanta.”

² *Noto de la Brazila Spiritisma Federacio al sia portugallingva eldono:* – Estis anatemitaj ne nur la apolinaristoj sed ankaŭ la kredantoj en la reenkarniĝo kaj tiuj, kiuj komunikiĝas kun la mortintoj.

LA ANTAŬDIROJ LAŬ SPIRITISMO

ĈAPITRO XVI

TEORIO DE LA ANTAŬSCIO

1. – Kiel eblas la konado de la estonteco? Oni komprenas la antaŭvidon de okazaĵoj, kiuj rezultus el la nuntempo, sed ne de tiuj, kiuj havus nenian rilaton al ĝi, des malpli de tiuj, kiujn oni atribuas al la hazardo. La estontaĵoj, oni diras, ne ekzistas; ili ankoraŭ troviĝas en la nenio; kiel do scii, ke ili okazos? Sed la ekzemploj de efektiviĝintaj antaŭdiroj estas tre multenombraj, el kio oni nepre devas konkludi, ke temas pri fenomeno, kies ŝlosilon oni ne havas, ĉar ja ne estas efiko sen ia kaŭzo. Tiun kaŭzon ni provos serĉi, kaj estas ankoraŭ Spiritismo, en si mem la ŝlosilo de tiom multe da misteroj, kiu al ni ĝin liveros kaj krome montros al ni, ke eĉ la antaŭdiroj ne okazas ekster la naturaj leĝoj.

Ni prenu, por komparo, ekzemplon ĉe la ordinaraĵaj aferoj. Ĝi helpos nin kompreni la principon, kiun ni devos elvolvi.

2. – Ni supozu, ke homo staras sur la supro de alta monto, observante la vastan etendaĵon de la ebena. En tiu pozicio, unuleŭga spaco montriĝos malgranda al li, kiu povos facile, per unu ekrigardo, ĉirkaŭpreni ĉiujn malebenaĵojn de la tereno, inter ambaŭ ekstremoj de la vidata vojo. La vojaĝanto, kiu la unuan fojon iras sur tiu vojo, scias, ke, marŝante, li atingos la celon, kio estas nura antaŭvido de la sekvoj de lia marŝo. Sed la malebenaĵoj de la tereno, la supreniroj kaj malsupreniroj, la riveroj, kiujn li devos transpasi, la arbaretoj, kiujn li devos trairi, la krutegaĵoj, en kiujn li povos fali, la banditoj gvatantaj por lin prirabi, la gastamaj domoj, en kiuj li povos ripozi, ĉio tio ne dependas de lia persono, estas por li la nekonataĵo, la estonteco, ĉar lia vido ne atingas trans la malgrandan rondon ĉirkaŭ li. Koncerne la daŭron, li ĝin mezuras laŭ la tempo, kiun li uzas por trapasi la vojon. Forprenu de li la referencajn punktojn, kaj malaperos la daŭro. Al homo, staranta sur la montsupro kaj akompananta la vojaĝanton per la rigardo, ĉio tio montriĝas kiel nuno. Ni supozu, ke tiu homo malsupreniras apud la vojaĝanton kaj diras al li: “En tiu tempo vi renkontos tiaĵon, vi estos atakata kaj helpata.” Li do antaŭdiras la estontecon; sed ĝi estas estonteco por la vojaĝanto; por la homo sur la monto la estonteco estas nuno.

3. – Se ni nun eliras el la rondo de la pure materialaj aferoj kaj eniras, per la penso, en la sferon de la spirita vivo, ni vidos tiun fenomenon okazi en pli granda skalo. La senmateriigintaj Spiritoj estas kiel la homo sur la monto; spaco kaj

daŭro ne ekzistas por ili. Sed la atingpovo kaj la penetrivo de ilia rigardo estas proporciaj al ilia pureco kaj al ilia rango en la spirita hierarkio. Rilate al la malsuperaj Spiritoj ili estas kvazaŭ homo provizita per potenca teleskopo apud alia homo disponanta nur siajn okulojn. Ĉe la malsuperaj Spiritoj la vidado estas limita ne nur tial, ke ili tre malfacile povas foriĝi de la globo, al kiu ili estas ligitaj, sed ankaŭ ĉar la krudeco de iliaj perispiritoj al ili vualas la malproksimajn objektojn, same kiel nebulego ilin kaŝas antaŭ korpaj okuloj.

Oni komprenas do, ke, laŭ sia grado de progreso, iu Spirito povus ĉirkaŭpreni kelkjaran, kelkjarcentan, eĉ plurjar-milan periodon, ĉar kio ja estas jarcento antaŭ la senfino? La okazaĵoj ne sinsekve elvolviĝas antaŭ li, kiel la survojaj incidentoj antaŭ la vojaĝanto; li samtempe vidas la komencon kaj la finon de la periodo; ĉiuj okazaĵoj, kiuj, en tiu periodo, prezentas la estontecon por la surtera homo, montriĝas kiel nuno por la Spirito, kiu do povos veni diri al ni kun certeco: Tio okazos en tiu tempo, ĉar li vidas ĝin, same kiel la homo sur la monto vidas tion, kio atendas la vojaĝanton sur la vojo. Se li ne tiel agas, tio estas tial, ke la konado de la estonteco povus malutili la homon; ĝi povus malhelpi al li la liberan volon, lin paralizi ĉe la laboro, kiun li devas plenumi por progresi. Restante nekonataj, la bono kaj la malbono, kiuj lin atendas, konsistigas al li provon.

Se tia kapableco, eĉ limita, povas alkalkuliĝi al la atributoj de kreito, kian gradon de potenco ĝi povas atingi ĉe la Kreinto, kiu ĉirkaŭprenas la senfinon? Por la Kreinto tempo ne ekzistas: la komenco kaj la fino de la mondoj montriĝas al li kiel nuno. En tiu senmezura panoramo, kio ja estas la vivodaŭro de homo, de generacio, de popolo?

4. – Sed ĉar la homo devas kunagi por la ĝenerala progreso, kaj certaj faktoj devas rezulti el lia kunlaboro, tial povas esti utile, ke, en apartaj okazoj, li antaŭsentu tiujn faktojn, por al ĉi tiuj prepari la vojon kaj mem esti preta agi, kiam alvenos la momento. Jen kial Dio iafoje permesas, ke unu anguleto de la vualo estu levita; sed ĉiam por nepre utila celo, neniam por kontentigi vanan scivolemon. Tia misio povas do esti komisiata ne al ĉiuj Spiritoj, ĉar estas multaj, kiuj konas la estontecon ne pli ol la homoj, sed al kelkaj Spiritoj sufiĉe progresintaj por ĝin plenumi. Nu, estas rimarkinde, ke tiaspecaj revelacioj ĉiam estas spontane faritaj, sed neniam, aŭ almenaŭ tre malofte, kiel respondo al rekta demando.

5. – Tiu misio ankaŭ povas esti komisiata al certaj homoj ĉi-maniere:

Tiu, al kiu estas konfidita la tasko revelacii kaŝitaĵon, povas pretervole ricevi pri ĝi la inspiron de la Spiritoj, ĝin konantaj, kaj ĝin maŝine kaj preterkonscie transigi. Oni cetere scias, ke tiel dum dormo kiel dum maldormo, ĉe la ekstazoj de duobla vidado, la animo liberiĝas kaj ekhavas, en pli aŭ malpli alta grado, la kapablojn de libera Spirito. Se li estas progresinta Spirito, se li precipe, same kiel la profetoj, ricevis mision speciale koncernantan tiun celon, li, en la momentoj de anima libereco, ĝuos la kapablon per si mem ĉirkaŭpreni pli aŭ malpli longan periodon, kaj vidos, kiel nunajon, la okazaĵojn de tiu periodo. Li tiam povas sammomente ilin revelacii, aŭ konservi ties memoron ĉe la vekigo. Se tiuj okazaĵoj devas konserviĝi en sekreto, li ne tenos memoron pri ili aŭ restos ĉe li nur ia svaga intuicio, sufiĉa por lin instinkte gvidi.

6. – Kaj tial oni vidas, ke tiu kapablo providence disvolviĝas en certaj okazoj, nome ĉe tuja danĝero, grandaj

katastrofoj, revolucioj, kaj ke la pliparto el la persekutataj sektoj ekhavas multnombrajn antaŭvidistojn. Ankaŭ tial oni vidas grandajn kapitanojn senhezite marŝi kontraŭ la malamikon kun certeco pri la venko; geniulojn, kiel ekzemple Kristoforo Kolumbo, strebi al ia celo, antaŭanoncante, por tiel diri, la momenton, en kiu ili ĝin atingos. Tiel fariĝis, ĉar ili ja vidis tiun celon, kiu ne estis nekonataĵo por iliaj Spiritoj.

La kapablo por antaŭdiro neniel estas do supernatura, ne pli ol amaso da aliaj fenomenoj. Ĝi baziĝas sur la proprecoj de la animo kaj sur la leĝo reganta la rilatojn inter la videbla kaj la nevidebla mondo, kiun leĝon Spiritismo venis konigi.

La teorio de la antaŭscio eble ne solvas, en absoluta maniero, ĉiujn okazojn de antaŭdiro de la estonteco, sed oni ne povas ne konsenti, ke al ĉi tiu ĝi starigas la fundamentan principon.

7. – Ofte, la personoj dotitaj per la kapablo antaŭvidi, ĉu en stato ekstaza, ĉu en stato somnambula, vidas la okazaĵojn desegniĝi kvazaŭ sur bildo, kion ankaŭ povus klarigi la fotografio de la penso. Ĉar la penso trairas la spacon, same kiel la sonoj trairas la aeron, tial iu okazontaĵo, kiu troviĝas en la penso de la Spiritoj laborantaj por ĝia efektiviĝo, aŭ en la penso de la homoj, kies agoj devas ĝin estigi, povas, tiu okazontaĵo, formi ian imagon por la antaŭvidanto; sed ĉar ĝia efektiviĝo povas esti plifruigita aŭ prokrastita de ia kuntrafiĝo de cirkonstancoj, la antaŭvidanto vidas la fakton, ne povante precizigi la momenton, en kiu ĝi fariĝos. Tiu penso iafoje estas nenio alia krom ia projekto, ia deziro, kiuj eble ne konkretiĝos, kaj de tio venas la oftaj eraroj pri faktoj kaj datoj ĉe la antaŭdiroj. (Ĉap. XIV, n-ro 13 kaj sekvantaj.)

8. – Por kompreni la spiritajn aferojn, tio estas, por al si fari pri ili ideon tiel klaran kiel tiu, kiun oni faras pri pejzaĝo antaŭ siaj okuloj, efektive mankas al la homo ia senso, tute same kiel al blindulo mankas la senso necesa por tio, ke li senkontakte komprenu la efikojn de la lumo, de la koloroj kaj de la vidado. El tio rezultas, ke tiun komprenon ni atingos nur per penado de la imago kaj helpe de komparoj kun aferoj al ni familiaraj. Sed materialaj aferoj povas doni pri spiritaj aferoj nur tre neperfektajn ideojn, pro kio tiujn komparojn oni devas ne preni laŭlitere, kaj do ne kredi, ekzemple, ke la amplekso de la perceptaj kapabloj de la Spiritoj dependas de ilia efektiva leviĝo kaj ke ili bezonas stari sur monto aŭ super la nuboj por ĉirkaŭpreni la tempon kaj la spacon.

Tia kapablo estas esence propra al la stato de spiritiĝo, aŭ, se oni volas, de senmateriigo, tio estas, la spiritiĝo estigas efikon, kiun oni povas kompari, kvankam tre neperfekte, kun la ĉirkaŭprena vido de homo staranta sur montsupro. Tiu komparo nur celis montri, ke okazaĵoj, kiuj por unuj apartenas al la estonteco, tamen por aliaj troviĝas en la nuno kaj povas do esti antaŭdirataj, kio ne signifas, ke la efiko sammaniere fariĝas.

Por ĝui tiun percepton, la Spirito do ne bezonas translokiĝi al iu punkto en la spaco. Povas ĝin havi, en ties tuta pleneco, tiu, kiu sur la Tero apudestas al ni, tiel same kiel se li troviĝus mil leŭgojn malproksime, dum ni nenion vidas trans la videbla horizonto. Ĉar la vido ĉe la Spiritoj ne fariĝas sammaniere nek per samaj elementoj kiel ĉe la homo, tial tute alia estas ilia videbla horizonto. Nu, ĝuste tiu senso al ni mankas, por ke ni ĝin prezentu al ni. *Spirito apud enkarnulo estas kvazaŭ vidanto apud blindulo.*

9. – Krom tio, ni devas konsideri, ke tiu percepto ne limiĝas al la etendaĵo, sed ampleksas la penetradon de ĉiuj aferoj. Ĝi estas, ni ripetas, kapablo esence propra kaj proporcia al la stato de senmateriigo. La enkarniigo ĝin malakrigas sed ne tute nuligas, ĉar la animo ne estas enfermita en la korpo kvazaŭ en kesto. La enkarniiginto ĝin posedas kvankam ĉiam en malpli alta grado ol tiam, kiam li troviĝas tute liberiĝinta; ja ĉi tio havigas al certaj homoj ian penetrivon, kiu tute mankas ĉe aliaj, ian pli grandan akrecon de la morala vidado, pli facilan komprenon de la ekstermaterialaj aferoj.

La enkarniiginta Spirito ne nur perceptas sed ankaŭ memoras, kion li vidis en stato de libera Spirito, kaj tiu memoro estas kvazaŭ bildo, kiu redesejniĝas en lia menso. Dum la enkarniigo, li vidas, sed malprecize, kvazaŭ tra ia vualo; en stato de libereco, li klare vidas kaj konceptas. *La principo de la vidado ne estas ekstera al li, sed en li*; jen kial li ne bezonas nian eksteran lumon. Pro la morala disvolviĝo, vastiĝas la rondo de la ideoj kaj de la konceptado; pro la laŭgrada senmateriigo de la perispirito, ĉi tiu puriĝas el la krudaj elementoj, kiuj malhelpis la delikatecon de la perceptoj, kio faciligas la komprenon pri tio, ke la ampleksiĝo de ĉiuj kapabloj akompanas la progreson de la Spirito.

10. – Estas ĝuste la grado de amplekseco de liaj fakultoj, kiu, dum la enkarniigo, faras la Spiriton pli aŭ malpli kapabla por koncepti la spiritajn aferojn. Sed tiu kapableco ne estas nepra sekvo de la disvolviĝo de la intelekto; la vulgara scienco ne havigas ĝin; ja pro tio oni vidas homojn kun vasta sciado tiel same blindajn rilate al spiritaj aferoj, kiel aliaj tiaj estas rilate al materialaj aferoj; ili emas kontraŭstari, ĉar tiajn aferojn ili ne komprenas kaŭze de tio, ke ilia progreso ankoraŭ ne kompletiĝis en ĉi tiu rilato, dum oni vidas personojn kun

vulgaraj instruiteco kaj inteligenteco, kiuj ilin kaptas kun granda facileco, kio pruvas, ke pri tiuj aferoj ili jam antaŭe havis ian intuicion. Ĝi estas, ĉe ili, ia retrospektiva memoro pri tio, kion ili vidis kaj sciis, ĉu en la spirita vaganteco, ĉu dum siaj antaŭaj ekzistadoj, same kiel ĉe aliaj estas intuicio pri la lingvoj kaj sciencoj, kiujn ili antaŭe sciis.

11. – Koncerne la estontecon de Spiritismo, la Spiritoj, kiel oni scias, unuanime asertas ĝian proksiman triumfon, malgraŭ la baroj, kiujn oni kontraŭmetas al ĝi. Facile estas al ili ĝin antaŭdiri, unue ĉar ĝia disvastigo estas ilia persona verko: kunhelpante por tiu movado, aŭ ĝin direktante, ili sekve scias, kion ili devas fari; due, al ili sufiĉas ĉirkaŭpreni mallongdaŭran periodon, en kiu ili vidas la plej povajn helpantojn, kiujn Dio estigas al ili kaj kiuj baldaŭ manifestiĝos.

Kvankam ne estante Spiritoj, la spiritistoj sin transportu je nur tridek jarojn antaŭen, en la sinon de la nun leviganta generacio; de tie, ili konsideru tion, kio nuntempe okazas kun Spiritismo; ili akompanu ĝian progresan iradon, kaj ili vidos konsumiĝi en vanaj klopodoj tiujn, kiuj kredas esti vokitaj por ĝin renversi. Ili vidos tiujn iom post iom malaperi el la scenejo kaj samtempe kreskadi la arbon, kies radikoj kun ĉiu tago ĉiam pli etendiĝas.

12. – La vulgaraj okazaĵoj de la privata vivo ofte estas sekvo de la maniero kiel ĉiu agas: unu, per siaj kapabloj, lerteco, persistado, prudento kaj energio sukcesos tie, kie alia fiaskos pro sia malkapableco; tial oni povas diri, ke ĉiu estas mem la konstruanto de sia estonteco, kiu neniam estas submetita al ia blinda fatalo ne dependa de lia personeco. Konante la karakteron de iu individuo, oni povas facile antaŭdiri la sorton, kiu lin atendas sur la vojo, kiun li sekvas.

13. – La okazaĵoj koncernantaj ĝeneralajn interesojn de la homaro estas direktataj de la Providenco. Kiam io troviĝas en la projektoj de Dio, ĝi malgraŭ ĉio nepre plenumiĝos, per tia aŭ alia rimedo. Kvankam la homoj kunhelpas por ĝia efektiviĝo, tamen neniu estas por tio nepre necesa, ĉar alie Dio mem troviĝus sub la dependeco de siaj kreitoj. Se mankos tiu, kiun koncernas la misio plenumi ĝin, iu alia estos komisiita. Ne ekzistas fatala misio; la homo ĉiam havas la liberecon plenumi, aŭ ne, tiun, kiu al li estis komisiita kaj kiun li volonte akceptis. Se li ĝin ne plenumas, li perdas ĝian bonon kaj respondas pri la prokrastoj, kiuj povus rezulti el lia neglektado aŭ el lia malvolonto. Se li stariĝas kiel baro al ĝia plenumiĝo, Dio povas lin forblovi.

14. – Certa povas do esti la elplenumiĝo de ia okazaĵo, ĉar ĝi troviĝas en la planoj de Dio; sed ĉar la detaloj kaj la manieroj de plenumado dependas de la cirkonstancoj kaj de la libera volo de l' homoj, tial la vojoj kaj la rimedoj povas esti eventualaj. La Spiritoj povas, se utile al ni, antaŭsentigi la tuton; sed, por precizigi lokon kaj daton, necesus al ili antaŭe koni la decidon prenotan de tiu aŭ tiu alia individuo. Nu, se tiu decido ankoraŭ ne troviĝas en lia menso, ĝi povos, laŭ sia direkto, rapidigi aŭ prokrasti la efektiviĝon, aliigi la neĉefajn manierojn de agado, tamen ĉiam kondukante al sama rezultato. Tiel, ekzemple, la Spiritoj povas, laŭ la tutaj de la cirkonstancoj, antaŭdiri, ke iu milito pli aŭ malpli frue okazos, ke ĝi estas neevitebla, tamen ne povante antaŭdiri la tagon de ĝia komenco, nek la detalajn incidentojn, kiujn la homa volo povus ŝanĝi.

15. – Por precizigi la tempon de estontaj okazaĵoj, estos krome necese preni en kalkulon iun cirkonstancon esence ligitan al la naturo mem de la Spiritoj.

La tempo, same kiel la spaco, ne povas esti mezurata alie, ol helpe de punktoj por komparo aŭ por signado, kiuj ĝin dividu en kalkuleblajn periodojn. Sur la Tero, la natura divido de la tempo en tagojn kaj jarojn estas signata de la leviĝo kaj subiro de la Suno, krom ankaŭ de la daŭro de la planeda translacio. La mezurunuoj de tempo nepre diversas laŭ la mondoj, ĉar malsamaj estas la astronomiaj periodoj. Tiel, ekzemple, en Jupitero la tagoj daŭras dek surterajn horojn, kaj la jaroj pli ol dek du niamondajn.

Ĉiu mondo havas do diversan manieron kalkuli la daŭron, laŭ la naturo de siaj revoluoj. Ĉi tio jam prezentus malfacilaĵon por Spiritoj, kiuj, ne konante nian mondon, volus difini surterajn datojn. Krom tio, ekster la mondoj ne ekzistas tiaj rimedoj de kalkulado. Por Spirito, en la spaco, ne estas leviĝo nek subiro de la Suno por signi tagojn, nek perioda revoluo por signi jarojn; por li nur estas daŭro kaj spaco senfinaj. (Ĉap. VI, n-roj 1 kaj sekvantaj.) Kiu do neniam estus veninta sur la Teron, tiu nenion sciis pri niaj kalkuloj, kiuj, cetere, al li estus absolute senutilaj. Ankoraŭ pli: kiu neniam enkarniĝus en iu ajn mondo, tiu havus nenian konon pri frakcioj de daŭro. Kiam Spirito fremda al la Tero ĉi tien venas por manifestiĝi, li povas difini datojn al okazaĵoj nur se li alkonformiĝas al niaj kutimoj, kio sendube estas al li ebla, sed kion li tre ofte rigardas neutila.

16. – La Spiritoj, konsistigantaj la nevideblan loĝantaron de nia globo, en kiu ili jam vivis kaj ĉiam ankoraŭ vivas inter ni, estas nature alkonformiĝintaj al niaj kutimoj, kies memoron ili konservas en la spirita mondo. Ili sekve pli facile

povos difini datojn al estontaj okazaĵoj, se nur ili scias pri ili; sed krom la fakto, ke tio ne ĉiam estas al ili permesata, ilin ankaŭ nebligas alia kaŭzo, nome: ĉiufoje, kiam detalaj cirkonstancoj dependas de libera volo kaj de eventuala homa decido, nenia preciza dato efektive ekzistas, krom nur tiam, post kiam la okazaĵo plenumiĝis.

Jen kial detalaj antaŭdiroj ne povas havigi ian certecon kaj devas esti akceptataj nur kiel probablaj, eĉ se ili ne portus ian stampon de *efektiva suspektindeco*. Ĝuste tial la vere saĝaj Spiritoj neniam antaŭdiras por difinitaj epokoj; ili limigas sin per antaŭsentigo al ni pri la irado de la aferoj, kiujn al ni konvenas scii. Insisti por ekhavi precizajn detalojn estas sin elmeti al mistifikado de frivolaj Spiritoj, kiuj antaŭdiras ĉion, kion oni deziras, ne atentante la veron, amuziĝante per la timegoj kaj elreviĝoj, kiujn ili kaŭzas.

17. – La formo ĝis nun ĝenerale uzata por la antaŭdiroj faras el ili vere nedeĉifreblajn enigmojn. Tiu formo mistera kaj kabaleca, kies plej kompletan tipon liveras Nostradamus, donas al ili ian prestiĝon en la okuloj de la vulgarularo, kiu des pli valoraj ilin rigardas, ju pli nekompreneblaj ili montriĝas. Pro sia ambigueco ili taŭgas por tre malsamaj interpretoj, en tia maniero, ke, laŭ la senco atribuata al certaj vortoj alegoriaj aŭ konvenciaj, laŭ la maniero fari la strange komplikajn kalkulon de datoj, kaj, krome, kun ia bonvolo, oni en ili trovas preskaŭ ĉion, kion oni volas.

Kiel ajn tamen la afero estas, oni ne povas ne konsenti, ke iuj havas seriozan karakteron kaj konfuzas pro sia vereco. Verŝajne la vualita formo iam havis sian pravon de ekzisto kaj eĉ estis necesa.

Hodiaŭ aliaj estas la cirkonstancoj; la pozitiveco de la jarcento apenaŭ tolerus la orakolan lingvon. Tial la nuntempaj

antaŭdiroj ne plu prenas tiajn strangajn formojn; tiuj farataj de la Spiritoj havas nenion mistikan; ili uzas la lingvon de ĉiuj homoj, same kiel ili faris dum ili vivis surtere, ĉar ili ne ĉesis aparteni al la homaro. Ili antaŭsentigas al ni pri la estontaĵoj, personaj aŭ ĝeneralaj, kiam ĉi tio povas esti utila, laŭ la mezuro de ilia sagaceco, same kiel agus konsilantoj aŭ amikoj. Iliaj antaŭvidoj estas do pli ĝuste avertoj, nenion deprenantaj de la libera volo, ol propre antaŭdiroj, kiuj kuntrenus absolutan fatalecon. Krom tio, ilia opinio estas preskaŭ ĉiam motivita, ĉar ili ne volas, ke la homoj nuligu sian racion sub ia blinda fido, kio al ĉi tiuj permesas taksi ĝian ĝustecon.

18. – La nuntempa homaro ankaŭ havas siajn profetojn. Pli ol unu verkisto, poeto, literatoro, historiisto aŭ filozofo antaŭsentis, en siaj skriboj, la estontan iradon de la aferoj, kies efektivigon ni nun spektas.

Tiu kapablo sendube ofte fontas el la ĝusteco de juĝado, kiu deduktas la logikajn sekvojn de la estanteco; sed ankaŭ ofte ĝi rezultas el speciala senkonscia klarvidado, aŭ de ia ekstera inspiro. Kion tiaj homoj faris dum sia vivo, tion ili des pli prave kaj ĝuste povas fari en la stato de liberaj Spiritoj, kiam la spirita vidado ne plu estas nebuligita de la materio.

ĈAPITRO XVII

ANTAŬDIROJ DE LA EVANGELIO

Neniu estas profeto en sia lando. – Morto kaj pasiono de Jesuo.
Persekutado al la apostoloj. – Senpentaj urboj.
Ruinigo de la Templo kaj de Jerusalemo. – Malbeno kontraŭ la fariseoj.
Miaj vortoj ne forpasos. – La bazangula ŝtono.
Parabolo de la murdintaj vinberistoj. – Unu grego, unu paŝtisto.
Veno de Elija. – Anonco de la Konsolanto. – Dua veno de la Kristo.
Antaŭsignoj. – Viaj filoj kaj filinoj profetos. – Lasta juĝo.

Neniu estas profeto en sia lando

1. – Kaj veninte en sian patrujon, li instruis ilin en ilia sinagogo, tiel ke ili miris, kaj diris: De kie ĉi tiu viro havas tian saĝecon kaj la potenciaĵojn? – ĉu ĉi tiu ne estas la filo de la ĉarpentisto? Ĉu lia patrino ne estas nomata Maria? kaj liaj fratoj Jakobo kaj Jozefo kaj Simon kaj Judas? Kaj ĉu liaj fratinoj ne estas ĉiuj ĉe ni? De kie do li ĉion tion havas? Kaj ili ofendiĝis pro li. Sed Jesuo diris al ili: *Profeto ne estas sen honoro, krom en sia patrujo kaj en sia domo.* – Kaj pro ilia nekredemo li faris tie ne multajn potenciaĵojn. (Sankta Mateo, ĉap. XIII, par. 54 ĝis 58.)

2. – Tiel Jesuo eldiris veron, kiu fariĝis proverbo, kiu validas en ĉiuj tempoj kaj al kiu oni povus doni pli vastan sencanon, dirante, ke *neniu estas profeto dum sia vivo.*

En la komunuza lingvo, tiu maksimumo aludas la kredindecon, kiun homo ĝuas ĉe la siaj kaj ĉe tiuj, inter kiuj li vivas; la konfidon, kiun al ĉi tiuj li inspiras pro la supereco de sia sciado kaj inteligento. Ĝiaj esceptoj estas maloftaj kaj neniam absolutaj. La principo de tiu vero estas natura sekvo de la homa malforteco kaj povas esti jene klarigita:

La kutimo sin vidi, ekde la infaneco, en la ordinaraj cirkonstancoj de la vivo, estigas inter la homoj ian materialan egalecon, kiu ofte igas ilin ne rekoni moralan superecon en tiu, kies kompanoj kaj kunmanĝantoj ili estis, kiu eliris el la sama medio kiel ili kaj kies unuajn malfortaĵojn ili ĉeestis: suferas ilia orgojlo, ke ĝi devas rekoni ies superecon. Kiu ajn staras super la komuna nivelo, tiun ĉiam celas ĵaluzo kaj envio. Kiu sentas sin nekapablaj atingi lian altecon, tiuj klopodas lin malaltigi per misfamigo, klaĉado kaj kalumnio; ili des pli forte kriadas, ju malpli valoraj ili sin rigardas, kredante, ke ili sin altigas kaj lin eklipsas per sia bruado. Tia estis kaj estos la historio de la homaro tiel longe, ĝis la homoj estos komprenintaj sian spiritan naturon kaj vastigintaj sian moralan horizonton. Kaj ja tial tiu antaŭjuĝo estas karakterizaĵo de la etmensaj, vulgaraj spiritoj, kiuj ĉion rilatigas al sia persono.

Aliflanke, oni ĝenerale faras el la homoj, konataj nur laŭ ilia spirito, ian idealon, kiu kreskas kun la malproksimiĝo de la tempoj kaj lokoj. Oni deprenas de ili preskaŭ la tutan homecon; ŝajnas, ke ili ne parolis, nek sentis kiel la ceteraj homoj; ke ilia parolo kaj pensoj devis esti konstante agorditaj al sublimesco, kaj, kiuj tiel imagas, ne memoras, ke spirito ne povus resti en stato de konstanta streĉiteco kaj senĉesa supereksciteco. Ĉe la ĉiutaga kontakto en la privata vivo, oni tre ofte vidas, ke la materiala homo per nenio distingiĝas de la homo vulgara. La korpa homo, tuŝanta la sensojn, preskaŭ forviŝas la homon spiritan, kiu frapas nur la spiriton. *De malproksime, oni*

apenaŭ vidas la fulmobriilojn de la genio; de proksime, oni vidas la paŭzojn de la spirito.

Post la morto, kiam komparo ne plu eblas, nur restas la spirita homo, kiu ŝajnas des pli granda, ju pli malproksimas la memoro pri la korpa homo. Ja tial la homoj, markintaj sian pason sur la Tero per efektive valoraj verkoj, estas pli estimataj postmorte ol dumvive. Oni ilin juĝas pli senpartie, ĉar, pro la malapero de enviuloj kaj ĵaluzuloj, ne plu ekzistas personaj antagonismoj. La posteularo estas senpartia juĝisto, kiu taksas la verkon de la spirito, ĝin aprobas sen blinda entuziasmo se ĝi estas bona, ĝin malaprobas sen malbonvolo se ĝi estas malbona, flankelasante la individuon, kiu ĝin produktis.

Des malpli povis Jesuo eskapi el la sekvoj de ĉi tiu principo, esence propra al la homa naturo, ĉar ja malmulte klera estis la medio, en kiu li vivis, inter homoj tute dediĉitaj al la materiala vivo. Liaj samlandanoj vidis en li nur la filon de la ĉarpentisto, la fraton de homoj tiel malkleraj kiel ili, kaj ili sin demandis pri tio, kio povus fari lin supera al ili kaj doni al li la rajton ilin riproĉi. Vidante do, ke lia parolo havas malpli da fideindeco ĉe la siaj, kiuj lin malŝatis, ol ĉe la fremduloj, li iris prediki al tiuj, kiuj lin aŭskultos kaj ĉe kiuj li trovos simpatian.

Oni povas prezenti al si, kiajn sentojn liaj parencoj havis por li, laŭ la fakto, ke liaj fratoj mem, en akompano de lia patrino, iris al kunveno, en kiu li troviĝis, por *kapti lin*, dirante, ke li *freneziĝis*. (Sankta Marko, ĉap. III, par. 20, 21 kaj 31 ĝis 35. – *La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉap. XIV.)

Tiel, de unu flanko, la pastroj kaj la fariseoj akuzis Jesuon, ke li agas per la demono; de alia flanko, liaj pli proksimaj parencoj nomis lin frenezulo. Ĉu ne tiel same oni nuntempe agas kun la spiritistoj? Kaj ĉu ĉi tiuj devas plendi, ke iliaj samurbanoj traktas ilin ne pli bone, ol oni traktis Jesuon? Kaj kio estis neniel surpriza, antaŭ du mil jaroj, ĉe malklera

popolo, tio sama, ja tre strange, okazas en la dek-naŭa jarcento ĉe civilizitaj nacioj.

Morto kaj pasiono de Jesuo

3. – (Post la resanigo de la lunatiko). – Kaj ĉiuj miregis pro la majesto de Dio. – Sed dum ĉiuj miris pri ĉio, kion li faris, li diris al siaj disĉiploj: – Penetrigu ĉi tiujn vortojn en viajn orelojn: ĉar la Filo de homo estos transdonita en la manojn de homoj. – Sed ili ne komprenis tiun diron, kaj ĝi estis kaŝita for de ili, por ke ili ne sciu ĝian signifon; kaj ili timis demandi al li pri tiu diro. (Sankta Luko, ĉap. IX, par. 44, 45.)

4. – De post tiu tempo Jesuo komencis montri al siaj disĉiploj, ke li devas iri al Jerusalemo, kaj multe suferi ĉe la pliaĝuloj kaj ĉefpastroj kaj skribistoj, kaj esti mortigita, kaj la trian tagon releviĝi. (Sankta Mateo, ĉap. XVI, par. 21.)

5. – Kaj kiam ili kolektiĝis en Galileo, Jesuo diris al ili: La Filo de homo estos transdonita en la manojn de homoj; – kaj ili mortigos lin, kaj la trian tagon li leviĝos. Kaj ili tre malĝojis. (Sankta Mateo, ĉap. XVII, par. 22, 23.)

6. – Kaj suprenirante al Jerusalemo, Jesuo prenis la dek du disĉiplojn aparte, kaj sur la vojo li diris al ili: – Jen ni supreniras al Jerusalemo; kaj la Filo de homo estos transdonita al la ĉefpastroj kaj skribistoj; kaj ili kondamnos lin al morto, – kaj transdonos lin al la nacioj, por moki kaj skurĝi kaj krucumi; kaj la trian tagon li releviĝos. (Sankta Mateo, ĉap. XX, par. 17, 18, 19.)

7. – Kaj preninte al si la dek du, li diris al ili: Jen ni supreniras al Jerusalemo; kaj ĉio skribita per la profetoj estos plenumita al la Filo de homo. – ĉar li estos transdonita al la nacioj, kaj mokita kaj perfortita kaj surkraĉita; – kaj ili skurĝos kaj mortigos lin; kaj la trian tagon li releviĝos.

Kaj ili komprenis nenion el tio, kaj ĉi tiu parolo estis kaŝita for de ili, kaj ili ne sciis la dirojn. (Sankta Luko, ĉap. XVIII, par. 31 ĝis 34.)

8. – Kaj kiam Jesuo finis ĉiujn tiujn vortojn, li diris al siaj disĉiploj: Vi scias, ke post du tagoj okazos la Pasko, kaj la Filo de homo estos transdonita, por esti krucumita.

Tiam kunvenis la ĉefpastroj kaj la pliaĝuloj de la popolo, en la korto de la ĉefpastro, kies nomo estis Kajafas; – kaj ili konsiliĝis, por ke ili povu per ruzo kapti Jesuon, kaj mortigi lin. – Sed ili diris: Ne dum la festo, por ke ne leviĝu tumulto ĉe la popolo. (Sankta Mateo, ĉap. XXVI, par. 1 ĝis 5.)

9. – En tiu sama horo alvenis iuj Fariseoj, kaj ili diris al li: Eliru kaj foriru de ĉi tie, ĉar Herodo volas mortigi vin. – Kaj li diris al ili: Iru, kaj diru al tiu vulpo: Jen mi elpelas demonojn kaj faras sanigojn hodiaŭ kaj morgaŭ, kaj la trian tagon mi estos perfektigita. (Sankta Luko, ĉap. XIII, par. 31, 32.)

Persekutado al la apostoloj

10. – Sed gardu vin kontraŭ la homoj; ĉar ili transdonos vin al sinedrioj, kaj en siaj sinagogoj ili vin skurĝos; – kaj antaŭ provincestrojn kaj reĝojn vi estos kondukitaĵ pro mi, por atesto al ili kaj al la naciaoj. (Sankta Mateo, ĉap. X, par. 17, 18.)

11. – Ili forpelos vin el la sinagogoj; eĉ venas la horo, kiam iu, kiu mortigos vin, opinios, ke li faras servon al Dio. – Kaj tion ili faros pro tio, ke ili ne konis la Patron, nek min. – Sed tion mi parolis al vi, por ke vi rememoru, kiam ĝia tempo venos, ke mi ĝin antaŭdiris al vi. (Sankta Johano, ĉap. XVI, par. 2 ĝis 4.)

12. – Sed vi estos transdonitaj eĉ de gepatroj kaj fratoj kaj parencoj kaj amikoj; kaj iujn el vi oni mortigos. – Kaj vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo. – Kaj eĉ unu haro de via kapo ne pereos. – Per via pacienco vi akiros viajn animojn. (Sankta Luko, ĉap. XXI, par. 16 ĝis 19.)

13. – (Martirigo de Sankta Petro). Vere, vere, mi diras al vi: Kiam vi estis juna, vi zonis vin, kaj iris, kien vi volis; sed kiam vi maljuniĝos, vi etendos viajn manojn, kaj alia vin zonos, kaj portos vin, kien vi ne volos. – Tion li diris, montrante per aludo, per kia morto li gloros Dion. (Sankta Johano, ĉap. XXI, par. 18, 19.)

Senpentaj urboj

14. – Tiam li komencis riproĉi la urbojn, en kiuj estis faritaj la plej multaj el liaj potencaj faroj; ĉar ili ne pentis.

Ve al vi, Ĥorazin! Ve al vi, Betsaida! Kaj se en Tiro kaj Cidon estus faritaj tiuj potencaĵoj, kiuj estas faritaj en vi, antaŭ longe ili jam pentus en sakajo kaj cindro. – Tamen mi diras al vi: Estos pli elporteble por Tiro kaj Cidon en la tago de juĝado, ol por vi.

Kaj vi, Kapernaŭm! ĉu vi estos altigita ĝis la ĉielo? vi malsupreniĝos ĝis Hades; ĉar se en Sodom estus faritaj tiuj potencaĵoj, kiuj estas faritaj en vi, ĝi restus ĝis hodiaŭ. – Tamen mi diras al vi: Estos pli elporteble por la lando de Sodom en la tago de juĝado, ol por vi. (Sankta Mateo, ĉap. XI, par. 20 ĝis 24.)

Ruiniĝo de la Templo kaj de Jerusalemo

15. – Kaj Jesuo, elirinte, ekforiris de la templo; kaj liaj disĉiploj venis al li, por montri al li la konstruaĵojn de la templo. – Sed li responde diris al ili: ĉu vi ne vidas ĉion tion? vere mi diras al vi: Ne estos lasita ĉi tie ŝtono sur ŝtono, kiu ne estos deĵetita. (Sankta Mateo, ĉap. XXIV, par. 1, 2.)

16. – Kaj kiam li alproksimiĝis, li rigardis la urbon, kaj ploris pro ĝi, – dirante: Ho, se vi mem scius en ĉi tiu tago la aferojn apartenantajn al paco! sed nun ili estas kaŝitaj for de viaj okuloj. – ĉar venos sur vin tagoj, kiam viaj malamikoj ĉirkaŭbaros vin per palisaro, kaj ronde ĉirkaŭos vin, kaj ĉiuflanke premos vin, – kaj detruos ĝis la tero, kaj viajn infanojn en vi, kaj ne lasos en vi ŝtonon sur ŝtono, pro tio, ke vi ne sciis la tempon de via vizitado. (Sankta Luko, ĉap. XIX, par. 41 ĝis 44.)

17. – Sed mi devas iradi hodiaŭ kaj morgaŭ kaj postmorgaŭ, ĉar ne povas esti, ke profeto pereos ekster Jerusalemon.

Ho Jerusalemo, Jerusalemo, kiu pereigas la profetojn kaj ŝtonmortigas tiujn, kiuj estas senditaj al ĝi! kiom ofte mi deziris kolekti viajn infanojn, kiel kokino kolektas sian idaron sub la flugilojn, kaj vi ne volis! – Jen via domo estas lasita al vi dezerta; kaj mi diras al vi: Vi min ne vidos, ĝis vi diros: Estu benata tiu, kiu venas en la nomo de la Eternulo. (Sankta Luko, ĉap. XIII, par. 33, 34, 35.)

18. – Sed kiam vi vidis Jerusalemon ĉirkaŭitan de armeoj, tiam sciis, ke ĝia ruiniĝo alproksimiĝis. – Tiam, kiuj estas en Judujo, tiuj forkuru al la montoj; kaj kiuj estas en ĝia mezo, tiuj elmigru; kaj kiuj estas sur la kamparo, tiuj ne eniru tien. – ĉar tiuj estas tagoj de punado, por ke plenumiĝu ĉio, kio estas skribita. – Ve al la gravedulinoj kaj al la suĉigantinoj en tiuj tagoj! ĉar estos granda manko sur la tero, kaj kolero kontraŭ ĉi tiu popolo. – Kaj ili falos per tranĉando de glavo, kaj forkaptiĝos en ĉiujn naciojn; kaj Jerusalemon estos piedpremata de la nacioj, ĝis plenumiĝos la tempoj de la nacioj. (Sankta Luko, ĉap. XXI, par. 20 ĝis 24.)

19. – (Jesuo iranta al turmento). Kaj sekvis lin granda amaso de la popolo, kaj de virinoj, kiuj ĝemis kaj lamentis pro li. – Sed Jesuo, turninte sin al ili, diris: Filinoj de Jerusalemon, ne ploru pro mi, sed ploru pro vi kaj pro viaj infanoj. – ĉar jen venas tagoj, kiam oni diros: Feliĉaj estas la senfruktaj, kaj la ventroj ne naskintaj, kaj la mamoj ne nutrintaj. – Tiam oni komencos diri al la montoj: Falu sur nin; kaj al la montetoj: Kovru nin. – ĉar se oni tiel agas en la suka ligno, kiel oni agos en la seka? (Sankta Luko, ĉap. XXIII, par. 27 ĝis 31.)

20. – La kapablo antaŭsenti la estontaĵojn estas unu el la atributoj de la animo, kies klarigon donas la teorio de la antaŭscio. Jesuo ĝin posedis kiel ĉiuj ceteraj homoj, sed en eminenta grado. Li povis do antaŭvidi la okazaĵojn sekvontajn lian morton, kaj tiu fakto prezentis nenion supernaturan, ĉar ni vidas ĝin refariĝi antaŭ niaj okuloj en la plej ordinara kondiĉoj. Ne malofte iuj individuoj antaŭsciigas kun precizeco la momenton de sia morto, kaj tiel estas, ĉar ilia animo, en stato de libereco, sin trovas kvazaŭ la homo sur la monto (ĉap. XVI, n-ro1); ĝi superrigardas la irotan vojon, kies finon ĝi vidas.

21. – Des pli prave tiel devis okazi kun Jesuo, ĉar, konsciante la mision, kiun li venis plenumi, li ja sciis, ke la morto per turmento nepre estos ĝia sekvo. Tiel la spirita vidado, kiu en li estis konstanta, kiel ankaŭ la penetrivo de lia penso certe montris al li ties cirkonstancojn kaj la fatalan momenton. Pro la sama kialo, li povis antaŭvidi la ruiniĝon de

la Templo, tiun de Jerusalemo, la malfeliĉojn frapontajn ĝiajn loĝantojn kaj la disiĝon de la judoj.

Malbeno kontraŭ la fariseoj

22. – (Johano Baptisto). Kaj vidante multajn el la Fariseoj kaj Sadukeoj venantajn al lia baptado, li diris al ili: Ho vipuridoj! kiu vin avertis forkuri de la venonta kolero? – Donu do fruktojn taŭgajn por penti; – kaj ne pensu diri en vi: Ni havas Abrahamon kiel patron; ĉar mi diras al vi, ke Dio povas el ĉi tiuj ŝtonoj starigi idojn al Abraham. – Kaj jam la hakilo kuŝas ĉe la radikoj de la arboj; tial ĉiu arbo, kiu ne donas bonan frukton, estas dehakata, kaj jetata en fajron. (Sankta Mateo, ĉap. III, par. 7 ĝis 10.)

23. – Sed ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi ŝlosas la regnon de la ĉielo kontraŭ la homoj; ĉar vi mem ne eniras, nek lasas al la enirantoj eniri.

Ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi formanĝas domojn de vidinoj, kaj por preteksto vi longe preĝas; tial vi ricevos pli severan kondamnon.

Ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi ĉirkaŭiras maron kaj teron, por varbi unu prozeliton; kaj kiam li tia fariĝis, vi lin faras filo de Gehena, duoble kiom vi mem.

Ve al vi, blindaj gvidantoj! kiuj diras: Se iu ĵuras per la sanktejo, tio estas nenio; sed kiu ĵuras per la oro de la sanktejo, tio estas ŝuldanto. – Vi malsaĝaj kaj blindaj! ĉar kio estas pli granda, la oro, aŭ la sanktejo, kiu sanktigas la oron? – Kaj: Se iu ĵuras per la altaro, tio estas nenio; sed kiu ĵuras per la ofero, kuŝanta sur ĝi, tio estas ŝuldanto. – Vi blinduloj! ĉar kio estas pli granda, la ofero, aŭ la altaro, kiu sanktigas la oferon? – Tiu do, kiu ĵuras per la altaro, ĵuras per ĝi, kaj per ĉio, kuŝanta sur ĝi. – Kaj tiu, kiu ĵuras per la sanktejo, ĵuras per ĝi, kaj per Tiu, kiu loĝas en ĝi. – Kaj tiu, kiu ĵuras per la ĉielo, ĵuras per la trono de Dio, kaj per Tiu, kiu sidas sur ĝi.

Ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi pagas dekonaĵojn de mento kaj de anizo kaj de kumino, kaj forlasis la pli gravajn aferojn de la leĝo: juĝon kaj kompaton kaj fidon. Sed ĉi tiujn vi devus fari, kaj la aliajn ne preterlasi. – Vi blindaj gvidantoj! kiuj elkribras la kulon kaj glutas la kamelon.

Ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi purigas la eksteron de la kaliko kaj de la plado; sed interne ili estas plenaj de rabado kaj malmalmodereco. – Vi blinda Fariseo! purigu unue la internon de la kaliko kaj de la plado, por ke ilia ekstero ankaŭ fariĝu pura.

Ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi similas al tomboj blankigitaj, kiuj ekstere ŝajnas belaj, sed interne estas plenaj de ostoj de mortintoj kaj de ĉia malpureco. – Tiel ankaŭ vi ekstere ŝajnas justaj antaŭ homoj, sed interne vi estas plenaj de hipokriteco kaj maljusteco.

Ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi konstruas la tombojn de la profetoj kaj ornamas la monumentojn de la justuloj, kaj diras: – Se ni vivus en la tagoj de niaj patroj, ni ne partoprenus kun ili en la sango de la profetoj. – Tial vi atestas pri vi mem, ke vi estas filoj de tiuj, kiuj mortigis la profetojn. – Vi do plenigu la mezuron de viaj patroj. – Serpentoj, vipuridoj! kiel vi povos eviti la juĝon de Gehena? – Jen do mi sendas al vi profetojn kaj saĝulojn kaj skribistojn; iujn el ili vi mortigos kaj krucumos, kaj aliajn el ili vi skurĝos en viaj sinagogoj kaj persekutos de urbo al urbo; – por ke venu sur vin la tuta justa sango elversita sur la teron, de la sango de la justulo Habel ĝis la sango de Zeĥarja, filo de Bereĥja, kiun vi mortigis inter la sanktejo kaj la altaro. – Vere mi diras al vi: ĉio tio venos sur ĉi tiun generacion. (Sankta Mateo, ĉap. XXIII, par. 13 ĝis 36.)

Miaj vortoj ne forpasos

24. – Tiam veninte, la disĉiploj diris al li: ĉu vi scias, ke la Fariseoj ofendiĝis, kiam ili aŭdis tiun diron? – Sed li responde diris: ĉiu kreskaĵo, kiun mia ĉiela Patro ne plantis, estos elradikigita. – Lasu ilin; ili estas blindaj kondukantoj de blinduloj. Kaj se blindulo kondukos blindulon, ambaŭ falos en fosajon. (Sankta Mateo, ĉap. XV, par. 12, 13, 14.)

25. – La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos. (Sankta Mateo, ĉap. XXIV, par. 35.)

26. – La vortoj de Jesuo ne forpasos, ĉar ili estos veraj en ĉiuj tempoj. Eterna estos lia morala kodo, ĉar ĝi enhavas la kondiĉojn de la bono, kiu kondukas la homon al sia eterna destino. Sed ĉu liaj vortoj venis al ni puraj de ĉia makulo kaj de falsaj interpretoj? Ĉu ĉiuj kristanaj sektoj kaptis ilian spiriton? Ĉu neniu ilin deturnis de la vera senco pro antaŭjuĝoj kaj nescio pri la leĝoj de la Naturo? Ĉu neniu faris el ili ian instrumenton de superregado, kiu servus al iliaj ambicio kaj

materialaj interesoj, ian ŝtupon ne por leviĝi al la ĉielo, sed por leviĝi sur la Tero? Ĉu ĉiuj prenis, kiel regulon de konduto, la praktikadon de la virtoj, kiun Jesuo starigis kiel nepran kondiĉon de savo? Ĉu ĉiuj estas liberaj de la riproĉoj, kiujn li adresis siatempe al la fariseoj? Ĉu ĉiuj fine estas, teorie kaj praktike, pura esprimo de lia doktrino?

Estante unusola, la vero ne povas troviĝi en interkontraŭaj asertoj, kaj Jesuo ne volis doni duoblan sencan al siaj vortoj. Se do la diversaj sektoj sin kontraŭdiras; se unuj rigardas vera, kion aliaj kondamnas kiel herezon, neeble estas, ke ĉiuj esprimas la veron. Se ĉiuj estus kaptintaj la veran sencan de la evangelia instruado, ĉiuj estus kolektiĝintaj sur la saman terenon kaj ne ekzistus sektoj.

Kio ne forpasos, tio estas la vera senco de la vortoj de Jesuo; *kio forpasos*, tio estas la konstruaĵo, kiun la homoj starigis sur la falsa senco de ili donita al tiuj samaj vortoj.

Ĉar la misio de Jesuo estas porti al la homoj la penson de Dio, nur lia *pura* doktrino povas esti la esprimo de tiu penso. Jen kial li diris: *ĉiu kreskaĵo, kiun mia ĉiela Patro ne plantis, estos elradikigita.*

La bazangula ŝtono

27. – Jesuo diris al ili: ĉu vi neniam legis en la Skriboj: Ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj, fariĝis ŝtono bazangula: De la Eternulo ĉi tio fariĝis, kaj ĝi estas miraklo en niaj okuloj? – Tial mi diras al vi: La regno de Dio estos prenita for de vi, kaj estos donita al nacio, kiu liveros ĝiajn fruktojn. – Kaj kiu falas sur tiun ŝtonon, tiu rompiĝos; sed sur kiun ĝi falos, ĝi tiun polvigos.

Kaj la ĉefpastroj kaj la Fariseoj, aŭdinte liajn parabolojn, komprenis, ke li parolas pri ili. – Kaj celante kapti lin, ili timis la popolon, ĉar oni opiniis lin profeto. (Sankta Mateo, ĉap. XXI, par. 42 ĝis 46.)

28. – La vorto de Jesuo fariĝis la bazangula ŝtono, tio estas, la ŝtono de plifirmigo de la nova konstruaĵo de la leĝo,

starigita sur la ruinoj de la malnova. Ĉar la judoj, la ĉefpastroj kaj la fariseoj malŝatis tiun vorton, ĝi ilin polvigis, same kiel ĝi polvigos tiujn, kiuj poste ignoris ĝin, aŭ falsis ĝian sencon profite al sia ambicio.

Parabolo de la murdintaj vinberistoj

29. – Estis viro dommastro, kiu plantis vinberĝardenon, kaj ĉirkaŭmetis plektobarilon, kaj fosis en ĝi vinpremejon, kaj konstruis turon, kaj luigis ĝin al kultivistoj, kaj forvojaĝis.

Kaj kiam alproksimiĝis la sezono de fruktoj, li sendis siajn sklavojn al la kultivistoj, por ricevi siajn fruktojn. – Kaj la kultivistoj, kaptinte liajn sklavojn, skurĝis unu, kaj mortigis alian, kaj ŝtonbatis alian. – Li sendis ankoraŭ aliajn sklavojn, pli multajn ol la unuaj; kaj ili faris al ili tiel same. – Sed poste li sendis al ili sian filon, dirante: Ili respektos mian filon. – Sed la kultivistoj, vidante la filon, diris inter si: ĉi tiu estas la heredonto; venu, ni lin mortigu, kaj prenu lian heredajon. – Kaj ili kaptis lin, elĵetis lin el la vinberejo, kaj mortigis lin.

Kiam do venos la sinjoro de la vinberejo, kion li faros al tiuj kultivistoj? – Ili diris al li: Tiujn malbonulojn li mizere pereigos, kaj li luigos la vinberejon al aliaj kultivistoj, kiuj donos al li la fruktojn en iliaj sezonoj. (Sankta Mateo, ĉap. XXI, par. 33 ĝis 41.)

30. – La dommastro estas Dio; la vinberĝardeno, kiun li plantis, estas la leĝo, kiun li starigis; la kultivistoj, al kiuj li luigis la vinberĝardenon, estas la homoj, kiuj devas instrui kaj praktiki la leĝon; la sklavoj, kiujn li sendis al ili, estas la profetoj, kiujn ili pereigis; lia filo, kiun li laste sendis, estas Jesuo, kiun ili same pereigis. Kiel do la Sinjoro traktos siajn komisiitojn, rompintojn de la leĝo? Li traktos ilin tiel same, kiel ili traktis liajn senditojn, kaj li sendos voki aliajn luontojn, kiuj donu al li pli bonan kalkulon pri lia havo kaj pri la kondukado de lia grego.

Tiel okazis al la skribistoj, ĉefpastroj kaj fariseoj; tiel estos, kiam li venos por denove peti de ĉiu kalkulon pri tio, kion ĉiu faris el lia doktrino; li forprenos aŭtoritaton de ĉiu, kiu

ĝin misuzis, ĉar li deziras, ke lia kultivejo estu administrata konforme al lia volo.

Post dek ok jarcentoj, atinginte la plenaĝon, la homaro estas sufiĉe matura, por kompreni tion, kion la Kristo apenaŭ tuŝis, ĉar tiam, kiel li mem diris, ili ĝin ne komprenus. Nu, al kiu rezultato venis tiuj, kiuj dum tiu longa periodo, estis ŝarĝitaj per la edukado de la homaro? Al tiu, nome ke la indiferento anstataŭis fidon kaj nekredemo stariĝis kiel doktrino. En neniu alia epoko, efektive, skeptikismo kaj neado estis pli dissemitaj en ĉiuj klasoj de la socio.

Sed se kelkaj vortoj de la Kristo troviĝas sub la vualo de alegorio, tamen koncerne kondutregulon, interhomajn rilatojn, moralajn principojn, el kiuj li faris nepran kondiĉon de savo, liaj instruoj estas klaraj, eksplicitaj, tute ne ambiguaj. (*La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉap. XV.)

Kion oni faris el liaj maksimumoj pri karitato, amo kaj toleremo? el la rekomendoj, kiujn li faris al siaj apostolo, ke ili konvertu la homojn per *mildeco kaj persuado*; el la simpleco, humileco, neprofitemo kaj el ĉiuj virtoj, kiujn li ekzemplis? En lia nomo, la homoj sin reciproke anatemas kaj malbenas; ili sin ekzekutis en la nomo de tiu, kiu diris: ĉiuj homoj estas fratoj. El Dio senfine justa, bona kaj indulgema, oni faris ian Dion ĵaluzan, kruelan, venĝeman kaj partian; al tiu Dio de paco kaj vero oni oferis sur ŝtiparoj, per torturoj kaj persekutoj, multe pli granda nombro da viktimoj, ol en ĉiuj tempoj la paganoj oferis al siaj falsaj dioj; oni vendis preĝojn kaj ĉielajn favorojn en la nomo de tiu, kiu forpelis la vendantojn el la Templo kaj kiu diris al siaj disĉiploj: Donace vi ricevis, donace donu.

Kion dirus la Kristo, se li hodiaŭ vivus inter ni? Se li vidus siajn reprezentantojn avidantaj honorojn, riĉaĝojn, la povon kaj lukson de la mondaj princoj, dum li, estante reĝo pli ĝuste ol ĉiuj surteraj reĝoj, eniris Jerusalemon, rajdante sur

azeno? Ĉu li ne rajtus diri al ili: Kion vi faris el miaj instruoj, vi, kiuj incensas al la ora bovido, kiuj dediĉas la pliparton de viaj preĝoj al la riĉuloj kaj nur magran parton al la malriĉuloj, kvankam mi ja diris al vi: La unuaj estos la lastaj, kaj la lastaj estos la unuaj en la regno de la ĉielo? Sed, se ne en karno, li estas inter ni en Spirito, kaj, kiel la dommastro de la parabolo, li venos peti kalkulon de la kultivistoj pri la frukto de sia vinberejo, kiam alvenos la tempo de la rikolto.

Unu grego, unu paŝtisto

31. – Kaj aliajn ŝafojn mi havas, kiuj ne estas de ĉi tiu gregejo; ilin ankaŭ mi devas alkonduki, kaj ili aŭskultos mian voĉon; kaj estos unu grego, unu paŝtisto. (Sankta Johano, ĉap. X, par. 16.)

32. – Per tiu vortoj, Jesuo klare anoncas, ke la homoj iam kolektiĝos en unu solan kredon. Sed kiel povos efektiviĝi tiu kolektiĝo? Ĝi ŝajnas malfacila afero, se oni konsideras la diferencojn inter la religioj, la antagonismon, kiujn ili nutras inter siaj adeptoj, ilian obstinon sin rigardi ekskluzivaj posedantoj de la vero. Ĉiuj volas la unuecon, sed ĉiu flatas al si, ke tiu unueco fariĝos por ĝia sola profito, kaj neniu konsentas fari cedojn koncerne siajn kredojn.

Sed la unueco fariĝos en religio tiel same kiel ĝi emas fariĝi socie, politike, komerce, pro la disfalo de la baroj apartigantaj la popolojn, per la asimiliĝo de la kutimoj, moroj kaj lingvoj.¹ La popoloj de la tuta mondo jam interfratiĝas, same kiel provincoj de unu sama imperio. Oni antaŭsentas

¹ *Nota de la Brazila Spiritisma Federacio al sia portugallingva eldono* – Kardec antaŭsentis la forigon de la lingvaj baroj dudek jarojn antaŭ la apero de Esperanto, kiam Zamenhof havis nur sep jarojn. Tiu profetaĵo nun plenumiĝas antaŭ niaj okuloj ĉe la konstanta progreso de Esperanto.

tiun unuecon, oni deziras ĝin. Ĝi efektiviĝos pro la forto de la aferoj, ĉar ĝi ja fariĝos necesa, por ke streĉiĝu la frateco-ligiloj inter la nacioj; ĝi plenumiĝos per la disvolviĝo de la homa racio, kiu vidigos la bagatelecon de tiuj malkonsentoj; per la progreso de la sciencoj, kiu ĉiutage elmontras la materialajn erarojn, sur kiuj sidas tiuj malkonsentoj, kaj kiu iom post iom deigas la koroditajn ŝtonojn de ties vicoj. Disbatante tion, kio en la religioj estas homa verko, frukto de ilia nescio pri la leĝoj de la Naturo, la Scienco tamen, malgraŭ la opinio de kelkaj homoj, ne povas detrui tion, kio estas verko de Dio kaj ja eterna veraĵo. Formetante la akcesoraĵojn, ĝi preparas la vojon al unueco.

Por atingi la unuecon, la religioj devos kolektiĝi sur terenon neŭtralan sed komunan al ĉiuj; por tiu celo ĉiuj devos fari cedojn kaj pli aŭ malpli grandajn oferojn laŭ la multobleco de siaj apartaj dogmoj. Sed pro la principo de neŝanĝebleco, de ĉiuj konfesata, la iniciato de la cedo ne povos deveni de la oficiala kampo; anstataŭ deiri de supre, ĝi venos de malsupre pere de individua iniciato. De antaŭ kelka tempo, estiĝas ia malcentraliza movado, kies forto emas fariĝi nerezistebla. La principo de neŝanĝebleco, kiun la religioj ĝis nun rigardis kiel konservativan egidon, fariĝos detrua elemento, ĉar, dum la socio antaŭeniras, la kultoj, rigidiĝante, estos preterpasataj kaj poste sorbitaj de la fluo de l' progresigaj ideoj.

La neŝanĝebleco, anstataŭ esti forto, fariĝas ja kaŭzo de senfortigo kaj ruino al tiu, kiu ne sekvas la ĝeneralan movadon; ĝi rompas la unuecon, ĉar tiuj, volantaj antaŭeniri, disiĝas de tiuj, kiuj obstine volas resti senmovaj.

En la nuna stato de la opinio kaj de la scioj, la religio, kiu iam devos kolekti ĉiujn homojn sub sama standardo, nepre estos tiu, kiu plej bone kontentigos la racion kaj la verajn aspirojn de la koro kaj de la spirito; kiun la pozitiva scienco ne

kontraŭdiros pri iu ajn punkto; kiu, anstataŭ senmoviĝi, akompanos la homaron en ties progresa marŝo, neniam lasante, ke oni ĝin preterpasu; kiu estos nek ekskluzivisma nek maltolerema; kiu estos liberiganto de la inteligento, nur akceptante la rezonatan fidon; kies morala kredo estos la plej pura, la plej logika, la plej harmonia kun la sociaj bezonoj, la plej taŭga, fine, por fondi sur la Tero la regnon de Bono per la praktikado de la karitato kaj frateco universalaj.

Kio nutras la antagonismon inter la religioj, tio estas ilia komuna ideo, ke ĉiu havas sian apartan dion, kaj la pretendo, ke ĉi tiu sola estas la vera kaj la plej potenca, en konstanta batalo kontraŭ la alikultaj dioj kaj okupita per kontraŭstarado al ilia influo. Kiam la religioj konvinkiĝos pri tio, ke nur unu sola Dio ekzistas en la Universo, kaj ke li nepre estas tiu sama, kiun ili adoras sub la nomoj *Jehovo*, *Alaho* aŭ *Dio*; kiam ili interkonsentos pri liaj esencaj atributoj, tiam ili ekkomprenos, ke unusola estulo povas havi nur unu solan volon; ili donos al si la manojn, unuj al la aliaj, kiel servantoj de unu sama Majstro kaj filoj de unu sama Patro, kaj estos farintaj grandan paŝon al la unueco.

Veno de Elija

33. – Kaj liaj disĉiploj demandis lin, dirante: Kial do diras la skribistoj, ke Elija devas veni antaŭe? – Kaj li responde diris: Vere Elija venas antaŭe, kaj restarigos ĉion.

Sed mi diras al vi, ke Elija jam venis, kaj oni ne konis lin, sed faris al li ĉion, kion ili volis. Tiel ankaŭ la Filo de homo estas suferonta sub ili.

Tiam la disĉiploj komprenis, ke li parolis al ili pri Johano, la Baptisto. (Sankta Mateo, ĉap. XVII, par. 10 ĝis 13.)

34. – Elija jam revenis en la persono de Johano Baptisto. Lia nova veno estas eksplicite anoncita. Nu, ĉar li ne povas reveni alie, ol kun nova korpo, ni tial havas la formalan

konfirmon de la principo de la plureco de la ekzistadoj. (*La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉap. IV, n-ro 10.)

Anonco de la Konsolanto

35. – Se vi min amas, vi observos miajn ordonojn. – Kaj mi petos la Patron, kaj Li donos al vi alian Parakleton, por ke li restadu kun vi por ĉiam; – tiu estas la Spirito de la vero, kiun la mondo ne povas akcepti, ĉar ĝi lin ne vidas nek ekkonas; vi lin konas, ĉar li restadas kun vi kaj estos en vi. – Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kion mi diris al vi. (Sankta Johano, ĉap. XIV, par. 15, 16, 17, 28. – *La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉap. VI.)

36. – Tamen mi diras al vi la veron: Estas bone por vi, ke mi foriros; ĉar se mi ne foriros, la Parakleto ne venos al vi; sed se mi foriros, mi sendos lin al vi. – Kaj kiam li alvenos, li pruvos la mondon kulpa rilate pekon kaj justecon kaj juĝon: – rilate pekon, ĉar ili ne kredas al mi; – rilate justecon, ĉar mi foriras al la Patro, kaj vi jam ne rigardas min; – rilate juĝon, ĉar la estro de ĉi tiu mondo estas juĝita.

Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi, sed vi ne povas ĝin nun elporti.

Tamen kiam venos li, la Spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron; ĉar li parolos ne de si mem; sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos; kaj li anoncos al vi venontajn aferojn.

Li gloros min, ĉar li ricevos el miaj kaj anoncos al vi. (Sankta Johano, ĉap. XVI, par. 7 ĝis 14.)

37. – Nekontesteble, tiu antaŭdiro estas unu el la plej gravaj el la religia vidpunkto, ĉar ĝi malplej dube pravas, ke *Jesuo ne diris ĉion, kion li havis por diri*, tial, ke oni lin ne komprenus, eĉ ne liaj apostoloj mem, ĉar ja al ĉi tiuj li sin turnis. Se al ili li estus doninta sekretan instruadon, ili estus ĝin menciintaj en la Evangelio. Se li ne ĉion diris al siaj apostoloj, ties posteuloj ne povis scii pli ol ili kaj do eble trompiĝis koncerne la sencon de liaj vortoj, misinterpretis liajn pensojn, ofte vualitajn sub la parabola formo. La religioj fonditaj sur la

Evangelio ne povas do sin prezenti kiel posedantojn de la tuta vero, ĉar li rezervis al si la postan kompletigon de sia instruado. Ilia principo de neŝanĝebleco estas neo de la vortoj mem de la Kristo.

Li anoncas, sub la nomo *Konsolanto kaj Spirito de Vero*, tiun, kiu *instruos ĉiujn aferojn kaj rememorigos tion*, kion li diris. Nekompleta, do, estis lia instruado. Krom tio, li antaŭvidas, ke oni ne nur forgesos sed ankaŭ kripligos tion, kion li diris, ĉar la Spirito de Vero devos ĉion *rememorigi* kaj, interkonsente kun Elija, *restarigi ĉiujn aferojn*, tio estas, ilin akordigi kun la vera penso de Jesuo.

38. – Kiam devos veni tiu nova revelacianto? Estas evidente, ke, se en la tempo kiam Jesuo predikis, la homoj ne kapablis kompreni la aferojn, kiujn li ankoraŭ havis por diri, do ne post nur kelke da jaroj ili povus akiri la por tio necesajn lumojn. Por la kompreno de certaj partoj de la Evangelio, escepte de la moralaj instruoj, nepre necesis konoj, kiujn nur la progreso de la sciencoj povus havigi kaj kiuj devus rezulti el la agado de l' tempo kaj de multaj generacioj. Se do la nova Mesio venus ne longe post la Kristo, li ankaŭ trovus tre malfavoran terenon kaj farus ne pli, ol la Kristo mem. Nu, depost la Kristo ĝis la nunaj tagoj ekestis neniu granda revelacio, kiu kompletigus la Evangelion kaj klarigus ties obskurajn partojn, kio estas certa signo, ke ankoraŭ ne aperis la Sendito.

39. – Kiu estas tiu Sendito? Dirante: “Kaj mi petos la Patron kaj Li donos al vi alian Parakleton”, Jesuo klare indikas, ke ne li estos tiu Konsolanto, ĉar kontraŭe li estus dirinta: “Mi revenos por kompletigi tion, kion mi instruis al vi.” Poste li aldonas: “*Por ke li restadu kun vi por ĉiam, kaj li estos*

en vi.” ĉi tio certe ne estis aludo al enkarniĝinta individuo, kiu ne povas resti por ĉiam kun ni, kaj des malpli esti en ni; sed temas ja pri ia doktrino, kiu, post kiam oni ĝin asimilos, povos efektive esti por ĉiam en ni. *La Konsolanto* estas do, laŭ la penso de Jesuo, la personigo de ia superege konsolanta doktrino, kies inspiranto nepre estas la *Spirito de Vero*.

40. – *Spiritismo* plenumas, kiel estas demonstrite, ĉiujn kondiĉojn de la *Konsolanto* promesita de Jesuo. Ĝi ne estas individua doktrino, ia homa koncepto: neniuj povas sin deklari ties kreinto. Ĝi estas frukto de la kolektiva instruado de la Spiritoj, kiun direktas la Spirito de Vero. Nenion ĝi forprenas de la Evangelio, kiun ĝi, kontraŭe, kompletigas kaj klarigas. Helpe de la leĝoj, kiujn ĝi malkaŝas, kunigitaj kun tiuj de la Scienco, ĝi komprenebligas tion, kio estis nekomprenebla, kaj akceptigas la eblecon de tio, kion nekredemo rigardis neakceptebla. Ĝi havis siajn pionirojn kaj siajn profetojn, kiuj antaŭsentis ĝian alvenon. Per sia moraliga forto, ĝi preparas la regnon de bono sur la Tero.

La doktrino de Moseo, ne kompleta, restis limigita inter la juda popolo; tiu de Jesuo, pli kompleta, disvastiĝis sur la tuta Tero, per la Kristanismo, sed ne konvertis la tutan mondon; Spiritismo, ankoraŭ pli kompleta, kun radikoj en ĉiuj kredoj, konvertos la homaron.¹

41. – Dirante al siaj apostoloj: “Poste venos alia, kiu instruos al vi tion, kion mi nun ne povas instrui”, Jesuo ja

¹ Ĉiuj doktrinoj, filozofiaj kaj politikaj, portas la nomon de sia fondinto. Oni diras: Moseismo, Kristanismo, Mahometismo, Budhismo, Kartezianismo, Fourierismo, Sansimonismo, ktp. La vorto *Spiritismo*, kontraŭe, memorigas neniun personon; ĝi enhavas ĝeneralan ideon samtempe indikantan la karakteron kaj la multoblan fonton de la doktrino.

proklamis la necesecon de la reenkarniĝo. Kiel tiuj homoj povus profiti el pli kompleta instruado, kiu nur poste estos donata; kiel ili kapabliĝos por ĝin kompreni, se ili ne denove vivos? Jesuo estus dirinta ion nekonsekvencan, se, laŭ la vulgara doktrino, la estontaj homoj devus esti novaj homoj, animoj elirintaj el la nenio okaze de sia naskiĝo. Konsentu, kontraŭe, ke la apostoloj kaj iliaj samtempuloj poste vivis; *ke ili ankoraŭ nuntempe revivas*, kaj tial estas pravigita la promeso de Jesuo. Ilia inteligento, disvolviĝinte ĉe la kontakto kun la socia progreso, povas nun akcepti, kion ĝi antaŭe ne povis. Sen la reenkarniĝo, la promeso de Jesuo estus iluzia.

42. – Se oni dirus, ke tiu promeso plenumiĝis en la tago de Pentekosto, per la malsupreniro de la Sankta Spirito, oni povus respondi, ke la Sankta Spirito ilin inspiris, malfermis ilian menson, disvolvis en ili mediumajn kapablojn faciligontajn iliajn misiojn, sed nenion alian li instruis al ili krom tio, kion Jesuo jam estis instruinta, ĉar ĉe ili oni trovas neniun signon de ia speciala instruado. La Sankta Spirito do ne plenumis tion, kion Jesuo anoncis pri la Konsolanto: alie, la apostoloj estus dumvive klarigintaj tion, kio en la Evangelio ĝis nun restis obskura kaj kies memkontraŭdira interpreto naskis sennombrajn sektojn, kiuj dividis la Kristanisman ekde la unuaj jarcentoj.

Dua veno de la Kristo

43. – Tiam Jesuo diris al siaj disĉiploj: Se iu volas veni post mi, li abnegaci sin, kaj levu sian krucon, kaj sekvu min; – ĉar kiu volos savi sian animon, tiu ĝin perdos; kaj kiu perdos sian animon pro mi, tiu ĝin trovos.

Ĉar kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus sian animon? Aŭ kion homo donu interŝanĝe por sia animo? – ĉar la Filo de homo

venos en la gloro de sia Patro kun siaj anĝeloj, kaj tiam li redonos al ĉiu laŭ liaj faroj.

Vere mi diras al vi: Inter la ĉi tie starantaj estas iuj, kiuj neniel gustumos morton, antaŭ ol ili vidos la Filon de homo venantan en sia regno. (Sankta Mateo, ĉap. XVI, par. 24 ĝis 28.)

44. – Kaj la ĉefpastro stariĝis en la mezo, kaj demandis Jesuon, dirante: ĉu vi respondas nenion? kion atestas ĉi tiuj kontraŭ vi? – Sed li silentadis kaj respondis nenion. Denove la ĉefpastro demandis lin, kaj diris al li: ĉu vi estas la Kristo, la Filo de la Benato? – Kaj Jesuo diris: Mi estas; kaj vi vidos la Filon de homo, sidantan dekstre de la Potenco kaj venantan kun la nuboj de la ĉielo.

Kaj la ĉefpastro disŝiris siajn vestojn, kaj diris: Pro kio ni plu bezonas atestantojn? (Sankta Marko, ĉap. XIV, par. 60 ĝis 63.)

45. – Jesuo anoncas sian duan venon, sed li ne diras, ke li revenos sur la Teron kun karna korpo, nek ke li estos la personigo de la *Konsolanto*. Li sin prezentas, kiel venonton en Spirito, en la gloro de sia Patro, por juĝi meriton kaj malmeriton kaj doni al ĉiu laŭ liaj faroj, kiam la tempo estos alveninta.

Ĉi tiuj vortoj: “Inter la ĉi tie starantaj estas iuj, kiuj neniel gustumos morton, antaŭ ol ili vidos la Filon de homo venantan en sia regno” ŝajnas ia kontraŭdiro, ĉar certe estas, ke li ne venis dum ankoraŭ vivis iu ajn el tiuj ĉeestantaj. Jesuo tamen ne povus trompiĝi ĉe tiela antaŭvido, kaj ĉefe rilate al io siatempa kaj lin persone koncernanta. Necesas unue demandi, ĉu liajn vortojn oni ĉiam fidele esprimis. Oni povas ĝin pridubi, se oni konsideras, ke li nenion skribis; ke tiujn vortojn oni registris nur post lia morto; ke la saman paroladon ĉiu evangeliisto preskaŭ ĉiam reproduktis per malsamaj vortoj, kio evidente pravas, ke ili ne prezentis laŭvortajn esprimojn de Jesuo. Krom tio, estas verŝajne, ke la senco suferis ŝanĝojn, trapasante sinsekvajn tradukojn.

Aliflanke, estas sendube, ke se Jesuo dirus ĉion, kion li povus, li sin esprimus pri ĉiuj aferoj en klara kaj preciza

maniero, kiu ebligus nenian eraron, kiel li ja faris koncerne la moralajn principojn, dum li devis vualigi sian penson koncerne temojn, kies profundigon li trovis nekonvena. Konvinkite, ke la generacio, al kiu ili apartenas, devos atesti lian anoncon, la apostoloj estis instigitaj interpreti la penson de Jesuo laŭ sia ideo kaj sekve ĝin redaktis el siatempa vidpunkto, en maniero pli absoluta ol kiel li mem eble farus. Kiel ajn ĝi estas, la afero efektive ne okazis tiel, kiel ili supozis.

46. – La granda kaj grava leĝo de reenkarriĝo estis ĉefa punkto, kiun Jesuo ne povis disvolvi, ĉar la tiamaj homoj ne estis sufiĉe preparitaj por tia klaso de ideoj kaj por ties sekvoj. Sed li starigis ĝian principon, kiel li ja faris rilate al ĉiuj ceteraj aferoj. La leĝo de reenkarriĝo, kiun Spiritismo nuntempe studas kaj diskonigas, estas la ŝlosilo por kompreno de multaj lokoj de la Evangelio, kiuj sen ĝi ŝajnus efektivaj sensencaĵoj. Ĉe tiu leĝo oni trovas racian klarigon de la ĉi-supraj vortoj, se oni ilin akceptas kiel laŭtekstajn. Ĉar oni ne povas ilin apliki al la apostoloj, estas do evidente, ke ili rilatas al la estonta regno de la Kristo, tio estas, al la tempo, kiam lia doktrino, pli ĝuste komprenata, estos universala leĝo. Lia diro, ke *iuj ĉi tie starantaj* vidos lian venon, povus havi nur tiun sencon, nome ke ili denove vivos en tiu tempo. Sed la judoj imagis, ke ili vidos ĉion, kion Jesuo anoncis, kaj ili prenis laŭlitere liajn alegoriajn esprimojn.

Cetere, kelkaj el liaj antaŭdiroj siatempe plenumiĝis, kiel la ruiniĝo de Jerusalemo, la ĝin sekvantaj malfeliĉegoj kaj la disiĝo de la judoj. Sed Jesuo pli foren etendis sian vidon, kaj, parolante pri la nuno, li ofte aludis la estontecon.

Antaŭsignoj

47. – Kaj vi aŭdos pri militoj kaj famoj de militoj. Zorgu, ke vi ne maltrankviliĝu; ĉar tio devas okazi; sed ankoraŭ ne estas la fino. – ĉar leviĝos nacio kontraŭ nacion, kaj regno kontraŭ regnon; kaj estos malsatoj kaj tertremoj en diversaj lokoj. – Sed ĉio tio estas komenco de suferoj. (Sankta Mateo, ĉap. XXIV, par. 6, 7, 8.)

48. – Kaj frato transdonos fraton al morto, kaj patro filon; kaj leviĝos gefiloj kontraŭ gepatroj kaj mortigos ilin. – Kaj vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo; sed kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita. (Sankta Marko, ĉap. XIII, par. 12, 13.)

49. – Kiam do vi vidos la abomenindaĵon de dezerteco, pri kiu estas dirite de la profeto Daniel, starantan sur la sankta loko (la leganto komprenu), – tiam tiuj, kiuj estas en Judujo, forkuru al la montoj;¹ – kiu estas sur la tegmento, tiu ne malsupreniru, por preni ion el sia domo; – kaj kiu estas sur la kampo, tiu ne revenu, por preni sian mantelon. – Sed ve al la gravedulinoj kaj al la suĉigantinoj en tiuj tagoj! – Kaj preĝu, ke via forkurado ne estu en vintro nek en sabato; – ĉar tiam estos granda aflikto tia, kia ne estis de la komenco de la mondo ĝis nun, nek iam estos. – Kaj se tiuj tagoj ne estus mallongigitaj, neniu karno estus savita; sed pro la elektitoj tiuj tagoj estos mallongigitaj. (Sankta Mateo, ĉap. XXIV, par. 15 ĝis 22.)

50. – Sed tuj post la aflikto de tiuj tagoj la suno mallumiĝos, kaj la luno ne donos sian lumon, kaj la steloj falos el la ĉielo, kaj la potenco de la ĉielo ŝanceliĝos;

Kaj tiam aperos sur la ĉielo la signo de la Filo de homo, kaj tiam ploros ĉiuj gentoj de la tero, kaj oni vidos la Filon de homo, venantan en la nuboj de la ĉielo kun potenco kaj granda gloro.

¹ Ĉi tiu esprimo: *abomenindaĵo de dezerteco* ne nur malhavas sencon sed ankaŭ ridindas. La traduko de Osterwald tekstas: “La abomenindaĵo, *kiu kaŭzas dezertecon*”, kio estas tre malsama. Tiel la senco fariĝas perfekte klara, ĉar oni komprenas, ke la *abomenindaĵoj* devas kuntreni la *dezertecon*, kiel punon. Kiam, diras Jesuo, la abomenindaĵo venos en la sanktan lokon, tiam ankaŭ tien venos la dezerteco, kaj tio estos signo, ke la tempoj estas proksimaj.

Kaj li elsendos siajn anĝelojn kun granda sono de trumpeto, kaj ili kolektos liajn elektitojn el la kvar ventoj, el limo ĝis limo de la ĉielo.

De la figarbo lernu ĝian parabolon: kiam ĝia branĉo jam moliĝis kaj aperigas foliojn, tiam vi scias, ke la somero estas proksima; – tiel same vi, kiam vi vidus ĉion tion, tiam sciu, ke li estas proksima, ĉe la pordoj.

Vere mi diras al vi: ĉi tiu generacio ne forpasos, ĝis ĉio tio plenumiĝos. (Sankta Mateo, ĉap. XXIV, par. 29 ĝis 34.)

Sed kiel la tagoj de Noa, tiel estos la alesto de la Filo de homo. – ĉar kiel dum la tagoj, kiuj estis antaŭ la diluvo, oni manĝis kaj trinkis, edziĝis kaj edziniĝis, ĝis la tago, kiam Noa eniris en la arkeon. – kaj oni ne eksciis, ĝis la diluvo venis kaj forprenis ĉiujn; tiel estos la alesto de la Filo de homo. (Sankta Mateo, ĉap. XXIV, par. 37, 38, 39.)

51. – Sed pri tiu tago kaj la horo scias neniu, eĉ ne la anĝeloj en la ĉielo, nek la Filo, sed nur la Patro. (Sankta Marko, ĉap. XIII, par. 32.)

52. – Vere, vere, mi diras al vi, ke vi ploras kaj lamentos, sed la mondo ĝojos; vi estos malĝojaj, sed via malĝojo fariĝos ĝojo. – Virino, kiam ŝi akuŝas, havas malĝojon, ĉar ŝia horo venis; sed kiam ŝi naskis la infaneton, ŝi jam ne memoras sian doloregon, pro ĝojo, ĉar homo naskiĝis en la mondon. – Vi do ankaŭ havas nun malĝojon; sed mi revidos vin, kaj via koro ĝojos, kaj neniu forprenos de vi vian ĝojon. (Sankta Johano, ĉap. XVI, par. 20, 21, 22.)

53. – Kaj multaj falsaj profetoj leviĝos, kaj forlogos multajn. – Kaj pro la multobligo de maljusteco, la amo de la plimulto malvarmiĝos. – Sed kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita. – Kaj ĉi tiu evangelio de la regno estos predikita tra la tuta mondo, kiel atesto al ĉiuj nacioj; kaj tiam venos la fino. (Sankta Mateo, ĉap. XXIV, par. 11 ĝis 14.)

54. – Evidente alegoria estas tiu bildo de la fino de l' tempoj, same kiel la pliparto de la ceteraj prezentitaj de Jesuo. Pro sia energio, la imagoj en ĝi entenataj celas impresi ankorau krudajn inteligentojn. Por frapi tiujn ne subtilajn mensojn, necesis viglaj pentraĵoj kun vivaj koloroj. Jesuo precipe sin turnis al la popolo, al malpli kleraj homoj, nekapablaj kompreni metafizikajn abstraktaĵojn kaj kapti la delikatecon de la

formoj. Por atingi la koron, li devis paroli al la okuloj per materialaj signoj, kaj al la oreloj per la viglo de la lingvaĵo.

Kiel natura sekvo de tiu stato de la spiritoj, la superega plejpotenculo ne povus manifestiĝi, laŭ la tiama kredo, krom per eksterordinaraj, supernaturaj faktoj; ju pli neeblaj ĉi tiuj montriĝus, des pli facile oni ilin rigardus probablaj.

La Filo de homo venanta sur la nuboj, kun granda majesto, ĉirkaŭita de siaj anĝeloj kaj ĉe sonado de trumpetoj ŝajnis al ili multe pli impona ol ia estulo nur portanta moralan povon. Ĝuste tial la judoj, kiuj kiel Mesion atendis ian surteran reĝon, pli potencan ol ĉiuj ceteraj reĝoj, destinitan meti ilian nacion sur la unuan rangon kaj relevi la tronon de David kaj Salomono, ne volis tiun rekoni en la humila filo de ĉarpentisto, havanta nenian moralan aŭtoritatecon.

Tamen tiu malriĉa proleto el Judujo fariĝis la plej granda inter la grandaj; li submetis al sia suvereneco pli da regnoj ol kiel faris la plej povaj potenculoj; nur per sia parolo kaj helpe de kelke da mizeraj fiŝistoj li revoluciis la mondon, kaj ĝuste al li la judoj ŝuldos sian rehonoriĝon. Li do diris la veron, kiam al ĉi tiu demando de Pilato: “ĉu vi do estas reĝo?”, li respondis: “Vi ĉi tion diras”.

55. – Rimarkindas, ke ĉe la antikvuloj la tertremoj kaj la obskurigo de la Suno estis nepra akompano al ĉiuj okazaĵoj kaj al ĉiuj sinistraj aŭguroj; ni ilin renkontas ĉe la morto de Jesuo, ĉe tiu de Cezaro kaj ĉe sennombraj aliaj cirkonstancoj en la historio de paganismo. Se tiaj fenomenoj estus okazintaj tiel ofte kiel oni ilin rakontas, ŝajnus neeble, ke la homoj konservis en sia tradicio nenian rememoron pri ili. Ĉi tie aldoniĝas la *falo de steloj el la ĉielo*, kiel atesto al la estontaj generacioj, ke temas pri nura fikcio, ĉar oni nun scias, ke la steloj ne povas fali.

56. – Tamen, sub tiuj alegorioj kaŝiĝas grandaj veraĵoj. Unue estas la ĉiaspecaj malfeliĉegoj, kiuj frapos la homaron kaj ĝin pereigos, malfeliĉegoj rezultontaj el la ekstrema batalo inter bono kaj malbono, inter fido kaj nekredemo, inter progresigaj kaj malprogresigaj ideoj. Due estas la disvastigo, sur la tuta Tero, de la Evangelio *restarigita en ties unuatempa pureco*. Poste, la regno de bono, kiu estos la regno de paco kaj frateco universalaj kaj kiu naskiĝos el la kodo de la evangelia morallo praktikata de ĉiuj popoloj. Ĉi tiu estos vere la regno de Jesuo, ĉar li direktos ĝian establon, kaj la homoj vivos sub la egido de lia leĝo. Ĝi estos la regno de feliĉo, ĉar, li diras, – “post la tagoj de aflikto venos la tagoj de ĝojo”.

57. – Kiam plenumiĝos tiaj aferoj? “Neniu ĝin scias, diras Jesuo, *eĉ ne la Filo*”. Sed kiam venos la horo, la homoj estos avertitaj per antaŭsignoj, kiuj tamen montriĝos nek en la Suno, nek en la steloj, sed ja en la socia stato kaj en fenomenoj de naturo prefere moralaj ol fizikaj, kiujn oni parte povas dedukti el liaj aludoj.

Tutcerte tiu ŝanĝo ne povus estiĝi dum la vivo de la apostoloj, ĉar alie Jesuo ne povus ne scii ĝian horon. Cetere unu tia transformiĝo ne povus plenumiĝi en kelke da jaroj. Li tamen parolas al ili pri ĝi, kvazaŭ ili devus ĉeesti ĝin; tiel estas ĉar ili ja povos revivi dum tiu epoko kaj mem kunlabori por ĝia efektiviĝo. Li jen parolas pri la proksima sorto de Jerusalemo, jen prenas tiun faktan kiel komparpunkton antaŭ la estonteco.

58. – Kiam li antaŭdiras sian novan venon kaj diras: “Kiam la Evangelio estos predikita tra la tuta Tero, tiam venos la fino”, ĉu Jesuo anoncas la finon de la mondo?

Ne estas racie supozoj, ke Dio detruus la mondon ĝuste tiam, kiam ĝi enirus la vojon de la moralaj progreso per la

praktikado de la evangeliaj instruoj. Cetere, nenio en la vortoj de la Kristo indikas universalan detruon, kiu, en tiaj kondiĉoj, ne praviĝus.

Ĉar la ĝenerala praktikado de la Evangelio alportos plibonigon al la morala stato de la homoj, ĝi per si mem alportos la regnon de bono kaj rezultigos la falon de la regno de malbono. Estas do la fino de *malnova mondo*, nome tiu regata de antaŭjuĝoj, orgojlo, egoismo, fanatikeco, nekredemo, profitamo kaj ĉiuj malbonaj pasioj, kion la Kristo aludas, kiam li diras: “Kiam la Evangelio estos predikita tra la tuta Tero, tiam venos la fino.” Sed tiu fino alportos ian lukton, kaj ĝuste el tiu lukto fontos la malbonoj, kiujn li antaŭvidis.

Viaj filoj kaj filinoj profetos

59. – Kaj en la lasta tempo, diras Dio, Mi elverŝos Mian spiriton sur ĉiun karnon; kaj viaj filoj kaj viaj filinoj profetos; kaj viaj junuloj havos viziojn, kaj viaj maljunuloj havos sonĝojn. – Kaj eĉ sur Miajn sklavojn kaj Miajn sklavinojn en tiu tempo Mi elverŝos Mian spiriton, kaj ili profetos. (La Agoj, ĉap. II, par. 17, 18. – Joel, ĉap. II, par. 28, 29.)

60. – Se oni konsideras la nunan staton de la fizika kaj de la morala mondoj, la tendencojn, aspirojn kaj antaŭsentojn de la amasoj, la dekadencan de la malnovaj ideoj, kiuj de antaŭ jarcento vane luktas kontraŭ la novaj ideoj, oni ne povas dubi, ke prepariĝas nova ordo de aferoj kaj ke la malnova mondo venas al sia fino.

Se, nun, prenante en kalkulon la alegorian formon de iuj bildoj, kaj esplorante la profundan sencon de la vortoj de Jesuo, oni komparas la nuntempan situacion kun la tempoj, kiujn li priskribis kiel signontajn la epokon de renoviĝo, oni ne povas ne konsenti, ke multaj el liaj antaŭdiroj plenumiĝas en la hodiaŭaj tagoj; el tio oni devas konkludi, ke ni atingas la

anoncitajn tempojn, kion konfirmas, en ĉiuj lokoj de la globo, la manifestiĝantaj Spiritoj.

61. – Kiel vidite (ĉap. I, n-ro 32), koincide kun aliaj cirkonstancoj, la apero de Spiritismo realigas unu el la plej gravaj antaŭdiroj de Jesuo, pro la influo, kiun ĝi nepre devas havi sur la ideojn. Cetere, ĝi estas klare anoncita en *La Agoj de la Apostoloj*: “Kaj en la lasta tempo, diras Dio, Mi elverŝos Mian spiriton sur ĉiun karnon; Kaj viaj filoj kaj viaj filinoj profetos.”

Ĝi estas la senduba antaŭdiro pri la vulgarigo de la mediumeco, kiu nuntempe montriĝas ĉe personoj de ĉiuj aĝoj, de ambaŭ seksoj kaj de ĉiuj klasoj; ĝi sekve estas la antaŭdiro pri la universala manifestiĝo de la Spiritoj, ĉar sen Spiritoj ne ekzistus mediumoj. Tio, kiel dirite, ekestos en *la lasta tempo*; nu, ĉar ni ne venis al la fino de l' mondo, sed, kontraŭe, al la epoko de ĝia regeneriĝo, tial ni devas jene kompreni tiujn vortojn: la lasta tempo de la finiĝanta mondo. (*La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉap. XXI.)

Lasta juĝo

62. – Sed kiam la Filo de homo venos en sia gloro, kaj ĉiuj anĝeloj kun li, tiam li sidos sur la trono de sia gloro; – kaj antaŭ li kolektiĝos ĉiuj nacioj, kaj li apartigos ilin unu de alia, kiel paŝtisto apartigas la ŝafojn for de la kaproj; – kaj li starigos la ŝafojn dekstre de li, kaj la kaprojn maldekstre. – Tiam diros la Reĝo al tiuj, kiuj staras dekstre de li: Venu, vi benataj de mia Patro, ktp. (Sankta Mateo, ĉap. XXV, par. 31 ĝis 46. – *La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉap. XV.)

63. – Ĉar la bono devas regi sur la Tero, necesas, ke el ĝi estu elpelitaj la Spiritoj, kiuj, hardiĝinte en la malbono, povas porti malordon al ĝi. Dio konsentis al ili la tempon necesan por ilia pliboniĝo; sed ĉar estas veninta la tempo,

kiam la globo devas altiĝi en la hierarkio de la mondoj per la morala progreso de ĝiaj loĝantoj, tial la restado sur ĝi, kiel loĝantoj, estos malpermesata tiel al Spiritoj, kiel ankaŭ al enkarnuloj, ne profitintaj la instruojn, kiujn ili povis tie ricevi. Ili estos ekzilitaj en malsuperajn mondojn, kiel iam estis, en la Teron, tiuj apartenintaj al la adama raso, dum ilin anstataŭos pli bonaj Spiritoj. Tiun apartigon, direktotan de Jesuo, figuras jenaj vortoj pri la lasta juĝo: “La bonaj sidos dekstre de mi, kaj la malbonaj maldekstre.” (Ĉap. XI, n-roj 31 kaj sekvantaj.)

64. – La doktrino pri ia lasta, unusola kaj universala juĝo, kiu por ĉiam metus finon al la homaro, kaŭzas abomenon al la racio, en tiu senco, ke ĝi implicas la neaktivecon de Dio dum la eterna tempo antaŭa al la kreado de la Tero kaj dum la eterneco, kiu sekvos ties detruon. Oni al si demandas, por kio do utilis la Suno, la Luno kaj la steloj, kiuj, laŭ la Genezo, estis faritaj por lumigi nian mondon? Oni miregas, ke tiel supermezura verko estis starigita por tiel mallonga tempo kaj profite al estaĵoj anticipe destinitaj, en ties pliparto, al eternaj turmentoj.

65. – El materia vidpunkto, la ideo de unusola juĝo estus, ĝis certa grado, akceptebla por tiuj indiferentaj antaŭ la ekzistopravo de la aferoj, kiam oni kredis, ke la tuta homaro estas limigita sur la Tero kaj ke ĉio en la Universo estis farita por ties loĝantoj. Ĝi tamen estas neakceptebla, kiam oni scias, ke ekzistas miliardoj da mondoj, kiuj ĉiamigas la homarojn dum la eterneco kaj el kiuj la Tero montriĝas kiel malpli rimarkinda, neperceptebla punkto.

Oni vidas, per ĉi tiu sola fakto, ke Jesuo pravis, dirante al siaj disĉiploj: “Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi, sed vi ne povas ĝin nun elporti”, ĉar la progreso de la sciencoj estis

nepre necesa por ĝusta interpreto de iuj el liaj vortoj. Sendube la apostoloj, Sankta Paŭlo kaj la unuaj disĉiploj estus tute alie starigintaj certajn dogmojn, se ili disponus la sciojn astronomiajn, geologiajn, fizikajn, kemiajn, fiziologiajn kaj psikologiajn, kiujn oni nuntempe posedas. Tial Jesuo prokrastis la kompletigon de siaj instruoj kaj anoncis, ke ĉiuj aferoj nepre estos restarigitaj.

66. – El morala vidpunkto, senapelacia kaj definitiva juĝo estas neakordigebla kun la senfina boneco de la Kreinto, kiun Jesuo senĉese prezentas al ni kiel bonan Patron, ĉiam lasantan nefermitan vojon al pento kaj ĉiam pretan etendi siajn brakojn al erarinta filo. Se Jesuo komprenus la juĝon laŭ tiu senco, li forneus siajn proprajn vortojn.

Krom tio, se la lasta juĝo devus surprize kapti virojn dum iliaj ordinaraj laboroj kaj virinojn en graveda stato, oni al si demandas, kiacele Dio, kiu faras nenion senutilan kaj maljustan, naskigus infanojn kaj *kreus novajn animojn* en tiu ekstrema momento, ĉe la fatala fino de la homaro, por ilin submeti al juĝo ĉe la eliro el la patrina ventro, antaŭ ol ili havus konscion pri si mem, kiam aliaj ricevis milojn da jaroj por sin mem rekoni? Kiun flankon, dekstran aŭ maldekstran, irus tiuj animoj, kiuj ankoraŭ ne estas bonaj, nek malbonaj, kaj al kiuj restus de tiam fermita ĉia plua vojo de progreso, ĉar ja ne plu ekzistus la homaro? (Ĉap. II, n-ro 19.)

Kiuj kontentiĝas per similaj kredoj, tiuj ilin konservu, ĉar tion ili rajtas kaj neniu povas ĝin malpermesi; sed ili ne rigardu malbona, ke ne ĉiuj ilin konsentas.

67. – La juĝo per la vojo de elmigrado, kiel ĉi-supre difinita (n-ro 63), estas laŭracia; ĝi sidas sur la plej rigora justeco, ĉar ĝi por ĉiam lasas al la Spirito ties liberan volon; ĝi

havigas privilegion al neniuj; al ĉiuj siaj kreitoj, senescepte, Dio havigas saman liberecon de agado por progresi; eĉ la detruo de iu mondo, kuntrenanta la detruon de la korpo, nenia interrompo kaŭzos al la progressa marŝo de la Spirito. Tiaj estas la sekvoj de la plureco de la mondoj kaj de la plureco de la ekzistadoj.

Laŭ tiu interpreto, ne ĝusta estas la nomo *lasta juĝo*, ĉar la Spiritoj trapasas similajn juĝojn ĉe ĉiu renoviĝo de l' mondoj, kiujn ili loĝas, ĝis ili estos atingintaj difinitan gradon da perfekteco. Ne estas do, ĝustadire, *lasta juĝo*, sed ja *ĝeneralaj juĝoj* en ĉiuj epokoj de renoviĝo, parta aŭ tuta, de la loĝantaro de la mondoj, pro kiuj fariĝas la elmigroj kaj elmigroj de Spiritoj.

ĈAPITRO XVIII

LA TEMPOJ ESTAS VENINTAJ

Signoj de l' tempoj. – La nova generacio

Signoj de l' tempoj

1. – Ĉie estas al ni dirate, ke venis jam la tempoj difinitaj de Dio, en kiuj grandaj eventoj efektivigoj por la regenerado de la homaro. En kiu senco oni komprenu tiujn profetajn vortojn? Por la nekredantoj ili havas nenian gravecon; en iliaj okuloj ili nur prezentas la esprimon de infaneca, senfundamenta kredo. Por la plimulto el la kredantoj ili havas ion mistikan kaj supernaturan, kio al ili ŝajnas aŭguri la renverson de la leĝoj de la Naturo. Ambaŭ interpretoj estas eraraj; la unua pro tio, ke ĝi implicas la neadon de la Providenco; la dua tial, ke tiuj vortoj ne anoncas perturbon al la leĝoj de la Naturo sed ja ilian plenumiĝon.

2. – Ĉio estas harmonio en la kreaĵaro; ĉio elmontratan antaŭzorgon, kiu ne malkonfirmiĝas tiel ĉe la plej malgrandaj, kiel ankaŭ ĉe la plej grandaj aferoj. Ni devas do unue

formeti ĉian ideon pri kaprico, kiel ne akordigeblan kun la dia saĝeco. Due, se nia epoko estas difinita por la plenumiĝo de certaj aferoj, tiel estas ĉar ili havas sian pravon de ekzisto en la irado de la tuto.

Ĉe tio, ni diras, ke nia globo, kiel ĉio ekzistanta, estas submetita al la leĝo de progreso. Ĝi progresas fizike per la transformiĝo de la ĝin konsistigantaj elementoj, kaj morale per la puriĝo de la Spiritoj, enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj, kiuj ĝin loĝatigas. Ambaŭ progresoj disvolviĝas paralele, ĉar la perfekteco de loĝejo estas en proporcia rilato kun tiu de ties loĝanto. Fizike, la globo suferis transformiĝojn, kiujn la Scienco konstatis kaj kiuj ĝin sinsekve loĝebbligis por estuloj ĉiam pli kaj pli progresintaj. Morale, la homaro progresas per la disvolviĝo de la intelekto, de la morala sento kaj per la mildigo de la moroj. Samtempe kiel la globo pliboniĝas sub la agado de materiaj fortoj, la homoj samcele kunagas per la klopodoj de sia intelekto, bonigante nesalubrajn regionojn, faciligante la interkomunikojn kaj pliproduktivigante la teron.

Tiu duobla progreso estiĝas per du manieroj: unu, malrapida, laŭgrada kaj nesentebla; la alia, per subitaj ŝanĝoj, ĉe ĉiu el kiuj ekestas ia pli rapida supreniĝa movo, signanta, per frapantaj trajtoj, la progresajn periodojn de la homaro.

Tiuj movoj, subigitaj, *koncerne la detalojn*, al la homa libera volo, estas iasence fatalaj en sia tuto, ĉar ili estas regataj de leĝoj, same kiel tiuj okazantaj ĉe la ĝermado, kreskado kaj maturiĝado de la plantoj. Jen kial la progressa movo iafoje estas parta, tio estas, limigita al unu raso aŭ al unu lando, kaj aliffoje ĝenerala.

La progreso de la homaro efektiviĝas do laŭ iu leĝo. Nu, ĉar ĉiuj leĝoj de la Naturo estas eterna verko de la diaj saĝeco kaj antaŭzorgo, tial ĉia efiko de tiuj leĝoj rezultas el la volo de Dio, ne el akcidenta kaj kapricema volo, sed el neŝanĝema

volo. Kiam do la homaro estas matura por supreniri unu ŝtupon, oni povas diri, ke estas venintaj la tempoj difinitaj de Dio, same kiel oni ankaŭ povas diri, ke en tia sezono ili venas por la maturiĝo de l' fruktoj kaj ties rikolto.

3. – El la fakto, ke la progresa movo de la homaro estas neevitebla, ĉar ĝi troviĝas en la Naturo, ne sekvas, ke Dio indiferentas al ĝi kaj ke, stariginte leĝojn, li retiriĝis en senfarecon kaj lasis la aferojn iri solaj per si mem. Liaj leĝoj sendube estas eternaj kaj neŝanĝemaj ĝuste tial, ke lia volo mem estas eterna kaj konstanta kaj ke lia penso senĉese animas ĉiujn ekzistaĵojn. Lia penso, ĉion penetranta, estas la forto inteligenta kaj konstanta, kiu subtenas en ĉio la harmonion. Se tiu penso eĉ por momento ĉesus agadi, la Universo fariĝus kiel horloĝo sen reguliga pendolo. Dio do senĉese prizorgas la plenumiĝon de siaj leĝoj, kaj la Spiritoj, kiuj loĝatigas la spacon, estas liaj ministroj, ŝarĝitaj pri la detaloj laŭ komisioj respondaj al ilia grado da progreso.

4. – La Universo estas samtempe ia supermezura mekanismo, direktata de same nekalkulebla nombro da inteligentoj, ia senmezura regno, kie ĉiu inteligenta estulo havas sian parton en la agado, sub la okuloj de la suverena Mastro, kies unusola volo ĉie tenadas la *unuecon*. Sub la potenco de tiu vasta reguliga povo, ĉio moviĝas, ĉio funkcias en perfekta ordo. Kio al ni ŝajnas perturboj, tio estas partaj kaj izolitaj movoj, kiuj al ni aspektas neregulaj nur tial, ke limigita estas nia vidadado. Se el ili ni povus ĉirkaŭpreni la tuton, ni vidus, ke tiuj neregulaĵoj estas nur ŝajnaj kaj ja harmonias kun la tuto.

5. – La homaro ĝis nun plenumis nekontestebajn progresojn. Per sia intelekto, la homoj venis al rezultatoj neniam antaŭe atingitaj, el la vidpunkto de la sciencoj, de la artoj kaj de la materiala bonstato. Al ili ankoraŭ restas, por fari, senmezura progreso, nome: *igi regadi inter si karitaton, fratecon, solidarecon, kiuj al ili certigu la moralan bonstaton*. Ili ne povas tion atingi per siaj kredoj, nek per siaj malnoviĝintaj institucioj, restaĵoj de alia tempo, bonaj por certa epoko, sufiĉaj por ia transira stato, sed kiuj, doninte tion, kio al ili nur eblis, starus hodiaŭ kiel ia malhelpo. Necesas al la homoj jam ne nur la disvolviĝo de la intelekto, sed ja la altiĝo de la sentoj, kaj por tio necesas detruĝi ĉion, kio povas supereksciti en ili egoismon kaj orgojlon.

Tian periodon ili de nun eniros, kaj ĝi signos unu el la ĉefaj etapoj de la homaro. Tiu etapo, kiu nun ellaboriĝas, estas la necesa sekvo de la antaŭa stato, same kiel plenaĝo estas sekvo de junaĝo. Ĝi do povis esti antaŭvidita kaj antaŭdirita, kaj ja tial oni diras, ke estas venintaj la tempoj difinitaj de Dio.

6. – Sed, koncerne ĉi tempojn, ne temas pri ia parta ŝanĝo, ia renoviĝo limigita al unu regiono, al unu popolo, al unu raso. Temas ja pri universala movado, estiĝanta cele al la *moralprogreso*. La nova ordo de aferoj emas stariĝi, kaj la homoj, kiuj ĝin plej kontraŭas, por ĝi malgraŭvole laboras. La estonta generacio, liberiĝinta el la feĉoj de la malnova mondo kaj konsistanta el pli puraj elementoj, estos animata de ideoj kaj sentoj tre malsamaj ol tiuj de la nuna generacio, kiu forpasas per gigantaj paŝoj. La malnova mondo estos mortinta kaj pluvivos en la Historio, same kiel nun la tempoj de la Mezepoko kun siaj barbaraj moroj kaj superstiĉaj kredoj.

Cetere, ĉiuj scias, kiel ankoraŭ tute ne kontentiga estas la nuna ordo de la aferoj. Iel plenĝuinte la materialan bonsta-

ton, kiu estas produkto de la intelekto, oni venas al la kompreno, ke la sekvo de tiu bonstato povas troviĝi nur en la morala disvolviĝo. Ju pli oni antaŭeniras, des pli oni sentas, kio mankas, tamen ne povante ankoraŭ ĝin klare difini: tio estas la efiko de interna laboro elvolviĝanta por la regenerado; oni havas dezirojn, aspirojn, kiuj kvazaŭ estus la antaŭsento pri ia pli bona stato.

7. – Sed tiel radikala ŝanĝo, kiel tiu ellaboriĝanta, ne povas fariĝi sen skuoj. Neeviteble ekestas ia batalo inter la ideoj. De tiu konflikto nepre naskiĝos nedaŭraj perturboj, ĝis la tereno estos ebenigita kaj la ekvilibro restarigita. Estas do el la batalo inter la ideoj, ke aperos la gravaj, antaŭdiritaj eventoj, ne el kataklismoj aŭ pure materiaj katastrofoj. La ĝeneralaj kataklismoj estis sekvo de la stato de formiĝo de la Tero: *hodiaŭ ne plu skuiĝas la internaĵoj de la globo, sed ja tiuj de la homaro.*

8. – Se la Tero jam ne devas timi la ĝeneralajn kataklismojn, ĝi tamen ankoraŭ devas suferi periodajn transformiĝojn, kies kaŭzoj estas klarigitaj, el scienca vidpunkto, en la jenaj instruoj donitaj de du eminentaj Spiritoj:¹

“Ĉiu ĉiela korpo, krom la simplaj leĝoj, kiuj direktas la apartigon inter tagoj kaj noktoj, inter la sezonoj, ktp, spertas transformiĝojn, bezonantajn milojn da jarcentoj por plene efektiviĝi, sed kiuj, kiel la malpli daŭraj transformiĝoj, trapasas ĉiujn periodojn, ekde la komenca ĝis tiu kun maksimuma

¹ Ekstrato el du komunikaĵoj donitaj en la Pariza Societo kaj publikigitaj en la *Revue Spirite* de oktobro 1868, p. 313. Ili estas la korolario de tiuj de Galileo, prezentitaj en la Ĉapitro VI, kaj ia kompletigaĵo al la Ĉapitro IX pri la transformiĝoj de la globo.

efiko, post kiu ekestas la malkresko ĝis la ekstrema limo, por ke denove rekomenciĝu la paso tra la samaj fazoj.

“La homo ampleksas nur tiujn fazojn de relative mallonga daŭro, kies periodecon li povas konstati. Sed estas iuj ampleksantaj longdaŭrajn generaciojn, kaj eĉ sinsekvajn rasojn, kies efikoj, pro tio, aperas al li kun la ŝajno de noveco kaj spontaneco, dum, se lia rigardo povus retroiri kelkajn milojn da jarcentoj, li vidus, ke inter tiuj samaj efikoj kaj ties kaŭzoj estas ia interrespondeco, pri kiu li tute ne suspektis.

“En unu sama planeda sistemo, ĉiuj korpoj, kiuj al ĝi apartenas, reagas unuj sur la aliajn; en ĝi ĉiuj fizikaj influoj estas solidaraj, kaj el tiuj efikoj, kiujn vi nomas grandaj perturboj, estas neniuj, kiu ne rezultus el la komponanto de la influoj de la tuta sistemo.

“Mi iras pluen: mi diras, ke la planedaj sistemoj reagas, unuj sur la aliajn, pro la proksimeco aŭ malproksimeco rezultantaj el ilia translacia movo tra la miriadoj da sistemoj, kiuj konsistigas nian nebulozon. Kaj ankoraŭ pluen: mi asertas, ke nia nebulozo, – kiu kvazaŭ estas ia arkipelago en la senlimaĵo kaj kiu ankaŭ faras sian translacion tra la miriadoj da nebulozoj –, suferas la influon de tiuj, al kiuj ĝi alproksimiĝas.

“Tiel do nebulozoj reagas sur nebulozojn, sistemoj sur sistemojn, kaj same planedoj reagas sur planedojn, kiel ankaŭ la elementoj de ĉiu planedo reagas, unuj sur la aliajn, kaj tiel plu ĝis la atomo. De tio venas, en ĉiu mondo, lokaj aŭ ĝeneralaj transformiĝoj, kiuj ne ŝajnas perturboj tial, ĉar la mallongeco de la vivo permesas, ke oni nur vidu iliajn partajn efikojn.

“La organa materio ne povus eskapi tiujn influojn; la perturboj, kiujn ĝi spertas, povas do aliigi la fizikan staton de la vivantaj estaĵoj kaj estigi iujn el tiuj malsanoj, kiuj ĝenerale atakas plantojn, bestojn kaj homojn. Tiuj malsanoj, kiel ĉiuj

malfeliĉegoj, havigas al la homa intelekto ian stimulon, kiu ĝin pelas, per la premo de neceseco, al serĉado de rimedoj por ilin kontraŭbatali kaj al malkovro de naturaj leĝoj.

“Sed la organa materio siavice reagas sur la Spiriton, kiu, pro sia kontakto kaj intima ligiteco kun la materiaj elementoj, ankaŭ suferas influojn, kiuj ŝanĝas liajn inklinojn, tamen ne senigante lin je la libera volo, kiuj superekscitas aŭ moderigas lian aktivecon, kaj kiuj, ĝuste pro tio, kunhelpas por lia disvolviĝo. La bolado, kiu iafoje ekestas ĉe unu tuta popolo, inter la homoj de unu sama raso, ne estas io hazarda, nek rezulto de ia kaprico; ĝi havas sian kaŭzon en la leĝoj de la Naturo. Komence nekonscia kaj estanta nenio pli ol ia svaga deziro, ia nepreciza aspiro al io pli bona, ia bezono de ŝanĝo, tiu bolado manifestiĝas per ia surda agitiĝo, poste per agoj kondukantaj al sociaj transformiĝoj, kiuj, kredis ĝin, ankaŭ havas sian periodecon kiel la fizikaj transformiĝoj, ĉar ĉio sin interĉenas. Se la spirita vidado ne estus nebuligita de la materia vualo, vi vidus la fluidecajn fluojn, kiuj, kvazaŭ miloj da konduktantaj fadenoj, interligas la aferojn de la mondoj spirita kaj materia.

“Kiam oni diras al vi, ke la homaro alvenis al periodo de transformiĝo, kaj ke la Tero devas altiĝi en la hierarkio de l' mondoj, en tiuj vortoj vidu nenion mistikan sed, male, la plenumiĝon de unu el la grandaj, fatalaj leĝoj de la Universo, kontraŭ kiuj disrompiĝas ĉia homa malbonvolo.”

ARAGO.

9. – “Jes, certe, la homaro transformiĝas, same kiel ĝi jam transformiĝis en aliaj epokoj, kaj ĉiun transformiĝon signis ia krizo, kiu estas por la homa genro tio sama kiel la kreskokrizoj por la individuoj; krizoj ja surprizaj, doloraj, kiuj kuntrenas

generaciojn kaj instituciojn, sed kiujn ĉiam sekvas fazo de materiala kaj morala progreso.

La surtera homaro, veninte al unu el tiuj periodoj de kreskado, troviĝas, post preskaŭ unu jarcento, en plena laboro de transformiĝo, pro kio ĝi ĉiuflanke agitiĝas, kaptita de ia speco de febro kaj kvazaŭ pelata de nevidebla forto; kaj tiel estos ĝis ĝi reekvilibriĝos sur novaj bazoj. Tiam, kiu ĝin observos, trovos ĝin tre sanĝita laŭ ĝiaj moroj, ĝia karaktero, ĝiaj leĝoj, ĝiaj kredoj, unuvorte laŭ ĝia tuta socia stato.

“Estas afero, kiu, kvankam ĝi ŝajnos al vi stranga, tamen estas nepra vero: la mondo de la Spiritoj, kiu vin ĉirkaŭas, suferas la reefikon de ĉiuj skuegoj trafantaj la mondon de la enkarnuloj; mi eĉ asertas, ke ĝi aktive partoprenas en ili. Ĉi tio estas neniel surpriza al tiu, scianta, ke la Spiritoj apartenas al la homaro; ke ili venas de ĝi kaj al ĝi devas reveni, pro kio estas kompreneble, ke ili interesiĝu pri la movadoj, kiuj fariĝas ĉe la homoj. Estu do certaj pri tio, ke, kiam socia revolucio ekestas sur la Tero, ĝi ankaŭ skuas la nevideblan mondon, en kiu ĉiuj bonaj kaj malbonaj pasioj akriĝas, kiel ĉe vi. Tiam neesprimebla bolado ekregas inter la Spiritoj, kiuj ankoraŭ apartenas al via mondo kaj kiuj atendas la momenton por reeniri en ĝin.

“Al la agitiĝado de enkarnuloj kaj elkarnuloj iafaje, eĉ ofte, aldoniĝas la perturboj de la fizikaj elementoj, ĉar ĉio ja interligiĝas en la Naturo. Tiam, dum kelka tempo, ekestas ia ĝenerala konfuzo, kiu tamen pasas kvazaŭ uragano, post kiu la ĉielo resereniĝas kaj la homaro, restarigita sur novaj bazoj, penetra de novaj ideoj, ekpaŝas novan etapon de progreso.

“Ja en la nun komenciĝanta periodo oni vidos Spiritismon floradi kaj doni siajn fruktojn. Vi do laboras pli por la estonteco, ol por la nuno. Sed necesis, ke tiuj laboroj estu antaŭe preparitaj, ĉar ili malfermas la vojojn al la regenerado

per la unuecigo kaj raciigo de la kredoj. Feliĉaj estas tiuj, kiuj jam de nun profitas el ili, ĉar tiom da ĉagrenoj ili al si ŝparas, kiom da bonoj ili ĉerpos el tiuj laboroj.”

Doktoro BARRY.

10. – El tio supre dirita sekvas, ke pro sia translacia movo tra la spaco la ĉielaj korpoj havas, unuj sur la aliajn, pli aŭ malpli grandan influon, laŭ sia interproksimeco kaj respektiva pozicio; ke tiu influo povas esti momentan perturbon en iliaj konsistaj elementoj kaj aliigi la kondiĉojn de vivipoveco de iliaj loĝantoj; ke la reguleco de la movoj devas rezulti la periodan revenon de la samaj kaŭzoj kaj efikoj; ke, se la daŭro de certaj periodoj estas tre mallonga, por ke la homoj povu ilin percepti, tamen aliaj vidas pasi generaciojn kaj rasojn, kiuj ilin ne perceptas kaj al kiuj la stato de la aferoj ŝajnas normala. Male, la generacioj samtempaj kiel la transiĝo suferas ties frapon, kaj al ili ĉio ŝajnas ekster la ordinaraj leĝoj. Tiuj generacioj vidas supernaturan, miregindan, miraklecan kaŭzon en tio, kio efektive estas nenio alia ol la plenumiĝo de la leĝoj de la Naturo.

Se, pro la interĉeno kaj solidareco de kaŭzoj kaj efikoj, la periodoj de morala renoviĝo de la homaro – kiel ĉio kredigas – koincidas kun la fizikaj transformiĝoj de la globo, do tiujn periodojn povas akompani aŭ antaŭveni naturaj fenomenoj, eksterordinaraj por tiuj al ili ne kutimintaj; aŭ meteoroj, kiuj ŝajnas strangaj kaj manifestiĝas per akregeco kaj intenseco nenormalaj ĉe detruaj malfeliĉegoj. Tiuj malfeliĉegoj estas nek kaŭzo nek aŭguroj supernaturaj, sed ja sekvo de la ĝenerala movado, kiu fariĝas en la mondoj fizika kaj morala.

Antaŭdirante la eraon de renoviĝo malfermiĝonta por la homaro kaj difinonta la finon de la malnova mondo, Jesuo povis do diri, ke ĝi estos karakterizita per eksterordinaraj

fenomenoj, tertremoj, diversaj malfeliĉegoj, signoj en la ĉielo, kiuj estas nenio alia ol meteoroj tute ne troviĝantaj ekster la naturaj leĝoj. Sed la malklera vulgarularo vidis en tiuj vortoj la anoncon de miraklecaj faktoj.¹

11. – La antaŭvido de la progresaj movadoj de la homaro prezentas nenion surprizan al la senmateriigintaj estuloj, kiuj vidas la celon kien iras ĉiuj aferoj, kaj el kiuj kelkaj senpere konas la penson de Dio. Laŭ la partaj movadoj, ĉi tiuj estuloj vidas la tempon, kiam povos ekesti ia ĝenerala movado, same kiel oni antaŭe scias la tempon, kiun arbo bezonas por doni fruktojn, aŭ same kiel astronomoj kalkulas la epokon de ia astronomia fenomeno laŭ la tempo, kiun astro uzas por fari sian rivoluon.

12. – La homaro estas kolektiva estaĵo, ĉe kiu fariĝas samaj moralaj transformiĝoj, kiel ĉe ĉiu individuo, kun la diferenco, ke unuj plenumiĝas ĉiun jaron, kaj la aliaj ĉiun jarcenton. Oni sekvu la homaron en ties evoluoj tra la tempoj kaj oni vidos la vivon de la diversaj rasoj signita de periodoj, kiuj donas al ĉiu epoko ian apartan fizionomion.

13. – En du manieroj fariĝas, kiel ni jam diris, la progressa irado de la homaro: unu, – se oni konsideras la

¹ La terura epidemio, kiu, de 1866 ĝis 1868, disfalis la popolon de Maŭricio, estis antaŭirita de tiel eksterordinara kaj tiel abunda pluvo da falantaj steloj, en novembro 1866, ke ĝi timegigis la loĝantojn de tiu insulo. Ekde tiu momento, la malsano, kiu de antaŭ kelke da monatoj tre benigne disvastiĝis, aliĝis en vere detruantan malfeliĉegon. Tio estis senduba surĉiela signo, kaj eble ĉi-sence oni devas kompreni la esprimon – *steloj falantaj el la ĉielo*, pri kiu parolas la Evangelio, kiel unu el la signoj de l' tempoj (Detalaj informoj pri la Maŭricia epidemio: *Revue Spirite*, julio 1867, p. 208, novembro 1868, p.321).

sinsekvajn epokojn –, laŭgrada, malrapida, neperceptebla, kiu montriĝas per sinsekvaj pliboniĝoj ĉe moroj, leĝoj, kutimoj, pliboniĝoj rimarkeblaj nur kun la kreskado de l' tempo, kiel la ŝanĝoj estigataj de la akvofluoj sur la globsupraĵo; la alia, per relative subitaj movoj, similaj al tiuj de torento rompanta siajn digojn, movoj kiuj igas la homaron transpasi en kelke da jaroj la spacon, kiun ĝi laŭirus dum jarcentoj. Ĝi estas ia morala kataklismo, englutanta, en kelke da momentoj la instituciojn de la pasinteco, kaj kiun postvenas nova ordo de aferoj, kiu iom post iom stabiliĝas laŭgrade kiel sereneco reestiĝas por definitive regi.

Al tiu, kiu vivus sufiĉe longe por ĉirkaŭpreni la du fluojn de la nova fazo, ŝajnos, ke ia nova mondo eliris el la ruinoj de la malnova; la karaktero, la moroj, la kutimoj, ĉio estas ŝanĝita. Tiel estas, ĉar efektive novaj, aŭ pli bone, regeneriĝintaj homoj aperis; la ideoj, kiujn la forpasinta generacio portis kun si, cedis lokon al novaj ideoj ĉe la leviĝanta generacio.

14. – Maturiĝinte, la homaro havas novajn bezonojn, pli vastajn kaj pli altajn aspirojn; ĝi komprenas la malplenon de la ideoj, per kiuj ĝi estis lulata, la nesufiĉecon de siaj institucioj por fari ĝin feliĉa; ĝi ne plu trovas en la stato de la aferoj tiujn decajn plezurojn, al kiuj ĝi sentas sin altirata; tial ĝi formetas de si la vandojn kaj sin ĵetas, pelate de nekontraŭstarebla forto, al nekonataj bordoj serĉe de novaj, malpli limigitaj horizontoj.

Ĝuste al unu el tiuj periodoj de transformiĝo, aŭ, se oni volas, de *morala kreskado*, la homaro venis. El la adoleska ĝi venas en la plenkreskan aĝon. La pasinteco ne plu kontentigas siajn novajn aspirojn, siajn novajn bezonojn; ĝi jam ne povas esti kondukata per la samaj rimedoj; ĝi ne plu kontentiĝas per iluzioj kaj magiaĵoj: ĝia maturiĝinta racio postulas pli kernecajn nutraĵojn. La nuneco estas tro efemera; ĝi sentas, ke ĝia

destino estas pli vasta kaj ke la korpa vivo estas tro malvasta por tiun enteni; pro tio ĝi dronigas sian rigardon en la pasinteco kaj en la estonteco, por malkovri la misteron de sia ekzistado kaj tie ĉerpi konsolan certecon.

Kaj estas ĝuste en la momento, kiam ĝi troviĝas tro malvaste en la materia sfero, kiam ĝia intelekta vivo superbordiĝas, kiam en ĝi burĝonas la spirita sento, ke homoj, kiuj sin deklaras filozofoj, esperas ŝtopi la malplenon per la doktrinoj de negativismo kaj materialismo! Stranga anomalio! Tiuj samaj homoj, kiuj intencas peli ĝin antaŭen, klopodas por ĝin enfermi en la malvastan rondon de la materio, el kiu ĝi strebas eliri. Ili vualas al ĝi la vidon de la senfina vivo kaj, montrante al ili la tombon, ili asertas: *Nec plus ultra!*

15. – Kiu ajn meditis pri Spiritismo kaj ties sekvoj kaj ĝin ne limigas en la estigado de kelkaj fenomenoj, tiu komprenas, ke al la homaro ĝi malfermas novan vojon kaj senvualigas la horizontojn de la senfino. Inicante ĝin pri la misteroj de la nevidebla mondo, Spiritismo montras al ĝi ĝian veran rolon en la kreaĵaro, ja *eterne aktivan*, tiel en la spirita, kiel ankaŭ en la korpa stato. La homo jam ne iras blinde: li scias, de kie li venas, kien li iras kaj kial li troviĝas sur la Tero. La estonteco montriĝas al li en sia realeco, senigita je la antaŭjuĝoj de la sciencio kaj de la superstiĉo. Temas ne pri ia svaga espero, sed ja pri palpebla veraĵo, tiel certa por li kiel la alterno de tago kaj nokto. Li scias, ke lia esto ne limiĝas al kelkaj momentoj de ia efemera ekzistado; ke la spiritan vivon ne ĉesigas la morto; ke li jam vivis, ke li ankoraŭ revivos, kaj ke neniam li perdos el ĉio, kion li akiris en perfekteco per sia laboro; en siaj antaŭaj ekzistadoj li trovas la kialon de tio, kio li estas nun, kaj rekonas ke: *el tio, kia la homo hodiaŭ sin faris, li povas konkludi, kia li mem iam estos.*

16. – Kun la penso, ke la individuaj agado kaj kunlaborado por la ĝenerala laboro de la civilizo limiĝas al la nuna vivo, kaj ke oni antaŭe estis nenio kaj ja nenio estos poste, kio ja interesas la homon la posta progreso de la homaro? Per kio lin tuŝas, ke en la estonteco la popoloj estos pli bone regataj, pli feliĉaj, pli kleraj, pli bonaj, unuj al la aliaj? Ĉar nenium frukton li rikoltos el ĝi, ĉu tiu progreso ne tute perdiĝos por li? Kiel utilos al li labori por tiuj, venontaj post li, se tiujn li neniam konos, se ili estos novaj kreitoj, kiuj post ne longe revenos en la nenion? Sub la influo de la neado de l' individua estonteco, ĉio nepre reduktiĝas al la mizeraj proporcioj de la momento kaj de la personeco.

Sed, kontraŭe, kian amplekson donas al la homa penso la *certeco* pri la ĉiamdaŭreco de lia spirita memo! Kio pli racia, pli grandioza, pli inda je la Kreinto, ol tiu leĝo, laŭ kiu la spirita vivo kaj la materia vivo estas nenio alia krom du modaloj de ekzistado, kiuj alternas por la efektivigo de la progreso! Kio pli justa kaj pli konsola ol la ideo, ke samaj estuloj senĉese progresas, unue tra generacioj en unu sama mondo, poste de mondo al mondo ĝis la perfekteco, *sen rompo de kontinueco!* Ĉiuj agoj havas do ian celon, ĉar, laborante por ĉiuj, oni laboras por si, kaj reciproke, kaj tial neniam estas senfruktaj tiel la individua kiel la kolektiva progreso. El ambaŭ profitos la venontaj generacioj kaj individuoj, kiuj estos nenio alia ol la estintaj generacioj kaj individuoj en pli alta grado da progreso.

17. – La frateco estos la angulŝtono de la nova socia ordo; sed ne ekzistas frateco reala, solida, efektiva, se ĝi ne sidas sur neskiebla bazo. Tiu bazo estas la *fido*, ne la fido al tiaj aŭ aliaj apartaj dogmoj, kiuj ŝanĝiĝas kun la tempoj kaj popoloj kaj kiuj ĵetas ŝtonojn, unuj kontraŭ la aliajn, ĉar, sin reciproke anatemante, ili nutras la antagonismon; sed ja la fido

al la fundamentaj principoj, kiujn ĉiu persono povas akcepti: *Dio, la animo, la estonteco, la senfina, individua progreso, la ĉiameco de la rilatoj inter la estuloj*. Kiam ĉiuj homoj estos konvinkitaj, ke Dio estas unu sama por ĉiuj; ke tiu Dio, superege justa kaj bona, nenion maljustan povas deziri; ke la malbono venas de la homoj, ne de li, tiam ĉiuj sin rigardos filoj de unu sama Patro kaj sin reciproke donos la manojn.

Tia estas la fido, kiun Spiritismo havigas, kaj kiu de nun fariĝos la akso, ĉirkaŭ kiu turniĝos la homa gento, kiaj ajn estos la manieroj de adorado kaj la apartaj kredoj.

18. – La intelekta progreso farita ĝis nun, laŭ plej vastaj proporcioj, estas granda paŝo kaj signas la unuan fazon de la homaro, sed sola ĝi estas senpova por la homaron regeneri. Tiel longe dum orgojlo kaj egoismo lin potencos, la homo uzos sian inteligenton kaj siajn sciojn profite al siaj pasioj kaj personaj intereso, kaj ja tial li ilin utiligas por perfektigi rimedojn por malbonfari kaj pereigi siajn similulojn.

19. – Nur la morala progreso povas certigi al la homoj la surteran feliĉon, metante bridon al la malbonaj pasioj; nur tia progreso povas fari, ke inter la homoj regu konkordo, paco, frateco.

Ĝi sola faligos la interpopolajn barojn, forigos la antaŭjuĝojn pri kasto kaj silentigos la sektajn antagonismojn, instruante la homojn rigardi sin, unuj la aliajn, kiel fratojn, vokitajn al reciproka helpado kaj ne al tio, ke unuj vivu koste de la aliaj.

Estos ankoraŭ la morala progreso, tiam helpata de la progreso intelekta, kiu intermiksos la homojn en unu sama kredo bazita sur la eternaj veraĵoj, ne elvokantaj diskutadon kaj, ĝuste pro tio, akcepteblaj por ĉiuj.

La unueco de kredoj estos la plej potenca ligilo, la plej solida fundamento de la universala frateco, ĉiam rompata de la religiaj antagonismoj, kiuj dividas la popolojn kaj familiojn kaj kiuj igas vidi disidentojn kiel malamikojn nepre evitendajn, atakendajn, ekstermendajn, anstataŭ amindajn fratojn.

20. – Unu tia stato de aferoj kondiĉas radikalalan ŝangon en la sento de la amasoj, ĝeneralan progreson, kiu povos efektiviĝi nur ekster la rondo de la malvastaj kaj trivialaj ideoj, kiuj nutras egoismon. En diversaj epokoj, elitaj homoj provis peli la homaron sur tiun vojon, sed, ankoraŭ tro juna, la homaro restis surda, kaj iliaj instruoj estis kvazaŭ la bona grajno falinta sur ŝtonon.

Nuntempe, la homaro estas matura por ĵeti sian rigardon pli alten, ol kiel ĝi iam ajn faris, kaj tiel sin nutri per pli vastaj ideoj kaj kompreni, kion ĝi ne komprenis antaŭe.

La forpasanta generacio portos kun si siajn antaŭjuĝojn kaj erarojn; la generacio, kiu leviĝas, refreŝiĝinta ĉe pli pura fonto, penetrita de pli sanaj ideoj, komunikos al la mondo supreniran movon en la senco de la morala progreso, kiu signos novan fazon de la homaro.

21. – Tiu fazo jam montriĝas per sendubaj signoj, per klopodoj por utilaj reformoj, per grandaj kaj noblaj ideoj, kiuj elkrepuskiĝas kaj ektrovas resonon. Ja tial oni vidas fondiĝi amason da institucioj protektaj, civilizaj kaj emancipaj, sub la influo kaj pro la iniciato de homoj evidente antaŭdestinitaj por la regenera agado; ke la kriminalaj leĝoj kun ĉiu tago penetriĝas de pli humanaj sentoj. La antaŭjuĝoj pri raso malfortiĝas, la popoloj komencas sin reciproke rigardi kiel anojn de unu granda familio; pro la unuformeco kaj facileco de la rimedoj por siaj interŝanĝoj, la popoloj forigas la ilin apartigantajn

barojn, kaj el ĉiuj partoj de la mondo ili kolektiĝas en universalaĵ kunvenoj por la pacaĵ turniroj de la intelekto.

Sed al tiuj reformoj mankas ia bazo por disvolviĝi, kompletiĝi kaj plifirmiĝi; ia morala elano pli ĝenerala, por ke ili fruktiĝu kaj akceptiĝu de la amasoj. Temas pri nenio alia ol karakteriza signo de la epoko, ja preludo de tio, kio efektiviĝos en pli granda skalo, laŭmezure kiel la tereno fariĝos pli favora.

22. – Alia ne malpli karakteriza signo de la periodo, kiun ni nun eniras, estas la evidenta reago estiĝanta en la direkto al la spiritualismaj ideoj; ia instinkta abomeno manifestiĝas kontraŭ la ideoj materialismaj. La nekredemo, kiu iam posedis la amasojn, sensciajn aŭ klerajn, kaj igis ilin forpuŝi la formon kaj eĉ la fundon de ĉia kredo, ŝajne estis ia dormo, el kiu oni vekigis sentante la bezonon spiri pli vivigan aeron. Kaj tie, kie ekestis la vakuo, oni pretervole serĉas ion, ian apogpunkton, ian esperon.

23. – Se oni supozas la plimulton de la homoj penetrita de tiaj sentoj, oni povas facile imagi la ŝanĝojn, kiujn ili portas al la sociaj rilatoj: ilia devizo estos karitato, frateco, bonvolemo al ĉiuj, toleremo al ĉiuj kredoj. Al tia celo evidente iras la homaro, tio estas la objekto de ĝiaj aspiroj, de ĝiaj deziroj, kvankam ĝi neklare konscias la rimedojn por ties efektivigo. Ĝi provas, palpas, sed estas retenata de aktivaj kontraŭstaroj, aŭ de la inercia forto de antaŭjuĝoj, de kredoj stagnantaj kaj malinklinaj al progreso. Ja tiajn kontraŭstarojn necesas venki, kaj en tio konsistos la verko de la nova generacio; se oni sekvas la nunan fluon de la aferoj, oni rekonos, ke ĉio ŝajnas antaŭdestinita por malfermi al ĝi la vojon; ĝin favoros la duobla potenco de nombro kaj de ideoj, kaj aldone la sperto de la pasinteco.

24. – La nova generacio irados do al la realigo de ĉiuj homamaj ideoj konformaj al la progresgrado, kiun ĝi estos atinginta. Kun sama strebado kaj plenumante siajn celojn, Spiritismo renkontiĝos kun la nova generacio sur la sama tereno. La progresemaj homoj trovos, en la spiritismaj ideoj, potencon levilon, kaj Spiritismo trovos, en la novaj homoj, spiritojn tute inklinajn ĝin akcepti. Ĉe tia stato de aferoj, kion povos fari tiuj, kiuj provos bari al ĝi la vojon?

25. – Ne Spiritismo estigas la socian renoviĝon, sed ja la matureco de la homaro faras tian renoviĝon ia neceso. Pro sia moraliga povo, pro siaj progresigaj tendencoj, pro la vasteco de siaj celoj, pro la ĝeneraleco de la demandoj, kiujn ĝi ampleksas, Spiritismo kapablas, pli ol ia ajn doktrino, helpi la regeneran movadon, kaj ja tial ĝi estas samtempa kiel tiu movado. Ĝi aperis ĝuste tiam, kiam ĝi povus esti utila, ĉar ankaŭ por ĝi la tempoj estas alvenintaj. Se ĝi venus pli frue, ĝi estus renkontinta nesupereblajn obstaklojn kaj neeviteble pereus, ĉar la homoj, kontentaj pri tio, kion ili havas, ankoraŭ ne sentus bezonon de tio, kion ĝi portas. Nuntempe, naskiĝinta kune kun la ideoj, kiuj fermentas, Spiritismo trovas la terenon preparita por ĝin akcepti; la spiritoj, lacaj de la dubo kaj necerteco, teruritaj de la abismo, kiu faŭkas antaŭ ili, ĝin akceptas kiel tabulon de savo kaj superegan konsolon.

26. – La nombro de la malfruiĝintoj sendube ankoraŭ estas granda, sed kion ili povos fari kontraŭ la leviĝanta ondo, krom nur ĵetadi al ĝi kelkajn ŝtonojn? Tiu ondo estas la generacio, kiu leviĝas, dum ili formalaperas kun la generacio, kiu kun ĉiu tago larĝapaŝe foriras. Sed ĝis la fino ili paŝo post paŝo defendos la terenon; okazos do neevitebla batalo, sed batalo neegala, ĉar ĝi estos batalo de la kadukiĝinta pasinteco,

kiu disŝiriĝas en ĉifonojn, kontraŭ la juneca estonteco; de stagno kontraŭ progreso; de la kreito kontraŭ la volo de Dio, ĉar ja estas venintaj la tempoj de li difinitaj.

La nova generacio

27. – Por ke la homoj estu feliĉaj sur la Tero, necesas ke ĝin loĝu nur bonaj Spiritoj, enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj, kiuj ekskluzive strebu al bono. Ĉar la tempo alvenis, tial granda migrado ekestas nun inter ĝiaj loĝantoj. Kiuj faras malbonon pro malbono, *ankoraŭ ne tuŝitaj de la sento de bono* kaj, pro tio, ne plu indaj je la transformiĝinta planedo, tiuj estos elpelitaj, ĉar ili sur ĝi denove kaŭzus malordon kaj konfuzitecon kaj obstaklus la progreson. Ili elpagos la harditecon de siaj koroj, unuj en malsuperaj mondoj, aliaj ĉe malprogresintaj surteraj rasoj, kiuj ja egalus tiajn mondojn, kaj al kiuj ili portos siajn akiritajn sciojn, plenumante la mision progresigi tiujn rasojn. Al ili substituiĝos pli bonaj Spiritoj, kiuj starigos inter si la regadon de justeco, paco kaj frateco.

Laŭ la Spiritoj, la Tero ne transformiĝos pere de ia kataklismo, kiu subite neniigus tutan generacion. La nuna generacio grade malaperos, kaj la nova sammaniere ĝin postvenos, sen ia ŝanĝo en la natura ordo de la aferoj.

Ĉio do ekstere fariĝos kiel ordinaro, kun la sola sed gravega diferenco, ke parto de la Spiritoj, kiuj enkarniĝadis sur la Tero, tie ne plu enkarniĝos. En ĉiu naskiĝonta infano, anstataŭ ke ĝin animus Spirito malprogresinta, inkлина al malbono, ja loĝos Spirito pli progresinta kaj *inklina al bono*.

Temas do ne pri nova enkorpora generacio, sed ja pri ia nova generacio da Spiritoj, kaj sendube en tiu senco Jesuo tion komprenis, kiam li diris: “Vere mi diras al vi: ĉi tiu generacio ne forpasos, antaŭ ol ĉio tio fariĝos.” Kiuj do

esperas vidi la transformiĝon okazanta per miraklecaj kaj supernaturaj fenomenoj, tiuj nepre elreviĝos.

28. – Transira estas la nuna epoko, intermiksiĝas la elementoj de la du generacioj. Starantaj sur la mezo, ni ĉeestas la foriron de unu kaj la alvenon de alia, kaj ĉiu jam montriĝas en la mondo kun siaj aparte propraj karakteroj.

Ambaŭ sin intersekvantaj generacioj havas ideojn kaj vidpunktojn inter si kontraŭajn. Laŭ la naturo de la moralaj dispozicioj, sed ĉefe laŭ la intuiciaj kaj denaskaj inklinoj, estas facile distingi, al kiu el ambaŭ apartenas ĉiu individuo.

Ĉar ĝin koncernas fondi la eraon de la morala progreso, la nova generacio distingiĝas per ordinare frumaturaj inteligento kaj prudento, ligitaj al *denaska* sento pri bono kaj al spiritualismaj kredoj, kio konstituas senduban signon de certa grado da *antaŭa* progreso. Ĝi ne konsistos ekskluzive el pleje superaj Spiritoj, sed el tiuj, kiuj, jam progresinte, inklinas asimili ĉiujn progresigajn ideojn kaj kapablas kunhelpi por la regenera movado.

Kio, male, igas distingi la malfruiĝintajn Spiritojn, tio estas unue la ribelo kontraŭ Dio per la rifuzo agnoski ian ajn povon superan al la homaro; la *instinkta* inklino al malnoblaj pasioj, al la nefrataj sentoj de egoismo, orgojlo, envio, ĵaluzo; fine la alkroĉiteco al ĉio materiala: sensamo, avideco, avareco.

Ja el tiuj malvirtoj la Tero devas esti elpurigita, per la forigo de tiuj, kiuj rifuzas sin rebonigi, ĉar tiuj malvirtoj estas nekonformaj al la regado de frateco kaj ĉar la virtuloj ĉiam suferos de ilia kontakto. Kiam la Tero liberiĝos de tiuj malvirtoj, la homoj irados sen malhelpoj al la pli bona estonteco, kiu al ili estas rezervita, eĉ en ĉi tiu mondo, kiel premio al ilia penado kaj persistado, dum ili atendas, ke ankoraŭ pli kompleta elpurigo al ili permesu eniron en superajn mondojn.

29. – Tiun elmigradon de Spiritoj oni ne tiel komprenu, ke ĉiuj Spiritoj malfruiĝintaj estos elpelitaj el la Tero en malsuperajn mondojn. Multaj, kontraŭe, al ĝi revenos, ĉar ili cedis al la forlogo de la cirkonstancoj kaj de la ekzemplo; ĉe tiuj la ŝelo estis pli malbona ol la kerno. Unu fojon elirinte el la influo de la materio kaj de la antaŭjuĝoj de la korpa mondo, ili plejparte rigardos la aferojn tute alie ol kiel dumvive, kaj pri tio ni havas multenombrajn ekzemplojn. Por tio, ili estas helpataj de bonvolemaj Spiritoj, kiuj pri ili interesiĝas kaj rapidas ilin instrui kaj al ili montri, kiel erara estas la vojo de ili sekvata. Per niaj preĝoj kaj admonoj, ni mem povas kunhelpi por ilia pliboniĝo, ĉar ekzistas ĉiama solidareco inter mortintoj kaj vivantoj.

Tre simpla estas la maniero, kiel fariĝas la transformiĝo, kaj, kiel vidate, ĝi estas tute morala kaj neniel okazas ekster la leĝoj de la Naturo.

30. – Tute egale, ĉu la novan generacion konsistigas novaj pli bonaj Spiritoj, ĉu malnovaj, kiuj pliboniĝis, la rezultato estas unu sama: se ili portas pli bonajn inklinojn, nepre estas renoviĝo. La enkarniĝintaj Spiritoj formas do du kategoriojn, laŭ siaj naturaj inklinoj: unuflanke, la malfruiĝintoj, kiuj foriras; aliflanke, la progresemaĵoj, kiuj alvenas. La stato de la moroj, de la socio ĉe iu popolo, ĉe iu raso, aŭ en la tuta mondo rilatos do kun tiu, el ambaŭ kategorioj, kiu superregos.

31. – Vulgara komparo ankoraŭ pli bone komprenigos, kio okazas tiurilate. Ni imagu reĝimenton, kiun plejmulte konsistigas tumultemaj, sendisciplinaj homoj: ili tie okazigos konstantan malordon, kiun la severeco de la punleĝaro devos, ofte kun malfacileco, subpremi. Tiaj homoj estas la plej fortaj, ĉar pli nombraj ol la ceteraj. Ili sin reciproke subtenas, kuraĝi-

gas kaj stimulas per la ekzemplo. La kelke da bonaj estigas nenian influon; iliaj konsiloj estas malŝatataj; ili suferas de la kontakto de la malbonaj, kiuj ilin mokadas kaj malbontraktas. Ĉu ne tia estas la bildo de la nuntempa socio?

Ni supozu, ke tiaj homoj, po unu, po dek, po cent, estas forigataj el la reĝimento kaj laŭgrade, egalnombre anstataŭigataj per bonaj soldatoj, eĉ per tiuj, kiuj, iam forigite, tamen sin korektis: post kelka tempo, ĉiam ankoraŭ ekzistos la sama reĝimento, sed transformita; bona ordo estos sekvinta la malordon. Tiel estiĝos la regenerita homaro.

32. – La grandaj kolektivaj foriroj havas kiel celon ne nur akceli la elmigrojn, sed ankaŭ pli rapide transformi la spiriton de la amaso, ĝin liberigante de la malbonaj influoj, kaj havigi pli da aŭtoritateco al la novaj ideoj.

Jen kial multaj, kiuj, malgraŭ siaj neperfektaĵoj, estas jam maturaj por la transformiĝo, foriras por refreŝiĝi ĉe pli pura fonto. Restante en la sama medio kaj sub la samaj influoj, ili persistus en siaj opinioj kaj en sia maniero rigardi la aferojn. Restado en la mondo de la Spiritoj sufiĉos por al ili malfermi la okulojn, ĉar tie ili vidos, kion ili ne povis vidi sur la Tero. Nekredanto, fanatikulo, absolutisto povos do reveni kun *denaskaj* ideoj pri fido, toleremo kaj libereco, kaj ĉe la reveno ili trovos la aferojn ŝanĝitaj kaj ricevos la influon de la nova medio, en kiu ili naskiĝos. Anstataŭ kontraŭstari, ili kunhelpos la novajn ideojn.

33. – La regenerado de la homaro ne nepre bezonas do la kompletan renoviĝon de la Spiritoj: sufiĉas ia ŝanĝo de iliaj moralaj dispozicioj. Tiu ŝanĝo fariĝas ĉe ĉiuj, kiuj inklinas al ĝi, se nur ili estas fortiritaj el la ruiniga influo de la mondo. Tiel,

ne ĉiam la revenantoj estas aliaj Spiritoj: ili ofte estas la samaj Spiritoj, tamen pensantaj kaj sentantaj alimaniere.

Kiam tiu pliboniĝo fariĝas izole kaj individue, ĝi pasas nerimarkate sen ia videbla influo sur la mondon. Tute alia estas la efiko, kiam ĝi fariĝas samtempe ĉe grandaj amasoj, ĉar tiam, laŭ ĝiaj proporcioj en unu generacio, la ideoj de unu popolo aŭ de unu raso povas profunde ŝanĝiĝi.

Tion oni preskaŭ ĉiam rimarkas post la grandaj skuoj, kiuj disfalĉas la loĝantarojn. La detruantaj malfeliĉegoj pereigas nur korpojn, ne atingas la Spiriton, intensigas la iro-reiran movadon inter la korpa kaj la spirita mondoj, sekve la progresan movadon de enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj Spiritoj. Rimarkindas, ke en ĉiuj epokoj de la Historio la grandajn sociajn krizojn sekvis erao de progreso.

34. – Nuntempe okazas unu el tiuj ĝeneralaj movadoj, kiuj devas estigi ian reformon de la homaro. La multeco de detruaj kaŭzoj prezentas karakterizan signon de la tempoj, ĉar ili devos akceli la burĝonadon de la novaj ĝermoj. Tio estas kvazaŭ folioj falantaj en aŭtuno, kiujn sekvos novaj folioj, plenaj de vivo, ĉar la homaro havas siajn sezonojn, same kiel la individuoj havas siajn aĝojn. La velkintaj folioj de la homaro falas pro la puŝoj kaj batoj de la vento, por renaskiĝi pli viglaj sub la sama vivoblovo, kiu ne estingiĝas sed ja puriĝas.

35. – Por materialisto, la detruantaj malfeliĉegoj estas senkompensaj plagoj, sen utilaj rezultatoj, ĉar ilia opinie *tiuj malfeliĉegoj por ĉiam neniigas la estulojn*. Sed por tiu, scianta, ke la morto nur detruas la envolvaĵon, tiaj malfeliĉegoj ne rezultigas la samajn sekvojn kaj ne kaŭzas al li la plej etan timon; li komprenas ties celon kaj ankaŭ scias, ke la homoj ne

pli perdas, mortante kunaj, ol mortante solaj, ĉar per unu aŭ alia maniero ili ĉiuj nepre tien iros.

La nekredantoj priridos tiajn aferojn kaj ilin rigardos kimeraj; sed, kion ajn ili diros, ili ne eskapos la komunan leĝon; kiel la ceteraj, ili siavice falos, kaj tiam kio ili fariĝos? Ili diras: *Nenio!* Ili tamen vivos, spite al si mem, kaj iam estos devigitaj malfermi siajn okulojn.

APENDICO
Spiritismo aŭ Spiritisma Doktrino

Fundamentaj instruoj

- Dio estas la superega intelekto, unua kaŭzo de ĉiuj estaĉoj. Dio estas eterna, neŝanĝema, nemateria, unika, ĉiopova, superege justa kaj bona.
- La Universo estas kreaĉo de Dio kaj ampleksas ĉiujn estaĉojn, raciajn kaj neraciajn, animitajn kaj neanimitajn, materiajn kaj nemateriajn.
- Krom la korpaj mondo, kie loĝas la enkarniĝintaj Spiritoj, t.e., la homoj, ekzistas la spirita mondo, loĝejo de la elkarniĝintaj Spiritoj.
- En la Universo estas aliaj loĝataj mondoj, kun estaĉoj en malsamaj gradoj de progreso: egalaj, pli evoluintaj kaj malpli evoluintaj ol la homoj.
- Ĉiuj naturaj leĝoj estas diaj, ĉar Dio estas ilia aŭtoro. Ili ampleksas tiel la fizikajn kiel ankaŭ la moralajn leĝojn.
- La homo estas Spirito enkarniĝinta en materia korpo. La perispirito estas la duonmateria envovaĉo, liganta la Spiriton al la fizika korpo.
- La Spiritoj estas la intelektaj estaĉoj de la kreaĉaro. Ili konsistigas la mondon de la Spiritoj, kiu antaŭekzistas kaj al ĉio postvivis.
- La Spiritoj estas kreitaj simplaj kaj senciaj. Ili progresas intelekte kaj morale, pasante de malsupera ordo al sekvanta supera ordo, ĝis la perfekteco, ĉe kiu ili ĝuas senŝanĝan feliĉon.
- La Spiritoj konservas sian individuecon antaŭ, dum kaj post ĉiu enkarniĝo.
- La Spiritoj reenkarniĝas tiom da fojoj, kiom necese por sia pli-boniĝo.
- La Spiritoj ĉiam progresas. En siaj multaj korpaj ekzistadoj ili povas ne antaŭeniri, sed ili neniam malprogresas. La rapideco de ilia intelekta kaj morala progreso dependas de iliaj klopodoj por atingi la perfektecon.

- *La Spiritoj apartenas al diversaj ordoj, laŭ la atingita grado de perfekteco: Puraj Spiritoj, kiuj atingis la maksimuman perfektecon; Bonaj Spiritoj, ĉe kiuj regas la deziro al bono; Neperfektaj Spiritoj, kiujn karakterizas neklereco deziro al malbono kaj mal-superaj pasioj.*
- *La rilatoj inter la Spiritoj kaj la homoj estas kontinuaj kaj ĉiam ekzistis. La Bonaj Spiritoj admonas nin al bono, kuraĝigas nin ĉe la provoj de la vivo kaj helpas nin elteni ĉi tiujn brave kaj rezignacie. La Malbonaj Spiritoj pelas nin en malbonon.*
- *Jesuo estas la gvidanto kaj la modelo por la tuta homaro, kaj la Doktrino, kiun Li instruis kaj praktikis, estas la plej pura esprimo de la leĝo de Dio.*
- *La moralo de la Kristo, enhavata en la Evangelio, estas la gvidilo por la firma evoluo de ĉiuj homoj, kaj ĝia praktikado estas la solvo por ĉiuj homaj problemoj kaj la celo atingota de la homaro.*
- *La homo havas liberan volon por agadi, sed li respondas pri la sekvoj de sia agado.*
- *La estonta vivo rezervas al la homoj punojn kaj ĝuojn konformajn al lia konduto, ĉu obeanta, ĉu malobeanta la Leĝon de Dio.*
- *La preĝo estas ago de adorado al Dio. Ĝi troviĝas en la natura leĝo kaj rezultas el sento kunnaskita kun la homo, same kiel denaska estas la ideo pri la ekzisto de la Kreinto.*
- *La preĝo plibonigas la homon. Tiu, kiu preĝas kun fervoro kaj fido, fariĝas pli forta kontraŭ la tentoj de la malbono, kaj Dio sendas al li bonajn Spiritojn por lin helpi. Tiu estas helpo neniam rifuzata, kiam petata sincere.*

Praktikado

- *La spiritismaj servoj estas tute senpagaj, kiel preskribas jena evangelia instruo: "Donace vi ricevis, donace vi donu".*
- *La praktikado de Spiritismo estas simpla, uzas nenian formon de ekstera kulto, laŭ tiu kristana instruo, ke Dio devas esti adorata en spirito kaj vero.*

- Spiritismo ne havas sacerdotojn, ne adoptas nek uzas en siaj kunvenoj kaj praktikoj: altarojn, ikonojn, portilojn, kandelojn, procesiojn, sakramentojn, indulgencojn, ornatojn, alkoholajn halucinogenajn trinkaĉojn, incensojn, tabakon, talismanojn, amuletojn, horoskopojn, kartdivenadon, piramidojn, kristalojn aŭ iajn ajn objektojn, ritarojn aŭ formojn de ekstera kulto.
- Spiritismo ne trudas siajn principojn. Ĝi invitas interesatojn en ĝia konado pasigi ĝiajn instruojn tra la kribrilo de la racio, antaŭ ol akcepti ilin.
- La mediumeco, kiu permesas al la Spiritoj komuniĝi kun la homoj, estas kapableco, kiun multaj personoj kunportas denaske, kaj kiu estas sendependa de ilia religio aŭ de la moralaj principoj, kiujn ili adoptas por sia vivo.
- Spiritisma praktikado de mediumeco estas nur tiu, kiu estas farata surbaze de la principoj de la Spiritisma Doktrino kaj laŭ la kristana moralo.
- Spiritismo respektas ĉiuj religiojn kaj doktrinojn, valorigas ĉiujn klopodojn por la bonfarado kaj laboras por la interfratiĝo kaj la paco inter ĉiuj popoloj, sendepende de raso, haŭtkoloro, nacieco, kredo, kultura aŭ socia niveloj. Ĝi krome rekonas, ke "la vere virta homo estas tiu, kiu praktikas la leĝon de justeco, amo kaj karito laŭ ties plej granda pureco".

"Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi, tia estas la leĝo.

"Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro".

(Parto el teksto titolita "Konatiĝu kun SPIRITISMO, Nova Erao por la Homaro", presfolio disdonata sub la aŭspicioj de la Internacia Spiritisma Konsilio).